

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
1-a numero



Januaro
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDIJNLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POŝTEKKONTO
162626

Nova gazeto

salutas vin. Ĝi estas speciala gazeto kaj ĝia celo estas: prezenti al la Esperantistoj fortigan kaj bongustan lingvan nutraĵon.

Post la kursoj oni ofte demandas: Kion ni faru nun? En la mallonga kurso oni ne povas ellerni la tutan lingvon. Post la kurso devas komenciĝi serioza studado: marŝado al la perfekteco en la lingvo.

Estas plej bone, se post la elementa kurso oni havas la okazon partopreni en bona daŭriga kurso. La Cseh-Instituto nun preparas sistemon por tia kurso kaj ĉi tiu gazeto deziras esti unu punkto en tiu sistemo. Kiel ĉe la elementa kurso, ankaŭ ĉi tie regas la efika moderna principo: per amuzo al la cerbo.

Ĉiu numero de LA PRAKTIKO enhavos valorajn lingvajn lecionojn por gramatika perfektigo. Amaso da interesaj tekstoj en facila stilo liveros la novajn vortojn, kiuj estas necesaj en la praktika vivo. Tiamaniere ĉiu parteto de LA PRAKTIKO servos kiel instruilo.

La novaĵojn de la Esperantista mondo ni

donos en bildoj kaj per riĉa paĝo de amuzaj kaj instruaj konkursoj ni instigos al aktiveco.

En la rubrikoj de „Redakciaj Respondoj” kaj „Lingvaj Konsiloj” ni volonte respondos je ĉiu demando rilatanta al nia lingvo kaj nia movado. Krom tio ni malfermos novajn, specialajn rubrikojn, kiuj donos instruon pri diversaj lingvaj aferoj.

LA PRAKTIKO estas la frukto de amo al la novaj Esperantistaj generacioj kaj se ili akceptos ĝin kun simila amo, se la nombro de la abonantoj estos sufiĉe granda, LA PRAKTIKO aperos baldaŭ pli ofte aŭ sur pli multaj paĝoj. — kontraŭ la nuna abonprezo.

Kiam ni alvokas vin, novajn kaj malnovajn, junajn kaj pli junajn geesperantistojn, al abono de la nova gazeto, ni esperas, ke LA PRAKTIKO, kiu hodiaŭ ekiras en la koloro de la optimismo kaj en la brilo de la radianta stelo, portos al vi ĉiuj ĝojon kaj helpon kaj estos grava faktoro en la baldaŭa venko de la grandioza verko de Zamenhof.

ANDREO CSEH.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS


Specimena numero kostas unu respondkuponon (0.15 ned. guld.). Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. ★ Kopirajto de la enhavo rezervita.

jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro. ★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro.

Aperas monate. Abonprezo por unu apero: 1.50 ned. guld. ★

LECIONO PRI LA FAMILIA ĈAMBRO.

1. planko
2. muro
3. kornico
4. plafono
5. lustro
6. stango por la kurtenoj
7. kurtenoj
8. fenestro
9. fenestra vitro
10. spegulo
11. horloĝo
12. antaŭtableto
13. florpoto
14. patrino
15. kudrotablo
16. libroŝranko
17. bildo, pentraĵo
18. kadro
19. kanapo
20. dorsa kuseno
21. radŝpinilo
22. tablo



23. tabla tapiŝo
24. lampo
25. tapiŝo
26. piedbenketo
27. apogseĝo
28. skribotablo
29. kandelingo
30. potfloro
31. patro
32. portreto
33. busto
34. kandelabro
35. piano
36. muziklibro
37. infano, knabino
38. pianoseĝo
39. pordo
40. porda kadro
41. forno
42. karbositelo
43. karbo
44. karbŝovelilo
45. ekrano

Kiun ĉambron vi vidas sur ĉi-tiu bildo? Mi vidas la familian ĉambron.

Kiu estas en la familia ĉambro? La ³¹, la ¹⁴ kaj la ³⁷, estas en ĝi. La ³¹ sidas antaŭ sia ²⁸. La ¹⁴ brodas, ŝi sidas proksime al la ⁶, por ke ŝi vidu pli bone. La ³⁷ ludas pianon; ŝi studas novan komponaĵon, sed ŝi tre ofte ludas malĝuste; pro tio ŝi ofte ripetas, por progresadi je bona ludado.

Nomu al mi la diversajn partojn de la ĉambro! Ili estas la kvar ², la ⁴ kaj la ¹.

Kiuj objektoj ornamas la murojn? Super la ¹⁹ pendas ¹⁷ kun ora ¹⁸. Inter la ⁶ troviĝas la ¹⁰, kiu bazas sur la ¹².

Antaŭ la fenestroj pendas ⁷, kiuj estas fiksitaj al la ⁶. Maledkestre estas ³³, sub ĝi ³².

Kiamaniere vi pasigas viajn vesperojn? La ²⁴ sur la tablo estas eklumigata. Kiam la ³¹ estas fininta la legadon de la gazetoj, li laŭtleĝas aŭ kantas kanton. La patrino kudras kaj flikas, ŝia malgranda filino helpas ŝin. Kiam ni havas gastojn, la ⁵ estas eklumigata.

Kio staras sur la antaŭtableto? Tie ¹¹ staras; ĝi estas tre multvalora, ĉar ni heredis ĝin de nia praavo.

Al kio servas la libroŝranko? La patro tie konservas siajn librojn, kiuj ĉiam estas ordigitaj tre precize. Oni enmetas la librojn en ŝrankon, por ke ili ne malpurigu.

DEMANDOJ.

Kies portreto pendas sur la muro? Kiuj tabloj estas en la ĉambro? Kien oni povas sidiĝi en la ĉambro? Kie staras la potfloroj? Kie staras la radŝpinilo? Kio kuŝas sur la kanapo? Kie staras piedbenketo? Kiom da piedoj havas la tablo antaŭ la kanapo, la seĝo antaŭ la piano? Kiu objekto ŝirmas nin kontraŭ la varmeĝo de l' forno? Kio estas super la piano? Pri kio la patro estas okupata? Kion la patrino faras? Kio kuŝas kaj kio staras sur la diversaj tabloj?

Ĉi tiu leciono estas prenita el la bonega praktika lernolibro: THORA GOLDSCHMIDT, BILDOTABULOJ, eldonita de la firma Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig (Salomonstrasse 15). La libro sur 104 paĝoj pritrakta ĉiujn temojn de la praktika vivo en similaj bildoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO kaj ĝia prezo estas:

kartonita nur 1.90 ned. guld.
bindita " 2.20 " "

Al niaj abonantoj afrankita sendo!

FARU LA KONTROLON!

(Praktika gramatika leciono)

En la kurso vi lernis la verbojn kun *-anta, -inta, -onta*. Ĉu vi bone komprenis ilin? Rigardu:

trinkanta homo = homo, kiu trinkas,

trinkinta " = " " trinkis,

trinkonta " = " " trinkos.

En alia (adverba) formo:

trinkonte = kiam mi estas trinkonta, antaŭ la trinko,

trinkante = dum la trinko,

trinkinte = post la trinko.

Ekzemplo: *manĝinte mi dormis* = post la manĝo mi dormis.

Nun vi faru la kontrolon! Legu la sekvantan rakonton kaj en la malplenajn lokojn enmetu la gravan literon, kiu mankas: a, i aŭ o. En la venonta numero de LA PRAKTIKO ni publikigos la kompletajn vortojn kaj vi povos ilin kompari kun via propra laboro.

La potenco de la virino. (Popola rakonto).

Johano Korenŝu estis malriĉa vilaĝano. Li havis dometon star...ntan ĉe la vilaĝfino, unu tre maljunan mort...ntan hundon, du nudajn, ĉiujn harojn perd...ntajn katojn, unu senĉese kikerik...ntan kokon, dek-tri kokinojn lam...ntajn kaj unu senhalte parol...ntan, energian kaj kapricoplenan edzinon. La kompatinda Johano devis ĉiam labori kaj aŭdi la malbelajn vortojn de la ĉiam diproĉ...nta edzino.

Estis vintra mateno kun forte blov...nta malvarma vento. Johano, lev...nte sin el la lito, komencis labori sid...nte apud la forno, kiu estis varmaga pro la ligno en ĝi brul...nta. En momento aperis la edzino alte ten...nte la balailon kaj kriis al Johano: „Sentaŭga idioto, ne sidadu ĉe la forno, sed iru rapide al la kampo apud la arbaro kaj fosu kanaleton ĉirkaŭ la kampo. Kuir...nte la manĝaĵojn mi iros kaj faros kontrolon kaj se vi ne estos bone labor...nta, vi ne ricevos manĝon.”

Aŭd...nte la tondr...ntajn vortojn kaj vid...nte la fulm...ntajn okulojn de la adzino Johano Korenŝu ekstaris kaj pren...nte la fosilon li ekiris al la malproksime kuŝ...nta kampo. La teron kovris tre dika neĝo fal...nta dum la nokto. Sed Johano, pens...nte pri la okaz...nta kontrolo, komencis labori.

Sonor...ntaj glitveturiloj preterpasis kun vojaĝ...ntoj vest...ntaj sin per peltoj bone ten...ntaj la varmon. Kun kompatio ili rigardadis la malfeliĉan labor...nton. Hazarde preterpasis ankauŭ unu amiko de Johano, la riĉa vilaĝano Georgo Bonŝanc, hered...nto de bela bieno. Salut...nte Johanon li demandis: „Kion vi faras ĉi tie?” Respond...nte Johano rakontis al Georgo pri la ordon...nta kaj kontrol...nta edzino. Kaj la du amikoj parolis:

— Johano, vi estas azeno!

— Kiel?

— Ĉar vi plenumas ĉiun kapricon de via edzino. Tiam virinon oni devas puni.

— Kiel?

— Rigardu, rigardu! Fosu ĉi tie grandan kavon. Fos...nte la kavon kovru ĝin per branĉoj kaj per neĝo. Tion far...nte atendu la ven...ntan kaj vin bat...ntan edzinon. Ŝi venos, konstat...nte, ke vi ne laboris, ŝi furiozos, bat...nte vin ŝi kuros al vi kaj kur...nte ŝi falos en la kavon. Perd...nte la edzinon vi estos libera kaj feliĉa homo.

Aŭd...nte kaj kompren...nte la genian planon Johano dankis kaj eklaboris. La penso pri la est...nta sklaveco kaj est...nta libereco donis al li multan forton. Georgo ĝoj...nte pro la helpo al la sufer...nta amiko fajf...nte foriris.

Far...nte ĉion laŭ la konsilo de la forir...nta Georgo, Johano pacience atendis. Li baldaŭ ekvidis la figuron de la ven...nta edzino. La edzino, vid...nte, ke ne estas kanaleteto, blasfem...nte kaj riproĉ...nte kuris al la trankvile star...nta Johano. Paŝ...nte sur la branĉojn ŝi falis en la kavon. Johano iris hejmen. Sur la

vojo li longe aŭdis la voĉon de la enfal...nta kaj krieg...nta edzino.

Ating...nte la hejmon Johano manĝis unu metron da kolbaso kaj trinkis unu litron da vino. Manĝ...nte kaj trink...nte li ekkuŝis. Dorm...nte li sonĝis pri la mort...nta, laste spir...nta edzino. Matene, lev...nte sin kaj fum...nte sian pipon li rememoris pri la edzino. Hav...nte molan koron li komencis bedaŭri la aferon de la pas...nta tago kaj decidis savi la edzinon. Forir...nte el la domo li trinkis du glasojn da brando kaj prenis dikan ŝnuron por eltiri la edzinon.

Ir...nte al la kampo li aŭdis korŝir...ntajn helpkriojn. Paŝ...nte al la rando de la kavo li vidis: en la kavo estis du enfal...nta kaj star...ntaj personoj, la edzino kaj — la diablo. La diablo ekvid...nte Johanon, kun trem...nta voĉo diris: „Bona homo, ŝi vi havas koron, savu min de ĉi tiu terure turment...nta virino. Mi faros vin riĉa kaj feliĉa.”

Johano, kompat...nte la malfeliĉan, dum la nokto enfal...ntan diablon kaj jet...nte al li la ŝnuron, eliris lin. La haroj sur tiu flanko de la diablo, ĉe kiu la edzino staris, estis jam grizaj. La diablo, deŝir...nte kelkajn harojn de sur sia brusto etendis ilin al Johano, dir...nte:

— Mia kara sav...nto, prenu ĉi tiujn harojn. Nun mi eniros en la filinon de la reĝo kaj faros ŝin malsana. Neniu kuracisto kaj neniu medikamento povos helpi al la sufer...nta reĝidino. Aŭd...nte tion vi iru al la palaco kaj kun la permeso de la malĝoj...nta reĝo en la ĉambro de lia kuŝ...nta filino metu la harojn en la fajron dir...nte: ĉoĝohojoŝo-ŝojohoĝoĉo. Aŭd...nte tion mi tuj eliros el la reĝidino kaj la reĝo donos al vi riĉajn donacojn.

Ĉio okazis tiel. La plej grandaj doktoroj, rigard...ntaj la reĝidion, ne povis helpi. Tiam venis Johano Korenŝu. Met...nte la harojn en la fajron kaj dir...nte la magiajn vortojn: ĉoĝohojoŝo-ŝojohoĝoĉo li ekvidis antaŭ si la diablon, elven...ntan el la reĝidino. La diablo per la fingro minac...nte diris al li:

— Johano Korenŝu, nun vi estas riĉa kaj feliĉa. Sed ne kuraĝu en alia fojo simile kuraci, ĉar mi tuj mortigos vin.

Ricev...nte multajn donacojn Johano iris hejmen.

En la sekv...nta tago la diablo eniris en la filinon de la reĝo de la najbara lando. Oni invitis la plej famajn doktorojn, oni aĉetis la plej multekostajn kuracilojn. Sed ĉio restis vana. Tiam la reĝo aŭdis, ke Johano Korenŝu, viv...nta en la najbara lando, jam kuracis la filinon de la kolego. Skrib...nte belan leteron li invitis Johanon.

Ricev...nte la leteron Johano respondis, ke li estas jam sufiĉe riĉa. Sed la reĝo forte koler...nte sendis soldatojn kaj tiuj met...nte katenojn sur la manojn de Johano kondukis lin al la palaco.

En la ĉambro de la kuŝ...nta princino la reĝo diris al la trem...nta Johano:

— Se post unu minuto vi ne estos kurac...nta mian filinon, post du minutoj vi estos pend...nta.

Johano, trov...nte en la poŝo du rest...ntajn haretojn de la diablo, metis ilin en la fajron kaj balbut...nte diris: ĉoĝohojoŝo-ŝojohoĝoĉo.

En momento elsaltis la diablo el la princino kaj lev...nte la manon diris al Johano:


— Mizera Korenŝu, ĉu vi forgesis mian ordonon? Post unu minuto vi estos mort...nta.

Sed Johano subite trovis la sav...ntan ideon. Tuŝ...nte la sultron de la diablo li flustris al li:

— Parolu mallaŭte, ĉar mia edzino estas en la najbara ĉambro. Aŭd...nte tion la diablo tuj forkuris kun haroj suprenstar...ntaj. Li rekuris en la inferon, kie la edzinoj ne estas pli malbonaj, ol sur la tero.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



FREDERIKO LA GRANDA (1712—1786)



prusa reĝo distingis foje unu oficiron per ordeno. La oficiro aperis antaŭ la reĝo kaj hezitis akcepti la ordenon, dirante:

— Reĝa Moŝto, mi povas akcepti ordenon, nur se mi meritas ĝin sur la batal-kampo.

Frederiko kun kolero respondis:

— Ne estu freneza, sed akceptu ĝin, ĉar por vi sola mi ne povas fari militon.

★

MAC MAHON (1808—1893)



franca marŝalo kaj respublikala prezidanto vizitis foje militistan malsanejon. Starante ĉe la lito de tifa malsanulo, li diris:

— Tifo? Terura malsano! Oni mortas pro ĝi aŭ restas idioto dum la tuta vivo. Bedaŭrinde mi bone konas ĉi tiun malsanon. Ankaŭ mi trapasis ĝin en Algerio!

★

MORITZ GOTTLIEB SAPHIR (1795—1858)


stis fama humoristo en Vieno. Foje unu onhumora germano luis ĉe li ĉambron. ed pro ia kaŭzo ili malpacigiĝis. Tiam la ermano sendis al Saphir leteron kun nur unu vorto: „Judiciu“.

Saphir tuj komprenis la signifon de la vorto: „Jud..... ich..... zieh..... um“.

Li tuj respondis, same per nur unu vorto: „Officiu“. Tio signifis: „O..... zieh..... zieh..... um“.

★

MARK TWAIN (1835—1910)



la fama amerika humoristo, estis foje en societo, kie oni diskutis pri la disiĝo de geedzoj. Fine unu sinjorino diris:

— Se la viroj estus pli inteligentaj, multaj disiĝoj ne okazus.

— Sed ankaŭ multaj edziĝoj ne okazus, — respondis tuj Mark Twain.

ALFONZO XIII-a



la estinta reĝo hispana, foje post soldata ribelo persone volis konvinkiĝi pri la fideleco de siaj trupoj. Li eliris do kaj alparolis kelkajn soldatojn, kiuj antaŭ kazerno deĵoris kiel gardistoj.

— Ĉu vi scias, kiu estas mi? — demandis la reĝo de unu soldato — Mi estas via plej alta superulo. Kion farus vi, se oni nun ordon-us al vi, ke vi pafu min?

— Mi obeus, Majesto! — respondis tuj la soldato.

Aliaj tri soldatoj donis la saman respon-don. Sed la kvina soldato respondis, ke li ne pafus.

— Brava knabo vi estas, — diris la reĝo kontente, — fine mi trovas unu viron, kiu metas la vivon de sia reĝo super la ordonojn. Kaj nun diru al mi, kial vi ne pafus?

— Ĉar mi estas trumpetisto, Majesto! — respondis la soldato.

★

SELMA LAGERLÖF,



la mondfama sveda verkistino, en la lernejo ne tre sukcesis en la skribaj taskoj, ĉar ŝia instruistaro diris foje pri ŝi teruran juĝon:

— Fraŭlino Lagerlöf ne scias svede skribi.

Kiam la lerneja sonorilo kunvokis la lernantaron, oni vane atendis fraŭlinon Lagerlöf. Fine ŝiaj kamaradinoj post multa serĉado trovis ŝin en la vestejo. Tie ŝi en angulo ploradis kaj diradis:

— Mi montros al ili, ke mi tamen scias svede skribi.

— Kion do vi volas skribi? — demandis unu koleginon.

— Unu rakonton el Vermlando, — respondis Selma Lagerlöf.

Post la fino de la studoj Selma Lagerlöf silentis dum 17 jaroj. Sed en 1891 ŝi gajnis la unuan premion en la literatura konkurso de la gazeto „Idun“, per la romano „Gösta Berling“. Per tiu verko ŝi venkis ne nur siajn estintajn instruistojn, sed ankaŭ la tutmondan publikon. La fraŭlino, kiu „ne sciis svede skribi“, per siaj svedlingvaj verkoj gajnis fine eĉ la literaturan premion de Nobel.

LORDO H. J. PALMERSTON (1784—1865)



estis ĉefministro de Britujo. En iu tago lia ĉefarbaristo, kiu jam de kvardek jaroj fidele servis lin, diris:

— Via Lorda Moŝto devas fine energie trakti la posedantojn de la najbaraj bienoj.

— Kial? — demandis la lordo.

— Ĉar ili ĉasadas en viaj arbaroj kaj mortigadas la plej belajn leporojn.


— Kion do mi faru?

— Bonan proceson kontraŭ ili!

— Kara Martin, — respondis la nobla lordo, — mi preferas havi amikojn, ol leporojn.

★

IGNACY PADEREWSKI



la pola virtuozo de fortepiano, foje en amika rondo diris:

— Dek-kvin jaroja mi bezonis por fine konvinkiĝi, ke mi ne havas eĉ guteton da muzika talento.

Liaj amikoj kun miro rigardis al li kaj fine unu demandis:

— Kaj kion vi faris, kiam vi konvinkiĝis pri tio?

— Mi povis fari nenion, ĉar tiam mi estis jam fama homo, — respondis Paderewski.

★

FRIDTJOF NANSSEN (1861—1930)



la fama norvega vojaĝisto, dum sia juna aĝo foje sur la strato salutis unu sinjoron opiniante koni lin.

— Ĉu vi konas min? — demandis krude la salutita viro.

Nansen nun pli bone rigardis la viron kaj diris:

— Pardonu, sinjoro, sed mi eraris.

— Do kial vi salutas, se vi ne konas min? — respondis malafable la viro.

— Se mi estus sciinta, kia homo vi estas, mi ne estus vin salutinta. Nun mi konas vin kaj plu mi ne salutas vin.

la mondo ridas



Ŝanĝo en la persono.

— Mizera birdaĉo! Kiam vi fine ellernos, ke anstataŭ „Arturo” vi devas krei „Edgaro”?
(Humorist)

★

Pli altaj studoj.

Filino: Post la fino de la mezlernejo mi studos biologion, psikologion kaj fiziologion.

Patro: Sed estus pli bone, se vi lernus la kuirologion, lavologion kaj kudrologion.

(Buen Humor)

★

Frua matureco.

— Ĉu vi scias, kio okazas al tiuj knaboj, kiuj mensogas?

— Jes! Ili duonpreze veturas en la tramo!

(Southwark Recorder)

★



La nova modo.

— Sinjorino, ĉu vi ne vendus al mi vian ĉapelon?

— Ĉu via edzino bezonus ĝin?

— Ne, sed mi mem. Ĉar mi estas arlekeno en cirko.

(Berliner Ill. Zeitung)

Li zorgas pri si.

— Karlo, manĝu ankoraŭ unu kuketon.

— Mi ne povas, onklino, mi estas jam tute plena.

— Tiam metu kelkajn en la poŝojn.

— Ne eble! Ankaŭ ili estas plenaj!

(Macclesfield Times)

★

Moderna matematiko.

— Mi intencas viziti Parizon por dek tagoj. Kion vi pensas, amiko Fritz, kiom da mono mi bezonos porti kun mi?

— Dumil markojn, se vi vojaĝos sola. Sed se vi iros kune kun via edzino, sufiĉas mil.

(Le Rire)

★



La fatalisto.

— Ho, kial mi estas nur malforta virino? Kial mi ne naskiĝis kiel knabo?

— Lasu nur, tiam mi estus tute certe virino kaj en la finrezulto ni tamen estus geedzoj.

(Fliegende Blätter)

★

La tradicio.

Instruisto: „Tradicio” estas tio, kio iras de patroj al filoj. Nun, Joĉjo, faru unu frazon kun la vorto „tradicio”!

Joĉjo: Hieraŭ mi grimpis sur la ĉerizarbon kaj mi ŝiris mian tradicion.

(Haagsche Post)

★

Virina akurateco.

Edzo: Jam de tuta horo mi atendas je vi.

Edzino: Sed karulo, mi ja diris antaŭe, ke mi malfruos kvin minutojn.

(Sond. Strix)

Ŝanĝiĝas la tempo.

— Sinjorino, en la pasporto staras, ke vi havas nigrajn harojn. Sed viaj haroj estas blondaj.

— Ho, la pasporto estas el la pasinta jaro!

(Frou-Frou)

★

Infana kapo.

— Panjo, kiam mi estos granda, mi estos edzino de la avo.

— Kiel, karulino, ĉu vi volas esti la edzino de mia patro?

— Kial ne? Ankaŭ vi estas la edzino de mia patro.

(Dimanche Illustré)

★



Honesta laborgajno.

— Iu fripono forŝtelis de mi ĉion, kion mi hodiaŭ perlaboris.

— Ĉu estis multe?

— Tri poŝhorloĝoj, kvin monujoj kaj du ringoj.

(Journal Amusant)

★

Profesio.

— Mi daŭrigas la metion de mia patro.

— Kio estas via patro?

— Senlaborulo.

(Passing Show)

★

Sur ĉirkaŭvojo.

— Ĉu vi povus ŝanĝi al mi unu centfrankan biletan?

— Jes.

— Tiam bonvolu prunti al mi dek frankojn.

(Journal Amusant)

★



Patra konsilo.

— Kaj nun, kara filo, iru kun Dio. Restu ĉiam brava kaj honesta knabo kaj kion vi ŝtelas, sendu bele hejmen.

(Lustige Blätter)

Kritiko.

— Nu, ĉu vi estas kontentaj pri la nova pastro?

— Ni ankoraŭ ne konas lin bone. Dum ses tagoj de la semajno li estas nevidebla, en la sepa tago nekomprenebla.

(Moustique)

★

Eltrovema knabo.

— Rigardu, paĉjo, ĉi tiun violonon mi mem faris.

— Tre brave! Kaj de kie vi havis la kordojn?

— El la fortepiano.

(Illustrierte Blatt)



La Tria Internacia Kurso de Andreo Cseh okazis en Krakovo dum Julio 1931. Partoprenis 267 personoj el 23 landoj. Post la kurso okazis tritaga seminario por Cseh-metodaj instruistoj. 1. Prof. Odo Bujwid, prezidanto de la kongreso kaj rektoro de la kurso. 2. Andreo Cseh. 3. T. Hodakowski ĝen. sekretario de la kurso kaj de la kongreso (Foto de Z. Garzynski, Krakovo.)



★
Maldekstra bildo: La solena malfermo de la 23-a Universala Kongreso de Esperanto, en la „Ora Ĉambrego“ de la Katolika Domo en Krakovo. S-ro B. Long, prezidinto de la antaŭa (Oksforda) kongreso, faras la malferman paroladon. - En la kongreso partoprenis 777 personoj el 26 landoj.

★
Malsupra bildo: Grupo el la internacia balo dum la kongreso en Krakovo. - En ĉiu universala kongreso de Esperanto oni aranĝas internacian balon, en kiu la partoprenantoj aperas en siaj hejmlandaj naciaj kostumoj kaj prezentas siajn naciajn dancojn.

(Foto Mucha, Krakovo)



★
Zamenhof-monumento en Bad Reinerz (Silezio). Oni malkovris ĝin post la Krakova kongreso





La solena malfermo de la Esperanto-Domo en Arnhem okazis la 11-an de Aŭgusto 1931. La personoj en la antaŭa sidanta vico (de maldekstre al dekstre): Andreo Cseh, s-ino Julia Isbrücker, s-ro D-ro S. J. R. de Monchy urbestro de Arnhem, s-ro F. J. H. Verbeets reprezentanto de la nederl. ministerio por komercio, industrio kaj laboro, inspektoro Omloo repr. de la ministerio de instruado, s-ro C. Smeenk skabeno de la urbo Arnhem, s-ro R. Casimir prof. de pedagogio de la universitato en Leiden, s-ro P. Heilker prez. de la nederlanda ekzamena komitato de Esp-o. Inter la starantoj estas la reprezentantoj de la Lingva Komitato kaj Akademio (s-ro inĝ. J. R. G. Isbrücker), de UEA (Prof. D-ro C. J. Baart de la Faille) kaj de pluraj internaciaj kaj landaj Esp-aj organizaĵoj.



En Julio 1931 okazis en Tartu (Estonio) oficiala kurso de Esperanto por la estona instruistaro. La kurson organizis la Estona Instruista Asocio kun subvencio de la ministerio de publika instruado. En la kurso partoprenis pli ol 150 peinstruistoj, inter ili ankaŭ kelkaj el Svedujo kaj Finnlando. Sur la bildo en la mezo sidas: Viktor Raukas, direktoro de la Industria Lernejo, oficiale komisiita organizanto de la kurso. Andreo Cseh, Johannes Jaanisto, prezidanto de la Tartua Esp-Societo kaj Landa Sekretario de la Cseh-Instituto.



Nia fervora hinda samideano, s-ro Lakshmiwar Sinha, instruisto en la lernejo de Rabindranath Tagore en Kalkutta. S-ro Sinha dum 1931 faris grandsukcesan paroladvojaĝon tra Svedujo, Norvegujo, Estonio, Latvujo kaj Polujo.



La 11-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (organizaĵo de la esperantistaj laboristoj) okazis en la unua semajno de Aŭgusto en Amsterdam. Nia bildo montras la propagandan rondiron de la kongresanoj tra la urbo.




En la printempo de 1931 okazis grandaj kursoj en Berlino. Partoprenis pli ol 900 personoj. Inter la kursanc' estis ĉ 400 policistoj en Berlino kaj Potsdamo, por kiuj la kursojn aranĝis la prusa internafera ministerio. Nia bildo montras scenon el la publika leciono en la urbdomo de Berlino. La personoj (de maldekstre): la konata Esp-pioniro Dir. J. Glück, poŝtkonsilisto A. Behrendt prezidanto de la Germana Esp-Asocio, la talentoplena tradukistino f-ino Margarete Glaser, Andreo Cseh, kaj s-ro Emil Dauge prezidanto de la kursorganiza komitato.



La Esp-istaro de la Libera Urbo Danzig la 4-an de Decembro festis la 90-jaran naskiĝtagon de la plej maljuna Esp-istino, s-ino Anna Tuschinski.



Pastro Font Giral el Hispanujo, la prezidanto de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, en Aŭgusto 1931 vizitis la katolikajn Esp-organizaĵojn en Nederlando. La bildo montras pastron Font Giral (maldekstre) kun Frato Vigberto van Zon, meritplena pioniro de Esperanto en Nederlando.



S-ro John Mabon Warden (Edinburgo), la nova prezidanto de la Esperantista Akademio.



S-ro Joseph R. Scherer faris dum la jaro 1931 propagandan vojaĝon ĉirkaŭ la terglobo. La bildo montras s-ron Scherer en Japanujo, kiam li fotografas japanan Esperantistinon. En la mezo staras nia nederlanda samideano s-ro Nico H. Slinger, ĵurnalisto kaj redaktoro de filmgazetoj, kiu akompanis s-ron Scherer.



Jean Forge, la konata aŭtoro de originalaj romanoj en Esperanto, kun sia unua Cseh-metoda lernanto: s-ro Kola Ajayi el Lagos (Okcidenta Afriko).

PANORAMO



La eskimo-patrino ne lavas sian infanon, sed lekas ĝin, kiel la katino siajn idojn.

★



La plej novaj sciencaj esploroj montras, ke sur unu kvadrata centimetro de la pura, ĵus lavita ĉemizoj estas ĉirkaŭ 100 bakterioj. Post unutaga portado oni trovas jam 75.000 bakteriojn. Sed post unu semajno jam 1.500.000 (unu kaj duona miliono) da bakterioj svarmas sur unu sola kvadratcentimetro. Konkludo: ofte ŝanĝi la subvestojn.

★




Tero anstataŭ butero. En norda Germanujo estas regionoj, kie oni trovas en la tero tre *grasan argilon*. Malriĉaj homoj ofte ŝmiras ĝin sur panon kaj manĝas ĝin kiel buteron.




Ekzistas en Suda Azio popoloj, kie la virinoj nigrigas siajn dentojn. Ili opinias, ke la nigraj dentoj plibeligas la virinon.

★



Alumeto, sur kies kvar flankoj estas la du preĝoj: „Nia Patro” kaj „Estu salutata, Maria”, skribitaj per mano. La skribinto estas Petro Illés, hungara desegnisto en la urbo Salgótarján.

★



La interesa restoracio „AL LA FIDO”. Kiel la bildo montras, la tabloj estas ŝraŭbitaj al la planko, la seĝoj kaj manĝiloj estas fiksitaj per ĉenoj. La kelnero verŝas la supon en la teleron kaj tiam oni devas tuj pagi. Se la gasto ne pagas tuj, la kelnero per la pumpilo elpumpas la supon el la telero.



La hotentotoj en Afriko kaptas la fiŝojn per mano. Ili estas tre lertaj en tiu arto.

★



La signo, kiun ĉi tiu japano faras per la mano, en Japanujo signifas: „iru de mi”. La sama signo en Eŭropo signifas: „venu al mi”.



Malfeliĉaj viroj! La bildo montras, ke sur la vira vestaĵo estas 58 butonoj (sur la ĵako 8, sur la veŝto 8, sur la pantalone 15, sur la ĉemizoj 12, sur la kalsono 5, sur la gamaŝoj 8 kaj sur la ŝtrump-teniloj 2), ne kalkulante la surtuton. Malfeliĉaj viroj!!



Loĝdomo en la formo de la ŝinkso. Ĝi apartenas al unu komercisto en Ameriko.


KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano, diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

GENERALAJ REGULOJ:

1. En la konkursoj de LA PRAKTIKO partopreni povas ĉiu persono, ankaŭ tiuj, kiuj ne abonas la gazeton.
2. La solvon de ĉiu aparta konkurso oni devas sendi sur aparta papero.
3. Ĉe ĉiu solvo oni devas alglui la koncernan konkurs-kuponon.
4. Al la solvo oni devas aldoni sur la sama papero la precizan nomon kaj adreson de la solvinto, per tre klara skribo.
5. Oni povas sendi solvon ankaŭ per poŝtkarto, sed sur unu karto nur unu solvon.
6. Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu siajn solvojn kune, en unu koverto, por ŝpari poŝtkostojn.
7. Adreso por la sendaĵoj: Redakcio de LA PRAKTIKO, Oostduinlaan 32. Den Haag, Nederlando.
8. Solvoj ne konformaj al la supraj reguloj ne estos konsiderataj.
9. La nomoj de tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantaj, sendotaj aŝrankite al la gajnintoj.
10. Sendante demandon al la redakcio bonvolu aldoni respond-aŝfrankon.

1-a konkurso.



Ĉi tie vi vidas serion de bildoj sen teksto. Bonvolu verki la tekston, rakonti la historion, kiun la bildserio prezentas.

Grava kondiĉo: la teksto estu mallonga kaj sprita!

15 premiojn ni disdonos al la verkintoj de la plej bonaj tekstoj. La plej bonajn tekstojn kaj la nomojn de la gajnintoj ni publikigos en la Aprila numero. Ni akceptas la tekstojn ĝis la 15-a de Marto. Bonvolu atenti je la ĝeneralaj reguloj!

2-a konkurso.

a, e, i, o, b, k, r, s, p, t.

El ĉi tiuj dek literoj faru vortojn, ekz-e: arto, briko, Petro, karbo, pasko, bori, persiko, raboti, seka.

Oni ne rajtas ripeti la saman literon en unu vorto.

10 premiojn ni disdonos al tiuj personoj, kiuj faris plej multe da vortoj. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Marto. La rezulto aperos en la Aprila numero.

Legu la ĝeneralajn regulojn! Algluu la kuponeton!

3-a konkurso.

El la haveno de Liverpulo ĉiutage foriras unu ŝipo al Novjorko kaj alvenas tie post 8 tagoj. Simile el la haveno de Novjorko ĉiutage foriras unu ŝipo kaj post 8 tagoj alvenas en Liverpulo. La ŝipoj sur la maro unu post la alia renkontiĝas. La demando estas: unu ŝipo kiom da ŝipoj renkontas dum la veturo inter la du havenoj?

Rimarkigo: ĉiu ŝipo ekiras precize je tagmezo kaj alvenas precize je la 3-a horo posttagmeze.

10 premiojn ni disdonos al la solvintoj. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Marto. La rezulto aperos en la Aprila numero.

Bonvolu atenti je la ĝeneralaj reguloj!

4-a konkurso.

Kiom da kongresanoj havos la 24-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo?

Inter tiuj personoj, kies respondoj estos plej proksimaj al la vero, ni disdonos 20 premiojn, interesajn librojn en diversaj valoroj.

La kongreso okazos la 30. Jul.—6. Aŭg. 1932.

La listo de la ĝisnunaj 23 kongresoj, kune kun la nombroj de la kongresanoj, estas trovebla en la Konversacia Gazeto, 14-a paĝo (mendebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO, prezo 1 respondkuponon).

Ni akceptas respondojn ĝis la 1-a de Majo 1932.

Post la kongreso ni demandos la precizan nombron kaj la rezulton de la konkurso ni aperigos en la Septembra numero de LA PRAKTIKO.

Rigardu la ĝeneralajn regulojn supre!

5-a konkurso.

En ĉi tiu numero de LA PRAKTIKO estas kelkaj (ne multaj!) preseraroj. Bonvolu serĉi ilin!

Al la trovintoj de plej multaj preseraroj ni disdonos 10 premiojn.

Solvojn ni akceptas ĝis la 15-a de Marto. La rezulto aperos en la Aprila numero.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

6-a konkurso.



En ĉi tiu bildo estas kelkaj eraroj. Bonvolu serĉi ilin kaj sendi la liston de la eraroj al ni.

20 premioj atendas tiujn personojn, kiuj trovis la plej multajn erarojn. Solvojn ni akceptas ĝis la 15-a de Marto. La rezulto aperos en la Aprila numero.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

Kupono por la	Kupono por la	Kupono por la	Kupono por la	Kupono por la	Kupono por la
1-a	2-a	3-a	4-a	5-a	6-a
konkurso	konkurso	konkurso	konkurso	konkurso	konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.
Favore al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

FRANCUJO.

Neuilly-sur-Seine (Seine). — S-ro Jean-Charles Teulieres, 82 rue de Long-champs. (komercagento). Dez. koresp. kun frŭlinoj.
Paris. — F-ino Marion Blau, oficistino, 44 rue Richer. (Dez. koresp. kun ruso).
Paris. — S-ro Artur Kach, 151 rue de Belleville. (Dez. koresp. kun japanino).
Paris. — S-ro Oskar Kach, 151 rue de Belleville. (Dez. koresp. kun ĉino).

NORVEGUJO.

Hamar. — S-ro Lyder Larsen, sekretario, Vang-Sparebank. (Pri ŝako kaj framasonismo).
Hamar. — S-ro Torbjørn Ekern, Hobergo (16-jara gimnaziano).
Hamar. — S-ro Hjalmar Johnson, laboristo, Oplandske-Sag.
Hamar. — S-ro Gustav Johannessen, masonisto, bontemplano, Skappelsgate.
Hamar. — S-ro Hans Lien. (24-jara komercisto. Koresp. ankaŭ germane, angle kaj hispane).
Hamar. — S-ro Erik Garlie, Grand-Hotel. (30-jara subleŭtenanto).
Hamar. — S-ro Arne Guldbrandsen. (30-jara instruisto).

Hamar. — F-ino Bergljot Haug (22-jara kontoristino).
Hamar. — F-ino Magnhild Norheim (22-jara studentino).
Hamar. — F-ino Valborg Nergaard (25-jara instruistino).
Lillehammer. — S-ro Marius Berge, Gausdalsgate 132. (30-jara instruisto).
Lillehammer. — F-ino Sigrid Antonsen, Sorgendahlsvei 8 (18-jara eks-pedistino).
Lillehammer. — F-ino Astrid Burdal, Kirkegatan 22. (20-jara f-ino).
Lillehammer. — S-ro Ivar Hansen, Lysgaardsveien 13. (24-jara radiotelegrafisto).
Oslo. — S-ro Egil Aas, Markveien 44. (14-jara lernanto).
Oslo. — F-ino Margarete Almqvist, flegistino, Suhmsgate 14. (dez. koresp. pri paco kaj vegetarismo).
Oslo. — S-ro Nils Lofstad, inĝeniero, Thaulowsgate 12.
Oslo. — F-ino Dagny Rasch, Hansteensgate 9. (16-jara lernantino).
Oslo. — F-ino Gerd Torgersen, Arbiensgate 11. (20-jara studentino).

POLUJO.

Bydgoszcz. — S-ro Edmund Chyrek, Garbary 26. (27-jara librotenisto).
Dez. koresp. pri psikologio kaj filozofio.
Bydgoszcz. — S-ino Stanisława Sopinska, oficistino, Sniadeckich 49-3.

SVISLANDO.

Sankt-Gallen. — S-ro Lukas Staeheli, Greifenstr. 21. (17-jara komercisto).
Sankt-Gallen. — S-ro Hans Schmucki, Wildegstr. 44. (21-jara komercisto).
Sankt-Gallen. — F-ino Mary Hanhart, Burgstr 84. (21-jara oficistino).
Sankt-Gallen. — F-ino Margrit Cerliani, Rickenstr. 8. (22-jara bank-oficistino). Dez. koresp. pri landoj kaj popoloj.
Sankt-Gallen. — F-ino Marie Gschwend, Bitzistr. 9. (30-jara vendistino).
Dez. koresp. kun s-ro aŭ f-ino el la tapet- aŭ dekoraci-fako, pri interna dekoracio.
Zürich 1. — S-ro Franz Hammer, Neumarkt 14.
Zürich 6. — S-ro Kurt Wälterlin, Goldauerstr. 32.
Zürich 7. — S-ro Hans Behrmann, Hegibachstr. 52.

Mendeblaj ĉe la:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

Oostduinlaan 32, DEN HAAG (Nederlando)

Postĉekkonto: Den Haag 162626

LA KURSO DE ANDREO CSEH. La stenografita kaj poste mimeografita teksto de unu tuta kurso de Andreo Cseh farita en Stokholmo en 1928. La kurso kaj enkonduko kun klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruantoj, krom tio aldonoj, entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo, afrankite	7.75 G.
KONVERSACIA VORTARO, ŝercaj difinoj de la vortoj uzataj en la kursoj	-25 "
KONVERSACIA LITERATURO, 8 numeroj, unu n-o	-10 "
KARTONA UJO por la Konversacia Literaturo . . .	-10 "
KONVERSACIA GAZETO. Unusola n-ro kun plena informaro pri Esp-o, por enkonduki la novajn Esp-istojn en la movadon	-20 "
KANTO AL LA ESP-DOMO. Verkita de C. Roskes-Dirksen. Muziknotoj kun teksto	-15 "
POSTKARTOJ KUN LA BILDO DE LA ESP-DOMO sur la adresflanko. Tre taŭgaj por skribmaŝino, 50 pecoj	-75 "
BILDKARTOJ pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem, 10 belegaj il. poŝtkartoj kun Esp-teksto, pri la ekstero kaj interno de la Esp.-Domo kaj pri la urbo Arnhem, la 10 kartoj kune afrankite	0.50 "
BILDKARTOJ, poŝtkartoj kun portretoj de D-ro Zamenhof, Andreo Ĉe kaj de Ĉe-metodaj instruistoj, ĝis nun 10 diversaj kartoj. Unu peco	-10 "
GVIDLIBRO pri Arnhem, 32-paĝa libreto ilustrita . . .	-15 "
PLANO DE ARNHEM, kolorpresita plano de la urbo, la loko de la Esp-Domo aparte markita sur ĝi . . .	-40 "
VERZAMELDE EXAMENOPGAVEN	-45 "
VERTAADE EXAMENOPGAVEN	-50 "

La prezoj entenas la afrankon!

INSTRUISTOJN

de Esperanto, bonajn kaj elprovitajn, ni volonte disponigas al ĉiuj, kiuj deziras aranĝi Ĉe-metodajn kursojn. Ni garantias pri la laboro kaj konduto de tiuj instruistoj, kiujn ni rekomendas. Detalaj informoj je peto senpage sendotaj.

INT. CSEH-INSTITUTO DE ESP.



La ŝatataj

FLAGINSIGNOJ

speciale taŭgaj por vojaĝo kaj kongreso, por montri la naciecon de la portanto.

Eleganta formo,
bela emajlo.

Haveblaj por ĉiu nacio, kun pinglo, broĉo aŭ butono.

Prezo: -.60 ned. guld. (kvar respondkuponoj) afrankite.

Int. Cseh-Instituto de Esp.
Hago.



LA ESPERANTO - DOMO

en Arnhem (Nederlando)

kun malfermitaj pordoj atendas ĉiun Esperantiston.

Internacia lernejo, renkontejo, hejmo kaj libertempejo por la tuta Esperantistaro.

En la Esperanto-Domo la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto aranĝas dum la tuta jaro kursojn, konferencojn kaj kunvenojn, kies programon konstante publikigos LA PRAKTIKO.



Teo Jung

1-a SEMAJNFINA KUNVENO

(Arnhem, 30-31. Januaro 1932. — Kotizo .75 guld.)

Sabate vespere je la 7-a horo prelego de s-ro TEO JUNG ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto el Köln, pri: De Balaibalan ĝis Anglic Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj (kun lumbildoj). Post la prelego amuza programo kaj danco. (Moderna orkestro).

Dimanĉe posttagmeze je la 2-a horo parolado de s-ro Andreo Ce pri: Spertoj kaj memoroj de propagandisto de Esperanto. Konsiloj por la propagando.


2-a SEMAJNFINA KUNVENO

(Arnhem, 27-28. Feb. 1932 — Kotizo .75 guld.)

Sabate vesp. lumbilda parolado de s-ro Georges Warrier prez. de la Kongresa Komitato en Parizo, pri Parizo kaj la 24-a Univ. Kongreso. Post la parolado amuza vespero kaj danco (moderna orkestro).

Dimanĉe je la 2-a h. lumbildparolado de s-ro L.N. Newell el Londono.

Pri la 5-a Internacia Kurso de Andreo Ce (Arnhem, 18-29. Julio 1932) kaj pri la Internacia Perfektiga Kurso kaj Seminario por Ĉe-metodaj Instruistoj (Arnhem, 7-21. Aŭgusto 1932) detaloj sekvas en la venontaj numeroj de LA PRAKTIKO.



La ESPERANTO-DOMO, en la mezo de belegra vasta parko, estas malfermita dum la tuta jaro. En la domo estas kursejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro fluenta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5-10 personoj en unu ĉambro): 2.— ned. guld., (2-4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. Lunĉo: .75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro.

Servmono 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso: Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26800.

GRANDA LOTERIO

por la instalado de la Esperanto-Domo de Arnhem

Aprobata per dekreto de la Nederlanda Ministro por Justeco, 2 Sekc. A. N-o 1069, de la 2-a de Aprilo 1931.

ĈEFPREMIOJ:

1. AUTOMOBILO
NASH, 6-cilindra
5-persona, plej
nova modelo.



2. Moderna manĝo-ĉambra meblaro el fabr. „Pander”, Hago.
3. Portebla skribmaŝino „Royal”, plej nova modelo.
4. Gramofono de „Sprenger”, Hago.
5. Persa tapiŝo „Schira” de firma Kulcsár, Hago.
6. Luksa salona starlampo el fabr. D. D. Coelingh, Hago.
7. Portebla skribmaŝino „Corona”, plej nova modelo.
8. Polvuŝilo „Protos” kun kompleta garnituro.
9. Foto-aparato Zeiss-Ikon Cocarrette 6X9.
10. Laŭtparolilo de Bell Telephone Mfg. Co.

Entute 1000 premioj, ĉiuj valoraj praktikaj objektoj (pli ol 100 elektraj mastrumaj aparatoj, plue bicikloj, vojaĝklojfor k.t.p.) — La tirado okazos publike dum la somero de 1932 en Arnhem pere de Notario Ch. J. Engelberts, Arnhem. — La rezultato de la tirado (listo de la gajnintoj) numeroj kaj de la premioj estos publikigata per speciala bulteno, ricevebla ĉe la Esperanto-Domo en Arnhem. — La gajnintoj povas transpreni la premiojn dum unu jaro post la tirado. Post tiu templanio la premioj apartenos al la loteria fondo.

PREZO DE UNU LOTBILETO: 1.— ned. guld.

Adreso por mendoj kaj pagoj:

F-ino J. E. RIKKERS, Anton de Haenstraat 122,

DEN HAAG, (Nederlando). Poŝtgirokonto: Den Haag 96085.

Sensacia novaĵo!

La enigmoj

Unu broŝuro plena de enigmoj speciale faritaj por ripeti la vortojn lernitajn en la kurso kaj por lerni novajn vortojn, gravajn en la praktika vivo.

**1000 premioj
al la solvintoj**

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Prezo de la broŝuro: .15 ned. gld. (= unu respondkupono).
Mendebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Ĝis nun solvis (la nomoj de gajnintoj per dikaj literoj): Sand, Oslo. - Gobiet, Papendrecht. - Holleman, Bergen op Zoom. - Veidemanis, Riga. - Birkenfeld, Krakovo. - Soyeur, Seraing. - Kramers, Apeldoorn. - Palm, Uppsala. - v. d. Mey, Arnhem. - 10 Pehrson, Hamar. - Eckstein, Apeldoorn. - Ortman, Krakovo. - Torp, Oslo. - Unterweiserowna, Krakovo. - Stören, Nötterö, - Wijers, Hago. - Scheinker, Riedholz. - Otterfors, Kiruna. - Gostynski, Krakovo. - 20 Goldmanowna, Krakovo. - Zelnik, Krakovo. - Grönneberg, Oslo. - Michelsen, Wassenaar. - Hoestra-Nieuwenhuijs, Hago. - Buzek, Horka. - Ginters, Riga. - Vermeer, Zutphen. - Touber, Amsterdam. - Moosbrugger, Gossau. - 30. v. d. Graaf, Dordrecht. - Linné, Munkfors. - Brouwer, Hago. - Bovet, Genevo. - Kleven, Hamar. - Palsberg, Aarhus. - Gubler, Zürich. - Petersen, København. - Christanell, Salzburg. - Ceh, Sankt-Gallen. - 40. Bnthoven, Hago. - Pfiffner, Sankt-Gallen. - Krukowna, Katowice. - Rosenzweig, Katowice. - Tarr, Leigh-on-Sea. - Poots-Kleyheeg, Dordrecht. - Scheffelaar, Hago. - Beishuizen, Bussum. - Haalebos, Leiden. - Hockett, Leigh-on-Sea. - 50. Sokalska, Danzig. - Thijss, Papendrecht. - Ellerbeck, Berlin. - Opendorp, Oosterbeek. - Opendorp, Bemmelen. - Toorneman, Deventer. - Hartog, Baarn. - Lövgren, Myra. - Roorda, Oosterbeek. - Örn, Stockholm. - 60 Laverge, Utrecht. (Daŭrigo sekvas en la Februara n-ro de LA PRAKTIKO).

Esperanto-Presejo PIER WESTERBAAN, Nieuwe Molstraat 24, Den Haag (Nederlando).

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
2-a numero



Februaro
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POSTĈEKKONTO
162626

Varman akcepton

trovis la unua numero de La Praktiko ĉe la Esperantistaro. Ĉiu poŝto amase alportas abonojn kaj gratul-leterojn. Ni permesas al ni citi ĉi tie kelkajn el ili:

S-ro J. M. instruisto en L. (Aŭstrio) skribas: „La Praktiko estas tio, kion mi serĉas longtempe por kurspartoprenintoj”.

F-ino J. D. en Berlin skribas: „Nia tuta grupo multe ĝojas pro la apero de via gazeto; ĝi estas ĝuste tio, kio ankoraŭ mankis al ni”.

D-ro E. R. en V. (Ĉeĥoslovakujo) skribas: „Mi gratulas vin. Vi akiris al ni grandegan ĝojon, vi riĉigis la Esperantan literaturon per nova brila stelo. Ĉi tiu nova gazeto, kiel jam la unua numero dokumentas, amuzante, preskaŭ kiel muzika melodio portas nin en la plezuron de la lingvo internacia. Mi estas certa, ke ĉiu Esperantisto, kiu volas sin amuzi kaj perfektigi en nia lingvo, La Praktikon fiera gardos sur la plej bela loko de sia biblioteko.”

Ĉi tiu eĥo pravas, ke ni trovis la ĝustan vojon al la kapoj kaj al la koroj de la gesamideanoj. Kaj tio estis nia celo. Ni volas ĉiunonate viziti vin per La Praktiko por instrui al vi nian lingvon en agrabla maniero. Sed krom tio ni deziras ankaŭ doni al vi

horojn de ĝojo kaj rido, por ke vi forgesu la zorgojn de la vivo kaj la premon de la mondkrizo.

Ke la Esperantistaro ŝatas lerni kaj ridi, tion montras la granda sukceso de nia unua numero. Dum kelkaj tagoj ĝi tute elĉerpiĝis kaj ni devis fari novan preson. Pro tio kaj pro la subita elĉerpiĝo de nia speciala papero bedaŭrinde (aŭ feliĉel!) prokrastiĝis la apero de ĉi tiu numero. Sed nun ni certigis la necesan paper-kvanton kaj la Marta numero tuj sekvos ĉi tiun numeron.

Apartan ĝojon kaŭzas al ni la amasa alveno de solvoj por niaj konkursoj, ĉar ili ĉiuj servas kiel lecionoj. Niaj legantoj faras bonegan laboron kaj montras multan spritecon. Baldaŭ ni aperigos la plej interesajn solvojn kaj tiam nia tuta legantaro havos okazon por vera ĝuo.

En la proksima numero ni komencos publikigi ankaŭ interesajn laboraĵojn de la kursanoj mem.

De nun La Praktiko aperas sur 16 paĝoj kaj ĝi klopodos esti por ĉiu Esperantisto vera kamarado.

Saluton al nia ŝatata legantaro!

La redakcio.


LA GAZETO, KIU INSTRUAS

KAJ AMUZAS

Specimena numero kostas unu respondekuponon (0.15 ned. guld.). Reklam-tarifo: 1 paĝo 40.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. ★ Kopirajto de la enhavo rezervita.

LECIONO PRI LA MAMBESTOJ.

1. leono
2. kolharoj
3. vosto
4. piedego (kun ungegoj)
5. tigro
6. faŭko
7. urso
8. simio
9. ŝakalo
10. lupu
11. elefanto
12. rostro
13. rinocero
14. ĝirafu
15. dromedaro
16. kamelo
17. ĝibo



18. zebro
19. azeno
20. alko
21. vulpo
22. rangifero
23. ĉamo
24. vesperto
25. mustelo
26. sciuro
27. apro
28. erinaco
29. melo
30. leporo
31. talpo
32. kuniklo
33. baleno
34. foko
35. kastoro

La reĝo de la bestoj estas la 1. La belaj 2 estas kvazaŭ lia reĝa mantelo. La 11 havas longan 12 kaj du grandajn dentojn, kiuj liveras la eburon. La 5 estas tre danĝera rabobesto. Ĝi havas striitan felon. Ankaŭ la 18 havas tian. La 7 estas karnivora (t.e. viandon manĝanta) besto; sed ĝi ankaŭ ŝatas la mielon de la abeloj. La 15 kaj 16 estas tre utilaj por la loĝantoj de la dezertaj regionoj. La 15 havas unu, la 16 du 17. La 14 havas tre longan kolon. La 8 estas la besto, kiu plejmulte similas la homon. Ĝi tre bone scipovas suprenrampi la arbojn. La 10 kaj 9 apartenas al la familio de hundoj. Ili atakas ankaŭ la homojn, kiam ili estas malsataj. La 35 havas tre valoran

felon; ĝi vivas en la bordoj de riveroj. La 34 kaj 33 vivas en la maro. La 33 estas la plej granda mambesto. La 22 anstataŭas por la nordlandanoj la bovon. La 21, la 27 kaj la 25 estas bestoj de niaj arbaroj. 26, 28, 30, 32 kaj 31 estas mordetuloj.

Kiel parolas la bestoj? — La 10 bojas, la 9 blekas, la 8 krias, la 11 trumpetas, la 7 murmuregas, la 27 gruntas.

Kiamaniere la bestoj sin movas? — La 5 saltas kiel kato, la 1 paŝas majestece, la 30, la 18, la 14 kuras, la 8 kaj la 26 suprenrampas la arbojn, la 23 supreniras la plej altajn rokojn, la 31 fosas, la 33 kaj 34 naĝas.

LA PARTO DE LA LEONO.

Leono, vulpo kaj azeno ĉasis kune kaj kaptis cervon. Tiam la leono ordonis, ke la azeno dispartigu la ĉasaĵon. La azeno faris tri partojn; pro tio la leono koleriĝis kaj deŝiris la felon al la azeno tiel, ke ĝi staris tute sangokovrita, kaj poste ĝi ordonis, ke la vulpo dispartigu la ĉasaĵon. La vulpo ree kunmetis la tri partojn kaj donis ilin al la leono. Nun la leono ridis kaj diris: „Kiu instruis vin dispartigi tiel?” La vulpo montris al la azeno dirante „Tie la magistro kun ruĝa bireto.”

Ĉi tiu leciono estas prenita el la bonega praktika lernolibro: **THORA GOLDSCHMIDT BILDOTABULOJ**, eldonita de la firma **Ferdinand Hirt & Sohn** en Leipzig (Salomonstrasse 15). La libro sur 104 paĝoj pritraktas ĉiujn temojn de la praktika vivo en similaj bildoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo de **LA PRAKTIKO** kaj ĝia prezo estas:

kartonita nur 1.90 ned. guld.

blindita „ 2.20 „ „

Al niaj abonantoj aŭfrankita sendo!

FARU LA KONTROLON!

(Praktika gramatika leciono)

En la Januara numero ni aperigis la 1-an taskon, per kiu vi kontrolis, ĉu vi bone komprenas la aktivajn participojn (-anta, -inta, -onta). Vi devis kompletigi la vortojn en la historio pri Korenŝu. Ni esperas, ke vi bone sukcesis. Ĉi tie ni donas la kompletigitajn vortojn, por ke vi povu kontroli vian propran laboron. Se vi bone kompletigis la vortojn, vi povas esti feliĉa kaj vi povas akcepti nian gratulon, ĉar vi perfekte scias la aktivajn participojn.

La solvo de la 1-a tasko:

Starantan, mortontan, perdintajn, ĉikrikantan, lamantajn, parolantan, riproĉanta. — Blovanta, levinte, sidante, brulanta, tenante, kuirinte, laborinta. — Aŭdinte, tondrantajn, vidinte, fulmantajn, preninte, kuŝanta, falinta, pensante, okazonta. — Sonorantaj, vojaĝantoj, vestintaj, tenantaj, laboranton, heredinto, salutinte, respondante, ordoninta, kontrolonta. — Fosinte, farinte, venontan, batontan, konstatainte, batonte, kurante, perdinte. — Aŭdinte, kompreninte, estanta, estonta, ĝojante, suferanta, fajfante. — Farinte, foririnta, venanta, vidinte, blasfemante, riproĉante, staranta, paŝinte, enfalinta, krieganta. — Atinginte, manĝinte, trinkinte, dormante, mortanta, spiranta, levinte, fumante, havante, pasinta, forironte. — Irante, korŝirantaj, paŝinte, enfalintaj, starantaj, ekvidinte, tremanta, turmentanta. — Kompatante, enfalintan, jetinte, deŝirinte, dirante. — Savinto, suferanta, aŭdinte, malĝojanta, kuŝanta, dirante, aŭdinte. — Rigardintaj, metinte, dirinte, elvenintan, minacante. — Ricevinte. — Sekvinta, vivanta, skribante. — Ricevinte, kolektante, metinte. — Kuŝanta, tremanta. — Kuracinta, pendanta. — Trovinte, restintajn, balbutante. — Levinte. — Mortinta. — Savontan, tuŝante. — Aŭdinte, suprenstarantaj.

2-a tasko.

Hodiaŭ ni demandas vin: ĉu vi bone komprenas la pasivajn participojn (-ata, -ita, -ota)? Se vi ne estas certa pri tio, bonvolu fari kontrolon. Ĉi tie ni donas al vi mallongan historion kaj ni petas vin, bonvolu kompletigi la vortojn, en kiuj mankas la tempon signifanta litero a, i aŭ o.

Antaŭ la komenco de la laboro ni refreŝigu la aferon en la kapo:

La letero en la koverto estas skribita letero, ĉar oni skribis ĝin.

La ĉokolado en la buŝo estas manĝata ĉokolado, ĉar oni manĝas ĝin.

La akvo en la glaso estas trinkota akvo, ĉar oni trinkos ĝin.

Alia ekzemplo: *La fumota cigaro estas en la poŝo; la fumata cigaro estas en la buŝo; la fumita cigaro estas en la aero.*

Bonvolu aŭskulti:

Hieraŭ mi skribis gravan kaj longan leteron. Mi skribis ĝin preskaŭ dum la tuta tago. Do, mia letero hieraŭ matene estis skribota, dum la tago ĝi estis skribata kaj vespere ĝi estis skribita. Kiel vi vidas, la verbo „esti” havas ĉiam pasintan tempon („estis”), ĉar la afero okazis hieraŭ. Tre simpla, ĉu ne?

Morgaŭ mi havos liberan tagon, do mi legos la gravan kaj interesan libron, kiun mi aĉetis hieraŭ. Mi intencas legi ĝin dum la tuta tago. Do, mia libro morgaŭ matene estos legota, dum la tago ĝi estos legata kaj vespere ĝi estos legita. Vi vidas, ke la verbo estas ĉiam en la venonta tempo („estos”). Jes, ĉar ni parolas pri morgaŭ.

Kaj nun bonvolu komenci la kontrolan laboron! La kompletigitajn vortojn ni publikigos en la Marta numero de LA PRAKTIKO.

NIA DOMO

(Stranga, sed vera historio).

Antaŭ tri jaroj en la plej leg...ta gazeto de nia urbo ni trov...s la jenan anoncon pres...tan per dikaj literoj: „ĉarma familia domo konstru...ta el bone bak...taj brikoj est...s vend...ta.”

Kiam mia patro est...s leg...nta la anoncon, li tuj pens...s pri sia am...ta familio kaj pri dolĉaj jaroj traviv...taj en propra ĉarma familia domo. Tial li tuj diris al mi: „prenu vian ĵus aĉet...tan ĉapelon kaj venu kun mi por rigardi la anonc...tan domon”.

Ni devis iri tra bala...ta strato kaj tial ni enspiris multan polvon. Sed sur la ĉielo pezaj nuboj est...s pel...taj de forte blovanta vento kaj ni esperis, ke nia reveno estos pli agrabla, ĉar la aero baldaŭ est...s bone purig...ta de pluvo.

Ni alvenis al la anonc...ta loko kaj la tre elegante vest...ta posedanto montris al ni la ĉarman familian domon. Ĝia tegmento est...s jam forport...ta de ventoj, ĝiaj muroj est...s detru...taj de tertremo kaj ĉiuj partoj de la domo, ĝis la lasta briko, est...s forŝtel...taj de malriĉuloj. Sed la posedanto certigis, ke ĉi tiuj negravaj difektoj est...s post unu monato jam ripar...taj kaj tiam ni pov...s ekloĝi. Oni tuj faris la kontrakton kaj mia patro pagis la interkonsent...tan prezon.

Dum la sekv...nta monato la domo est...s ripar...ta. Brikoj, kalko, sablo, traboj, lignaj tabuloj est...s alport...taj, novaj muroj konstru...taj, nova tegmento far...ta.

Kiam la domo est...s tute ripar...ta kaj ĉiu laboro fin...ta, la masonistoj prezent...s al mia patro elegante skrib...tan fakturon pri la riparkostoj. Mia patro diris al ili: „la vendinto devas pagi el la ricev...ta prezo”. Sed la vendinto montris al ni la subskrib...tan kontrakton, en kiu staris la jena frazo: „La necesaj riparoj est...s pag...taj de la aĉetinto”.

Sekve de tio mia patro pagis la postul...tan sumon kaj ni estas tre feliĉaj en la multekoste aĉet...ta, sed tre ŝat...ta ĉarma familia domo.

Gvidantoj de daŭrigaj kursoj!

LA PRAKTIKO estas redaktata kun la speciala celo, ke ĝi estu uzata en la daŭrigaj kursoj kiel legaĵo kaj bazo por gramatika klarigado. Bonvolu atenti precipe la lecionajn partojn kaj la konkursojn.

Al kursgvidantoj ni volonte liveras por disvendado al la kursanoj kvantojn el kiu ajn numero aparte kun rabato.

La redakcio.

Grupoj kaj studrondoj!

Vi povas multe pliagrabligi viajn kunvenojn, se vi kune legas kaj priparolas la enhavon de LA PRAKTIKO, kiu estas redaktata kun speciala atento al tia uzado. Por tiu celo ni liveras kvantojn kun rabato.

Speciale rekomendinde estas, ke en la kunvenoj oni komune solvadu la konkursojn kaj la lecionajn taskojn.

La redakcio.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj

PRINCO OTTO BISMARCK (1815—1898),



BISMARCK

la granda kanceliero de Germanujo, kiel 20-jara junulo en Göttingen partoprenis foje en junulara kunveno. Dum la festa manĝo li faris fajran paroladeton kaj en momento li eljetis sian glason tra la fenestro. Sur la strato iu ekkriis; la glaso falis sur la kapon de preterpasanto.

En la sekvinta mateno la juna Bismarck ankoraŭ dormis, kiam oni frapis sur lia pordo. La rektoro de la universitato vokis lin kun la ordono, ke li senprokraste, tuj venu.

— Ĉu senprokraste? — diris Bismarck. — Bone!

Ne vestinte sin, tiel, kiel li estis, en dorm-ĉemizo kaj nokta ĉapo li tuj ekiris. Nur ŝuojn li prenis kaj promen-bastonon. Tiel li aperis antaŭ la konsternita rektoro, kiu demandis:

— Kiel vi povis hieraŭ vespere eljeti la glason?

— Kiel? — ripetis Bismarck. — Tre simple. Jen, tiel...

Kaj li subite prenis la inkujon de sur la tablo de la rektoro kaj eljetis ĝin tra la malfermita fenestro.

Nova krio sur la strato. La inkujo trafis la kapon de alia preteriranto.

★

NICOLAS-RENE DESGENETTES (1762—1837)

franca profesoro de medicino, en ekzameno pri higieno demandis foje unu kandidatecon:

— Kie komenciĝas la digestado?

— En la buŝo, — respondis la kandidateco.

— Ne, sinjoro, la digestado komenciĝas en la kuirejo, — korektis la profesoro.

★

ARISTOTELO (389—322 a. Kr.)

la granda greka filozofo, diris foje, kiam oni demandis lin, kio estas la espero?

— La sonĝo de la nedormantoj, — respondis la filozofo.



ARISTOTELES

ALPHONSE PAILLET (1795—1855)

estis franca advokato kaj aŭtoro de pluraj jurhistoriaj verkoj. Iu demandis lin foje: kio estas necesa por gajni proceson?

— Por gajni proceson, — respondis Paillet, — estas necesaj naŭ elementoj. Ili estas la jenaj:

- 1-e: Multa ŝparita mono.
- 2-e: Granda porcio da pacienco.
- 3-e: Bona proces-kaŭzo.
- 4-e: Bona advokato.
- 5-e: Bona prokuroro.
- 6-e: Bonaj atestantoj.
- 7-e: Bona juĝistaro.
- 8-e: Bona prezidanto.
- 9-e: Bona ŝanco.

★

PRINCO K. W. METTERNICH (1773—1859)



METTERNICH

estis aŭstria politikisto. La tuta mondo malamis lin, precipe la aŭstrianoj. En la muzeo de Praha ĝis hodiaŭ oni konservas unu skribajon, kiu pravas la egan malamon. Ĉi tiu dokumento estas la pasporto, kiun oni sendis al Metternich, kiam li en la jaro 1848 devis forkuri el

Aŭstrio pro la kolero de la Vienanoj. En la pasporto estas la jenaj partoj:

Naskiĝis: en la sterkejo Johannisberg (Johannisberg estas ĉe la rivero Rejno, tie estas la malnova kastelo de la familio Metternich).

Sidejo: la monujo de Aŭstrio, sur kiu li sidis kiel hirudo.

Loĝejo: antaŭe la palaco de la eksterafera ministerio sur la Ballplatz, nuntempe la landstrato, numero necerta.

Religio: ne havas, sed liaj sentoj inklinas plej multe al la rusa.

Profesio: antaŭe okupis sin pri ŝtataj aferoj, nuna profesio — kuri.

Vizaĝo: tia, ke estas malbone ĝin rigardi.

Buŝo kaj longo: akraj.

★

ADOLPHE PHILIPPE (1811—1899)

franca dramverkisto, konata sub lia verkista nomo Dennery, diris foje al sia edzino:

- Kien vi iras?
- Kien a! mi plaĉas!
- Kiam vi revenos?
- Kiam al mi plaĉos!
- Nu bone! Sed ne kuraĝu veni pli malfrue! — respondis la poeto.

NAPOLEONO BONAPARTE (1769—1821),

imperiestro de Francujo, foje en aŭdienco akceptis la historiiston Ameilhon, membron de la Franca Akademio, kiu estis modelo de kortegana lojaleco. Inter la imperiestro kaj la akademiano okazis la jena dialogo:

— Ah, vi estas, sinjoro Aneillon?

— Jes, Imperiestra Moŝto, mi estas Ameilhon.

— Jes, jes, Ameilhon... Vi daŭrigis la verkon de Lebon pri la historio de Romo?

— Jes, Moŝto, la verkon de Lebeau.

— Jes, mi scias, de Lebeau! Ĝis kiam la araboj okupis Konstantinoplon, ĉu ne?

— Jes, Moŝto, ĝis kiam la turkoj okupis

— Kompreneble, la turkoj... en 1449.

— Jes, Moŝto, en 1453.

Ameilhon post la aŭdienco diris al siaj amikoj:

— Nekredebla afero! La imperiestro scias ĉion! Memoras pri ĉio! Oni tute ne povas diri al li ion novan!

★

GRAFO STEFANO KÁROLYI (1797—1881),

hungara diplomato, estis granda filantropo.

En la jaro 1848 okazis en Hungarujo grava reformo en la ter-posedo kaj pro tio en la bienoj de grafo Károlyi multaj oficistoj fariĝis superflujaj. Tamen la grafo neniam el ili maldungis. Foje lia frato demandis al li:

— Kial vi ne forsendas viajn superflujajn oficistojn? Vi ja ne bezonas ilin.

La nobla grafo respondis:

— Estas vere, ke mi ne bezonas ilin. Sed ili bezonas min.

★

ARTHUR SCHOPENHAUER (1788—1860)

la fama germana filozofo estis foje en societo, kie sinjorinoj kaj sinjoroj diskutadis. Unu sinjorino demandis al Schopenhauer, kiuj estas pli inteligentaj, ĉu la viroj aŭ la virinoj?

— La virinoj, — respondis la filozofo, — ĉar ili edziniĝas kun viroj, dum la viroj edziĝas kun virinoj.



SCHOPENHAUER

la mondo ridas



La filo iras al universitato.

— Adiaŭ, patro! Kaj ne forgesu skribi al mi de tempo al tempo unu ĉekon!
(Judge)

★

Nun jam komprenebla.

— Paŭlo, kiel povas esti, ke via adicio estas ĉiam erara?
— Mi ne scias, sinjoro instruisto.
— Ĉu iu helpas al vi?
— Jes, mia patro.
— Kio estas via patro?
— Kelnero.
(Lustige Kiste)

★

Surpriza efiko.

Kritikisto: Via vintra pejzaĝo estas surprize fidela al la naturo. Oni preskaŭ malvarmas, rigardante ĝin.

Pentristo: Ankaŭ mi spertis tion. Hieraŭ rigardis ĝin unu nekonata artŝatanto kaj forirante li forportis kun si mian pelton el la antaŭĉambro.

(Dimanche Illustré)

★



La konscienca sportisto

antaŭ ĉio trastudas la koncernan fakan literaturon.

(Fliegende Blätter)

Ideala negoco.

— Ĉu vi scias, kio estus belega negoco?
— Kio?
— Se ni povus aĉeti la homojn je ilia vera valoro kaj vendi ilin je tiu valoro, kiun ili pri si mem imagas!
(Haagsche Post)


★

Duonigo.

— Vidu, fraŭlino Mari, tiu vazo, kiun vi hieraŭ rompis kaj poste kungluis, estis tre valora objekto. Sed mi volas dividi kun vi la domaĝon.

— Tre bone! Tiam la sinjorino pagos nur duonon de la gluilo kaj mi la alian duonon.
(Moustique)

★



Ho, tiuj knaboj!

— La knaboj estas terure mallaboremaj. Mi vidas tion ĉe mia frato.
— Sed li estas tre bona lernanto.
— Jes, sed li tamen ne volas ellabori miajn hejmtaskojn.
(Fliegende Blätter)

★

La servisto de la cirko.

— Kial vi estas tiel malgaja, amiko?
— Ĉar mortis la elefanto.
— Ĉu vi tiel multe amis tiun bestegon?
— Kia penso! Sed la direktoro ordonis, ke mi enterigu ĝin.
(Sunderland Echo)


★

La fluanta scienco.

Poŝtestro: Sinjoro pastro, paketo venis por vi el la urbo.

Pastro: Ho jes, certe sciencajn librojn oni sendas al mi.

Poŝtestro: Nur bonvolu kiel eble plej baldaŭ forporti tiun sciencan, ĉar ĝi fluas el la kesto.
(Black and Blue Jay)



En la ateliero de futurista pentristo.

— Jen, jen, kion faras la alkoholo!
(Lustige Blätter)

★

La eta fakuĵo.

Instruisto: Jen estas la frazo: „Mia patro aĉetas teatron“. Nun metu ĉi tiun frazon en la tempojn pasintan, estantan kaj venontan!

Fileto de teatra direktoro: Mia patro havis multan monon... Mia patro aĉetas teatron... Mia patro bankrotos.

(Lustige Kiste)

★

Senkulpigo.

Juĝisto: Vi do konfesas, ke vi trompis la aĉetanton, ĉar vi asertis pri la ĉevalo, ke ĝi estas du jarojn pli juna, ol kia ĝi fakte estis.

— Jes, sinjoro juĝisto, sed bonvolu konsideri, ke ĝi estis ĉevalino.

(Moustique)

★



Moderna manlaboro.


— Kiel belan vizaĝon vi havas, karu-lino!
— Ĉu ne? Kaj ĝi estas tute mia propra manlaboro.
(Jud. je)




La projekto de la Zamenhof-monumento en Bjalistoko.



En la pola urbo Bjalistoko, kie la aŭtoro de Esperanto, d-ro L. L. Zamenhof naskigis, oni konstruas monumenton je lia honoro. Nia maldekstra bildo montras la projekton de la monumento, kiu estos 12 metrojn alta. La fundamentan ŝtonon de la monumento oni jam metis en la teron post la Krakova kongreso. Nia supra bildo montras la solenan scenon, kiam la Bjalistoka vic-vojevodo Zawistowski subskribas la monumantan dokumenton. — Samideanoj, kiuj deziras helpi al la konstruado de la monumento, povas sendi siajn donacojn al nia redakcio, kiu volonte transsendos ilin al la Monumenta Komitato.



Du redaktoroj de konataj Esperanto-lingvaj gazetoj: s-ro E. Lanty (maldekstre) redaktoro de „Sennaciulo” en Parizo kaj s-ro H. W. Alings (dekstre), redaktoro de „Laborista Esperantisto” en Amsterdam.




Ĉi tiuj du bildoj (la supra kaj malsupra) montras, ke Arnhem estas vera Esperanto-urbo. Okaze de la jubilea festo de la Arnhema Fremdulaŭtika Unuiĝo la Arnhema Esperantistaro partoprenis en la solena procesio kaj gajnis la unuan premion.

Supra bildo: la ornamita aŭtomobilo de la Esperanto-reĝino.

Malsupra bildo: en la procesio tra la urbo trupo de Esperantistaj fraŭlinoj portas grandan verdan stelon, sur kiu staras la litero „E”.



Malproksimaj vizitantoj de la Esperanto-Domo en Arnhem. F-ino Lucia Atias el Bukureŝto kaj ingeniero Jagdhir Singh Ramana el Maur (Hinduĵoj) en la parko de la Esperanto-Domo. S-ro Ramana lernis Esperanton en Zŭrich kiel kursano de Andreo Cseh dum Novembro 1931 kaj li faris tiel rapidan progreson en la lingvo, ke la 17-an de Januaro li faris en Arnhem bonegan paroladon pri Hinduĵoj kaj ĝiaj popoloj.



GESINJOROJ MORARIU.

la famaj internaciaj instruantoj de Esperanto.

S-ro Tiberio Morariu lernis Esperanton en la jaro 1921 en Cluj (Transilvanio), kiel kursano de Andreo Cseh. Dum 1922—1927 li estis sekretario de la Esperanto-Centro Rumana en Bukureŝto kaj estas ĝis nun ĉefdelegito de UEA por Rumanujo. Dum 1924—1931 li gvidis multajn grandsukcesajn kursojn en Rumanujo, Svedujo kaj Danujo.

En Svedujo s-ro Morariu edziĝis kun sia talentoplena lernantino Lizeto Andersson el Örebro kaj nun ili kune disvastigas la mondlingvon. Dum la lasta aŭtuno ili gvidis kursojn en 7 urboj de Saksujo kaj nuntempe ili instruas en la svisaj urboj Bern, Zürich, Thun, Sankt-Gallen, Gossau kaj Herisau. Post Pasko ili gvidos kursojn en Vieno.

S-ro Morariu estas konata ankaŭ kiel eminenta tradukanto de la rumana literaturo. Liaj tradukaĵoj „Niĉjo Mensogulo“, „Nobela Peko“ kaj „Sonorilo kaj Kanono“ estas premiitaj de la Esperantista Akademio.



Kurso de nia fervora instruistino f-ino Margarete Saxl (X) en Berlino. Kvankam f-ino Saxl estas eminenta instruistino de la „mondlingvoj“ germana, franca kaj angla, ŝi tamen energie propagandas Esperanton.



La kanto-horo de la Esperanto-Societo en Tartu (Estonio). Ĝia gvidantino estas f-ino Hilda Ilwes (signita per X).

F-ino Elinjo Pähn, la eminenta instruistino de la Cseh-Instituto, sur kamelo en la ĵus fermita Kolonia Ekspozicio en Parizo. F-ino Pähn, estona ŝtata instruistino, lernis Esperanton en 1928 kiel kursanino de Andreo Cseh kaj dum 1930—31 ŝi faris multajn kursojn en Svedujo. Dum la lasta vintro ŝi instruis en Groningen, Winschoten (Nederlando), Strashbourg kaj Parizo. Nun ŝi laboras en Hälsingborg (Svedujo). Apud ŝi sidas s-ro L. Wijschenk, nederlanda samideano vivanta en Parizo.

LA MONDO ESTAS INTERESA



La valoro de Parizo.

Speciala komisiono de taksistoj kalkulis, ke la urbo Parizo valoras entute 6656 milionojn da dolaroj. El tiu sumo la Eiffelturo valoras 26 milionojn da dolaroj, sed se oni volus nun konstrui ĝin, ĝi kostus la duoblon. La muzeo Louvre valoras 1600 milionojn, la Operdomo 88 milionojn, la subtera fervojo („Metro”) 192 milionojn, la stratoj kaj pavimoj 640 milionojn kaj la subteraj kanaloj 144 milionojn da dolaroj.

La valoro de Londono laŭ la kalkuloj de la sama komisiono estas 11200 milionoj kaj la valoro de Nov-Jorko 16000 milionoj da dolaroj.

★

Pilgrimanto sur ŝarko.

La vaporŝipo Strathaird dum sia unua veturo al Aŭstralio savis en la Ruĝa Maro pilgrimanton, kiu falis el la ŝipo Antiochus dum pilgrima vojaĝo al Mekka. Estas interese, ke tuta aro da ŝarkoj ĉirkaŭis la viron, sed la danĝeraj fiŝegoj ne tuŝis lin. Tio faris al la araboj profundan impreson. Kiam la savita pilgrimanto en Aden forlasis la ŝipon, oni komencis honori lin kiel sanktulon. Kaj nun la popolo rakontas pri li, ke oni trovis lin sur la dorso de la plej granda ŝarko kaj kun vulturo sur la kapo.

La birdoj estas utilaj.

Proksime al la urbeto Tölz en Bavarujo ekzistas fama farm-bieno kun bird-koŝonjo. Ĝi estas vera paradizo de birdoj. Proksimume 80.000 birdoj vivas tie, inter ili 20.000 hirundoj. La birdoj ĉiutage ekstermas ĉirkaŭe 3200 kilogramojn da malutilaj insektoj kaj pro tio la multaj

fruktarboj de la bieno tute ne suferas pro la insektoj. Laŭ la observoj de la estro ĉiu bovino, kiun la muŝoj ne turmentas, donas ĉiutage unu litron pli multe da lakto. Tial li deziras, ke ĉirkaŭ ĉiu bovino ĉirku-ladu kelkaj hirundoj.

★

Aĉeteblaj telefon-numeroj.

En Japanujo oni povas aĉeti la telefon-numerojn. Se iu opinias pri sia telefon-numero, ke ĝi estas „malfeliĉa”, li iras en la bazon kaj aĉetas novan, pli bonan numeron. Laŭ japana opinio la paraj numeroj portas feliĉon. Tial por tiaj numeroj oni ofte pagas altajn sumojn. La plej feliĉa numero estas la 8. Tre ŝatata numero estas ankaŭ la 357. La plej malfeliĉa numero estas la 42, ĉar ĝi signifas la morton.

★

Kiel akiris Anglujo la insulon Man.

La malgranda insulo Man kuŝas inter Anglujo kaj Irlando. Dum jarcentoj daŭris la diskuto inter la du landoj pri tio, al kiu lando ĝi apartenas. Fine la du landoj interkonsentis pri speciala maniero de decido. En la komenco de la pasinta jarcento oni metis sur la insulon kelkajn venenajn serpentojn. Oni devas scii, ke en tuta Irlando ne vivas serpentoj, sed en Anglujo estas sufiĉe multaj. La interkonsento estis: se la serpentoj restos en vivo, tiam la insulo apartenas al Anglujo. Kun streĉa intereso oni atentadis la rezulton de la eksperimento. La serpentoj oĝie vivis kaj plimultiĝis sur la insulo kaj Irlando devis konfesi, ke Anglujo havas plenan rajton posedi la insulon.

La blanka elefanto ne toleras la pluvon.

La blanka elefanto estas malofta ne nur en Eŭropo, sed eĉ en sia propra hejmlando. Oni povas do kompreni la ĝojegon de ĉi direktoro de cirko en Francujo, kiam unu best-dresisto proponis vendi al li belan blankan elefanton. La direktoro tuj aĉetis la valoran beston. Antaŭ la malfermo de la cirko la tuta personaro de la cirko kun la bestoj aranĝis arandan reklam-rondiron tra la urbo. Sed okazis malfeliĉo: pluvis. Dum la rondiro la blanka elefanto iom post iom kriziĝis. La direktoro kun kolerego konstatis, ke la best-dresisto faris trompon. Ĉar li simple blankigis la ordinaran elefanton. Tial li forpelis la dresiston kaj akuzis lin ĉe la juĝejo. La juĝisto pravigis la direktoron kaj diris al la dresisto, ke li ekzercu la postarton sur simpla tolo, ne sur la haŭto de elefanto.

★

Kie en unu tago dufoje subiras la suno.

La loĝantoj de la angla urbo Leek ĉiutage dufoje povas vidi la sunsubiron. Ĉe la okcidenta flanko de la urbo estas montoj kun stranga formo, kiaj ĉe la mal-supro estas trarompitaj kaj oni havas la impreson, ke tra la montoj estas granda truo. En la tempo de la sunsubiro la suno iras malantaŭ la montoj. Tiam en la urbo tuj komenciĝas la krenusko kaj oni devas lumiĝi la lampojn. Sed post unu horo la suno denove sendas siajn radiojn tra la monta truo kaj en la urbo denove estas tago. Tamen tio ne daŭras longe kaj post kelkaj minutoj la suno definitive malaperas.

LA KURSANOJ RESPONDAS.

En la Ĉe-metodaj kursoj la kursanoj ricevas en kelkaj lecionoj specialajn foliojn kun diversaj demandoj. La kursanoj kun ĝojo respondas, parte por montri sian progreson en la lingvo, parte por feliĉigi la scivolan instruiston.

La demandfolioj anstataŭas la hejmtaskojn.

Ĉi tie ni prezentas kelkajn interesajn respondojn je la demando: „Kion vi faras, se muŝo falis en vian glason?”

„Se muŝo falis en mian glason, mi prenas la muŝon el la glaso kaj portas ĝin al la kuracisto.” (A. K., Bern).

„Mi prenas la muŝon el la glaso kaj donas ĝin al mia edzino.” (K. O., Stockholm).

„Mi faras tiel, kiel la ĉino, ĉar ankaŭ mi estas ĉino, ĉar mi estas nederlandano kaj la nederlandanoj oni nomas: la ĉinoj de Eŭropo.” (J. B., Hago).

„Sed kio estas en la glaso? Se estas akvo, mi elverŝas ĝin. Se biero, mi elprenas la muŝon kaj trinkas la bieron. Se bruna biero,

mi ne vidas la muŝon kaj trinkas ĝin kun la biero.” (J. S., Dresden).

„Mi elprenas la muŝon, sekigas ĝin kaj diras al ĝi: flugu, flugu kaj estu feliĉa, malgranda besteto!” (L. S., Oslo).

„La muŝo ne havas tempon fali en mian trinkajon, ĉar mi rapide eltrinkas.” (O. G., Berlin).

„Mi elprenas la muŝon. Se en la glaso estas akvo, mi verŝas ĝin sur la plankon. Se estas vino, mi verŝas ĝin en mian buŝon.” (J. M., Paris).

„Mi metas la glason en sekreto antaŭ la personon, kiu sidas apud mi.” (A. R., Riga).

„Mi metas la muŝon sur la plankon kaj mi metas mian piedon sur ĝin.” (K. P., Tartu).

„Mi petas de la kelnero novan trinkajon kaj mi trinkas la novan kaj la malnovan.” (S. L., Krakovo).

Oni povas konstati, ke la kursanoj kuraĝe kaj sprite uzas la lernatan lingvon kaj ke la instruisto vere povas esti feliĉa.

PANORAMO



Unu vendisto de glaciaĵo en Kalifornio konstruis sian butikon en formo de glaciaĵ-maŝino.



Filo de Orient-Afrika gentestro, ornamita per cikatroj. La cikatrojn oni faras per tranĉilo kaj en la freŝan vundon oni enfrotas teron, cindron kaj aliajn aĵojn. Ankaŭ la eleganta frizaĵo montras, ke li estas tre altranga junulo.




„Rigardu, rigardu! Mi estas la plej malgranda ĉevalo en la tuta mondo. Mia pezo estas nur 28 kilogramoj. Mia mastro estas farmisto en Kanado.”



Unu sola muŝo portas sur sia korpo **SES MILIONOJN** da bakterioj. Ĝi disvastigas la ĝermojn de la tifo, infana lakso, skarlatino kaj aliaj danĝeraj malsanoj. La muŝo estas multe pli danĝera besto, ol la leono aŭ la venena serpento.




Grandeĝa ŝtoniĝinta arbo en la „Petrified Forest” (ŝtoniĝinta arbaro) en la ŝtato Arizono de Usono. Ĉi tiu arbaro estas 10,358 hektarojn vasta kaj en la jaro 1906 la usona prezidanto Roosevelt deklaris ĝin „nacia parko”.




La azeno pentras bildon. Kelkaj bonhumoraj junuloj en Francujo trempis la voston de azeno en diversajn kolorojn kaj per bastono batadis ĝin. Tiamaniere la malfeliĉa besto fariĝis pentristo. La junuloj portis la „pentraĵon” al la ekspozicio de la modernaj pentristoj. Tie ĝi pendis inter la diversaj futuristaj kaj kubistaj bildoj, sub titolo: „Sunsubiĉo ĉe la oceano”. Fama kritikisto, kiu ne konis la historion de la pentraĵo, skribis pri ĝi en unu gazeto: „ne ordinara, kuraĝa pionira verko”.



La progreso de la tekniko. En Ameriko oni fabrikas sinjorinajn mantelojn, kiuj interne havas elektrajn hejtilojn.



Portreto de Tolstoj, teksita el virinaj haroj. La farinto de la admirata gobelino estas la rusa artisto Grigori Boruhov.



Poŝtmarko, sur kies dorsa flanko estas skribita per mano unu tuta ĉapitro el la biblio per tre malgrandaj literoj. La skribinto estas unu hispana junulo.

KONKURSOJ

GRAVAJ INFORMOJ:

La ĝeneralajn regulojn pri la partopreno en niaj konkursoj bonvolu serĉi en la Januara numero de LA PRAKTIKO.
 Ĉar la Januara numeron ni devis denove presigi kaj tial multaj abonantoj ricevis ĝin malfrue, por ke ankaŭ ili povu partopreni en la

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

interesaj kaj instruaj konkursoj, ni decidis plilongigi la limtempojn. Ni akceptas solvojn de la 1-a, 2-a, 3-a, 5-a kaj 6-a konkursoj ĝis la 1-a de Majo 1932. La limtempo de la 4-a konkurso (Kiom da kongresanoj havos la Kongreso en Parizo?) ni plilongigas ĝis la 1-a de Junio.

7-a konkurso

Vi lernis, ke en Esperanto la sufiksoj kaj prefiksoj estas veraj, memstaraj vortoj.

La tasko estas: faru vortojn, kiuj konsistas nur el sufiksoj, prefiksoj kaj gramatikaj finaĵoj, ekzemple: *ano, ero, etulo, disigi k.t.p.*

Reguloj. 1) Oni povas uzi ĉiujn prefiksojn kaj sufiksojn kaj la gramatikajn finaĵojn a, o, i, j.

2) Unu elemento povas nur unufoje esti en la sama vorto. Tial ekz-e ni ne akceptas la vorton „etuleto“.

3) La vortoj devas havi klaran sencon. La netaŭgajn vortojn ni forstrekos antaŭ la juĝo.

15 premiojn ni disdonas al tiuj, kiuj ensendas la plej bonajn solvojn laŭ kvanto kaj kvalito de la vortoj.

Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Majo.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn. Ne forgesu alglui la kuponeton.

8-a konkurso.

ENIGMO

Ĉi tiun enigmon ni prenis el la libreto LA ENIGMOJ (vidu la apartan anoncon) kiel specimenon por niaj legantoj.

Ĉiu rondeto signifas unu literon. Unu super la alia estas ĉiam la samaj literoj.


1. Malsupra parto
2. Grava tago
3. Pezo
4. Blanka korpoparto
5. Laŭ ĝi oni instruas
6. La pastro faras ĝin
7. Sur la ŝnuro estas
8. Valora metalo
9. Okazo fari malbonon
10. Komuna sorto
11. La fabriko ricevas ĝin
12. La fianĉino havas
13. Manĝata kreskaĵo
14. Metallo
15. Difekto
16. La avo havas
17. En la letero estas
18. Tirado de la virinoj
19. Parto de la kapo
20. Malfacilaĵo
21. Planedo
22. Mezuro
23. Trinkajo
24. Elegantu
25. Birda dometo
26. Samfamiliano
27. Ĉe la fajro estas

La solvo:

Al la solvintoj ni donos 14 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Majo.

Bonvolu atenti la ĝeneralajn regulojn.

9-a konkurso



Grava tago en la vivo de la bona sinjoro Adamson.

La tasko estas: Bonvolu mallonge kaj sprite rakonti tion, kion ĉi tiu bildserio prezentas. Oni povas rakonti ankaŭ en versoj, farante pri unu bildeto maksimume unu kvarlinian strofon.

Per 15 premioj ni rekompencos la plej bonajn solvojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Majo. Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn.

10-a konkurso

Kiom da abonoj vi kolektis por LA PRAKTIKO?

Al tiuj personoj, kiuj kolektas por LA PRAKTIKO almenaŭ 10 pagitajn abonojn, ni disdonos premiojn (librojn kaj diversajn objektojn) en diversaj valoroj. Ĉiu partoprenanto de ĉi tiu konkurso ricevos premion. Inter la premioj estos 50 ĉef-premioj altvaloraj. Ju pli multe da abonoj iu kolektis, des pli valoran premion ricevos.

Reguloj: 1. Kiu volas partopreni en ĉi tiu konkurso, bonvolu ĝis la 1-a de Junio 1932 sendi al la redakcio la liston de tiuj abonantoj, kiujn li varbis kaj kies abonmonon li mem sendis al ni. Alglui la konkurs-kuponon.

2. Sur la listo bonvolu aldoni ankaŭ la datojn, kiam vi sendis la abonojn, por faciligi al ni la kontrolon.

3. Do vi povas sendi al ni la kolektitajn abonojn aparte, tuj post la ricevo, ne atendante ĝis la 1-a de Junio.

4. En la konkurso estos konsiderataj nur la pagitaj abonoj, ne la senpagaj abonoj donitaj al la kolektintoj de sep abonoj.

5. La partopreno en ĉi tiu konkurso ne tuŝas la rajton de la kolektanto ricevi post ĉiu sepa pagita abono unu senpagan abonon. Do la kolektanto ricevas la senpagajn abonojn kaj la konkursan premion.

Kupono
por la
7-a
konkurso

Kupono
por la
8-a
konkurso

Kupono
por la
9-a
konkurso

Kupono
por la
10-a
konkurso

11-a konkurso.

El la radiko „arb-“ faru novajn vortojn per la prefiksoj kaj sufiksoj!

Reguloj: 1. Oni povas uzi ĉiujn prefiksojn kaj sufiksojn kaj la gramatikajn finaĵojn a, e, o, i, j.

2. En unu vorto povas esti plej multe tri sufiksoj.

3. Ĉiu vorto devas havi klaran sence.

Al tiuj personoj, kiuj faris la plej multajn kaj plej bonajn vortojn, ni disdonos 15 premiojn.

Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Majo. La listo de la gajnintoj kaj la plej bona solvo aperos en LA PRAKTIKO.

Bonvolu legi la ĝeneralajn regulojn!

12-a konkurso

EKZAMENO.

Jen dek seriozaj demandoj. Ili estas facilaj, sed ne tre. Bonvolu doni la respondojn!


1. Kiu estas la plej malgranda respubliko en Eŭropo?
2. Kiu franca reĝo diris: „La ŝtato estas mi“?
3. Kiu granda germana poeto mortis en Parizo?
4. Kiu eltrovis la alumeton?
5. Kiu besto povas plej altan salti, proporcie kun la grandeco de sia korpo?
6. Kiu viando estas pli nutra, ĉu la kuirita aŭ la rostita?
7. Kiam kaj en kia malsano mortis Julio Cezaro?
8. Kie vivas la druoj kaj kie vivas la gruzoj?
9. Kiom da kilogramoj pezas la ovo de la baleno?
10. Kio estas la nomo de tiu armeo, kiu neniam rajtas pafi?

Al tiuj personoj, kiuj sendas al ni la ĝustajn respondojn, ni disdonos 15 premiojn. La ĝustajn respondojn ni publikigos.

Respondojn ni akceptas ĝis la 1-a de Majo.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

13-a konkurso



Ĉu en ĉi tiu lernejo estas ĉio en ordo? Se vi trovas erarojn, bonvolu fari liston kaj sendi ĝin al ni.

Estas tre praktike, se vi metas sur la bildon traveblan paperon kaj sur ĝi donas numeron al ĉiu erara parto de la bildo. Sur alia papero vi nomas la erarojn laŭ la numeroj.

20 premiojn ni donos al tiuj personoj, kiuj trovis plej multe da eraroj. Solvojn ni akceptas ĝis la 1-a de Majo.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn en la Januara numero.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 respondakupojn). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

BULGARUJO.

Ĉuĉuligovo, cv. Vraĉko. — S-ro Georgi Andreev, 25-jara oficisto, Mituizata. L, PI k.ĉ.l. pri ĵiversaj temoj.

GERMANUJO.

Bünde in Westfalen. — S-ro E. Hollmann, 45-jara instruisto, Holtkampstr. 64. K.ĉ.l. pri laŭplaĉa temo.

ISLANDO.

Ĉe-metodaj kursanoj de Th. Thordarson dez. kor. k.ĉ.l.:

Reykjavik. — S-ro Sigurdur Thorlacius, lernejestro, Nyi barnaskólinn. Dez. kor. pri blindulaj aferoj.

Reykjavik. — S-ro Sigurjón Jónsson maŝinisto, Njálsgata 35. (27-jara fraŭlo).

Reykjavik. — S-ro Asbjörn Ol. Jónsson, Hverfisgata 68.a. (30-jara dompen-tristo. Dez. kor. pri pentristaj aferoj k. aliaj temoj).

Reykjavik. — S-ro Fridjón Skarphjedinsson stud. de juro, Bankastræti 7. (22-jara fraŭlo).

Reykjavik. — F-ino Marta Guðjónsdóttir, Garðastræti 21.

Reykjavik. — S-ro Magnus Einarsson maristo, Nylandugata 22.

Reykjavik. — S-ro Jón Sigurdsson instruisto, Nyi barnaskólinn. Dez. kor. pri edukaj aferoj.

Reykjavik. — S-ro Haraldur Erlendsson, laboristo, Vellir, Seltjarnarnes.

NEDERLANDO.

Breda. — S-ro Ph. Fickinger, 33-jara prokuristo, Teteringschedijk f. 161. (PI, k.ĉ.l. pri komerco).

Helmond. — Helmonda Esperanto-Grupeto, Tolpoststraat 56. (20-30-jaraj personoj dez. kor. k.ĉ.l., ne kun Germanujo).

Schingen apud Dronrijp, Ned. Frisl. — S-ro H. P. Breuker, 20-jara farmisto. Dez. kor. k.ĉ.l., prefere kun ĝejnuloj.

NORVEGUJO.

Hamar. — F-ino Unn Nyseth, 25-jara instruistino.

Lillehammer. — S-ino Ruth Kristiansen, vidvino de kuracisto, Bj. Bjørnsonsgate 20.

Oslo. — F-ino Liv Sandberg, 20-jara stenografistino, Bekkelagshøgda.

POLUJO.

Tarnów. — F-ino Irena Trautówna, instruistino de ritmaj dancoj. — (L. PI k.ĉ.l., p.ĉ.t., speciale pri dancarto, sporto kaj Esp-movado. Interŝ. ilustr. gazetojn).

SVEDUJO.

Karlstad. — S-ro Evert Jansson, 21-jara kontoristo, P. Box 139. PI k.ĉ.l.

SVISLANDO.

Bern. — F-ino Gertrud Gruber, Bridelstr. 81.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandojn bonvolu aldoni respond-markon.

J. S. R., Hindujo. — Vi demandas: Kial oni uzas en Esperanto kvar diversajn alfabetojn? Estas grava malfacilaĵo, ke ni, hindoj kaj aliaj aziaj popoloj, lernante Esperanton, devas elteni ankaŭ kvar novajn literaĵojn. En niaj lingvoj ekzistas unu sola alfabeto kaj ĝi sufiĉas. — Vi estas prava. Ni, eŭropanoj, uzas vere kvar alfabetojn:

1. a, b, c.
2. A, B, C.
3. a, b, c.
4. A, B, C.

Sed ni ne rimarkas tiun balaston, ĉar ni lernis ilin kiel infanetoj, ni kutimis al ili per la ĉiutaga uzado kaj ni neniam pensas pri tio, ke la tero povus turniĝi ĉirkaŭ sia akso ankaŭ se ni iom simpligus nian vivon. Por ni estus la malfacilaĵo, se ni forlasus nian komplikitan manieron. Ni povus uzi en Esperanto, kiel vi proponas kaj per via propra letero ilustras, nur unu alfabeton (a, b, c, kaj forlasi A, B, C), sed estus tre maloportune rompi la nuntempan ĝeneralan kutimon. Fakte ekzistas klopodoj simpligi la skribadon, parte per forlaso de la grandaj literoj, parte per enkonduko de tute nova literaro racie ellaborita, taŭga por manskribo kaj preso kaj ankaŭ por stenografado. Ni esperu, ke tiuj klopodoj sukcesos por la bono de niaj nepoj. Se vi skribas viajn Esp-lingvajn leterojn sen grandaj literoj ĉe la frazkomenco kaj propraj nomoj, oni ne kuraĝos vin riproĉi, ĉar ankaŭ en Eŭropo faras jam tion kuraĝaj personoj.

Diskutantoj en B. (Svedujo). — La objekto de via diskuto estas: Kiu formo estas la ĝusta el la du: centjaro kaj jarcento? Ni respondas, ke la ĝusta formo estas jarcento. La klarigo estas, ke en la kunmetitaj vortoj la ĉefa vorto devas stari en la fino. En ĉi tiu kazo la ĉefa vorto estas cento kaj la vorto jaro estas nur adjektiva, klariga vorto. Observu la demandojn kaj respondojn: Kio? cento. — Kia cento? jara cento (cento de jaroj, cent konsistanta el jaroj). Kaj nun renverse: Kio? jaro. Kia jaro? centa jaro. Nun vi vidas, ke ĉi tiu lasta estas malbona. La formo centjaro estas do sendube

malĝusta, sed tamen oni ofte uzas ĝin. Ni mal-konsilas ĝian uzadon.

C. P., Amsterdam. — Kun bedaŭro ni informas vin, ke vi perdis la veton, ĉar en via frazo: „La birdoj kaj siaj idoj estis malsataj“ la vorto „siaj“ estas malĝusta. Devas esti: iliaj. La ŝlosilo de la problemo estas la regulo, ke la vorto si aŭ sia ne povas esti subjekto en la frazo.

B. S., Eindhoven. — Vi plendas, ke en neniu lernolibro vi trovis respondon je via demando: Kial ni devas legi:

7 : 2 kaj $\frac{3}{4}$: 3?

Laŭ via opinio: „sep dividita per du“ kaj „tri kvaronoj dividitaj per tri“. Vi estas prava. Sed por eviti la maloportunan diferencigon inter dividita kaj dividitaj, vi povas ĉiam diri: dividite per. En la praktika vivo ni kutimas diri tute mallonge: sep per du kaj tri kvaronoj per tri.

K. B. en W. (Germ.). — Vi demandas: Kial ni devas diri, ĉu „skribi sur la papero“ aŭ „skribi sur la paperon“? Ni respondas, ke ambaŭ manieroj estas bonaj. La afero dependas de tio, kiel vi klarigas la vorton „skribi“. Ni povas klarigi: skribi = fari vortojn sur la papero. Sekve de ĉi tiu klarigo ni devas diri: skribi sur la papero. Sed se ni klarigas: skribi = meti vortojn sur la paperon, tiam ni diras: skribi sur la paperon. Bonvolu libere elekti, ĉar kiun ajn formon vi uzas, oni bone komprenas vin kaj miskompreno ne estas ebla.

„Dumviva abonanto“. — La vorto „mansardo“ signifas subtegmentan ĉambron. Ĝi venas el la nomo de la franca konstruisto Jules Mansard, kiu en la 17-a jarcento kiel unua komencis konstrui tiajn subtegmentajn ĉambrojn.

ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

Kiom da? — Novaj Esp-istoj ofte diras ĉi tiun demandon. Ĝi estas malbona. Oni devas diri nur: *Kiom?* La vorteto „da“ ne apartenas al la vorto „kiom“, sed al iu substantivo, kiu devos ĝin sekvi. Tial bona frazo estas: *Kiom da akvo?*

Kune kun. — Ni ofte aŭdas la frazon: *Ili iris kune kun.* Ĝi estas tre malbona. La vorto *kun* estas prepozicio, do ĝi devas esti ĉiam antaŭ iu substantivo. La bona

frazo estas: *Ili iris kune.* Tute alia frazo estas: *Ili iris kune kun la amikoj.* Ankaŭ ĉi tiu frazo estas bona, ĉar la vorto *kun* ne estas sola, sed kun substantivo.

Promenas sin. — Kelkfoje ni trovis la frazon: *Mi promenis min.* Ĝi estas malbona. La vorto *promenas* ne estas refleksiva verbo. Oni devas diri: *Mi promenis.*

Mi iris ĉe mia amiko. — En ĉi tiu frazo la vorto ĉe estas malĝusta. Ni povas diri: *mi estis ĉe mia amiko*, sed ni devas diri: *mi iris al mia amiko.* En Esp-o la vorto ĉe signifas nur staton. La movon ni esprimas per la prepozicio *al*.

La malriĉulo demandis helpon. — La frazo estas malbona. Oni devas diri: *la malriĉulo petis helpon.* Oni ofte intermiksas la du verbojn: *peti* kaj *demandi*. Ĉar en kelkaj lingvoj la vorto „demandi“ havas ankaŭ la signifon de „peti“. Sed en Esperanto la vorto *demandi* signifas nur: *peti informon*. Bonvolu rigardi la du vortojn en via vortaro, por ke vi uzu ilin ĉiam korekte.

ANONCETOJ

TARIFA: 1 vorto aŭ mallongigo 0.33 guld.

Helpu gravan ekspozicion! — En la pola urbo Sosnowiec, kie en la popollernejoj oni komencis instrui Esperanton, ni intencas aranĝi ekspozicion por plifortigi la favonon de la lernia straro kaj de la gepatroj. Samideanoj bonvolu sendi al ni taŭgajn objektojn por la ekspozicio. Koran antaŭdankon! Adreso: s-ro J. Goldkorn, Ĉe-metoda instruisto, strato Wiejska 2, Sosnowiec, Polujo.

KURSGVIDANTO! Mi deziras korespondi kun gvidanto de infan-kursoj laŭ la Ĉe-metodo. Adreso: F-ino Leonia Fruchtówna, Ĉe-metoda instruistino, p. adr. s-ro H. Oberländer v. Sternberg, ul. Główna 95, Czortków, Polujo.

KORESPONDO. Kiu deziras interŝanĝi ideojn kun samideano en sovaĝoĉidenta lando? Skribu al s-ro W. H. Fenton, Magee High School, Vancouver, B.C. (Kanado).

Sko!toj! Adresojn de Esperantistaj skoltaj, kiuj intencas viziti en la jaro 1933 la mondjamboreon en Budapeŝto, serĉas s-ro *Pavlo Balkányi*, Hajós-ut. 15. II, Budapeŝto VI. (Hungarujo).

Mendeblaj ĉe la:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

Oostduinlaan 32, DEN HAAG (Nederlando)

Poŝteĉkonto: Den Haag 16266

- LA KURSO DE ANDREO CSEH.** La stenografita kaj poste mimeografita teksto de unu tuta kurso de Andreo Cseh farita en Stokholmo en 1928. La kurso kaj enkonduko kun klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruantoj, krom tio aldoni ĉ. entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo, afrankite 7.75 G.
- KONVERSACIA VORTARO.** Sercaj difinoj de la vortoj uzataj en la kursoj -25 „
- KONVERSACIA LITERATURO.** 8 numeroj, unu n-o -10 „
- KARTONA UJO** por la Konversacia Literaturo . . . -10 „
- KONVERSACIA GAZETO.** Unusola n-ro kun plena informaro pri Esp-o, por enkonduki la novajn Esp-istojn en la movadon -20 „

- KANTO AL LA ESP-DOMO.** Verkita de C. Roskes-Dirk-sen. Muziknotoj kun teksto -15 G.
- POSTKARTOJ KUN LA BILDO DE LA ESP-DOMO** sur la adresflanko. Tre taŭgaj por skribmaŝino, 50 pecoj -75 „
- BILDKARTOJ** pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem, 10 belegaj il. poŝtkartoj kun Esp-teksto, pri la ekstero kaj interno de la Esp-Domo kaj pri la urbo Arnhem. la 10 kartoj kune afrankite 0.50 „
- BILDKARTOJ,** poŝtkartoj kun portretoj de D-ro Zamenhof, Andreo Ĉe kaj de Ĉe-metodaj instruistoj, ĝis nun 10 diversaj kartoj. Unu peco -10 „
- GVIDLIBRO** pri Arnhem, 32-paĝa libreto ilustrita . . . -15 „
- PLANO DE ARNHEM,** kolorpresita plano de la urbo, la loko de la Esp-Domo aparte markita sur ĝi . . -40 „
- VERZAMELDE EXAMENOPGAVEN** -45 „
- VERTAALDE EXAMENOPGAVEN** -50 „

La prezoj entenas la afrankon!

Ni dankas

al niaj abonantoj, kiuj sendis al ni ne nur la abonmonon, sed ankaŭ sian kuraĝigan simpation. Ni klopodos doni al ili tian gazeton, kiu plene kontentigos iliajn dezirojn kaj atendojn.

Speciale ni dankas al tiuj samideanoj, kiuj fervore kolektis abonojn. Ni publikigas ĉi tie la unuan liston de tiuj personoj, kiuj ĝis nun kolektis almenaŭ 7 abonojn:

S-ro C. S. Bowitz en Oslo (8 abonojn), D-ro F. Christanell en Salzburg (7), f-ino J. Doering en Berlin (8), Prof. A. Eckelt en Aussig (7), s-ro O. van Hoek en Winschoten (7), s-ro A. L. Moreau en Arnhem (23), s-ro J. Mraz en Linz (7), f-ino M. Norheim en Hamar, Norvegujo (16), Nova Esp.-Klubo en Sankt-Gallen, Svisujo (21), s-ro A. Pascha en Bergen, Nederl. (7), s-ro S. Pragano (39), f-ino E. Schelchen en Berlin (7), s-ro W. H. G. van Tinteren en Amsterdam (8), s-ro A. Viberg en Hålsingborg, Svedujo (7), f-ino S. M. Wijers en Hago (7), s-ino E. Ziedins en Riga (7). La rekordon tenas s-ro S. Pragano kun 39 kolektitaj abonoj.

La fervora simpatio de nia legantaro instigas nin anonci specialan konkurson kun premioj al tiuj legantoj de nia gazeto, kiuj kolektas abonojn. La detalojn pri la konkurso bonvolu serĉi sur la paĝo de la konkursoj inter la ceteraj konkursoj.

Multaj samideanoj sendis al ni malpli ol 7 abonojn kaj je iliaj demandoj ni respondas ĉi tie, ke ankaŭ ili rajtos ricevi senpagan abonon poste, kiam ili sendas al ni la sepan pagitan abonon. Ili havas ankaŭ la rajton transdoni sian senpagan abonon al alia persono.

Antaŭ ol sendi al ni la abonmonon, oni zorge tralegu niajn konsilojn pri la sendo de mono. Oni povas rimarki, ke por kelkaj landoj ni fiksis specialan manieron kun favora prezo. Tion ni faris por faciligi la sendon de mono.

Ni petas, ke oni sendu la adresojn de la abonantoj kaj la monon ĉiam en sama tempo, por eviti erarojn ĉe la enskribado de la abonoj.

LA PRAKTIKO.

Ĉi tie detranĉi!

Mendilo de koresponda anonceto

Unufoja enskribo kostas .45 ned. guld. (= 3 poŝtajn respond-kuponojn). La abonantoj de LA PRAKTIKO povas unufoje en la jaro senpage anonci.

Bonvolu skribi tre klare, se eble, per skribaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Nomo:

Profesio:

Aĝo (laŭvole, sed konsi'linde):

Adreso:

Dezirata korespondi per leteroj poŝtkartoj kun la landoj: il. p-kartoj

..... pri la temoj:

Specialaj deziroj:

Mi promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu, kiu al mi skribas

La monon mi sendas samtempe per

Dato:

(subskribo)

ABONILO

Ĉiu persono, kiu kolektas 7 abonojn, ricevas LA PRAKTIKON senpage!

Bonvolu sendi la kolektitajn abonojn sur ĉi tiu papero. Skribu tre klare, se eble, per skribaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Abonprezo: }
Maniero de } turnu kaj legu: 
pago: }

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

S-ro:	1
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	2
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	3
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	4
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	5
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	6
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	7
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	
S-ro:	SENPAGE
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	

La sumon de mi sendas samtempe
per

Dato:

(subskribo)

Ni petas

niajn legantojn, ke ili bonvolu kunlabori, sendante al ni interesajn fotografiajn kaj informojn pri la Esperantista vivo, por publikigo en LA PRAKTIKO.

Kun aparta danko ni akceptas taŭgan materialon por niaj specialaj paĝoj: MOMENTON, LA MONDO RIDAS, LA MONDO ESTAS INTERESA, KONKURSOJ kaj PANORAMO. Sufiĉas ankaŭ nur tekstoj, ĉar la bildojn povas fari nia desegnisto.

La redakcio.

Abonprezo de LA PRAKTIKO: por unu jaro 1 dolaro (= 2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro.

(La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Jul. kaj Okt.).

La abonon kaj monon sendu al:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto,
Oostduinlaan 32, Den Haag (Nederlando).

Vi povas sendi la monon en diversaj manieroj:

- 1) Transpagu la monon per poŝtĉeko al nia poŝtĉekkonto: Den Haag 162626. Sur la kupono aldonu, ke ĝi estas por la abono.
 - 2) Ĉetu en banko amerikan dolaran papermonon kaj sendu ĝin al ni en rekomendita (registrita) letero.
 - 3) Sendu la monon per poŝtmandato. Sur la kupono de la mandato ne forgesu aldoni, ke vi sendas la monon por abono.
 - 4) Per banka ĉeko.
 - 5) Per UEA-kuponoj aŭ poŝtaj respondkuponoj. Unu poŝtan respondkupono ni akceptas en valoro de — 15 ned. guld.
 - 6) Krom la supraj kvin manieroj ni nomas por kelkaj landoj pluan, specialan manieron:
- AŬSTRIO. — Vi povas sendi al ni en letero 7.— ŝilingojn en aŭstria papermono.
- BRITUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5 ŝilingojn en brita papermono aŭ en britaj poŝtmarkoj.
- DANUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— kronojn en dana papermono.
- ESTONIO. — Vi povas aboni ĉe s-ro Joh. Jaanisto, Kastani 125-1, Tartu, kaj pagi al li 3.50 est. kronojn.
- FRANCUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 25.— frankojn en francaj monbiletoj.
- GERMANUJO. — Vi povas sendi al ni per poŝtĉeko, per bankĉeko, per poŝtmandato aŭ per germana papermono en letero la sumon de 4.— germ. markoj.
- HISPANUJO. — Vi povas sendi al ni per poŝtmandato aŭ per hispana papermono en letero 10.— pesetojn.
- HUNGARUJO. — Vi povas aboni ĉe s-ro Paŭlo Tolnai, Amerikaj-ut 36, Budapeŝto VII, pagante al li 5.— pengojn. Poŝtĉekkonto: 45.327.
- ITALUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 20 lirojn en itala papermono.
- LATVUJO. — Vi povas aboni ĉe s-ro Talivaldo Indra, Pasta kaste 475, Riga, kaj pagi al li 4.50 latojn. Poŝtĉekkonto: Riga 7.
- NORVEGUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— kronojn en norvega papermono.
- POLUJO. — Vi povas sendi al ni per poŝtmandato aŭ rekomendita letero per polaj papermonoj 8.— zlotojn.
- RUMANUJO. — Vi povas aboni ĉe f-ino Eugenia Morariu, strada Bravilor 15., Cluj, pagante al ŝi 150.— leojn.
- SVEDUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— kronojn en sveda papermono.
- SVISLUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— frankojn en svisa papermono, aŭ en svisaj poŝtmarkoj.

Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu kune la abonon, por ŝpari poŝtan afrankon.

Kune kun la abono oni povas sendi ankaŭ mendon por la eldonaĵoj de la Int. Cseh-Instituto, anoncataj en LA PRAKTIKO.

Se vi devas sendi en letero papermonon pli valoran, ol la pagota abonsumo, por la diferenco ni volonte sendos al vi eldonaĵojn anoncatajn en LA PRAKTIKO, laŭ via elekto.

NOVAĴOJ

Esperanto en polaj ŝtataj lernejoj. — Dank' al la senlacaĵa klopodo de s-ro J. Goldfarb instruisto de la Cseh-Instituto, la inspektoro de la ŝtataj lernejoj en la pola urbo Sosnowiec kaj ĝia distrikto, oni donis permeson al instruado de Esperanto en la popolaj lernejoj. Oni tuj komencis kursojn por 236 infanoj. Ĉi tiu sukceso estas tiel grava, ĉar ĝin povas sekvi la instruado de Esperanto en multaj aliaj lernejoj. Niaj legantoj estas petataj subteni la favoron de la lerneja estraro, sendante dankletojn al la distrikta lernejs-inspektoro, la adreso estas: s-ro St. Luchowicz, Inspektorjat Szkolnej, ul. Malachowskiego 22, Sosnowiec, Polujo.

Semajnfinoj en Arnhem. — En la Esperanto-Domo okazis semajnfina kunveno en Januaro kaj Februaro. En la Januara kunveno s-ro Teo Jung, ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto, gastis de la Esperanto-Domo faris interesan kaj valoran prelegon pri la historio de la mondlingvaj projektoj kaj s-ro Andreo Ĉe parolis pri siaj propagandistaj spertoj. En la Februara kunveno du gastoj, s-ro George Warnier, prezidanto de la Pariza Kongresa Komitato kaj s-ro L. N. Newell el Londono, nuntempe ĝen. sekr. de la Pariza Kongresa Komitato, donis al la kunvenintaj gesamideanoj goĝon kaj ĝuon. S-ro Warnier kun la agrabla franca spirito kaj kun multaj belaj bildoj paroladis pri Parizo kaj invitis al la kongreso. S-ro Newell faris interesan kaj bone ilustratan prelegon pri „la poezio en Esperanto”. La semajnfinaj kunvenoj pasis en tre agrabla atmosfero. Partoprenantoj venis el diversaj partoj de Nederlando.

D-ro Edmond Privat en Hindujo. — Ĉiu Esperantisto konas la nomon de D-ro Privat, aŭtoro de la klasikaj verkoj „Historio de Esperanto”, „Vivo de Zamenhof” k.a. kaj la plej eminenta oratoro de Esperantujo. En Januaro oni povis vidi lian bildon kaj aŭdi lian voĉon en ĉiuj kinoteatroj de la mondo, kiam la semajnaj film-raportoj montris la viziton kaj paroladon de Gandhi en Ĝenevo, kun D-ro Privat kiel lia akompananto kaj tradukanto. La vizito de Gandhi al Svislando kaj Italujo aranĝis D-ro Privat mem. Post la fino de tiuj vizitoj la fama hinda kondukanto invitis D-ro Privat kaj lian edzinon al vizito en Hindujo. Ili kune vojaĝis al Hindujo kaj post la enkarcerigo de Gandhi ges-roj Privat faris stud-vojaĝon tra Hindujo. D-ro Privat faris ankaŭ propagandon por Esperanto. Li faris paroladojn pri Esperanto en la urboj Dehli, Benares, Calcutta kaj Madras kaj la 19-an de Januaro li estis akceptata de la vic-reĝo de Hindujo, Lordo Willingdon. — Gesinjoroj Privat en Februaro revenis al Eŭropo kaj dum la paska libertempo ili estos gastoj de la Cseh-Instituto en la Esperanto-Domo en Arnhem, kie ili partoprenos en la lingva konferenco kaj poste D-ro Privat donos universitatan kurson. Li faros ankaŭ publikajn paroladojn en Arnhem kaj Hago pri sia vojaĝo kaj spertoj en Hindujo.



La ŝatataj

FLAGINSIGNOJ

speciale taŭgaj por vojaĝo kaj kongreso, por montri la naciecon de la portanto.

Eleganta formo,
bela emajlo.

Haveblaj por ĉiu nacio, kun pinglo, broĉo aŭ butono.

Prezo: .60 ned. guld. (kvar respondkuponoj) afrankite.

Int. Cseh-Instituto de Esp.
Hago.



INTERNACIA LINGVA KONFERENCO EN ARNHEN

dum Pasko (25-29 Marto) 1932

La celoj de la konferenco estas:

1. Diskuti pri la lingvaj problemoj de Esperanto, komparante la spertojn de diversnaciaj uzantoj de nia lingvo.
2. Kolekti informan materialon por la lingvaj institucioj (spertoj, bezonoj kaj deziroj de la publiko uzanta Esperanton).
3. Fari rezoluciojn kaj deziresprimojn transdonotajn al la Akademio por pristudo kaj efektivigo.
4. Doni okazon al persona kontakto inter la Esp-lingvistoj.

La diskutoj okazos sur la bazo de enkondukaj referaĵoj, farotaj de kompetentuloj.

La konferenco ne havos oficialan karakteron. Ĝi estos kvazaŭ libera „lingva parlamento” de la libera Esperantista publiko. Tial ĝi ne povos fari „decidojn” pri nia lingvo, sed nur konstatojn, deziresprimojn, konsilojn. Ni esperas, ke similaj konferencoj, sendube gravaj por nia lingvo kaj movado, okazos poste en diversaj partoj de la mondo.

Kunlaborantoj, kiuj partoprenos en la konferenco kiel referantoj aŭ sendis materialon kaj proponojn por la diskutadoj: s-ro M. Bobin, L.K., Paris; s-ro O. Bünemann, L.K., Hamburg; Prof. E. Grosjean-Maupin, Akademiano, Paris; D-ro W. Lippmann, Akademiano, Leipzig; s-ro K. Minor, L.K., Hamburg; D-ro Edmond Privat, L.K., Genevo; s-ro C. Rousseau, L.K., Paris; s-ro A. van Straaten, Nijmegen; Prof. G. Waringhien, L.K., Lille; Dr. Ing. Eugen Wüster; s-ro Felix Zamenhof, Varŝavo; s-ro Delfi Dalmau, Barcelona, kaj aliaj.

PROGRAMO:

- 25 Marto, vendredo:** Dum la tago akceptado de la alvenantaj konferencanoj.
20.00 h. Malferma kaj interkonatiga kunveno kun parolado de s-ro C. Rousseau je la memoro de Prof. Th. Cart.
- 26 Marto, sabato:** 9.00-10.45 Laborkunsido kun diskutado. Temo: Vortfarado, gramatika karaktero de la vortradikoj. Referanto: s-ro J. R. G. Isbrücker, Akad.
11.15-13.00 Laborkunsido kaj diskutado. Temo: Nia literaturo el lingva vidpunkto. Rimedoj por la plialtigo de la nivelo. Referanto: s-ro Karl Minor, L.K., Hamburg.
15.00-17.00 Laborkunsido kun diskutado. Temo: La elparolado kaj akcento. Ref.: s-ro Andreo Cseh.
20.00. Oficiala akcepto de la konferencanoj en la urbodomo.
- 27 Marto, dimanĉo:** Mateno libera por diservo kaj promeno.
Posttagmeze ekskurso. Aŭtomobila rondveturo tra la vidinda ĉirkaŭaĵo de Arnhem.
- 28 Marto, lundo:** 10.30-11.30 Laborkunsido kun diskutado. Temo: La tutmonda unueco de Esperanto kaj ties gardado. Batalo kontraŭ naciismoj. Referanto: D-ro Edmond Privat, Genevo.
11.45-13.00 Laborkunsido. Prelego de s-ro Delfi Dalmau (Barcelona): La korektiga influo de Esperanto al la naciaj lingvoj.
14.30-17.00 Laborkunsido kaj diskutado. Temoj: La verbo, kunmetitaj verboformoj. Referanto: s-ro J. R. G. Isbrücker, Hago. — La vortaro; fakaj vortaroj.
20.00 Parolado de D-ro Edmond Privat pri sia vojaĝo kun Gandhi al Hindujo.
- 29 Marto, mardo:** 9.00-10.45 Laborkunsido kaj diskutado. Temo: Problemoj renkontataj ĉe la instruado. Spertoj de kursgvidantoj. Referanto: s-ro A. van Straaten, gvidanto de la nederlanda skriba kurso de la Centra Esperanta Propaganda Komisiono en Nijmegen.
11.15-13.00 Laborkunsido kaj diskutado. Temo: Ĉu Esperanto evoluas? La direkto kaj faktoroj de la evoluo. La rolo de la lingvaj institucioj kaj de la Esp-ista publiko en la evoluo. Referanto: D-ro Edmond Privat.
15.00-17.00 Ferma kunsido. Diskuto pri la temo: Ortografio (interpunkcio, mallongigoj, grand-literoj k.t.p.) Referanto: Andreo Cseh. Finaj rezolucioj.
19.30 FOLKLORA FESTO, organizata de la famaj folkloristoj: *ges-roj VAN DER VEN* en Oosterbeek apud Arnhem (popoldanca balo, prezentado de tipaj kaj artaj popoldancoj kaj popolkantoj, ekbruligo de la pasko-fajro k.t.p.)

En la konferenco kaj diskutado partopreni povas ĉiu Esperantisto. Speciale invitataj estas niaj instruistoj, verkistoj kaj la estimataj anoj de la Lingva Komitato kaj Akademio. Personoj ne povantaj ĉeesti en la konferenco, povas sendi siajn proponojn en leteroj, kiuj estos transdonataj al la koncernaj referantoj, por prezenti ilin al la konferenco.

La aranĝoj de la konferenco okazos en la Esperanto-Domo.

Partoprena kotizo: 4.— ned. guld. El la kotizoj 25%ojn ni apartigos kiel subtenon al la Lingva Komitato. Aliĝojn kaj kotizojn oni sendu al la Int. Cseh-Instituto de Esperanto, Hago, Oostduinlaan 32. Poŝtĉekkonto: Den Haag 162626.

La partoprenantoj de la konferenco povos loĝi en la hotelo de la Esperanto-Domo. Prezo de plena pensio por unu tago: 3.25 (en komuna ĉambro de 5 aŭ pli da personoj) 3.75 (2-4 pers.) 4.25 (unu persono) ned. guld.

LA INVITANTA KOMITATO:

P. W. BAAS, prez. de la Ned. Esp.-Societo L.E.E.N.
H. J. BULTHUIS, ano de la Lingva Komitato.
CENTRA ESP. PROPAG. KOMISIONO, Nijmegen.
H. DAMEN, prez. de la Ned. Katolika Ligo Esp-ista.

P. HEILKER, L.K., prez. de la Ned. Ekzamena Komitato.
J. R. G. ISBRÜCKER, ano de la Esp. Akademio.
H. C. VAN LEEUWEN, prez. de la Ned. Krist. Esp.-Un.
D. UITTERDIJK, ano de la Lingva Komitato.

INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO.

PASKA UNIVERSITATO

en la Esperanto-Domo

Arnhem (Nederlando), 30 Marto—2 Aprilo 1932.

Je la invito de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

D-ro Edmond Privat

profesoro de Esperanto de la Geneva Universitato, membro de la Esp. Lingva Komitato, honora prezidanto de ICK, redaktoro de „ESPERANTO“, aŭtoro de la famaj verkoj pri Zamenhof kaj pri la historio de Esperanto.

Ĝus reveninte el Brita Hindujo, donos 5-tagan universitatan kurson pri la temoj:

1. Esperanto kiel kaptilo de ideoj kaj sentoj (kun speciala atento pri la propagando bezono kontraŭ la dubantoj pri la esprimkapableco de nia lingvo).
2. Geavaj kaj interesaj etapoj en la historio de Esperanto.

Krom tio apartaj paroladoj de D-ro Privat pri sia vojaĝo kun Gandhi al Hindujo kaj pri siaj spertoj kolektitaj dum la studvojaĝo tra Brita Hindujo.



D-ro Edmond Privat


Ĉi tiu kurso estas speciale rekomendata al niaj propagandistoj, instruistoj kaj kandidatoj por la nederlanda B-ekzameno.

PROGRAMO:

- 30 Marto, merkredo: 10-12 h. Prelego.
20-22 h. Prelego.
- 31 Marto, ĵaŭdo: 14-16 h. Prelego.
20 h. Publika parolado de D-ro Privat pri Hindujo kaj Gandhi (en fr. lingvo).
- 1 Aprilo, vendredo: 10-12 h. Prelego.
14-16 h. Prelego.
- 2 Aprilo, sabato: 10-12 h. Prelego.
Posttagmeze ekskurso.
Vespere: Jarfesto de la Esp.-Societo de Arnhem „Unu per Esperanto“.

Kotizo: 4.— ned. guld. Aligojn kaj kotizojn oni sendu al la Int. Cseh-Instituto de Esp., Oostduinlaan 32, Den Haag. Pliŝteklonto: Den Haag 162626.

La partoprenantoj de la kurso povas loĝi en la hotelo de la Esperanto-Domo, kie plena pensiono por unu tago kostas de 3.25 ĝus 4.25 ned. guld.



La **ESPERANTO-DOMO**, en la mezo de belega vasta parko, estas malfermita dum la tuta juro. En la domo estas kurejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro ŝanta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5—10 personoj en unu ĉambro): 2.— ned. guld., (2—4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. Lundo: .75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensiono (ĉambro kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro. Serumono 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso: Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26060

GRANDA LOTERIO

por la instalado de la Esperanto-Domo de Arnhem

Aprobata per dekreto de la Nederlanda Ministro por Justeco.
2 Sekc. A. N-ro 1069, de la 2-a de Aprilo 1931.

ĈEFPREMIOJ:

1. AUTOMOBILO

NASH, 6-cilindra

5-persona, plej

nova modelo.



2. Moderna manĝo-ĉambro meblaro el fabr. „Pander“, Hago.
3. Portebila skribmaŝino „Royal“, plej nova modelo.
4. Gramofono de „Sprenger“, Hago.
5. Persa tapiŝo „Schira“ de firmo Kulcsár, Hago.
6. Luksa salona stariĵo el fabr. D. D. Coelingh, Hago.
7. Portebila skribmaŝino „Corona“, plej nova modelo.
8. Polvuŝilo „Protos“ kun kompleta garnituro.
9. Foto-aparato Zeiss-Ikon Cocarotte 6X9.
10. Laŭparolilo de Bell Telephone Mfg. Co.

Enste 1000 premioj, ĉiuj valoraj praktikaj objektoj (pli ol 100 elektraj instruistaj aparatoj, plue bicikloj, vojaĝkiloj k.a.p.) — La tirado okazos publike dum la numero de 1932 en Arnhem pere de Notario Ch. J. Engelberts, Arnhem. — La rezultato de la tirado (uno de la gajnintaj numeroj) kaj de la premioj estas publikigata per speciala bulteno, ricevebla ĉe la Esperanto-Domo en Arnhem. — La gajnintoj povas transpreni la premiojn dum unu jaro post la tirado. Post tia tempolimo la premioj apartenos al la loteria fondo.

PREZO DE UNU LOTBILETO: 1.— ned. guld.

Adresu por mendoj kaj pagoj:

F-lao J. E. RIKKEAS, Antico de Haenstraat 122.

DEN HAAG. (Nederlando).

Pliŝteklonto: Den Haag 96085.

Ideala lingva ekzercilo:

La enigmoj

Unu broŝuro plena de enigmoj por lerni novajn vortojn.

Specimenan enigmon vidu en ĉi tiu numero de **LA PRAKTIKO** inter la konkursoj.

1000 premioj al la solvintoj

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Opinio pri la broŝuro: „Mi gratulas al vi! La enigmoj estas altgrade geniaj!“ (S-ro J. T. en K., Polujo).

Prezo: —15 ned. guld. (= unu respondkuponon).

Aĉetebla ĉe la eldonejo de **LA PRAKTIKO**.

La enigmojn solvis:

Per dikaj literoj ni presas la nomojn de tiuj, kiuj gajnis premion.

(Daŭrigo) Lightfoot, Strawberry Hill. — Schatzmann, Genevo. — Jaccard, Zürich. — V. d. Bossche, Antverpeno. — Jongbloed, Arnhem. — Bowier, Arnhem. — Schmalzl, Weiden. — Fröhlich, Hannover. — Indra, Riga. — 70. Simonis, Schiedam. — Falke, Neumark. — Monod, Morges. — Krestanov, Sofia. — Eiberle, Zürich. — Kempers, Nijmegen. — Riether, St. Gallen. — Rubinovič, Wilno. — Tenot, Levallois-Perret. — Halma, Oranjedorp. — 80. Fichtner, Radebeul. — Dresden. — Milakovski, Wilno. — Levi, Trieste. — Bocca-sini, Trieste. — Chocky, Zoppot. — Skatfell, Reykjavik. — Wekerle, Paris. — Kádár, Baia-Mare. — Somvi, Parsch bei Salzburg. — Schächterówna, Borszczów. — 90. Rosenstock, Borszczów.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
3-a numero



Marto
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POŝTEKONTO
162626

„Komencantoj”

estas la novaj Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne scias bone nian lingvon, sed lernas ĝin. La malnovaj Esp-istoj tre ŝatas ilin kaj ofte karesas ilin per la simpatiaj nomoj: „*Esperanta suĉinfano*”, „*verda bebo*”. Ni amas ĉi tiujn infanojn de nia tutmonda familio kaj ni ĝojas, kiam ilia nombro pligrandiĝas. En ili ni vidas tiun generacion, kiu alportos la tutmondan venkon de Esperanto.

La komencantoj ĝuas specialan privilegion en la Esperanto-mondo. Ili rajtas paroli nian lingvon balbutante, ili rajtas fari erarojn kaj ili rajtas tiel uzi nian lingvon, kiel la infanoj ĝenerale, tio estas: neperfekte.

En la societo de malnovaj kaj spertaj Esp-istoj la komencantoj kutimas diri la peton: „*bonvolu paroli simple kaj malrapide, ĉar ni estas komencantoj*”. Ĉiu sperta Esp-isto kun plezuro plenumas ĉi tiun peton, kvankam ĝi kaŭzas klopodon kaj penon. Paroli simple kaj malrapide estas ne nur malfacila tasko, sed eĉ arto.

Kiel la aĝo de infaneco pasas, same ankaŭ la aĝo de „*komencanteco*” devas finiĝi. Kaj ni aldonu: kiel eble plej baldaŭ! La komencanto devas progresi kaj sin perfektigi. Kaj la malnovaj Esp-istoj devas ilin helpi. Kiel? Parolante kun ili kaj korespondante kun ili.

En la Esp-aj kluboj oni ofte rimarkas, ke

la spertaj Esp-istoj apartigas sin kaj ne zorgas pri la komencantoj, kiuj venis en la klubon por ekzerci la parolon en Esperanto. Nu, ili estas pravaj, kiam ili diras, ke tio estas malfacila kaj neinteresa. Sed estas bela kaj nobla ago fari tiun oferecon kaj partopreni en la edukado de niaj novaj generacioj. Ni opinias, ke estas ĝuste unu el la gravaj taskoj de niaj kluboj kaj societoj: ke en ili la pli malnovaj samideanoj eduku kaj instruu la novulojn. Kelkaj Esp-aj societoj en la kunvenoj tiel grupigas la membrojn, ke novaj kaj malnovaj Esp-istoj devas kune konversacii. Ni forte rekomendas imiti ĉie tiun bonan ekzemplon.

Ankaŭ per la korespondado oni povas progresigi la komencantojn. Bedaŭrinde la komencantoj devas korespondadi plej ofte kun aliaj komencantoj. Sed estas dezirinde, ke ili korespondu kun spertuloj, kiuj povas korekti iliajn erarojn.

Ni ŝatus vidi inter la korespondaj anoncetoj ankaŭ tiajn anoncojn: „*sperta Esp-isto deziras korespondi kun komencantoj, por helpi al ilia progresado en la lingvo*”. Ĝi estus bela pruvo pri nia solidareco kaj pri bona kompreno de nia komuna intereso: havi multajn perfektajn Esperantistojn!

Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Specimena numero 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. ★ Kopirajto de la enhavo rezervita.
jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro. ★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro.
Aperas monate. Abonprezo por unu numero kostas unu respondkuponon (0.15 ned. guld.). Reklam-tarifo: 1 paĝo



La telefono disvastiĝas.

Laŭ la lasta statistiko, farita en Ameriko, en la jaro 1931 estis en la tuta mondo 35.300.000 telefon-aparatoj. El tiu nombro en Nord-Ameriko estas 21.700.000, en Eŭropo 10 milionoj kaj en Azio 3,5 milionoj. Poste sekvas Aŭstralio, Sud-Ameriko kaj fine Afriko. Unu jaron pli frue estis en la mondo nur 34.500.000 aparatoj en uzado.

★

Sinjinorino Kajtielplu.

La urbo Reno en la ŝtato Nevada de Usono estas fama pri tio, ke tie geedzoj tre facile povas disiĝi. La tiea juĝejo bone konas unu sinjinorinon kun nomo Willis Carolyn, kiu ĵus edziniĝis la dek-unuan fojon, kvankam ŝi havas jam sesdek-kvar jarojn. La unuan fojon ŝi edziniĝis en 1886, sed ŝia unua edzo post tri jaroj mortis. De la dua edzo, kiu estis borsa agento, ŝi disiĝis. Post tio la sinjinorino ankoraŭ naŭfoje edziniĝis. Sed nun ŝiaj gekonantoj estas en granda embaraso, ĉar ili neniam estas certaj pri tio, ĉu la sinjinorino estas edzino aŭ eksedzino kaj se ŝi estas edzino, kiu estas ŝia edzo. En la sociaj interrilatoj kun ŝi ofte okazas strangaj situacioj. Tial oni donis al ŝi la moknomon „Mrs. Etcetera“, kio en Esperanto signifas: Sinjinorino Kajtielplu.

★

Tunelo sub la kanalo de Suez.

La egipta registaro komisiis la ŝtatan inĝenieran lernejon en Kairo, ke ĝi esploru, ĉu oni povas konstrui tunelon sub la Suez kanalo. La destino de la tunelo estus: kunligi la fervojarojn de Egiptujo kaj Palestino. La kostojn de la tunelo oni taksas je kvin milionoj da dolaroj. Ĉi tiu plano estas tre grava, ĉar ĝi realigus grandan fervojan sistemon, kiu kunligus la orientajn britajn posedaĵojn. Ĝis nun per pramoj oni transportas la vojaĝantojn kaj komercaĵojn.

★

Lernejo el vitro.

Antaŭ nelonge oni finkonstruis en la germana urbo Lübeck la novan popolarnejon. Ĝi estas unika lerneja domo en la tuta mondo. La klas-ĉambroj ne havas fenestrojn, ĉar la muroj mem estas faritaj el vitro. La lernantoj havas apartan matenmanĝejon, en ĉiu klas-ĉambro estas lavujo kun fluanta akvo kaj en la gimnastika ĉambrego estas bonega radio-aparato kun laŭtparolilo.

La idealo de brava militisto.

La ĉina generalo Ĉangkaiŝek ordonis al la oficiroj de la ĉina armeo la jenajn regulojn: „Ne timu la morton! Ne fanfaronu! Ne estu mallaborema! Ne partoprenu en hazard-ludo! Ne fumul! Ne prunteprenu monon! Ne trinku vinon! Ne mensogu!“ Ĉi tiuj ordonoj pendas sur la muroj de la oficiraj kluboj.

★

Milito inter cigoj kaj cikonioj.

Unu lago en Germanujo dum la lasta somero estis scenejo de interesa dramo. Oni scias, ke la cigoj tre zorge gardas siajn nestojn kaj neniel permesas, ke fremdaj bestoj alproksimiĝu. Hazarde unu juna cikonio iris ĝis la cigna nesto, ĉe kiu gardostaris tre forta cigno. La cigno premis la cikonion sub la akvon kaj tenis ĝin sub la akvo, ĝis kiam la cikonio dronis. Kelkaj cikonioj vidis la „mortigon“ kaj post kelka tempo tuta aro da cikonioj flugis al la cigoj kaj komencis ataki ilin per siaj longaj bekoj. La cigoj ne povis sin defendi kaj tial ili iris simple sub la akvon. Sed la cikonioj sekvis ilin kaj frakasis ĉiujn. Post la „venko“ la cikonioj detruis ankaŭ la loĝejojn de la cigoj.

★

Almozulo kun dudek ŝparlibroj.

En Reichenberg antaŭ ne multa tempo mortis almozulo, kiun la tuta urbo bone konis. Iam li estis horloĝisto, sed en la lastaj jaroj li vivtenis sin per almozpetado. Post lia morto ĝeneralan surprizon kaŭzis la fakto, ke li postlasis havaĵojn en la valoro de kvarona miliono da ĉeĥaj kronoj. Oni trovis en lia loĝejo dudek ŝparlibretojn kaj krom tio plurajn milojn da kronoj en mono. Estas interese, ke la tutan havaĵon heredis unu riĉa konstruisto.

★

La plej malgranda bebo.

En la urbo Pretorio, ĉefurbo de Transvalo, oni povas vidi nuntempe la plej malgrandan suĉinfanon de la mondo. Mary estas la nomo de la malgranda hinda infaneto. Kiam ŝi havis 14 tagojn, ŝia pezo estis nur 3 funtoj (1½ kg.). Ŝi estas konstante en vato kaj grandparte tiel oni nutras ŝin, ke oni ŝprucas solvitajn salonojn sub ŝian haŭton. Ŝia buŝo estas tiel malgranda, ke la suĉilo de la ordinara laktobotelo ne eniras. Tial en vendejo de ludiloj oni aĉetis por ŝi ludilan laktoboteleton. Malgraŭ sia eksterordinara malgrandeco la fama bebo estas tute sana.

Mistera floro.

En la ĝardeno de la fama botanikisto Burbank Luther en Kalifornio kreska nuntempe interesa floro, kiu estas enigmopora la fakuloj, ĉar oni ne konas ĝian devenon. Inter la notoj de la mortinta Burbank oni ne trovas ion pri ĉi tiu floro. Ĝi havas la formon de dianto, sed tute senodoro. Dum kelkaj monatoj ĝi kreska ĝis la alteco de du metroj. La amerikaj botanikistoj ĝis nun vane esploris la sekreton de ĉi tiu kreskaĵo.

★

La nomoj de la monoj.

La franca franko ricevis sian nomon de la latin-lingva surskribo „Francorum Rex“ (=reĝo de la frankoj), legebla sur la ora moneroj, kiujn la unuaj frankaj reĝoj farigis. La nomo „funto“ de la brita monaĵo venas de tie, ke tiu mono en arĝento pezis unu funton. La hispana „peseto“ signifas malgrandan pecon. La germana „marko“ estas parenca kun la franca vorto „marc“, kiu iam estis la nomo de arĝenta monero. La vorto „floreto“ venas el la nomo de la itala urbo Firenze. La vorto rublo venas el la slava „rubli“, kiu signifas krispon, ĉar la unuaj rusaj moneroj havis krispan randon. La vorto dolaro venas el la germana „Taler“. La hinda rupio ricevis sian nomon el la sanskrita lingvo, kie la vorto „rupa“ signifas beston. La nomo piaŝtro venas el la vorto „piastra“, kiu en la hispana kaj itala lingvoj signifas maldikan metalan platon.

★

Post dek jaroj.

La amerika verkisto Norman B. Geddes, kiu antaŭe estis teatra pentristo, lastatempe diris interesajn profetaĵojn. Li firme asertas, ke liaj antaŭdiraĵoj dum dek jaroj plenumiĝos. Laŭ lia antaŭvido la stratoj havos etaĝojn kun apartaj vojoj por la rapidaj kaj malrapidaj veturiloj. Ĉiu domo havos platan tegmenton kaj sur ĉiu tegmento estos ĝardeno. La flugmaŝino leviĝos en vertikala direkto kaj albridiĝos sur la domtegmentoj. En la ĉambroj de la strato loĝos la servistaro, la gemastro loĝos en la trankvilaj ĉambroj malantaŭe de la ĝardeno. En la konstruado oni ne uzos plu la ŝtalon, sed alian metalon, kiu estos pli forta, sed nur duone peza. La elektraj lampoj ne ekzistos plu en la formo de piro, sed en la formo de lumantaj tubo. Tra la fenestroj venos transviolaj radioj. Ĉiu loĝejo havos aeruman aparaton, kiu kondukos en la ĉambrojn varman aŭ malvarman aeron, laŭ la sezonoj.

FARU LA KONTROLON!

(Praktika gramatika leciono)

La Februara numero de LA PRAKTIKO entenis la 2-an taskon por ekzerci la pasivajn participojn (-ata, -ita, -ota). Ĉi tie ni publikigas la kompletigitajn vortojn kaj vi povas kontroli vian propran laboron. Ni esperas, ke vi solvis la taskon bone kaj laŭ nia solvo. Se vi tamen trovas ĉe iuj vortoj diferencon, ne malesperu! En kelkaj kazoj oni povas apliki du diversajn tempojn. Por ekzemplo ni citas unu frazon: *Ni esperis, ke la aero baldaŭ estos purigita de pluvo.* En ĉi tiu frazo oni povas diri: „purigita“ aŭ „purigata“. Ĉio dependas de tio, pri kiu momento ni pensas, ĉu pri momento *post la pluvo* aŭ *dum la pluvo*. - Se vi bone solvis la taskon, akceptu nian gratulon. Se vi faris erarojn, bonvolu plue studi ĉi tiun gravan parton de nia lingvo.

La solvo de la 2-a tasko:

Legata, trovis, presitan, konstruita, bakitaj, estas vendota. - Estis leginta, pensis, amata, travivota, aĉetitan, anoncitan. - Balaata, estis pelataj, estos, purigata. - Anoncita, vestita, estis, forportita, estis detruitaj, estis forŝtelitaj, estos, riparitaj, povos, interkonsentitan. - Sekvinta, estis riparata, estis alportataj, konstruitaj, farata. - Estis, riparita, finita, prezentis, skribitan, ricevita, subskribitan, estos pagataj. - Postulitan, aĉetita, ŝatata.

3-a tasko.

Vi sendube bone konas la sufiksojn ig kaj iĝ. Ili havas multan kaj gravan rolon en nia lingvo. Per ili ni faras tre grandan nombron da novaj vortoj.

Per la sufikso ig ni faras el adjektivo verbon kun la signifo: *meti en novan staton, fari ...-a*. Ekzemple: *la forno varmigas la ĉambro* = la forno faras la ĉambro varman, la forno metas la ĉambro en varman staton. Simile: *la kuracisto sanigas la homojn* = la kuracisto faras la homojn sanaj, la kuracisto metas la homojn en sanan staton.

Per la sufikso iĝ ni faras verbojn, kiuj signifas: *veni en novan staton*. Ekzemple: *la arbo verdiras* = la arbo venas en verdan staton; *la ĉambro varmigas* = la ĉambro venas en varman staton; *Karlo edziĝis* = Karlo venis en staton de edzo.

La sufiksojn ig kaj iĝ oni ofte uzas kune kun prepozicio, ekzemple: *enigi* = enmeti; *kunigi* = kunmeti, fari kunaj; *eligi* = elpreni; *aligi* (al societo) kaj tiel plu.

En tute speciala maniero ni uzas la sufiksojn ig kaj iĝ por formi mallongajn esprimojn. Ekzemple: *enpoŝigi* = meti en la poŝon, fari iun objekton estanta en la poŝo; *ensipigi* = meti en la ŝipon; *enlitiĝi* = iri en la liton; *senvestigi sin* = demeti la vestojn, fari sin senvesta; *surtabligi* = meti sur la tablon; *subakvigi* = veni sub akvon.

Ĉi tie ni prezentas al vi rakonton. En ĝi kelkaj esprimoj estas presitaj per dikaj literoj. La tasko estas: *bonvolu transformi*

tiujn esprimojn, ke ili estu pli mallongaj, unuvortaj. Por tio vi bezonas uzi la sufiksojn ig kaj iĝ laŭ la supre cititaj ekzemploj. La solvon ni publikigos en la Aprila numero de LA PRAKTIKO. Bonan laboron!

LA SEKRETO DE LA SUKCESO.

Hieraŭ posttagmeze promenante tra la urbo mi vidis, ke oni metas sur la murojn grandajn afiŝojn, kiuj alvokas aĉeti lotbiletojn. Dezirante esti pli riĉa mi tuj prenis el la poŝo monon kaj aĉetis unu bileton. La vendisto metis en la manon al mi la bileton kun numero 1313. Kun ĝojego mi metis en la poŝon la bileton, ĉar mi estis certa, ke tiu bela numero nepre devas gajni. Sen prokrasto mi iris en elegantan manĝejon, mi sidis al tablo kaj la kelneroj metis sur la tablon al mi la plej bonajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Mi metis en la buŝon tiel grandan kvanton, ke mi devis tuj hejmeniri kaj min meti en la liton.

Rapide mi falis en dormon kaj post kelkaj momentoj oni jam metis en miajn manojn la ĉefgajnon: 10 milionoj da frankoj. Tuj ĉiuj redakcioj metis en la gazeton mian portreton kaj mi decidis fari reala mian malnovan sonĝon: vojaĝi al Ameriko, ĉar tie iras en korpon la idealoj de la tuta homaro. Mi iris en vagonon por veturi ĝis la haveno. Mi ne bezonis aĉeti bileton, ĉar mi estis riĉa. Post tio mi iris en la ŝipon. Oni metis en la ŝipon kun mi ankaŭ 5 vagonojn da floroj, donacitajn de miaj estimantoj. La ŝipo estis la plej granda en la mondo. Oni metis ĝin sur la akvon je mia honoro.

Sur la oceano estis granda uragano. La ŝipanoj timis, ke la ŝipo iros sub la akvon. Sed mi faris ilin trankvilaj: „Ne timu, ĉar mi estas kun vi kaj mi estas riĉa!“ Kaj vere nia ŝipo ne falis sur la fundon, sed sen difekto iris al la bordo.

Kun triumfo mi iris el la ŝipo kaj poste oni elportis el la ŝipo 10 vagonojn da floroj, ĉar dum la veturo aeroplanoj ĵetis sur la ŝipon ankoraŭ 5 vagonojn da amerikaj floroj.

La prezidanto de Usono metis al mi sur la bruston la oran medalon de la Honora Legio kaj sidigis min en aeroplanon. Post duhora flugado super la tuta Ameriko la flugmaŝino venis sur la teron. Mi eliris el la kajuto, sed pro la honoroj mi tute perdis la fortojn. Mi prenis el la poŝo paperon, mi skribis sur la paperon mian testamenton, post tio mi metis la paperon en koverton kaj mi mortis.

Oni metis min en la teron kun granda pompo kaj post unu semajno oni prenis la vualon de sur mia statuo. Post tio oni prenis el la koverto la paperon, sur kiu staris: „Homoj, ne aĉetu lotbiletojn!“

Post tio mi vekiĝis, mi eliris el la lito kaj mi aĉetis novan. duan lotbileton kun la numero 131313.

Gvidantoj de daŭrigaj kursoj!

LA PRAKTIKO estas redaktata kun la speciala celo, ke ĝi estu uzata en la daŭrigaj kursoj kiel legaĵo kaj bazo por gramatika klarigado. Bonvolu atenti precipe la lecionajn partojn kaj la konkursojn.

Al kursgvidantoj ni volonte liveras por disvendado al la kursanoj kvantojn el kiu ajn numero aparte kun rabato.

La redakcio.

Grupoj kaj studrondoj!

Vi povas multe pliagrabligi viajn kunvenojn, se vi kune legas kaj preparolas la enhavon de LA PRAKTIKO, kiu estas redaktata kun speciala atento al tia uzado. Por tiu celo ni liveras kvantojn kun rabato.

Speciale rekomendinde estas, ke en la kunvenoj oni komune solvadu la konkursojn kaj la lecionajn taskojn.

La redakcio.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



ALPHONSE MARTAINVILLE
(1776—1830).

franca ĵurnalisto, fondinto de la gazeto „Drapeau blanc“, la 6-an de Julio 1794 staris antaŭ la revolucia tribunalo en Parizo. La prezidanto de la tribunalo nomis lin ripete „de Martainville“. La verkisto protestis kontraŭ la aristokrata vorteto „de“ kaj kun la kuraĝo de dekok-jara junulo diris:

— Civitano prezidanto, mi estas nenio „de“! Memoru, ke vi sidas ĉi tie por mallongigi min, ne plilongigi.

Oni kondamnis lin al morto, sed post unu tago ĉesis la reĝimo de l' teroro kaj tiamaniere Martainville liberiĝis de la senkapigo.

★

ELISA RACHEL (1821—1858)



estis unu el la plej grandaj tragediaktoroj de Francujo. Kiam ŝi la unuan fojon ludis en komedio en la Pariza teatro „Gymnase“, ŝi havis teruran fiaskon. La direktoro de la „Gymnase“ maldungis ŝin kun la vortoj:

— Fraŭlino, vi pli bone farus, se vi vendus florojn.

Post kelkaj monatoj f-ino Rachel ricevis kontrakton ĉe la Comédie Française kaj jam ĉe la unua ludo ŝi rikoltis sensacian sukceson. Ŝiaj estimoj superŝutis ŝin per tuta ĝardeno da floroj. Rachel elektis la plej belajn florojn, metis ilin en korbon kaj iris al sia antaŭa direktoro:

— Sinjoro, vi donis al mi la konsilon, ke mi vendu florojn. Do mi venis.

★

NIKOLAO I-a (1769—1855)

rusa caro estis tre malŝparema en la disdonado de ordenoj. Foje li kun granda kaj brila akompanantaro aŭskultis la prelegon de unu fremda astronomo. La prelego, kiun la scienculo legis monotone kaj kun videbla ĝeno, tre enuigis la caron. Fine li diris al sia favorata princo Menĉikov:

— Nenion eksterordinaran mi vidas en ĉi tiu homo.

— Via Moŝto pardonu al li, sed oni ne povas miri, se la astronomo konfuziĝas vidante ĉi tie tiom da steloj en malĝusta loko.

La caron pli multe amuzis ĉi tiu respondo, ol la tuta prelego.

ABRAHAM LINCOLN (1809—1865)



estis prezidanto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. Foje iu faris al li komplimenton dirante, ke li tute ne havas malbonajn kutimojn, ĉar li nek drinkas, nek fumas.

Je tio Lincoln respondis:

— Ĉi tiu komplimento havas tre duban valoron.

Foje mi vojaĝis en la ŝtato Illinois per poŝta veturilo. Kontraŭ mi sidis fremda sinjoro kaj proponis al mi cigaron. Mi rifuzis dirante, ke mi ne havas „malbonajn kutimojn“. Mia kunvojaĝanto nenion respondis, nur plue fumis. Sed post kelka tempo li ekparolis:

— Laŭ miaj spertoj tiuj homoj, kiuj ne havas malbonajn kutimojn, ankaŭ bonajn kutimojn havas terure malmultajn.

★

PRINCO LOUIS-HENRI BOURBON
(1692—1740)

donis foje balon en sia palaco. Li starigis al la pordego de la palaco unu soldaton kun la ordono, ke li ne enlasu personojn kun masko. Alvenis ankaŭ pastro Allaig-nant, la poeto, kiun oni konis en Parizo pli multe pro lia granda ruĝa nazo, ol pro liaj poemoj.

— Kun masko oni ne povas eniri, — diris la soldato al la pastro.

— Ĉu vi ne vidas mian vizaĝon? — diris kun indigno Allaig-nant.

— Sed tiu grandega nazego, — diris la soldato, — ĉu ĝi ne estas el papero? — kaj li tuŝis ĝin per la fingroj.

Post kiam li bone ĉirkaŭpaleis la tutan nazon kaj konvinkiĝis, ke ĝi estas vivanta nazo kaj apartenas al la vizaĝo de la pastro, li daŭrigis pli milde:

— Pardonu, sinjoro pastro, sed mi ne povis kredi, ke tiu nazego estas vera nazo. Bonvolu eniri.

★

KARLO V.
(1500—1558)



german-roma imperiestro, foje en la jena maniero karakterizis la popolojn:

— La italo estas saĝa kaj ankaŭ aspektas saĝa. La hispano ŝajnas esti saĝa, sed ne estas tia. La franco estas saĝa, kvankam ne aspektas tia.

MISTRESS ROBERT BURNS

estis edzino de la plej granda skota lirikisto. Post la morto de la poeto vizito la vidvinon unu angla sinjoro kaj petis ke ŝi donu al li el la heredaĵo de la poeto ian manuskripton aŭ ian ajn objekton kiun li gardus kiel eternan memoraron.

La vidvino de Burns respondis, ke ŝi ja disdonis ĉion inter la amikoj kaj estimantoj de la mortinto kaj restis nenio, per kio ŝi povus kontentigi la deziron de la vizitanto. Sed ĉi tiu plue petadis, ĝis fine la vidvino de la poeto diris:

— Vere, sinjoro, se nur min mem vobis ne volas akcepti, alian relikvaĵon de mia edzo mi ne povas doni.

★

MAX LIEBERMANN (1847—)

germana pentristo, ricevis foje presitan alvokon, ke li donu deklaron pri sia artistlaborado.

„Kion vi pensis kaj sentis, kiam vi komencis pentradi, kion vi sentas dum la pentrado, kiam humoron vi havas post la pentrado?“ kaj tiel plu, kvindek demandoj.

Liebermann je la alvoko donis la jenan saĝan respondon:

— Se mi povus respondi je viaj demandoj, mi neniam estus fariĝinta pentristo.

★

HEINRICH LAUBE (1806—1884)

estis germana verkisto kaj direktoro de la Burgtheater en Vieno. En iu tago aperis antaŭ li juna verkisto, prezentis sin kaj transdonis manuskripton de dramo. Laube prenis la manuskripton kaj respondis:

— Mia juna amiko, revenu post duona jaro. Ĝis tiam mi tralegos vian skribaĵon.

Post duona jaro revenas la juna verkisto. Laube sidas ĉe la skribtablo kaj laboras. La juna verkisto modeste staras antaŭ li kaj balbutante diras:

— Antaŭ duona jaro mi transdonis mian pecon, mi ŝatus aŭdi pri ĝia sorto. La maljuna Laube rigardas al li kaj ekkrias:

— Kiel vi nomiĝas?

— Franz Grillparzer, — ĝemas la juna.

— Abomena nomo, — krias Laube, — sed la homaro memoros ĝin.

Kaj li estis prava. La nomo de Grillparzer apartenas al la historio de la mondliteraturo.



la mondo ridas



Majma vivo kun varieco.
Filmaktorino: Ĉu vi ne hontas postuli refoje novan paĉjon, kua kiu vi ludu? Ĉu ne sufiĉis en ĉi tiu jaro jam tri?
 (Humorist)

Poezio kaj prozo.
Edzino: Tamen la plej bela afero en la mondo estas la amo. Ĉu ne, kara edzo?
Edzo: Jes, jes, karulino..... kaj kio estos hodiaŭ por tagmanĝo?
 (Gringoire)




Bona ŝanco.
 — Sinjoro policisto, oni forŝtelis mian aŭtomobilon de ĉi tiu loko.
 — Vi havas bonŝancon, sinjoro! Mi ĵus volis noti vin, ĉar ĉi tie veturiloj ne rajtas halti.
 (Passing Show)

En drogejo.
 — Kiel, ĉu nia fama harkreskiga alkoholo ne utilis al vi?
 — Tute ne, kvankam mi jam trinkis tri tutajn botelojn.

La espero.
 — Paŭlo, kiel fartas via malsana onklo?
 — Dankon, iom pli bone. Sed mi tamen ne perdis ĉiun esperon.
 (Frou-Frou)

Virinoj inter si.
 — Pri tiu sinjorino Anderson oni povas nur bonon diri.
 — Jes, vere! Tute ne meritas paroli pri ŝi.
 (Allt för Alla)

En literatura ekzameno.
Profesoro: Kiel oni konsiderus la poeton Goethe, se li vivus nun?
Kandidato: Kiel la plej maljunan loĝanton de Germanujo.
 (Haagsche Post)



Pedagogio.
 — Via fileto estas tiel malgranda kaj vi jam instruas al li pianon?
 — Jes, sed nur por ke li ne maĉadu la ungojn.
 (Le Rire)

Praktika anatomio.
Malsanulo: La blinda intesto estas tute superflua parto en la korpo. Ni povus tre bone vivi sen ĝi.
Kuracisto: Vi jes, sed ni, kuracistoj, ne.
 (Ulk)

La scio estas potenco.
Instruisto: Se mi donus al vi 16 nuksojn kaj vi devus ilin dividi kun via malgranda frateto, kiom da nuksoj ricevus li?
Bob: Ses!
Instruisto: Vi ne scias kalkuli!
Bob: Mi jes, sed mia frateto ne!
 (Haagsche Post)

Gojo en la familio.
Edzo: La nova kuiristino bonege kuiras. La tagmanĝo estis grandioza!
Edzino: Jes, jes, sed ne forgesu, ke ankaŭ mi helpis.
Edzo: Malgraŭ tio.....
 (Schweizer Illustrierte)

Agordado de piano.
 — Rigardu, sinjoro agordisto, ĉi tiu klavo ne sonas.
 — Ĉu vi ordonas ripari ĝin?
 — Ne, tute ne, sed mi satus, se vi metus ankaŭ la aliajn klavojn en la saman staton.
 (Deutsche Illustrierte)



La kuraĝa rajdistino kaj la muso.
 (Kölnische Ill. Zeitung).

La granda nomo.
 — Mi tre satus, se filo naskiĝus al mi.
 — Kial?
 — Por ke la nomo Mayer iel ne elmortu.
 (Lustige Kiste)

La eta diplomato.
Filo: Patro, en ĉi tiu jaro vi havos grandan profiton.
Patro: Kiel?
Filo: Por la venonta lerneja jaro vi ne bezonas aĉeti al mi novajn lernolibrojn.
 (Haagsche Post)



En kuracista kongreso.
 — Mi deziris aŭskulti la prelegon de la profesoro pri la certa kuracado de la gorgbrulumo, sed li ne povas fari la prelegon.
 — Kio okazis al li?
 — Li havas gorgbrulumon.
 (Guerin Meschino)



D-ro OTTMAR FISCHER, hungara Esperantisto, unu el la plej popularaj instruistoj de Esperanto. Dum la lastaj du jaroj li „verdigis” kelkajn urbojn de Norvegujo, gvidante sukcesplenajn kursojn.



Esperanto-kurso en la norvega urbo Hamar. En la mezo sidas la gvidinto de la kurso, D-ro Ottmar Fischer kaj tenas la hungaran kaj norvegan flagojn. En la unua staranta vico de maldekstre la dua persono estas inĝeniero J. A. Kleven, kiu tre lerte kaj sindone organizis la bonsukcesan kurson. Apud li staras s-ro Arne Arnessen, ĉefdelegito de UEA kaj landa sekretario de la Cseh-Instituto por Norvegujo, estro de la norvega Cseh-metoda kuroorganiza sistemo, aranginto de dek grandsukcesaj kursoj de D-ro Fischer en Norvegujo.



Kursfina festo en Arnhem. — Nia rumana samideano, advokato S. Pragano el Bukureŝto, gvidis dum la lasta vintro en Arnhem kaj aliaj nederlandaj urboj grandajn kursojn. Sur nia bildo en la mezo sidas s-ro Pragano. Dekstre la lasta sidanto estas s-ro A. L. Moreau, sekretario de la Esp. societo „Unu per Esperanto”, organizinto de la kurso.




Ekskurso de norvegaj Esperantistoj al la ruinoj de antikva katedralo ĉe Hamar. En la mezo staras ing. Kleven (kun flago en la manoj) laŭ s-ro Arne Arnessen (en helkolora surtuto).



S-ro JENS SCHJERVE, norvega Esperantisto el Oslo, satata internacia instruanto de Esperanto. Nuntempe li guidas kursojn en Ameriko.



Esperanto kiel oficiala lingvo en Cannes (Francujo).



Kiel ni jam skribis en la Februara numero de La Praktiko, D-ro Edmond Privat, redaktoro de la gazeto „Esperanto”, organizis la viziton de la fama hinda gvidanto Mahatma Gandhi al Svislando kaj Italujo. Post tiuj vizitoj je la invito de Gandhi D-ro Privat kaj lia edzino vojaĝis kun Gandhi al Hindujo.

Ĉi tie ni prezentas al niaj legantoj tri bildojn pri la vojaĝo.

La unua bildo (supre la maldekstra) montras la scenon, kiam Gandhi kaj liaj akompanantoj en la svisa limstacio Vallorbe ripozas kaj atendas novan vagonaron. Apud Gandhi sidas D-ro Privat kaj legas gazeton.

La dua bildo (supre la dekstra) prezentas momenton, kiam Gandhi en la Ĝeneva Victoria Hall faras paroladon al la loĝantaro de Ĝenevo. Apud la sidanta Gandhi staras D-ro Privat, prezidanto



de la kunveno, kaj tradukas la frazojn de Gandhi.

La tria bildo montras idilian scenon sur la ŝipo dum la vojaĝo al Hindujo. Gesinjoroj Privat kaj Gandhi, sidante sur la planko de la ferdeko, interparolas pri Esperanto, pri Zamenhof kaj pri la spirito de l'Esperantismo.


Gandhi aŭdis pri Esperanto jam antaŭ la mondmilito, de sia brita amiko, la mortinta Esperanto-pioniro kolonelo Pollen. La persono kaj la ideoj de Zamenhof vekis ĉe Gandhi grandan intereson kaj simpatian. Bedaŭrinde la nuntempa malfacila situacio en Hindujo ne ebligas efikan propagandon por Esperanto.

Gesinjoroj Privat estis apud Gandhi ĝis la momento, kiam la brita polico malliberigis lin. Poste ili faris studvojaĝon tra Hindujo kaj d-ro Privat faris publikajn paroladojn pri Esperanto en kelkaj urboj de Hindujo.



S-ro GEORGES WARNIER (dekstra bildo), prezidanto de la Esperanto-Klubo de Parizo kaj de la Kongresa Komitato de Parizo, en la lastaj tagoj de Februaro vizitis la Esperanto-Domon en Arnhem kaj faris tie interesan kaj spritan paroladon kun lumbildoj pri la franca metropolo kaj pri la proksima universala kongreso de Esperanto, okazonta en Parizo.

S-ro L. N. NEWELL (maldekstra bildo), ĝenerala sekretario de la Pariza Kongresa Komitato, redaktinto de la bonega anglalingva propaganda gazeto „International Language”, meritplena angla propagandisto de Esperanto, en la fino de Februaro estis gasto de la Esperanto-Domo en Arnhem kaj faris valoran prelegon pri „la poezio en Esperanto”.




PANORAMO



La fakiro Blakamann, kiu lasas sin en ĉerko enterigi por pluraj tagoj.

★




Stranga natura ponto en la ŝtoniĝinta Arbaro de Arizona. Ĝi estas ŝtoniĝinta arbo-trunko kaj kuŝas super profundaĵo. La arbo estas ĉe la radiko 120 centimetrojn, ĉe la fino 45 centimetrojn dika kaj ĝia longeco estas 15 metroj.



En Afriko, ĉirkaŭ la ekvatoro, vivas malgranda popolo, la „jenoj”. Ili havas la kutimon pintigi la dentojn. Ilia propra kuracisto faras la teruran operacion. La iloj estas: unu lignopeco kaj unu fera stango. La kuracisto metas la lignopecon en la buŝon de la paciento, por ke tiu ne povu fermi la buŝon. Poste li komencas per la fera stango batadi la dentojn. La paciento terure kriegas, sed la kuracisto kaj liaj helpantoj kantas, por ke oni ne povu aŭdi la kriadon.

★



En Hongkong unu kulio de rikŝo tre sprite kombinis la rikŝon kun biciklo. Nun lia laboro estas pli facila kaj la veturo pli rapida. Baldaŭ centoj da aliaj rikŝo-kulioj imitis la ekzemplon.



Orkestro el infanetoj. En la amerika urbeto Eureka la instruistoj rimarkis, ke multaj infanoj havas tre grandan talenton al muziko. Ili decidis organizi infanan orkestron. La estro havas 6 jarojn, la tamburisto nur 3 jarojn. La interesa orkestro havas grandan sukceson, multaj urboj invitis ĝin por koncerto kaj ĝi jam ludis en parolanta filmo.



En Londono la industria higiena komitato studis la vivmanieron de la laboristoj kaj konstatis, ke la plej multan korpan movon faras la kelneroj de la popularaj restoracioj. Sur la kruojn de kelnerinoj oni fiksis paŝ-kalkulantajn aparatojn. La aparatoj montris, ke unu kelnerino marŝas dum unu tago proksimume 20 mejlojn (= 33 kilometrojn).

KONKURSOJ

GRAVAJ INFORMOJ:

La ĝeneralajn regulojn pri la partopreno en niaj konkursoj bonvolu serĉi en la Januara numero de LA PRAKTIKO.

Ĉar la Januara numeron ni devis denove presigi kaj tial multaj abonantoj ricevis ĝin malfrue, por ke ankaŭ ili povu partopreni en la

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

interesaj kaj instruaj konkursoj, ni decidis plilongigi la limtempojn. Ni akceptas solvojn de la 1-a, 2-a, 3-a, 5-a kaj 6-a konkursoj ĝis la 1-a de Majo 1932. La limtempo de la 4-a konkurso (*Kiom da kongresanoj havos la Kongreso en Parizo?*) ni plilongigas ĝis la 1-a de Junio.

14-a konkurso.

ENIGMO

La solvo konsistas el 70 literoj. Ĉiu nombro signifas unu literon.

- 21, 48, 53, 13, 58, 70 = nomo de mondparto.
41, 6, 19, 33, 65, 39, 36, 59 = dolĉa manĝaĵo.
16, 27, 24, 35, 36, 10 = la kelnero iras tiel.
2, 63, 15, 17, 49, 28, 12, 6 = longnaza besto.
34, 25, 40, 14, 37, 50, 33 = parto de la tago.
18, 1, 52, 22, 26, 8, 60, 32, 6 = la plej facila lingvo.
69, 57, 67, 70 = forta trinkaĵo.
11, 66, 7, 47, 62, 20, 42 = ne paroli.
9, 61, 55, 43, 28, 36, 59 = parto de la horo.
38, 51, 3, 64, 23 = ne mortis.
56, 45, 68, 33 = parto de la monato.
46, 54, 31, 29, 70 = sinjoro kun granda apetito.
58, 5, 30, 62 = nombro.
44, 4, 43 = montra vorto.

1—70 = grava regulo por novaj Esperantistoj.

Al la solvintoj ni donos 12 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis la 1-a de Junio.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn kaj alglui la konkurs-kuponon.

15-a konkurso.

Ĉarman kaj interesan bildon vi vidas ĉi tie. Sur la bildo estas tri kapoj kaj ses piedoj. Tamen vi eraras, se vi opinias, ke sur la bildo estas tri infanoj. La tasko estas: bonvolu respondi al ni: kiom da infanoj montras la bildo? Bonvolu atente kalkuli!



Inter tiuj personoj, kiuj sendas al ni la ĝustan respondon, ni dislotos 10 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Junio.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

16-a konkurso.

ENKETO

Kiu dato estas la plej grava en la historio de la homaro kaj kial?

Reguloj: 1) Kiel daton ne sufiĉas doni nur jaron, sed oni devas doni ankaŭ la monaton kaj tagon.

2) La respondoj estu mallongaj kaj spritaj.

Al tiuj personoj, kiuj sendas al ni la plej interesajn respondojn, ni donos 15 premiojn.

Respondojn ni akceptas ĝis la 1-a de Junio. La plej interesajn respondojn ni publikigos en LA PRAKTIKO.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn.

17-a konkurso.

ELTROVUI!

- Kiuj homoj metas siajn piedojn tiel forte, ke oni povas aŭdi tion en la tuta urbo?
- Kiam vivis la plej bela knabino de la mondo?
- Kion vidis ĉiu homo kaj neniam revidos ĝin?
- Kio povas fali tra vitro, ne rompante ĝin?
- Blindulo vidis kura leporon; lamulo persekutis kaj kaptis ĝin; nudulo metis ĝin en sian poŝon kaj portis ĝin hejmen. Kio estas tio?

Bonvolu sendi al ni la respondojn je ĉi tiuj kvin gravaj demandoj!

Al tiuj personoj, kiuj sendas al ni la ĝustajn respondojn, ni disdonos 12 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Junio.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

18-a konkurso.

ENIGMO

Ag, bo, bo, cer, den, da, do, do, e, ed, es, ĥo, in, in, kap, ko, lo, lo, nes, nig, nor, nu, ou, omb, on, onk, os, ra, ro, ro, so, ta, ter, ti, to, to, to, to, vos, zo.

El ĉi tiuj 40 silaboj faru 20 dusilabajn vortojn, kun signifoj:

- Revenanta sono.
- Direkto
- La maro havas ĝin.
- Utila besto.
- En la kapo estas.
- Skribilo.
- En la buŝo estas.
- Viro kun ringo.
- Koloro.
- Trinkilo.
- Parto de la korpo.
- La birdoj havas.
- Ofta verbo.
- Sur la ĉielo estas.
- Prepozicio.
- Frato de la patro.
- Senvesta.
- La lumo kaŭzas ĝin.
- Besta korpoparto.
- Granda birdo.

La unuaj literoj de la 20 vortoj donas la titolon de tre konata libro.

Al la solvintoj ni disdonos 15 premiojn. Solvojn ni akceptas ĝis la 1-a de Junio. Bonvolu atenti je la ĝeneralaj reguloj. Ne forgesu alglui la kuponon.

19-a konkurso.

En la Januara numero de LA PRAKTIKO aperis bildo pri la partoprenintoj de la Tria Internacia Kurso de Andreo Cseh en Krakovo. Sur tiu bildo estas videblaj multaj konataj kaj konindaj Esperantistoj.

La tasko estas: sendu al ni la nomojn de tiuj personoj videblaj sur la bildo, kiujn vi konas, signante la konatajn vizaĝojn per numeroj. Tion vi facile faras, se vi metas sur la bildon traveblan paperon kaj sur ĝi skribas la numerojn. Tiam vi ne bezonas eltranĉi la bildon, sed sendas al ni nur la traveblan paperon kaj la liston de la nomoj.

Atentu! Personoj, kiuj estas videblaj sur la bildo, ne rajtas partopreni en la konkurso.

Al la sendintoj de plej multaj nomoj ni disdonos 15 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Junio.

Bonvolu atenti je la ĝeneralaj reguloj.

Kupono
por la
14-a
konkurso

Kupono
por la
15-a
konkurso

Kupono
por la
16-a
konkurso

Kupono
por la
17-a
konkurso

Kupono
por la
18-a
konkurso

Kupono
por la
19-a
konkurso



Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

W. B. en B. (Germ.). — Je via demando, ĉu la frazo *Li vidis la viron kun sia ĉapelo sur la kapo* estas korekta aŭ ne, ni devas respondi, ke ĝi povas esti bona kaj malbona. Tio dependas de tio, al kiu apartenas la ĉapelo, ĉu al la vidanto aŭ al la portanto. Se ĝi apartenas al la vidanto, vi devas diri: „kun lia ĉapelo”. Sed se la ĉapelo apartenas al la portanto, vi prave diris: „kun sia ĉapelo”. Laŭ via supre citita frazo ni havas la opinion, ke la viro estas honesta homo. Sed se vi estus skribinta „kun lia ĉapelo”, ni havus la impreson, ke li estas ŝtelisto. Se vi opinias, ke la solvo estas malfacila, ni rekomendas al vi konstrui la frazon alimaniere, ekzemple: *Li vidis la viron, kiu portis sian ĉapelon sur la kapo*, aŭ: *Li vidis, ke la viro portas sian ĉapelon sur la kapo*.

„Lernemaŭlo”. — La vorto „caro” venas el la latina vorto *Caesar*, kiu signifas: imperiestro.

Sano M. P. — Vi ĝuste pensas, opinante, ke la vorto „kvaronhoro” ne estas logika. Vere, ni devas diri: *herkvarono*, ĉar ĝi ne estas horo, sed nur kvarono. *Kia kvarono? hora kvarono.* La kontrolon ni povas fari facile per la renverso: *Kio? hero. Kia horo? kvarona horo.* Vi vidas, ke ĉi tiuj lastaj respondoj ne estas taŭgaj.

T. M. en G. (Svislando). — Vi opinias, ke la demando: „*Kiuj objektoj ornamas la murojn?*” estas malkorekta, ĉar anstataŭ la vorto „*kiuj*” devas esti „*kiaj*”. Vi ne estas prava. En ĉi tiu frazo ambaŭ demandaj vortoj estas uzablaj, kaj tiam ankaŭ la respondaj frazoj estos diversaj. Bonvolu atenti: Demando: *Kiaj objektoj?* Respondo: *Belaj objektoj, novaj objektoj.* Sed: *Kiuj objektoj?* Resp.: *La spegulo, la bildoj.* Simile: *En kia ĉambro manĝas la familio?* En *bela, granda ĉambro.* Sed se ni demandas: *En kiu ĉambro?*, la respondo devas esti: *En la mangoĉambro.* Kiel vi vidas, per la vorto „*kia*” ni demandas kvaliton, per la vorto „*kiu*” ni demandas difinitan objekton (kaj personon).

Fino A. R. — La frazo, kiun vi sendis al ni: „*Mi estas dankema al vi pro via helpo*”, estas bona. En ĉi tiu frazo la vorto *pro* estas la ĝusta kaj ne *por*. La vorton *pro* ni uzas por esprimi kaŭzon. Kaj efektive la helpo estas la kaŭzo de la danko. Sed ni konsilas al vi diri nur: *mi estas dankema.* Dankema homo estas tiu homo, kiu havas la kutimon danki. Same kiel ĉe „babilema, kolerema”. La sufikso „*em*” signifas inklinton, kutimon.

ANONCETOJ

TARIFA: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

PETO. — Esperanto-klaso en metia lernejo petas por ekspozicio ilustr. poŝtkartojn kun la poŝtmarko bildflanke. La celo estas: montri al la lerneja estraro la praktikan valoron de Esperanto. Adreso: s-ro *Josef Mraz*, instruisto, Aubergrasse 43. I., Linz a/D., Aŭstrio.

LA MEMORON plifortigas perkoresponde profesoro de mnemoniko *D. Fajnshtejn*, Vilno, Zawalna 15 (Polujo). Postulu senpagajn prospektojn pri la memorfortiga kurso en Esperanto.

ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

La hundo estis batata per la knabo. — En ĉi tiu frazo la vorto „*per*” estas maltaŭga. Ni devas diri: „*de la knabo*”. La regulo estas: ĉe pasivaj verboj la vorto, kiu montras la aganton, ricevas la prepozicion „*de*”. La vorton „*per*” ni povas uzi nur por montri ilon, rimedon. Ĉe la supra ekzemplo estas klara, ke la knabo estas aganto kaj ne ilo. Por pli klare vidi la aferon, ni aldonu novan parton al la frazo: *La hundo estis batata de la knabo per bastono.*

Ili rifugiĝis sin. — Malkorekta frazo, ĉar la verbo *rifugi* ne estas refleksiva. Oni devas diri: *Ili rifugiĝis.*

Vi riĉigis min kun vera trezoro. — En ĉi tiu frazo la vorto „*kun*” ne estas taŭga. Ni devas diri: „*per vera trezoro*”. Vi tuj klare vidos la aferon, se ni ion aldonas al la frazo. Jen: *Vi kun via amiko riĉigis min per vera trezoro.* Nun vi vidas la diferencon inter la vortoj „*kun*” kaj „*per*”.


GRANDA LOTERIO

por la instalado de la Esperanto-Domo de Arnhem

Aprobata per dekreto de la Nederlanda Ministro por Justeco,
2 Sekc. A. N-o 1069, de la 2-a de Aprilo 1931.

ĈEFPREMIOJ:

1. Aŭtomobilo
NASH, 6-cilindra
5-persona, plej
nova modelo.



2. Moderna manĝo-ĉambra meblaro el fabr. „Pander”, Hago.
3. Portebla skribmaŝino „Royal”, plej nova modelo.
4. Gramofono de „Sprenger”, Hago.
5. Persa tapiŝo „Schira” de firmo Kulcsár, Hago.
6. Luksa salona starlampo el fabr. D. D. Coelingh, Hago.
7. Portebla skribmaŝino „Corona”, plej nova modelo.
8. Polvuŝilo „Protos” kun kompleta garnituro.
9. Foto-aparato Zeiss-Ikon Cocarette 6 × 9.
10. Laŭtparolilo de Bell Telephone Mfg. Co.

Entute 1000 premioj, ĉiuj valoraj praktikaj objektoj (pli ol 1000 elektraj mastrumaj aparatoj, plue bicikloj, vojaĝkofroj k.t.p.) — La tirado okazos publike dum la somero de 1932 en Arnhem pere de Notario Ch. J. Engelberts, Arnhem. — La rezultato de la tirado (listo de la gajnintaj numeroj kaj de la premioj) estos publikigata per speciala bulteno, ricevebla ĉe la Esperanto-Domo en Arnhem. — La gajnintoj povas transpreni la premiojn dum unu jaro post la tirado. Post tiu templatigo la premioj apartenas al la loteria fondo.

PREZO DE UNU LOTBILETO: 1.- ned. guld.

Adreso por mendoj kaj pagoj:

Fino J. E. RIKKERS, Anton de Haenstraat 122,

DEN HAAG, (Nederlando). — Poŝtgirokonto: Den Haag 96085.

Ideala lingva ekzercilo:

La enigmoj

Unu broŝuro plena de enigmoj por lerni novajn vortojn.

Specimenan enigmon vidu en ĉi tiu numero de LA
PRAKTIKO inter la konkursoj.

1000 premioj al la solvintoj

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Opinio pri la broŝuro: „*Mi gratulas al vil La enigmoj estas altgrade geniaj!*” (S-ro J. T. en K., Polujo).

Prezo: — 15 ned. guld. (= unu respondkupono).
Aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

La enigmojn solvis:

Per dikaj literoj ni presas la nomojn de tiuj, kiuj gajnis premion.

(Daŭrigo) 91. Boschat, Boulogne-sur-Seine. — Halma, Oranjedorp. — V. d. Pavert, Nijmegen. — Minderhoud, Haarlem. — V. Soest, Arcen. — Stettler, Bern. — Mandel, Cernauti. — Kunnen, Dordrecht. — Soeteman-Rube, Hago. — 100. Broek, Wassenaar. — Fox, Iggesund. — Lorenz, Reichenbach. — Schmidt, Pirna. — Schlechter, Münster. — Korell, Langebrück. — Brunet, Bordeaux. — Grob, St-Mande. — Juchniewicz, Warszawa. — Henriksen, Holbæk. — 110. Piper, Vechta. — Tarnow, Düsseldorf-Oberkassel. — Sing, Kreuzlingen. — V. d. Schaaff, Leeuwarden. — Gombault, Leeuwarden. — Schumann, Reichenbach. — Tilstra-Rohdens, Leeuwarden. — Fischer, Pirna. — Kruizinga, Amsterdam. — Onstein, Nijmegen. — 120. V. Tintereen, Amsterdam.



KORRESPONDU

— Kara Esperantisto, vi devas korespondi!
— Kial?
— Ĉar:

Unue, per la korespondado vi plej bone ekzercas la lingvon.
Due, per korespondado kun interesaj personoj vi plej interese kaj agrable pasigas viajn liberajn horojn.
Trie, per la korespondado vi multe lernas pri malproksimaj landoj kaj popoloj.
Kvare, per la korespondado vi plej efike laboras por la amikeco kaj paco inter la popoloj.
Ĉi tie vi trovas adresojn. Elektu kaj skribu tre klare, precipe la adresojn.

ADRESOJ

Prezo de enskriba. — Unufoja enskriba kosto — 45 ned. guld. (= 3 respondopostoj). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.
Favoru al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpensi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MAILONGIGOJ

s-ro = sinjoro	int. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	glus sur la bildan
ŝino = ŝtulinio	PK = poŝtkarto	flankon
des. = desiras	PI = poŝtkarto (ŝtulinio)	k.ĉ. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ. = pri ĉiu temo

ĈEĤOSLOVAKIO

Vyšok (Olom. Berchov). — Dr. med. vet. Elgona Rina, 30-jara bestokuracisto. Dez. kor. per L aŭ PI kun Francujo.
Biepost. — S-ro F. Ullrich, 35-jara poŝtstacidisto. Dez. ricev. eldonkaj papilinoj kontraŭ laŭdita rekompenco.

DANIO

Jyderup. — S-ro Erik Pedersen, 22-jara (santa, Holbølvej). — Dez. kor. kun Rusujo kaj ĉiuj eksterlandaj landoj. Dez. inter. numeroj kaj senvaloraĵoj papirinoj.

FRANCIJO

Colombes (Seine). — S-ro Marcel Lemaire, 47-jara instruisto, 168 rue Hoche. — Serĉas korespondistinojn en Hispanujo. Ĉiuj respondos.

GERMANIO

Altenstadt (Hessen). — D-ro Wilhelm Bär, bestokuracisto. — Petas ĉiuj kolegoj universitate aprobigitaj, sendi sian adresojn.
Freiburg i. Sa. — S-ro Karl Nendel, Fernstr. 17. — K.ĉ. p.ĉ.

ITALIO

Alessandria. — S-ro Clemente Daglio, 50-jara servistino, Via Sarmarola 13. — L. PK, k.ĉ. pri scienca, teknika, Esp.-movado. Petas afanki per ĉiuj PM.

JAPANIO

Aiŝ-Kan. — S-ro H. Otomoto, Ĉiu. Ĉiu-ĉiu. — L. PK, k.ĉ., precipe kun eksterlandaj.

Takaoka. — S-ro Naoni Rokuse, Hjakutjo-maŝi 3, Tojama-Ken. — PI bfl. k.ĉ. Ĉiam respondas.

LATVUJO

Riga. — S-ro S. Jakobson, 20-jara dentoteknikisto, Kungu iela 30. a-18. PI, L.

NEDERLANDO

Assen (Dr.). — S-ro F. A. G. Boermans, 19-jara vendisto, Veenestr. 1.
Giessendam. — S-ro A. J. Middag, lernejestro.
Gorinchem. — S-ro J. P. Waale, lernejestro, Zusterstraat 9.
Gorinchem. — S-ro B. Versluis, instruisto, Schelluinen 63.
Gorinchem. — S-ino M. Beugelink-Bourguignon, Arkelschedijk 193.
Gorinchem. — F-ino E. Kingmans, telefonistino, Nieuwstad 32.
Gorinchem. — F-ino I. Hartman, Nonneveld 23.
Gorinchem. — S-ino E. Tammens-Ooijkaas, Alkewaal 2.
Haarlem. — F-ino Annie Zinkweg, analizistino, Hoofmanstraat 48.
Rotterdam. — F-ino A. Oosterwijk, 24-jara telefonistino, Boezemsingel — K.ĉ.

Rotterdam. — F-ino D. Bezooeyen, 28-jara edukistino, p.a. s-ro A. Oostveen, Crooswijk 8a. — L. PI, k.ĉ., p.ĉ.

Rotterdam. — F-ino N. v. d. Burgh, 28-jara oficistino, Putschelaan 58a. K.ĉ., p.ĉ.

Rotterdam. — F-ino Anna Hers, 46-jara verkistino, Prins Hendriklaan 6a. L. PI, k.ĉ., p.ĉ.

Rotterdam. — F-ino M. Klaassen, oficistino, Hooftgouverlaan 75.

Rotterdam. — F-ino T. Kelder, oficistino, Waandijk 144.

Rotterdam. — F-ino T. Beijer, instruistino, Aalstriede 157a.

Rotterdam. — S-ro B. B. de Regt, ingenierno, Van de Withstraat 89.

Rotterdam-Zuid. — S-ro Hendrik Cornelis Vlaschop, masonisto kaj signisto, Wed 14.

Rotterdam. — F-ino E. E. Droogleevers, oficistino, Prins Hendrikade.

Rotterdam. — F-ino B. de Zoete, 20-jara lernistino, Voorburgstraat 12.

Rotterdam. — S-ino G. H. Drost, 28-jara, Maltmasserstraat 160a. II. K.ĉ.

Sloewijk (N.Br.). — F-ino L. Hoogendijk, instruistino, Straatweg 76.

Vuren (Geld.). — S-ro J. Cramer, instruisto, A. 153.

Woodrichem. — F-ino E. W. Vos, instruistino, Hoogstraat 15.

SVEDUJO

Eskestuna. — S-ino Märta MÄKI, 30-jara telefonistino, Klostergatan 47. Dez. kor. komence per PI k.ĉ.

Karlstad. — S-ro Filip Carlson, 35-jara konstruisto, Klarstrand 6. A. PI k.ĉ., p.ĉ., precipe pri la Esperanto-movado.

Karlstad. — S-ro Malte Gläns, 25-jara librolandisto, Va. Vartentornet. K.ĉ., p.ĉ.

Mänsrad. — S-ro Einar F. Månsson, 32-jara instruisto. — PI kun japan p.ĉ.

SVISUJO

Bern. — F-ino Esther Stettler, 30-jara bankoficistino, Tiefmattstr. 12. L aŭ PI kun Svedujo, Norvegujo, Japanujo, Rumanujo, Grekujo, Ita

pri lando kaj moroj, muziko, pentraĵoj.

Sankt-Gallen. — S-ro Rudolf L. Albrecht, 40-jara vojaĝisto de ĉiuj fabriko, Jeremias Gotthelf-Strasse 12. — PI bfl. kun nord- kaj ek

eksterlandaj (ne-germanlingvaj).

Internacia Ĉeĥ-Instituto de Esperanto

Oosthuishaan 31, DEN HAAG (Nederland)

Polstakanto: Den Haag 162626

LA KURSO DE ANDRĤO ĈEĤ. La stenografita kaj poste minuscigita teksto de unu tuta kurso de Andreo ĈeĤ lita en Stokholmo en 1921. La kurso kaj enkonduko kaj klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruistoj, ĉiujn tiu sistemo, entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo, afankite. 2.75 G.
KONVERSACIA VORTARO, ĉiuj difinoj de la vortoj uzitaj en la kurso. 25
KONVERSACIA LITERATURO, 8 numeroj, unu r-o. 10
KARTONA UJO por la Konversacia Literatura. 10
KONVERSACIA GAZETO. Unufoja r-o kun plena informo pri Esp-o, por enkonduki la novajn Esp-atojn en la movadon. 20

KANTO AL LA ESP-DOMO. Verkita de C. Roskes-Dicksen. Muziknotoj kun teksto. 15 G.
POSTKARTOJ KUN LA BILDO DE LA ESP-DOMO sur la adresflanko. Tre valgaĵoj por skribmaŝino, 50 pecoj. 75
BILDKARTOJ pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem, 10 belegaĵoj il, postkarto kun Esp-teksto, pri la ekstero kaj interno de la Esp-Domo kaj pri la urbo Arnhem. la 10 kartoj kune afankite. 50
BILDKARTOJ, postkarto kun poŝtetoj de D-ro Zamenhof, Andreo Ĉe kaj de Ĉe-metodaj instruistoj, ĉiuj nun 10 diversaj kartoj. Unu peco. 10
GVIDLIBRO pri Arnhem, 32 paĝa libreto ilustrita. 15
PLANO DE ARNHEM, kolorpresa plano de la urbo, la loko de la Esp-Domo aparte markita sur ĝi. 40
VERZAMELDE EXAMENOPAVEN. 45
VERTAALDE EXAMENOPAVEN. 50

La prezoj entute la afankitoj!

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
4-a numero



Aprilo
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POSTĈEKKONTO
162626

La 14-a de Aprilo

estas grava tago por la Esperantistoj, ĉar en tiu tago en la jaro 1917 mortis d-ro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de nia lingvo.

La mondmilito furiozis en tiu tempo kaj ĝi multe rapidigis la finon de tiu nobla vivo.

D-ro Zamenhof estis dum sia tuta vivo granda idealisto. Li faris la novan lingvon kun la celo, ke ĝi pacigu la popolojn kaj reunuigu la homaron. Kaj li firme kredis, ke la homaro proksimiĝas al tiu celo.

Sed en la jaro 1914 eksplodis la mondmilito. D-ro Zamenhof estis ĝuste en vojaĝo al la universala Esperanto-kongreso en Parizo. La kongreso ne povis okazi kaj d-ro Zamenhof devis revojaĝi al sia hejmurbo Varŝavo. Post longa kaj malfacila vojaĝo li atingis sian hejmon kaj tie li restis ĝis la fino de sia vivo.

La terura milito haltigis la internacian laboron de la Esperantistoj, la „kultur-popoloj” de Eŭropo fariĝis sovaĝaj. Pro tio Zamenhof multe suferis anime, kaj ankaŭ korpe, pro kor-malsano. Sed tamen li ne ĉesis labori. En

la printempo de la jaro 1915 li verkis publikan leteron al la diplomatoj. En tiu letero li alvokis la diplomatojn ĉesigi la militon kaj li montris vojon kaj donis konsilojn pri la solvo de la internaciaj problemoj, simile kiel poste faris la usona prezidanto Wilson.

Sed la milito plue daŭris kaj kun ĝi la malsaneco de Zamenhof kreskis. Fine la 14-an de Aprilo 1917 ĉesis bati lia suferanta koro.

La urbo Varŝavo estis tiam sub germana okupado. La tutmonda Esperantistaro ne povis partopreni ĉe la enterigo. Nur malrapide disiris la malĝojiga informo kaj ĝi vekis ĉie sinceran funebron, ĉar mortis bona homo kaj granda profeto de la tuta homaro, kies pensoj inspiras milojn da homoj kaj

kies verko kondukas la mondon al pli feliĉa estonteco.

La verko de Zamenhof estas nun en niaj manoj, kaj ni, Esperantistoj de la tuta mondo, devas plenumi lian testamenton. Lia ekzemplo inspiru nin al esperplena laboro.



La tombo de D-ro Zamenhof en Varŝavo.


Praktiko

A GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro. ★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro. Specimena numero kostas unu respondkuponon (0.15 ned. guld.). Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. ★ Kopirajto de la enhavo rezervita.

LECIONO PRI LA KOMERCA KONTORO.

1. komerca kontoro
2. posedanto, ĉefo
3. kasisto
4. librotenisto
5. stenotipistino, sekretariino
6. (komerc)ler-nanto
7. vendisto
8. aĉetanto, kliento
9. specimenoj
10. kontortablo
11. skribotablo
12. skribtabla seĝo
13. pupitro
14. turnseĝo
15. paperkorbo
16. skribmaŝino
17. skribmaŝin-tablo
18. kopimaŝino
19. kalkulmaŝino
20. ĝiceto
21. monŝranko
22. papermono (monbiletoj, banknotoj)
23. fera ŝranko (por la kontorĉeflibroj)



24. kontorlibroj (ĉeflibro, ordiglibro, konturantalibro, bilanclibro, inventarlibro)
25. breto por registrolibro
26. leterordigilo
27. kartoteko
28. leterkorbo
29. inkujo
30. plumingo
31. inksoŝtelo
32. skribsubmetaĵo
33. letero
34. koverto
35. traigilo
36. stampilo kun farbulo
37. leterpapilo
38. liniilo
39. telegramkodo
40. telefono (surtablo)
41. arklampo
42. ampolo
43. lampŝirmilo
44. lampŝirmilo
45. kalendaro
46. terglobo
47. landkarto
48. afiŝo

1

Hodiaŭ estas la tria de novembro laŭ la 45. La „sezono” de la komercejo, kiu peras importon de kafo kaj aliaj eksterlandaj produktaĵoj, komenciĝas. Pro tio en la komercejo Schmidt & Co. vigla vivo regas. La 9 kuŝas sur la 10, ĉe kiu nova 8 priparolas negocajn aferojn kun la 7. Li ŝajnas esti kontenta kun la 9. Ankaŭ la 3 havas multan laboron. Li, malantaŭ la 20, denombrias grandajn kvantojn da 22, kiujn li certe baldaŭ enmetos en la 21, komparinte la rezultaton kun la nombroj de la kaslibro.

La 4, antaŭ la 13, en la fundo de la kontoro estas tre okupitaj, por noti la novajn mendojn en la 24. Por la kalkulo ili uzas la 19. La 38, pendanta ĉe la 13, estas la ilo, per kiu oni desegnas liniojn. La libroj mem ĉiunokte estas metataj en la 23, kie ili estas ŝirmataj kontraŭ ŝtelistoj.

Ĉar la 4 dum la laboro bezonas helan lumon, multaj lampoj estas

pendigitaj super la 13 kun helaj 42 kaj kun bone reflektantaj 43. La lampoj per 44 povas esti tirataj pli altan aŭ pli malaltan. La tuta kontoro estas heligata krom tio per 41.

En la antaŭaĵo ni vidas la 2, sinjoron Schmidt, kiu ĵus ricevis gravan 33. Versajne li tuj vokos la 5, por dikti al ŝi la respondon. Kiam (ĝi) urĝas, li iras al la 40 aŭ sendas telegramon, eble ankaŭ kablogramon al sia transmara liveranto helpe de la 39. Intertempe li jam komisiis la 6, kontroli en la 27, ĉu la sendinto de la 38 jam antaŭe proponis liveraĵon. Kutime s-ro Schmidt, respondinte 33, signas ĝin per respondstampo. Por tio li bezonas la 36 kun la stampfarbujo. Poste la 33 estas metataj en la 28 kaj fine truatataj per la 35 kaj kolektataj en la 26, kiu staras en la 25. La 34 de la respondita 33 la 2 kutime jetas en la 15.

INTERPAROLOJ EN LA KONTORO:

La 2 parolas:

Kun la 7: Ĉu la 8 estis kontenta kun la 9? — Ĉu li mendis ion? — Ĝis kiam li volas ricevi la komercaĵojn? — Ĉu vi jam parolis kun nia urba vojaĝanto pri la mendo de la firma N.N.? — Ne forgesu montri al s-ro B., se li venos hodiaŭ, la plej novajn specimenojn! — Kiuj sendoj al Svedujo povas esti efektivigitaj ĝis la fino de ĉi tiu semajno? —

Kun la 4: Se nia afero plue tiel progresos, ni baldaŭ bezonos novan kaslibron; ĉu vi jam mendis novan? — Ĉu inter la hodiaŭ ricevataj monbiletoj vi trovis falsigitajn? — Ne pagu al nia liveranto N. en M. la tutan sumon: parto de la liveritaj komercaĵoj estis netaŭga. — Montru al mi la lastan tabelon de la pagoj ĉe la poŝteekoficejo. — Zorgu, por ke en la venonta semajno ni havu pli grandan nombron de malmultvaloraj 22, ol dum la lasta pago de salajroj. — Kiuj estis la kliento, kiu ĵus pagis ĉe vi? — Ĉu li pagis per kambio? — Depost la komenco de nova monato pagu al nia 6 dek procentojn pli, ol la tarifo destinas. La junulo ŝajnas sukcesi; li estas kompleksa kaj inteligenta.

Ĉi tiu leciono estas prenita el la bonega praktika lernolibro: THORA GOLDSCHMIDT: BILDOTABULOJ, eldonita de la firma Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. La libro sur 104 paĝoj pritraktas ĉiujn temojn de la praktika vivo en similaj bildoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO kaj ĝia prezo estas:

kartonita nur 1.90 ned. guld.

bindita „ 2.20 „ „

Al niaj abonantoj aŭfrankita sendo!

FARU LA KONTROLON!

(Praktika gramatika leciono)

La solvo de la 3-a tasko:

Surmurigis, pliriĉiĝi, elpoŝigis, enmanigis, enpoŝigis, altbliĝis, surtabligis, enbuŝigis, enlitigi.

Endormigis, enmanigis, engazetigis, realigi, enkorpiĝas, envagonigis, ensipiĝis, ensipigis, surakvigis.

Subakviĝos, trankviligis, surfundiĝis, albordiĝis.

Elŝipiĝis, elŝipigis, surŝipigis.

Surbrustigis, surteriĝis, elkajutiĝis, senfortiĝis, elpoŝigis, surpaperigis, enkovertigis.

Enterigis, senvualigis mian statuon, elkovertigis.

Elmigiis.

4-a tasko.

Cu vi komprenas la prepoziciojn por, pro, pri kaj per? Jen ekzempla frazo: *Zorgante pri la sano de mia frato, pro la malbona vetero mi aĉetis por li dikan veston per mia ŝparita mono.*

POR esprimas celon. Anstataŭ ĝi ni povas diri: „kun la celo”, „favore al”. Ekz-e: *ni manĝas por vivi.*

PRO esprimas kaŭzon. Anstataŭ ĝi ni povas diri: „kaŭze de”.

PRI signifas rilaton. Ekz-e: *paroli pri io; sonĝi pri iu.* Anstataŭ ĝi ni povas diri: „rilate al”, „koncerne al”.

PER signifas ilon, rimedon. Ekz-e: *ni skribas per krajono, ni parolas per la okuloj.* Anstataŭ „per” ni povas diri: „helpe de”.

En la sekvanta teksto tie, kie vi trovas: „p...”, devas esti unu el la supraj kvar prepozicioj. Bonvolu fari la kompletigon. La rakonto ni publikigos en la Maja numero. Bonan laboron!

LA DU BILETOJ

Rakonto p... ruza venĝo.

Sinjoro Aleksandro Fuŝrap p... la favoro de la sorto estis ĵurnalisto en la urbo Rancfort, mondfama p... la bonega butero p... malsanuloj, tie fabrikata p... specialaj maŝinoj.

Sinjoro Fuŝrap, p... kiu nia rakonto temas, p... sia ofico devis ofte vojaĝi p... fervojo al aliaj urboj p... fari raportojn p... sia gazeto p... novaj skandaloj. P... la fakto, ke li estis ĵurnalisto, li vojaĝis ĉiam senpage. Li havis legitimacion, kiu p... portreto kaj p... kelkaj vortoj atestis p... tio, ke li rajtas veturi senpage p... la ŝtataj fervojoj.

Dum siaj vojaĝoj sinjoro Fuŝrap ofte aŭdis p... unu severa konduktoro, kiu p... fanatika burokrato, p... plaĉi al siaj superuloj, p... diversaj malagrablaĵoj turmentas la vojaĝantojn. La nomo de tiu tirano de la fluganta rado estis Johano Bilrig.

Foje s-ro Fuŝrap vojaĝis p... rapida vagonaro al la urbo Ruĝmur, p... fari raporton p... sensacia krimo farita en tiu urbo: La surda muzikisto Francisko Lackord p... ĵaluzo p... sia rusta glavo mortpafis sian edzinon, kiu sonĝis antaŭ kelkaj tagoj p... juna princo kun kvar oreloj.

S-ro Fuŝrap en la vagono sidante revis p... la granda honorario, kiun la gazeto pagos al li p... la sensacia raporto kaj li decidis diri dankon al s-ro Lackord p... la farita krimo, p... kiu baldaŭ la tuta mondo legos. Li pensis ankaŭ p... la sukceso de la bildoj, kiujn li faros p... la gazeto p... sia multekosta fotografa aparato, p... la konata scivolemo de la publiko.

En tiu momento enpaŝis la timata konduktoro Bilrig p... kontroli la biletojn. S-ro Fuŝrap p... ambaŭ manoj serĉis sian legitimacion, sed fine li konvinkiĝis p... tio, ke li forgesis ĝin hejme p... la granda rapido. La konduktoro faris p... tio teruran scenon, li batadis la plankon p... ambaŭ piedoj kaj minacis s-ron Fuŝrap p... timigaj vortoj p... granda puno. S-ro Fuŝrap estis pala p... timo, sed fine li sukcesis trankviligi la konduktoron

p... granda trinkmono kaj p... paroloj p... la potenco de sia plumo.

S-ro Fuŝrap estis tre kolera p... la okazintaĵo kaj pensis p... venĝo. Li memoris p... sia kolego, redaktoro Mateo Arteltond, kiu foje plendis p... la sama konduktoro, ĉar li punis lin p... manko de bileto, kiam li foje vojaĝis p... viziti sian bopatrinojn kaj p... ĝojo forgesis preni kun si la fervojan legitimacion.

S-ro Fuŝrap p... aŭtomobilo rapidis al redaktoro Arteltond kaj p... kolero balbutante diris:

— Kara kolego, mi estas certa p... tio, ke ankaŭ vi deziras puni tiun aĉan konduktoron Bilrig p... lia impertinenta konduto. Mi petas, vojaĝu morgaŭ kun mi p... la fervojo, p... fari la venĝon p... liaj krimoj.

— Mi ne dubas p... tio, ke Bilrig meritas punon p... sia tiraneco, sed kion vi elpensis p... lin forte puni?

— Ne zorgu p... tio! Ni ambaŭ havas p... la fervojo senpagajn biletojn. Ni intersanĝu niajn legitimaciojn kaj kiam Bilrig venos p... fari la kontrolon, li saltos en la aeron p... kolero kaj volos nin puni p... granda monsumo. Sed li ne frandos el tio. P... tio mi certigas vin.

— Bone, sed p... kio okazos la puno?

— Nun mi silentas p... tio, p... fari al vi dolĉan surprizon. Sed morgaŭ vi vidos ĉion p... viaj propraj okuloj. Cu vi aŭdis p... Georgo Bruĉef, la staciestro de la urbo Porkenput? Li estas fama p... sia severeco. P... ĉiu bagatelo li insultas kaj eĉ batas la fervojistojn. Sed nun sufiĉe p... tio.

En la alia tago s-roj Fuŝrap kaj Arteltond vojaĝis p... la rapida vagonaro al Ruĝmur. P... ke la plano sukcesu, ili sidis en du diversaj vagonoj. En momento konduktoro Bilrig aperas en la kupeo de s-ro Fuŝrap p... kontroli la biletojn. S-ro Fuŝrap sekrete ridante p... la okazonta sceno donas al Bilrig la legitimacion de — Arteltond. Bilrig p... aglaj okuloj ekzamenas la karton kaj ekkrias:

— Sinjoro, vi vojaĝas p... fremda legitimacio! Cu vi ne scias p... la regularo? Oni punos vin p... trompo! Ni iros al la staciestro p... fari la protokolon!

— Ĉe kiu stacio? — demandas Fuŝrap p... trankvila voĉo.

— Ĉe la stacio Porkenput! — respondas la konduktoro, pensante p... tio, ke li akiros la favoron de Bruĉef p... ĉi tiu nova merito.

Bilrig metis la konfiskitan legitimacion en sian poŝon kaj eliris p... daŭrigi la kontroladon. En la kupeo de s-ro Arteltond, kiu p... laceco kuŝis sur la kanapo p... iom ripozi, ripetigis la sama sceno. La konduktoro p... kolero spiregante konfiskis la „fremdan” legitimacion kaj p... tondra voĉo ordonis, ke s-ro Arteltond ĉe la stacio Porkenput iru al la staciestro p... fari la protokolon.

La vagonaro haltas ĉe la stacio de Porkenput pli longe p... bezono preni akvon p... la lokomotivo. Dume la konduktoro kaj la du ĵurnalistoj p... rapidaj paŝoj iras al la staciestro. Bilrig kun triumfa mieno transdonas al la staciestro la du konfiskitajn legitimaciojn kaj raportas p... la trompo.

La staciestro p... akraj okuloj ekzamenas la du sinjorojn kaj la portretojn en la legitimacioj, p... kontrolo prenas de ili la nom-subskribojn, redonas al ili la legitimaciojn kaj post tio p... siaj pezaj manoj donas du potencajn vangofrapojn al la konduktoro:

— Kanajlo, ĉu vi kuraĝas ŝerci kun mi? Cu vi ne vidas p... viaj okulaĉoj? Cu vi estas ebria p... brando? La du sinjoroj havas bonajn legitimaciojn! Marŝu al via laboro!

La vagonaro foriris kun la du ĵurnalistoj, feliĉaj p... la bone sukcesinta venĝo, kaj kun la malfeliĉa konduktoro, kiu p... sia malgranda cerbo vane pensadis p... la maljusteco de la staciestro kaj eĉ hodiaŭ vizitas kuracistojn p... sanigi la orelojn.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



MAURICE MAETERLINCK,



la fama belga verkisto, estis sur la Riviero, kiam foje unu amerika sinjorino anoncis sin ĉe li kaj kiel kunlaborantino de iu amerika revuo, petis de li intervjuon. Maeterlinck rifuzis akcepti ŝin. La sinjorino denove petis enlasson kaj dirigis al la verkisto, ke la intervjuo estas por ŝi afero de morto aŭ vivo, ĉar ŝi perdis en la kazino ĉiun sian monon. Ŝi povus hejmenvojaĝi al siaj infanoj nur, se ŝi sendus al sia gazeto la intervjuon. La honorario sufiĉus por la vojaĝo ĝis Ĉikago. Se Maeterlinck rifuzas la intervjuon, — ŝi diris, — restas nur tio, ke ŝi pendigas sin.

Kvankam la verkisto sciis, ke la tuta dirajo povas esti nur trompo, li tamen akceptis la ĵurnalistinon.

La sinjorino enpaŝis, kun kajero kaj krayono en la manoj, kaj sen ia hezito demandis:

— Diru al mi, kara majstro, kial vi forlasis vian edzinon Georgette Leblanc?

Maeterlinck kun kolero saltis de la seĝo, prenis la brakon de la vizitantino, kondukis ŝin al la pordo kaj alkiis:

— Sinjorino, iru kaj pendigu vin!

★

DIPHILOS (355—263 a.Kr.),

la greka poeto, foje tagmanĝis ĉe sia amiko Gnathenes. Laŭ la greka kutimo ili trinkis vinon miksiton kun akvo. Sed Gnathenes sekrete metis en la vinon pecon da glacio anstataŭ akvo.

— Bonan malvarman puton vi havas! — ekkriis Diphilos, admirante la malvarman, freŝigan trinkadon.

— Nur de tiu tempo estas tiel malvarma mia puto, kiam mi jetis en ĝin la prologojn de viaj komedioj, — respondis la mastro.

★

GUSTAVO ADOLFO (1594—1632)



sveda reĝo foje alparolis unu pastron, kiu rajdante sur ĉevalo pasis tra la vilaĝo, en kiu la reĝo tiutempe estis:

— Sinjoro pastro! Se mi ne eraras, en la biblio staras: „Iru en la mondon“, kaj ne: „Rajdu en la mondon“.

— Pardonu via moŝto, — respondis la pastro, — en la originala teksto staras: „Iru tiel, kiel vi povas“.

GIACCOBO ANTONELLI (1806—1876)

kardinalo kaj ministro de papo Pio IX-a, estis iom superstiĉema homo. Granda estis do lia maltrankvileco, kiam unu post alia mortis la kardinaloj Bedin kaj Savelli. Ĉar laŭ la roma popola kredo, se iu kardinalo mortis, baldaŭ sekvas lin du aliaj kardinaloj.

La timo de Antonelli estis tiom pli motivita, ke li suferis en la malsano tiom ofta ĉe politikistoj: li havis reŭmatismen. Tial en iu tago, kiam oni komunikis al li la morton de kardinalo Geissel, li multe trankviliĝis. Li diris kelkajn frazojn de bedaŭro pri la granda perdo, kiu la Eklezion trafis, kaj poste kun radiantia vizaĝo ii ekkriis:

— Dankon al Dio! Troviĝis la tria! Per tio la serio estas fermita.

★

JEAN PAPADIAMANTOPOULOS MOREAS (1856—1910)



franca poeto de greka deveno, estis tre vanta homo. Foje lia amiko, Durand, prezentis al li unu junan poeton. Moréas diris al la junulo:

— Venu kun mi tagmanĝi. Kaj vi povos iam rakonti, ke vi tagmanĝis kun granda poeto.

La junulo miris je tiu diro, sed Moréas daŭrigis:

— Absolute tiel estas. Mi estas tiel granda poeto, kiel Homero.

— Sed povas esti, ke Homero tute ne ekzistis, — rimarkigis Durand.

— Jes, vere, povas esti, ke Homero neniam ekzistis, sed mi ekzistas.

★

FRANCESCO DE SANCTIS (1818—1883)

itala literaturhistoriisto ne ŝatis la vanajn diskutadojn de la „kafejaj kritikistoj“. En iu tago li ricevis leteron de tri lernantoj de la Bari-liceo. La lernantoj petis, ke li skribu al ili, kial skribis Petrarca siajn sonetojn al Laŭra en la itala lingvo kaj ne en la latina lingvo. La lernantoj ankaŭ tion rakontis en la letero, ke ili faris inter si veton kaj ĉiu el la tri donis alian opinion pri la afero.

De Sanctis estis ĝuste en malbona humoro, kiam la letero alvenis. Do li respondis tute mallonge:

„Ĉar Laŭra ne sciis latine.“

MOHAMEDO I-a

estis turka sultano. Foje li riproĉis al unu kortegano, ke li havas tro molan spinon. La kortegano respondis:

— Mia sinjoro, ĝuste pro tio mi povis teni ĝis nun mian pozicion, ĉar mi havas tian karakteron. Mi havas sesdek jarojn kaj rigardu, miaj dentoj, kiuj estis malmolaj, kiel fero, ĉiuj elfalis. Sed mia lango, kiu estis mola, restis ĝis hodiaŭ kaj funkcias bone.

★

KARL HEINRICH GRAUN (1701—1759),

germana komponisto, estis direktoro de la Berlina Operdomo, fondita de la prusa reĝo Frederiko II-a. Li verkis operon kaj ankaŭ la reĝo ĉeestis en la ĉefprovo, tri tagojn antaŭ la premiero. La reĝo kun malkontenteco aŭskultis la prezentadon. Post la fino li petis la partituron kaj trastrekiis en ĝi kelkajn paĝojn. Graun trankvile rigardis la tutan aferon.

— Ĉion, kion mi trastrekiis, oni devas alimaniere komponi, — diris Frederiko al la komponisto. — Tiu partoj ne estas indaj al vi kaj ne plaĉas al mi.

— Mi tre bedaŭras, — respondis Graun, — sed oni nenion povas plu ŝanĝi, ĉar postmorgaŭ okazos la premiero kaj ne estas sufiĉa tempo por ellerni ion novan. Krom tio mi havas unu alian, gravegan kaŭzon, sed tiun mi povos diri nur tiam, kiam via moŝto estos al mi pli favora.

— Graun, — respondis la reĝo, — mi estis ĉiam favora al vi kaj ankaŭ nun mi estas tia; do mi deziras, ke vi tuj diru al mi tiun alian kaŭzon.

Graun montris al la muziknotoj kaj diris: — Majesto, en ĉi tiu regno mi estas la reĝo!

Frederiko ekridetis kaj diris:


— Vi estas prava. Ĉio restos tiel, kiel vi mem faris.

★

VOLTAIRE (1694—1778)

la franca filozofo, diris foje:

— La franca popolo estas tiu popolo, kiu plej multe grumblas, plej bone obeas kaj plej rapide forgesas.



la mondo ridas




Hotlestro: Sinjoro, belega sunumbro estas videbla. Ĉu vi ne deziras ĝin rigardi?
Gasto: Kiom kostas?
 (All for Alla)

★

Nur ĝentile!

Unua amiko: Ĉu vi permesas, ke mi faru?
Dua amiko: Jes, se vi permesas, ke mi fariĝu vomema.

★



La bona gasto.

— Kiam vi venus al ni por tagmanĝi?
 — Ni rigardu... Marde mi estos gasto, merkrede mi estos malsana; jaŭde mi denove estos gasto, vendrede mi estos malsana; do ni diru: sabate.
 (Travaso)

Vivspertoj.

Juna edzo: Mia edzino satas trinki matene kafon kaj mi teon.

Maljuna edzo: Ne malĝoju, amiko. Kun la tempo vi kutimiĝos al la kafo.

(Pathfinder)

★

La kaŭzo.

Ĉefo: Kio estas la kaŭzo, ke ĉiufoje, kiam mi envenas en vian ĉambron, vi legas ĵurnalon?

Diligenta oficisto: Viaj gumaj plandoj, sinjoro ĉefo.

★

Ĉirkaŭ la kapo.

Edzo: Tion mi diras, edzino, ke vi ne kuraĝu fariĝi al vi buban frizaĵon, ĝis mi ne donas mian konsenton al tio.

Edzino: Nu, kaj ĉu vi petis mian konsenton, kiam vi kalviĝis?

(Ullk)

★

Vojaĝistoj inter si.

— Kial vi rakontis al sinjoro Braun, ke la varoj, kiujn mi vendas, estas aĉaj?

— Kial vi rakontis al li, ke ili estas bonaj?

★



Moderna romantiko.

— Kaj ĉu vi venus kun mi eĉ ĝis la fino de la mondo, karulino?

— Kial ne, se vi havas sufiĉan monon al tio? (Judge)

★

Modela edzino.

Amikino al alia: Dum monatoj mi ne povis eltrovi, kie pasigas mia edzo la vesperojn. Hazarde hieraŭ vespere mi frue hejmeniris kaj tiam evidentiĝis, ke li restis hejme.

★

Vojaĝo en teorio.

— Ho, vi studas vojaĝlibron! Ĉu vi preparas vin al liber-tempo?

— Mi jam komencis la liber-tempon, sed mi restis hejme kaj mi faras la vojaĝon nur en la imago.

— Sed kial vi foliumas la libron returne?

— Ĉar mi estas jam en la revojaĝo.

(Faun)

En la juĝejo.

Juĝisto: Vi ne bezonas plu nei. Jen antaŭ vi staras tri atestantoj, kiuj vidis, ke vi faris la krimon.

Akuzito: Kion signifas tri atestatoj? Mi tuj povas nomi mil homojn, kiuj ne vidis ĝin.

★

Refrapo.

La malkontenta aĉetantino severe rigardas al la komerca komizo kaj malice diras:

— Kiel mi vidas, en ĉi tiu butikoj oni ne vendas ĝentilecon.

La komizo estas preta kun la respondo:

— Eventuale, se la sinjorino bonvolus montri malgrandan specimenon de ĝi.

(Southwark Recorder)



Vidpunkto de kuiristino.

— Mi akceptos lokon nur ĉe tia domo, kie ne estas radio. Tiu malbeninda maŝino ĉiutemene disblekas la prezojn de la foirejo.

(Dimanche Illustré)

★

La bona patro.

— Nun, mia filo, vi havas jam dudek-unu jarojn. Nur jam ankaŭ vi povus zorgi pri kelkaj aferoj.

— Ekzemple pri kio?

— Vi povus pagi la lastajn partojn, kiujn mi ankoraŭ ŝuldas pro via infanveturilo.

(Hummel)

★



— Ĉu vi memoras ankoraŭ pri tiu belega tempo de nia lernejoj jaroj, sinjorino, ...kiam ni ankoraŭ havis la samaragŝon?

(Le Matin)




Lingua Konferenco en Arnhem. — Dum la paska libertempo okazis en la Esperanto-Domo en Arnhem internacia konferenco, en kiu oni diskutis pri diversaj problemoj de nia lingvo. Nia bildo montras grupon de la partoprenantoj, antaŭ la Esperanto-Domo. En la unua vico staras (de maldekstre): s-ro C. Rousseau L.K. (= ano de la Lingua Komitato) el Parizo, s-ro Karl Minor L.K. el Hamburgo, s-ino Yvonne Privat, D-ro Edmond Privat L.K., redaktoro de la gazeto „Esperanto“ el Ĉenevo, f-ino Lucia Atlas el Bukureŝto, direktoro Delfi Dalmau el Barcelono, s-ro ing. J. R. G. Isbrücker Akademiano el Hago, s-ino Julia Isbrücker, Andreo Cseh kaj s-ro A. L. Moreau (Arnhem).




S-ro Mieczyslaw Sygnarski, gimnazia profesoro en Bydgoszcz (Polujo), instruisto de la Cseh-Instituto, senlaca disvastiganto de la mondlingvo, kiu nuntempe gvidas plurajn kursojn en sia lernejo kaj por la publiko de la urbo.



Kurso en Potsdam (Germanujo). — La agema instruistino de la Cseh-Instituto, f-ino Rita Thomas, instruistino en Potsdam, ĵus finis bon sukcesan kurson. F-ino Thomas lernis Esp-on antaŭ unu jaro en la kurso de Andreo Cseh kaj perfektigis sin en Krakovo en la Seminario por Cseh-metodaj instruistoj. Sur la bildo la sidanta viro estas s-ro Markau, prezidanto de la Potsdama Esperanto-Grupo, malnova pioniro de nia lingvo. Apud li sidas f-ino Thomas.



Grupo el la „FOLKLORA FESTO”, per kiu finiĝis la Lingva Konferenco en Arnhem. Nia bildo montras la finan figuron de la „glav-danco”. Per glavoj oni simbole senkapigas personon, kiu reprezentas la finigantan vintron. La feston aranĝis la famaj folkloristoj gesinjoroj VAN DER VEN (signitaj per 1 kaj 2) en Oosterbeek apud Arnhem.



Nia ŝatata internacia instruisto, la hungara D-ro Ottmar Fischer, en Norvegujo helpe de la aĝablaj gesamideanoj ellernis la ski-kuradon kaj vigle partoprenis en la vintraj sportoj. Nia supra bildo montras ski-konkurson en Hamar, en kiu D-ro Fischer (la saltanta persono) gajnis premion. — La malsupra bildo prezentas momenton de ripozo. D-ro Fischer (supre sidas), ĝino Unn Nysaeth kaj s-ro Gustav Johannessen, la gastiganto de D-ro Fischer, manĝas bananojn.



S-ro Talivaldo Indra en Riga (Latvujo), ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio kaj landa sekretario de la Cseh-Instituto por Latvujo, meritplena malnova pioniro kaj instruisto de nia lingvo.



Kurso en Rotterdam. — Nia rumana kunlaboranto advokato Pragano dum la lastaj monatoj gvidis kurson en la nederlanda urbo Rotterdam. La kurson aranĝis la tiea Popola Universitato, en kunlaboro kun la Esperantista Societo „Merkurio” en Rotterdam. Nia bildo montras la kursanaron kun la instruisto sinjoro Sigismundo Pragano (signita per X).



D-ro Won Kenn, profesoro de leĝoscienco ĉe la universitato de Kanton (Ĉinujo), fervora propagandisto de Esperanto. Post la mondmilito li faris dum kelkaj jaroj studvojaĝon en Eŭropaj landoj kaj faris prelegojn pri la filozofio de Konfucio. D-ro Won Kenn diligente instruas Esperanton en sia hejmurbo.




F-ino B. Bresler, la ŝatata sekretariino de la Esperanto-Domo en Arnhem, gvidis tre sukcesan kurson en sia hejm-urbeto Werkendam (Nederlando). Nia bildo montras la kursanaron en la kursfina festvespero. Meze, ĉe la tablo sidas f-ino Bresler kaj ŝia patrino, s-ino Bresler. Maldekstre de ili la sidanta sinjoro, tenanta grandan stelon, estas ŝia patro, D-ro Bresler, kuracisto. Ankaŭ li ellernis nian lingvon.

PANORAMO



La admirinda kreskajo „Kudrilo de Kleopatra”. Kiel burĝono ĝi kreskas dum unu tago 6 centimetrojn. La kreskajo atingas la altecon de 2 ĝis 3 metroj. Ĝi estas granda malofaĵo, ekzistas nur en kelkaj ekzempleroj.



En la franca urbo L. antaŭ kelkaj jaroj blindiĝis la bakisto H.V. La kuracistoj ne povis helpi, ĉar ili ne trovis la kaŭzon de la blindeco. Pro malespero li dufoje provis mortigi sin. Antaŭ kelka tempo li faris ekskurson kun sia familio. Kiam li dormis en la ombro de granda arbo, subite granda araneo lasis sin malsupren, eksidis precize sur lia okulo kaj pikis ĝin. Pro forta doloro la viro vekigis kaj el la pikita okulo fluis sango. Sed post unu horo li tute klare vidis.

★



Persa tapiŝ-faristo faris el silko tapiŝon, kiu estas fidela bildo de usona unu-dolara bankbileteto. La interesa tapiŝo apartenas nun al unu milionulo en Novjorko, kiu dum sia vojaĝo en Azio je alta prezo aĉetis ĝin de la lertega kaj bonŝanca perso.



Ovo kiel bilet-prezo. En la angla urbeto *Tonbridge Wells* la imposta oficejo postulis tro grandan parton el la enspezoj de la kino-teatroj. Tial la kino-posedantoj komencis vendi la enirbiletojn kontraŭ ovoj, anstataŭ mono. La infanoj pagis unu ovon, la plenkreskaj personoj de tri ĝis dek ovojn laŭ la boneco de la loko. Fine la imposta oficejo cedis kaj malaltigis la imposton.



★
Monumento por la memoro de sinjorino Harel, kiu eltrovis la fromaĝon *Camembert*.

★
18,256,000 leterojn disportas kaj 4 milionojn da ŝtupoj paŝas unu leterportisto de eŭropa grandurbo, dum 40 jaroj da servado.



Sinjorino *Bleeke* en *Wesermünde* (Germanujo) faris al si veston el tiuj haroj, kiujn ŝi dum 30 jaroj elkombis el sia hararo. La interesa vesto estas grava vidindaĵo en la urbo.

LA NOVA LITERATURO

Sur ĉi tiu paĝo ni publikigas tiujn verkaĵojn de la novaj Esperantistoj, kiujn la kursgvidantoj mem sendas al ni. Nia intenco estas doni al la komencantoj tre facilan legajon kaj kuraĝigi ilin al la uzado de nia lingvo. Ni kore gratulas al niaj talentaj novaj gesamideanoj.

MALGAJA VINTRA FABELO.

(Skribis f-ino Helena Kuronovna, 16-jara lernantino de f-ino Leonja Fruchtowna, en Czortków, Polujo.)

Estis vintro. Ĉio dormis sub blanka neĝo. La ĉielo estis malgaja, grizaj nuboj kovris ĝin. Blankegaj neĝeroj dancis en la aero.

En la ĉambro ĉe fenestro staris eta knabino. Malĝojo estis sur ŝia dolĉa kaj bela vizaĝo. La knabino rigardis la neĝon, la blankigitan arbaron, kaj ŝi mallaŭte ploris. Ŝi ne aŭdis, ke ŝia patrino malfermis la pordon kaj venis al ŝi.

La patrino metis sian manon sur la blondan kapon de ŝia filineto kaj demandis: „Kial vi ploras, kara infano, ĉu vi estas malsana?”

„Ne, ne,” — respondis rapide la knabino, — „mi ne estas malsana, sed nur tre malgaja.”

„Pro kio vi malĝojas?”

„Rigardu, patrino, ĉio mortis, nenio vivas.”

„Ne,” — respondis la patrino, — „ĝi ne mortis, sed nur dormas nun. La vintro ne estas la morto, sed nur la sonĝo de la naturo. Kaj vi ne ploru, ĉar baldaŭ revenos la printempo, la mateno de la naturo.”

„Mi scias,” — diris la knabineto, — „ke la printempo revenos, kaj mi scias, ke la mondo estos denove gaja kaj bela, sed mi scias ankaŭ tion, ke tio, kio mortis, ne revenos jam al vivo, ne vivos en la printempo.”

Multaj semajnoj pasis post tiu tago. Finiĝis jam la vintro. En la ĉambro ĉe la fenestro kuŝas en lito la orhara knabino, malsanega. Ŝiaj infanaj okuloj malgaje rigardas la ŝanĝon en la naturo. La malfeliĉa patrino sidas apud la lito kaj ne povas eldiri eĉ unu vorton. La knabineto malrapide turnas sian kapon al ŝi kaj demandas kun malgaja rideto: „Panjo, ĉu vi memoras, kion mi diris en la vintro?”

„Jes, infano mia, sed ne pensu pri ĝi.”

„Kial, patrino? Ĝi estis la pura vero. Ne ĉiu ĝojos pro la printempo. Ekzemple mi. Mi ne revidos la kantantan arbaron kaj la koloran kampon...”

La naturo ricevis belan kaj riĉan printempan veston kaj ĝi ploris per florodoroj super la tombo de eta orhara knabino, kiu kuŝis en blanka malmola kaj malvarma ĉerko... La printempo ploris, sed ŝi ne sciis pri tio.

LA TELEFONO.

(Skribis s-ro Kurt Wälterlin, kursano de A. Cseh, en Zürich, Svisujo.)

Estis vespero, miaj gepatroj ne estis hejme. Mi legis grandiozan romanon en mia ĉambro. Miaj fratinoj, la granda kaj la malgranda, faris same en siaj ĉambroj. Paco estis en la tuta domo.

Subite la telefono eksonoras. Sed mi ne lasas ĝeni min. „La aliaj iru al la krakmaŝino”, mi pensas. Miaj fratinoj pensas same. Sed la fisonorado ne volas ĉesi. Ho, tiu suferiganta bruoj! Fine mi kolere rapidas en la loĝĉambron. Tie mi renkontas miajn fratinojn, kiuj faris same. Tro malfrue! La telefono eksilentis. Tio okazis je la oka horo.

Denove mi legis. Denove la telefona bruego. Nun mi rapidegas. Miaj fratinoj same. Triumfo! Mi estas antaŭ la fratinoj! Mi kaptas la aŭdilon: „Ĉi tie Wälterlin!” ... „Malĝusta ligo!” ... Diablo prenu la telefonon! — Tio okazis je la oka horo kaj duono.

Post tio mi daŭrigis legi. Kia belega libro! Kia katenanta verkisto! Sed ve, la telefono ne konas ripozon! Ĝi denove kriegas: sen komato, kriegas, kriegas. Malbenon al tiu nervturmentilo! Sed mi ne iros. Ĝi nur kriegu, blekegu eterne, mi ne iros. Mi jetas la romanon en angulon. Mi aŭdas, ke miaj fratinoj en siaj ĉambroj faras la saman. Mi rampas en miajn kusenojn. Miaj fratinoj faras same, mi kredas. Al la telefono neniu iras. — Tio okazis je la naŭa horo.

En la alia tago la patrino demandis nin: „Kie vi estis hieraŭ vespere?” — „Hejme!” — „Ne fabelu,” — ŝi diris, — „je la naŭa horo mi telefonis hejmen. Mi atendis dum kvin minutoj sed neniu venis.”

Nun sufiĉis. Furioze mi iris. Mi volis detrui la malican instrumenton. Starante antaŭ ĝi mi satane ridetis: „Aparataĉo diru vian lastan preĝon!” Kaj jen, ĝi efektive eksonas! Kaj mi laŭ la kutimo mi prenas la aŭdilon kaj prezentas min: „Wälterlin!” — „Ah Kurt, ĉu vi estas?” mi aŭdas dolĉan voĉon, „mi venos hodiaŭ vespere...”

Tiam ni repaciĝis. La telefono kaj mi.

LA TRI GIGANTOJ.

(Norvega popolarokonto. Tradukis f-ino Marte Löken, kursantino de D-ro O. Fischer.)

En la montaro loĝas tri fratoj. Ili estas grandaj, altaj gigantoj. Ili silentas kaj pensas. La unua frato levas la kapon, askultas kaj diras:

— Mi aŭdas la bovon bleki.

Pasas cent jaroj. La fratoj sidas kaj silentas. Post cent jaroj la dua frato diras:

— Mi kredas, ke ĝi estis ne la bovo, sed la bovino.

Denove pasas cent jaroj. La tria frato diras:

— Silentu, aŭ mi foriros kaj plu ne revenos.

LA SILENTO DE LA NOKTO.

(Skribis f-ino Maja Persson en Lund, Svedujo, kursantino de s-ro Olle Olsson.)

Estas nokto. La steloj brilas. Mi ne povas dormi. Mi staras ĉe la malfermita fenestro kaj revas. Mi revas pri la amiko, al kiu mia koro apartenas. Kaj mi promesas esti tre bona, se mi nur estos sana. Antaŭ la fenestro staras tre altaj arboj, ili silentas, ili dormas, ankaŭ la floroj kaj la bestoj dormas. Estas silento, la silento de la nokto.

Ne, unu besto ne dormas. Mi aŭdas ĝian krimon. Sed kion signifas ĝi? Jes, la krio signifas, ke unu homo fermas siajn okulojn, li mortas, li estas feliĉa. Sed mi estas malfeliĉa. Mi petas: Birdo, ne krii pri mi ankoraŭ, ĉar mi volas vivi, vivi, mi estas juna.

Ĉu vi jam legis la interesan romanon:

AKBAR

de P. A. S. van Limburg Brouwer, el la nederlanda originalo tradukitan de

J. C. kaj J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans?

— Prezo aŭfrankite 1,80 ned. guld. —

Mendu ĝin ĉe:

J. R. G. Isbrücker, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando

Postĝirokonto 10866

aŭ ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

Fino Chr. M. en E. — Vi demandas: Kial i uzas en Esperanto la vorton „alfabeto“, kiam ni povas formi la tute bonajn Esp-ajn vortojn „aboco“ aŭ „literaro“? Ni respondas: ĉar ĝi estas internacia vorto kaj, kiel vi sendube bone scias, la internaciaj lingvoj estas uzablaj en Esperanto. Tamen via demando, kiu kaŝiĝas sub via demando, estas prava kaj simpatia kaj ni tute ne malkonsilas, ke vi ne uzadu la vorton „alfabeto“. Niaj samideanoj en Azio, kiuj ne konas la eŭropajn lingvojn, ofte postulas, ke ili ne uzu tiajn internaciajn vortojn, sed preferu formi la vortojn el la fundamentaj elementoj de nia lingvo, ĉar la vorto „internacia“ signifas nur „eŭropa“ aŭ „okcidentkultura“ kaj la eŭropaj „internaciaj“ vortoj tute ne ekzistas en la aziaj lingvoj.

Sas-Opla en O. (Francujo). — La okulvitro ne kaŝas ĝi de la nazo, sed sidu sur la nazo. Se vi ne trovas ĉi tiujn esprimojn taŭgaj, preferu tute aliajn, uzante alian frazkonstruon. Ni povas konsili al vi taŭgan frazon nur, se ni havus la signifon.

J-ro P. N. en M. (Germ.). — 1) „Nokti“ en la senco de „pasigi la nokton“ ne estas sufiĉe preciza. Pli bone estas uzi „tranokti“. — 2) „Kutimitaj“ ne estas korekta. Oni devas diri „kutimiĝintaj“. — 3) Ĉar la rigardado okazis samtempe kun la starado, oni devas diri: „mi staris... rigardante... postrigardante“. — 4) „Li sentis, kiel la ruĝo de l' hontemo venis en lian vizaĝon“ estas bona frazo. Oni devas atenti, kio estas la subjekto de „veni“, kaj ne de la verbo en la ĉefphrazo. Se oni skribus „sian“, tio signifus la vizaĝon de la ruĝo, kaj tio ja estas absurda. — 5) Estas pli bone ne fari kunmetitan vorton el adverbo kaj adjektivo, do oni skribu en du vortoj „mire bela“. — 6) La frazon „La vesto bone sidas sur vi“ vi povas uzi, ĉar ĝi estas sufiĉe komprenebla. Sed anstataŭ „la ĉapelo ne staras al vi“ bonvolu diri: „la ĉapelo ne konvenas por vi“. — 7) „Ektimi“ sur la 62-a paĝo de Hamleto estas bona, ĉar tie ĝi signifas: komenci timi. — 8) „Ekskuis ilin ĉiuj“ kredeble estas preseraro. Devas esti: „ĉiujn“. — 9) La formo „estas savitaj“ estas bona, ĉar en la momento de la alveno la savado jam estis okazinta. — 10) Ni ne rekomendas la troan uzadon de novaj radikoj, precipe ne, kiam bonaj Esp-aj formoj ekzistas. Ekz-e: ŝtormo = ventego, sledo = glitveturilo, k.t.p. — 11) Oni uzas la adverbajn formojn en la predikato, kiam la subjekto estas adverbo, infinitivo aŭ tuta frazo. Do: estus estinte necesego. — 12) La kunmetita vorto „sinregado“ estas unu ideo kaj oni povas tre bone uzi ĝin post „mi“. Oni diras ja ankaŭ: „mi estas singarda“.

„Esperplena abonanto“ en E. — Via espero plenumiĝos en la venonta jaro.

S-ro P. K. en V. — 1) La „Esperantista Literatura Asocio“ laŭŝajne ne funkcias plu. Ĝi havis tri ĉefajn taskojn: a) kolekti informojn pri la tradukado de libroj kaj per tio malhelpi, ke pluraj personoj traduku la saman libron; b) korekti la manuskriptojn; c) rekomendi bonstilaĵojn librojn. Se vi volas ricevi certajn informojn, bonvolu turni vin al la lasta prezidantino de E.L.A.: f-ino J. Zschepank, Paul Gerhardt-Strasse 22, Dresden-A 19, Germanujo. — 2) Pri la „Societo de Amikoj de Esperanto“ oni nenion trovas en la Esp-aj adresaroj. Tio signifas, ke ĝi malaperis.

S-ro R. M. en Berlin. — „La suno brilas“ kaj „La suno lumas“, ambaŭ frazoj estas tute bonaj. — La propaganda frazo sur via leterpapiro estas tre bona.

K. L. en A. (Nederl.). — Vi sendis al ni la frazon: „La oficiro ordonis al la soldato trinkiĝi lian ĉevalon“ kun la demando: ĉu en ĉi tiu frazo la vorto „lian“ estas bona, aŭ devas esti „sian“? Bedaŭrinde ni ne povas doni al vi rektan respondon, ĉar ni ne konas la kompatindan solifontan ĉevalon kaj ne scias, al kiu ĝi apartenas. Se ĝi apartenas al la oficiro, vi devas uzi la vorton „lian“. Sed se ĝi apartenas al la soldato, vi devas diri „sian“. La afero estos tuj klara, se ni iom ŝanĝas la formon de la frazo kaj diras: La oficiro ordonis al la soldato, ke li trinkiĝu sian (aŭ: lian) ĉevalon.

ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

„En la ĉefurbo mi havas familion.“ — La parolanto erare uzas ĉi tie la vorton „familio“, ĉar li pensas pri „parencio“. En Esp-o la vorto „familio“ signifas: grupo konsistanta el la gepatroj kaj infanoj, aŭ la tuta parencaro kune. Do la vorto „familio“ neniam signifas nur unu personon. Tial, se ni parolas pri unu persono, ni devas diri „parencio“ aŭ „familiano“.

Tielmaniere. — Tre malbona vorto. Oni devas diri: tiamaniere (= en tia maniero) aŭ tiamaniere (= en tiu maniero), aŭ simple nur tiel. La vorto tiel signifas: en tiu maniero.

Mi ne havas sufiĉe da. Mi manĝis tiom da. — Terure malbonaj frazoj. La vorto da estas prepozicio kaj tial ĝi devas stari ĉiam antaŭ substantivo. La korektaj frazoj estas: Mi ne havas sufiĉe kaj mi manĝis tiom.

INFORMOJ

Ŝtata instruisto de Esperanto en Ameriko. — El Kalifornio ni ricevas la ĝojigan sciigon, ke s-ro P. P. Christensen, nia fervora propagandisto kaj mondvojaĝinto, kiun ni konas el la kursoj de Krakovo kaj Arnhem, ricevis oficon kiel ŝtate pagata instruisto de Esperanto ĉe la Politeknika Altlernejo en Los Angeles kaj ĉe la „Junior College“ en Pasadena.

Esperanto oficiala lingvo de trafiko. — Dank' al la klopodoj de s-ro Cresp, delegito de UEA, la franca urbo Cannes uzas Esperanton en publikaj surskriboj por reguligi la trafikon. Bildon de tia surskribo ni jam publikigis en la Marta numero de LA PRAKTIKO.

Strato kun nomo „Esperanto“. — La urbestro de Aracaju, ĉefurbo de la ŝtato Sergipe en Brazilo, decidis doni al unu strato la nomon: „Esperanto“.

LA VILA MANO

Originala Romano
de
H. J. BULTHUIS
— Lingva Komitatano —

pli ol
300 paĝoj

Kun belaj plum-desegnoj de la nederlanda artisto TJEERD BOTTEMA.

Kostas nur
Guld. 2.75 broŝurita
„ 3.25 bele bindita

— Valora donaco —

Postĝiro 39039

N.V. Joh. Ykema's U.M.
's-Gravenhage
- Nederlando -

Mendeblaj ĉe la:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto

Oostduinlaan 32, DEN HAAG (Nederlando)

Postĉekkonto: Den Haag 162626

LA KURSO DE ANDREO CSEH. La stenografita kaj poste mimeografita teksto de unu tuta kurso de Andreo Cseh farita en Stokholmo en 1928. La kurso kaj enkonduko kun klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruantoj, krom tio aldonaj, entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo, afrankite 7.75 G.

KONVERSACIA VORTARO, ŝercaj difinoj de la vortoj uzataj en la kursoj -25 „

KONVERSACIA LITERATURO, 8 numeroj, unu n-o . . . -10 „

KARTONA UJO por la Konversacia Literaturo . . . -10 „

KONVERSACIA GAZETO. Unusola n-ro kun plena informaro pri Esp-o, por enkonduki la novajn Esp-istojn en la movadon -20 „

KANTO AL LA ESP-DOMO. Verkita de C. Roskes-Dirksen. Muziknotoj kun teksto -15 G.

POSTKARTOJ KUN LA BILDO DE LA ESP-DOMO sur la adresflanko. Tre taŭgaj por skribmaŝino, 50 pecoj -75 „

BILDKARTOJ pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem, 10 belegaj il. postkartoj kun Esp-teksto, pri la ekstero kaj interno de la Esp.-Domo kaj pri la urbo Arnhem, la 10 kartoj kune afrankite -50 „

BILDKARTOJ, postkartoj kun portretoj de D-ro Zamenhof, Andreo Ĉe kaj de Ĉe-metodaj instruistoj, ĝis nun 10 diversaj kartoj. Unu peco -10 „

GVIDLIBRO pri Arnhem, 32 paĝa libretto ilustrita . . . -15 „

PLANO DE ARNHEM, kolorpresita plano de la urbo, la loko de la Esp-Domo aparte markita sur ĝi . . . -40 „

VERZAMELDE EXAMENOPGAVEN -45 „

VERTAALDE EXAMENOPGAVEN -50 „

La prezoj entenas la afrankon!

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

GENERALAJ REGULOJ:

1. En la konkursoj rajtas partopreni ĉiu, ankaŭ ne-abonantoj.
2. Ĉiun solvon oni devas sendi sur aparta papero aŭ poŝtkarto.
3. Ĉe ĉiu solvo oni devas alglui la koncernan konkurs-kuponon.
4. Al la solvo oni devas aldoni sur la sama papero la precizan nomon kaj adreson de la solvinto, per tre klara skribo.
5. Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu siajn solvojn kune en unu koverto, por ŝpari poŝtkostojn. Adreso: LA PRAKTIKO, Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando.
6. La nomoj de tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantaj, sendotaj aŭ frankite al la gajnintoj.

20-a konkurso.

ENIGMO

12,3,18,4,5 — 14,3 — 20,5,8,5,11 — 10,2,13 —
 1,15,1,12,9,3,4,1,7 — 4,3 — 1,6 — 9,2,13 — 1,16 —
 1,6,2,1 — 18,3,4,9,5 — 1,16 — 3,10,6,3,22,2,5 —
 7,3,14 — 1,6 — 19,2,13,11 — 7,2,1,11 — 20,5,4,3,
 7,9,1,11 — 23,2,6,5,11 — 8,2 — 10,6,2,4,1,7 —
 8,2,4 — 1,4,9,1,16 — 17,2 — 10,1,11 — 8,2 —
 3,7,9,1,7 — 23,3,6,2,19,1 — 10,3 — 6,1 — 7,5,12,9,5
 — 15,3,12,8,3,7,2,7 — 1,6 — 8,2 — 17,2,4 —
 17,2,14,2 — 10,1,11 — 7,15,2,12,2 — 1,6,8,3,4,1,16
 — 14,13,8 — 10,3,6,10,1 — 9,3,8,15,5 — 17,2,1,4 —
 6,2,21,3,12,1,4 — 14,3 — 4,3,4,2,13 — 8,5,4,5,15,5,
 6,2,18,2,9,1,4 — 1,3,12,5,4.

Anstataŭ la nombroj metu literojn. La sama nombro signas ĉiam la saman literon. Vi ricevos frazon el la parolado de D-ro Zamenhof en la 6-a Universala Kongreso de Esperanto en Vaŝingtono.

Ŝlosil-vortoj:

- 19, 3, 12, 2, 22, 5 = ruĝa frukteto
 12, 3, 14, 1, 10, 9, 2 = fari gazeton
 11, 13, 17, 3, 6, 5 = multekosta objekto
 20, 3, 4, 12, 2, 10, 5 = vira nomo
 21, 13, 23, 5 = malbeleaga besteto
 8, 5, 12, 18, 1, 16 = post unu tago
 15, 1, 7, 3, 12, 5 = bruna birdeto

Inter tiuj personoj, kiuj sendas al ni la ĝustan solvon, ni dislotos 10 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Julio. Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn. Algluu la kuponon.

21-a konkurso.

DELIKATA SITUACIO.

Sinjoro profesoro Karlson estas en eleganta balo. Li havas sur si frakon. Kiam li iras al la malvarma bufedo, en momento unu nekonata elegantega sinjorino haltigas lin kaj diras: „Sinjoro kelnero, alportu, mi petas, rapide porcion da glaciaĵo. Dume mi atendos ĉi tie.”


La tasko estas: Bonvolu skribi al ni, kion faru la kompatinda profesoro en ĉi tiu malfacila situacio? Ni supozas, ke niaj legantoj havas la necesan diplomatan senton por kontentige solvi ĉi tiun problemon. El la solvo ni ĉiuj lernos, ĉar ni ĉiuj povas fali en similan situacion.

Per 10 premioj ni rekompencos tiujn personojn, kiuj sendas al ni la plej inteligentajn kaj spritajn solvojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Julio. Bonvolu atenti la regulojn.

22-a konkurso.

La bestoj deziras, ke vi sciuj iliajn nomojn en la lingvo Esperanto. Ĉi tie estas 139 literoj. Enmetu ilin en la figuron. Se vi metas ilin en la ĝustajn lokojn, vi ricevos la nomojn de 22 bestoj. Rigardu, rigardu:

a a a a a a a a a a a b c c d d d d e e
 e e e e e e f g g h h i i i i i i i i i
 i i k k k k k k k k k k k l l l l l m
 m n n n n n n n n n n n n n n o o o o o o
 o
 o o p p p p p r r r r r r r r r r r r r r s
 s t t t t t t t t u u u u u u u u u v v z



- = fidela besto
- = „inteligenta” besto
- = besto kun kiraso
- = migra birdeto
- = malpura besto
- = imitema besto
- = utilega insekto
- = besto kun pikiloj
- = granda rabobirdo
- = kampa birdo
- = marbesteto kun domo
- = belflugila insekto
- = insekto en la vesto
- = pikema insekto
- = tre eta krokodilo
- = granda akva birdo
- = flava birdeto
- = diligenta insekto
- = homforma besto
- = besto kun tondiloj
- = belfela besteto
- = nigra birdo

La mezaj literoj, de supre legate, donas gravan frazon, kiun la bestoj diras al vi.

Inter la solvintoj ni dislotos 15 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Julio. Sufiĉas sendi al ni la frazon, kiun donas la mezaj literoj. Ne forgesu alglui la konkurs-kuponon.

Kupono
por la
10-a

Kupono
por la
20-a
konkurso

Kupono
por la
21-a
konkurso

Kupono
por la
22-a
konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.

Al niaj legantoj!

Kun feliĉa sento ni povas konstati, ke LA PRAKTIKO ĝuas la plenan ŝaton de la legantaro. Ni dankas pro la granda amaso da gratul-leteroj kaj abonoj, kiujn la poŝto ĉiutage alportas.

Apartan dankon ni diras al la fervoraj abon-kolektantoj. Nun ni ne publikigas ilian liston, ĉar ni ja anoncis specialan konkurson por la abon-kolektado. Ĉi-sube ni represas la informojn pri la konkurso, por ke ankaŭ tiuj legantoj povu partopreni en ĝi, kiuj nur de Aprilo ricevas la gazeton.

El la numeroj de Januaro, Februaro kaj Marto ni havas ankoraŭ kvantojn, do oni povas aboni ankaŭ kun Januara komenco. Ni tre rekomendas tion, por posedi la gramatikajn lecionojn, kiuj iom post iom formas tutan kurson.

LA PRAKTIKO.

(Represo el la Februara numero. La konkurs-kupono estas trovebla en ĉi tiu numero sur la paĝo de la konkursoj.)

10-a konkurso

Kiom da abonoj vi kolektis por LA PRAKTIKO?

Al tiuj personoj, kiuj kolektas por LA PRAKTIKO almenaŭ 10 pagitajn abonojn, ni disdonos premiojn (librojn kaj diversajn objektojn) en diversaj valoroj. Ĉiu partoprenanto de ĉi tiu konkurso ricevos premion. Inter la premioj estos 50 ĉef-premioj altvaloraj. Ju pli multe da abonoj iu kolektis, des pli valoran premion ricevos.

Reguloj: 1. Kiu volas partopreni ĉi tiu konkurso, bonvolu ĝis la 1-a de Junio 1932 sendi al la redakcio la liston de tiuj abonantoj, kiujn li volas kaj kiel abonmonon li mem sendis al ni. Algluu la konkurs-kuponon.

2. Sur la listo bonvolu aldoni ankaŭ la datojn, kiam vi sendis la abonojn, por faciligi al ni la kontrolon.

3. Do vi povas sendi al ni la kolektitajn abonojn aparte, tuj post la ricevo, ne atendente ĝis la 1-a de Junio.

4. En la konkurso estos konsiderataj nur la pagitaj abonoj, ne la senpagaj abonoj donitaj al la kolektintoj de sep abonoj.

5. La partopreno en ĉi tiu konkurso ne tuŝas la rajton de la kolektanto ricevi post ĉiu sepa pagita abono unu senpagan abonon. Do la kolektanto ricevos la senpagajn abonojn kaj la konkursan premion.

Ĉi tie detranĉu!

Mendilo de koresponda anonceto

Unufoja enskribo kostas -45 ned. guld. (= 3 poŝtajn respond-kuponojn). La abonantoj de LA PRAKTIKO povas unufoje en la jaro senpage anonci.

Bonvolu skribi tre klare, se eble, per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Nomo:

Profesio:

Aĝo (laŭvole, sed konsilinde):

Adreso:

Desiras korespondi per leteroj poŝtkartoj kun la landoj: il. p-kartoj

..... pri la temoj

Specialaj desiroj:

Mi promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu, kiu al mi skribas

La monon mi sendas samtempe per

Dato

(subskribo)

ABONILO

Ĉiu persono, kiu kolektas 7 abonojn, ricevas LA PRAKTIKON senpage!

Bonvolu sendi la kolektitajn abonojn sur ĉi tiu papero. Skribu tre klare, se eble, per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Abonprezo: }
Maniero de } turnu kaj legu: 
pago: }

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

S-ro:	1
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	2
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	3
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	4
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	5
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	6
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	7
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:
S-ro:	SENPAGE
S-ino:	
F-ino:	
Adreso:	Abonkomenco:

La sumon de mi sendas samtempe per

Dato:

(subskribo)

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

Ĉi tie detranĉu!

Abonprezo de LA PRAKTIKO: por unu jaro 1 dolaro (= 2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro.

(La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Jul. kaj Okt.).

La abonon kaj monon sendu al:
Internacia Cseh-Instituto de Esperanto,
Oostduinlaan 32, Den Haag (Nederlando).

Vi povas sendi la monon en diversaj manieroj:

- 1) Transpagu la monon per poŝtĉeko al nia poŝtĉekkonto: Den Haag 162626. Sur la kupono aldonu, ke ĝi estas por la abono.
 - 2) Aĉetu en banko amerikan dolaran papermonon kaj sendu ĝin al ni en rekomendita (registrita) letero.
 - 3) Sendu la monon per poŝtmandato. Sur la kupono de la mandato ne forgesu aldoni, ke vi sendas la monon por abono.
 - 4) Per banka ĉeko.
 - 5) Per UEA-kuponoj, kies valoron ni kalkulas: 1.— svisa franko = —.50 ned. guld.
 - 6) Per poŝtaj respondkuponoj. Unu poŝtan respondkuponojn ni akceptas en valoro de —.15 ned. guld. Por unu jarabono ni akceptas 16 kuponojn.
 - 7) Krom la supraj ses manieroj ni nomas por kelkaj landoj pluan, specialan manieron:
- AŬSTRIO. — Vi povas sendi al ni en letero 7.— ŝilingojn en aŭstria papermono.
- BRITUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5 ŝilingojn en brita papermono aŭ en britaj poŝtmarkoj.
- ĈEĤOSLOVAKUJO. — Vi povas aboni per poŝtĉeko, enpagante 33.— ĉ. kronojn al poŝtĉekkonto n-ro 32573 de *Městská spořitelna (Wanitzek)*, Bratislava.
- DANUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— kronojn en dana papermono.
- ESTONIO. — Vi povas aboni ĉe s-ro *Joh. Jaanisto*, Kastani 125-1, Tartu, kaj pagi al li 3.50 est. kronojn.
- FRANCUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 25.— frankojn en francaj monbiletoj.
- GERMANUJO. — Vi povas sendi al ni per poŝtĉeko, per bankĉeko, per poŝtmandato aŭ per germana papermono en letero la sumon de 4.— germ. markoj.
- HISpanUJO. — Vi povas sendi al ni per poŝtmandato aŭ per hispana papermono en letero 10.— pesetojn.
- HUNGARUJO. — Vi povas aboni ĉe s-ro *Paŭlo Tolnai*, Amerikaj-ut 36., *Budapest VII*, pagante al li 5.— pengojn. Poŝtĉekkonto: 45.327.
- ITALUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 20 lirojn en itala papermono.
- LATVUJO. — Vi povas aboni ĉe s-ro *Talivaldo Indra*, Pasta kaste 475, Riga, kaj pagi al li 4.50 latojn. Poŝtĉekkonto: Riga 7.
- NORVEGUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— kronojn en norvega papermono.
- POLUJO. — Vi povas sendi al ni per poŝtmandato aŭ rekomendita letero per polaj papermonoj 8.— zlotojn.
- ROMANUJO. — Vi povas aboni ĉe *f-ino Eugenia Morariu*, strada Bravilor 15., Cluj, pagante al ŝi 150.— leojn.
- SVEDUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— kronojn en sveda papermono.
- SVISUJO. — Vi povas sendi al ni en letero 5.— frankojn en svisa papermono, aŭ en svisaj poŝtmarkoj.

GRAVA ATENTIGO: Bonvolu sendi ĉiam samtempe la mendon kaj la monon, por eviti erarojn en la enskribo de la abonoj.

Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu kune la abonon, por ŝpari poŝtan afrankon.

Kune kun la abono oni povas sendi ankaŭ mendon por la eldonaĵoj de la Int. Cseh-Instituto, anoncataj en LA PRAKTIKO.

Se vi devas sendi en letero papermonon pli valoran, ol la pagota abonsumo, por la diferenco ni volonte sendos al vi eldonaĵojn anoncatajn en LA PRAKTIKO, laŭ via elekto.

Ideala lingva ekzercilo:

La enigmoj

Unu broŝuro plena de enigmoj por lerni novajn vortojn.

1000 premioj al la solvintoj

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Opinio pri la broŝuro: „Mi gratulas al vil La enigmoj estas altgrade geniaj!” (S-ro J. T. en K., Polujo).

Prezo: —.15 ned. guld. (= unu respondkupono).

Aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

La enigmojn solvis:

Per dikaj literoj ni presas la nomojn de tiuj, kiuj gajnis premion.

(Daŭrigo) 121. Fehr, Köln-Bickendorf. — Fuchs, Köln-Ehrenfeld. — Gödde, Ahlen. — Kooy, Nijmegen. — Nysaeth, Hamar. — Schneider, Köln-Bickendorf. — Skarphedinnsson, Reykjavik. — Steinmetz Hansen, Holbæk. — Bloemendal, Deventer. — 130. Jensen, Holbæk. — Männel, Reichenbach. — Carlsten, Stockholm. — Westra, Oosterbeek. — Hinkel, Reichenbach. — Verlee, Gorinchem. — Brandenburg, Leeuwarden. — Frode, Vimmerby. — Stemmer, St. Gallen. — Larsen, Hamar. — 140. Ligthart, Leeuwarden.


GRANDA LOTERIO

por la instalado de la Esperanto-Domo de Arnhem

Aprobata per dekreto de la Nederlanda Ministro por Justeco,
2 Sekc. A. N-o 1069, de la 2-a de Aprilo 1931.

ĈEFPREMIOJ:

1. AUTOMOBILLO
NASH, 6-cilindra
5-persona, plej
nova modelo.



2. Moderna manĝo-ĉambra meblaro el fabr. „Pander”, Hago.
3. Portebla skribmaŝino „Royal”, plej nova modelo.
4. Gramofono de „Sprenger”, Hago.
5. Persa tapiŝo „Schira” de firmo Kulcsár, Hago.
6. Luksa salona starlampo el fabr. D. D. Coelingh, Hago.
7. Portebla skribmaŝino „Corona”, plej nova modelo.
8. Polvsuĉilo „Protos” kun kompleta garnituro.
9. Foto-aparato Zeiss-Ikon Cocarette 6 X 9.
10. Laŭtparolilo de Bell Telephone Mfg. Co.

Entute 1000 premioj, ĉiuj valoraj praktikaj objektoj (pli ol 1000 elektraj mastrumaj aparatoj, plue bicikloj, vojaĝkofroj k.t.p.) — La tirado okazos publike dum la somero de 1932 en Arnhem pere de Notario Ch. J. Engelberts, Arnhem. — La rezultato de la tirado (listo de la gajnintaj numeroj kaj de la premioj) estos publikigata per speciala bulteno, ricevebla ĉe la Esperanto-Domo en Arnhem. — La gajnintoj povas transpreni la premiojn dum unu jaro post la tirado. Post tiu templatempo la premioj apartenos al la loteria fondo.

PREZO DE UNU LOTBILETO: 1.— ned. guld.

Adreso por mendoj kaj pagoj:

F-ino J. E. RIKKERS, Anton de Haenstraat 122,
DEN HAAG, (Nederlando). — Poŝtĉekkonto: Den Haag 96085.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = desinas	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

AŬSTRIO

Linz a/D. — S-ro Ludwig Krenmayr, 24-jara, studento ĉe la Viena universitato, Untere Donaulände 68. — L, PK, PI, kun Norvegujo, Svedujo, Rusio.

ĈEĤOSLOVAKUJO.

Praha-II. — F-ino Julie Šupichová, pens. faka instruistino, 48-jara, Malá Štěpánská 6/II. — Dez. interŝ. lernolibrojn pri esperanto kaj esp-an literaturo (kun siaj verkoj), interŝ. esp-ajn gazetojn.

ESTONIO.

Tartu. — F-ino Leili Tomberg, instruistino. — L, PI k.ĉ.l., precipe pri la loka vivo, kulturo.

FRANCUJO.

Orléans. — S-ro G. Papaud, poŝtoficisto, Chèques Postaux. — L, PI, precipe kun poŝt. oficistoj.

GERMANUJO.

Berlin-Friedrichshagen. — S-ro Herbert Göhlsdorf, 30-jara fraŭlo, Steinmetzstr. 44. — L, k.ĉ.l., pri la temo: la vivo kaj ĝia valoro.

Düsseldorf. — S-ro Hermann Patzke, 40-jara vitro-faceto, Dürerstr. 1.

Berlin-Mitte. — Membroj de la Esperanto-Grupo, 20—47 jaraĝaj, divers-profesiaj, dez. kor. per L kaj PI (bfl.) k.ĉ.l. pri diversaj temoj, precipe pri pacifismo, vegetarismo, socialismo k.s.

Berlin. — S-ro Arthur Kirchhübel, Del. de UEA, Hohe Str. 8.

ISLANDO.

Reykjavik. — S-ro Gudmundur H. Pjetursson, presisto, Gutenberg.

Reykjavik. — S-ro Eyjólfur Thordarson, telefonisto, Grettisgata 66.

Reykjavik. — S-ro Kristbjörn Bjarnason, maristo, Skaffafell, Seltjarnarnes.

Reykjavik. — S-ro Kjartan Jónsson, librotenisto, Bjarkargata 10.

Reykjavik. — S-ro Stigfús Jónsson, carpentisto, Box 996.

LATVUJO.

Riga. — S-ro Arturo Kaufmann, 20-jara maŝinisto, Vec-aku iela 2. — L, PK, PI, k.ĉ.l.

LITOVUJO.

Raseiniai. — S-ro B. Giedra, 34-jara oficisto. — L, PI, kun Nov-Zelando, Azio, Afriko, Ameriko, Aŭstralio, pri asocia vivo, moroj, komerco, esperantismo, k.t.p.

NEDERLANDO.

Amersfoort. — S-ro J. de Way, kavaleria serĝento, Ruitersstraat 19. — Dez. kor. k.ĉ.l., interŝ. PM.

Dordrecht. — S-ro A. de Visser, 20-jara instruista kandidato, Reeweg 30. — L kun Anglujo kaj Germanujo, p.ĉ.t.

Eersel (N.B.). — S-ro L. J. Stravens, instruisto. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Mi promesas respondi unufoje al ĉiu.

Enschede. — S-ro H. H. Brandsma, muzikisto, 28-jara fraŭlo, Gronausche weg L. 59. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

's-Hertogenbosch. — S-ro W. A. Hoevenaars, 20-jara, Willem van Nassaulaan 42. — PI k.ĉ.l. Kolektas PM.

Oranjestad. — S-ro T. Halma, 46-jara lernejestro. — L, PI, k.ĉ.l., pri instruado kaj edukado de 10-14-jaraj gelemantoj. Dez. ricevi PI por geografia instruado.

Rotterdam-West. — S-ro P. M. den Toonder, 30-jara pordisto, Haringpakkersstraat 69. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Utrecht. — S-ro Chr. v. d. Kuip, libropresisto, Krugerstraat 19.bis. — PK, PI, k.ĉ.l.

NORVEGUJO.

Fjellbo pr. Sandefjord. — S-ro Alf Hasle, 18-jara laboristo. — L, kun Italujo, Usono, Kanado, Kun fraŭlinoj.

[POLUJO.

Czortków. — S-ro Vlodimiro Dymidas, 13-jara lernanto, ĉe ges-ro J. Drazniowski, ul. Browarna. — L, PI, kun tuta Eŭropo.

Czortków. — S-ro Borys Kowal, 12-jara lernanto, ul. Browarna. — L, PI, kun knaboj de la tuta mondo.

SVEDUJO

Lund. — Lunda Esperanto-Klubo. — L, PI, k.ĉ.l.

Öxnered. — S-ro Erik O. N. Lundgren, 30-jara fervojisto. — P.ĉ.t.

Sandviken. — S-ro John Ling, Box 2617. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., por progresantoj en kurso.

Vallåkra. — S-ro Harry Håkansson, „La Kafejo“. — Dez. koresp.

Vallåkra. — S-ro Hartvig Johansson, 26-jara razisto. — PI kun Rusujo, pri la razista fako.

SVISLANDO.

Olten-Trimbach. — S-ro H. Finkel, 20-jara frizisto, Baslerstrasse 140. — L, PI, k.ĉ.l., nur kun frizistinoj.

USONO.

Buffalo, N.Y. — S-ro Fred Weiss, urba estingisto de fajroj, 568 Stockbridge Ave. — Dez. koresp. per PK.

East Orange, N.J. — S-ro Lawrence A. Ware, 30-jara elektra inĝeniero, 61 N. Arlington Ave. — L, PK, PI, kun Egipto, Ĉinujo kaj Eŭropaj landoj, pri kompara filologio, astronomio, elektro, teozofio, arkeologio k.t.p. Dez. kolekti informojn pri la frua historio de malnovaj landoj.

SES KANTOJ:

Se en arbar'...

Printempo

Silento

Vi kiel flor'...

Ĝojo

Feliĉo

Fortepiana akompano de DINA APELDOORN.

Ĉiuj tekstoj en la esperanta, nederlanda, germana lingvoj, de Cath. Roskes-Dirksen, ĉe kiu la muzikaĵo estas havebla.

Prezo: 1.50 guld.

— Poŝtĉekkonto 52008.

Anemoonstraat 96, DEN HAAG, Nederlando.



La ŝatataj

FLAGINSIGNOJ

speciale taŭgaj por vojaĝo kaj kongreso, por montri la naciecon de la portanto.



Eleganta formo,
bela emajlo.

Haveblaj por ĉiu nacio, kun pinglo, broĉo aŭ butono.

Prezo: .60 ned. guld. (kvar respondkuponoj) afrankite.

Int. Cseh-Instituto de Esp.
Hago.



PENTEKOSTA LIBERTEMPO

en la ESPERANTO-DOMO en ARNHEM.

*Pasigu viajn liberajn tagojn
en agrabla samideana rondo!*

Speciala programo ne estos. - Oni ripozos,
promenos, babilos, ridos kaj - praktikos
Esperanton en amika, familia kunesto.

Bonvolu anonci vian partoprenon rekte al la Esperanto-Domo.



La ESPERANTO-DOMO, en la mezo, de belega vasta parko, estas malfermita dum la tuta jaro. En la domo estas kursejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro fluenta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5-10 personoj en unu ĉambro): 2.- ned. guld., (2-4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. Lunĉo: -75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro. Servmono 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26060



La manĝejo en la Esperanto-Domo

INVITO

La Internacia Cseh-Instituto de Esperanto
kore invitas siajn kunlaborantojn kaj tiujn, kiuj deziras aktive partopreni en
la efektivigo de la loteria projekto, al

TE-KUNVENO

sabate, la 14-an de Majo posttagmeze je la 4-a horo en la Esperanto-Domo en Arnhem.

La direkto de la Instituto donos informojn pri la faritaj kaj farotaj laboroj de la Instituto kaj speciale pri la stato de la loteria. Oni preparos projekton pri vasta propagando (disportado de lotoj kaj reklamiloj, vendado kun rabato k.t.p.) antaŭ la tirado, kiu okazos en la nuna somero.

Partoprenantoj bonvolu sendi sian nomon al la Esperanto-Domo, antaŭ la 13-a de Majo. - Partoprenantoj el aliaj urboj, kiuj intencas pasigi la nokton en la Esperanto-Domo, bonvolu frue rezervigi por si la liton.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
5-a numero



Majo
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POSTĈEKKONTO
162626

La 18-a de Majo

ne estas ordinara tago. Ĝi estas dediĉata al la Paco kaj Bonvolo. En la tuta mondo en la lernejoj kaj en kunvenoj oni parolas en tiu tago pri la mondpaco.

Oni parolas.....

Sed ni demandas: ĉu estas sufiĉe, se oni nur parolas?

Ne! Estas necese ankaŭ *agi!*

La belajn parolojn oni aŭdas kaj aplaŭdas, kaj baldaŭ..... forgesas. Sed la agoj efikas, ili malrapide transformas la mondon.

Ni, Esperantistoj, povas esti feliĉaj kaj fieraj, ĉar ni faras la agojn por la paco.

D-ro Zamenhof verkis Esperanton ne kun la intenco helpi al la internacia komerco kaj trafiko, sed por efektiviĝi la mondpacon. Kaj la Esperantistaro de la tuta mondo laboris ĉiam en la spirito de tiu intenco. Kompreneble ni ĝojas, ke Esperanto estas utila ankaŭ sur la praktika kampo kaj ni laboras ankaŭ en tiu direkto. Tamen la gvidanta ideo restas: ke la popoloj interparaciĝu.

Sur la vojo de la interparaciĝo la unua paŝo devas esti: rompi la murojn inter la popoloj, por ke ili povu interkonatiĝi, interamikiĝi kaj kunlabori.

Tiuj pacifistoj, kiuj ne uzas kaj disvastigas

la internacian lingvon, faras nenian servon al la paco. Ĉiu rezulto de ilia laboro baldaŭ perdiĝas.

Ne estas sufiĉe, ke nur la diplomatoj de la diversaj landoj kunvenas kaj intertraktas. Tiam ili kondukas la popolojn kiel blindajn ŝafarojn. Sed la grandaj amasoj, la popoloj mem devas internacie interrilati, por ke iliaj okuloj malfermiĝu kaj en la fremdulo ili ekvidu la fraton.

Ni, Esperantistoj, faras en tiu direkto potencon laboron. Kiam ni en internaciaj kongresoj kunvenas kaj kiam ni internacie korespondas, ni faras la plej efikan paclaboron: ni malarmas unu la alian. Per nia Esperantista laboro ni edukas la homojn al nova pensmaniero kaj ni transformas la psikon de la homaro, ĉar ni donas al la homoj *travivaĵojn*, kiujn oni ne povas forgesi kaj al kies efikoj oni ne povas kontraŭstari.

Le Esperantistoj ofte senkonscie kaj kvaŭzaŭ ludante faras tiun gravan, epokfarantan pac-laboron. Sed estas bone, se la 18-an de Majo ili pensas pri sia laboro kaj konsciiĝas pri la bela misio, kiun ili plenumas. Tio donos al ni ĉiuj novan energion al la laboro.

Pensi pri la paco oni devas ne nur la 18-an de Majo, sed en ĉiu tago de la jaro, ĉar en ĉiu tago danĝeroj minacas la pacon kaj vivon de la homaro.

la Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Unu numero jaro. ★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro.
80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. ★ Kopirajto de la enhavo rezervita.
Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro.
★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro.
Unu numero kostas -25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo
★ Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

1-a konkurso.

Abundan kaj interesan rikolton alportis la 1-a konkurso. Estas tre interese vidi, ke diversaj personoj vidas en la samaj bildoj tute diversajn aferojn. Tion ni ilustras per la publikigo de kelkaj solvoj.

Laŭ la decido de la juĝantaro la 1-an premion (la libron „Hura!“ de Julio Baghy) ricevas s-ro direktoro R. Peter en Bisamberg apud Vieno (Aŭstrio). Jen lia solvo:

Postulas peltmantelon
decide la edzin'!
„Ho, multekosta estos!
De kie mi prenos ĝin?“ -
pripensas malgaje la edzo.
Subite venas ide':
Li prenas nur feltmantelon
kaj paŝas kaj ĝojas tre.
Li verŝas sur glatan mantelon
„harkreskigilon“. - Kiel lag'
etendiĝas ĝi ĉiufanken.
Tre miras pri tio pagag'.
Kaj post malmultaj momentoj
la glata senhara felt'

fariĝis, - ho stranga efiko! -
plej bela eleganta pelt'.
Gojege la peltmantelon
alportas la feliĉul'.
Surmetas ĝin la edzino,
rigardas sin en spegul'.
Edzin' en peltmantelo -
personiĝinta ĉarm'!
Sur vango de l' bona edzo
briletas proĝoja larm'.
Ravegita pri tiu donaco
tro arde lin kisis ŝi,
ke li eĉ sufokiĝis. -
Terurega histori'!

La 2-a premio (la libro de Madách: Tragedio de la Homo) apartenas al Hipo Krito en Nederlando. Li (aŭ ŝi?) ne donis sian veran nomon, nek la adreson, kaj tio signifas, ke ĝi rezignas je premio. Tamen ni estas tre scivolaj pri la persono de tiu sprita kaj lerta samideano, kiu sendis solvojn de pluraj konkursoj kaj por ekscii la nomon kaj adreson, ni anoncas hodiaŭ apartan konkurson, trobeblan sur la paĝo de la konkursoj. Jen la solvo de Hipo Krito:

„Mia pelto eluziĝas,
Preskaŭ ne plu har' troviĝas
Sur la fel', rigardu nur!“

Li kun zorgo ĝin etendas,
Vidas, kvazaŭ nova pendas;
Estas en la sepa ĉiel'.

Jes, ŝi pravas, tute certe,
Sed ... la senmoneco sperte
Donis scion pri l' struktur'!

„Ĉu la nova pelto plaĉas?
Kostas multe!“ Li formaĉas
Grandan larmon ĉe l' ide'.

Papĉjo sur la ripozilo
Vidas, kiel harkreskilo
Servas ankaŭ por la fel'.

„Ho, karulo!“ Ŝi radias.
Kaj ŝi, antaŭ ol li scias,
Kisas lin! - La farise'!

La 3-a premio (Baghy: Preter la Vivo) apartenas al s-ro Erich Wald en Dresden, pro lia ĉarma versaĵo kun sprita ideo pri histrika pelto:

Edzino al la edz' ordonas:
„Nun pelt-mantelon mi bezonas!“

kaj poste frotas ĝin je kakt'o,
aliĝas dornoj dum pritrakto.

Kun falsa larm' al ŝi li diras:
„Histrika pelto!“ - Ŝi tre miras.

Sen mon' aĉeti kiu povas?
Jen bon-ideo lin ekmovas!

Li sur mantelon ŝian nunan
gluaĵon verŝas bele brunan -

Jen, ĉiam maloftaj' efikas,
ŝi dankas lin, sed tio pikas.

La 4-an premion (Kalocsay: Lingvo, stilo, formo) ricevas H. Tachauer en Rothenburg (Germanujo), pro la versa solvo:

„Konrado,“ diris la edzino,
„Mi estas granda, bela ino;
Necese estas por la belo
Nov-eleganta peltmantelo“.

Kun nova plano li nun iris
En florvendejon kaj deŝiris
Kaktojn kaj sur mantelon gluis
Kaj antaŭĝojon li jam ĝuis.

La bona edzo reflektante,
Kun peza kapo trairante
La stratojn, trovis tuj ideon,
Eniris en birdovendejon.

Kiom radias en beleco
La grand-edzino, kaj la edzo
Nur kaŝe ridas en la koro.
Mirinda estas la trezoro.

Li prenis plumojn de papago,
Sed vana estis lia ago.
Ho ve, la plumoj ne luĝiĝis
Kaj nova pelto ne fariĝis.

„Ho, vi estas bona edzo!
Kaj por via bonegeco
Por ĉiam al vi mi ligita.“
Jen, bum, li estas kaktigital!

La ceteraj premioj (diversaj libroj) apartenas al: 5. Ges-roj Dr. ing. Friedmann en Dresden. — 6. S-ro W. Pestinger en Ffm.-Höchst (Ni citas el lia solvo: „Dankon, karulo, pro la belega pelto. En ĝi mi brilos dum la somera vojaĝo kaj vi restos hejme por ripozi“). — 7. S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Ned. — 8. Pastro A. Troszynski en Koronowo, Polujo. — 9. S-ro K. Nagy en Debrecen, Hungarujo. — 10. S-ro Einar F. Månsson en Månserud, Svedujo. — 11. S-ro Jac. Vonk en Zaandam, Nederl. — 12. F-ino K. Lenk en Berlin. — 13. S-ro W. Strobach en Dresden. — 14. Gefratoj Fichtner en Radebeul. — 15. F-ino O. Goldmanówna en Krakovo. — La premiojn ni sendis al la nomitaj personoj.

Ni tre bedaŭras, ke pro manko de loko ni ne povas publikigi pli multajn solvojn, ĉar en multaj tekstoj estas troveblaj tre amuzaj kaj spritaj ideoj. En unu solvo ekzemple la edzino estas feliĉega, ĉar ŝi havas la unuan „erinacan

pelton“ en la mondo. Kaj tiel plu. Ni trovas kelkajn lingvajn erarojn en la solvoj, sed tio ne estas grava. La gravajo estas, ke oni kuraĝe uzas la okazon ekzerci nian lingvon. Ni kore gratulas al niaj talentaj legantoj!

2-a konkurso.

La prijuĝo de la ricevita solvoj estis tre malfacila, ĉar pluraj solvintoj faris terure multajn vortojn. Ili erare opiniis, ke oni rajtas fari plurajn vortojn el la sama vortradiko, ekz-e: post, posta, poste, aŭ: peki, pekas, pekis, pekos, peko. Do antaŭ la juĝo la komitato devis forstrekii tiujn nevalidajn vortojn.

La 1-an premion (pro 338 taŭgaj vortoj) ricevas ges-roj Dr. Ing. Friedmann en Dresden, la ceterajn premiojn la jenaj: 2. Pastro A. Troszynski en Koronowo, Polujo. — 3. S-ro W. Gombault en Leeuwarden, Ned. — 4. F-ino Th. Moosbrugger en Gossau, Svislando. — 5. S-ro A. Baumgart en Landeshut, Germ. — 6. S-ro A. Fehr en Köln-Bickendorf, Germ. — 7. S-ro J. Patalong en Bydgoszcz, Polujo. — 8. F-ino A. Kramer en Arnheim. — 9. S-ino E. Tilstra-Rohdens en Leeuwarden. — 10. S-ro H. Finkel en Olten-Trimbach, Svislando.

3-a konkurso.

Ĉi tiun sufiĉe simplan demandon nur malmultaj personoj sukcesis solvi. Ni ricevis grandan aron da malĝustaj solvoj. Pluraj personoj respondis, ke la ŝipo renkontas 4, 5, 6, 8, aŭ 9 ŝipojn. Unu persono donis eĉ tian respondon, ke unu ŝipo renkontas nur unu (!) alian ŝipon. La ĝusta solvo estas: Unu ŝipo renkontas 17 aliajn ŝipojn. Oni devas pensi pri tio, ke la trafikado de la ŝipoj estas daŭra. Se ni supozas, ke ŝipo A forveturas el Liverpoolo la 10-an de Majo, ĝi jam tuj post sia forveturo renkontas tiun ŝipon, kiu Novjorkon forlasis la 2-an de Majo. Kaj la lasta renkontata ŝipo estas tiu, kiu forlasas Novjorkon la 18-an de Majo. Ĉar ĉiutage unu ŝipo forlasis Novjorkon kaj venis renkonte al ŝipo A, estas evidente, ke ŝipo A renkontis 17 ŝipojn.

La premiojn ni dislotis inter tiuj personoj, kiuj donis ĝustan solvon. Premiojn ricevis: 1. S-ino Klaudija Indra en Riga, Latvio. — 2. S-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden, Nederl. — 3. S-ro D. Stegeman en Arnheim. — 4. S-ro J. Wiesböck en Schattendorf, Aŭstrio. — 5. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 6. S-ro Ph. Grimm en Ellefeld, Germ. — 7. S-ro J. Linthuis en Rotterdam. — 8. S-ro P. Creemers en Obbicht, Ned. — 9. Gefratoj Fichtner en Radebeul, Germ. — 10. S-ro W. Pestinger en Ffm.-Höchst, Germ.

5-a konkurso.

En la Januara numero de LA PRAKTIKO estis nur kvar veraj prezeraroj. Ili estas: 1) adzine sur la 2-a paĝo, 2) frŭlinoj sur la 11-a paĝo, 3) F-ino sur la 11-a paĝo kaj 4) poŝkartoj sur la 11-a paĝo.

El la multaj partoprenantoj de ĉi tiu konkurso nur 5 personoj estas, kiuj trovis tri erarojn el la supre cititaj kvar eraroj. Aliaj 10 personoj trovis nur 2 erarojn, kaj la ceteraj personoj nur 1 eraron.

La premiojn 1-5 ricevas tiuj kvin personoj, kiuj trovis tri erarojn. La premiojn 6-10 ni dislotis inter tiuj dek personoj, kiuj trovis du erarojn. La premiojn ricevis: 1. F-ino J. v. Savelbergh en Heerlen, Nederl. — 2. S-ro Talivaldo Indra en Riga, Latvio. — 3. S-ro J. Opendorp en Bemmelen, Ned. — 4. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 5. S-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden, Ned. — 6. S-ro K. Nagy en Debrecen, Hungarujo. — 7. S-ro Neis en Rotterdam. — 8. S-ro Ch. Brunet en Bordeaux, Francujo. — 9. F-ino C. M. Schelfelaar en Hago. — 10. S-ro J. Tromp en Zaandam, Ned.

6-a konkurso.

Kun plezuro ni konstatas, ke niaj legantoj faris belan kaj grandan laboron partoprenante en ĉi tiu interesa konkurso, kiu estas eksterordinare lerniga. La partoprenantoj trovis multajn erarojn, sed kelkaj personoj estis tro fervoraj, ĉar ili ofte nomis aferojn, kiuj en la vero ne estas eraroj, sed devenas nur de la neprecizeco de la desegno. Unu persono eĉ tion skribis inter la eraroj: „sur la strato mankas la malpurajoj“. La juĝa komitato unue forstrekis tiujn malĝustajn punktojn kaj poste disdonis la 20 premiojn inter tiuj personoj, kiuj trovis de 88 ĝis 35 erarojn. Multaj personoj trovis malpli da eraroj kaj tial ili ne povas ricevi premion. Sed ilin konsolu la fakto, ke ili faris tre valoran ekzercon en la lingvo. En la estont j numeroj ili serĉu pli diligente la erarojn, por ricevi premion.

La premiojn ricevis: 1. S-ro A. Libers en Jelgava, Latvio. — 2. S-ro J. Opendorp en Bemmelen, Ned. — 3. S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Ned. — 4. F-ino A. Kramer en Arnheim. — 5. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 6. S-ro J. Patalong en Bydgoszcz, Polujo. — 7. F-ino Chr. J. van der Horst en Amsterdam. — 8. S-ro J. Stec en Warszawa-Zoliborz, Polujo. — 9. Gefratoj Fichtner en Radebeul. — 10. S-ro H. Rippel en Würzburg, Germ. — 11. S-ro Walter Strobach en Dresden. — 12. F-ino C. Peters en Apeldoorn, Ned. — 13. S-ro W. Pestinger en Ffm.-Höchst, Germ. — 14. S-ro H. Tachauer en Rothenburg, Germ. — 15. S-ino Leonora Wiesenfeld en Varŝavo, Polujo. — 16. Pastro A. Troszynski en Koronowo, Polujo. — 17. Frato C. Göbel en Berlino. — 18. S-ro R. Buseth en Namsos, Norv. — 19. F-ino Luise Hüber en Zürich, Svisl. — 20. F-ino J. Savelbergh en Heerlen, Ned.

La rezulto de la pluaj konkursoj aperos en la venonta numero.

FARU LA KONTROLON!

(Praktika gramatika leciono)

La solvo de la 4-a tasko:

Rakonto pri ruza venĝo.

Pro la favoro. Pro la bonega butero por malsanuloj. Per specialaj maŝinoj. — Pri kiu. Pro sia ofico. Per fervojo. Por fari. Por sia gazeto pri novaj skandaloj. Pro la fakto. Per portreto kaj per kelkaj vortoj. Pri tio. Per la ŝtataj fervojoj. — Pri unu. Pro burokrateco. Por plaĉi. Per diversaj. — Per rapida. Por fari. Pri sensacia. Pro jalujo. Per sia. Pri juna. — Pri la granda. Pro la sensacia. Pro la farita. Pri kiu. Pri la sukceso. Por la gazetoj. Per sia. Pro la konata. — Por kontroli. Per ambaŭ. Pri tio. Pro la granda. Pro tio. Per ambaŭ. Per timigaj. Pri granda. Pro timo. Per granda. Per paroloj. Pri la potenco. — Pro la okazintoj. Pri venĝo. Pri sia. Pri la sama. Pro manko. Por viziti. Pro ĝojo. — Per aŭtomobilo. Pro kolero. — Pri tio. Pro lia. Per la fervojo. Por fari. Pro liaj. — Pri tio. Pro sia. Por lin. — Pri tio. Por la fervojo. Por fari. Pro kolero. Per granda. Pri tio. — Per kio. — Pri tio. Por fari al vi. Per viaj propraj okuloj. Pri Georgo. Pro sia. Pro ĉiu. Pri tio. — Per la rapida. Por ke la plano. Por kontroli. Pri la okazonta. Per aglaj. — Per fremda. Pri la regularo. Pro trompo. Por fari. — Per trankvila. — Pri tio. Per ĉi tiu. — Per daŭrigi. Pro laceco. Por iom ripozi. Pro kolero. Per tondra. Por fari. — Pro bezono. Por la lokomotivo. Per rapidaj. Pri la tempo. — Per akraj. Por kontrolo. Per siaj. — Per viaj. Pro brando. — Pro la bone. Per sia. Pri la maljusteco. Por sanigi.

5-a tasko.

Oni ofte diras, ke en Esperanto la plej malfacila afero estas la akuzativo, la uzado de la litero „n“. Sed tio ne estas vera. Se vi scias la regulojn pri la litero „n“, la tuta afero estas nur ludo.

La literon „n“ ni uzas: 1) Ĉe la objekto de la ago. Ekz-e: *mi manĝas pomon*. 2) Por montri direkton, anstataŭ la vorteto „el“. Ekz-e: *li vojaĝas Parizon, mi iras en la domon*. 3) Por esprimi tempojn. Ekz-e: *la pasintan semajnon mi estis malsana*. 4) Por esprimi mezuron kaj kvanton. Ekz-e: *du metrojn longa, tridek jarojn aĝa*.

Bonvolu el via lernolibro refreŝigi tion, kion vi jam lernis kaj post tio legu la sekvantan rakonton kaj enmetu ĉie la mankantan literon „n“. Bonan sukceson!

SOMERA VOJAĜO.

(Skrabis unu lernanto, kiu tute ne komprenis la uzadon de la grava litero „n“ kaj tial li ĉie forlasis ĝin.)

La lasta jaro miaj instruistoj metis en mia kapo tro multe da gramatikaj reguloj kaj pro tio mi sentis mi preskaŭ malsana. Je mia demando fama kuracisto malkaŝis la grava sekreto de la sano, dirante al mi: vi devas forgesi ĉio, kio vi lernis. Plena de ĝojo pro tiu saĝa konsilo mi decidis fari longa vojaĝo tra la plej bela lando de la mondo: mia patrolando.

Kun kelke da bonaj kamaradoj la tridek-unua de Junio mi forveturis per rapida vagonaro al vilaĝeto Sismur, apud kiu estas la interesa moderna kastelo de la glora mezepoka kavaliro Fortbrak. La vagonaro tuta horo sen halto kuris preter urboj kaj arbaroj kaj poste dudek minutoj inter senarbaraj rokoj.

La kastelo mem kuŝas ekster la vilaĝeto, tri kilometroj malproksime de ĝi. Kun batantaj koroj ni enpaŝis inter la malnovegaj muroj de la kastelo, el kiuj blovetis la vento de la historio.

Irinte tra malvastaj koridoroj kaj krutaj ŝtuparoj ni atingis la granda salono. En tiu impona ĉambrego, kiu oni uzadis por festenoj, apud la muro staras

granda ŝranko. Ĝi estas 9 metroj alta, 7 metroj larĝa kaj 837 kilogramoj peza. La gardisto de la kastelo diris, ke malantaŭ la ŝranko en la muro estas sekreta pordo, tra kiu kavaliro Fortbrak kun sia juna edzino forkuris por savi sia vivo de la malamiko, kiam li estis 98 jaroj aĝa. Li estis tiom forta, ke li povis per unu sola fingro formovi la ŝranko.

Kontraŭ la ŝranko sur la muro pendas la portreto de la kavaliro, pentrita laŭ malnova fotografiaĵo. Ĉirkaŭ la portreto pendas granda amaso da antikvaj bataliloj. Mi enrigardis malantaŭ la portreto por vidi la dua sekreta pordo, sed mi vidis nur araneaj retoj kun sekaj kadavroj de muŝoj, kiuj ne sukcesis savi sia vivo. Tiu belega kolekto de bataliloj havas la valoro de tri milionoj da dolaroj, laŭ la diro de la gardisto.

Apud la salono estas la dormoĉambro. Kiam ni enpaŝis, antaŭ niaj okuloj ĉarma muŝeto saltis de sur la tablo kaj kuris sub la lito, ĉar sub la mebloj estas la sekretaj pordoj de la muŝoj. En momento la gardisto klinis si kaj prenis de sub la lito grava historia objekto: la pantofloj de kavaliro Fortbrak. Ni rigardis ili kun admiro kaj respekto kaj ni devis meti en ili kelke da moneroj.

Krom la salono kaj dormejo ni rigardis ankoraŭ kvar ĉambroj, sed anstataŭ la turo, kiu estas 84,693 milimetroj alta, ni vizitis la kelo, kiu ne havas fenestro. Tie mi metis mia vizitkarto super la pordo.

Kiam ni eliris el la kastelo, super ni ridis la ĉielo. Tio inspiris ni al manĝo kaj dormo. Ĉirkaŭ la kastelo estas bela ĝardeno kun ŝtona barilo kaj trans la barilo vasta kampo. Ni metis niaj aĵoj apud la barilo, ni sternis niaj manteloj sur la tero, ni manĝis kaj post tio ni ekdormis. En la sonĝo mi vidis kavaliro Fortbrak. Li vokis mi per la mano. Mi humile paŝis antaŭ li, sed li metis ŝnuro ĉirkaŭ mia kolo, ŝovis ŝtonoj en miaj poŝoj kaj jetis mi en la putro de la kastelo, kiu estas 97 metroj profunda kaj kies akvo estas 78 gradoj varma.

Sed la akvo havis malbonega odoro kaj mi kriis tiel forte, ke ni ĉiuj vekigis. Tiam mi vidis la kaŭzo de mia sonĝo: kelkaj paŝoj de mi kuŝis mortinta kato. Mi kuraĝe jetis ĝi trans la barilo.

Post tio ni eliris ekster la ĝardeno por spiri freŝa aero. Sed la gardisto kuris al ni kaj rakontis pri la mortinta kato, kiu dum 56 jaroj vivis ĉe li. Ni bone komprenis, ke mankas al li mono kaj ni metis en liaj manoj granda trinkmono. Post tio ni proponis, ke la monumento de kavaliro Fortbrak oni metu aŭ kontraŭ la fenestro de la kelo, aŭ inter la du maljunaj arboj sur la turo de la kastelo. Sed li prezentis gravaj argumentoj kontraŭ nia propono.

En tiu momento ekpluvegis kaj ni malsekiĝis ĝis la ostoj. Ni volis daŭrigi nia vojaĝo, sed pro manko de mono ni devis tuj revojaĝi al nia hejmurbo. Kvankam matene nia veturo daŭris unu horo kaj dudek minutoj, la reveturo daŭris nur 80 minutoj kaj ni multe miris pri tiu granda diferenco. Malgraŭ ĉio ni tamen decidis, ke venonta somero ni daŭrigos nia interesa kaj agrabla vojaĝo.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



EZOPO (6-a jarcento a. K.),



EZOPO

la fama greka fabelisto, estis sklavo de riĉa komercisto. La komercisto foje faris vojaĝon al Efezo por disvendi siajn varojn. La aliaj sklavoj diris al Ezopo, ke li ne bezonas porti ŝarĝon, ĉar li estas el ĉiuj la plej klera. Sed Ezopo sentis kiel sian honoron devon, partopreni en la ŝarĝportado. Tiam la sklavkunuloj permesis al li, ke li mem elektu la portotan objekton. Ezopo elektis la plej pezan objekton, la pan-korbon.

Ĉiu opiniis, ke Ezopo freneziĝis, ĉar li ja povis elekti multe pli malpezajn objektojn. Ĉe la tagmanĝo oni komencis manĝi el la pano kaj la ŝarĝo de Ezopo komencis malpeziĝi. Tiel daŭris vespere kaj en la sekvantaj tagoj. Post kelkaj tagoj li devis porti nur la malplenan korbon.

★

LORDO FREDERICK NORTH
(1733—1792)

estis brita politikisto. Foje, kiam li en la parlamento faris gravan paroladon, hundo kuris en la ĉambregon kaj la lordo devis interrompi sian paroladon. La hundo serĉis rifuĝon sub la oratora podio, sed kiam oni elpelis ĝin de tie, la kompatinda besto kuris en la mezon de la ĉambrego kaj komencis laŭte boji. Ĉi tiu sceno vekis ĉe la parlamentanoj laŭtan ridon.

Tia komika sceno povas konfuzi ordinaran oratoron. Sed lordo North havis la kapablon tiri profiton eĉ el la plej ridindaj cirkonstancoj. Li atendis kun la plej granda seriozeco kaj kiam la bruo ĉesis, li turnis sin al la prezidanto kaj diris:

— Prezidanta Moŝto, mian paroladon interrompis unu nova ano de la kunsido. Nun, kiam ĝi finis prezenti sian aferon, mi havas la honoron daŭrigi mian paroladon...

★

LUDOVIKO XIV-a
(1638—1715)



LUDOVIKO XIV

franca reĝo respondis, kiam oni petis lin, ke li ekstermu en Francujo la kalvinismon:

— Mia avo ŝatis la hugenotojn kaj ne timis ilin. Mia patro ne ŝatis ilin kaj timis ilin. Mi nek ŝatas ilin, nek timas ilin.

WILHELM WALDEYER,

la fama germana anatomo, profesoro ĉe la universitato de Breslau, estis ironia homo. Unu el liaj malfortaj studentoj sendis al li foje ekzempleron de sia doktora disertacio kaj post kelkaj tagoj persone vizitis la profesoron. Dum interparolo la juna kuracisto demandis:

— Kion opinias sinjoro profesoro pri mia disertacio?

— Ne troviĝas en ĝi ortografiaj eraroj. Kaj nun, kiel kuracisto, kien vi iros?

— Mi komencos praktiki en Magdeburgo.

— Ne faru tion, — respondis Waldeyer, — Magdeburgo estas en Germanujo, niaj samnacionoj loĝas tie. Iru prefere en Venezuelon.

★

HEINRICH HEINE (1797—1856),



HEINE

la granda germana poeto, ricevis foje paketon, kiu pezis kelkajn kilogramojn. En la paketo estis la poeziaĵoj de iu poetaĉo. Ĉe la manuskriptoj estis letero, en kiu la aŭtoro en rimantaj versoj petas, ke Heine diru kritikon pri la poemoj, aŭ almenaŭ tralegu ilin, ĉar „el la buŝo de

Heine — skribis la sekreta poeto — eĉ la mallaŭdo faras el oni kavaliron, levas al nobela rango”.

Heine resendis la poemojn kun la jena mallonga rimarko:

„Opiniu, ke mi faris el vi ... grandprincon.”

★

JOZEFO HYRTL (1811—1894)

estis hungara anatomo kaj profesoro ĉe la universitato de Vieno. Li havis multajn ordenojn, sed li neniam portis ilin. Sed iam, en studenta festo, li aperis kun ĉiuj siaj medaloj. Oni tre miris pri tio, ĉar oni sciis, ke Hyrtl ne estas vantulo.

Jen la historio de la afero:

Kiam Hyrtl volis forlasi sian hejmon, li demandis al kelkaj ĉeestantaj amikoj, ĉu oni kutimas surmeti la ordenojn por tia studenta festo?

— Nur la plej grandan, — respondis la amikoj.

Poste ili aldonis, ke ĉiujn ordenojn surmeti oni kutimas nur tiam, kiam oni iras al la plej altaj personoj.

— Tiam, — diris Hyrtl, — rapide ĉi tien ĉiujn ordenojn, ĉar por mi ne ekzistas pli altaj personoj, ol la studentoj.

ALEXANDRE MILLERAND,



MILLERAND

la franca politikisto, en la jaro 1925 kiel milit-ministro ofte vizitis rajd-lernejon kaj prenis lecionojn, ĉar li devis partopreni en la rajd-ekzercoj de la militista lernejo. En la lernejo oni disponigis al li la du plej bonajn rajdistojn. Sed la dika Millerand ĉiam malfacile iris sur la ĉevalon kaj tiu estis komika antaŭ tiuj personoj, kiuj ĉiam estas inter ĉevaloj. Unu maljuna, tre miopa kavaleria kolonelo sentis kiel sian taskon fari rimarkon pri tio.

— Sajnas al mi, — li diris — ke vi estas rezerva ofico de iu infanteria regimento tre malbone vi rajdas. Ni vetu, ke vi povas resti dum du horoj sur ĉevalo.

Millerand nenion respondis je tio.

— Kie estas via garnizono? — demandis la kolonelo.

— En la militministerio — respondis Millerand.

— Kian rangon vi havas?

— Nenian.

— Kiel nenian? Do kio estas vi en la ministerio?

— Bedaŭrinde mi estas la militministro.

★

HENRI DUGAZON (1746—1809)

estis franca aktoro. Foje unu el liaj kolegoj, la aktoro Desessart, vokis lin al duelo. Desessart estis tre dika viro. Sur la kampado de la duelo Dugazon paŝis al Desessart per kredo desegnis cirklon sur la nigra veston sur lia ventro kaj diris:

— Ni devas egaligi la ŝancojn; la trale de pafado ekster la cirklo ne estos valida.

La malamikoj ekridis kaj repaciĝis.

★

UMBERTO (1844—1900)

itala reĝo foje faris vojaĝon en Piemonto. En iu urbeto la loĝantoj aranĝis por la reĝo solenan akcepton. La urbestro salutis la reĝon per mallonga, sed enhavriĉa parolado. Ĉio bone iris, ĝis kiam la reĝo kun sia kutima afableco kaptis la manon de la urbestro kaj forte premis ĝin. La simpla viro tiel konfuziĝis per tio, ke li tute perdis sian elokventecon kaj povis balbuti nur la jenajn vortojn:

— Reĝa moŝto, nun, kiam mi fine vidis vin, vi povas trankvile morti.



UMBERTO

la mondo ridas

Sur ĉirkaŭvojo.

— Ĉu vi ne havas hazarde dudek markojn en malgrandaj moneroj?
— Ĉu vi volas ŝanĝigi dudek-markan bileton?
— Ne. Mi volas pruntepeti dek markojn.

(College Life)

★

La poeto.

— Ĉu Edgardo ne sendadas plu al la redakcio siajn poemojn?
— Ne. Li aĉetis propran paperkorbon kaj memstarigis sin.

(Berlingske Tidende)

★

Brandemo en Afriko.

La afrika vojaĝisto rimarkas, ke lia negra servisto maĉadas pecon da putranta viando. Li diras:

— Kiel vi povas manĝi tiun viandon, ĝi ja havas malbonan odoron.
— O, massa, mi manĝi nur la viando, laodoro lasi tie.....

(Frou-Frou)

★

Bona rekomendo.

La razisto-majstro faras fortan tranĉon sur la vango de la gasto, sed rapidas konŝoli lin:

— Ne grave, mi petas! Mi havas bonegan rimedon, el kiu unu sola guto tuj haltigas la sangadon. (Al la helpanto): Kie ĝi estas? Hodiaŭ matene ni havis tutan botelon.

La helpanto mallaŭte respondas:

— Elĉerpigis, sinjoro ĉefo.

(Dimanche Illustré)

★



Naiva demando.

La sinjorino: Kiam mia avino naskiĝis, ŝi pezis entute nur tri funtojn.

La grafo: Nekredeble! ... Kaj ĉu ŝi restis en vivo?

(Passing Show)

La surprizo.

— Hodiaŭ estas la favora okazo, ke ni surprizu vian karan patrinon per la novaĵo pri nia fianĉiĝo.

— Tre bone! Si jam tre atendas ĝin. (Fliegende Blätter)

★


La distrita profesoro.

— Kiel belan, elegantan surtuton vi havas, sinjoro profesoro!

— Jes, sed mi ŝatus scii, kiel mi akiris ĝin.

(Ulk)

★



Rompita krimulo.

— Ĉu vi deziras havi advokaton?

— Ne. Mi volas konfesi nur la puran veron.

(Le Rire)

★

Agrabla profesio.

— Vi certe havas malagrablan oficon kiel enkasigisto de ŝuldoj; nenie vi estas bonvena.

— Male, la plej multaj homoj petas min reveni.

(Haagsche Post)

★

La trajno ekiras.

— Portisto, idioto, vi metis mian pakojn en malĝustan trajnon!

— Ĉu mi estas la idioto? La pakajo estas en ĝusta loko, sed la sinjoro iris en malĝustan trajnon!

(Ulk)

★

En Skotlando.

Du araneoj renkontas.

— Kiel vi fartas? demandas unu.

— Terure aĉel! — respondas la alia

— Oni ne povas plu vivi pro tiuj malbenitaj polvsuĉiloj. Kaj vi?

— Ho, mi bonege kaj trankvile vivas.

— Kaj kie vi loĝas?

— En Aberdeen, en unu monkolakta kesto.

La unua tagmanĝo.

La novedzino la unuan fojon faras tagmanĝon. Kiam ĝi estas preta, ŝi mas ĝin. Kun grimaco ŝi diras:

— Strangan guston havas mia ke li ŝatas ĝuste ĉi tiun abomenaĵon!

★

Matematiko.

Onklino: Jes, mia etulo, la kio ke la sep-jara infano devas enli sepa horo kaj la ok-jara je la o

Knabeto: Ho, onklino, tiam vi devas enlitiĝi!

★

Malestimo.

— Kia mizera senorda familio familio Humbig. Eĉ salon ili ne la hejmo.

— De kie vi scias?

— Hieraŭ mi volis pruntepeti

★

Granda efiko.

— Ĉu la eksplodo dum la fabriko faris grandan bruon?

— Jes ja! Eĉ la n...

La granda...

— Patro, mi volas fariĝi flugilo

— En ordo! Aĉetu por vi la ŝinon kaj mi donacas al vi la tuta

★



La malgranda denunciato.

— Panjo, mi vidis, ke onklo kisis mian fratino.

— Tio ne estas malbona, fileto. Alfredo post unu semajno estos de via fratino.

— Kaj paĉjo kiam estos edzo fraŭlino edukistino?

(Ric)



Dum la paska libertempo D-ro Edmond Privat donis universitatan kurson en la Esperanto-Domo en Arnheim pri „la esprimado de sentoj en Esperanto“. Nia bildo montras grupon de la partoprenantoj, dum promeno en la parko de la Esperanto-Domo. En la mezo staras D-ro Privat (1) kaj lia edzino (2). La kursanoj multe ĝuis la tre instruajn prelegojn.



La „Esperanta Rondo“ ĉe la ŝtata klasika gimnazio de la urbo Bydgoszcz en Polujo. En la mezo sidas profesoro Mieczysław Sygnarski, la gvidanto de la Rondo, fervora propagandanto kaj instruanto de Esperanto. En Bydgoszcz estas tre vigla Esperantista vivo.



Parto de la Esperanto-ekspozicio, kiun nia fervora propagandisto, s-ro Simono Rosenstock aranĝis en sia hejmurbo Borszczów en Polujo.



La 10-an de Aprilo, okaze de la vizito de pastro Andreo Cseh, okazis en la Minorita preĝejo de Vieno (Aŭstrio) diservo kun Esperanto-lingva prediko. Nia bildo montras la partoprenintajn geesperantistojn antaŭ la pordego de la preĝejo, post la diservo. (Foto A. Reiss, Vieno).



S-ro Susumu Aibara, nia fervora japana propagandisto, mortis. - S-ro Aibara estis konsilanto de Japana Esperanto-Instituto kaj kunlaboranto de la Revuo Orienta. Kiel sekretario de la Japana Filio de la Ligo de Nacioj li enkondukis la uzadon de Esperanto ĉe sia oficejo.



Dum la paska libertempo okazis Cseh-metoda kurso en la urbo Barry (Suda Britujo), kun partoprenantoj el la tuta Anglujo kaj Skotlando. - En la mezo staras la kursgvidanto, la rumana s-ro Pragano. Dekstre de li sidas, tenante verdan stelon, f-ino Ella Baldwin Smith, kiu senlace kaj tre lerte organizis la sukcesplenan kurson. Oni preparas en Anglujo pluajn Cseh-metodajn kursojn.

INFORMOJ

Esperanto instruata en universitatoj de Ameriko. — Laŭ ĵus ricevita informo en tri universitatoj de Usono oni instruas nuntempe Esperanton: en la Universitato de Texas *prof. Kennott* instruas 10 studentojn, en la Universitato de Kalifornio *prof. Berkeley* la docento de Esp-o estas *prof. Fred W. Wharff* kaj en la Universitato de Minnesota a instruanto estas *d-ro Leman Wendel*.

F-ino Elinjo Pähn en Aprilo faris provlecionon en Hamburgo kaj vizitis dufoje Kopenhagon. Post la fino de siaj kursoj en Helsingborg (Svedujo) ŝi faros propagandan rondvojaĝon tra Danujo. F-ino Pähn faris en Svedujo plurajn radio-paroladojn.

S-ro Julio Baghy, la fama poeto de Esperantujo, konstruisto de la Cseh-Instituto, gvidas nuntempe kursojn en Parizo. Lastatempe li devis bedaŭrinde apasi malsanon, kiu finiĝis per sukcesa operacio. La operacio asistis *D-ro Pierre Corré*, membro de la Esperantista Akademio. S-ro Baghy nun estas bona sano daŭrigas la instruadon.

Kursoj en Norda Francujo. — La Pariza Kongresa Komitato organizas Ĉe-kursojn en la urbo *Amiens, Arras* kaj *Boulogne-sur-Mer*, por prepari partoprenantojn al la kongreso. La kursojn gvidos *ĉiuj* Majo kaj Junio nia multmerita norvega samideano *s-ro Jens Schjerve*, instruisto de la Cseh-Instituto, ĵus reveninta el Ameriko, kie li gvidis kursojn.

En Sosnowiec (Polujo) s-ro *Bol. Czechowski* gvidas kursojn por senlaboruloj kaj alian kursojn por 14 popollernejaj instruistinoj, oficistinoj, inĝenieroj kaj instruistoj. En perfektiga grupo oni enkondukis ludon bazitan sur la Ĉe-kurso, por perfektigi la kurspartoprenintojn en gaja maniero.

Esperanto ĉe la skoltaj. — En Budapeŝto (Hungarujo) estas du kursoj por la anoj de la Skolta Trupo 401 de S. George. La kursojn gvidas *f-inoj Margit Janicsák* kaj *Ily Mátéffy*. — Nia konata internacia instruisto *d-ro O. Fischer* en Norvegujo instruis Esperanton al 140 skoltaj kun la celo, ke ili uzu la internacian lingvon dum la venontjara mond-jamboreo en Budapeŝto.

En Buczacz (Polujo) du kursojn gvidas nia fervora instruistino *f-ino Leonja Fruchtowna*. Ŝi havis malfacilan laboron, ĉar en tiu urbeton ĝis nun ne estis eĉ unu Esperantisto. Ni gratulas al nia kuraĝa pionirino.

F-ino Martha L. Root, nia fervora samideanino, tutmonde konata propagandistino de la Bahaimovado, post dujara vojaĝo ĉirkaŭ la tergloblo, revenis al Eŭropo kaj intencas fari pli longan vojaĝon en la landoj de Eŭropo. Ŝi estas nuntempe en Praha (Ĉeĥoslovakujo), de kie ŝi vojaĝos baldaŭ al Varŝavo (Polujo). F-ino Root estas amerika ĵurnalistino el la usona urbo Pittsburg.

En Borszczów (Polujo) nia fervora propagandisto *s-ro Simono Rosenstock* gvidas kursojn en la gimnazio. En la aranĝado de la kurso multe helpis s-ro profesoro Grzyb. En la sama urbo oni fondis Esp-societon kun nomo „Verda Fonto” kaj aranĝis ekspozicion.

ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

Li diris, ke li venus. — En kelkaj landoj komencantoj ofte uzas ĉi tiun formon anstataŭ la ĝusta: *Li diris, ke li venos*. Bonvolu atenti: ne traduku sklave la naciajn esprimmanierojn. Jes, ni povas en Esp-o diri ankaŭ: *Li diris, ke li venus*, sed tiam ni devas aldoni ian kondiĉon, ekz-e: *Li diris, ke li venus, se li estus sana*.

Respondu plejble baldaŭ. — Anstataŭ la stranga kaj malkorekta vorto „plejble” oni devas diri: „*kiel eble plej*”. Do: *Respondu kiel eble plej baldaŭ*.

Tiu pejzaĝo estas fama por sia beleco. — La vorto „por” estas malbona ĉi tie. Ni devas diri „pro”, ĉar la beleco estas la kaŭzo de la fameco.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

S-ro J. H. en St.-A. — 1. La vorto „jabato” verŝajne estas preterarato anstataŭ sabato aŭ rabato. — 2. „Tentaklo” estas la nomo de la kaptilo de iaj maraj bestoj, kiel polipoj (en holanda lingvo: *vangarm, tentakel*). — 3. Estas vere, ke la nomo de la floro „lekanto” havas la saman formon, kiel

la partipo de la verbo „leki”, sed verŝajne la kunteksto neniam lasos dubon pri la vera signifo. Ĉu ie, en nia tuta literaturo, la partipo de „leki” jam estis uzata kiel substantivo? Cetere ekzistas tre multaj tiaj vortoj kun duobla senco kaj estus senespera laboro trovi ĉiam apartajn vortojn. Multaj homoj eĉ ŝatas fari vortludojn per tiaj dusencaj vortoj.

S-ro R. J. en B. (Polujo). — Grandliteron ni uzas en Esperanto ĉe la komenco de frazo kaj ĉe la propraj nomoj. Laŭ la kutimo kaj laŭ la ekzemplo de Zamenhof ni uzas grandliteron ankaŭ ĉe la nomoj de la monatoj. La vorton „Esperanto” oni skribas kun granda komenclitero, por eviti kunfuzon kun la partipa formo de la verbo „esper”. — Ni esperas, ke la Esperantista Akademio baldaŭ donos detalan regularon pri ĉi tiu afero.

P. M., Arnhem. — Vi estas prava, kiam vi preferas uzi nur-Esperantan vortaron, en kiu ĉiu Esp-a vorto estas klarigata en Esp-o. La *Plena Vortaro* de SAT estas tre rekomendinda. Ĝi donas ĉe ĉiu vorto ankaŭ ekzemplajn frazojn kaj esprimojn kaj detalajn gramatikajn klarigojn precipe ĉe la sufiksoj. La libro estas aĉetebla ankaŭ ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO, prezo 6.- guld.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.05 guld.

KALENDARETOJN por 1932, eldonitajn de la Internacia Foiro de Budapeŝto, la Cseh-Instituto senpage dissendas al la kursgvidantoj, por uzo en la leciono pri la tempo.

KIU HAVAS BONAN KORON? — Kelkaj senlaboruloj kaj junuloj deziras aboni LA PRAKTIKON, sed ili ne havas monon. Kiu bonvolas donaci al ili la gazeton, pagante anstataŭ ili la abonon? Antaŭdan dankon!

TRO MULTE! — En la Februara numero de LA PRAKTIKO aperis mia adreso inter la korespondaj anoncetoj. Sed mi havas jam tiel multajn korespondantojn, ke mi bedaŭrinde ne havas plu tempon respondi. Tial mi petas, ke oni ne sendu al mi novajn proponojn. F-ino *Liv Sandberg*, Bekkelaget pr. Oslo, Norvegujo.

SOMERA GASTIGO. — Por praktike uzi kaj perfekte ellerni Esperanton, mi donos senkosten loĝejon kaj pensionon dum 1-2 somermonatoj al kolego, kiu donos la saman al mi en la somero de 1933. — *Albert Seppel*, 32-jara instruisto en Leisi, Estonio.

KOREKTADO. — Mi volonte korektos skribaĵojn de novaj Esp-istoj, sen honorario, oni aldonu nur respondkuponon por afranko. Bonvolu verki ion ajn aŭ traduki kaj sendu la skribaĵojn al mi. Sendante tradukaĵojn oni aldonu ankaŭ la originalan tekston. S-ro *Algot Hellbom*, Ĉe-metoda instruisto, Högbergsgatan 28, Sundsvall, Svedujo.

Grava libro aperis:

HISTORIO KAJ ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO

de
Ir. J. R. G. Isbrücker
membro de la Esperantista Akademio.

Grava por kandidatoj por la B-ekzameno!

Prezo: -75 guld.
Mendebla ĉe la eldonejo de La Praktiko.



La fama supera lernolibro:

KOMPLETA GRAMATIKA KAJ VORTFARADO DE ESPERANTO


reviziita kaj kompletigita de
S. GRENKAMP-KORNFELD, L.K.
estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.50 ned. guld.
Al la abonantoj afrankita sendo.

PANORAMO




En Novjorko la 7-jara knabineto *Margaret Murphy* elfalis tra fenestro de la kvara etaĝo. Pro feliĉa hazardo ŝi falis precize en malplanan infan-veturilon starantan antaŭ la domo. La veturilo tute disrompiĝis, sed la knabineto restis sen ia ajn difekto. Oni povas konstati, ke en la mondo okazas kelkfoje nekredeblaj hazardaĵoj.




En la komenco de la nuna jarcento en kelkaj landoj de Eŭropo oni uzis ankoraŭ du-etaĝajn fervojajn vagonojn. Kiel la bildo montras, supre estis la 3-a kaj 4-a klasoj, malsupre la 1-a kaj 2-a klasoj.

★




Ĉe unu familio en Budapeŝto en la plej granda amikeco vivas kune la hundo kun unu anaso. La malgranda anasido ne havis patrinon kaj tial oni metis ĝin al la hundo, por ke ĝi havu varmon. De tiam la du bestoj estas ĉiam kune. Ili kune manĝas kaj kune dormas.

★



Ĉi tiu giganta sonorilo estas farita el 26.000 elektraj lampoj. Ĝi anoncis la 150-jaran jubileon de la sendependeco de Usono.



Oliver Veale angla komeristo dum 14 jaroj portis en sia koro tiun germanan pafilkuglon, kiun li ricevis en la jaro 1917 sur la franca batal-kampo dum la mondmilito. Li mortis en sia 50-jara aĝo, sed la morto ne estis en kunligo kun tiu vundiĝo.

★



La plej peza homo de la mondo, sinjoro Joe Raggio, vivas en Philadelphia, Usono. Lia korpo pezas 320 kilogramojn, sed li estas nur 177 centimetrojn alta. Lia talia vasteco estas 202-centimetra.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Aprila numero!

23-a konkurso.

ENIGMO

La solvo konsistas el 68 literoj. Ĉiu nombro signifas unu literon. La sama nombro signifas ĉiam la saman literon.

30, 18, 59, 44, 14, 53, 8, 67 = tre altranga ŝtata oficisto.
25, 26, 27, 47, 31, 52, 45 = homo faranta vestojn.
35, 58, 23, 24, 68, 29 = parenca virino.
37, 40, 22, 61, 9, 12, 63, 67 = soldata vesto.
32, 60, 16, 48, 11 = virina nomo.
19, 4, 5, 6, 7, 8, 9 = granda rabobirdo.
15, 52, 36, 41, 42, 43, 29 = besto kun pikiloj.
34, 64, 65, 66, 67 = blanka floro kun forta bonodoro.
13, 55, 56, 57, 45 = akva birdo.
50, 51, 1, 2, 17, 31 = granda bela domo.
39, 38, 59, 60, 33, 12, 45 = nomo de monato.
3, 62, 21, 20, 10, 31 = araba regnestro.
28, 46, 54, 55, 67 = besto manĝanta kadavrojn.
35, 49, 50, 29 = parto de la korpo.

1-68 = vortoj de Anatole France.

Al la solvintoj ni donos 10 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis la 20-a de Julio. - Bonvolu observi la regulojn. Ne forgesu alĝui la konkurso-kuponon.

24-a konkurso.



Per ĉi tiu bildo ni intencas fari reklamon al La PRAKTIKO. Sed la bildo sola ne sufiĉas.

Ni bezonas ankaŭ vortojn.

Ni petas vin, bonvolu verki la reklam-tekston. Ĝi devas esti kiel eble plej mallonga. Ĉe la aljuĝo de la premioj ni konsideros la trafekon, la spritecon kaj la mallongecon.

Al la sendintoj de la plej bonaj tekstoj ni donos 15 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 20-a de Julio. Bonvolu atenti je la ĝeneralaj reguloj kaj ne forgesu alĝui la kuponeton.

25-a konkurso.

Kiu estas HIPO KRITO kaj kio estas lia (ŝia) adreso?

La redakcio de LA PRAKTIKO ricevis solvojn de diversaj konkursoj, kun subskribo „Hipo Krito en Nederlando“. Neniam vera nomo, nenia adreso. La leteroj portas la stampon de la poŝtoŝtampo en la centra stacidomo de Amsterdamo.

Ni anoncas konkurson por ricevi la nomon kaj adreson de tiu mistera Hipo Krito. La unua persono, kiu sendas al ni la ĝustajn nomon kaj adreson, ricevos premion. Se tiu unua persono estos Hipo Krito mem, li (ŝi) ne ricevos la premion. Limtempo: la 15-a de Junio.

26-a konkurso.

Faru frazojn, kies vortoj konsistas nur el prefiksoj kaj sufiksoj.

Ekzemploj: *La ujo de la ilaro aĉiĝis.*
La anaro disiĝas.


Reguloj: 1) Estas uzablaj ĉiuj prefiksoj kaj sufiksoj, plue la jenaj vortoj: la, estas, al, de, en, sur.
2) La frazoj devas havi klaran sencon.
3) La sama gramatika elemento povas plurfoje ripetigi en la sama frazo.

15 premiojn ni disdonos al la ensendintoj de la plej bonaj solvoj. Ni akceptas solvojn ĝis la 20-a de Julio. La plej bonaj solvoj aperos en LA PRAKTIKO.
Bonvolu legi la ĝeneralajn regulojn. Ne forgesu alĝui la malgrandan kuponon.

27-a konkurso.

En la monato Majo, en la bela monato de la floroj, ĉiu Esperantisto devas lerni la nomojn de la floroj. Ĉi tie estas 122 literoj. Bonvolu enmeti ilin en la kvadratojn de la figuro. Se vi metas ilin en la ĝustajn lokojn, vi ricevos la nomojn de 19 gravaj kaj tre konataj floroj. Jen la literoj:

a a a a a a a a a a a a a a b c c c d e e e
e e f g g g h i i i i i i i i i i i i i i
i j k k k k k k l l l l l l l l m m m n n
n n n n n n n n n n n n o o o o o o o o o o
o o o o o o o o o o o o o o o o o o p p p r
r r r s s s t t t t t t t t t t t u u v v v z
z z



potfloro kun ruĝo en la folioj
plej bela floro
blanka floreto pendanta
ruĝa kampa floro
bonodora bulba floro
modesta floreto
frua arbara floro
bonodora floro kun multaj
japana floro [anguloj]
blua floreto kun flava mezo
floro diranta „jes“ kaj „ne“
blanka bulba floro kun flava
ruĝa pendanta floro [mezo]
bonodora granda blanka
moderna „floro“ [floro]
bonodora floro de arbeto
ruĝa floro kun bulbo
blua floro sur la grenkampo
fruprintempa blanka floro

La literoj en la girlando, kiun formas la dikaj kvadratetoj, donas belan kaj veran frazon, kiu sendube rilatas al ĉiu solvanto de ĉi tiu enigmo.

Al la solvintoj ni donos 12 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 20-a de Julio. Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn. Estas sufiĉe, se vi sendas al ni la frazon el la girlando.

Kupono
por la
23-a
konkurso

Kupono
por la
24-a
konkurso

Kupono
por la
25-a
konkurso

Kupono
por la
26-a
konkurso

Kupono
por la
27-a
konkurso



Ĉi tiujn kuponon detranĉu
kaj sendu ilin kun viaj solvoj
al la redakcio.



Klarigoj en la Aprila numero.

AŬSTRIO

Bad Vöslau. — S-ro Johann Jüptner, fervoja inspektoro, Friesstrasse 4. — 54-jara. PI, k.ĉ.l.

ĈEĤOSLOVAKIO

Petrovice, p. Police n/Met. — S-ro Josef Braha, laborestro, N-o 80. — 35-jara. L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

ESTONIO

Leisi. — S-ro Albert Seppel, 32-jara instruisto. — L, PK, PI, pri pedagogiaj temoj, kun eŭropaj landoj escepte Germanujo.

Tallinn. — F-ino Vera Gutmann, 13-jara gimnazia lernantino, Kaupmehe 6-1. — Kun ekstereŭropaj landoj

Tallinn. — S-ro Hugo Einblau, 26-jara bankoficisto, Kaasani 15.a-12. — PK, PI (bfl.), k.ĉ.l., p.ĉ.t. Dez. interŝ. PM (sen aerpoŝto).

FRANCUJO

Lernantinoj de la Komerca Altlernejo en Parizo, kursantinoj de Julio Baghy kaj Elinjo Pähnen.

Alfort (Seine). — F-ino Helgett Paviot, 10 Quai du Marne. — Kun Hindujo, Ĉinio kaj Japanujo.

Boulogne-sur-Seine (Seine). — F-ino Jacqueline Dintilhac, 103 avenue Victor Hugo. — Kun Argentino kaj Japanujo.

Colombes (Seine). — F-ino Raymonde Bridier, 30 rue Saint Denis. — Kun Japanujo.

Garches (Seine & Oise). — F-ino Suzanne Helft, 16 rue des Bures. — Kun gestudentoj en la Skandinavaj landoj.

Gennevilliers (Seine). — F-ino Suzanne Chevrier, 133 rue du Moulin de la Tour. — Kun Sud-Ameriko kaj Japanujo.

Montigny les Bains (Seine & Oise). — F-ino Yvonne Bizet, „Les Feuillantines”. — Kun Brazilo.

Neuilly sur Seine. — F-ino Geneviève Beutter, 6 rue Henrion Bertier.

Rueil-Malmaison (Seine & Oise). — F-ino Christiane Pilot-Debienné, 216 avenue de Paris. — Kun Japanujo kaj Hindujo.

Saint Maur les Fossés (Seine). — F-ino R. Pfender, 21 rue du Rocher. — Kun Japanujo.

Paris 14. — F-ino Simone Duriez, 22 rue d'Alésia. — Kun Ameriko kaj Japanujo.

Paris 18. — F-ino France Ducombat, 30 avenue de Saint Ouen. — Kun Aŭstralio kaj Meksiko.

Paris 17. — F-ino Lucette Dufumier, 27 rue de Tocqueville. — Kun studentinoj en Rusujo.

Paris 16. — F-ino Mary Salza, 105 avenue Victor Hugo.

Paris 7. — F-ino Lucie Runacher, 5 avenue Daniel Lesueur. — Kun Ameriko.

Paris. — F-ino Jacqueline Keim, 243 rue Saint Honoré. — Kun Japanujo.

Paris 16. — F-ino Simone Fuchs, 84 rue de Longchamp. — Kun Japanujo.

Paris 7. — F-ino Adèle Lescovar, 57 rue de Babylone.

Paris 6. — F-ino Lucie Charlot, 15 rue Littré. — Kun Norvegujo kaj Aŭstralio.

Paris 15. — F-ino Simone Roussel, 6 rue Nicolas Charlet.

Paris 15. — F-ino N. Néviadomsky, 6 avenue Vaugirard Nouveau.

Paris 15. — F-ino Jeanne Pelet, 13-bis avenue La Motte-Picquet.

Paris 14. — F-ino Andrée Raphanaud, 17 rue Delambre. — Kun Sud-Ameriko.

GERMANUJO

Berlin SW 48. — Esperanto-Grupo „Kolping”, per adr. s-ro Hans Haydt, K. G. H., Wilhelmstrasse 122. — K.ĉ.l., precipe kun tiuj, kiuj iros al la Pariza kongreso.

Greiz-Th. — S-ro Kurt Walther, sanitaristo, Eichbergstr. 15. — K.ĉ.l.

Greiz-Th. — S-ro Erich Weibrecht, konstruisto, Elsterstr. 38. — K.ĉ.l.

Karlsruhe, Baden — S-ro Friedrich Helfers, 31-jara bankoficisto, Postschliessfach 165. — K.ĉ.l.

Reichenbach-Vogtland. — F-ino Frida Heckel, kooperativa oficistino, Eisenbahnstrasse 39. — K.ĉ.l.

Reichenbach-Vogtland. — S-ino Bertha Strobel, Bahnhofstrasse 16. — K.ĉ.l. koresp. kaj interŝ. PM.

HONDURASO

Olancho. — S-ro Mauricio Jagoda, 24-jara komercisto. — L, PI, kun la landoj en la tri Amerikoj, pri la Esp-movado en tiuj landoj. Ĉiu skribanto bonvolu almeti sian portreteton kaj biografion.

ISLANDO

Reykjavik. — S-ro Gudjón Bj. Gudlaugsson, laboristo, Framnesveg 48.

Reykjavik. — S-ro Agnar G. Breidfjörð, ladisto, Laufásveg 4. — (21-jara fraŭlo).

Reykjavik. — S-ro O. Fridgeirsson, komercisto, Box 465.

KANADO

Vancouver, B. C. — S-ro W. H. Fenton, ĉefinstruisto de Komerca Altlernejo, 2755 West 36 Ave. — L, PK, PI, k.ĉ.l., pri div. temoj, speciale SAT kaj frاتمovadoj.

NEDERLANDO

Enschede. — S-ro K. J. Kuiper, 41-jara lernejestro, Lasondersingel 27. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Goes. — F-ino T. Veenis, Kreukelmarkt 12. — (19-jara), L, k.ĉ.l.

Haarlem. — S-ro Isaac Rabbie, 42-jara vojaĝisto, Juno Plantsoen 1. — PK kun Ruslando, p.ĉ.t.

Hilversum. — S-ro W. H. v. Dongen, 30-jara hemiisto, Prof. Poelsstraat 16. — K.ĉ.l. precipe ekstereŭropaj, p.ĉ.t., precipe filozofio kaj folkloro.

Leeuwarden. — S-ro C. Wiersma, oficisto, Schapestraat 3. — K.ĉ.l., p.ĉ.t. Respondo garantiata. Interŝ. PM, ilustr. gazetojn, revuojn k.t.p.

Leeuwarden. — S-ino A. Gombault-Biegel, 28-jara mastrino, Deinumerstraat 13. — L kun Germanujo kaj Svislando.

Leeuwarden. — S-ino E. Tilstra-Rohdens, 34-jara mastrino, O. Grachtswal 113. — L, PI, k.ĉ.l., kun mastrinoj.

Rotterdam. — S-ro B. B. de Regt, inĝeniero, Witte de Withstraat 89.a. — L, PI, kun personoj, kiuj partoprenos en la Pariza kongreso.

Rotterdam. — F-ino G. Hardinxveld, instruistino, Kreekweg 105.

Rotterdam. — F-ino J. de Regt, instruistino, Putschelaan 158.

Tegelen. — S-ro Mathieu Cornet, 38-jara komunuma oficisto, Spoorstraat 5. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Zeddam. — S-ro M. Haas, lernejestro. — Pri pacmovado en la instruista mondo.

NORVEGUJO

Hamar. — S-ro Sverre Engebretsen, 24-jara modelisto en ŝufabriko, Torvg. 3. III. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., ankaŭ germane kaj angle kun kolegoj.

Larvik. — S-ro Bjarne Andressen, 37-jara instruisto, Trygves gt. 2. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

POLUJO

Bydgoszcz 4. — S-ro Rudolf Jablonski, 19-jara mehanikisto de aŭtomobiloj, ul. Kanatowa 11-1. — PI, bfl., k.ĉ.l.

Poreba kolo Zawiercia. — S-ro Pawel Kosko, 48-jara oficisto kaj instruanto de Esp-o, P.k.9. — P.ĉ.t., ĉiam respondos al ĉiu.

RUMANUJO

Cluj (Transilvanio). — S-ro V. Lapuseanu, str. Salcam 34. — Dez. interŝ. belajn PI, bfl., k.ĉ.l.

Satu-Mare. — S-ro Andreo Rubin, 21-jara, grandkomercisto de peltoj, strada Mihai Pavel 7. — L, PI, k.ĉ.l. kun personoj bone sciantaj esp-on, pri politiko, mondekonomio, spertoj dum la esp-a propagandado k.t.p.

SVEDUJO

Karlstad. — S-ro Ernst Andersson, 22-jara ĉapellaboristo, Karlstorp, Svinbäcken. — PI, k.ĉ.l.

Karlstad. — S-ro Folke Malmgren, 32-jara fervojisto, Sjöstrand 3. — PI, k.ĉ.l.

Wallåkra. — S-ro Sigvard Henriksson, 18-jara laboristo, Grönadal. — PI, p.ĉ.t., kun japanino.

SVISLANDO

Zürich 6. — S-ro Emil Eiberle, sorĉisto, Röschibachstr. 71.

USONO

Glendale, Cal. — S-ro Ben M. Crawford, 1110 Elm St.

Hollywood, Cal. — S-ro Roscoe V. Williams, 5529 Bonner Ave.

Hollywood, Cal. — F-ino Marie P. Cottrell, 935½ N. Ardmore.

Los Angeles, Cal. — S-ro P. P. Christensen, P.O. Box 1532.

Los Angeles, Cal. — S-ino F. S. Haley, 1325 W. 30th St.

Los Angeles, Cal. — S-ino E. Grace Cunningham, 1507 Talmage St.

Los Angeles, Cal. — S-ino H. L. Montank, 457 North Ave.

Los Angeles, Cal. — S-ro Harry B. Blee, 2307 Berkley Ave.

Los Angeles, Cal. — S-ro Clarence R. Zoll, 1618 E. 99th St.

Los Angeles, Cal. — F-ino Alice S. Eddy, 632¼ N. Virgil Ave.

Los Angeles, Cal. — F-ino Evelyn Medeck, 607 St. Paul Ave.

Los Nietos, Cal. — S-ro Earl Seall, P.O. Box 62.

Pasadena, Cal. — S-ino L. P. Boynton, 1765 Goodyear St.

Pasadena, Cal. — S-ino L. J. Barth, 314 S. Lake Ave.

Pasadena, Cal. — F-ino Daisy S. Lacey, 173 Pepper St.

Pasadena, Cal. — F-ino Emma E. Schaufele, 36 South Los Robles Ave.

South Pasadena, Cal. — S-ro G. R. Thomson, 1737 Mission St.

SEMAJNFINA KUNVENO en la Esperanto-Domo en Arnhem

18-19 Junio 1932

Programo:

18. Junio, sabato:

Posttagm. 4-a horo:

Parolado de s-ino Julia Isbrücker pri la Coué-metodo kaj ĝia praktika aplikado. (Enirprezo -25 guld.)

Vespere 8-a horo:

Amuza vespero. Prezentado de la teatraĵo „En 1950“, originale verkita de s-ro G. van Goethem, Aktiva Membro de la Cseh-Instituto. Post la prezentado danco. (Enirprezo inkl. imposto: -50 guld.)

19. Junio, dimanĉe:

Matene komuna ekskurso.

Partoprenantoj bonvolu frue rezervigi por si la ĉambron.

Favoro por la partoprenantoj: la hotelo de la Esperanto-Domo kalkulas la malaltigitan (pensionan) prezon.

La ESPERANTO-DOMO, en la mezo de belega vasta parko, estas malfermita dum la tuta jaro. En la domo estas kursejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro fluanta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5-10 personoj en unu ĉambro): 2.- ned. guld., (2-4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. Lunĉo: -75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro. Servmono 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26060

5-a INTERNACIA KURSO de ANDREO CSEH Arnhem, 19-29 Julio 1932.

La kurso daŭros dum 10 labortagoj, kun 4 instruhoroj ĉiutage. La lecionoj okazos matene de la 9-a horo ĝis la 1-a horo. En la posttagmezoj estos plezuraj kaj studaj ekskursoj. En la vesperoj okazos alterne amuzaj kaj seriozaj kunvenoj kun prelegoj kaj lumbildparoladoj.

La kurso finiĝos per amuza vespero kun teatra prezentado kaj balo la 29-an de Julio.

La 30-an de Julio oni povos forvojaĝi al la Pariza kongreso, kun la nederlanda speciala karavano de UEA. (Pri la karavano oni turnu sin al s-ro J. Telling, ĉefdel. de UEA, Bellevoijstraat 36, Rotterdam).

En la kurso partopreni povas ĉiu persono, kiu ankoraŭ ne scias Esperanton, kaj ankaŭ malnovaj Esperantistoj, kiuj deziras studi la kursmetodon.

Kotizo por la kurso kaj ĉiuj aranĝoj alligitaj (prelegoj, teatro, balo k.t.p.): 12.50 ned. guld.

Premio: Tiuj personoj, kiuj varbas tri neesperantistajn kursanojn, povas partopreni ne pagante kotizon.

Favoroj: 10 kursanoj povas ricevi senpagan loĝejon en la Esperanto-Domo dum la tuta kursdaŭro. Ili devos pagi nur la manĝon (2.50 guld. por unu tago).

Grave! Oni bonvolu diskonigi la suprajn informojn en la ĉiutaga gazeto, ricepi en la instruistaj gazetoj kaj fervore varbi kursanojn, por ke la kurso estu kiel eble plej internacia kaj ke edukiĝu multaj novaj instruistoj de Esperanto. (Ni antaŭdankas pro afable alsendotaj gazetnumeroj kun la koncerna artikolo.)

Bonvolu legi la informojn malsupre.

SEMINARIO POR CSEH-METODAJ INSTRUISTOJ Arnhem, 8-13 Aŭgusto 1932.

Partopreni povas ĉiu persono, kiu estas aŭ deziras esti gvidanto de Cseh-metodaj kursoj. La programo de la Seminario estas:

- Prelegoj de Andreo Cseh pri sia kurs-sistemo, pri la principoj de la metodo kaj la tekniko de la aplikado.
- Konsiloj al instruantoj.
- Praktikaj prov-ekzemploj.
- Raportado de diverslandaj instruistoj pri siaj spertoj.
- Diskutado.

Bonvolu legi la informojn malsupre.

INTERNACIA PERFEKTIGA KURSO Arnhem, 15-20 Aŭgusto 1932.

La kurson gvidos Andreo Cseh laŭ speciala sistemo kaj kun aplikado de helpiloj, disponigotaj al la kursanoj.

La lecionoj okazos ĉiutage en 4 horoj (matene de la 9-a ĝis la 1-a). En la vesperoj estos instruaj prelegoj (pri la historio kaj organizo de la Esp-movado, pri la Esp-a literaturo k.t.p.) kaj amuzaj aranĝoj.

La kurso okazos en internacia kunestado kaj tio ebligas la plej efikan

Bonvolu legi la informojn malsupre.

praktikan ekzercadon de la lingvo. Por tio servas speciale la posttagmezaj komunaj ekskursoj.

Partopreno en ĉi tiu kurso estas tre rekomendata speciale al tiuj personoj, kiuj preparas sin al ekzamenoj.

Kotizo por ĉiuj lecionoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj: 7.50 guld. Kiu aliĝas ankaŭ al la Seminario, pagas komunan kotizon de nur 10.— guld.

INFORMOJ:

Ĉiuj kursoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj okazos en la Esperanto-Domo. La kursanoj povos loĝi en la hotelo de la Esperanto-Domo, kie speciala favorpreza plena pensio (komforta ĉambro kun fluanta akvo kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago kaj unu persono: en unu-lita ĉambro 4.—, en du- ĝis kvar-lita ĉambro 3.50, en kvin- ĝis dek-lita ĉambro 3.— guldenojn. (La litoj estas apartigitaj per ŝirmiloj). Servmono: 10%. Aliĝante oni sendu la kotizon kaj menu la hotelon, pagante la pensionprezon por almenaŭ 2 tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando. (Telefona: 116720. Postĉekkonto: Den Haag 162626.)

Estas konsilinde baldaŭ aliĝi, ĉar la nombro de la partoprenantoj kaj de la loĝlokoj en la Esperanto-Domo estas limigita.

Personoj, kiuj deziras partopreni en la supre nomitaj kursoj, sed pro la krizo havas ekonomiajn malfacilaĵojn, turnu sin kun fido al la Cseh-Instituto, kiu klopodos fari por ili faciligojn.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
6-a numero



Junio
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO

OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederland)

TELEFONO: 116720
POSTĈEKKONTO
162626

„Dumvivaj komencantoj”

Pri la komencantoj ni skribis simpatiajn frazojn en la Marta numero de la Praktiko. Ni diris, ke ni amas ilin, ke ni dorlotas ilin, ke ni donas al ili kares-nomojn kaj ke ili ĝuas la privilegion balbuti en nia lingvo.

Hodiaŭ ni devas reveni al tiu temo. La kaŭzo estas tio, ke multaj samideanoj miskomprenas nian simpation al la komencantoj. Ili opinias, ke ni volas havi en Esperantujo nur komencantojn. Tial ili ne klopodas progresi kaj perfektigi. Ili scias la dek-ses regulojn de la gramatiko kaj povas balbuti kelkajn primitivajn esprimojn.

Efektive, ne malofte okazas, ke ni renkontas samideanon, kiu eĉ post dek aŭ dudek jaroj diras: „Bonvolu paroli malrapide, ĉar mi estas komencanto”. Tiuj personoj estas la „eternaj komencantoj”, la „dumvivaj komencantoj”.

Ne estas granda gloro aparteni al tiu kasto. La publiko rapide konkludas, ke ili ne havas talenton lerni la facilan Esperanton. Tial devas esti intereso de ĉiu komencanto, rapide perfektigi.

Sed povas esti pli malbona sekvo. La publiko, kiu pli longe observas tiujn dumvivajn komencantojn, facile faras malfavoran konkludon pri nia lingvo mem. Vidante, ke

personoj dum pluraj jaroj ne sukcesis bone ellerni la lingvon, oni konkludas, ke Esperanto estas tro malfacila, nelernebla, neparolebla lingvo. Kaj tian lingvon neniu volas enkonduki en la internacian vivon.

Tiamaniere la „dumvivaj komencantoj” povas esti tre danĝeraj kaj malutilaj al nia movado.

La plej bona propagando por nia lingvo estas: paroli la lingvon. Kaj la plej efika malpropagando estas: paroli ĝin malbone antaŭ la ne-esperantista publiko.

Teruran sperton ni havis foje. En tramvagono kelkaj Esperantistoj parolis inter si. En momento unu el la ne-esperantistaj pasaĝeroj demandis al sia kunulo:

- Kiun lingvon parolas tiuj homoj?
- Esperanton, — respondis la alia.
- De kie vi scias?
- Ĉar ili balbutas.

Nu, ĉu nia kara lingvo estas *balbut-lingvo*? Jen, kian „servon” povas fari al nia movado la senpripensaj komencantoj. Tial oni memoru: ni amas la komencantojn, sed nur dum unu jaro. En la dua jaro ili devas jam bone paroli nian lingvon.

Kaj la sekto de la „dumvivaj komencantoj” devas malaperi. Rapide, rapide!

Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Unu numero jaro. ★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro.
80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. ★ Kopirajto de la enhavo rezervita.
Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.) Oni povas aboni nur por tuta jaro.
★ La abona jaro komenciĝas en Jan., Apr., Julio kaj Oktobro.
Unu numero kostas 25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 page.
★ Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

4-a konkurso.

La 1-an de Junio ni fermis la 4-an konkurson, sed la premiojn ni povos disdoni nur post la kongreso, kiam ni scios la nombron de la kongresanoj. La ricevitaj respondoj estas tre interesaj. La partoprenantoj de nia konkurso estas optimistaj, sed ne tre. Nur unu persono donis la belegan nombron: 10,000.

Oni sendis la jenajn nombrojn: 864, 1200, 1230, 1265, 1317, 1326, 1700, 1785, 1800, 1873, 1900, 1932, 2100, 2200, 2400, 2560, 2800, 2950, 3000, 3100, 3230, 3250, 3256, 3456, 3500, 3645, 4014, 4526, 4865, 10,000. — Ni estas scivolaj pri tio, kiu gajnos la unuan premion.

7-a konkurso.

Bedaŭrinde ni povas disdoni nur 11 premiojn, ĉar nur 11 solvoj estas konformaj al la postuloj de la konkurso. La premiataj personoj formis el la afiksoj ĝustajn vortojn en la nombro de 168 ĝis 58. La juĝa komitato antaŭ la juĝo forstrekis la netaŭgajn vortojn.

La premiojn ricevis: 1. S-ro A. P. G. Droste en Hillegersberg, Ned. — 2. S-ro K. Nagy en Debrecen, Hung. — 3. S-ro Andreo Rubin en Satu-Mare, Rumanujo. — 4. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 5. F-ino Chr. J. v. d. Hor en Amsterdam. — 6. F-ino C. M. Scheffelaar en Hago. — 7. S-ro Ch. Brunet en Bordeaux, Francujo. — 8. Gefratoj Fichtner en Radebeul. — 9. S-ro F. A. G. Boermans en Assen, Ned. — 10. S-ro J. Hartog en Baarn, Ned. — 11. S-ino L. Wiesenfeld en Varŝavo.

8-a konkurso.

La solvo de la enigmo estas: *Fundamento de Esperanto*. Per lotado la sorto tiel decidis, ke la 14 premiojn ricevu la jenaj solvintoj:

1. S-ro L. Martensen en Hamburg. — 2. S-ro M. Cornet en Tegelen, Ned. — 3. S-ro B. Skaffell en Reykjavik, Islando. — 4. S-ro S. Zandstra en Wormerveer, Ned. — 5. S-ro J. Vital-Vital en Sankt-Moritz, Svislando. — 6. F-ino A. H. E. v. Vliet en Alphen a/d Rijn, Ned. — 7. S-ro H. S. Luengo en Orense, Hispanujo. — 8. S-ro G. P. Moerman en Apeldoorn, Ned. — 9. S-ro C. C. van Erp Taalman Kip en Arnhem. — 10. F-ino W. Huisman en Hago. — 11. S-ro W. v. Ratingen en Neer, Ned. — 12. F-ino L. Vechtmann en Hago. — 13. S-ro A. Nilsson en Vallåkra, Svedujo. — 14. S-ro W. Märten en Berlino.

9-a konkurso.

La bildoj pri la bona sinjoro Adamson inspiris multajn legantojn de La Praktiko. Pluraj personoj faris beletajn versaĵojn, aliaj en sprita prozo priskribis la okazintaĵojn de tiu grava tago en la vivo de s-ro Adamson.

La juĝanta komitato decidis doni la 1-an premion (la libron Imperiestro kaj Galileano de Ibsen, trad. de Bulthuis) al s-ro C. G. Kat en Amsterdam, pro lia versa solvo:

1. Adamson sinjoro en bona humoro
Guas la trinkajon, bongustan dolĉajon.
2. Subite doloro lin trafas ĝis koro.
Adamson paliĝas, la glaso rompiĝas.
3. Ĉu estas de vino, aŭ eble veneno
La stranga dolor' de nia sinjor'?
4. Ĉar li ĝin ne fidas, li tuj nun decidis
Forĵeti la aĉan vinon malsanigan.
5. La vino elfluas, botel' malpleniĝas
Kaj li faras juron: „Neniam plu vinon!”

La 2-a premio apartenas al s-ro Fr. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Nederlando. Jen lia lerta solvo:

1. La trihara Adamson havis grandan soifon.
Ĉu brandon li trinkos?
2. Multan brandon trinkinta (Kial tion farinta?)
Li havis kapdoloron.
3. Ĉu li estas ebria? Li ne estis kvieta:
For la bona famo!
4. Tial bravan decidon: For la tutan enhavon!
Rapide elverŝi!
5. La botelo turnita, trinkajo elfluinta.
Dankon, gardaĝelo!

La ceteraj premioj apartenas al: 3. S-ro W. Klein en Berlino. — 4. F-ino E. Fischer en Vieno. — 5. S-ro M. Durand en Parizo. — 6. S-ino E. E. Morgan en Londono. — 7. F-ino M. A. C. van Zon en Amsterdam. — 8. S-ro G. Schmidt en Praha. — 9. F-ino A. H. Smith en Rotterdam. — 10. S-ro Aleksandro Beier en Cluj, Rumanujo. — 11. F-ino Chr. J. van der Hor en Amsterdam. — 12. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 13. S-ro Ch. Brunet en Bordeaux, Francujo. — 14. S-ro A. de Visser en Dordrecht, Nederl. — 15. S-ro S. Zandstra en Wormerveer, Nederlando.

10-a konkurso.

Post la publikigo de nia 10-a konkurso ni ricevis de multaj abonkolektantoj abonilojn kun multaj varbitaj abonoj. Tamen en la konkurso mem partoprenas nur 9 personoj. Kial? Ĉu oni forgesis, ke oni devas ensendi specialan liston kun la konkurs-kuponeto? Aŭ eble oni volas helpi al nia eldonejo, ne prenante la premiojn? Ni bedaŭras, ke tiuj abonkolektintoj ne povas ricevi la meritatan premion.

La 9 personoj, kiuj partoprenas en ĉi tiu konkurso kaj al kiuj ni dissendis la premiojn, estas: 1. S-ro Hans Pfiffner en Sankt-Gallen, Svislando, (kolektis 30 abonojn). — 2. F-ino Magneliä Norheim en Hamar, Norvegujo (29 ab.). — 3. F-ino S. M. Wijers en Hago (26 ab.). — 4. F-ino Margarete Saxl en Berlino (21 ab.). — 5. S-ro Gustav Johannessen en Hamar, Norvegujo (16 ab.). — 6. S-ro Carl Stöp Bowitz en Oslo, Norvegujo (14 ab.). — 7. S-ro Alfred Eckelt en Aussig, Ĉeĥoslov. (10 ab.). — 8. S-ro W. Oesterle en Berlino (10 ab.). — 9. F-ino Rita Thomas en Potsdam, Germanujo (10 ab.). — Al ili kaj al ĉiuj abonvarbitoj la eldonejo de la Praktiko diras koran dankon pro la fervora kaj bonvola helpo.

11-a konkurso.

La partoprenantoj de ĉi tiu konkurso kun pli-malpli granda lerteco fabrikis novajn vortojn el la radiko „arb”. La premiojn ricevis la jenaj personoj (kun formitaj vortoj de 61 ĝis 28):

1. S-ro F. Müller en Hannover, Germ. — 2. F-ino M. v. d. Ven en Amsterdamo. — 3. S-ro K. Grünwald en Vieno. — 4. S-ino G. Petit en Parizo. — 5. S-ro E. Martinelli en Romo. — 6. S-ro K. Nagy en Budapeŝto. — 7. S-ro S. Weiss en Zürich. — 8. S-ro W. Oesterle en Berlino. — 9. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 10. S-ro S. J. de Groot en Rotterdam. — 11. S-ro A. J. P. J. Vogel en Rijswijk, Nederl. — 12. S-ro J. Pawlowski en Varŝavo. — 13. S-ro Oskar Frode en Vimmerby, Svedujo. — 14. F-ino A. M. Jackson en Londono. — 15. S-ro A. P. G. Droste en Hillegersberg, Nederl.

12-a konkurso.

El la multaj partoprenantoj de ĉi tiu ekzameno nur 6 personoj donis la ĝustajn respondojn je ĉiuj dek demandoj. Tial nur ili povas ricevi premion. Pluraj personoj respondis nur je parto de la demandoj. Ankaŭ tiuj ne povas ricevi premion. Inter la respondoj ni trovis multajn interesajn kaj amuzajn. Ĉi tie ni donas la ĝustajn respondojn per dikaj literoj. Inter parentezoj per kursivaj literoj ni etas kelkajn interesajn respondojn:

1. Laŭ areo San Marino, laŭ loĝantaro Andorra. (*Dancigo, Albanio*). — 2. Ludoviko XIV-a. (*Napoleono*). — 3. Heinrich Heine. (*Neniŭ*). — 4. En ĉiu lando alia. La plej konataj estas: Derosne, Kammerer, Jones, Congreve, Irinyi, Boettger, Lundström. (*„Ne mi eltrovis la alumeton!”*). — 5. La pulo. — 6. La roŝtita viando. — 7. Oni mortigis lin la 15-an de Marto en la jaro 44 antaŭ Kristo. — 8. La druzoj en Sirio, la gruzoj en la Kaŭkazo. (*En Germanujo kaj Nederlando. En Francujo. Ili neniam vivis kaj neniam vivos. En la nederlanda vilaĝo Groessen. Ili vivas en la fantazio de la redaktoro*). — 9. Neniom. (*Tiom, kiom ĝiaj kolharoj pezas. Same kiel la ovo de la homo*). — 10. Savarmeo. (*La Esperantista pac-armeo*.)

La premiojn ricevis: S-ro H. Kaiser en Köln-Ehrenfeld. — S-ro Oskar Frode en Vimmerby, Svedujo. — S-ro T. Indra en Riga, Latvio. — S-ro L. Martensen en Hamburg, Germ. — S-ino Leonora Wiesenfeld en Varŝavo, Polujo. — S-ro K. Nagy en Debrecen, Hungarujo.

Koran gratulon al la sukcesintoj!

13-a konkurso.

Ĉi tiu konkurso donis denove grandan kaj utilan laboron al la diligentaj legantoj de la Praktiko, same kiel la 6-a konkurso. La juĝa komitato refoje devis forstrekii multajn punktojn. La 20 premiojn ricevis la jenaj personoj (kun trovitaj eraroj de 52 ĝis 30):

1. S-ro H. Klinger en Dresden, Germ. — 2. F-ino Chr. van der Hor en Amsterdamo. — 3. S-ro J. Andersson en Stokholmo. — 4. S-ino E. M. v. d. Graaf-Peters en Amsterdamo. — 5. S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Nederl. — 6. S-ro K. Nagy en Debrecen, Hung. — 7. F-ino E. Karlsson en Göteborg, Svedujo. — 8. S-ro P. Metzger en Leipzig, Germ. — 9. F-ino S. M. Wijers en Hago. — 10. S-ro A. Szabó en Budapeŝto. — 11. S-ro J. P. van Dijk en Rotterdam. — 12. S-ro J. Hartog en Baarn, Nederl. — 13. S-ro Andreo Rubin en Satu-Mare, Rumanujo. — 14. S-ino L. Wiesenfeld en Varŝavo. — 15. S-ro H. Tachauer en Rothenburg, Germ. — 16. Helmonda Esp. Grupeto en Helmond, Nederl. — 17. Gefratoj Fichtner en Radebeul, Germ. — 18. S-ro A. Seppel en Leisi, Estonio. — 19. S-ro Ch. Brunet en Bordeaux, Francujo. — 20. F-ino A. Bayer en St. Margrethen, Svislando.



Grava informo!

Pro la universala krizo en la Esperantistaj poŝoj ni akceptos dum ĉi tiu jaro ankaŭ duon-jarajn abonojn.
Prezo: la duono de la tut-jara abono.

LA PRAKTIKO.

Faru la kontrolon!

La solvo de la 5-a tasko:

La lastan jaron. En mian kapon. Mi sentis min. La gravan sekreton. Cion, kion vi lernis. Fari longan vojaĝon. — La tri-dekan de Junio. Tutan horon. Dudek minutojn. — Tri kilometrojn. Inter la malnovegajn murojn. — La grandan salomon. Kiun oni uzadis. 9 metrojn. 7 metrojn. 837 kilogramojn. Por savi sian vivon. 98 jarojn. Formovi la ŝrankon. — Malantaŭ la portreton. La duan sekretan pordon. Araneajn retojn. Savi sian vivon. Havas la valoron. — Kuris sub la liton. Klinis sin. Gravan historian objekton. La pantoflojn. Ni rigardis ilin. Meti en ilin. — Kvar ĉambrojn. 84,693 milimetrojn. La kelon. Ne havas fenestron. Mian vizitkarton super la pordon. — Inspiris nin. Ni metis niajn aĵojn apud la barilon. Niajn mantelojn sur la teron. Kavaliron Fortbrak. Vokis min. Paŝis antaŭ lin. Metis ŝnuron kaŭ mian kolon. Ŝtonojn en miajn poŝojn. Jetis min en la puton. 97 metrojn. 78 gradojn. — Malbonegan odoron. Vidis la kaŭzon. Kelkajn paŝojn. Jetis ĝin trans la barilon. — Ekster la ĝardenon. Freŝan aeron. Metis en liajn manojn grandan trinkmonon. La monumenton. Kontraŭ la fenestron. Inter la du maljunajn arbojn. Gravajn argumentojn. — Daŭrigi nian vojaĝon. Unu horon kaj dudek minutojn. Nur 80 minutojn. Venontan someron. Nian interesan kaj agrablajn vojaĝon.

6-a tasko.

Ni proponas al vi fari ekzercon hodiaŭ pri la prepozicioj tra kaj trans. Bedaŭrinde multaj personoj ofte konfuzas ilin, kvankam inter ili estas granda diferenco. Ni vidu:

TRA = ĉe unu fino en kaj ĉe la alia fino el. Ekz-e: Iri tra la strato = eniri en la straton ĉe unu fino kaj eliri ĉe la alia fino. — Labori tra la nokto = labori de la komenco de la nokto ĝis la fino de la nokto. — Tralegi libron = legi la libron de la komenco ĝis la fino.

TRANS = ĉe la alia flanko. Ekz-e: Trans la maro = ĉe la alia flanko de la maro. — Trans la maron = al la alia flanko de la maro. — Transiri = iri de unu flanko al la alia flanko. — Transporti = porti de unu flanko al la alia flanko, de unu loko al la alia loko.

Modela frazo: La tunelo kondukas tra la monto (KIE?) trans la monton (KIEN?) = la tunelo kondukas, enirante en la monton kaj elirante el la monto, al la alia flanko de la monto.

En la sekvanta rakonto kompletigita la vortojn kaj poste kontrolu vian laboron per nia solvo, kiu aperos en la Julia numero.

LA GENIA IDEO

(Vera historio)

Sinjoro Roberto Ver d'Orell estis studento de filozofio en la urbego P. Li t.....studis jam multajn sciencajn librojn pri la t.....morta vivo, sed kiam li t.....serĉis siajn poŝojn, li konstatis, ke per ilia enhavo li ne povos t.....vivi ankoraŭ unu semajnon sur la tero. Nur unu penso vibris t.....lia tuta cerbo: „mi bezonas monon”.

T.....la strato, en malgranda subtegmenta ĉambro, t.....kies plafono povis enflui la pluvo, loĝis lia sola bona amiko, sinjoro Arturo Elversink, oficisto ĉe la Anatomia Instituto. Lia tasko estis t.....tagoj kaj jaroj t.....skribadi sekajn raportojn pri la kadavroj, kies animoj vagadas t.....la spacoj de la t.....a mondo, sed kies muskolojn t.....tranĉadas la studentaj tranĉiloj, pro scivolo pri tio, kio estas t.....la haŭto de la homa korpo.

S-ro Ver d'Orell, dezirante t.....festeni la proksiman nokton, rapide iris t.....la straton por viziti sian amikon. Enirinte t.....la pordego li suprenkuris t.....la longa ŝtuparo kaj t.....la sloŝiltruo enrigardis en la ĉambron. T.....la pordo sidis s-ro Elversink kun ĵus t.....legita romano en la manoj.

S-ro Ver d'Orell eniris kaj eksidis sur seĝo t.....borita de vermoj. Li diris:

— T.....la tuta nokto mi maldormis. Mi t.....esploris ĉiun eblecon por venki la krizon de la poŝoj, sed vane.

— Ankaŭ mi t.....meditis la tutan nokton, sed ne venas radio de espero t.....la nigraj nuboj. Kaj mia riĉa onklo, kiu vivas t.....la oceano, ankoraŭ ne t.....paŝis la sojlon de la eterneco. Sed mi proponas, ke ni forpelu niajn zorgojn per promeneto t.....la rivero.

Ili kune iris t.....la riveron kaj promenadis, rigardante la fiŝetojn, kiuj estis videblaj t.....la klara akvo.

En momento t.....la silento sonis stranga bruoj. Ĉe la t.....a bordo la akvo plaŭdis kaj t.....la saŭmanta akvo ili ekvidis homan figuron. Ili komprenis: homo ensaltis, kompatinda viktimo de poŝa aĵo kora krizo.

S-ro Ver d'Orell rapide t.....vidis la neceson helpi, t.....ŝovis sin t.....fendo de la borda barilo kaj kiam li estis t.....la barilo, li saltis en la akvon. Li devis naĝi t.....multaj akvaj kreskaĵoj, sed fine li atingis la malfeliĉulon kaj trenis lin sur la bordon. La savita viro, post kiam multa akvo elfluis t.....lia buŝo, dankis al s-ro Ver d'Orell per elektitaj insultoj.

Post du tagoj s-ro Ver d'Orell, t.....rigardante la matenan gazeton, trovis en ĝi komunikon de la polico, ke la savinto devas tuj aperi antaŭ la polico. Frostotremo kuris t.....lia dorso, kiam li pensis pri la puno ricevota pro la savo de tiu superflua homvivo, sed t.....pensante la situacion li trovis konsolon en la espero, ke li povos senpage t.....vivi kelkajn tagojn t.....la sojlo de la malliberejo. Sed en la policejo granda surprizo atendis lin: la poliestro t.....donis al li 300 frankojn kiel premion pro la heroo ago.

T.....preninte la monon s-ro Ver d'Orell kuris t.....la stratoj al sia amiko kaj kun okuloj brilantaj t.....larmoj raportis pri la okazintaĵo.

T.....la cerbo de s-ro Elversink fulmis genia ideo. Li ekkriis:

— Amiko, ni estas savitaj! Aŭdu mian ideon: De nun ĉiutage ni promenos t.....la urbo, unu el ni saltos en la akvon kaj la alia savos lin. Tiamaniere ni ricevos ĉiutage 300 frankojn kaj ni frate dividos la monon. Kaj ni vivos senzorge, kiel la dioj t.....la nuboj de la Olimpo.

Tiel ili faris. Ili t.....donis sin tute al la ekzercado de la nova profesio. Ili savis unu la alian en ĉiu tago, sed ili t.....iris ĉiam en alian parton de la urbo, kie alia policejo estas kompetenta, kaj oni ne povas rimarki, ke la herooj de la savado estas ĉiam la samaj personoj. Poste ili eĉ t.....formis siajn eksterajojn per perukoj kaj artefaritaj lipharoj kaj barboj.

Ĉio bonege iris. Sed en unu nokto, kiam ili kun vestoj t.....penetritaj de akvo iris t.....la stratoj, ili malvarmumis. Kuŝante en lito ili t.....foliumadis gazetojn kaj hazarde trovis la interesan informon, ke personoj, kiuj eltiras el la akvo mortintan homon, ricevas premion de 150 frankoj.

Nova ideo fulmis t.....la kapo de s-ro Elversink:

— Amiko, ni ne bezonas salti plu en la riveron! Ni t.....portos al la rivero la kadavrojn el la Anatomia Instituto, ni jetos ilin en la akvon kaj poste eliros ilin per hoko. Ni ricevos nur 150 frankojn, sed almenaŭ nia sano restos sen danĝero. Kaj ni havas en la instituto multajn kadavrojn, por ĉiu nokto unu.

Tiel okazis. Ili diligente t.....migradis la urbon dum la noktoj kun siaj kadavroj kaj en la matenoj ili t.....prenadis la premiojn. Abunde venis la mono kaj s-ro Ver d'Orell eĉ povis t.....sendi al sia maljuna patrino ĉiumonate 12 frankojn.

Sed ĉiu gloro havas finon. En unu mateno, kiam la polico ekzamenis la eliritajn kadavron, oni trovis sur la plando de la kadavro la viol-koloran stampon de la Anatomia Instituto. La polico tuj t.....vidis la tutan trompon kaj s-roj Ver d'Orell kaj Elversink devis puniĝi pro sia facilanimeco.

S-ro Ver d'Orell, kiu t.....pluraj monatoj tiel sukcesplene praktikadis la savadon, ne povis sin mem savi de la malliberejo. Sed s-ro Elversink, kies kapon en la ĝusta momento ĉiam t.....fulmis la genia ideo, rapide forvojaĝis. Kien? T.....la oceanon.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



EMMANUEL GEIBEL (1815—1884)

estis eminenta poeto germana. Inter liaj postlasitaj paperoj oni trovis ankaŭ la jenan interesan leteron:

„Al sinjoro Emmanuel Geibel
poeto

Kuhberg n-ro 15.

Lübeck.

Estimata sinjoro Geibel!

Hodiaŭ ni finis la ellernadon de via poemo „Frühlingshoffnung“ Dum la lastaj ok aĝoj en nia klaso oni punis kvin lernantojn per malliberigo kaj hodiaŭ du kamaradojn per vergobatoj, ĉar ili ne povis enerare ellerni la poemon. Ĉu vi ne pensis pri tio, kiam vi skribis vian poemon? Kaj i tamen estas unu el la plej mallongaj poetoj. Schiller estas pli longa. La sinjoro profesoro diras, ke la poemo estas tre bela. Sed ekzistas multaj belaj poemoj kaj ni devas lerni ilin ĉiujn. Tial ni petas in, ke vi ne skribu plu poemojn. Militoj ĉi estas kaj ni devas lerni anlaŭ la batalojn. La geografia estas pli bona, ĉar dum la respondado ni almenaŭ povas rigardi la andkarton. Sed la versoj kaj bataloj estas a plej malbonaj inter ĉiuj. Plue, ĉiu poeto devas ankaŭ biografion kun la jaroj de la naskiĝo kaj morto. Ĉe vi ni ankoraŭ ne devas lerni la mort-jaron, kaj mi deziras, ke vi vivu ankoraŭ dum multaj jaroj.

En la nomo de miaj kamaradoj mi estas kun alta estimo:

Karl Dechmann
gimnazia lernanto
Lübeck.”

★

HONORE DE BALZAC

1799—1850),



BALZAC

la franca verkisto, faris foje pli longan vojaĝon en Aŭstrio. Eĉ unu vorton li ne sciis germane, ankaŭ la monon de la lando li tute ne konis. Tial unu el liaj konatoj demandis al li:

— Kiel vi povis pagi, se vi ne konis la monon

kaj la lingvon de la lando?

— Tre simple, — respondis Balzac. — Mi ĉiam havis ĉe mi saketon kun arĝentaj moneroj. Mi prenis la monerojn el la saketo kaj metis ilin sur la manplaton de la poŝt-veturisto, malrapide, unu, du kaj tiel plu. Dum tio mi rigardis lian vizaĝon. Kiam li komencis rideti, mi vidis, ke mi donis al li tro multe. Tiam mi rapide reprenis tri monerojn kaj mia homo estis juste pagita.

GUTTA ROTSCCHILD,

la prapatrino de la riĉega familio Rothschild, atingis tre altan aĝon. Kun 98 jaroj ŝi havis ankoraŭ tute klaran kapon kaj kiam la malsano puŝis ŝin en la liton, ŝi afable petis la kuraciston:

— Kara sinjoro doktoro, helpu min!

— Mi faros ĉion eblan, sinjorino, — respondis la kuracisto, — sed bedaŭrinde mi ne povas resorĉi al vi la Junecon.

— Ho, tian aferon mi tute ne deziras. Mi ne volas rejuniĝi, nur daŭrigi bele, malrapide la..... maljuniĝon.

★

GIUSEPPE VERDI (1813—1901),



VERDI

la fama itala komponisto kaj oper-verkisto, estis dum sia vivo unufoje ankaŭ membro de la itala parlamento. Sed li malofte vizitis la kunsidojn. La politiko ne tre interesis lin.

Tamen unufoje li diligente plenumis sian parlamentanan devon. Oni diskutis pri nova leĝ-projekto, kiu interesis ankaŭ la komponiston. La proponita nova leĝo volis enkonduki novajn impostojn kaj ĝi vekis en la parlamento grandan uraganon. La deputitoj saltis de siaj sidlokoj kaj furioze kriegis al la prezidanto:

— Ai voti! (Voĉdoni!).

Verdi miris pri ĉi tiu sceno, ne deca al seriozaj viroj, kaj en la granda bruo li forgesis, ke li estas politikisto. Vekiĝis en li la muzikisto. Li petis de la servisto paperfolion kaj rapide notis la melodion de la „Ai voti!“

La muziknotojn de la „Ai voti!“ la majstro poste donacis al sia kolego, parlamentano Piroli, sed pli poste ĝi reiris en la posedon de la familio.

Laŭ la instrukcio de Verdi oni devas kanti la gvidmelodion de la „Ai voti!“ en diversaj voĉoj kaj dum tio la akompano kun fermita buŝo murmuris.

★

ALPHONSE PAILLET (1795—1855)

franca advokato kaj jurhistoria verkisto, estis tre bonhumora homo. Foje iu demandis al li:

— Se vi estus pentristo, kiel vi prezentus la procesantojn?

Paillet respondis:

— La gajninton de la proceso en ĉemizo, la perdinton — nuda.

LOUIS MINET (1753—1845)

konata sub lia artista nomo Rosambeau, estis aktoro de la teatro Odeon en Parizo. Li estis tre malriĉa homo. Kiam li ne havis, kion doni al siaj infanoj por vespermango, li diris al ili:

— Kiu hodiaŭ ne volas vespermanĝi, ricevas unu soldon. 1)

La infanoj memkompreneble elektis la monon kaj enlitiĝis kun la feliĉiga sento, ke ili havas monon. Sed en la mateno ili estis tre malsataj. Tiam Rosambeau diris al ili:

Kiu volas matenmanĝi, tiu devas pagi unu soldon.

Tiamaniere la disdonitaj moneroj revenis kaj li ŝparis unu vespermanĝon.

1) soldo = franca monero de 5 centimoj.

★

MAX REGER (1873—1916),

la fama germana fortepian-artisto en unu el siaj koncertoj prezentis la truto-revon de Schubert. En la sekvinta tago la artisto ricevis de unu entuziasma sinjorino donace du belajn trutojn.

Reger en letero diris dankon pro la atento kaj menciis, ke ĉi tiun kazon li rigardas kiel instigon kaj kuraĝigon kaj ke en la proksima koncerto li ludos la „Bovo-menueton“ de Haydn.

★

PRINCO LUDOVIKO XVII-a (1785—1795)

estis filo de la ekzekutita franca reĝo Ludoviko XVI-a. La revolucia registaro donis al li la nomon Ludoviko Capet kaj transdonis lin por edukado al la ŝuisto Simon. Ĉi tiu tre krule traktis la malgrandan princon. En unu tago la ŝuisto diris al Ludoviko:

— Capet, kion farus vi; se la rojalisto liberigus vin?

— Mi pardonus al vi, — respondis la malgranda princo.

★

NICOLAS BOILEAU-DESPREAUX (1636—1711)



BOILEAU-DESPREAUX

estis franca poeto. Dum la lastaj jaroj de sia vivo li tute ne aperis plu en la reĝa kortego. Liaj amikoj ofte instigis lin, ke li almenaŭ kelkfoje montru sin antaŭ la reĝo. Sed la poeto rifuzis la konsilojn, respondante:

— Kion mi faru tie? Laŭdi mi ne povas plu.

la mondo ridas



Akurata kalkulado.

Kliento: Sinjoro advokato, vi kalkulis al mi tri interparolojn, sed laŭ mia memoro mi vizitis vin nur dufoje.

Advokato: Bonvolu nur rememori, ke post la lasta vizito vi revenis kaj demandis min, ĉu vi ne forgesis ion ĉe mi.

(York Star)

★

Infana fantazio.

La malgranda Paŭlo kun siaj gepatroj ŝanĝas la loĝejon. Foje ili vizitas konatan familion, kiu loĝas en ilia antaŭa loĝejo kaj kiu ĝuste nun havas novnaskitan infanon.

Dum la hejmeniro diras la eta Paŭlo:

— Vidu, paĉjo, estas domaĝe, ke ni foriris el la malnova domo. Nun ni havas la bebon.

(Tit-Bits)

★

Familia rendo.

— Kial estas hodiaŭ via edzino tiel malbonhumora?

— Unue ŝi riproĉis la servistinon; poste ŝi riproĉis min, ĉar mi ne riproĉis la servistinon. Kaj nun ŝi riproĉas al si mem, kial ŝi ne riproĉis min pli forte, ĉar mi ne riproĉis la servistinon.

(Deutsche Illustrierte)

★



Advokatoj inter si.

— Teruran malfacilaĵon mi havis hodiaŭ kun unu kliento. Li volis nepre konfesi sian krimon.

(Jugend)

La honorario.

— Kiom mi ŝuldas, sinjoro profesoro?

— Cent kronojn.

— Kiel? Mi ja estis nur dufoje ĉe vi, entute nur dum dek minutoj.

— Jes, sed ankaŭ en la atendejo vi pasigis duonan horon.

(Karikaturen)

★



Ĉe la amerika doganejo.

— Paĉjo, li ankoraŭ ne trovis la botelon, ĉu ne?

(Life)

★

Kiam la edzino kuiras.

— Imagu, edzeto, tiel bonan kukon mi bakis por vi, sed la hundeto formangis la tutan.

— Ne malĝoju, karulino. Mi aĉetos por vi novan hundeton.

(Everybody's Weekly)

★

Infana intereso.

— Paĉjo, ĉu estas vera, ke en la malnova tempo la homoj vivis dum okcent jaroj?

— Jes, fileto, ĝi estas vera.

— Kaj diru, ĉu ili devis iri en lernejon dum ducent jaroj?

★

Dubo.

— Kiom aĝa estas la onklino?

— Proksima al la kvardek.

— Ĉu de supre aŭ de malsupre?

(Journal Amusant)

Malbona sperto.

— Ĉu vi povus rekomendi al mi unu bonan hotelon?

— Pro principo mi ne rekomendas hotelon. Unufoje mi faris tion al unu amiko, sed poste mi ricevis terure malĝentilan leteron.

— De via amiko?

— Ne, sed de la hotelisto.

(Illustrierte Blatt)

★

La venĝo estas dolĉa.

— Centmil frankojn vi ricevis de la bankiero, kiel kompenso, ĉar li surpasis vin per sia aŭto!! Kaj kion vi faris per la mono?

— Mi aĉetis por mi aŭtomobilon.

(Passing Show)

★

Trafa logiko.

— Diru, patro, kiuj tiuj prauloj?

— Nu, ekzemple mi via praulo, kaj la avo praulo de ni an.

— Sed tiam homoj tiel fieraj

La nova ĉ.

— Kaj mi ankoraŭ pri unu afero: vi devas dormi sur kanapo.

— Volonte, sinjorino, nur dum tago.

(M)

★

Gramatiko.

— Diru, Tom, kiel oni la vorton „pantalono“, ĉu singularo aŭ pluralo?

— Supre en singularo, supre en pluralo.

(Everybody's Weekly)

★

Diskreta entrepreno.

Sinjorino: Espereble vi tenos en sekreto, ke vi ekstermis cimojn en mia loĝejo?

Entreprenisto: Nepre, sinjorino. Sed reciproke ankaŭ mi esperas, ke la sinjorino rekomendos nian firmon al siaj amikoj kaj konatoj.

(Nagel's Lustige Welt)

★

Prokrasto.

Sinjorino: Ĉu vi diris al la laktisto, ke la hodiaŭa lakto estis acida?

Servistino: Ho, sinjorino, mi petas, ni atendu kelkajn tagojn, ĉar li promesis inviti min al kino.

(London Opinion)



La ĉarmo.

— Vidu, najbarino, iom post iom ankaŭ ĉi tiuj modernaj junulinoj ekkomprenas, ke nur la longa vesto kaj longa haro donas al la virino ĉarmecon.

(Gringoire)



Kursoj en Rakvere (Estonio). — S-ro Hendrik Rikand (signita per X), estinta poŝtestro de Tallinn, instruisto de la Cseh-Instituto, gvidis bonsukcesajn komencan kaj daŭrigan kursojn en Rakvere. La komenca kurso komenciĝis kun 24 kaj finiĝis kun 36 kursanoj. S-ro Rikand lernis Esperanton en la jaro 1929 kaj dum la lastaj jaroj faris plurajn sukcesplenajn kursojn en diversaj urboj de Estonio. En liaj kursoj ofte partoprenis ankaŭ simplaj kamparanoj.



S-ro Willy Burgemeister el Ĉeĥoslovakio, fervora propagandisto kaj Cseh-metoda instruisto, komencis someran propagandovojaĝon tra la sveda provinco Vermlando. Lia akompananto estas s-ro Lars Andersson el Høje, Svedujo.




Okaze de la 5-a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Olomouc (15-16. Majo) oni starigis memorŝtonon kaj oni plantis Esperanto-arbon. Nia bildo montras la ŝtonon kaj (maldekstre) la arbon.



Maldekstra bildo: Grupo de Esperantistaj leterportistoj, deĵorantaj ĉe la Amsterdama ĉefpoŝtoŝticejo. En Amsterdamo estas nuntempe 24 leterportistoj, kiuj portas la verdan stelon sur la maniko. Aliaj 60 leterportistoj nun lernas Esperanton en kursoj.



Kurso en Österbybruk, Svedujo. — S-ro Petrus Fredlund, Cseh-metoda instruisto el Örbýhus, Svedujo, gvidis dum la lasta vintro kursojn en kelkaj urbejoj de Svedujo. Ĉi tiu bildo montras la kursancon de la kurso en Österbybruk. En Svedujo la Esperanto-movado estas tre vigla. Multaj kursoj okazas precipe en la malgrandaj urboj kaj en la vilaĝoj. Multaj studrondoj funkcias en la laboristaj organizaĵoj.



Punt-plekta kurso por Esperantistinoj en Tallinn (Estonio), gvidata de s-ino F. Gutman (straranta). De dekstre la tria sidantino estas s-ino Helmi Dresen, ĉefdelegitino de UEA por Estonio, la kvina estas s-ino Hilda Deesen, kiu riciĝis la Esperantan literaturon per lertaj tradukaĵoj el la estona literaturo. Ĉiuj puntoj, kiuj estas videblaj sur la muro, estas faritaj de la partoprenantinoj de la kurso.



Esperanta kurso por infanoj en Buczacz (Polujo). La kurson gvidis nia fervora propagandistino f-ino Leonja Fruchtoŭna, instruistino de la Cseh-Instituto, kiu dum la lastaj monatoj gvidis sukcesplenajn kursojn ankaŭ en la polaj urboj Czorków kaj Borszczów. Sur nia bildo f-ino Fruchtoŭna sidas en la mezo maldekstre.



Klubfonda festo en la urbo Kolding (Danujo). — Post sukcesplena kurso de nia senlaca pioniro s-ro Ajo el Germanujo (sidanta en la mezo), oni fondis Esperanto-klubon en la dana urbo Kolding. S-ro Ajo gvidis kursojn ankaŭ en la danaj urboj Aalborg kaj Aarhus kaj baldaŭ li komencos kursojn en Randers. Poste li gvidos someran kurson.

ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

En tiu urbo mi konas eĉ ne unu personon. — En ĉi tiu frazo la vorto „eĉ” estas en malĝusta loko. Ĝi devas esti antaŭ la vorto „unu”. Ankaŭ la vorto „ne” estas en malĝusta loko. Ĝi devas esti antaŭ la verbo, ĉar la verbo, la ago mem estas neata. Do la korekta frazo estas: *mi ne konas eĉ unu personon*.

Ili droniĝis. — Malĝusta verbo. Oni devas diri nur „dronis”, ĉar la verbo „droni”, estas netransitiva. En korekta maniero oni diras do: „li dronas” kaj „li dronigas alian homon”.

La ĉielo estis kovrita per nuboj. — Vidante ĉi tiun frazon oni devas pensi, ke iu persono kovris la ĉielon per nuboj. Sed se la nuboj mem kovris la ĉielon, ni devas diri: „kovrita de nuboj”. La regulo estas, ke ĉe la pasivaj verboformoj la aganto ricevas la pozicion „de”.

INFORMOJ

Strato „ZAMENHOF”. — La urbestro de Olomouc (Ĉeĥoslovakujo) donis al unu strato la nomon „Zamenhof” okaze de la 5-a Ĉeĥoslov. Esp.-Kongreso dum la lasta pentekosto. Ĉe la solena inaŭguro kiel eksterlandanoj ĉeestis f-ino M. L. Root en Usono kaj D-ro Abe el Mukdeno.

En Dunkerque (Francujo) s-ro Jens Schjerve gvidos kurson de la 10-a ĝis la 24-a de Junio. La kurson organizas la tiea Esp-Grupo kune kun la Kongresa Komitato de Parizo.

En Vieno (Aŭstrio) ges-roj Morariu la 11-an de Junio finos la kursojn.

En Londono s-ro M. C. Butler, sekretario de la Brita Esp-Asocio, faris dum la lastaj semajnoj 20 Ĉeĥ-metodajn provlecionojn en diversaj grupoj, por montri la ideon de la kursmetodo.

En Danujo f-ino Elinjo Pahn kun granda sukceso faris propagandan rondvojaĝon dum la monato Majo. Ŝi vizitis la urbojn Holbæk, Kopenhago, Aarhus, Aabyhøj, Aalborg, Nørresundby, Randers, Hobro, Kolding, Odense, Vallekilde kaj Helsingør. Ŝi faris ĉie interesajn paroladojn pri Esperanto kaj pri sia hejmlando Estonio. F-ino Pahn estas nun en Helsingør, kie ŝi studas la organizon de la tiea fama internacia altlernejo. — La tre efikan rondvojaĝon senlace kaj tre lerte organizis s-ro Holger Hansen, prezidanto de la „Holbæk Esperanto-Klubo”, reprezentanto de la Centra Dana Esp. Ligo por eksterlandaj paroladvojaĝantoj.

En Nederlanda Hindujo estas pluraj kursoj por eŭropanoj kaj indiĝenoj. En Sambodja (Borneo) 60 indiĝenojn instruas s-ro D. M. Pot, kunlaboranto de la Ĉeĥ-Instituto. En Balikpapan (Borneo) f-ino M. Suraab gvidas kurson. Estas granda intereso kaj rapida progresado en la lingvo.

La bulgara registaro por Esperanto. — La ministerio de Publika Instruado en Sofio per speciala letero de la 8-Marto rajtigis s-ron I. H. Krestanov, lektoron de fremdlingvoj, fari en ĉiuj mezlernejoj de Bulgarujo paroladojn pri la temo: „Esperanto kiel faktoro de klerigo”, kun demonstracioj kaj bildoj. La ministerio rekomendis la paroladon al la gimnaziaj direktoroj kaj faciligis la veturadon de s-ro Krestanov sur la bulgaraj fervojoj.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

S-ro K. R. en S. (Ned.). — „Krom” kaj „escepte”. — „Krom”, prenita el la slavaj lingvoj, havas du signifojn. Tion duoblan sencan oni trovas ankaŭ en multaj aliaj lingvoj ĉe la korespondaj vortoj. La du signifoj estas:

1. Ne nur ..., sed ankaŭ ... Ekz.: Krom rozoj, mi havas ankaŭ multajn aliajn florojn en mia ĝardeno.

2. Escepte, sed ne ... Ekz.: Mi prizorgis jam ĉiujn miajn florojn, krom la rozoj.

„Escepte”, derivita de la verbo „escepti”, havas nur la duan sencan de „krom”. Se la uzo de „krom” povas kaŭzi miskomprenon, la uzo de „escepte” povas forigi la konfuzon. Ekz-e: Krom mono li posedas ĉion, kio povas feliĉigi homon. Legante ĉi tiun frazon oni dubas, ĉu „li” havas monon aŭ ne. Se li ne havas, estas pli bone uzi la vorton „escepte”. Sed en multaj kazoj la kunteksto mem jam sufiĉas por distingi la signifon de „krom”.

Sendube estus tre utile, se oni uzus la vorton „krom” nur en la unua signifo kaj por la dua signifo oni uzus la vorton „escepte”. Do via klopodo estas aprobinda.

S-ino J. W. v. d. B. en D. (Ned.). — La vorto „jamboreo” signifas skoltan kunvenon en tendaro. — 2. La vorto „trajno” signifas ankaŭ fervojan vagonaron. Vidu en la Plena Vortaro. — Kvankam ni estas pacifistoj, tamen ĝojigas nin via informo, ke viaj klubanoj batalas por povi baldaŭ legi la Praktikon. Saluton al ĉiuj!

S-ro A. H. en L. (Ned.). — „Vojevodo” en Polujo estas estro de provinco.

Nova, maljuna Esp-isto en H. (Norvegujo). — 1. Bonvolu diri: „tiu estas mia ĉdzino” aŭ „ŝi estas mia ĉdzino”. — 2. En Esp-o ni diras „lordo”, same kiel „grafo”, „barono” k.t.p.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

EDZIĜO. — F-ino Niesje Elizabeth Stroo kaj s-ro Jan Tromp geedziĝis la 22-an de Junio en la ned. prot. preĝejo de Zaandam (Nederlandoj).

SKOLTA TENDARO ESPERANTISTA. — La Skolta Esp. Rondo de urbo Szeged (Hungarujo) okazigos Esp-and tendaron dum la tagoj 5-17. Julio 1932, apud la urbo Szeged. Partopreni povas ĉiu organizita skolto. Kosto: por unu tago kaj unu persono nur 1.— hung. pengo (loko en tendo kaj la tri manĝoj). En Hungarujo fervoja rabato. Okazos konkursoj kun premioj. Skoltoj dezirantaj partopreni anoncu sin tuj ĉe: skolto Ernest Farkas, Kecskeméti-utca 12, Szeged, Hung.

ADRESSANGO. — La adreso de s-ro Paŭlo Tolnai, kiu kolektas la abonojn por la Praktiko en Hungarujo, de nun estas: Budapest VII, Mexikóit 58.

SENPAĜAJ SPECIMENOJ. — Por komplezi al niaj abonantoj ni dissendos senpage specimenajn ekzemplerojn de la Praktiko al tiuj adresoj, kiujn niaj abonantoj sendas al ni. Oni sendu al ni nur seriozajn adresojn de personoj, kiuj supozeble havas intereson pri la Praktiko. Oni bonvolu skribi tre klare, laŭeble per skribmaŝino. Skribante per plumo oni imitu presitajn literojn. La eldonejo.

BONAN KORON havas ĝis nun f-ino E. Krieger en Hagoo, f-ino Alice Herz en Berlino kaj f-ino Chr. v. d. Hor en Amsterdamo, kiuj bonvolis pagi unujaran abondon por malriĉaj samideanoj. Ni diras al ili koran dankon en la nomoj de la feliĉigitaj novaj abonantoj, kies nomojn ni komunikos al ili. La eldonejo de la Praktiko.

D-ro EDMOND PRIVAT:

Esprimo de sentoj en Esperanto

La fama libro, kiu entenas la interesan universitatan kurson de D-ro Edmond Privat.

Tre utila por personoj, kiuj preparas sin al ekzamenoj.

Prezo: - 75 guld.

Mendebila ĉe LA PRAKTIKO.

Al niaj abonantoj afrankita sendo.

ESPERANTO-LINGVA

gramofondisko

Sur unu flanko: la Esperantista himno (Muziko de F. de Ménil), sur la alia flanko: Bildario el la opero „La sorĉa fluto” de Mozart (Kanto de Georg Gutzmer)

Prezo: 2.50 guld.

Mendebila ĉe LA PRAKTIKO.


Al niaj abonantoj afrankita sendo.

PANORAMO




La eskimo-infanoj sučas ordinare dum 6-7 jaroj. Sed ekzistas ankaŭ 10-jaraj infanoj, kiuj ankoraŭ ĉiam sučas. Ofte okazas, ke eskimo-knaboj tuj post la suĉado metas en la buŝon la pipon.

★



En Nordafriko ekzistas rivero, en kiu fluas vera inko. La rivero estas la kunfluo de du aliaj riveroj, el kiuj unu enhavas multan *gajl-acidon*, la alia multan *feron*. Ĉi tiuj du substancoj kune donas la inkon, same kiel en la fabriko. Per la natura inko de la nomita rivero oni povas skribi, sed ne tre bone.



En la pasinta jaro mortis en Vaŝingtono unu junulo 17-jara, kiu havis la koron en la dekstra flanko. Kiam li naskiĝis, la kuracistoj deklaris, ke li ne povos vivi pli longe, ol dum unu jaro. Kiam li havis 15 jarojn, komencis aperi gravaj malordoj en lia sang-cirkulado kaj la funkciado de lia koro pli kaj pli malfortiĝis.

★



En la longa kolo de la estas nur sep vertebroj, kiel en la mallonga kolo muso.

★



La amerika scienculo W. N. Kellogg faras interesan eksperimenton. Li edukas simian idon tute same kiel homan infanon: simio-bebo havas belan infan-veturilon, ludilojn kaj vartistinon eĉ lud-kamaradojn. La profesoro esperas, ke la malgranda orangutango per tia edukado ricevos homajn ecojn kaj ellernos la homan parolon.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Aprila numero!

28-a konkurso.

ENIGMO

Am, bo, bo, bro, ci, co, el, fla, fo, foj, go, go, jo, jo, ka, ka, ka, ki, ko, ko, ko, kre, kri, kro, la, lo, lo, ma, mo, mo, mu, no, no, no, no, no, per, pi, pi, pil, pla, po, pra, ra, ro, so, so, so, ste, ŝar, ta, ti, to, to, to, tro, va.

El ĉi tiuj 60 silaboj faru 30 dusilabajn vortojn, kun signifoj:


- | | |
|------------------------|----------------------------|
| 1. Nomo de monato. | 16. Reĝa seĝo. |
| 2. Sur la ĉielo estas. | 17. Malpura besto. |
| 3. Parto de la urbo. | 18. Danĝera fiŝo. |
| 4. Kreskajo ĉe akvoj. | 19. Koloro. |
| 5. Trinkajo. | 20. Arbo. |
| 6. Birda korpoparto. | 21. Trinkilo. |
| 7. Nomo de fiŝo. | 22. Hunda parolo. |
| 8. Stelema birdo. | 23. Demanda vorto. |
| 9. Skribilo. | 24. Parto de la korpo. |
| 10. Mambesteto. | 25. Lita besteto. |
| 11. Naĝanta ponto. | 26. Malbona ago. |
| 12. Ludilo. | 27. Sur la piedo estas. |
| 13. Piedvesto. | 28. Vestpurigilo. |
| 14. Montra vorto. | 29. Manĝajo de ĉevalo. |
| 15. Staranta akvo. | 30. Ĉiam mankanta objekto. |

La triaj literoj de la 30 vortoj donas la titolon de interesa originala romano en Esperanto, kun la nomo de la aŭtoro.

Al la solvintoj ni donos 10 premiojn. Oni bonvolu ensendi la solvojn ĝis la 15-a de Aŭgusto.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn kaj ne forgesu aldoni la konkurso-kuponeton.

29-a konkurso.



Ĉi tiu viro staras precize sur la suda poluso, la 1-an de Aprilo. Li rigardas la sunon. Nia demando estas: En kiu direkto rigardas la viro? Ĉu al oriento, aŭ al okcidento?

Per 5 premioj ni rekompencos tiujn, kiuj sendas al ni la ĝustan respondon. Oni bonvolu atentigi la ĝeneralajn regulojn.

Ni akceptas respondojn ĝis la 15-a de Aŭgusto.

30-a konkurso.

Serĉu la preserarojn!

En ĉi tiu numero de la Praktiko estas kelkaj preseraroj. Bonvolu serĉi ilin!

La malĝustaj literoj kune donas unu gravan kaj interesan vorton. Kiu vorto estas tiu grava vorto?

Inter la solvintoj ni dislotos 10 premiojn. Limtempo por ensendi la solvojn: la 15-a de Aŭgusto.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn! Algluu la kuponeton!

31-a konkurso.

→	13	4	12	17	2	13	10	20	7	1
15	4	5	1	4	14	4	22	13	4	10
11	4	13	11	15	4	5	1	4	9	13
13	3	10	16	4	8	19	4	14	10	4
10	13	1	18	2	5	10	15	10	5	13
2	10	7	5	5	2	13	2	6	7	2
17	2	3	7	15	10	13	13	2	18	5
8	17	7	16	7	15	9	4	12	2	11
4	8	21	15	12	17	13	12	14	5	16
17	4	17	8	10	2	5	15	10	13	7
8	10	7	17	5	4	15	10	9	8	10

En ĉiun kvadraton enmetu unu literon kaj poste legu ilin laŭ la direkto de la sago. La tuta teksto donas vortojn de Tolstoj.

Ŝlosil-vortoj:

- 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7 = nomo de tago.
 8, 9, 10, 11, 12, 13, 7 = la plej ĝentila meblo.
 14, 15, 4, 16, 4, 17, 7 = la viroj portas ĉe la kolo.
 18, 2, 15, 4, 19, 7 = besto kun tre longa kolo.
 8, 20, 10, 9, 17, 15, 7 = la reĝo tenas en la mano.
 21, 10, 22, 3, 7 = la plej kara loko.

Al la ensendintoj de la ĝusta solvo ni donos 10 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Aŭgusto.

Observu la regulojn, algluu la kuponeton.

32-a konkurso.

Kiu estis la plej diligenta?

(La konkurso de la konkursoj)

Ni deziras per apartaj donacoj premii tiujn fidelajn legantojn de la Praktiko, kiuj plej diligente partoprenadas en niaj konkursoj. 15 premiojn ni disdonos al tiuj personoj, kiuj dum la jaro 1932 plej ofte partoprenis kun bona solvo.

Speciala celo de ĉi tiu konkurso estas, ke ankaŭ tiuj personoj ricevu premiojn, kiujn ne favoris la sorto ĉe la dislotado de la premioj, kvankam ili ensendadis ĝustajn solvojn.

Reguloj de partopreno: 1. Ĝis la 15-a de Januaro 1933 bonvolu sendi al ni la liston de tiuj konkursoj aperintaj en la Praktiko dum la jaro 1932, en kiuj vi partoprenis kun ĝusta solvo. Vi ne bezonas ripeti la solvojn mem, sufiĉas skribi nur la numerojn de la konkursoj.

2. Post ĉiu konkurso-numero aldonu, ĉu vi ricevis premion en tiu konkurso, aŭ ne.

3. Algluu la kuponon de ĉi tiu konkurso kaj plenumu la ĝeneralajn konkurso-regulojn.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ANGLUJO

London, W.C. 1. — S-ro Charles G. Stuart-Menteth, 31 Upper Bedford Place. — Sperta Esp-isto. Dez.kor. kun komencantoj, prefere italoj.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Falkenau-Kittlitz 70. — S-ro Franz Knobloch, 20-jara drogisto. — L, PI, k.ĉ.l.

DANUJO

Ĉe-kursanoj de s-ro Ajo dez. koresp.:

Aalborg. — S-ro Kofed Larsen, redaktoro, Elmealle, „Karito”.
Aalborg. — S-ro S. C. Sørensen, lernejestro, Kong Hansgade, „Marie”.
Aalborg. — S-ro G. Sæmer, instruisto, Borgergade 20.
Aalborg. — S-ro C. Mathiasen, instruisto, Karlundvej 3.
Aalborg. — S-ro Selma Gunvald, instruisto, Algade 65.
Aalborg. — S-ro G. Steffersen, instruisto, Hasseris, Egholmsvej 16.
Aalborg. — S-ino P. Christiansen, Poul Buaasvej 38-2.
Aalborg. — S-ro Lars Petersen, tipografo, Reberbansgade 56.
Aalborg. — S-ro Torvald Andersen, kontoristo, Skalborg, Sofieendal Skole.
Aalborg. — S-ro Nikolai Jensen, 31-jara tipografo, Schleppegrellsgade 3. — L, PI, kun Aŭstrio, pri Vieno kaj pri socialistaj temoj.

GERMANUJO

Berlin-Halensee. — S-ino Lotte-Ruth Hoffnung, Seesenerstrasse 67. — 27-jara. L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Berlin-Treptow. — F-ino Margot Rudloff, 25-jara oficistino, Baumschulenstrasse 103. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Chemnitz. — Multaj partoprenintoj el la Ĉe-metodaj kursoj de s-ro Morariu, diversaj kaj diversprofesiaj, dez.kor. per L kaj PI (bfl) k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Adreso: S-ro C. Feder, Altenhainerstrasse 34 II.

ISLANDO

Kópavogur v. Reykjavík. — Anoj de la societo „La Verda Rondo” dez.kor. per L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., ankaŭ pri ŝako.

NEDERLANDO

Neer (Limburg). — S-ro Willem van Ratingen, 28-jara fraŭlo, dez.kor. kun Nederlandaj Esperantist(in)oj, kiuj studas por la Esperanta B-diplomo.
Rotterdam. — S-ro Theo v. d. Berg, 22-jara laktovendisto, Haagscheveer 11. — L, k.ĉ.l., pri Esperant-lingva scenludado.
Rotterdam. — F-ino Ali van den Heuvel, 24-jara daktilografino, Wolphaertsbocht 13. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Schiedam. — S-ro S. Geertsema, lernejestro, Singel 82. — K.ĉ.l. kun kalvinistoj pri kalvinismo.

NORVEGUJO

Hamar. — S-ro Michael Ekdahl, 33-jara fervojisto. — L, PI, kun Aŭstralio, Anglujo, Francujo kaj Germanujo.
Hamar. — S-ro Folke Hager, 29-jara fervojisto, Br-by.

POLUJO

Warszawa. — S-ro Ludwik Kolodziejski, 35-jara pentristo, Czerska 2-11. — PI, kun ekstereŭropaj landoj (bfl.), pri aktualaj politikaj kaj sociaj temoj.
Wilno. — S-ro Salomon Szyk, 23-jara studento, Zawalna 58. — PI kun Japanujo, Ĉinujo, Argentino, Meksiko, pri turismo, sporto kaj florkulturo.

PORTUGALUJO

Setubal. — S-ro Manuel Francisco Palma, urbodoma skribisto, Parque das Escolas 25. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

RUMANUJO

Satu-Mare. — S-ro Ludoviko Kerekes, 25-jara hungara seruristo kaj aŭtomobil-kondukisto, Strada Decebal 22. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

SVEDUJO

Högsjö. — S-ro Tore Hallerström, 25-jara komercisto, Fabriken. — L, PK, PI, k.ĉ.l. precipe sudeŭropaj kaj ekstereŭropaj, p.ĉ.t.
Stabbarps Gruva. — S-ro Albert Månsson, 30-jara elektristo, Stabbarp.

La fama supera lernolibro:

PAUL FRUICHTIER:

KOMPLETA GRAMATIKO

KAJ

VORTEFARADO DE ESPERANTO

reviziita kaj kompletigita de

S. GRENKAMP-KORNFELD, L.K.

estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.50 ned. guld.

Al la abonantoj afrankita sendo.

PRAKTIKU ESPERANTON EN LA IDEALAJ KONDIĈOJ

Parolu al ĉiuj nacioj en la

PARIZA KONGRESO

30 Julio—6 Aŭgusto 1932

Ĉiu kongresano ricevas regule la ilustritan Kongresan Gazeton, belan gvidlibron pri Parizo, kongresajn libron kaj raportaron, grandan fervojan rabaton en multaj landoj (50 % en Francujo); krome, li povos ĉeesti la kongresan teatraĵon (famaj aktoroj) kaj la kongresan balon, kaj aŭskulti ĉiutage intereseĝajn prelegojn kaj debatojn en Esperanto.

La Loka Kongresa Komitato organizas tre malkaran hotelservon, kaj ankaŭ malkarajn ekskursojn al Versailles kaj Fontainebleau, kaj tra Parizo.

Por ĉiuj detaloj skribu al la Ĝenerala Sekretario, XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto, 24, rue St.-Victor, Paris V.

SEMAJNFINA KUNVENO en la Esperanto-Domo en Arnhem 18-19 Junio 1932

Programo:

18. Junio, sabate:

Posttagm. 4-a horo: Parolado de s-ino Julia Isbrücker pri la Coué-metodo (sanigo per aŭtosugesto) kaj ĝia praktika aplikado. (Enirprezo -.25 guld.)

Vespere 8-a horo: **Amuza vespero.** Prezento de la teatraĵo „En 1950”, originale verkita de s-ro G. van Goethem, Aktiva Membro de la Cseh-Instituto. Post la prezentado **danco.** (Enirprezo inkl. imposto: -.50 guld.)

19. Junio, dimanĉe:

Matene komuna ekskurso.

Partoprenantoj bonvolu frue rezervigi por si la ĉambron.

Favoro por la partoprenantoj: la hotelo de la Esperanto-Domo kalkulas la malaltigitan (pensionan) prezon.

La **ESPERANTO-DOMO**, en la mezo de belega vasta parko, estas malfermita dum la tuta jaro. En la domo estas kursejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro fluenta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5-10 personoj en unu ĉambro): 2.- ned. guld., (2-4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. **Lunĉo:** -.75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro.

Servomono 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26060

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO NEDERLANDA TERITORIO.

La Nederlanda Delegitaro de UEA aŭtable invitas ĉiujn UEA-anojn al la
Teritoria Jarkunveno
la 2-3. Julio 1932 en la Esperanto-Domo en Arnhem.
ARANĜOJ:

SABATE: 16-a horo: **KUNVENO DE LA DELEGITARO.** (Ĉiu UEA-ano povas ĉeesti kiel aŭskultanto.)

18-a horo: **KOMUNA TAGMANĜO** en la restoracio de la Esperanto-Domo. (Tiuj, kiuj deziras partopreni, bonvolu anonci sin rekte al ges-roj de Gorter, Esperanto-Domo, Arnhem, kelkajn tagojn antaŭ la dato. Prezo: 1.50 guld.)

19-a horo: **MEMBRO-KUNVENO** de la Nederlanda Teritorio de UEA. (Tagordo: Malfermo. Kantado de „La Espero”. Parolado de la ĉefdelegito. Elekte de nova kas-kontrola komitato. Ronddemando. Fermo.)

20-a horo: **PUBLIKA KUNVENO. FESTVESPERO KUN DANCADO**, deklamado kaj gaja intima kunesto de la Esperantistoj de Arnhem kun tiuj gesamideanoj, kiuj en la sama tago faris la ekzamenon en Nijmegen. Ĉi tiu vespero estos **UEA-festo** kaj ni kore invitas al ĝi la tutan Esperantistaron, ankaŭ tiujn, kiuj ne estas anoj de UEA. — **PROGRAMO:** Kantado de Esp. horo sub gvidado de s-ro Jens. Parolado de Andreo Cseh. Muziko (orkestro de Arnhemaj samideanoj). Parolado de la ĉefdelegito. — Post la programo danco.

DIMANĈE: Matene la Geesperantistoj kolektiĝos laŭ indiko de nia Arnhemaj Delegito, s-ro D-ro C. Baart de la Faille, donota en la publika kunveno sabat-vespera. **EKSKURSO** al la „Steenen Tafel” sub gvidado de la loka Delegito. Tie ni trinkos la kafon. Poste promenado al restoracio „Waterberg” por lunĉi, post kio ni vizitos la Muzeon Parkon. (Tiuj, kiuj volas lunĉi en la Esperanto-Domo, anoncu sin jam sabat-vespere ĉe s-ro de Gorter.)

Gesamideanoj! La Arnhemaj Gesamideanoj kiel eble pleje aĝrabligos al vi la restadon kaj ankaŭ la Cseh-Instituto faros sian eblon kontentigi vin.

Vi grandnombre venu al nia bela urbo Arnhem, por esti dum kelkaj horoj en la societo de tiuj, kiuj dum la pasinta vintro tiel fervore laboris por la sola vera internacia ligo Esperantista: la Universala Esperanto-Asocio!!

JAKOB TELLING ĉefdelegito de UEA
Bellevijsstraat 36, Rotterdam.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
7-a numero



Julio
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POŬTĈEKKONTO
162626

Bela donaco.

Niaj legantoj sendube rimarkis inter la anoncetoj en la Maja numero de la Praktiko nian modestan demandon: „Kiu havas bonan koron?” Ni petis niajn bonkorajn legantojn, ke ili pagu la abonon anstataŭ kelkaj malriĉaj samideanoj.

Nia peto havis eĥon. Pluraj legantoj sendis al ni abonpagon kaj ni povis noti senpagan abonon al pluraj samideanoj malriĉaj, inter ili kelkaj, kiujn grava malsano ligas longe al lito. Ĉi tie ni esprimas koran dankon al la bonkoraj donacintoj, ankaŭ en la nomo de la ĝojigitaj novaj abonantoj. Ni estas feliĉaj vidante la pruvojn de bonfaremo kaj samideana solidareco.

Ni devas aparte raporti pri eksterordinara donaco, kiu certe surprizas nian legantaron. Unu grandanima abonantino de la Praktiko, kiu bedaŭrinde malpermesis publikigi sian nomon, sendis al ni grandan sumon kun la jena letero:

„Ne por montri bonan koron, sed por pruvi mian grandan ŝaton al via grandioza instrua kaj amuza gazeto La Praktiko, mi sendas al vi 200 dolarojn. Per tiu sumo mi pagas por 400 malriĉaj samideanoj la duonon de unu jarabono, tiel, ke la alian duonon pagu la abonantoj mem. La Praktiko devas

esti en la manoj de ĉiu Esperantisto, kiu volas lerni kaj ridi.”

Ni publike esprimas ĉi tie koran dankon al la nobla donacintino, kaj por sekvi la belan ekzemplon, ankaŭ ni, la eldonejo de la Praktiko, decidis simile pagi la duonon de la jara abono por 100 malriĉaj samideanoj. Do entute 500 personoj povos ĝui la favoran abonon.

En interkonsento kun la donacintino ni aranĝas la disdonon de la donaco en la plej simpla maniero:

Ĉiu persono, kiu deziras la favoran abonon, sendu al la eldonejo de la Praktiko 10 (dek) tiajn poŝtmarkojn de sia propra lando, per kia oni aŝrankas simplan leteron al eksterlando. — Detalajn informojn oni trovas en la interna parto de ĉi tiu numero.

Kaj nun ni petas niajn ŝatatajn legantojn: bonvolu atentigi pri ĉi tiu donaco tiujn gesamideanojn, kiuj suferas pro la ekonomia krizo kaj pro la falo de la naciaj valutoj.

Ĉi tiun okazon vi povas uzi ankaŭ por fari al viaj ĝeamikoj ŝatindan donacon, pagante anstataŭ ili la duonon de la jarabono.

Ni gratulas al la 500 bonŝancaj novaj abonantoj!

LA PRAKTIKO.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.), por duonjaro la duono. — Unu numero kostas -25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE KIAJ KONKURSOJ

ATENTU!

Ni rimarkas, ke multaj partoprenantoj de niaj konkursoj ne atentis la regulojn. Ni ofte ricevas plurajn solvojn sur unu paperfolio, aŭ solvojn sen nomo kaj adreso de la solvinto. Ĉe ĉi tiu konkurso ni atentigas ĉiam pri la ĝeneralaj reguloj kaj ni insiste rekomendas plenumi la regulojn, ĉar la juĝanta komitato ne konsideras la nekonformajn solvojn. — La redakcio.

14-a konkurso.

La solvo de ĉi tiu konkurso estas: „Se vi volas esti perfekta Esperantisto, vi devas ĉiutage fari praktikon en la lingvo.“ — El la multegaj solvintoj la sorto favoris per premio la sekvantaj: S-ro H. Bense en Friedland, Germ. — F-ino L. Le Blanc en Parizo, Francujo. — S-ro A. Csáder en Bratislava, Ĉeĥosl. — S-ro G. Das en Kalkwijk, Nederl. — S-ro G. C. van Diest en Hago. — S-ino K. Flodkvist en Eskilstuna, Svedujo. — S-ro B. Giedra en Raseiniai, Litovujo. — S-ro B. J. von Hebel en Groningen, Nederl. — S-ro J. v. d. Plas en Rotterdam. — F-ino J. Schouten en Santpoort, Nederl. — F-ino J. v. d. Velde en Rotterdam. — S-ro H. C. Vlaskamp en Rotterdam.

15-a konkurso.

La rezulto de ĉi tiu konkurso estas treege interesa. Kvankam la bildo estis sufiĉe klara, ni ricevis tamen la plej diversajn respondojn. La ĝusta respondo estas: La bildo montras sep infanojn. Sed ni ricevis ankaŭ tiajn respondojn: Unu, tri, ses, ok, naŭ, tridek-ses, nenio. — La dek premiojn ni dislotis inter tiuj personoj, kiuj donis la ĝustan respondon: sep. — La premiojn ricevis: F-ino A. Bayer en St. Margrethen, Svislando. — F-ino E. Berry en Haslingden, Anglujo. — F-ino M. Bronger en Voorburg, Nederl. — S-ro J. P. van Dijk en Rotterdam. — Helmonda Esp. Grupeto, Helmond, Nederl. — F-ino Ali v. d. Heuvel en Rotterdam. — F-ino Velta Indra en Riga, Latvujo. — F-ino A. Kramer en Arnhem. — S-ro A. Oosterwijk en Rotterdam. — S-ro A. Sommer en Hagen, Germ.

16-a konkurso.

La juĝanta komitato devis forjeti multajn respondojn, ĉar ili ne estis konformaj al la kondiĉo: doni precizan daton kun jaro, monato kaj tago. Oni donis respondojn ĝeneralajn, ekzemple: „La tago, kiam la mondo kreiĝis“, „la unua tago de la unua jaro“, „tiu tago, en kiu la unua homo aperis“ kaj tiel plu.

La premiitaj respondoj sonas jene: „La 1-a de Januaro 1932, ĉar en tiu tago komenciĝis La Praktiko, tra kiu oni povas vidi la tutan mondon.“ — „La 12-a de Oktobro 1942, kiam Kolumbo malkovris Amerikon, ĉar se tio ne estus okazinta, la Esperantista stelo havis nur kvar pintojn.“ — „La 28-a de Junio 1919, ĉar en tiu tago finiĝis la granda milito.“ — „La 15-a de Decembro 1859, ĉar en tiu tago naskiĝis Zamenhof.“ — „La 5-a de Aŭgusto 1905, ĉar en tiu tago en Bulonjo-ĉe-maro oni pruvis al la mondo, ke la problemoj de la mondlingvo estas solvitaj.“ — „La 5-a de Decembro 1878, ĉar en tiu tago la juna Zamenhof kun siaj kamaradoj festis la naskiĝon de la mondlingvo kaj bongusta kuko de bonkora patrino de Zamenhof plibonigis la humoron de la malmultaj gastoj.“ — „La 15-a de Decembro 1859, ĉar tiam naskiĝis Zamenhof, kaj la 2-a de Oktobro 1884, ĉar en tiu tago naskiĝis mi, s-ro B. de Regt.“

La 15 premiojn ricevis la jenaj personoj: S-ino A. M. G. Bergsma-Bonting en Hago. — S-ino E. Gross en Berlino. — Gefratoj Fichtner en Radebeul, Germ. — S-ro A. de Groot en Amsterdam. — S-ro J. Patalong en Bydgoszcz, Polujo. — F-ino M. Fuchs en Vieno. — S-ro B. B. de Regt en Rotterdam. — S-ino E. Tilstra-Rohdens en Leeuwarden, Nederl. — S-ro A. Krone en Frankfurt, Germ. — S-ro M. Cornet en Tegelen, Nederl. — S-ro L. Kiss en Budapeŝto. — F-ino L. Vechtmann en Hago. — F-ino S. M. Wijers en Hago. — S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Nederl. — F-ino Vera Gutmann en Tallinn, Estonio.

17-a konkurso.

La kvin gravaj demandoj de nia konkurso montrigis sufiĉe malfacilaj, ĉar el la multaj ensenditaj respondoj nur malmultaj estas ĝustaj. Ni ricevis la jenajn akcepteblajn respondojn:

Je la 1-a demando: „La orgenisto en la preĝejo.“ — „La tramisto.“ — „La sonorilistoj.“ — „La soldatoj.“ — „La bombardanta aviadisto.“ — „La dancistinoj de la radio-teatro.“ — „La poetoj, ĉar ili forte metas siajn verspedojn.“

Je la 2-a demando: „Inter sia naskiĝo kaj morto.“ — „Kiam mi estis juna.“ — „Kiam en la mondo estis nur unu knabino.“ — „Neniam.“ — La plej belan respondon je ĉi tiu demando donis s-ro M. Cornet en Tegelen (Nederlando): „Kiam mi edziĝis!“

Je la 3-a demando: „La pasintan tempon.“ — „La hieraŭan tagon.“ — „Sian junecon.“ — Kelkaj personoj respondis: „Kion oni manĝis.“ Sed ni ne povas akcepti ĉi tiun lastan respondon, ĉar la medicina scienco konas kelkajn kazojn, kiam oni revidas tion, kion oni manĝis. Ekzemple ĉe ŝipveturo.

Je la 4-a demando: „La sunradioj.“ — „La lumoj.“ — „Radio.“

Je la 5-a demando: „Malveraĵo.“ — „Mensogo.“ — „Terura mensogejo.“ — „Sensencajo.“ — Ni ne povas akcepti la respondojn: „Fantazio“ kaj „Songoj“, ĉar ni ne kredas, ke oni povas en fantazio aŭ songoj vidi tiajn aferojn.

La 12 premiojn ni aljuĝis al la jenaj personoj, kiuj ensendis ĝustajn respondojn je ĉiuj kvin demandoj: S-ro M. Cornet en Tegelen, Nederl. — S-ro M. Klein en Dresden. — S-ro K. Dickmann en Praha. — F-ino Th. Horner

en Berlin. — F-ino D. Johansen en Oslo. — S-ro B. v. d. Kamp en Amsterdam. — S-ro J. Kirsch en Köln. — S-ro P. Kovács en Budapeŝto. — S-ro B. B. Skaffell en Reykjavik, Islando. — F-ino M. E. v. Westen en Rotterdam. — S-ro J. Mühlmann en Vieno. — S-ro B. B. de Regt en Rotterdam.

18-a konkurso.

La titolo de la konata libro estas: *En okcidento nenio nova*. La granda nombro de la solvintoj montras, ke ĉi tiu enigmo estis facile solvebla. Per lotado premiojn ricevis: Lernantoj de Prof. Font Giralt en Collell, Hispanujo. — S-ro L. Winter en Dresden. — S-ro Karl Meinel en Ellefeld, Germ. — S-ino Hinze en Rothenburg, Germ. — S-ro H. Hafstein en Kópavogur, Islando. — S-ro A. Kemény en Budapeŝto. — S-ro B. J. Polak en Steenwijk, Nederl. — S-ro F. Müller en Berlin. — F-ino N. v. d. Burgh en Rotterdam. — S-ro F. Gateshill en Manchester, Anglujo. — S-ino H. Soeteman-Riibe en Hago. — S-ro E. Gubler en Zürich. — F-ino F. Aberdam en Lwów, Polujo. — S-ro A. Dobrovolny en Vieno. — S-ino A. Lindeman v. Bloemen Waanders en Spijkenisse, Nederl.

19-a konkurso.

En ĉi tiu konkurso partoprenis nur unu sola persono, f-ino S. M. W. en H. Ĝi ensendis la nomojn de 9 personoj, sed el ili nur 3 nomoj estas ĝustaj. Pro tio ni devas deklari ĉi tiun konkurson kiel senrezultan. La premiojn ni ŝparas por aliaj konkursoj.

GRAVA INFORMO! DUONPREZA ABONO!

Grandanima legantino de LA PRAKTIKO donacis la sumon de 200 dolaroj por pagi la duonon de la abono por 400 malriĉaj samideanoj. Laŭ la deziro de la donacintino la alian duonon devas pagi la abonantoj mem. La eldonejo de LA PRAKTIKO sekvas la ekzemplon kaj pagas la duonon de la abono por 100 personoj. Do entute 500 personoj povos ĝui la favoran, duonprezan abonon.

En interkonsento kun la donacintino ni aranĝas la disdonon de la donaco en la jena plej oportuna maniero:

Ĉiu persono, kiu deziras ricevi la favoran abonon, sendu al ni en simpla letero 10 (dek) tiajn poŝtmarkojn de sia propra lando, per kia oni afrankas simplan leteron al eksterlando. (Tia poŝtmarko kostas ekzemple en Nederlando 12½ cendojn, en Francujo 1.50 fr., en Germanujo 25 pfenigojn, en Britujo 2½ penceojn, en Svisujo 30 centimojn, en Svedujo 25 oerojn k.t.p.)

La valoro de 10 tiaj poŝtmarkoj kune pli-malpli egalas al duona dolaro, do al la duono de la abonsumo. La alian duonon de la abonprezo ni pagos el la donacitaj sumoj.

Kontraŭ la tiel pagita abono ni liveros LA PRAKTIKON dum la tuta jaro 1932 (do ni sendos ankaŭ la ĝis nun aperintajn numerojn de Januaro) kaj post la elĉerpiĝo de la ĝis nun aperintaj numeroj ni notos la abonon por la abonjaro Julio-1932 ĝis Junio-1933.

Mendoj ne konformaj al la supre priskribita maniero ne estos plenumataj. — Pluraj personoj povas sendi la abonon kune en unu letero, por ŝpari afrankon. — Ĉi tiu favora abono validas nur por apartaj personoj, ne por societoj. — Oni skribu sian nomon kaj adreson tre klare, laŭeble per skribmaŝino, aŭ imitante presitajn literojn. — En la letero oni ne forgesu aldoni, kion ni faru kun la poŝtmarkoj, se la mendo alvenas tro malfrue, t.e. post la disdono de la 500 favorabonoj. Ĉu ni resendu la markojn, aŭ uzu ilin por duonjara ordinara abono?

La leterojn kun la mendoj kaj poŝtmarkoj oni devas adresi al:

LA PRAKTIKO
Oostduinlaan 32
DEN HAAG, Nederlando.

FARU LA KONTROLON

La solvo de la 6-a tasko:

Trastudis. Transmorta. Traserĉis. Travivi. Tra lia tuta cerbo. — Trans la strato. Tra kies plafono. Tra tagoj. Transskribadi. Tra la spacoj. Transa mondo. Tra tranĉadas. Trans la haŭto. — Trafesteni. Trans la straton. Tra la pordego. Tra la longa ŝtuparo. Tra la ŝlosilruo. Trans la pordo. Tralegita. — Traborita. — Tra la tuta nokto. Tra esploris. — Trameditis. Tra la nigraj nuboj. Trans la oceano. Transpaŝis. Trans la rivero. — Trans la riveron. Tra la klara akvo. — Tra la silento. Transa bordo. Tra la ŝaŭmanta akvo. — Travidis. Traŝovis sin. Tra fendo. Trans la barilo. Tra multaj akvaj kreskaĵoj. Tra lia buŝo. — Trarigardante. Tra lia dorso. Tra pensante. Travivi. Trans la sojlo. Transdonis. — Transpreninte. Tra la stratoj. Tra larmoj. — Tra la cerbo. — Tra la urbo. Trans la nuboj. — Transdonis sin. Transiris. Transformis. — Tra penetritaj. Tra la stratoj. Tra foliumadis. — Tra la kapo. — Transports. — Tramigradis. Transprenadis. Transsendi. — Travidis. — Tra pluraj monatoj. Trafulis. Trans la oceanon.

7-a tasko.

En Esperanto ekzistas du tre gravaj prepozicioj: **de** kaj **da**. Vi jam lernis ilin en la kurso kaj poste el via lernolibro. Sed en la praktiko oni ofte faras eraron kaj tial estas necese pli profunde studi kaj ekzerci ilin.

La vorto „**DE**” estas uzata: 1) Por montri la lokon de foriro, malproksimiĝo (ekz-e: *Li vojaĝas de Londono al Parizo*). — 2) Por montri la tempon, en kiu komenciĝis ago (ekz-e: *Esperanto estas konata de 1887*). — 3) Por montri la posedanton, formi la genitivon (ekz-e: *La pipo de la onklo*). — 4) Por montri kaŭzon (ekz-e: *Li paliĝis de timo*). — 5) En pasivaj frazoj por montri la aganton (ekz-e: *La muso estas kaptata de la kato*. *La tero estas kovrita de neĝo*). — 6) Por montri econ, kvaliton (ekz-e: *Homo de meza kresko* = mezgreska homo. *Botelo de vino* = vinbotelo). — 7) Por montri la aganton ĉe substantivoj signifantaj agon (ekz-e: *La amo de la gepatroj*). — 8) Por montri la objekton de la ago ĉe substantivoj signifantaj agon (ekz-e: *La lernado de lingvoj*). — 9) Por montri parton aŭ kvanton de difinita aĵo (ekz-e: *Du litroj de tiu ruĝa vino*). — 10) Por montri ian gramatikan dependon (ekz-e: *Glaso plena de akvo*).

La vorto „**DA**” estas uzata por montri kvanton (ekz-e: *Du kilogramoj da viando*. *Tri sakoj da pizo*. *Multe de homoj*.) La ŝlosilo de la vorto „da” estas la demanda vorto „*kiom?*”. La uzado de „da” estas do korekta nur tiam, kiam ni povas demandi: *kiom?* — **Atentu!** Se la aĵo estas difinita, ni devas uzi la vorton „de” anstataŭ „da”. Vidu ĉe la vorto „de” sub punkto 9).

En la sekvanta rakonto bonvolu kompletigi la vortojn „de” kaj „da”. Vi trovos kelkajn malfacilajn lokojn, sed ni esperas, ke vi sukcesos. La solvo aperos en la Aŭgusta numero.

LA DU KOMERCISTOJ

Viro d... meza aĝo sidis sur la velura kanapo d... la rapidvagonaro. Li estis sinjoro Simono Altkvalit, komerca vojaĝisto d... la firmo Humpapa & Cinkabum, fabriko d... muzikiloj. Li apartenis al la plej lerta speco d... komercistoj. Lacigita d... multa laboro li ĝuis momenton d... ripozo.

Kontraŭ li sidis viro d... eksterordinara dikeco, sed kun tre malmulte d... haroj sur la kapo. Evidente li devenis d... prauloj dotitaj per granda porcio d... muzika talento, ĉar li faris potencon koncerton en la formo d... ronkado.

S-ro Altkvalit, plena d... komercista fervoro, ne povis longe reteni sin d... ekparolo. Kun iom d... delikateco li tuŝis la dormanton precize sur la mezo d... la ventro kaj diris al li:

— Sinjoro, mi faras al vi proponon: venu en la s-ro la firmo Humpapa & Cinkabum, fabriko d... la plej muzikinstrumentoj d... la tuta mondo.

La dikulo large malfermis al okulojn, prenis el sia poŝo plenan d... vizitkartoj kaj transdonante unu al s-ro diris:

— Mi estas Izako Prezmalalt, ĝenerala reprezentaro d... la firmo Humpapa & Cinkabum, fabriko d... la plej muzikinstrumentoj d... la tuta mondo.

— Mi ĝojas. Mi estas Simono Altkvalit, speciala direktoro d... la firmo Humpapa & Cinkabum, fabriko d... la plej muzikinstrumentoj d... la tuta mondo. — Tio estas nenio. Nia firma ĉiutage ekspedas 600 muzikiloj kaj instalas kelkajn dekduojn d... preĝejojn. — Sed nia firma per jardekoj d... laboro edukis multajn racion d... ŝmirfakuloj, amasojn d... specialistoj, aparmee d... laboristoj kaj neniam suferis pro manko.

— Eĉ ombreton d... dubo mi ne havas pri tio. Sed plej malfacilaj jaroj d... ekonomia krizo, kiam ĉiu havis maron d... zorgoj, nia firma sen iom d... peno plej simpla laboristo 400 orfrankojn d... monata salajron.

— Sed ĉe nia firma la plej simpla laboristo ricevas salajron d... 600 frankoj, ĉiujare 5 sakojn d... greno, 4 barelojn d... biero, ĉiusemajne 3 metrojn d... kolbatojn tage 2 glasojn d... vino kun unu paketo d... biskvitoj. — Sinjoro kolego, vi deklamas tutan liston d... 86 frankoj.

La ombro d... dubo aperis sur la frunto d... s-ro ĉar li vidis, ke en la tuta rakonto ne estas eĉ unu guto. Li diris:

— Sinjoro kolego, tio estas nenio. Nia firma enspezas pli d... mono, ol via firma. Ni posedas grandan aron reĵoj, pli grandan nombron d... kontoroj kaj se la niaj laboristoj ne uzus ciron, via firma tuj bankrotus.

Gutoj d... ŝvito aperis sur la frunto de s-ro Prezmalalt respondis:

— Mi kredas, ke la nombro d... viaj kontoroj kaj d... viaj produktaj estas granda, sed se niaj laboristoj ne faras muzikon per la instrumentoj liverataj d... via entrepreno fermiĝus post kelke d... tagoj.

Sekvis paŭzo, dum kiu la du viroj kun intereso rigardis la fenestro la preterflugantan pejzaĝon. Ili vidis vagpetrolo, barelojn d... vino, kestejojn d... fortepianojn, d... cemento, arojn d... ŝafojn kaj grupojn d... ciganojn. Altkvalit prenis el sia poŝo skatolon d... ĉokolado kaj d... likvoro kaj diris:

— Sinjoro kolego, unu glaso d... ĉi tiu likvoro faros s-ro Prezmalalt prenis du glasojn d... likvoro, sed pecon d... ĉokolado kaj demandis:

— Kial vi proponis, ke mi forlasu la firmon Cirum kaj transiru en la servon d... la firmo Humpapa & Cinkabum? — S-ro Altkvalit trankvile respondis:

— Ĉar en la listo d... niaj muzikinstrumentoj mankas unu: la ronk-maŝino.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj

CHARLES AUGEREAU (1757—1816),

franca generalo, estis eminenta armeestro kaj pro tio en la jaro 1804 li fariĝis marŝalo de Francujo kaj princo de Castiglione. Li devenis el tre simpla familio kaj kiel infano li tre malmulte vizitis lernejon. Tial multa manko estis en lia klereco kaj eĉ kiel alt-rangulo li fariĝis heroo de multaj amuzaj historioj.

Foje Augereau eksciis, ke unu el liaj konatoj baldaŭ iros al Egiptujo kun oficiala tasko. Li vizitis sian konaton kaj diris al li:

— Kara amiko, vi povus fari al mi grandan komplezon. De kelka tempo oni tiom multe parolas pri tiuj mumioj kaj mi konfesas al vi, ke mi ĝis nun ne vidis eĉ unu mumion. Faru do al mi la afablajn kaj sendigu al mi el Egiptujo unu mumion.

Pasis duonjaro, kiam foje kvar viroj aperis ĉe la domo de la generalo, portante grandan keston. Suboficiro, kiu ricevis libertempon el Egiptujo, anoncis sin ĉe la generalo kaj raportis, ke laŭ komiso li portis el Kairo la promesitan mumion.

— Mumion? Sed kie li estas?

— Ĉi tie, en la kesto.

La generalo ordonis al la laboristoj tuj malfermi ka keston. Aperis la granda argila sarkofago, ornamita per koloraj figuroj. Kaj en ĝi estis alia, simpla ligna ujo.

— Sed kie estas la mumio? — demandis senpacience Augereau.

— Ĉi tie, baldaŭ aperos ĝi, nur la rubandojn oni devas forpreni, — respondis la suboficiro.

Sub la kovrilo de la interna sarkofago oni efektive ekvidis la tolan vindajon. En ekstata atendo pasis kelkaj minutoj, dum kiuj oni devolis la rubandojn. Fine aperis la bruna vizaĝo de la mumio.

La generalo dum momento rigide rigardis la mumion kaj poste kun kolera indigniĝo kriis al la suboficiro:

— Malfeliĉulo, kion vi faris?... Li ja mortis survoje!

★

KARLO V-a (1500—1558)



german-roma imperiestro, foje konfesis siajn pekojn al pastro, sed li tute ne menciis tiujn pekojn, kiujn li faris kontraŭ siaj devoj al la regno. Tiam la pastro diris al li:

— Vi konfesis la pekojn de Karlo. Sed nun konfesu la pekojn de la imperiestro.

DIOGENO (413—323 a. Kr.,)

la fama cinika filozofo, estis foje en la templo „Parthenon” en Ateno. Petante almozon li tendis sian manon al la statuoj de dioj. Ekvidis tion la makedona reĝo Aleksandro la Granda kaj diris al Diogeno:

— Malsaĝulo, vi povas etendadi vian manon ĝis via morto, se vi atendas helpon de la marmoro.

— Tio ne estas novaĵo por mi, — respondis Diogeno, — ĉar mi jam al kutimiĝis al la rifuzo. Sed ĉi tiuj statuoj almenaŭ ne riproĉas kaj ne insultas min, kiel la homoj.

★

FREDERIKO LA GRANDA

(1712—1786)



prusa reĝo tre ŝatis havi altkreskajn soldatojn. Li serĉigis tiajn virojn tra tuta Eŭropo. Por kelkaj tiaj soldatoj li pagis nekredible altajn sumojn.

En la jaro 1783 fulmo trafis la preĝejon de Sankta Petro en Potsdam. La preĝejo, kiun Frederiko mem konstruigis, duone forbrulis. Neniu kuraĝis porti la malbonan novaĵon al la genia, sed kolere-ma regnestro. Sed Frederiko rimarkis, ke oni kaŝas ion antaŭ li. Fine la korteganoj konfesis, ke la preĝejo forbrulis.

— Ĉu tio estas la tuta? — diris la reĝo trankviligante. — Kiel oni ektimigis min! Mi jam komencis suspekti, ke mortis mia longa anglo!

La longa anglo kostis al li sesmil talerojn. Por la rekonstruado de la preĝejo li donacis tridek-mil talerojn.

★

LUDOVIKO XVIII-a (1755—1824),

franca reĝo, en la jena maniero klarigis foje la praktikon de la konstitucia regado:

— Mia konstitucia regado estas tre simpla. Matene, post la leviĝo, mi demandas al miaj ministroj:

— Sinjoroj, ĉu ni havas la plimulton?

— Jes, reĝa moŝto!

— Bonege, do mi iras promeni.

En la sekvanta tago mi refoje demandas:

— Sinjoroj, ĉu ni havas la plimulton?

— Ne, reĝa moŝto!

— Bone, do vi iru promeni.

FROMENTAL HALEVY (1799—1862)

estis franca muzikverkisto. Kiam en la mateno post la unua prezentado de sia opero „La gardisto de l' reĝino” li eliris el sia loĝejo, la pordisto de lia domo haltigis lin kaj diris:

— Sinjoro, via muziko hieraŭ en la teatro estis vere beleaga... Mi, kiu ĉiuvespere je la deka horo jam dormegas, hieraŭ vespere sukcesis ekdormi nur ĉe la tria akto.

— Dankon, amiko, — diris Halévy, — tion mi ne forgesos.

Unu tagon poste oni prezentis la operon ankaŭ en la reĝa teatro kaj la reĝo varme gratulis al Halévy. Sed la verkisto restis dum la tuta vespero silentema kaj malgaja. Unu el liaj amikoj, la muzika kritikisto Saint-Georges, akompanis lia hejmen kaj dum tio demandis lin, pri la kaŭzo de lia malgajejo.

— Mia opero ne havis grandan sukceson.

— Kiel? La beleco de via opero ravis ja ĉiujn, de via pordisto ĝis la reĝo mem.

— Mia amiko, — respondis Halévy malgaje, — dum la prezentado mi vidis unu ĉambelanon oscedi.

★

HANS CANON (1829—1885)

estis aŭstria pentristo. Foje en Londono li ricevis la honorigan komision pentri portreton pri la princino de Chesterfield. La princino havis tre belan vizaĝon, sed iom tro grandajn manojn. Kiam la bildo estis preta, la princino diris al la pentristo:

— Vi multe pli flatis al miaj manoj, ol al mia vizaĝo.

— Tio estas komprenebla, — respondis Canon, — ĉar viaj manoj pagas min.

★

FRANÇOIS RABELAIS (1490—1553):

la fama franca satiristo, estis ankaŭ tre klera kuracisto. Foje oni vokis lin al malsana virino. Rabelais palpis la pulson de la malsanulino kaj demandis:

— Kiom da jaroj havas vi?

— Okdek-naŭ, — respondis mallaŭte la virino.

— Okdek-naŭ jarojn! — ekkriis la kuracisto kaj forpuŝis la manon de la malsanulino. — Ĝis kiam vi volas do treni la vivon?

Kaj tion dirinte li simple foriris.



la mondo ridas



Reciproke.

— Via hundo ŝtelis de mi kolbason. Vi devas ĝin pagi.
— Volonte, se ankaŭ vi pagas la fakturon de la bestkuracisto, kiu poste mian hundon sanigis.

(Lustige Blätter)

★

Bona ŝanco.

— Kio estas do kun tiu bankdirektoro Goldman? Oni eksigis lin, sed li tamen havas aŭtomobilon kaj vivas en maniero de riĉulo. El kio do li vivas?

— El la manko de pruvoj.
(Ulk)

★

Bonŝanco.

— Venu rapide, sinjoro doktoro, mia fileto englutis sian buŝ-harmonikon.

— Vidu, kia feliĉo, ke li ne ludis sur fortepiano.

(Moustique)

★

Honori la rangon!

— Malriĉulo estas ekstere, li petas uzitan veston.

— Donu al li mian eluzitan ĵakon.

— Sed li diras, ke li vidis iam pli bonajn tagojn.

— Donu do al li mian eluzitan frakon.

(Travaso)

★



Fanfarono.

— Ĉe miaj piedoj jam pli ol dekduo da viroj kuŝis.

— Kompreneble, pedikuroj.
(Passing Show)

Sufiĉa kaŭzo.

— Kiu kriadas tiel forte en la najbara domo?

— Estas sinjoro Pieters, li parolas kun si mem.

— Sed tiam kial li kriegas?

— Ĉar li estas surda.

(Haagsche Post)

★

Fila fiereco.

— Kiel bone aspektas via patro kun siaj grizaj haroj!

— Jes ja! Kaj li ŝuldas tion nur al mi!

(London Opinion)

★

Pura amo.

— Diru al mi, Elinjo, ĉu vi jam amis alian viron antaŭ mi?

— Neniam! Kelkajn virojn mi ŝatis pro ilia kuraĝeco, inteligenteco kaj honesteco, sed al vi mi sentas nur amon, nuran amon!

(Answers)

★

Virina opinio.

— Ho, Paŭlo, kial vi aĉetis du lotbiletojn, kiam vi bone scias, ke estas nur unu ĉefpremio?

★



Kie la virino regas.

— Viaj atestoj estas bonaj, fraŭlino, sed mi opinias, ke via figuro ne konvenas al la gusto de mia edzo.

(Life)

★

Gojo de virinoj.

— Hieraŭ mi preteriris konstruatan domon, mia ĉapelo tuŝis la trabaron kaj difektigis. Mia edzo devis aĉeti por mi novan ĉapelon.

— Kaj diru, mia kara, en kiu strato oni konstruas tiun domon?

(Schweizer Illustrierte)

★

Malvarma sango.

Sinjinino: Sed fraŭlino, kiel vi kapablas legi romanon, kiam la bebo tiel ploregas?

Infanistino: Ho, sinjinino, tio tute ne ĝenas min.

(Lustige Sachse)

Moderna vojaĝo.

— Kiel vi estas do ĉi tie? Kaj vi diris, ke vi dum ses semajnoj vojaĝos!

— Jes, sed mi havis bonŝancon. Oni ŝanĝis ĝin en monpunon.

★

Espero.

— Ho, patro, kiam vi rakontis tiun humoran historion, la patrino preskaŭ mortis pro rido.

— Kie ŝi estas? Mi scias multe pli ridigan historion.

(Humour)

En restoracio.

— Kelnero, portu al mi unue supon, sed ĝi ne estu tre varma. Poste du ovojn, sed ili ne estu tre malmolaj. Post tio portu al mi bifstekon, sed ĝi ne estu tre rostita. Fine nigran kafon, sed ĝi ne estu tre forta.

— Jes, sinjoro. Kaj al la kafo ankaŭ akvon, ĉu ne, kiu ne estu tre malseka?

(Tidens Tegn)

★

En librovendejo.

— Ĉu mi povus aĉeti je kredito la libron „Kiel oni fariĝas milionulo dum tri monatoj?”

— Kaj kiam vi intencas pagi, sinjoro?

— Kompreneble, post tri monatoj.

(Pages Gaies)

★


Nomadoj.

Instruisto: Do nomadoj estas tiuj homoj, kiuj senripoze iras de loko al loko kaj nenie restas dum longa tempo. Ĉu iu povas nomi ekzemplon?

Lernanto: Niaj servistinoj!

(De Lach)

★



Moderna skulptarto.

— Terure! Mi ne povas porti mian skulptaĵon en la ekspozicion, ĉar mi forgesis, kion ĝi prezentas.

— Do simple nomu ĝin „La perdita memoro”.


(Vårt Hem)



Kurso en Los Angeles (Kalifornio, Usono). — S-ro P. P. Christensen, la tutmonde konata propagandisto de Esperanto, gvidis en Los Angeles sukcesan kurson. Nia bildo prezentas la kursanaron kun la instruisto s-ro Christensen (signita per X). Kiel oni vidas, la kurso estis internacia, partoprenis en ĝi eĉ hindoj, negroj kaj japanoj. Preskaŭ ĉiuj partoprenintoj de la kurso abonas La Praktikon kaj korespondas kun alilandanoj.



La hungaraj skoltroj lernas Esperanton. — La mond-jamboreo de la skoltroj en 1933 okazos apud Budapeŝto. La hungaraj skoltroj diligente preparas sin al la akcepto de la tutmonda skolt-frataro. Nia bildo montras la Esperanto-grupon de la skolt-trupo „Sankta Georgo”. En la mezo sidas la trupestro: pastro Antono Schuster. Dekstre ĉi-ino Margareto Janicsák, maldekstre ĉi-ino Illy Mátéffy, gvidantinoj de la kursoj.




S-ro Johano Jaanisto, landa sekretario de la Cseh-Instituto por Estonio, fervora propagandisto kaj instruanto de Esperanto, modela organizanto de kursoj. S-ro Jaanisto loĝas en Tartu, fama universitata urbo de Estonio kaj malnova kultura centro.



Kurso en Borås, Svedujo. — Nia eminenta pola samideano, s-ro Jean Forge (sidanta en la mezo), dum la lasta printempo gvidis Cseh-metodajn kursojn en la svedaj urboj Borås kaj Ulricehamn. Nia bildo montras la kursanaron en Borås, urbo kun grava teksa industrio. S-ro Jean Forge estas aŭtoro de pluraj interesaj originalaj romanoj en Esperanto. Kelkajn el liaj verkoj oni tradukis ankaŭ en diversajn naciajn lingvojn.



Kurso por infanoj en Tallinn. — Nia bildo montras la ĉarmajn Esperanto-klason de nia fervora samideanino f-ino Erika Vidas, instruistino en Tallinn, ĉefurbo de Estonio (signita per X). La infanoj tre deziras korespondi kun alilandaj infanoj. Adreso: Esperanto-klaso de la urba 12-a elementa lernejo, S. Tartu maantee 44, Tallinn. Gvidantoj de infankursoj en aliaj landoj esperable havigos al ili multajn verdastelajn gekamaradojn.



Kurso en Malmö, Svedujo. — La senlaca pioniro de nia lingvo, s-ro Erik Andersson en la sveda urbo Malmö, gvidis dum la printempo Cseh-metodan kurson. La kurson organizis la Esperantista Klubo d



En la litova urbo Raseiniai ĵus okazis la unuaj kursoj por la lernantoj de la tiea gimnazio. La kursojn gvidis s-ro Maknickas, gimnazia instruisto. Nia bildo prezentas la lernantojn, kiujn la instruisto s-ro Maknickas (sidas en

ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

L' lernantoj. L' tablo. — La forlaso de la litero „a“ en ĉi tiuj kazoj estas granda krimo. Oni povas forlasi ĝin nur, se la sekvanta vorto komenciĝas per vokalo, ekzemple: „l' espero“. Sed ni malkonsilas eĉ tion, ĉar povas okazi miskomprenoj, kiel ekzemple: „l' afero“, kie la aŭdanto povas kompreni: „la fero“. Ni firme konsilas, ke en la ordinara parolo kaj proza teksto oni neniam forlasu la vokalon de la vorto „la“. La sola kazo, kiam la forlaso de tiu litero estas bona kaj konsilebla, estas, kiam la vorto „la“ staras post tia prepozicio, kiu finiĝas per vokalo, ekzemple: *de l' patro, tra l' mondo, pri l' paco*. Tiam oni aŭdas: *del, tral, pril*.

En la kaso mankas monon. — Treege malbone estas uzi ĉi tie akuzativon. La „mono“ estas ja la subjekto de la frazo: *la mono mankas*. Ke la vorto „mono“ en la supra frazo estas en la fino de la frazo, tio tute ne ŝanĝas la aferon. Do la bona frazo estas: *En la kaso mankas mono*.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Kursoj por blinduloj. — En la blindul-lernejo en Tomteboda apud Stokholmo bonsukcesan Ĉemetodan kurson gvidis f-ino Marga Tisell. La gelnantoj nun vige korespondas kun Esperanto-klaso en germana blindul-lernejo. En la aŭtuno estos nova kurso en la sama lernejo, ĉar la intereso pri Esperanto estas tre granda.

Leeuwarden (Nederlando). — La 4-5-an de Junio okazis ĉi tie grandsukcesa regiona kunveno de la Esperantistaro de norda Nederlando, kun ricprograma amuza vespero kaj agrabla ŝipekskurso al Grouw, tra la beleaga lagaro de Frislando.

Rotterdam. — Okaze de la vizito de la aerŝipo „Graf Zeppelin“ la 18-an de Junio, ĉe la flughaveno oni disdonis al la grandnombra publiko la propagandan flugfolion de la Centra Esperanta Propaganda Komisiono de Nimego kaj oni vendadis la lotojn de la Esperanto-Domo.

Esperanto en la komerco. — La firmo „Komerca Societo DELICAAT“ en Bergen-op-Zoom (Nederlando) produktas la sanigan nutraĵon „Sanovite“. Sur ĉiu paketo oni vidas presitajn klarigojn en la lingvoj holanda, franca, angla kaj Esperanto.

Esperanto en komerca gimnazio. — En la knabina komerca gimnazio „Minerva“ en Sofio (Bulgario) oni devige instruas Esperanton apud la franca kaj germana lingvoj. La lektoro estas s-ro I. H. Krestanov.

Borszczów (Polujo). — Finiĝis kun bona sukceso Esperanta kurso en la gimnazio, gvidita de s-ro S. Rosenstock. La intereso estas granda.

Kurso en Londono. — F-ino F. W. Macauslan gvidis sukcesplenan kurson en Wood Green (Nord-Londono). La kursanoj alĝis al la loka klubo kaj preparas sin al teatra prezentado.

Katolika kongreso kaj pilgrimo al Lourdes. — La 16-a kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista okazos en ĉi tiu jaro en la franca urbo Betharram en kunligo kun pilgrimo al Lourdes, dum la tagoj 7-11. Aŭgusto. — Informojn donas kaj aliĝojn akceptas: s-ro R. Cl. Colas, 31 rue de la Gare, Deuil (Seine & Oise), Francujo.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

BLINDAJ SAMIDEANOJ dezirantaj partopreni en la Pariza Kongreso estus tre dankaj, se bonhavaj samideanoj bonvolus faciligi la partoprenon, subtenante per siaj donacoj la blindulan kason de la Pariza Kongresa Komitato.

BONAN KORON HAVAS: s-ro L. Martensen en Hamburgo, s-ro S. J. Ysselstein en Schiedam, f-ino F. Brouwer en Scheveningen kaj Hagaj kursanoj de s-ro Prágano (2 ab.). Ili bonvolis pagi tutjarajn abonojn por senlaboraj samideanoj. Koran dankon al ili en la nomoj de la ĝojigitaj novaj abonantoj.

AŬSTRIANOJ! — La Int. Cseh-Instituto de Esperanto ĵus malfermis poŝteĉkonton ĉe la Aŭstria Poŝtparko. Ĝia numero estas: A. 156933. Abonojn oni povas pagi al tiu konto. Je deziri ni sendas enpagilojn. — La eldonejo de LA PRAKTIKO.

S-ro S. PRÁGANO, la eminenta instruisto de la Cseh-Instituto, dum la 12-30. Septembro estos libera por gvidi kurson (komencan aŭ daŭrigan) en Nederlando aŭ en alia loko proksima al Nederlando. La kondiĉojn, kiuj estas tre favoraj, oni povas eksci ĉi tie la Int. Cseh-Instituto, Hago.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

S-ro W. R. en B. (Polujo). — Pri tiu temo vi trovas ĝeneralan artikolon en la *Konversacia Gazeto*. Detalojn pri la diversaj mondlingvaj sistemoj vi supozeble trovos en la Esperanta Enciklopedio, kiun baldaŭ eldonos Literatura Mondo.

F-ino C. J. A. en Sch. (Ned.). — 1. Por tiu ideo ni ne havas apartan vorton. Vi povas diri: *fremdnacia nederlandano*. — 2. Plej konsilinde estas diri: „partopreni en“. — 3. Vi estas prava, la vorto „vojaĝanto“ ne taŭgas tie, ĉar estas profesio. Oni devas diri: „vojaĝisto“. — 4. La vorto „unu“ estas uzata tie por ĝuste esprimi la ideon. Same vi faras en la nederlanda lingvo. — 5. La vorto „wigwam“ (ĝi ne estas nederlanda vorto) en Esperanto estas: „viguamo“. — 6. La vorto „jamborco“ havas sudafrikan devenon.

Al pluraj. — Pri la respondkuponoj ni donos detalajn informojn en la venonta numero de LA Praktiko.

S-ro M. C. en A. — Esperanta etimologia vortaro ekzistas, ĝi estas la „*Naŭlingva Etimologia Leksikono*“, verkita de la franca generalo Bastien. Ĝi estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA Praktiko. Prezo: 2.50 ned. guld.

F-ino E. K. en B. — La vorto „Ĉefe“ estis la pseŭdonimo de la iama fama angla propagandisto de Esperanto, s-ro H. F. Höveler en Londono, fondinto de la Esperantista Ĉekbanko kaj de la Internacia Propaganda Oficejo de Esperanto. La vorto „Ĉefe“ venas el la komenciliteroj de lia nomo: „H.F.H.“, laŭ angla elparolo. S-ro Ĉefe mortis dum la mondmilito.

S-ino M. G. en L. — La vortoj „elparoli“ kaj „prononci“ estas egalaj. Se al vi tiel plaĉas, vi rajtas tute ne uzi la vorton „prononci“.

S-ro H. H. en Z. (Svislando). — 1. La esprimo „ili faras la saman“ estas ĝusta, ĉar ni alpensas la vorton „agon“ aŭ „aferon“. — 2. „Ili donis de tri ĝis dek ovojn“. En ĉi tiu frazo la akuzativo ne estas malkorekta. La prepozicio „ĝis“ rilatas ne al la ovo, sed nur al la vorto „dek“. Bonvolu analizi la frazon pere de la demandaj vortoj! *Kiu? = ili. Kion faris? = donis. Kion? = ovojn. Kiom? = de tri ĝis dek*. — Estus alia afero, se la vorto „ĝis“ rilatus al la ovo, ekzemple: *Li povis vidi nur ĝis la dek ovojn*.

Nova libro:

RUMANA BONHUMORO

elektitaj bonhumoraj rakontoj de la rumanaj verkistoj: Carageale, Creanga, de Herz, Patrascanu kaj Visarion.

Tradukis: P. Firu kaj S. Prágano

PREZO: broŝurita 1.— guld. (2.— sv. fr.)
tole bindita 1.50 guld. (3.— „ „)

Mendebila ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO

Afrankita sendo.

ESPERANTO-LINGVA

gramofondisko

Sur unu flanko: la Esperantista himno (*Muziko de F. de Ménil*), sur la alia flanko: Bildario el la opero „La sorĉa fluto“ de Mozart (*Kanto de Georg Gutzmer*)

Prezo: 2.50 guld.

Mendebila ĉe LA PRAKTIKO.

Al niaj abonantoj afrankita sendo.

PANORAMO




En la landoj de Orienta Azio oni faras la naztukojn el papero kaj post unufoja uzo oni tuj forjetas ilin. Tiuj popoloj multe miras pri tio, ke la „civilizitaj“ Eŭropanoj remetas la malpurajn naztukojn en la poŝon.



En Centra Afriko la buŝmanaj patrinoj per la ŝeloj de grandegaj kukurboj ŝirmas siajn infanojn kontraŭ la varmegaj radioj de la suno.


La malnov-moda kolumo kun antaŭen-starantaj pintoj havas la nomon „Vatermörder-kolumo“, kio signifas: *patron mortiganta kolumo*. La nomo venas de tio, ke iam unu junulo kun tia kolumo vizitis sian patron kaj kiam li kisis la patron, la pintoj de la kolumo tranĉis la gorĝon de la patro kaj pro la vundo la patro baldaŭ mortis.




En la stacidomoj de Londono la aŭtomobiloj eniras sur la peronon ĝis la vagonoj. La vojaĝantoj ĝuas grandan komforton, ili paŝas el la vagono tuj en la aŭton.



La sola monumento de Eva, prapatrino de la homaro. Unu ĉina Amerikano starigis ĉi tiun monumenton sur sia bieno en Kalifornio.



Kiel la roma verkisto Plinius skribas, la antikvaj romanoj kuŝigis malgrandan hundon sur la ventron de la malsanuloj. Ili kredis, ke la hundo ne nur varmigas la ventron, sed ankaŭ forprenas la malsanon. Por tiu celo oni uzis la „silkharon hundeton de Malto“, kiu estas tiel malgranda, kiel sciuro. Laŭ Plinius la malsano simple transiras en la hundon kaj ofte la hundo mem mortas.



La vivanta bildolibro. Unu franca kolonia soldato portas sur sia korpo la tetovitajn portretojn de multaj famaj armeestroj. Kaj de kelkaj fraŭlinoj.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

GENERALAJ REGULOJ:

1. En la konkursoj rajtas partopreni ĉiu, ankaŭ ne-abonantoj.
2. Ĉiun solvon oni devas sendi sur aparta papero aŭ poŝtkarto.
3. Ĉe ĉiu solvo oni devas alglui la koncernan konkurs-kuponon.
4. Al la solvo oni devas aldoni sur la sama papero la precizan nomon kaj adreson de la solvinto, per tre klara skribo.
5. Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu siajn solvojn kune en unu koverto, por ŝpari poŝtkostojn. Adreso: LA PRAKTIKO, Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando.
6. La nomoj de tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantajoj, sendotaj aŭ frankite al la gajnintoj.

33-a konkurso.

ESPERANTO

Kiel vi vidas, la vorto „Esperanto” konsistas el naŭ literoj. La tasko estas: faru el tiuj naŭ literoj aliajn vortojn, ekzemple: *rato, tenas, eterna k.t.p.*

Reguloj: 1. Unu vortradiko estas uzebla nur unufoje. Do ekzemple el la vortoj „tero” kaj „tera” oni rajtas enskribi nur unu formon, sed ne ambaŭ.

2. Oni devas skribi la vortojn klare en formo de listo, do la vortoj estu unu sub la alia kaj ne unu apud la alia.

Por kunmetadi la vortojn, bona maniero estas, se oni eltranĉas naŭ kvadratajn karton-pecojn, surskribas sur ilin la naŭ literojn kaj poste oni miksadaj kaj sangadas ilin.

Al tiuj personoj, kiuj faris plej multajn vortojn, ni disdonos 12 premiojn.
Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Septembro.
Oni bonvolu atenti je la ĝeneralaj reguloj.

34-a konkurso.

MALFACILA SITUACIO.

MALFACILA SITUACIO.

Sinjoro Paŭlo Mallert ofte vizitas familion, kie estas du filinoj: Else kaj Ester. S-ro Mallert komencas senti amon al f-ino Else kaj fine li skribas la jenan leteron al la patrino:

"Estimata Sinjorino, miaj seriozaj sentoj al via ĉarma filino E. kuragigas min peti, ke vi bonvolu permesi al mi konfidencan interparolon kun ŝi. Via estimata servisto: Paŭlo Mallert."

La patrino rapidas respondi: „Kara Sinjoro Mallero, vizite gojo mi informas vin, ke mia filino akceptos vian postmorgaŭ, vendrede posttagmeze je la 4-a horo.”

Vendrede posttagmeze sinjoro Mallert iras kun vesto kaj batanta koro al la domo de la familio kaj lin-
tas — fraŭlino Ester.

La kompatinda sinjoro Mallert, skribante la fatalan forgesis, ke ambaŭ fratinoj havas nomon kun la komenco „E”. Nun li estas en terura situacio, ĉar li tute ne amas

Kion faru nun la malfeliĉa s-ro Mallert? Kiel li savas la plej bonan mallertan konsilon?

10 premiojn ni donos al tiuj personoj, kiuj sendas al ni inteligentajn kaj spritajn solvojn. Ni transdonos la solvojn al la por ke li mem faru la juĝon.

Solvojn ni akceptos ĝis la 15-a de Septembro.
Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn! Solvoj ne konformaj
reguloj ne partoprenos en la premiado.

35-a konkurso.

ELTROVU!

La homoj deziras ĝin kaj samtempe ili volas kiel eble plej baldaŭ forigi ĝin. Kio estas tio?

Al tiuj personoj, kiuj sendas al ni la ĝustan respondon je ĉi tiu demando, ni disdonos 7 premiojn.

Solvoj estas akceptataj ĝis la 15-a de Septembro.
Bonvolu atenti la ĝeneralajn regulojn!

36-a konkurso.

La honesta Esperantisto manĝas nur tiun frukton, kies Esperantan nomon li scias. Se vi volas havi trankvilan konsciencon ĉe la manĝo-tablo, vi nepre devas solvi ĉi tiun enigmon, ĉar ĝi instruas al vi la nomojn de ĉiuj satindaj fruktoj. Se vi enmetas la 160 literojn en la ĝustajn kvadratojn de la figuro, vi ricevos la nomojn de 27 bongustaj fruktoj.

La 27 fruktoj estas (laŭ la linioj de la figuro): 1. En la marcipano estas. 2. Suda frukteto kun longa kerno. 3. Suda frukto kun dolĉa suko. 4. Nigra frukteto de arbeto. 5. Longa frukto sur la tero. 6. Granda frukto sur la tero. 7. Ruĝa frukto kun multa vitamino. 8. Flava frukto kun forta kerno. 9. Flava suda frukto kun pikiloj. 10. Ruĝa frukteto sur la tero. 11. Granda frukto sur la tero. 12. Frukto kun multaj haretoj. 13. Frukto kun multaj ĉeloj. 14. Premita suda frukto. 15. Blua frukto kun kerno. 16. Fatale frukto. 17. Malmolega frukto kun lakto. 18. Ruĝa bero sur arbeto. 19. Frandajo por la sciuro. 20. Verda bero sur pikanta arbeto. 21. Acida frukto. 22. Frukto simila al lampo. 23. Ruĝa frukteto sur arbo. 24. Bonega frukto, grava por drinkemuloj. 25. Mola ruĝa frukteto sur arbeto. 26. Mola frukteto sur arbo. 27. Longa frukto.

- a a a a a a a a a a
 a a a a a b b b b b
 b b c c d d e e e e
 e f f f g g g g g g
 i i i i i i i i i i
 k k k k k k k k k l
 l l l m m m m m m m
 n n n n n n n n n n
 o o o o o o o o o o
 o o o o o o o o o o
 o o o o o o o o o o
 o o o o o o p p p
 p r r r r r r r r r
 r r r r r r r s s s
 s s s t t t t t t u
 u u u u u u u v v z

La literoj en la dikaj kvadratoj diras al vi gravan kaj utilan admonon.

La literoj en la dikaj kvadratoj diras al vi gravan kaj utilan admonon.

Ni dislotos 12 premiojn al tiuj personoj, kiuj sendis al ni la ĝustan solvon. Estas sufiĉe, se oni sendas al ni la frazon el la dikaj kvadratoj. Oni bonvolu observi la ĝeneralajn konkurs-regulojn.

Ni akceptas solvojn ĝis la 15-a de Septembro.

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.

Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

BELGIJO

Menin. — S-ro Arthur Sierens, St. Jansmolenstraat 52. — 39-jara. PI kun Germ. p.ĉ.t. Respondos je ĉiu ricevita korespondado.

DANUJO

Aalborg. — S-ro D-ro Karl Peschardt, orekuracisto, Fuglevanget 3.
Aalborg. — S-ro Marius Nielsen, fabrikestro, Nordvestvej „Fiona”.
Aarhus. — F-ino Paula Waitz, kontrolistino, Ringgade 90.

ESTONIO

Rakvere. — S-ro Boris Judeloviĉ, vendisto, Tallinna t. 35. — 24-jara fraŭlo. Dez. kor. kun fraŭlinoj. K.ĉ.l.
Tartu. — S-ro Pester Kütt, 17-jara gimnazia lernanto, Postkast 94. — L, PK, PI, PM, k.ĉ.l., precipe kun gelnantoj.

GERMANUJO

Berlin. — Multaj partoprenintoj el la Ĉe-metodaj kursoj de f-ino M. Saxl, diversagaj, dez. kor. per L kaj PI k.ĉ.l., p.ĉ.t. Adreso: F-ino Margarete Saxl, Küstriner Str. 26. III., Berlin-Halensee.
Reichenbach i. Vogt. — F-ino Marie Männel, Oberreichenbacherstr. 87. — L, PK, PI, k.ĉ.l.
Reichenbach i. Vogt. — S-ro Alfred Seckel, teksisto, Blücherstr. 76. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

HUNGARIJO

Debrecen. — S-ro vitĉ Kecskeméti József, 35-jara masonist-majstro, Kisfaludi-ucca 17. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., prefere kun samfakuloj.
Kiskörös. — S-ro Aleksandro Szalay, presejestro. — Pri la rolo kaj estonteco de la religioj en la homa vivo, kun ĉiulandaj geinteligentuloj. — Kolektas ankaŭ PM, PI (bfl.).

ISLANDO

Reykjavik. — S-ro Sigurdur H. Gudmundsson, 26-jara komercisto, Box 61.

NEDERLANDO

Bergen (N.H.). — F-ino N. Vorst, Bergerweg 43. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Leeuwarden. — S-ro Dirk Bijlsma, 17-jara kontrolisto, Franekerstraat 48. — PI, k.ĉ.l.
Rotterdam. — S-ro Gabriël Spoon, direktoro de poŝt-telegraf-telefono, Beukelsweg 78.a. — L, PI, k.ĉ.l.
Slidrecht. — S-ro C. A. Klootwijk, 36-jara lernejestro, D. 88. — PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Utrecht. — S-ro W. Kaaijk, fervojoficisto, Bolstraat 10.a.bis. — PI k.ĉ.l.
Valkenswaard. — S-ro Br. van Hoof, 23-jara dompenristo, Dijkstraat. — L, PI (bfl.), k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun dompenristoj.
Valkenswaard. — S-ro Fr. Hoppenbrouwers, 21-jara studento, Eindhoven-sche weg. — L, PI (bfl.), k.ĉ.l., p.ĉ.t., Volonte interŝ. PM.
Valkenswaard. — S-ro Mart. Peels, 21-jara fraŭlo, Dommelsche weg 77. — L, PI (bfl.), k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun fraŭlinoj.
Voorburg (Z.H.). — F-ino M. Bronger, 21-jara lernantino ĉe lernejo por artkredito, Prins Albertlaan 10. — Dez. kor. kun klera svedo el Stokholmo.

NEDERLANDA HINDUJO

Balikpapan (Borneo). — S-ro Albert Najoan, 21-jara kontrolisto, fraŭlo, ĉe B.P.M. afd. R.W.P. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Dez. interŝ. fotografajojn. Ĉiam respondos.

SVEDUJO

Hishult. — S-ro Nils Alfred Isaksson, poŝtestro. — L, PI, PM, bfl., k.ĉ.l.
Wallåkra. — S-ro Ake Karlsson, 25-jara maŝinisto, La Laktejo. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

SVISLANDO

Riedholz bei Solothurn. — F-ino Ottilie Schenker, 22-jara. — L, PI, k.ĉ.l. (escepte Svislando), pri landoj kaj moroj, pri belaj artoj. PK, PI, k.ĉ.t.

GRANDA LOTERIO

por la instalado de la Esperanto-Domo de Arnhem

Aprobata per dekreto de la Nederlanda Ministro por Justeco,
 2 Sekc. A. N-o 1069, de la 2-a de Aprilo 1931.

ĈEFPREMIOJ:

1. AUTOMOBILO

NASH, 6-cilindra
 5-persona, plej
 nova modelo.



2. Moderna manĝo-ĉambra meblaro el fabr. „Pander”, Hago.
3. Portebla skribmaŝino „Royal”, plej nova modelo.
4. Gramofono de „Sprenger”, Hago.
5. Persa tapiŝo „Schira” de firmo Kulcsár, Hago.
6. Luksa salona starlampo el fabr. D. D. Coelingh, Hago.
7. Portebla skribmaŝino „Corona”, plej nova modelo.
8. Polvuŝilo „Protos” kun kompleta garnituro.
9. Foto-aparato Zeiss-Ikon Cocarette 6 × 9.
10. Laŭtparolilo de Bell Telephone Mfg. Co.

Entute 1000 premioj, ĉiuj valoraj praktikaj objektoj (pli ol 1000 elektraj mastrumaj aparatoj, plue bicikloj, vojaĝkofroj k.t.p.) — La tirado okazos publike dum la somero de 1932 en Arnhem pere de Notario Ch. J. Engelberts, Arnhem. — La rezultato de la tirado (listo de la gajnintaj numeroj kaj de la premioj) estos publikigata per speciala buteno, ricevebla ĉe la Esperanto-Domo en Arnhem. — La gajnintoj povas transpreni la premiojn dum unu jaro post la tirado. Post tiu templimo la premioj apartenos al la loteria fondo.

PREZO DE UNU LOTBILETO: 1.- ned. guld.

Adreso por mendoj kaj pagoj:

F-ino J. E. RIKKERS, Anton de Haenstraat 122,
 DEN HAAG, (Nederlando). — Poŝtĝirokonto: Den Haag 96085.

La ŝatataj

FLAGINSIGNOJ

speciale taŭgaj por vojaĝo kaj kongreso, por montri la naciecon de la portanto.

Eleganta formo, bela emajlo.

Haveblaj por ĉiu nacio, kun pinglo, broĉo aŭ butono.

Prezo: -60 ned. guld. (kvar respondkuponoj) afrankite.

Int. Cseh-Instituto de Esp. Hago.



Gesamideanoj, atentu!

Mi, Miki Muso, donas al vi gravan konsilon!
Aŭskultu!

PASIGU VIAN LIBERTEM PON en la ESPERANTO-DOMO en Arnhem!

Hotelo kun plena moderna komforto.

Belega regiono.

Afable samideana rondo.

Tre moderaj prezoj.

En la ĉambroj ne estas musoj! Mi garantias. Absolute!

La **ESPERANTO-DOMO**, en la mezo de belega vasta parko, estas malfermita dum la tuta jaro. En la domo estas kursejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro fluanta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5—10 personoj en unu ĉambro): 2.— ned. guld., (2—4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. **Lunĉo:** .75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro.

Servomono 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26060

5-a INTERNACIA KURSO de ANDREO CSEH Arnhem, 19-29 Julio 1932.

La kurso daŭros dum 10 labortagoj, kun 4 instrueroj ĉiutage. La lecionoj okazos matene de la 9-a horo ĝis la 1-a horo. En la posttagmezoj estos plezuraj kaj studaj ekskursoj. En la vesperoj okazos alterne amuzaj kaj seriozaj kunvenoj kun prelegoj kaj lumbildparoladoj.

La kurso finiĝos per amuza vespero kun teatra prezentado kaj balo la 29-an de julio.

La 30-an de julio oni povos forvojaĝi al la Pariza kongreso, kun la nederlanda speciala karavano de UEA. (Pri la karavano oni turnu sin al s-ro J. Telling, ĉefdel. de UEA, Bellevoijstraet 36, Rotterdam).

En la kurso partopreni povas ĉiu persono, kiu ankoraŭ ne scias Esperanton, kaj ankaŭ malnovaj Esperantistoj, kiuj deziras studi la kursmetodon.

Kotizo por la kurso kaj ĉiuj aranĝoj alligitaj (prelegoj, teatro, balo k.t.p.): 12.50 ned. guld., por geinstruistoj kaj por pluraj familianoj 10.— guld.

Premio: Tiuj personoj, kiuj verbas tri neesperantistajn kursanojn, povas partopreni ne pagante kotizon.

Favoroj: 10 kursanoj povas ricevi senpagan loĝejon en la Esperanto-Domo dum la tuta kursdaŭro. Ili devos pagi nur la manĝon (2.50 guld. por unu tago).

Grave! Oni bonvolu diskonigi la suprajn informojn en la nacia gazetaro, precipe en la instruistaj gazetoj kaj fervore verbi kursanojn, por ke la kurso estu kiel eble plej internacia kaj ke edukiĝu multaj novaj instruistoj de Esperanto. (Ni antaŭdankas pro afable alsenditaj gazetonumeroj kun la koncerna artikolo.)

Bonvolu legi la informojn malsupre.

SEMINARIO POR CSEH-METODAJ INSTRUISTOJ Arnhem, 8-13 Aŭgusto 1932.

Partopreni povas ĉiu persono, kiu estas aŭ deziras esti gvidanto de Cseh-metodaj kursoj. La programo de la Seminario estas:

- Prelegoj de Andreo Cseh pri sia kurs-sistemo, pri la principoj de la metodo kaj la tekniko de la aplikado.
- Konsiloj al instruantoj.
- Praktikaj prov-ekzemploj.
- Raportado de diverslandaj instruistoj pri siaj spertoj.
- Diskutado.

e) Provlecionoj de partoprenantoj (eventuale speciala eksperimenta kurso, en kiu ĉiun lecionon donos alia instruisto).

La prelegoj de la Seminario okazos ĉiutage dum 4 horoj (matene 9-11 h.). En la posttagmezoj estos studaj kaj plezuraj ekskursoj, en la vesperoj amuzaj aranĝoj.

Kotizo por la Seminario kaj ĉiuj alligitaj prelegoj kaj amuzaj aranĝoj: 7.50 guld. Kiu aliĝas ankaŭ al la Perfektiga Kurso, pagas komunan kotizon de nur 10.— guld.

Bonvolu legi la informojn malsupre.

INTERNACIA PERFEKTIGA KURSO Arnhem, 15-20 Aŭgusto 1932.

La kursan gvidos Andreo Cseh laŭ speciala sistemo kaj kun aplikado de helpiloj, disponigitaj al la kursanoj.

La lecionoj okazos ĉiutage en 4 horoj (matene de la 9-a ĝis la 1-a). En la vesperoj estos instruaj prelegoj (pri la historio kaj organizo de la Esp-movado, pri la Esp-a literaturo k.t.p.) kaj amuzaj aranĝoj.

La kurso okazos en internacia kunestado kaj tio ebligos la plej efikan

praktikan ekzercadon de la lingvo. Por tio servas speciale la posttagmeza komuna ekskursoj.

Partopreno en ĉi tiu kurso estas tre rekomendata speciale al tiuj personoj, kiuj preparas sin al ekzamenoj.

Kotizo por ĉiuj lecionoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj: 7.50 guld. Kiu aliĝas ankaŭ al la Seminario, pagas komunan kotizon de nur 10.— guld.

Bonvolu legi la informojn malsupre.

INFORMOJ:

Ĉiuj kursoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj okazos en la Esperanto-Domo. La kursanoj povos loĝi en la hotelo de la Esperanto-Domo, kie speciala favorpreza plena pensio (komforta ĉambro kun fluanta akvo kaj la tri manĝoj) kostas por unu tago kaj unu persono: en unu-lita ĉambro 4.—, en du- ĝis kvar-lita ĉambro 3.50, en kvin- ĝis dek-lita ĉambro 3.— guldenojn. (La litoj estas apartigitaj per ŝirmiloj). Servomono: 10%.

Aliĝante oni sendu la kotizon kaj mendu la hotelon, pagante la pension prezon por almenaŭ 2 tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando. (Telefono: 116720. Postĉekkonto: Den Haag 162626.)

Estas konsilinde baldaŭ aliĝi, ĉar la nombro de la partoprenantoj kaj de la loĝlokoj en la Esperanto-Domo estas limigita.

Personoj, kiuj deziras partopreni en la supre nomitaj kursoj, sed pro la krizo havas ekonomiajn malfacilaĵojn, turnu sin kun fido al la Cseh-Instituto, kiu klopodos fari por ili faciligojn.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
8-a numero



Aŭgusto
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederland)
TELEFONO: 116720
POSTĈEKKONTO
162626

Kongreso.

En la tagoj, kiam ĉi tiu numero de la Praktiko aperas, la tutmonda Esperantistaro havas grandan feston en Parizo. Ĝi estas la 24-a universala kongreso de Esperanto.

Ĉiu Esperantisto, kiu havas tempon kaj monon, rapidas al tiu granda festo. Eksterordinaraj travivaĵoj atendas tie la partoprenantojn. Oni renkontas homojn el ĉiuj anguloj de la mondo, oni parolas kun la plej diversaj nacioj, oni sidas en kunvenoj — kaj ĉio okazas en unu sola lingvo. Ripetiĝas la pentekosta miraklo: ĉiu komprenas, ĉiu estas feliĉa.

La kongresoj ludas tre gravan rolon en la Esperantista vivo. Estus granda eraro opinii, ke ili estas nur okazoj al interesa somera vojaĝo kun fervoja rabato, kun babilado kaj dancado.

La kongreso estas la plej bona lernejo de nia lingvo. En la societo de alinaciaj Esperantistoj ni estas devigataj paroli la internacian lingvon kaj per tio ni lernas la praktikan uzadon de Esperanto. Tial al ĉiu persono, kiu volas progresi en Esperanto, nia unua konsilo estas: iru al kongreso!

Plue, niaj kongresoj estas la plej efikaj propagandiloj de nia lingvo. En la nuna tempo de densa internacia interkomunikado

ĉiu sane pensanta homo konsentas, ke internacia lingvo estas necesa. Sed multaj dubas pri la taŭgeco de Esperanto. Kaj nun venas niaj kongresoj, kiuj plene konvinkas eĉ la plej skeptikajn homojn. Ili povas vidi kaj admiri la brilan funkciadon de Esperanto. Ili povas aŭdi paroladojn kaj kantojn, gravajn diskutojn kaj teatrajn prezentadojn, sciencajn prelegojn kaj gajan babiladon. Se ni renkontas ege skeptikajn homojn, kiujn ne povas konvinki niaj argumentoj, ni sendu ilin al la kongreso. Tie ili konvertiĝos. Konvinkos ilin la potenco de la faktoj.

Fine, niaj kongresoj estas tre gravaj por nia „diligenta kolegaro“, por la laboranta Esperantistaro. Oni interkonatiĝas kun malproksimaj kolegoj kaj kunlaborantoj, oni interŝanĝas spertojn, oni aranĝas utilajn priparolojn kaj diskutojn.

Kaj super tio la kongreso estas ankaŭ fonto de multa nova energio, ĉar ĝi pravas al ni, ke ni laboras por realigebla idealo. La kongreso estas revelacio pri tio, ke la homaro povas ankoraŭ progresi. Ĝi estas bildo el la estonta, pli bela mondo.

Partopreni en universala kongreso devas esti sopiro de ĉiu vera Esperantisto, ĉar ĝi estas valora kaj dolĉa premio de nia „paca laboro“.


La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS


Unu numero kostas 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. —
La abona jaro komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. —
Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.), por duonjaro la duono. —
Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 pago — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LECIONO PRI LA DORMĈAMBRRO.

1. lito
2. litotuko
3. stebkovraĵo
4. pluma sako
5. kapkuseno
6. matraco
7. litkovrilo
8. litotapiŝeto
9. lavtablo
10. lavopelvo
11. akvokruĉo
12. sapujo
13. spongo
14. mantuko
15. hokaro
16. kombilo
17. broso
18. spegulo
19. dentobroso
20. ŝubutonumilo
21. ŝutirilo



22. ŝranko
23. litotuko
24. akvokarafo
25. akvoglaso
26. tualettablo
27. spegulo
28. fenestra
29. komodo
30. tirkesto
31. kandelingo
32. guto-telero
33. kandelo
34. meĉo
35. estingilo
36. skatolo kun alumetoj
37. lulilo
38. lularko
39. lulilkurteno
40. laktobotelo
41. bottirilo



Kiom da litoj estas en la dormĉambro? Mi vidas du ¹ kaj unu ³⁷, en kiu infaneto dormas kun la ⁴⁰ ĉe la buŝo. La unu de la du ³⁹ estas iomete tirita flanken.

Kiam vi vin levas? Mi estas vekata somere je la 7-a, vintre je la 8-a.

Kion vi faras, levinte vin matene? Mi iras al la ⁹, mi verŝas malvarman akvon el la ¹¹ en la ¹⁰. Poste mi prenas mian ¹³ kaj lavas min per akvo kaj sapo. Sekiginte min per la ¹⁴, mi purigas la dentojn per la ¹⁹ kaj purigas la ungojn per la ungoobroso. Post la lavado mi frizas min per la ¹⁷ kaj ¹⁶. Poste mi surmetas mian ĉemizon, miajn ŝtrumpojn, mian pantalonon, fine la jakon kaj ŝuojn. Kiam mi estas preta, mi

enmetas la poŝhorloĝon. Antaŭ la eliro mi surmetas surtuton kaj gantojn. Okaze de pluva vetero, mi prenas la ombrelon.

Kiel la lito estas farata? — La servistino faras la ¹, elprenante la kusenojn, por ke ili estu aerumataj. Poste ŝi turnas la ⁶ kaj enmetas la ², ⁵ kaj ³ bone skuitaj, estas metataj en la ¹ kaj kovrataj per la ⁷.

Kion vi vidas sur la komodo? — Tie staras ³¹ kun kandelo, apude ³⁶ kuŝas, per kiuj oni eklumigas la kandelon. La ³⁵ servas por estingi la kandelon.

Kie vi konservas viajn vestojn? — Ili estas en la ²². Mian talojon mi havas en la ³⁰ de la ²⁹.

DIALOGO.

Vespere: Je kiu horo vi deziras esti vekata? Veku min je la 6-a kaj frapu la pordon, ĝis kiam mi respondas. — Via moŝto, ĉu vi tintis? — Jes, la akvokruĉo staras antaŭ la pordo, ĝi estas malplena, alportu al mi freŝan akvon kaj kunportu samtempe ion por forviŝi la akvon, kiun mi disverŝis. — Bonan nokton, sinjorino, dormu bone. Mi vekos vin je la 6-a kaj alportos vian matenmanĝon en la ĉambron.

Matene: Ĉu vi dormis bone, sinjorino? — Ne, ĉar mia kapo kuŝis tro alte; elprenu, mi petas, la angulan kusenojn, kaj alportu novan litotukon, tiu ĉi ne estas pura. Krom tio mi deziras pli grandan pluman liton. Malfermu, mi petas, la fenestron. Ĉu vi brosis mian jupon? Ĉu la ŝuoj estas purigitaj? Alportu iom da varmeta akvo por brosi la dentojn. Kia estas hodiaŭ la vetero? Ĉu la temperaturo estas agrabla? Ĉu pluvos?

Ĉi tiu leciono estas prenita el la bonega praktika lernolibro: THORA GOLDSCHMIDT: BILDOTABULOJ, eldonita de la firmo Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. La libro sur 104 paĝoj pritraktas ĉiujn temojn de la praktika vivo en similaj bildoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO kaj ĝia prezo estas:

kartonita nur 1.90 ned. guld.

bindita „ 2.20 „ „

Al niaj abonantoj aŭfrankita sendo!

Faru la kontrolon!

La solvo de la 7-a tasko:

De meza aĝo. De la rapidvagonaro. De la firmo. De muzikiloj. De komercistoj. De multa laboro. De ripozo. — De eksterordinara dikeco. Da haroj. De prauloj. Da muzika talento. De ronkado. — De komercista fervoro. De ekparolo. Da delikateco. De la ventro. — De la firmo. De la plej altkvalitaj. De la tuta mondo. — Da vizitkartoj. — De la firmego. De ŝmirajoj de plej malaltaj. — De la firmo. De plej altkvalitaj. De ĉiu speco. De plej alta. — Da nomoj. Da ciro. Da diversaj. — Da muzikiloj. Da preĝejaj orgenoj. — Da laboro. De ŝmirfakuloj. Da specialistoj. Da laboristoj. De mono. — Da dubo. De ekonomia krizo. Da zorgoj. Da peno. Da monata salajro. De 600 frankoj. Da greno. Da biero. Da kolbaso. Da vino. Da biskvitoj. De 86 milionoj da frankoj. — De dubo. De s-ro. Da vero. — Da mono. Da laborejoj. Da kontoroj. De niaj laboristoj. — De ŝvito. — De viaj kontoroj. De viaj produktadoj. De via firmo. Da tagoj. — De petrolo. De vino. De fortepianoj. De cemento. De ŝafoj. De ciganoj. De ĉokolado. De likvoro. — De ĉi tiu likvoro. — Da likvoro. Da ĉokolado. — De la firmo. — De niaj.

8-a tasko.

La vortoj „si” kaj „sia” ofte kaŭzas zorgon en la Esperantistaj kapoj. Tial hodiaŭ ni ekzercu ilin.

„SI” estas refleksiva pronomo; ĝi montras, ke la ago reiras al la subjekto de la verbo. Ĝi estas uzebla nur por la tria persono, en ambaŭ nombroj. Ekz.: *Mi lavas min, vi lavas vin, li (ŝi, ĝi, ili) lavas sin.*

„SIA” estas la poseda adjektivo. Ekz.: *Mi kombas miajn harojn, li (ŝi, ĝi, ili) kombas siajn harojn.*

Reguloj: 1. Si kaj sia rilatas ĉiam al la subjekto de tiu frazo, en kiu ili mem estas. — 2. Si kaj sia neniam povas esti subjektoj de la frazo, do ili ĉiam devas havi aŭ akuzativon („n”), aŭ iun prepozicion.

Praktika konsilo: En okazo de dubo transformu la frazon je duobla frazo kaj ĉio tuj aŭtomate klariĝos. Ekz.: *La oficiro ordonis al la servisto purigi sian (lian?) veston = La oficiro ordonis al la servisto, ke li purigu sian (lian) veston. (Sian = la veston de la servisto. Lian = la veston de la oficiro.)*

Bonvolu nun kompletigi la vortojn en la sekvanta rakonto. En multaj lokoj oni povas kompletigi en diversaj manieroj. Sed tiam vi ricevos diversajn frazojn. La solvo aperos en la Septembra numero de La Praktiko.

LA DU PROFESOROJ

(Vera historio)

Sinjoro Rikardo Bonmemor, profesoro de botaniko, pleniginte ...ian stomakon per potenca tagmanĝo, kuŝis sur ...ia familia kanapo, heredita de tiu el ...iaj onklinoj, kiu plej multe amis ...in kiel ...ian nevon.

Por helpi al ...ia stomako digesti ...ian enhavon, li metis en ...ian buŝon la grandan cigaron, kiun ...ia plej bona amiko donacis al ...i okaze de ...ia lasta vizito.

Dezirante ripoziĝi ...in per dormeto, ...i prenis ...ian ĉiutagan gazeton, kiu sur ...iaj paĝoj raportadis pri ĉiu skandalo de ...ia lando.

La unua artikolo kun ...ia grava titolo kaptis ...ian atenton: „Nia reĝo mortigis ...in. — La glora reĝo de ...ia adorata lando hieraŭ ordonis al ...ia ĉefministro, ke ...i purigu la kronon de ...ia amata edzino per la ŝmirajo kuirita de ...iaj korteganinoj. Sed la ĉefministro anstataŭ ...i mem sendis al ...i ...ian serviston kun ordono, ke ...i kune kun ...iaj servistinoj purigu ...ian kronon. La reĝo, aŭdinte pri ...ia ago, sendis ...ian filon al ...ia ĉefministro, por ke ...i detranĉu ...ian kapon per ...ia propra glavo.”

La artikolo tiel tuŝis ...ian koron, ke la bona profesoro sentis larmojn en la anguloj de ...iaj okuloj. Li prenis el ...ia poŝto ...ian naztukon, kiun iam ...ia mortinta fianĉino uzis okaze de ...ia naskiĝtago, por sekigi ...iajn larmojn.

Profesoro Bonmemor skuigis en ...ia tuta korpo, ĉar ...i ekvidis sur ...ia tuko grandan nodon. Li tuj rememoris, ke ...ia kolego, s-ro Adolfo Neforges, profesoro de matematiko, invitis ...in por hodiaŭ al tagmanĝo. Li klare memoris, ke prof. Neforges mem per ...iaj propraj manoj faris la nodon sur ...ia tuko, ĉar ...i konis ...in kiel nekuraceblan forgesemulon.

Sed kion fari nun? Li rigardis ...ian horloĝon: la tempo jam pasis! Li palpis ...ian ventron: tro plena! Tamen por savi almenaŭ la reston de ...ia honoro, li rapide lavis ...in, razis ...in, kombis ...iajn harojn, vestis ...in, prenis ...ian pluvombreton kaj kuris al la domo, en kiu ...ia kolego loĝis.

Sinjoro Neforges afable salutis ...ian gaston, sed kiam ...i aŭdis, ke ...i venas por tagmanĝi, ...i svenis kaj falis en la brakojn de ...ia servistino. Sinjoro Neforges rapide rekonstaciis ...ian amatan edzinon per ...ia kolonja akvo, kiun ...ia servistino fulmrapide portis el ...ia ĉambro. La profesoro post tio kune kun ...ia edzino certigis ...ian gaston, ke ...ia sveno okazis pro ...ia granda ĝojo.

Post kiam ankaŭ s-ro Bonmemor juris, ke ...i havas la plej feliĉan tagon de ...ia vivo, prof. Neforges kondukis ...ian kolegon en ...ian laborĉambron kaj montris al ...i ...an grandiozan pip-kolekton kaj por flati al ...ia amiko, ...i montris al ...i ankaŭ la plenan kolekton de ...iaj lukse binditaj botanikaj verkoj.

S-ro Neforges dum tio preparis la tagmanĝon kaj admonis ...ian servistinon kondukti antaŭ ...ia gasto kun deca seriozezo.

La servistino post kvaronhoro venis por anonci al ...ia mastro kaj al ...ia gasto, ke la tagmanĝo estas preta. S-ro Neforges kondukis ...ian kolegon en la manĝoĉambron, kie jam atendis ...ia edzino. Tie ...i sidigis ...in apud ...i.

Ĉe la tablo prof. Bonmemor antaŭ ĉio senkulpigis ...in pro ...ia duhoro malfriiĝo. Li diris, ke ...i okupis ...in pri grava scienca laboro kaj ĉar ...ia horloĝo difektiĝis, nur ...ia apetito atentigis ...in pri la tempo de tagmanĝo.

Prof. Neforges trankviligis ...ian gaston dirante, ke ...ia malfriiĝo estas aranĝita de la providenco mem, ĉar ...ia edzino pro neatendita vizito de ...ia bopatrino ne havis tempon por pli frue plenumi ...iajn mastrinajn devojn.

Komenciĝis la tagmanĝo. S-ro Neforges ne volis manĝi supon pro la ordono de ...ia kuracisto. Sed kiam prof. Bonmemor klarigis al ...i, ke laŭ ...iaj sciencaj eksperimentoj tiuj floroj fariĝas plej belaj, sur kiujn oni ĉiutage verŝas supon, ...i tuj manĝis du telerojn da supo.

Ĉe la viando s-ro Bonmemor deklaris ...ian sekreton, ke kiel konvinkita botanikisto, lastatempe ...i ŝanĝis ...ian vivmanieron kaj fariĝis severa vegetarano. Sed kiam ...i aŭdis, ke la viando estas el la porko edukita de la mastro mem, pro ĝentileco al ...ia gastiganto ...i devis manĝi kun granda spirado du grandajn porciojn.

Kiam ili manĝis la duan porcion de la pudingo, fierajo de la mastrino, subite malfermiĝis la pordo kaj la gemastroj ekvidis ...ian filineton enŝovi ...ian kapeton kaj kun mirantaj okuloj ekkrii:

— Panjo, kial vi tagmanĝas hodiaŭ dufoje?

La sinjorino denove svenis kaj s-ro Neforges kun granda konfuziĝo devis konfesi, ke ili jam tagmanĝis unufoje, ĉar ...i tute forgesis, ke ...i invitis al ...i gaston.

S-ro Bonmemor rapide prenis ...ian ĉapelon kaj prof. Neforges akompanis ...ian gaston al ...ia hejmo. Sur la vojo s-ro Bonmemor diris al ...ia kolego:

— Estimata kolego, hodiaŭ ankaŭ mi tagmanĝis dufoje, ĉar ankaŭ mi forgesis pri via invito. Sed ni pardonu al ni reciproke, ĉar ni ambaŭ estas profesoroj.

Kaj ili sigelis la pacon per solena interŝanĝo de ...iaj pluvombreloj.

LA NOVA LITERATURO

Sur ĉi tiu paĝo ni publikigas tiujn verkaĵojn de la novaj Esperantistoj, kiujn la kursguidantoj mem sendas al ni. Nia intenco estas doni al la komencantoj tre facilan legajon kaj kuraĝigi ilin al la uzado de nia lingvo. Ni kore gratulas al niaj talentaj novaj gesamideanoj.

EN LA NOKTO.

(Skribis f-ino Fajga Bleiŭna, kursanino de f-ino Leonja Fruchtŭna, en Czortkŭw, Polujo.)

La hela luno briletas tra la densaj folioj de la arboj kaj ĵetas sian arĝentan lumon en la ĝardenon. En la tuta naturo regas granda silento. Mi promenas sola sur la bordo de la lago tien kaj reen. Facila bloveto movas la ŝnondojn de la lago kaj balancigas la malgrandan boaton. Post mallonga tempo ĉesas la bloveto kaj ĉio fariĝas silenta, kvieti. La supraĵo de la lago respegulas la malhelan ĉielon kun ĝiaj steloj kaj mi trovas min en la mezo de grandega globo, kiun formas la senfina ĉielo super mi kaj ĝia spegubildo sub mi. Mi sentas min malgranda ero, guto en la universo. Se mi ĵetus min en la lagon kaj dronus, la vizaĝo de la mondo tute ne ŝanĝiĝus. La luno briletus tiel, kiel ĝis nun, la lago post kelkaj moviĝoj revenus al sia kvieti. Nur miaj gepatroj sentus doloron, sinceran, eble profundan. Nur miajamikoj sentus mankon, eble ankaŭ doloron. Sed post kelka tempo, post kelkaj jaroj ili forĝus min kaj en la mondo ne restus postsigno pri mia vivo...

Sed kiam mi rigardas la harmonion de la naturo, kial venas en mian kapon penso pri la morto? Ĉu la trankvileco de la universo kaj la senfineco ĉiam donas al la homo impreson de lia malgrandeco kaj malforteco? Kial oni ne sentas sin en tiuj momentoj parteto de la granda homaro, de tiu homaro, kiu regas super la naturo kaj faras el ĝi obeantan sklaven?

La nokto estas tre silenta kaj ĉarma, la luno trankvile brilas, la tuta mondo dormas, nur mi maldormas kaj promenas sur la bordo de la lago tien kaj reen...

MIA NOVA MASTRO.

Verkis Lennart Ring kaj Bertil Rodin, 18-jaraj telegraphistoj, kursanoj de s-ro Algot Hellbom en Sundsvall, Svedujo.

Tiu tago estis granda tago. Ni — la aliaj hundoj kaj mi — kuŝis en niaj korboj, kiam juna sinjoro venis en la hundbutikon. Li demandis al la hundkomercisto: „Ĉu vi havas belan hundon?“ Li ekvidis min kaj diris: „Tiu estas bela kaj bona hundo. Mi ŝatas ĝin. Mi volas ĝin aĉeti.“ La hundkomercisto gajigis kaj diris: „Tiu hundo estas tre multekosta.“ La sinjoro diris: „Mi havas monon. Mi aĉetas ĝin.“ Li prenis monbileton el sia papermonujo kaj donis ĝin al la hundkomercisto.

Mi estis tre gaja. Mi ricevis novan mastron. Mi rigardis lin. Li estis tre eleganta kaj juna sinjoro. Mi iris malantaŭ mia nova mastro al lia hejmo. La nova hejmo estis tre bela. Li karesis min kaj diris: „Tob, sidu! Tob, kuŝu!“ Poste li iris en alian ĉambron. En la saman ĉambron, en kiu mi kuŝis, venis servisto. Li diris al mi: „Kion vi faras ĉi tie, hundaĉo?“ Mi bojis al li: „Voŭ, voŭ!“ Mia mastro revenis en la ĉambron. Li havis la ĉapelon sur la kapo. Li demandis al la servisto: „Ĉu vi ŝatas mian novan hundon?“ La servisto respondis: „Jes, ĝi estas tre bona kaj bela hundo. Mi tre ŝatas ĝin.“ Mia mastro diras al mi: „Venu, Tob!“ Ni iris sur la straton.

Post tio ni faris viziton al fraŭlino. Ŝi malfermis la pordon kaj diris: „Bonvenon, mia karulo!“ Mi komprenis, ke ŝi estas lia fianĉino. Ŝi estis blonda kaj tre bela. Ŝi donis al mi sukeron kaj „matenpantoflojn“ *) kaj diris: „Mi scias, ke hundoj ŝatas

„pantoflojn.“ Mia mastro kaj mi matenmanĝis ĉe ŝi. Neniam mi manĝis pli bonan manĝaĵon. Post la matenmanĝo ni eliris, ŝi, li kaj mi. Ni promenis en parko. Poste ni reiris al nia hejmo tre feliĉaj.

Tio estis la unua tago ĉe mia nova mastro.

★

La dua tago ĉe mia nova mastro:

Kiam mia mastro hieraŭ diris „bonan nokton!“ al la blonda fraŭlino, li diris post kiam li kisigis ŝin: „Morgaŭ, mia karulino, mi ne povas veni al vi, Morgaŭ mi devos viziti mian familion.“ Sed mia mastro mensogis, ĉar hodiaŭ ni iris nek al lia patro nek al lia patrino, sed ni iris — al alia fraŭlino. Ni iris en sian ĉambron. Ŝi iris antaŭ ni per graciaj paŝoj. Mi komprenis, ke ŝi estas dancistino. Ŝi diris: „Mi vidas, ke vi havas belan hundon.“ Ŝi karesis min kaj ludis kun mi. Ankaŭ ŝi donis al mi sukeron kaj „pantoflojn“. Ili eniris en salonon, kaj tie ili manĝis pomojn kaj trinkis vinon. Mia mastro estis tre gaja, la dancistino dancis tre bele. Ŝi prenis min kaj levis. Mi sentis dolĉan odoron. Ŝi metis min sur la plankon. Post tio ni iris hejmen.

Tio estis la dua tago ĉe mia nova mastro.

★

Hodiaŭ estas unu monato, post kiam mi venis al mia mastro. La blonda fraŭlino telefonas al mia mastro. Li respondas: „Mia plej dolĉa karulino, mi ne povas eliri kun vi, sed mi donas al vi mian hundon Tob.“ — La servisto kaj mi iras al la blonda fraŭlino. La blonda fraŭlino kaj mi iras sur la strato. Estas tre bela kaj varma vetero. Sed kiun mi vidas iri apud mi! Estas la dancistino. Mi tre gajigas kaj bojas „Voŭ, voŭ!“ Mia blonda mastrino ne komprenas, kion mi volas. Ŝi diras: „Estu silenta, Tob! Plejbona Tob, estu silenta nun! Kial vi bojas?“ Sed mi ne estas silenta. Mi bojas: „Voŭ, voŭ!“ Mi kuras al la dancistino kaj dancas ĉirkaŭ ŝi. „Tob!“ Ŝi diras, kiam ŝi ekvidas min, „de kie vi venas?“ Mia blonda amikino venas kaj diras: „Tob, venu ĉi tien!“ La blonda fraŭlino demandas al la dancistino: „Ĉu vi konas Tobon?“ „Jes, mi konas Tobon“, ŝi respondas. „Ĝi estas la hundo de mia amiko.“ „Ĉu la mastro de Tob estas via amiko?“ — „Jes, ĉu tio estas stranga?“

La blonda fraŭlino fariĝas tre kolera. Ŝi iras hejmen.

Sed la dancistino iras kun mi al la hejmo de mia mastro. Ŝi demandas al la servisto: „Ĉu la sinjoro estas hejme?“ — „Ne, fraŭlino, sed envenu kaj atendu, li venos post kelkaj momentoj.“ Kiam mia mastro venas, mi iras sub la sofion. Mi ne estas kuraĝa. Ŝi diras al li: „Vi havas du fianĉinojn. Vi ne estas fidela al mi. Se ŝi estus bela, mi komprenus, kial vi estas malfidela. Sed ŝi estas egala al kataĉo.“ Kaj ŝi iras el la ĉambro kun tre malafabla mieno. Mia mastro serĉas min kaj krias: „Kie estas la hundaĉo? Mi disrompos mian bastonon sur ĝia dorso.“ Sed li trankviliĝas. Post unu horo venas la blonda fraŭlino en la ĉambron. Ŝi donas al li multajn leterojn kaj diras: „Tiu estas viaj leteroj, plej kara amiko. Mi esperas, ke vi donos al mi miajn leterojn.“ Ŝi iras el la ĉambro. Mia mastro diras: „Nun mi ne volas plu havi la hundon. Mi havas praktikon.“ Li prenas min, kaj ni iras al la hundvendejo. Li diras al la hundkomercisto: „Tiu hundo ne estas bona hundo. Mi ne volas havi ĝin.“

Kaj nun mi sidas en korbo denove kaj atendas novan mastron.

LOTERIO!

La Nederlanda Ministro de Justeco konsentis prokrasti la tiradon de la loterio por la Esperanto-Domo, ĝis la 1-a de januaro 1933, por ke ĉiuj lotbiletoj povu esti vendataj.

La preciza dato de la tirado estos publikigata en la gazetar.

La Loteria Komitato.

*) Speco de kuko.

la mondo ridas



Justa indigniĝo.

— Bonvolu pagi ĉi tiun kvitancon, sinjoro. Mi mem devas pagi morgaŭ urĝan ŝuldon.

— Kion?! Ĉu mi devas pagi viajn ŝuldojn?

★

La bona eduko.

Knabino: Se vi kisas min, mi krios.

Knabo: Ho ne!... Tiel multaj homoj promenas ĉi tie.

Knabino: Do ni serĉu pli forlasitan lokon. (Hummel)

★

Pika aludo.

— Multajn vojojn havas la akirado de mono, sed honestan vojon nur unu.

— Kaj kiu estas tiu vojo?

— Ha, mi tuj pensis, ke vi ne konas ĝin! (Passing Show)

★

Senlima amo.

— Diru, Vilhelmo, ĉu vi amas min ankaŭ, se mi estus malproksime de vi?

— Kompreneble, mia karulino! Ju pli malproksime vi estus, des pli forte mi amas vin! (Värt Hem)

★

Fakaj konoj.

— Rigardu, la portreto de mia edzino.

— Sendube momenta bildo.

— Pro kio vi pensas?

— Ĉar ŝia buŝo estas fermita. (Schweizer Illustrierte)

★



En muzeo.

— Rigardu, Peĉjo, tia estos tiu, kiu ne volas manĝi la matenan kaĉon. (Ill. Blatt)

Ankoraŭ pli malbone.

— Kiel vi povas toleri, ke oni rakontas pri vi tiajn malveraĵojn?

— Tio ne estas grava. Nur oni ne komencu diri la veron! (De Lach)

★

Al ĉiu la sian.


Fervora komercisto klopodis vendi biciklon al kamparano.

— Ne, — diris la kamparano, — mi preferas aĉeti bovinon.

— Sed kiel? — respondis la komercisto, — Pripensu, ke ĉiu mokus vin, se vi provus rajdi sur bovinon!

— Jes, sed oni pli mokus min, se mi provus melki la biciklon!

★



Dolĉa sonĝo de la ŝtrump-komercisto.

Skolopendro venas por aĉeti ŝtrumpojn...

(Lustige Blätter)

★

Lingvaj scioj.

— Mia filo perfekte parolas angle, france, hispane kaj Esperante, — fanfaronas sinjorino Braun.

— Kio, — miras sinjorino Meier, — ĉu ankaŭ Esperanton li perfekte parolas?

— Jes, kiel indiĝeno, — triumfas panjo Meier. (L.R.)

★

Kompatinda almozulo.

Sinjorino: Kial vi ne laboras? Ĝis nun neniu mortis pro streĉa laboro.

Almozulo: Vi eraras, sinjorino. Mi perdis du edzinojn en tiu maniero. (Haagsche Post)

La sezonoj.

— Ĉu vi iam vidis tian malsekan vintron?

— Jes, dum la lasta somero.

★

La aĝoj.

— Kiom da jaroj vi havas, Peĉjo?

— Mi ne scias. Patrino estis 28-jara, kiam mi naskiĝis, kaj nun ŝi havas 26 jarojn.

★

Havas tempon

Edzino: Kial vi trinkas alkoholon? Ĉu vi ne scias, ke ĝi estas malrapide efikanta veneno?

Edzo: Ne gravas, mi ja ne bezonas rapidi.

★

La lasta rimedo.

— Do vi tamen aĉetis aŭtomobilon por via edzino? Komence ja tiel energie vi kontraŭstaris.

— Jes, sed fine mi devis cedi. La virino komencis kanti. (Muskete)

★

Ho, tiuj bopatrinoj!

— Mia bopatrino post nia edziĝo nur unufoje venis al ni.

— Ho, vi estas vere enviinda knabo!

— Jes, sed ŝi neniam foriris. (Answers)

★

La brava bofilo.

— Kara bopatro, mi promesas al vi, ke mi portados vian karan filinon sur miaj manplatoj, se nur...

— Nu, se nur?

— Se nur vi helpas min, ke mi povu stari sur miaj propraj piedoj. (Herold)

★

En la karbvendejo.

— Sinjorino, ĉu vi ankaŭ nun trovis malpuraĵon en la sako da karbo, lastfoje sendita?

— Male! Mi trovis iom da karbo en la sako da malpuraĵo. (Cheshire Herald)

★

Certa signo.

Sinjorino: Kio okazis, Anjo, ĉu vi malpaciĝis kun via fianĉo?

Kuiristino: Kial vi pensas tion, sinjorino?


Sinjorino: Ĉar jam de kelkaj tagoj la kato ne ŝtelas kolbason el la provizejo. (Ulk)

★

Tamen kredebla.

— Mi, kiel kuracisto, kompreneble tute ne kredas, ke Metuzalemo vivis dum 900 jaroj.

— Kaj mi, kiel pastro, diras, ke tio estas tute facile ebla, ĉar en tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis kuracisto.



La eltrovema kavaliro.

— Mi diras al vi enigmon: Kio estas la diferenco inter la aŭtobuso kaj taksaŭto?

— Mi ne scias.

— Tre bone! Tiam ni iros per aŭtobuso. (College Life)



Kunveno de UEA en Arnhem. — La Nederlanda Teritorio de Universala Esperanto-Asocio la 2-an de Julio havis sian jaran kunvenon en la Esperanto-Domo. Nia bildo montras la kunvenintan Delegitaron sur la teraso de la Esperanto-Domo. La signitaj personoj estas: 1. S-ro Jakob Telling, ĉefdelegito de UEA por Nederlando, 2. D-ro C. J. Baart de la Faille, la Delegito de UEA en Arnhem, 3. S-ro P. J. Vermaas, honora membro de UEA (Rotterdam). — Kiel gastoj partoprenis s-ro H. Moy Thomas, angla ĉefdelegito de UEA el Londono (4).



Kurso en Schiedam. — S-ro S. J. Ysselstein, Delegito de UEA, aktiva membro de la Cseh-Instituto, gvidis dum la printempo kaj somero en Schiedam (apud Rotterdam) kurson por komencantoj. Nia bildo montras la kursanojn kun la senlaca instruisto s-ro Ysselstein (staranta en la mezo).



S-ro Julio Baghy, la fama poeto de Esperantujo. S-ro Baghy dum la printempo kaj somero gvidis Cseh-metodajn kursojn en Parizo kaj kunlaboris por la prezentado de la kongresa teatraĵo.



Al Parizo! — El Nederlando 200 Esperantistoj vojaĝis al Parizo por la Esperanto-Kongreso. Du grupoj veturis per fervojo, kaj unu grupeto per flugmaŝino. Nia bildo montras la momenton de la adiaŭo en la flughaveno de Rotterdam. La personoj (de dekstre): s-ro ing. J. R. G. Isbrücker, Akademiano, s-ino Julia Isbrücker, s-ro Nico H. Slinger, redaktoro kaj f-ino M. Bijleveld, instruistino de Esperanto. — La akompanantoj: Andreo Cseh kaj s-ro J. D. Brakel, prezidanto de la Esp. societo „Merkurio” en Rotterdam, kun sia fileto. (K.L.M.-Foto).



Bildo pri la solena inaŭguro de la „Strato de D-ro Zamenhof” en Barcelono. En la mezo estas videbla la marmortabulo kun la bildo kaj nomo de nia Majstro. Sur la podio estas la urbestro kaj la reprezentantoj de la Esp-istaj organizadoj. En Barcelono, ĉefurbo de Katalunio, okazis la 5-a Universala Kongreso de Esperanto, en la jaro 1909. Ankaŭ D-ro Zamenhof mem partoprenis en tiu kongreso.



S-ro Lilok, ĉina instruisto, fervora propagandisto de Esperanto, kun sia familio. S-ro Lilok ĵus aliĝis al la Cseh-Instituto kaj komencis sian agadon kiel gvidanto de Cseh-metodaj kursoj en la urbo Kanton. Kiel la insignoj montras, gesinjoroj Lilok estas membroj de UEA. Ankaŭ la ĉarma ido portas la verdan stelon, ĝi signifas: „mi ploras Esperante”.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Propagando ĉe skoltoj. — S-ro Carsten Lea, norvega skolto el Oslo, fervora propagandisto de Esperanto, de la 15-Julio ĝis la 16-Aŭgusto vizitas plurajn skolt-trupojn en Londono kaj faras ĉe ili propagandon por Esperanto. — En Debrecen (Hungario) la tuta skolt-trupo n-ro 190 lernis Esperanton. Instruis ilin nia senlaca samideano Kolomano Nagy.

S-ro Kola Ajayi eklaboras. — Nia simpatia kaj talenta negra samideano s-ro Kola Ajayi el Lagos (Afriko), kies portreto ni publikigis en la Januara numero, komencis propagandan vojaĝon tra Eŭropo. Li intencas vojaĝi tra ĉiuj landoj de Eŭropo, farante paroladojn pri sia malproksima kaj nekonata lando kaj pri la vivo de la negroj.

S-ro Jens Schjerve, nia populara norvega instruisto, finis siajn grandsukcesajn kursojn en Norda Francujo (Amiens, Arras kaj Dunkerque). En Arras la Komerca Ĉambro elektis lin kiel honoran membron kaj donacis al li oran honormedalon. En la sukceso de la kursoj grandan meriton havas la fervoraj kaj sindonaj organizintoj de la kursoj. En la sama regiono oni intencas organizi novajn kursojn en la aŭtuno.

Anglujo. — Nia ŝatata propagandisto s-ro W. M. Appleby en Cheltenham gvidis tri bonsukcesajn kursojn. Unu el la kursoj estis speciala kurso por membroj de la Rotaria Klubo.

Estonio. — Okaze de la 300-jara jubileo de la fama universitato de Tartu aperis Esperanto-lingva gvidlibro pri la urbo Tartu kaj serio de propagandaj glumarkoj kun Esperanta teksto kaj bildoj pri Estonio, eldonitaj de la Esperanta Turista Komisiono de Estonio.

Jugoslavio. — Aperis nova gazeto: La Suda Stelo, organo de la Esperanto-movado en Jugoslavio. Ĝia redaktoro estas s-ro Franjo Homar en Slavonski Brod.

Polujo. — S-ro prof. M. Sygnarski, nia meritplena kunlaboranto el Bydgoszcz, dum la monato Julio organizis kaj gvidis kursojn en Gdynia, pola havenurbo ĉe la Balta Maro. — Nia diligenta instruisto s-ro Edward Szajnhole gvidis tre sukcesajn kursojn en Łódź, Tomaszów Masowiecki kaj Zdunska Wola.

La nova Jarlibro de UEA aperis. La dika libro sur 320 paĝoj entenas la adresaron de la UEA-Delegitoj en pli ol 2200 urboj, krom tio la plenan adresaron de ĉiuj Esperantaj organizaĵoj kaj multajn utilajn informojn. La tre valoran libron ĉiu membro de UEA ricevas senpage.

Fabrika uzas Esperanton. — La firma E. Griffiths Hughes Ltd. en Manchester (Anglujo) produktas la sanigan Kruschen-salon. Al ĉiu paketo estas aldonita la uzmaniero en diversaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandojn bonvolu aldoni respondmarkon.

S-ino A. T. en P. — Via demando estas: ĉu meznokto aŭ noktomezo? Nia respondo estas: la ĝusta vorto estas noktomezo, laŭ la reguloj de la vortkunmetado. En ĉi tiu kunmetaĵo la ĉefa vorto estas „mezo“ kaj ne „nokto“. La vorto „nokto“ estas nur adjektiva. Ni ne demandas: kia nokto? (meza nokto), sed: kia (kies) mezo? Respondo: nokta mezo, la mezo de la nokto.

S-ro J. H. en B. — 1. Iri returne aŭ iri returnen. Kvankam ofte uzata, ankaŭ de Zamenhof mem, la uzo de „returne“ ne estas logika. Prefere oni diru: „reiri“, aŭ kun la nova prefikso: „retroiri“. Cetere „returnen“ ne povas esti uzata, ĉar oni iras „en returna maniero“ kaj ne „al returne“. — 2. „Kultivi“ ne troviĝas en Jeremia 36-23. Verŝajne uzata en senco de „kreskigi plantojn“, por rezervi al „kulturo“ la senco de „civilizacio“. — 3. „Ibekso“ estas speco de kaprino (steengeit). — 4. La „hirako“ estas besto (= klipdas). — 5. La vorto „ĉu“ venas de la pola vorto „czy“ (elparolu: ĉi), kiu havas la saman signifon. — 6. Bedaŭrinde ĝia deveno ne estas konata. — 7. La Lingva Komitato kaj Akademio laboras skribi per cirkuleroj, voĉdoniloj k.t.p. — 8. La Akademijaj Korespondantoj estas konsultataj laŭbezone pri lingvaj aferoj. — 9. Puzzle = enigmo, solvota problemo. — 10. Estas vere, ke kelkaj personoj malfacile elparolas la sufikson „ĉj“. Sed estas malbone, ke vi klopodas ĝin solvi per la nederlanda skribmaniero. Tio erarigas. — 11. „Alesti“ aŭ „ĉeesti“. La lasta ŝajnas esti preferinda. Diferenco verŝajne ne estas. — 12. Tri milionoj okcentnaŭdek kvin mil septcent sesdek. — 13. Vi estas prava. Devas esti „sia“. — 14. „Sia estas pli kara, ol la najbara“. Ĉi tie

la vorto „sia“ estas uzata ne kiel refleksiva pronomo, sed kiel adjektivo kun la signifo de la vorto „propra“. — 15. „Mi legis la leteron al mia patro“ kaj „Mi legis la leteron de mia patro“. Ambaŭ frazoj estas dusencaj kaj tial ne konsilindaj. Diru: „mi igis mian patron legi la leteron“. — 16. La tempon „futurum exactum“ vi povas nomi: pasinta futuro. — 17. „Se“ enhavas kondiĉon. „Kiam“ rilatas nur al tempo. Bedaŭrinde, oni ofte miksas ilin, ĉar en kelkaj naciaj lingvoj ili havas ankaŭ saman tradukon. — 18. „Rifuĝiĝus“ estas bona, ĉar ĝi esprimas nereeligantan eblecon. En la dua frazo ŝajnas, ke anstataŭ „por ke“ devas esti „por“. — 19. Similan uzadon vi trovas en „La feino“ en la Fundamento kaj en la Fundamenta Krestomatio.

F-ino A.M.B. en B. — La litero „n“ en komplementoj de tempo aŭ mezuro estas uzata por anstataŭi la prepozicion. Do kiam oni uzas la prepozicion, tiam la litero „n“ forfalas. Ekzemple: Mi laboris la tutan tagon = Mi laboris dum la tuta tago.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

NASKIGIS Andreo Ludoviko IJsselstein en Schiedam (Nederlando) la 11-an de Julio 1932.

KATOLIKA INFORMOFICEJO INTERNA-CIA. — Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika diservo, povas ilin senpage ricevi de la korespondanto M. Goossens, Nobelstraat 10, Brielle (Nederlando), aŭ Herberto Paruzel, Kolegio de P. P. oblatoj en Lubliniec (Silezio, Polujo).

JUGOSLAVIO! — La Int. Cseh-Instituto de Esp. jus malfermigis poŝtekkonton ĉe la Jugoslava Poŝtparko. Ĝia numero estas: Zagreb 41.345. — Abonojn oni povas pagi al tiu konto. Je deziro ni sendas enpagilojn. Abonprezoj: por tuta jaro 60.— dinaroj, por duonjaro 30 dinaroj. — La eldonejo de La Praktiko.

PROPAGANDA MARSADO. — Ĉiujare okazas en Nimego (Nederlando) marsadoj granddistancaj, en kiuj partoprenas multaj personoj el Nederlando kaj el multaj aliaj landoj. La personoj marŝas en grupoj aŭ sole. Mi marŝis sole kaj portis nian verdan stelon. Se ni povus formi Esperantistan grupon, estus granda propagando. Kiuj volas min helpi por formi internacian Esperantan grupon? Por la kvar marŝtagoj la kotizo estas nur 6.50 ned. guld., kio entenas la loĝon kaj nutron. Mi esperas vian intereson kaj helpon. S-ro H. Brand, arkitekto, membro de UEA, en Dordrecht, Nederlando.

BONAN KORON havas: s-ino J. M. Menninga-Wolthers en Wassenaar (Ned.), ŝi bonvolis pagi abonon por malriĉa samideano. Dankon!

Grava libro aperis:

HISTORIO KAJ ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO

de Ir. J. R. G. Isbrücker

membro de la Esperantista Akademio.

Grava por kandidatoj por la B-ekzameno!

Prezo: .75 guld.

Mendebila ĉe la eldonejo de La Praktiko.

La fama supera lernolibro:

PAUL FRUICHTIER:

KOMPLETA GRAMATIKO KAJ VORTFARADO DE ESPERANTO

reviziita kaj kompletigita de

S. GRENKAMP-KORNFELD, L.K.

estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.50 ned. guld.

Al la abonantoj aŭfrankita sendo.

KONKURSOJ


Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

37-a konkurso.

La Esperantistoj ŝatas ne nur lerni, sed ankaŭ frandi. Jen, ĉi tiu konkurso donas okazon al ambaŭ belaj agoj. Se vi solvas la enigmon, vi lernas gravajn vortojn, do faras bonan lingvan ekzercon, kaj ankaŭ gajnas bongustan kaj sanigan premion.

La 146 literojn enmetu en la figuron tiel, ke la linioj donu 22 vortojn kun la dekstre aldonitaj signifo.

a a a a a a a a a a a a a a a a b b b
b c c c d e e e e e e e e e e e e e e f f
g ĝ ĝ i i i i i i i i j k k k k k k l l
l l l l m m m m n n n n n n n n n n n n
o
o o o o o o o o p p p r r r r r r r r r
r r s s s s s s s ŝ t t t t t t t t t t u
u u u u v z



grandega besto
mondparto
paska pano
vira vesto
planedo
parto de la korpo
nomo de monato
kolorŝanĝa besto
ĉefurbo en Eŭropo
tre utila insekto
migranta popolo
geometria figuro
terura malsano
nomo de tago
birda dometo
muzika kunveno
muzika instrumento
longkola besto
juvelŝtono
besto kun pikiloj
ne paroli
legomo





La literoj en la dikaj kvadratoj donas gravan frazon.

Ĉiu solvinto de ĉi tiu enigmo ricevos premion. La premio estas: specimena paketo de la saniga kaj fortiga nutraĵo „SANOVITE”. Inter la premioj estas 15 ĉefpremioj: po unu granda paketo da SANOVITE. La ĉefpremiojn oni disdonos per lotado. La premioj estos sendataj aŭ frankite al ĉiu solvinto.

ATENTU! La solvojn de ĉi tiu konkurso oni devas sendi ne al la redakcio de La Praktiko, sed al la jena adreso: Komerca Societo „DELICAAT”, en Bergen-op-Zoom (Nederlando).

La solvojn oni devas ensendi ĝis la 20-a de Septembro, sur poŝtkarto aŭ en letero. Estas sufiĉe, se oni sendas nur la frazon, kiu estas en la dikaj kvadratoj. Oni devas aldoni la nomon kaj plenan adreson de la solvinto kaj alglui la konkurs-kuponon.

38-a konkurso.



La kvar bildetoj prezentas ĉarman epizodon el la vivo de nia sagaca kaj praktika samideano Petro Nigra.

La tasko estas: Bonvolu mallonge, elegante kaj sprite rakonti la historion. Se vi rakontas en versa formo, ĝi ne povas esti pli longa, ol kvar kvar-liniaj strofoj. Se via animo posedas bonan humoron, ne forgesu enmeti ĝin en vian rakonton.

Per 10 premioj ni rekompencos la plej bonajn laboraĵojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 20-a de Septembro.

39-a konkurso.

ENIGMO

Aj, bo, bo, ca, do, ed, go, ju, kor, lo, lo, ma, mo, nig, omb, ost, po, ra, ran, ro, ro, ro, rost, so, ŝe, to, to, to, tor, ul, un, ur, ur, zo.

El ĉi tiuj 34 silaboj faru 17 vortojn kun signifo:

1. Tia estas la malnova butero.
2. Sur la fingroj estas.
3. Tapiŝo el kreskajoj.
4. Kreskajo kun fortaodoro.
5. Koloro.
6. Dancema besto.
7. Virina vesto.
8. Manĝata akva besteto.
9. Piedvesto.
10. Arbo.
11. La violono havas.
12. Parto de la lando.
13. La elefanto havas.
14. Mallibera viro.
15. La fruktoj havas.
16. Bongusta manĝaĵo.
17. Serĉata en la somero.

La komencliteroj de la 17 vortoj donas la nomon de lando kaj la nomon de ĝia ĉefurbo.

Al la solvintoj ni donos 12 premiojn. Ni akceptas la solvojn ĝis la 20-a de Septembro. — Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn.

Kupono
por la
37-a
konkurso

Kupono
por la
38-a
konkurso

Kupono
por la
39-a
konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.

Se vi volas praktike utiligi vian esperanto-scion, vi havas profiton abonigi al

LA NOVA EPOKO

Tiu ĉi LITERATUR SCIENCA REVUO, eldonata de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (Sidejo en Parizo), aperas jam de kelka tempo kun novaj vestoj kaj arango, kaj ĝia jara abonprezo estas nur 2.50 gmk. (Unuopa ekzemplero kosta 0.50 gmk.) — Pro la fakto, ke ĉiu abonanto de Sennaciulo ricevas „La Nova Epoko“ ĉi tiu lasta, 20-paĝa, grandformata, riĉe ilustrita revuo, fariĝis la plej grava kaj plej disvastigata tiaspeca organo kun sia eldonkvanto de 3000 ekzempleroj.

La lingvosciencia rubriko estas jam kompetente redaktata de profesoro G. Waringhien kaj la kunlaboro de aliaj kompetentuloj estas certigata por la estontaj kajeroj. La aliaj rubrikoj estas ĉefe jenaj: *Literaturo* (poezio kaj prozo originala kaj tradukita); *Scienca*; *La Pago de l'Filozofo*; *Sur la Ekrano*; *Sub la Sagoj de l'Kritiko*. Neniu esperantisto povas malhavi tiun gazeton, se li celas konscie la prosperon de la esperanta movado.

Mendojn kun sumtempa pago oni adresu al Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O, 27 (Germ.)

ESPERANTISTA VIVO

TUTMONDA

OKAZADO

INTERESAJ

ROMANOJ

SPECIALAJ

PAGĈOJ

ABONU!

HEROLDO DE ESPERANTO

fariĝis LA organo de Esperantujo: ĉar ĝi servas al la tuta Esperanto-movado, ĉar ĝi havas objektivan tendencan, ĉar ĝi subtenas ĉian progreson, ĉar ĝia enhavo estas internacia, ĉar ĝia raportado estas rapida kaj aktuala, ĉar ĝiaj lingvoj kaj stilo estas laŭfundamentaj, ĉar la plej eminentaj esperantistoj kunlaboras, kaj ĉar ĝi aperas nepre regule ĉiusemajne jam de post 1920.

HEROLDO DE ESPERANTO

prezentas al vi la okazojn el Esperantujo kaj el la tuta mondo. Unuavice ĝi informas kiel eble plej detale pri la Esperanto-movado; la ĉefartikoloj pritraktas la plej gravajn problemojn esperantistajn. Heroldo informas kaj raportas speciale pri la Universala Kongresoj de Esperanto. Ĉiu numero enhavas la semajnan Esperanto-Radio-programon.

HEROLDO DE ESPERANTO

estas malmultekosta kompare al sia graveco, aktualeco kaj amplekso de 8—10 paĝoj ĉiusemajne. Jarabono kosta 12.- gmk., kvaronjara abono 3.- gmk., mendita ĉe la poŝto aŭ rekte ĉe la eldonejo en Köln. Rekomendiĝas, mendi unumonatan provabonon por la prezo de 0.80 gmk., kun la rajto je senpaga korespondanonceto.

La adreso estas

Köln, Brüßeler Str. 94

Ideala lingva ekzercilo:

La enigmoj

Broŝuro plena de enigmoj por lerni novajn vortojn. La solvoj entenas interesajn kaj sciindajn frazojn pri Esperanto.

1000 premioj al la solvintoj

Ĉiu deka solvinto ricevas premion.

Opinio pri la broŝuro: „*Danĝera libretto! Dum unu tuta nokto mi ne dormis, tiel interesa estis la solvado.*“ (S-ro J. M. en A.)

Prezo: —.15 ned. guld. (= unu respondkupono). Aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

La enigmojn solvis:

Per dikaj literoj ni presas la nomojn de tiuj, kiuj gajnis premion.

(Daŭrigo) 141. Bierhoff, Kreuzlingen. — Raupp, Friedberg. — Halma, Oranjedorp. — Tolstad, Våle. — Nercessian, Genevo. — Horosowski, Varŝavo. — Cornet, Tegelen. — Boom, Nieuw-Lekkerland. — Seppel, Leisi. — 150. Wiesenfeld, Varŝavo. — Kalma, Groningen. — Martensen, Hamburg. — F-ino de Vos, Hago. — P. de Vries, Ginneken. — Tsuji, Osaka. — Taylor, Columbus. — Gasperini, Wien. — Moosbrugger, Bern. — Klockers, Steenwijkerwold. — 160. Forsgren, Granäsby. — Kirsch, Wien. — Nielsen, Aalborg. — Steffensen, Aalborg. — Stegeman, Arnhem. — Häussler, Reichenbach. — Pestinger, Ffm.-Höchst. — Patalong, Bydgoszcz. — E. W. v. d. Burgh, Leiden. — Halma, Oranjedorp. — 170. Halma, Oranjedorp. — Hoppenbrouwers, Valkenswaard. — Vechtman, Hago. — Klock, Apeldoorn. — Govers, Den Helder. — Montes, Los Angeles. — Brandner, Wien. — A. Huber, Wien. — J. Huber, Wien. — L. Huber, Wien. — 180. V. Huber, Wien.

D-ro EDMOND PRIVAT:

Esprimo de sentoj en Esperanto

La fama libro, kiu entenas la interesan universitatan kurson de D-ro Edmond Privat.

Tre utila por personoj, kiuj preparas sin al ekzamenoj.

Prezo: - 75 guld.

Mendebla ĉe LA PRAKTIKO.

Al niaj abonantoj afra-kita sendo.

Nova libro:

RUMANA BONHUMORO

elektitaj bonhumoraj rakontoj de la rumanaj verkistoj: Carageale, Creanga, de Herz, Patrascanu kaj Visarion.

Tradukis: P. Firu kaj S. Pragano

PREZO: broŝurita 1.— guld. (2.— sv. fr.)

tole bindita 1.50 guld. (3.— „ „)

Mendebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO

Afrankita sendo.

KORESPONDU

ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kosta — 45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.

Favore al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ANGLUJO

London, N. 22. — F-ino F. W. Macaulan, 13 Boreham Road, Wood Green. — L, PI, k.ĉ.l., pri kristanismo, paco, amatora fotografado. Kolektas poŝtkartojn pri naciaj lokoj, kutimoj kaj vestaĵoj.

AŬSTRIO

Linz. — S-ro Anton Pöschko, Kaisergasse 5/I. — (27-jara) — L, PI, bfl. k.ĉ.l.

BULGARUJO

Batak (Peŝtersko). — S-ro Dimitre G. Batocov, 35-jara oficisto. — PI, k.ĉ.l. Osman-Pazar. — S-ro Atanas D. Bojagiev, 26-jara instruisto. — Kun Ĉinujo, Japanujo kaj Sovetio, pri natursciencoj, politiko kaj pedagogio Interŝ. muziknotojn.

ESTONIO

Nõmme. — S-ro D-ro Hans Zirk, kuracisto, Raudtee 47. — L, PI, PK, k.ĉ.l., prefere ekstereŭropaj landoj, p.ĉ.t.

FRANCUJO

Strasbourg (Bas-Rhin). — S-ro A. Siefert, inĝeniero, 9 rue de Labroque. — P.ĉ.t.

Strasbourg (Bas-Rhin). — S-ro Jean Wutte, 14 Place d'Austerlitz. — Dez. kor. kun serioza samideano, ankaŭ kun komencanto.

Strasbourg-Robertsau (Bas-Rhin). — S-ro M. Raepenack, 26-jara dent-teknikisto 59 rue Principale. — P.ĉ.t.

HUNGARUJO

Debrecen. — S-ro Kolomano J. Nagy, 35-jara fervojoficisto, Máv-műhely. — Interŝ. PI tutmondajn bfl. kaj PM eŭropajn.

NEDERLANDO

Amsterdam-Zuid. — F-ino Marianne L. Uytendebroek, 19-jara, Govert Flinckstraat 136.hs. — L, PI, k.ĉ.l.

Maassluis. — S-ro C. Breggeman, 17-jara, estonta instruisto, Orfejo, Noord-19. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t. (ne pri religio, literaturo kaj politiko). Ĉiam respondos.

's-Gravenhage. — F-ino Amalia Ditsch, Sweelinkplein 34. — K.ĉ.l.

Wassenaar. — F-ino Poldi Greifeneder, Papelaan 2. — K.ĉ.l.

Warga (Frislando). — S-ro L. Kasje, 20-jara fervojisto. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.

NORVEGUJO

Hamar. — S-ro O. Pehrson, 43-jara fervojkontoristo, Holsetgate 1. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

POLUJO

Slawentyn, p. Lipica dolna, via Lwów-Halicz. — S-ro Simono Krontal, komercisto, 25-jara fraŭlo. — Dez. kor. kun fraŭlinoj, k.ĉ.l.

SVEDUJO

Göteborg. — S-ro Karl Lindqvist, Nordhemsgatan 30. — PI.

Hödsjö. — S-ro Birger Lövgren, Fabriken.

SVISLANDO

Zürich, 1. — S-ro Ernesto Gubler, oficisto, Niederdorfstrasse 2. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., ankaŭ astronomio.

K U R S O

pri la temo:

Nia nutrado kiel kaŭzo de malsanoj; Racia nutrado.

Gvidos: D-ro Y. HETTEMA, dieta kuracisto, Hilversum (Nederlando), en la ESPERANTO-DOMO en ARNHEM, 16—18 Septembro 1932.

Programo:

16 Septembro:	10—11 h.	Generalaj instruoj pri la nutrado.
(Vendredo)	11—12½ h.	Paŭzo.
	11½—12½ h.	Malsanoj pro eraroj en la vitamin-asimilado.
		Posttagmeze: Ekskurso.
	20—21 h.	Malsanoj pro eraroj en la mineral-asimilado.
	21—22 h.	Diskutado.
17 Septembro:	10—11 h.	Malsanoj pro eraroj en la uracid-asimilado.
(Sabato)	11—12½ h.	Paŭzo.
	11½—12½ h.	La ĝusta kunmetado de la menuo.
		Posttagmeze: Ekskurso.
	20—21 h.	Moderna infan-nutrado.
	21—22 h.	Diskutado.
18 Septembro:	Mateno libera.	
(Dimanĉo)	14—15 h.	Moderna nutrado en la moderna vivmaniero.
	15—16 h.	Diskutado. Fermo.

Kotizo por la tuta kurso: 3.50 ned. guld.

Dum la kurso la kuirado en la restoracio de la Esperanto-Domo okazos laŭ la instruata doktrino kaj tial la partoprenantoj de la kurso povos tuj sperti ankaŭ la praktikon de la moderna nutrado kaj ellerni la manieron de la kuirado.

La partoprenantoj de la kurso povos loĝi en la Esperanto-Domo mem, kiu kalkulos por la kursaj tagoj la pensionan prezon (vidu ĉi tie dekstre!).

La kurso okazos en nederlanda lingvo.

La aligon kun la kotizo kaj 2-taga pensionprezo oni sendu al: Intern. Cseh-Instituto de Esperanto, Oostduinlaan 32, Hago. (Telefono: 116720. Poŝtekkonto: 162626).



La ESPERANTO-DOMO, en la mezo de belega vasta parko, estas malfermita dum la tuta jaro. En la domo estas kursejo, biblioteko, konversacia salono, restoracio kaj hotelĉambroj por 50 gastoj, kun moderna komforto (banejo, centra hejtado kaj en ĉiu ĉambro fluanta akvo).

Prezoj: Ĉambro kun matenmanĝo (5—10 personoj en unu ĉambro): 2.— ned. guld., (2—4 pers.) 2.25 guld., (nur unu pers.) 2.50 guld. Lunĉo: .75 guld., tagmanĝo 1.50 guld. Ĉe restado de minimume 5 tagoj plena pensio (ĉambro kaj la tri manĝoj) kosta por unu tago 3.25, 3.75 aŭ 4.25 guld. laŭ la rango de la ĉambro. Servumo 10%.

La Esperanto-Domo estas atingebla de la stacidomo per la tramlinio 1. Kontraŭ la elirejo de la stacidomo estas la garaĝo D. de Rijk, kie estas haveblaj aŭtomobiloj je malalta tarifo.

Adreso Esperanto-Domo, Arnhem. Tel. 26060

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
9-a numero



Septembro
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POŝTEKKONTO
162626

Senpage al Arnhem!

La belega ĝardenurbo de Nederlando dum la lasta somero denove gastigis internacian societon de Esperantistoj. Dum kvar semajnoj flirtis la verdstela flago sur ĉiu tramvagono de Arnhem kaj la urbo kun siaj belaj promenejoj kaj ekskursejoj resonis de eleganta kaj gaja parolo Zamenhofa.

La Esperanto-Domo kolektis al siaj internaciaj kursoj grandan aron de gesamideanoj el dek-unu diversaj landoj. En Julio okazis internacia kurso por komencantoj, en kiu partoprenis kvardeko da personoj. En Aŭgusto estis unusemajna seminario por Cseh-metodaj instruistoj. Kvardek-kvar novaj kursgvidantoj studis la metodon por komenci dum la aŭtuno energian instruadon, disvastigadon de nia kara lingvo.

Post la seminario sekvis internacia perfektiga kurso kun sepdek-unu partoprenantoj. Fine, en la lasta semajno de Aŭgusto, devis okazi ankoraŭ unu komenca kurseto por kelkaj personoj, kiuj venis de malproksime kaj ne volis forlasi Arnhemon ne vidinte la kurson de Andreo Cseh.

La internaciaj semajnoj en la Esperanto-Domo pasis en la signo de serioza studo kaj ĝojplena amikeco. Multaj partoprenantoj en kortuŝa maniero esprimis sian kontentecon kaj decidon reveni en aliaj jaroj.

Estas revo de multaj Esperantistoj viziti foje la Esperanto-Domon kaj partopreni en ĝiaj kursoj. Sed la ekonomiaj cirkonstancoj

malhelpas. La Cseh-Instituto klopodas ebligi al ĉiu la viziton kaj en la lastaj kursoj pluraj partoprenantoj ricevis favorajn kaj senpagajn lokojn.

Por ebligi al ĉiu, eĉ plej malriĉa samideano, partopreni en la kursoj de la Esperanto-Domo, la sindonaj gemastroj de la Domo, *gesinjoroj De Gorter*, iniciatis kaj kreis specialan fondon de kapitalo, el kiu malriĉaj samideanoj ricevos subvencion por povi viziti Arnhemon.

Ĉiuj samideanoj, konsciantaj pri la utileco de la laboro, kiu okazas en la Esperanto-Domo, estas petataj pligrandigi tiun *De Gorter-fondon* per bonvolaj donacoj, kvitancotaj en la Esperanta gazetaro. La donacoj estas sendeblaj al la Esperanto-Domo en Arnhem aŭ al la Int. Cseh-Instituto en Hago.

La subvenciojn disdonos la direkcio de la Cseh-Instituto al tiuj petantoj, kies indecon kaj malriĉecon atestas la loka aŭ landa Esperantista organizaĵo aŭ Delegito de UEA.

Per la helpo de la nova fondo la Esperanto-Domo en Arnhem fariĝos vere hejmo por ĉiu Esperantisto. Ĝiaj pordoj nun pli larĝe malfermiĝas al ĉiu, kiu volas perfektigi en nia lingvo, kiu volas ĝui la praktikon de nia lingvo kaj kiu volas kunhelpi al la realigo de la Zamenhofa granda idealo: internacia frateco. Al ĉiu sonas la alvoko en la kanto al la Esperanto-Domo: „Al Arnhemo iru ĉiuj, tie staras nia Dom'!”

Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Unu numero kostas 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. —
La abona jaro komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. —
Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.), por duonjaro la duono. —
Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

ATENTU! Ni rimarkas, ke multaj partoprenantoj de niaj konkursoj ne atentigas la regulojn. Ni ofte ricevas plurajn solvojn sur unu paperfolio, aŭ solvojn sen nomo kaj adreso de la solvinto. Ĉe ĉiu konkurso ni atentigas ĉiam pri la ĝeneralaj reguloj kaj ni insiste rekomendas plenumi la regulojn, ĉar la juĝanta komitato ne konsideras la nekonformajn solvojn. — La redakcio.

20-a konkurso. La ĝusta solvo de ĉi tiu enigmo estas la jenaj: Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ ekdezo, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberecon, de neniu monopoligitan aeron. El la granda amaso de la ensenditaj solvoj la 10 premiojn ricevis per lotado la solvoj de la jenaj personoj: S-ro C. C. van Dorp-Pilgrim en Oosterbeek (Nederl.). — S-ro L. Dory en Genevo (Svisl.). — S-ro J. Evans en Jelgava (Latvuj). — S-ro J. Goldzier en Bayonne (Usono). — F-ino K. Klockers en Steenwijkerwold (Nederl.). — F-ino C. M. Nicholson en Londono. — S-ino E. Völkel en Würzburg (Germ.). — S-ro I. Williams en Pontypool (Anglujo). — G. Yben en Hengelo-O. (Nederl.). — G. Zlaff en Rakvere (Estonio).

21-a konkurso. La delikata situacio de profesoro Karlson donis zorgon al multaj legantoj de La Praktiko. La envenintaj solvoj estas tre diversaj, sed ni povas ilin dividi en du grupojn. Al la unua grupo apartenas tiuj solvoj, laŭ kiuj prof. Karlson devas rimarkigi al la sinjorino, ke ŝi eraris. La dua grupo proponas tiajn solvojn, en kiuj la sinjorino ne rimarkas sian eraron. La juĝanta komitato elektis por la premiado ĉi tiun duan grupon de la solvoj, konsiderante, ke ĉe la solvo de tia situacio oni ne devas obei la leĝon de ĝentileco kaj delikata takto, do oni devas eviti tion, ke la sinjorino suferas honton aŭ ian ajn malagrablan ĝenon. Sekve de tio la komitato malaprobis la jenajn kaj similajn solvojn: La profesoro diras al la sinjorino, ke li ne estas kelnero, sed profesoro. — Prof. Karlson revenas kun du porcioj da glaciaĵo kaj ili kune manĝas. — La profesoro krias: „Kelnero, unu glaciaĵon al ĉi tiu sinjorino!“ — La profesoro foriras kaj revenas kun vera kelnero, kiu portas du glaciaĵojn. — La profesoro respondas al la sinjorino: „Vi estas ŝapo-baronino.“ (!) K.t.p.

La premiojn ricevis (post la nomo sekvas la solvo): 1. S-ro F. Gateshill en Manchester, Anglujo (La afero estas infane simpla. Mi scias, ĉar mi estas multjara edzo. Dum miaj edzajaroj mi lernis, kiel pritrakti aferojn kun sinjorino. Ekzemple mi lernis la valoron de kompromisado. Supozu, ke mi volas kolorigi mian ŝidoŝanbron blua, sed mia edzino preferas ĝin ruĝa. Nu, la afero estas facile solvebla. Ni faras kompromison kaj kolorigas ĝin — ruĝa! El tio sekvas, ke mi ne argumentas kun eleganta sinjorino, kiu kredas min kelnero. Ŝi kredas, ke mi estas kelnero; mi kredas, ke mi estas profesoro. Tio estas afero por kompromiso. Do, tuj post respektoplena kliniĝo antaŭ ŝi mi kelnera alportas la glaciaĵojn.) Per ĉi tiu sprita solvo s-ro Gateshill gajnis ne nur la unuan premion de la konkurso, sed ankaŭ la admiron kaj simpatian de ĉiuj edzinoj de ĉiuj tempoj kaj lokoj de la mondo. Koran gratulon! — 2. S-ro H. Wagner en Berlin (Prof. Karlson alportu la glaciaĵojn, kvazaŭ li estus vera kelnero kaj post unu semajno li fonda la gravan organizaĵon ILPEDUK = Internacia Ligo Por Enkonduko De Uniformo Kelnera.) — 3. S-ro B. J. von Hebel en Groningen, Nederl. (S-ro Karlson apude alportas la glaciaĵojn al la sinjorino kaj prenas kiel eble plej baldaŭ lian tajloron.) — 4. S-ino A. Schoondermark en Eindhoven, Nederl. (La prof. alportas la glaciaĵojn kaj baldaŭ forlasas la balon, dirante al la mastro, ke li avas kapdoloron.) — 5. S-ro A. Seppel en Leisi, Estonio (S-ro Karlson iru apude por alporti la glaciaĵojn kaj ne revenu plu. Li povas forgesi sian tencon, ĉar li estas profesoro.) — 6. S-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden, Nederl. (Prof. Karlson ne volas montri al la sinjorino, ke li rimarkis ŝian eraron. Ĉar li, kiel profesoro, sendube scias Esperanton, li diras al la sinjorino Esperanto: „Sinjorino, pardonu al mi, mi ne komprenas vin, mi estas ofesofo Karlson.“ Se la sinjorino ne komprenas Esperanton, ŝi tamen komprenas tion, ke la sinjorino ne estas kelnero. Kaj se ŝi scias Esperanton, povas peti la profesoron, ke li helpu ŝerĉi kelneron.) — 7. S-ro Andreo Rubin en Satu-Mare, Rumanujo (Kvankam en delikata societo sinjorinoj petas glaciaĵojn nur pere de akompananto, en la loko de prof. Karlson mi apude portus al ŝi la glaciaĵojn.) — 8. F-ino Chr. J. v. d. Hor en Amsterdam (Se prof. Karlson havas ĝuste „human momenton“, li rapidas al la bufero kaj sendas la glaciaĵojn per vera kelnero. Poste li el trankvila angulo kun ontenteco observas la sinjorinon, kiu ne rimarkinte sian eraron manĝas la glaciaĵojn kun granda apetito.) — 9. F-ino M. Fischer en Vieno (La prof. sendas la glaciaĵojn per la kelnero kaj evitas denove renkonti tiun sinjorinon.) — 10. S-ro G. Danielsson en Lotorp, Svedujo (Prof. Karlson sendas la glaciaĵojn per vera kelnero kaj tuj malaperas en la balsalonojn).

2-a konkurso. La grava frazo, kiun la bestoj diras al la homoj, estas: Ne turmentu nin, sed amu nin. — 15 premiojn la sorto destinis al la jenaj solvintoj: S-ro L. Braet en Nieuwport (Belgujo). — R. Buck en Slav. Brod. (Jugosl.). — S-ro W. A. Cramer Berlino. — S-ino M. Hediger en Genevo. — S-ro G. T. Knol en Coevorden (Nederl.). — S-ro A. Korps en Aloja (Latvuj). — S-ro P. Kütt en Tartu (Estonio). — S-ro A. von Laban en Hamburg (Germ.). — F-ino M. G.

v. Lammeren en Amsterdam. — Esp. societo „Nova Sento“ en Den Helder (Nederl.). — S-ro S. A. Sundin en Arlöv (Svedujo). — S-ro A. Täldepp en Tartu (Estonio). — S-ro K. Vosten en Bramsche (Germ.). — Eugeno Ziedins en Riga (Latvuj). — D-ro M. Zirk en Nõmme (Estonio).

23-a konkurso. La solvo de ĉi tiu konkurso estas: „La kulturo faras el civilizitaj homoj, al kiuj ajn nacio ili apartenas, unu familion.“ La redakcio ricevis grandan amason da solvoj. Inter la solvintoj ni dislotis la 10 premiojn kaj la bonŝancaj gajnintoj estas la jenaj: S-ro E. Cohen en Rotterdam. — S-ro T. Hallerström en Högsjö (Svedujo). — F-ino M. Klassen en Rotterdam. — S-ro H. Michalski en Koronowo (Polujo). — S-ro O. Pehrson en Hamar (Norvegujo). — S-ro A. Piatsek en Oradea (Rumanujo). — S-ro S. Sobota en Bydgoszcz (Polujo). — S-ro J. C. v. d. Vlerk en Voorburg (Nederl.). — S-ro J. de Waij en Amersfoort (Nederl.). — S-ro C. Wiersma en Leeuwarden (Nederl.).

24-a konkurso. Kun plezuro ni konstatas, ke nia reklamkonkurso donis riĉan kaj bonan rikolon. Alvenis multaj taŭgaj tekstoj, el kiuj la juĝa komitato elektis 11 premiindajn. Ni ricevis ankaŭ tiajn tekstojn, kiuj tute ne taŭgas por reklamo, sed ĝuste male, ili fortimigas la publikon de La Praktiko. Ekzemple: Se vi legas La Praktikon, oni forŝtelas vian monon. Aŭ: Se vi volas perdi vian monon, legu La Praktikon. La juĝa komitato tre deziris doni al la verkintoj de tiuj kaj similaj tekstoj ne premion, sed — punon. Sed ĉar Esperantujo ankoraŭ ne havas pundojn, la komitato devis prokrasti tion decidon.



La 11 premiojn ricevis (post la nomo estas la premiita teksto): 1. S-ro A. Seppel en Leisi, Estonio:

Se vi La Praktikon legas,
Tutan mondon vi forgesas.
Sed ĉe pli ol oni ŝtelas
La Praktiko al vi redonas.

2. S-ro M. Cornet en Tegelen, Nederlando:

Li rimarkas, ho, nenion,
Ĉar li legas La Praktikon.

3. S-ino E. Tilstra-Rohdens en Leeuwarden, Nederlando: „Tiru kuraĝe, kamarado! Li rimarkos nenion, ĉar li legas La Praktikon!“ — 4. S-ro A. de Visser en Dordrecht, Nederl.: Li ne rimarkas tion, li legas La Praktikon. — 5. S-ro L. Krysta en Český Tešín, Ĉeĥoslov.: La Praktiko tiel interesa estas, ke por nenio alia intereso restas. — 6. S-ro G. P. Moerman en Apeldoorn (Nederl.): La Praktiko forgesigas ĉion. — 7. Gefratri Fichtner en Radebeul-Dresden (Germ.): 1. La interesa gazeto! 2. Ne aŭdi, ne vidi, nur ĉiam legi! — 8. F-ino F. Aberdam en Łwów (Polujo): La Praktikon ne legu sur la strato, ĉar ĝi estas tro interesa! — 9. S-ro J. Soyeur en Seraing (Belgujo):

Dum sur la strato, haltante,
Viro La Praktikon legas,
Du ŝtelistoj ridetante
Liajn poŝojn malplenigas.
La gazeto estas sprita,
La leganto laŭte ridas.
Tial, intereseĝita,
La du homojn li ne vidas.

Monperd' estos sendolora,
Ĉar la viro havis ĝuojn:
La Praktiko rozkolora
Forgesigas la enuojn.

10. Nivdlab, sen adreso:

Ĉiuj homoj vidu!
Tio estas La Praktiko,
Gazeto sen polemiko;
Aĉeti rapidu!
Nur per amuzajo plena,
Neniam ĝi estas ĝena,
Sed dum vi legas, sidu!

11. S-ino J. Stradal en Aussig a/E. (Ĉeĥosl.):

Vidu, mondo, la efikon!
Viro legas La Praktikon.
Kaj forgesas tempon, horon,
Faciligas ŝtel-laboron.

25-a konkurso. La redakcio ricevis nur unu solan respondon je la demando pri la nomo kaj adreso de la mistera Hipo Krito. Bedaŭrinde la sendita adreso ne estis la ĝusta. Tial ni fermis ĉi tiun konkurson sen rezulto. Hipo Krito povas trankvile plue ridi pri la kompatinda, senhelpa redakcio, kiu vane klopodas transdoni al li (ŝi) la belan premion.

La rezulto de la pluaj konkursoj aperos en la venonta numero.

Faru la kontrolon!

[[La solvo de la 8-a tasko:

Sian stomakon. Sur sia. El siaj onkloj. Lin kiel sian nevon.
— Sia stomako. Sian enhavon. Sian buŝon. Lia plej bona. Al
li. Lia lasta vizito. — Ripozigi sin. Li prenis sian. Sijaj paĝoj.
Lia lando. — Sia grava. Lian atenton. Mortigis lin. Nia adorata.
Sia ĉefministro. Li purigu. Lia amata. Sijaj korteganinoj. Si mem.
Al si sian serviston. Ke li. Kun siaj servistinoj. Sian kronon. Pri
ĝa ago. Sian filon al sia ĉefministro. Ke li. Lian kapon. Per
ĝa. — Lian koron. Sijaj okuloj. Sia poŝo. Sian naztukon. Lia
mortinta. Sia naskiĝtago. Sijaj larmojn. — En sia tuta. Li ekvi-
dis sur sia tuko. Lia kolego. Invitis lin. Per siaj. Lia tuko. Li
konis lin. — Sian horloĝon. Sian ventron. Sia honoro. Lavis
sin. razis sin. Sijajn harojn. Vestis sin. Sian pluvombreton. Lia
kolego. — Sian gaston. Ŝi aŭdis. Li venas. Ŝi svenis. Sia ser-
vistino. Sian amatan. Ŝia kolonja. Sia servistino. Sia ĉambro. Sia
edzino. Sian gaston. Sia sveno. Pro sia. — Li havas. Sia vivo.
Sian kolegon en sian. Al li sian. Sia amiko. Li montris. Al li.
De liaj. — Sian servistinon. Lia gasto. — Sia mastro. Lia gasto.
Sian kolegon. Lia edzino. Ŝi sidigis lin apud si. — Senkulpigis
sin. Pro sia. Li okupis sin. Lia horloĝo. Lia apetito atentigis lin.
— Sian gaston. Lia malfruiĝo. Lia edzino. Lia bopatrino. Plenumi
sian. — Sia kuracisto. Al si. Laŭ liaj. Ŝi tuj. — Sian sekreton.
Li ŝanĝis sian. Li aŭdis. Al sia gastiganto li. — Sian filineton.
Sian kapeton. — Ĉar li. Ke li. Al si. — Sian ĉapelon. Sian
gaston. Lia hejmo. Sia kolego. — De siaj pluvombreloj.

9-a tasko.

La vortojn kiu, tiu ĉi, ĉiu, neniu ni uzas tiam, kiam ni parolas
pri persono. La vortojn kio, tio, io, ĉio, nenio ni uzas tiam, kiam
ni parolas pri objekto. Ekzemploj: 1. Tiu, kiu mortigis iun, estas
ne neniu estimata, sed de ĉiu timata. — 2. En la sako de la sor-
tistino estis io, kio klare montris tion, ke en la mondo ĉio estas
tasma kaj nenio estas eterna.

Sed se la objekto estas nomita, en la vortoj kio, tio, io, ĉio,
nenio la litero „o” ŝanĝiĝas je „u”. Ekzemple: 3. El ĉiuj lingvoj
de la mondo neniu lingvo estas pli simpla, ol tiu lingvo, kiun
lingvon ni lernas; iu alia lingvo ne estas komparebla kun ĝi.

Grava rimarko: Ne estas necese, ke ni ĉiam ripetu la nomon
de la objekto. En la 3-a ekzemplo sufiĉas diri: El ĉiuj lingvoj
de la mondo neniu lingvo estas pli simpla, ol tiu lingvo, kiun
ne estas komparebla kun ĝi.

Kiel vi vidas, la regulo estas treege simpla. Tial ni esperas, ke
vi bone solvos la sekvantan taskon. Enskribu ĉie la literon „o”
aŭ „u” kaj poste kontrolu vian laboron per la solvo, kiu aperos
en la Oktobra numero.

LA JUBILEA LIBERTEMPO.

(Vera historio)

La urbo Kotburgo, pri ki... ni aŭdas en ĉi ti... rakonto, estas
inter ĉi...j urboj de la mondo ti... ki... havas la privilegion
posedi la plej vigan Esperantan societon.

Ti... tute ne estas miriga, se ni konsideras ti...n, ke la prezi-
danto de la Esperanta societo „Eĉ Guto Malgranda” estas ne
... ajn, sed sinjoro Johano Fervor mem, ki... laŭ la scio de ĉi...
oganto de ti... urbo estas la plej energia kaj agema el ĉi...j
samideanoj. Li kaptas ĉi...n okazon por fari i...n por Esperanto
kaj por varbi i...n al Esperanto. Per sia elokventeco li konvin-
cas ĉi...n kaj neni... povas kontraŭstari al liaj argumentoj.

Ne malpli grava persono estas en Kotburgo ti... ki...n oni
nomas „la dekstra mano” de sinjoro Fervor. Ti... persono estas
neni... alia, ol sinjoro Alberto Senlac, la senlaca sekretario de
ti... sama societo, ki...n prezidas sinjoro Fervor: la Esperanta
societo „Eĉ Guto Malgranda”. Sinjoro Senlac estas modelo de
la bona oficisto kaj sekretario: li aŭskultas ĉi...n, estas servema
al ĉi... akurate plenumas ĉi...n siajn taskojn kaj se i... petas
de li i...n, li faras ĉi...n, ki...n li povas.

Dum ti...j dudek jaroj, dum ki...j sinjoroj Fervor kaj Senlac
estris la societon, ĝi atingis grandan floradon. Precipe la lasta
jaro estis el ĉi...j la plej sukcesa, ĉar en ti... jaro plenumiĝis
fine la malnova sopiro: aliĝis al la societo la trideka membro.
Sinjoroj Fervor kaj Senlac decidis festi ti...n grandan sukceson
per eksterordinara jubilea somera libertempo kun vojaĝo al ti...
parto de la lando, ki... promesis doni ĉi...n, ki...n ripozemaj
homoj bezonas.

Enpakinte ĉi...n necesan ili iris kun ĉi...j siaj pakaĵoj al la
stacidomo. Tie ili atendis ti...n vagonaron, ki... iras al la
montaro.

Sinjoroj Fervor kaj Senlac havis bonan ŝancon: trairinte ĉi...n
vagonon ili fine trovis kupeon, en kiu sidis neni... Per siaj
pakaĵoj ili okupis ĉi...n lokon, eĉ ti...jn, sur ki...j ili mem volis
sidi. Sed ti... ne ĝenis ilin. Kiel propagandistoj de Esperanto
ili jam kutimiĝis al ti... ke la mondo ne estas perfekta.

Starante inter la pakaĵoj ili pensadis pri ti... ĉu ili ne forgesis
i...n hejme. Sinjoro Fervor rigardante ĉi...n pakajon demandis:

— Ki... estas en ti... kofro?

— En ĉi ti... kofro, — respondis sinjoro Senlac, — estas
ti...j libroj el nia biblioteko, ki...jn la anoj ankoraŭ ne prunte-
prenis. Ĉar ki...jn ili prunteprenas, ti...jn ili neniam redonas.
Dum la jubilea libertempo mi volas legi rapide ĉi...jn.

— Kaj ki... estas en ti... sako sur ti... kofro?

— En ĉi ti... sako estas ti...j leteroj kun plendprotestoj, ki...jn
nia societo ricevis de ti...j eksterlandaj samideanoj, ki...j ne
ricevis respondon de ti...j anoj de nia societo, ki...j en ĉi...
gazeto anoncis, ke ili deziras korespondi kun ĉi... lando kaj
pri ĉi... temo, sed ki...j respondis al neni...
— Kaj ki...n vi faros kun ti...j plendprotestoj? Ĉu vi respon-
dos je ĉi...?

— Absolutel Bonvolu rigardi, en ti... skatolo estas mil-sescent
poŝtkartoj kun la bildo de la tombejo de Kotburgo. Al ĉi...
plendinto mi sendos unu ekzempleron de ti...j kartoj kaj mi
skribos al ĉi... ke ti... samideano, al ki... oni skribis kaj de
ki... oni atendas respondon, intertempe bedaŭrinde mortis kaj
nun kuŝas precize en ti... tombo, ki... estas signita per krajono.
Per ti... mi savos la honoron de nia societo kaj de ĉi... ĝia ano.

— Ĉi... ki...n vi diras kaj faras, estas ege saĝa. Sed ki...
estas en ti... kartona skatolo, ki... kuŝas en ti... angulo?

— En ĉi ti... skatolo estas ĉi...j kvindek-sep kaŭĉukaj stam-
piloj de nia societo.

— Tre bone! Metu sur ĉi...n leteron almenaŭ sep stampojn,
ĉar ti...j leteroj, sur ki...j ne estas multaj stampoj, imponas al
neni... Kaj ti... kestego sub ti... benko? Ki...n ĝi enhavas?

— En ti... kesto estas ti... granda marmorbloko, ki...n mi
ricevis donace de ti...j, al ki...j mi instruis Esperanton.

— Sed kial vi portas kun vi ankaŭ ti...n marmorblokon?

— Ĉar mi volas dum ĉi ti... tuta jubilea vojaĝo memori pri
ti... kiel dolĉa kaj facila afero estas labori por Esperanto.

Tiel interparolis ili pri ĉi... kaj neni... ĝis kiam fine la vago-
naro alvenis al ti... stacio, ĉe ki... ili devis eliri. La nomo de ti...
stacio estas Koksterk kaj ĝi kuŝas ĉe la piedo de ti... monto,
sur ki... ili volis pasigi la jubilean libertempon.


Elmetinte ĉi...n siajn pakaĵojn kaj pensante pri ti... ĉu ili
ne forgesis i...n hejme, kun teruro ili konstatis ti...n, ke ili
forgesis hejme ti...n, ki... por vera Esperantisto estas la plej
grava kaj la plej kara en ĉi... loko kaj en ĉi... tempo: la verdan
stelon.

Ki...n fari? Ili estis malfeliĉaj. Sinjoro Fervor proponis ti...n,
ke ili tuj revojaĝu al Kotburgo. Sed en ti... momento sinjoro
Senlac ekmemoris pri ti... ke li havas kun si ĉi...n kaŭĉukajn
stampilojn de la societo, inter ki...j troviĝas ankaŭ la stampilo
de la verda stelo. Li rapide malfermis ti...n skatolon, elprenis
ti...n stampilon kaj stampis sur la frunton de la prezidanto belan,
grandan verdan stelon. Post ti... sinjoro Fervor faris la saman
al la brava sekretario.

Kaj nun neni... mankis plu, ke ili povu pasigi ĉi...n minuton
de la jubilea libertempo en plena feliĉeco.

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj



JEAN-ANTOINE CHAMPIONNET
(1762—1800)

franca generalo estis tre brava militisto, sed same grandanima kaj bonvola homo. En la jaro 1795 li alvenis kun sia armeo al la germana urbo Frankfurt. Tie atendis lin batalo kun la prusoj. Sed kiam li ekvidis ĉirkaŭ Frankfurt la belajn kampojn kovritajn de spikoj, li eksentis komal la regiono.

Ni ne detruu ĝin! — diris li kaj iris al la mejlojn, ĝis kampo, kie rikolto.

Li venkis la prusojn.

★

KANG-SI, (1662—1722).

Imperiestro, havis belan ĉevalon. Sed la ĉevalo mortis pro la ĉvalestro. La imperiestro ekkoleras, prenis sian glavon kaj tigi la ĉvalestron. Sed unu el la knoj, Jent-Se, retenis la imperiajn diris:

sinjoro, ĉi tiu homo tute ne konfido grandeco de sia krimo, pro kiu mortpunon.

Do al li, — ordonis Kang-Si. Tio min, krimulo, — diris la ĉvalestro, — mi diros al

viaj pekaj. Vi malsatigis la ĉestron konfidis al via

lo pro tio mortis. Plue, de la justa kolero de

volas mortigi vin per

Kaj fine via grandega

io, ke vi elmetas nian

la malestimo de la tuta

li mortigas homon pro unu

krimegojn vi faris, mal-

friponon, — diris tiam

prenante la kaŝitan ad-

onas al li.

★

HENRIKO IV (1553—1610)

franca reĝo renkontis foje kamparanon, kiu havis blankajn harojn, sed tute nigran barbon. La reĝo demandis:

— Kiel povas esti, ke via barbo estas ankoraŭ tute nigra, kiam vi havas blankajn harojn?

— Reĝa Moŝto, — respondis la kamparano, —

mia barbo estas dudek jarojn pli juna, ol la haroj.

4

VILHELMO II-a,

la eksimperiestro de Germanujo, en la jaro 1896 estis en Kiel kaj faris paroladon al la maristaj rekrutoj. En la parolado la imperiestro atentigis la junajn rekrutojn pri la eksteraj kaj internaj malamikoj. Post la parolado la imperiestro alparolis kelkajn rekrutojn. Al unu li faris la demandon:

— De kie vi estas?

— De Miesbach, — respondis la knabo kun bavara akcento.

— Ĉu vi komprenis, — demandis plu la imperiestro, — kiuj estas la eksteraj kaj internaj malamikoj, pri kiuj mi parolis al vi?

— Jes, Majestolo!

— Do diru, kiu estas la ekstera malamiko?

— La rusoj!

— Kaj la interna?

— La prusoj! — sonis la respondo.

★

VOLTAIRE (1694—1778)



la franca filozofo, verkis dramon sub la titolo „Mérope”. Elie Fréron, la fama kritikisto, akre atakis la verkon antaŭ la prezentado. Sed sur la scenejo la dramo havis grandan sukceson. Tiam Voltaire aperigis la dramon en libro kaj sur ĝia titolpaĝo estis la

bildo de azeno manĝanta foliojn de laŭro. Fréron intertempe ŝanĝis sian kritikon kaj laŭdis la dramon. Ankaŭ pri la libro li skribis favoran kritikon, sed tute serioze aldonis: „Kun la portreto de la aŭtoro”.

★

VITTORIO ALFIERI (1749—1803)

itala poeto ricevis foje la jenan riproĉon:

— Vi antaŭe havis demokratajn principojn. Kial vi nun forlasis ilin?

— Ĉar mi trompiĝis. Kun miaj demokrataj principoj mi trovis komprenon ĉe altrangaj sinjoroj, sed tute ne ĉe la simplaj homoj.

★

WILLIAM EWART GLADSTONE

(1809—1898)

estis angla ĉefministro. Li havis nevon, gimnazianon, kiu en unu tago diris al li:

— Onklo, en la nokto mi sonĝis, ke vi donis al mi kvin ŝilingojn.

— Bone, — respondis Gladstone. — Ĉar en la lastaj tempoj vi bone kondukis, vi povas ilin reteni.

JEAN-JACQUES PELISSIER

(1794—1864)

estis franca marŝalo kaj guberniestro de Algerio. Foje en iu kazerno en Algerio li severe riproĉis unu suboficiron kaj eĉ volis lin frapi. Kiam li levis la manon por frapi la suboficiron, tiu rapide prenis sian revolveron kaj pafis, sed la revolvero ne funkciis.

— Oktaga ĉambra aresto, — diris la marŝalo, — ĉar via armilo estas en malbona stato antaŭ la malamiko.

★

JOHN EASTMAN,

amerika miliardulo, la eltrovinto de la „Kodako”, en sia junaĝo estis telegramportisto. Ofte oni demandis al li, kio estas la sekreto de lia riĉigo? Eastman respondis ĉiam la saman:

— En la vivo nur tiuj povas atingi sukcesojn, kiuj ne faras dufoje la saman stultajon.

★

JOSEPH RUMMEL (1818—1880)

estis germana komponisto kaj fortepianaristo. Li lasis siajn harojn kreski tiel, ke ili jam kovris liajn ŝultrojn. Riĉa sinjorino, ĉe kiu la komponisto ofte faris viziton, havis esperon, ke la artisto edzinigos sian filinon. Nur unu afero ne plaĉis al la familio: la longaj haroj de Rummel. Tial en iu tago la riĉa sinjorino diris al li:

— Kara Rummel, se vi lasos detondi viajn harojn, mi donos al vi mian filinon.

— Sinjorino, — respondis tuj Rummel, — mi konservas miajn harojn, vi konservu vian filinon.

★

NAPOLEON BONAPARTE

(1769—1821),



imperiestro de Francujo, donis foje versperfeston. En la ĉeesto de ĉirkaŭe kvardek personoj li diris al Madame de Lorges, edzino de unu generalo:

— Ho, sinjorino, vi havas teruran veston! Oni faris ĝin el malnova litkovrilo... Ĝi estas germana gusto.

Madame de Lorges, kiu estis germandevena, respondis:

— Tion mi ne scias, ĉu ĉi tiun veston oni faris laŭ germana gusto, sed tion mi povas firme aserti, ke la komplimento de via moŝto ne estas laŭ franca gusto.

la mondo ridas

Ideala servistino.

La dommastrino (al la nova servistino el la vilaĝo): Kiel plaĉas al vi la kuirado per gaso, Minjo? Mi kredas, ke ĝi estas multe pli facila, ol hejme ĉe vi. Ĉu ne?

La servistino: Ho jes, sinjorino! Hejme mi devis ĉiutage ekbruligi la fornon, sed ĉi tie la gasaparato, kiun vi lunde matene ekbruligis, ankoraŭ ne estingiĝis.

★

Kontentigo de la emo.

— Kiu ŝatas muzikon, faru du paŝojn antaŭen! — ordonis la kapitano.

El la vicoj elpaŝis ses soldatoj.

— Ĉar vi estas muzikemaj, vi forportu de la kvara etaĝo el la loĝejo de serĝento Bruno, lian malnovan pianon kaj portu ĝin al la kantino. Formarŝu!

★

Senkulpigo.

Juĝisto: Kiam vi ekvidis la monujon sur la tero, vi tuj povis vidi, ke ĝi ne estas la via.

Akuzito: Jes, sed la mono, kiu estis en ĝi, al mi ŝajnis esti konata.


★

Kruela patrino.

Instruistino: Karlo, ĉu via patro helpis al vi ĉe la hejma tasko: „Kial mi amas la instruistinojn?”

Karlo: Ne, ĉar la patrino ne permesis al li.

★



Edzo: Estas io pri vi en la gazeto, Matildo!

Edzino: Pri mi? Ne ebla!

Edzo: Tamen! Ĉi tie staras, ke en la mondo estas tro multe da virinoj!

(Vårt Hem)

Kortuŝa adiaŭo.

— Ĉu estas vera, ke via fianĉino repaŝis?

— Jes ja. Ŝi eĉ resendis al mi tiun brilantan ringon, kiun mi donacis al ŝi kaj ŝi surskribis sur la paketon: „Rompebla! Vitraĵoj!”

(Judge)

★

Familia bildo.

Edzo: Pri kio vi pensas, mia kara?

Edzino: Pri nenio.

Edzo: Interese! Fine ni havas la saman penson.

(Dimanche Illustré)

★



★

Ruza taktiko.

— Kial vi skribis sur la leteron de s-ro Durand, ke „Konfidenca! Al liaj propraj manoj!”

— Ĉar mi volas, ke ankaŭ ŝia edzino legu ĝin.

(Journal Amusant)

★

La diplomatoj.

— Diru al mi, kial la diplomatoj ĉiam ridetas, kiam ili interparolas?

— Por ke poste ili povu diri, ke la interparolo ne estis serioza.

★

Komuna konto.

— Mi havas kun mia edzo komunan bank-konton.

— Kaj ĉu ne okazas pro tio kelkfoje komplikaj kaj miskomprenoj?

— Ne, neniam! Li enmetas kaj mi elprenas.

La fino de la studo.

— Ĉu estas vera, ke via filo devis ĉesigi siajn muzikajn studojn pro oreldoloroj?

— Jes, miaj oreloj jam ne povis plu toleri.

(Pearson's Magazin)

★

Kuraĝiga.

— La loĝejo plaĉas al mi, mi deziras ĝin lupreni, sed mi esperas, ke en la domo ne ekzistas fortepiano.

— Ho, estas nur unu, sed oni tute ne povas ĝin aŭdi pro la radio-aparatoj.

(Lustige Sachse)

Praktika klarigo.

Instruisto: Kio estas la diferenco inter la vortoj „sufiĉa” kaj „sata”?

Knabo: Kiam mia patrino diras, ke mi devas fini la manĝon, tiam mi manĝis sufiĉe. Sed kiam mi mem trovas, ke mi devas fini, tiam mi estas sata.

★

Fatala profesio.

— La kuracistoj havas multegajn malamikojn en ĉi tiu mondo.

— Jes, sed ankoraŭ multe pli en la alia mondo.

★

Malagrabla demando.

— Panjo, diru al mi, kial patro ne havas harojn sur la kapo?

— Ĉar li estas saĝa kaj li multe pensas.

— Sed panjo, kial vi havas tiel multajn harojn?

(Jaunakas Zinas)

★

En policejo.

— Do la edzino forlasis vin?

— Jes, antaŭ tri tagoj.

— Kaj kun kiuj vortoj?

— Ĉu mia ĉapelo ne sidas malrekte?

(Wróble na dachu)

★



Familia sceno en Afriko.

— Kiel? Mi donis al vi la manon de mia fratino kaj vi rifuzas doni al mi la piedon de via onklo?

(Ric et Rac)





SEMINARIO POR CSEH-METODAJ INSTRUISTOJ EN ARNHEM. — Post la Pariza kongreso 44 instruantoj de Esperanto el 11 landoj kunvenis en la Esperanto-Domo en Arnhem por studi la instrumentodon de Andreo Cseh. Nia bildo prezentas grupon de la partoprenantoj sur la teraso de la Esperanto-Domo. La personoj estas, de maldekstre: **Starantaj:** f-ino J. B. Seckel el Almelo (Ned.), f-ino Chr. Keiser el Hago, s-ro R. de Kegel el Aalst (Belgujo), f-ino F. Roth el Solothurn (Svisl.), s-ro P. v. Heyst el Velsen (Ned.), s-ino O'Brien Harris el Londono, s-ro C. Oderkerk el Velsen (Ned.), s-ro H. W. Holmes el Londono, f-ino K. C. Wagenaar el Almelo (Ned.), s-ro C. Baans el Arnhem, s-ro A. Fehr el Köln, s-ro R. v. d. Hoef el Nunspeet (Ned.), s-ro F. Ryser el Solothurn (Svisl.), s-ro J. F. O'Connor el Londono, f-ino M. Jaccard el Morges (Svisl.). **Sidantaj sur seĝoj:** s-ro A. Cseh f-ino A. Nieuwenhuys el Hago, s-ino J. Isbrücker, f-ino J. Eggink el Hago, s-ino D. Gorter mastro de la Esperanto-Domo, s-ino N. Holmes el Londono, s-ro J. Roosdorp el Bussum (Ned.), s-ro J. de Ren el Leiden (Ned.), s-ro D. Bartošik el Uh. Ostroh (Ĉeosl.). **Sidantaj sur la supra ŝtupo:** s-ro A. Strauch el Bottrop (Germ.), s-ro A. de Beus el Utrecht (Ned.), f-ino A. Früh el Sankt-Gallen (Svisl.), s-ro kapitano J. Barcelo el Palma de Mallorca (Hispanujo). **Sidantaj sur la meza ŝtupo:** f-ino B. Bresler sekretario de la Esperanto-Domo, f-ino T. Hooyer el Hago, f-ino K. Rüz el Bern (Svisl.), s-ino Ch. Stegenwalner el Leipzig (Germ.), s-ro J. Telling ĉefdelegito de UEA el Rotterdam, f-ino Th. Simonis el Schiedam (Ned.). **Sidantaj sur la malsupra ŝtupo:** f-ino H. Tushuizen el Amsterdam, f-ino H. v. Campen el Amsterdam kaj f-ino M. v. Lammeren el Amsterdam.

Post la seminario, kiu daŭris dum unu semajno, sekvis unusemajna **INTERNACIA PERFEKTIGA KURSO** en la Esperanto-Domo. Partoprenis 71 personoj el 12 landoj. Post la matena serioza studado estis multa kaj agrabla okazo praktiki la mondlingvon en la ekskursoj tra la belega regiono de Arnhem kaj en la vesperaj amuzaj kunvenoj. La partoprenantoj vivis en la Esperanto-Domo kiel unu granda familio, realigante la idealon de Zamenhof. Oni travivis tie la miraklojn de Esperanto, kiu ebligas al la plej diversaj nacioj amikiĝi kaj kunlabori, ne rimarkante la diferencojn de la diversnacieco. La partoprenantoj, ĉiuj aktivaj laborantoj de nia movado, ĉerpis novajn fortojn kaj entuziasmon al la aŭtuna agado por la ĉiujn kunliganta mondlingvo.



Dekstra bildo: Sinjoro A. L. Moreau, instruisto en Arnhem, aktiva membro kaj kursgvidanto de la Cseh-Instituto, sekretario de la societo „Unu Per Esperanto” en Arnhem, fervora propagandisto de nia lingvo. — Sinjoro Moreau organizis en la jaroj 1930, 1931 kaj 1932 la grandajn publikajn kursojn de A. Cseh, Julio Baghy kaj S. Pragano kaj dum la internaciaj kursoj de la Esperanto-Domo sub lia sperta direktado estis la agrablaj ekskursoj kaj amuzaj aranĝoj, organizitaj de la Ekskursita Komitato. Ĉiu partopreninto de la someraj internaciaj kursoj kun simpatio kaj danko memoras pri la ĉiam helpema sinjoro Moreau, plena de senlaca energio kaj optimismo.



LA KONGRESO. — Dum la unua semajno de Aŭgusto okazis en Parizo la 24-a Universala Kongreso de Esperanto, en kiu pli ol 1600 Esperantistoj el 36 landoj kunvenis, por praktiki la mondlingvon kaj per ĝi la internacian amikecon. Niaj bildoj prezentas kelkajn scenojn el la kongreso. Unua bildo: S-ro Georges Warnier, la meritplena prezidanto de la kongreso, inter la direktoroj de la fama grandmagazeno „Galeries Lafayette“, sur la tegmento de la magazeno, kiu gastigas la kongresanojn per tagmanĝo. Dua bildo: La kongresejo, kie okazis la kunvenoj kaj baloj de la kongreso. Tria bildo: S-ro Hans Jakob, direktoro de



Universala Esperanto-Asocio (Genevo), dum grava interparolo. Kvara bildo: Svedo (s-ro Hägglund), belgino (f-ino Richard) kaj nederlandano (s-ro Slinger) tagmanĝas dum la kongresa ekskurso en la arbaro de Fontainebleau kaj interfratiĝas per Esperanto kaj per la longa franca pano. Kvina bildo (malsupre): Grupo de kongresanoj en naciaj kostumoj en la kongresa balo.

La kongreso pasis en la signo de plena sukceso. Oni prezentis en Esperanta traduko la faman francan komedion „Knock“ (La Triumfo de Medicino) kaj en la Literatura Vespere oni povis vidi kaj aŭdi la plej eminentajn verkistojn de Esperantujo.



ERAROJ

En ĉi tiu rubriko ni regule aperigas klarigojn pri tiuj eraroj, kiujn oni ofte faras en Esperanto. Ni petas niajn legantojn, precipe la instruistojn de nia lingvo, ke ili bonvolu sendi al ni materialon el siaj spertoj.

Ti ne iris al la kongreso pro manko da mono. — Tre ofta kaj tre malbona estas esprimo: „pro manko da mono“. La pozocio „da“ estas uzebla nur ĉe imitado de kvanto, kiam la antaŭ ĝianta vorto mezuras la post ĝi starantan monon. Ĉu la vorto „manko“ esprimas monon? Tute ne! Tiuj esprimoj, en kiuj ni uzas la vorton „da“, respondas je la demando „kiom?“. Do ni kontrolu: *da mono? Manko da mono. Ĝi senmona. En la supra frazo ni devas uzi „lo de mono“.*

Esti riĉa, aĉetu lotbileton! — La frazo la vorto „kiam“ estas ne ĝusta. Anstataŭ ĝi ni devas diri „se“. „Kiam“ signifas tempon, la vorto „se“ kondiĉon. Vi tiuj klare vidos, se ni metas en la frazon anstataŭ „kiam“ aliajn vortojn, kiuj signifas kondiĉon, kion la sola vorto „kiam“ ne fari. *Kiam = en tiu tempo, en kiu tempo. En tiu tempo, en kiu vi volas esti riĉa, aĉetu lotbileton. Ĉi tiun eraron uzon ni devas anstataŭ „se“ oni ofte faras. Atenti!*

INFORMOJ

En tiu rubriko oni sendu informojn aparta papero. Oni redaktu la informojn kiel eble plej mallonge.

— S-ro Geoffrey D. Nash el Slaughter (Anglio) fianĉiĝis kun f-ino Joy Fernau, dancistino.

— Johano Hamvai en Budapeŝto fianĉiĝis kun f-ino Olga Kurbatova el Moskvo (Estonio).

— D-ro Emil Pfeffer edziĝis kun f-ino Maria en Vieno, la 12-an de Aŭgusto.

— S-ro oni povas pensi en Esperanto. (Veni!) oni skribas al ni: Ekskursoj al la insulo Heraklo, kiu en multaj lokoj tre rapide profundas subite perdis la grundon sub siaj piedoj. Je Esperanto-lingva helpkrio: „Venu!“, alia ekstere samideano tuj jetis sin en la akvon kaj savis la samideano, kiu en Norvegujo savis la sveamideano, estis nia konata hungara Esperanto D-ro Ottmar Fischer.

— S-ro Rudolf Blauffeldt, delegito de la Esperanto (Estonio), fervora, helpema kaj amabile, mortis la 4-an de Aŭgusto.

— En TARTU la kursoj de Esperanto finis solene en la urba knabina lernejo. Novaj kursoj, ankaŭ daŭrigaj, estas en Tartu. — S-ro H. Rikand finis bonsukcesajn kursojn la urboj VILJANDI kaj RAKVERE. — Elmar Kauer gvidas kurson en TALLINN por instruistoj.

Kursoj en Norvegujo. — En SOLBORG okazis dum la somero kurso por 70 norvegaj instruistoj, kunvenintaj el la tuta lando. Gvidis D-ro O. Fischer. — En STAVANGER D-ro O. Fischer gvidis sukcesplenan kurson, en kies organizo multe helpis s-ro bankĉefo Wiig, malnova samideano. — En HAMAR komenciĝis nova kurso. Instruas d-ro O. Fischer. — En OSLO komenciĝis kurso ĉe la Laborista Asocio, gvidas ĝin s-ro Sthaberg, sveda Esperanto-instruisto.

— Ges-roj Morariu finis siajn grandajn kursojn en Vieno, en kiuj partoprenis ĉ. 500 personoj. Ĉe la solena kursfina festo partoprenis 700 personoj, inter kiuj la estinta ministro prelat D-ro Innitzer kaj s-ro Hediger de la Internacia Laboroficejo en Genevo. Ges-roj Morariu gvidas nuntempe kursojn en Suda Svedujo (Skanio). S-ro Morariu en la urboj Hässleholm kaj Höör, s-ino Morariu en la urboj Ärlöv, Klagshamn kaj Kävlinge. Ili restos en Svedujo ĝis la novjaro. Poste ili iros versajne al Svisujo.

S-ro Henrik Seppik, instruisto de la Cseh-Instituto, invitita de la Norvega Esperantista Ligo, gvidos kursojn en Norvegujo dum la aŭtuno kaj vintro.

Kursoj en Danujo. — F-inoj Elinjo Pähn kaj Margarete Saxl, instruistoj de la Cseh-Instituto, gvidos kursojn dum la aŭtuno en pluraj danaj urboj.

Kursoj en Polujo. — En TLUSTE, kie ĝis nun ne estis eĉ unu Esperantisto, post grandaj klopodoj nia fervora instruisto s-ro S. Rosenstock gvidis kurson. — En BORSZCZOW okazis kurso por infanoj, tre diligente progresantaj en Esperanto. En la aranĝado de la kurso multe helpis s-ro W. Jägendorf, prezidanto de la „Juda Legio“. La kurso gvidis s-ro S. Rosenstock. — En NOWY BYTOM sukcesan kurson gvidis s-ino Klara Borzykowska. — En LODZ plurajn kursojn gvidis s-ro Ed. Szajnholc. — En KRAKOWO s-ro T. Hodakowski gvidis plurajn kursojn.

F-ino Lidja Zamenhof, la talenta kaj fervora filino de la aŭtoro de Esperanto, kiel instruistino de la Cseh-Instituto en la fino de Septembro komencos gvidi kursojn en la sveda urbo Gävle.

Parizo. — La direkto de la hotelo-restoracio Imperator disponigis grandan salondon, en kiu nia fervora propagandisto s-ro Emilio Ferrari, Esperantista klerano ĉe tiu hotelo, aranĝas ĉiunonate senceremonian Esperanto-istan bankedon kun koncerto kaj balo, nur por verdsteluloj.

La Universala Kongreso de Esperanto en la venonta jaro okazos en Köln. Por la jaro 1934 Stokholmo intencas inviti la kongreson.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

F-ino C. J. A. en Schev. — „Li paligis de timo“ kaj „Li paligis pro timo“. Ambaŭ frazoj estas korektaj. Preferinda estas: „pro timo“.

S-ro A. R. en S.-M. (Rum). — En la venonta jaro La Praktiko havos alian koloron. La nuna koloro estas ne ruĝa, sed roz.

S-ro K. L. en S.-M. (Rum). — La sendita enigmo estas tro malfacila.

S-ro K. M. K. en V.-L. (Sov.). — 1. „Miloj da hektaroj da arbaroj“ estas ĝusta, ĉar la vorto „da“ en ambaŭ fojoj esprimas kvanton. — 2. „Venis tagoj da laboro, rivelado“. Ĉi tie la vorto „da“ estas malĝusta, ĉar la vorto „tagoj“ ne mezuras la laboron. Ni ne demandas: Kiom da laboro kaj rivelado venis? Do ni devas diri: Venis tagoj de

laboro. — 3. „Ili kolektis provizojn da akvo“. Malĝusta. La vorto „provizo“ ne signifas kvanton. Ni ne demandas: Kiom da akvo kolektis ili? Tial ni devas diri: „provizon de akvo“. — 4. „Tiaj donis al ili ion de la akvo, kiun ili kolektis.“ La uzo de la vorto „de“ estas bona ĉi tie. Vidu la regulon en la gramatika leciono de La Praktiko (7-a tasko, punkto 9). — 5. „Mi konas, kion vi diras al mi.“ En ĉi tiu frazo anstataŭ la vorto „konas“ oni devas diri: „scias“. — „Mi scias la novaĵon“ aŭ „Mi konas la novaĵon.“ Ambaŭ frazoj estas bonaj. La vorto „scii“ signifas: koni komplete kaj precize. — „Scii“ neniam povas anstataŭi la vorton „povi“. — 6. „Lasi“ = a) ne teni b) ne preni kun si, c) ne malhelpi. — „Meti“ = transigi ion en difinitan lokon aŭ staton (meti sur la tablon, meti iun en dangeron). — 7. Koncepti = formi ideon pri io. Percepti = akiri konon pri io per la sentorganoj. Kompliki = fari ion malsimpla. Impliki = envolvi en malhelpilojn, en konfuzojn, en malklaraĵojn.

S-ro L. R. en Parizo. — „La rezulto de kiaj konkursoj“ en La Praktiko, n-o 7. Ĝi estas stulta preteraro anstataŭ „niaj konkursoj“. — „La dikulo malfermis al okulojn.“ Estas preteraro. Devas esti „la okulojn“. — S-ro A. demandis pri la mumio: „Kie li estas?“, ĉar li opiniis, ke la mumio estas vivanta viro, apartenanta al la mumia popolo. Parolante pri mumio ni uzas la pronomon „ĝi“.

S-ro W. G. en L. (Ned.). — La respondkuponoj de UEA oni devas antaŭ la dato de la nuliĝo foruzi aŭ reŝanĝi ilin je mono ĉe la Centra Oficejo de UEA aŭ ĉe la Delegitoj de UEA. Ankaŭ la eldono de La Praktiko estas preta ŝanĝi ilin.

ANONCETOJ

TARIFA: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

ESPERANTISTA KLERANO deziras korespondi kun Esperantistaj kleranoj en la tuta mondo nur pri profesiaj aferoj kaj deziras kolekti vizitkartojn kun verda stelo. Adreso: Esperantista klerano Emilio Ferrari, Hotel Imperator, 70 rue Beaubourg, Paris 3, Francujo.

KATOLIKA INFORMOFICEJO INTERNACIA. — Nekatoliki, kiuj deziras informojn pri la katolika diservo, povas ilin senpage ricevi de la korespondanto M. Goossens, Nobelstraat 10, Brichle (Nederlando), aŭ Herberto Paruzel, Kolegio de P.P. oblatoj en Lubliniec (Silezio, Polujo).

PETO. — Por pligrandigi la Esperanto-movadon en nia urbo, nia grupo aranĝos baldaŭ grandan ekspozicion. Ni petas ĉiujn gekamaradojn kaj Esperanto-societojn por helpo. Antaŭan dankon! Adreso: Esperantista Grupo „Libereco“, Zófimo Fernandes Luz, Rua Francisco José Mota 10, Setubal (Portugaliao).

KORESPONDO. — Dudek 17—20-jaraj lernantinoj ĉe la komerca gimnazio „Minerva“, kie Esperanto estas devige instruata, deziras korespondi por perfektigi en la mondlingvo. Respondon garantias ilia lektoro, s-ro Ivan H. Krestanov, ul. 6. Septemvri 2, Sofia (Bulgarujo), al kiu oni adresu la korespondadojn.

DUONPREZA ABONO. — El la 500 disponigitaj duonprezaj abonoj oni mendis ĝis nun 108 abonojn. do restas ankoraŭ 392 tiaj abonoj je dispono. La legantoj de La Praktiko bonvolu atentigi pri tio siajn Esperantistajn geamikojn, kiuj ankoraŭ ne abonas La Praktikon. Detaloj estas troveblaj en la Julia numero de La Praktiko, sur la dua paĝo.

BONKORULOJN atendas kelkaj tre malriĉaj samideanoj, kiuj deziras legi La Praktikon kaj esperas, ke bonkoraj samideanoj pagos anstataŭ ili la abonon.

INSTRUISTO SERĈATA. — Polujo serĉas Cseh-metodan kursgvidanton, alilandan. Proponojn oni sendu al s-ro T. Hodakowski, p.a. prof. O. Bujwid, Lubicz 34, Kraków (Polujo).



Kiom kostas la bestoj?

La grandaj sovaĝaj bestoj, kiujn la cirkoj kaj la zoologiaj ĝardenoj aĉetas, havas tre altajn prezojn, kvankam en la lastaj jaroj pro la ekonomia krizo ankaŭ iliaj prezoj konsiderinde malaltiĝis. La prezo de unu afrika elefanto estas proksimume 7000 dolaroj, sed mezgrandan elefanton oni povas aĉeti jam per 2000 dolaroj. Leonoj kaj tigroj havas la saman prezon: la plej bela ekzemplero kostas 2000 dolarojn. Unu orangutango aŭ gorilo kostas 3000—4000 dolarojn. Ĝirafon oni povas aĉeti per 4000 dolaroj, glacian urson per 2000—3000 dolaroj.

Antaŭdiroj por la jaro 1932.

La astrologo Culomb en Parizo ankoraŭ en la jaro 1931 elaboris la horoskopon de la jaro 1932. Li konstatis, ke en la horoskopo montriĝas multaj malfavoraj influoj, sed tamen la favoraj elementoj estas tiel multaj, ke oni povas antaŭdiri favoran jaron kun komenco de ĝenerala reboniĝo ekonomia. Nun, kiam jam pli ol duono de la jaro pasis, ni povas kontroli la pravecon de liaj antaŭdiraĵoj. Laŭ

sinjoro Culomb en la tria triono de la jaro okazos internacia konferenco de diplomatoj kaj ĝi trovos la vojon por fini la mondkrizon. Inter Germanujo kaj Francujo forte progresos la interproksimiĝo. En Orient-Eŭropo minacos milito inter Rusujo kaj unu el ĝiaj najbaroj, sed Anglujo kaj Francujo forigos la konflikton. En 1932 mortos du ŝtatestroj. Oni faru la kontrolo!

Klubo de sinmortigantoj.

En Novjorko ekzistas stranga klubo, kies membroj devas laŭ la statutoj de la klubo mortigi sin. Tridek personoj fondis la klubon kaj el ili jam kvar personoj mortigis sin. Laŭ la statutoj la anoj devas mortigi sin en difinita vico. Se iu ano ne plenumas sian devon, tiam la aliaj klubanoj mortigas lin. En la lasta tempo tiamaniere la klubanoj mortigis la membron Edvardo Schwartz.

Le plej malkara urbo de la mondo.

Laŭ la konstato de la mondvojaĝantoj la plej malkara urbo de la mondo estas Pekingo, aŭ laŭ la nova nomo Pejpingo, la ĉefurbo de Ĉinujo. Per 20 dolaroj oni

povas lui en la plej bonaj partoj de la urbo luksan palacon por unu monato. Ankaŭ la prezoj de la nutraĵoj estas tre malaltaj. Unu kilogramo da viando kostas 5 usonajn cendojn, unu kokino aŭ anaso kostas nur 10 cendojn. Nur unu objekto estas multekosta, la salo, pro la alta impostado. La prezo de unu funto estas 20 cendoj.

Biero kaj radio.

Ĉe pluraj bier-fabrikejoj oni konstatas la lastaj jaroj, ke konstante malplim la konsumado de biero el barelo kaj al la konsumado de la botela biero. longa tempo oni serĉis la kaŭzon, ĝis unu el la fabrikejoj en sia raporto la klarigon. Laŭ la opinio de la direktorio la kaŭzo estas la radio. populara fariĝas la radio, ju pli familioj enkondukas ĝin, des pli homoj restas hejme, anstataŭ iri bierejon aŭ kafejon. Sed ĉar la ŝatas la bieron kaj ne volas rezigni pro la radio, ili simple aĉetas botelan biero kaj trinkas ĝin hejme dum la aŭskultado de la radio.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 responduponoj). Oni devas respondi je ĉiu ricevita letero.
Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

ŜLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

AŬSTRIO

Wien VI. — S-ro Hans Aitzinger, instruisto, Webgasse 41.
Wien XIV. — F-ino Mary Lippert, edukantino, Rauchfangkehrergasse 10.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Tillisch, poŝto Bokau apud Aussig a/E. — S-ro Franz Fiala, 21-jara komercisto, N-o 32. — PI bfl. k.ĉ.l.

ESTONIO

Tartu. — S-ro Alfred Ilves, 20-jara lernanto, Uus 55-1.

GERMANUJO

Burghausen (Obb.). — S-ro Ferdinand M. Leis, 21-jara studento. — L, k.ĉ.l., pri religiaj kaj lingvaj temoj.
Potsdam. — S-ro Edgar Jeschke, komercisto, Kastanienallee 31.
Potsdam. — S-ino Gisela Jeschke, Kastanienallee 31.

ISLANDO

Reykjavik. — S-ro Baldvin B. Skaffell, 24-jara studento, Thingholtsstraeti 26. — L kun Ĉinujo kaj Japanujo.

LATVUJO

Riga. — F-ino Alvine Birzins, Setas i. 1-16. — PI bfl. k.ĉ.l., kaj grandurbanoj.

Riga. — S-ro Vsevolod Suslov, 18-jara oficisto, Šarlotes PI, L, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe pri edukado kaj popolaj kulturo.

NEDERLANDO

Amsterdam-Zuid. — F-ino Miep G. H. Op 't Land, 18-jara, straat 97 huis. — L, PI, k.ĉ.l.

Maastricht. — S-ro P. M. E. Bingen, komercisto, Poŝtkesto k.ĉ.l., pri fosilioj, grotoj, subteraj koridoroj, amatora foto unua helpo ĉe akcidentoj, moneroj malnovaj.

Rotterdam. — S-ro W. Schmidt, 29-jara komercisto, 1e Midde — Dez. koresp.

Schiedam. — S-ro M. H. Rebers, 22-jara fraŭlo, Goereesche L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Utrecht. — S-ro H. K. Rosema, 20-jara fraŭlo, Hyacinthstraat 43. — PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. L precipe kun mohamedanoj.

NEDERLANDA HINDUJO

Sambodja (Borneo). — La anoj de la Esperanto-Klubo „Fideleco“ dez. koresp. k.ĉ.l.

POLUJO

Radom. — S-ro Józef Duljas, ul. Kozienska 11.

SVEDUJO

Fjärås. — S-ro Gunnar Nilsson, 35-jara pentristo. — L, PK, PI, bfl., k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Högsjö. — S-ro Birger Lövgren, Fabriken.

SVISLANDO

Oerlikon. — S-ro Karlo Schlumpf, bakisto-sukerajisto, 32-jara fraŭlo, Querstrasse 9. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. escepte politiko.

PREMIOJ AL LA KOLEKTANTOJ DE ABONOJ.

Ĝis nun ni donis premion nur al tiuj, kiuj kolektis 7 abonojn. Ili rajtis senpage ricevi LA PRAKTIKON.

Sed kelkaj legantoj atentigis nin pri tio, ke tiu sistemo ne estas tute justa, ĉar estas multaj personoj, loĝantaj en malgrandaj urboj, kiuj klopodas, sed ne sukcesas varbi 7 abonantojn, kaj tial ili ne povas ricevi premion.

Ĉar tiu atentigo estas prava, ni fiksas diversajn premiojn, el kiuj povas elekti ĉiu kolektanto, laŭ la jena sistemo:

I.

a) Tiu, kiu kolektas 7 tutjarajn abonojn, ricevas LA PRAKTIKON senpage dum unu jaro.

b) Tiu, kiu kolektas 7 duonjarajn abonojn, ricevas LA PRAKTIKON senpage dum duonjaro.

II.

Tiu persono, kiu varbas kaj sendas al ni unu tutjaran abondon (aŭ du duonjarajn abonojn), rajtas elekti unu premion el la sekvanta listo.

Tiu, kiu kolektas du tutjarajn (aŭ 4 duonjarajn abonojn, rajtas elekti du premiojn. Kaj tiel plu.

Tiu, kiu kolektas 7 tutjarajn (aŭ 14 duonjarajn) abonojn, rajtas elekti 7 premiojn, aŭ ricevi LA PRAKTIKON.

La kolektanto devas sendi la mendon kun la mono rekte al la eldonejo de LA PRAKTIKO kaj aldoni: „Mi elektas la premio(j)n N-ro(j):”

La mono estas sendebla ankaŭ en letero per poŝtmarkoj (vidu pli malsupre).

La listo de la premioj:

- N-ro 1. La libro „KARLO” de D-ro E. Privat.
 „ 2. La libro „GAJAJ HOROJ” (spritaĵoj, anekdotoj, vortludoj).
 „ 3. La libro „DIBUK” (fama hebrea teatraĵo).
 „ 4. La libro „ANEKDOTARO” de D-ro L. Dreher.
 „ 5. KONVERSACIA LITERATURO, N-oj 1—4.
 „ 6. KONV. LITERATURO, N-oj 5—8 kaj kartona ujo.
 „ 7. KONVERSACIA VORTARO, KONVERSACIA GAZE-TO, LA ENIGMOJ kaj GVIDLIBRO DE ARNHEM.
 „ 8. Kvin Esperanto-ŝlosiloj (libretoj) en diversaj lingvoj.
 „ 9. La NOVA TESTAMENTO (eld. de Brita Biblia Soc.).
 „ 10. La PSALMARO (trad. de Zamenhof).
 „ 11. La libro: „Teksto el la Biblio en 630 diversaj lingvoj”.
 „ 12. Carolfi: Katolika preglibreto.
 „ 13. Esperanta Kantokolekto (kun muziknotoj).
 „ 14. Esperanto-Kantareto por katolikoj (de frato W. van Zon).
 „ 15. 25 poŝtkartoj kun la bildo de la Esperanto-Domo.
 „ 16. 10 foto-poŝtkartoj pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem.
 „ 17. 5 portretoj de D-ro Zamenhof.
 „ 18. „Esperantuja Kanto” kaj „Al la Esperanto-Domo” (du kan-
 toj kun muziknotoj).
 „ 19. Granda verda stelo kun la vortoj „ESPERANTO PARO-
 LATA” (kun truoj, ringo aŭ piedo, laŭ elekto).
 „ 20. Kvin simplaj Esperantistaj insignoj (verda stelo kun pinglo,
 broĉo aŭ butono, laŭ elekto).

Grava novaĵo! La abonprezon al LA PRAKTIKO oni povas sendi de nun

ankaŭ en poŝtmarkoj de la diversaj landoj. Oni sendu purajn, neuzitajn poŝtmarkojn en letero kune kun la abon-mendo. Ni akceptas pagojn en poŝtmarkoj el la jenaj lan-
 doj (Post la nomo de la lando estas la valoro de la sen-
 dotaj poŝtmarkoj por unujara abono. Por duonjara abono
 oni devas sendi la duonan valoron.): Aŭstrio (7 ŝilingoj),
 Belgujo (35 frankoj), Britujo (5 ŝilingoj), Bulgarujo (140
 levoj), Ĉeĥoslov. (33 ĉ. kronoj), Danujo (5 kronoj), Esto-
 nio (3.50 est. kronoj), Finnlando (70 markoj), Francujo
 (25 frankoj), Germanujo (4 markoj), Hispanujo (10 pese-
 toj), Hungarujo (5 pengoj), Italujo (20 liroj), Japanujo
 (3 jenoj), Jugoslavio (60 dinaroj), Latvujo (4.50 latoj),
 Norvegujo (5 kronoj), Polujo (8 zlotoj), Portugalujo (25
 eskudoj), Rumanujo (150 leoj), Svedujo (5 kronoj), Svi-
 sujo (5 frankoj), Usono (1 dolaro).

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Julia numero!

40-a konkurso.

ENIGMO.

La solvo konsistas el 53 literoj. Ĉiu nombro signifas unu literon.

48, 24, 45, 17, nomo de monato.

1, 40, 16, 53, grava meblo.

11, 17, 32, 41, 8, doma besto.

30, 9, 5, 35, 13, 51, 35, 42, nomo de tago.

43, 21, 49, 29, ĉefparto de la korpo.

2, 23, 18, 28, 4, 33, 38, nomo de mondparto.

46, 27, 36, 3, 34, lampeto sur la ĉielo.

50, 14, 39, 42, staranta akvo.

19, 31, 23, 44, 25, 15, 8, parto de la monato.

52, 47, 6, 14, 32, 29, la sinjoroj tenas en la buŝo.

7, 12, 26, 20, 38, estas sur la homo.

10, 8, 48, 18, 13, 53, nomo de sezono.

39, 37, 44, 22, 34, trinkilo.

1 - 53, deklaro de francaj scienculoj pri Esperanto.

Inter la solvintoj ni disdonos 8 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis la 20-a de Novembro.

Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!

41-a konkurso.

„S”-ENIGMO.

Sur la sekvanta paĝo vi vidas desegnaĵon. Ĝi prezentas multajn aferojn.

La tasko estas: Faru liston el tiuj vortoj kun komenc-litero „s”, kies bildon vi trovas en la granda desegnaĵo.

Reguloj: 1. Oni devas meti sur la bildon trasideblan paperon kaj sur ĝi doni numeron al ĉiu objekto kun komenc-litero „s”. Sur alia papero devas esti la vortoj mem kun la donitaj numeroj, en laŭnumera vico. La vortoj devas esti unu sub la alia, en kolonoj.

2. Oni povas meti en la liston nur substantivojn. La substantivo povas esti farita el alia vorto, ekzemple oni povas enmeti en la liston: „sidanto”.

3. Unu vortradikon kun komenc-litero „s” oni povas enskribi en la liston nur unufoje.

Al tiuj personoj, kiuj trovis plej multajn S-vortojn, ni disdonos 15 premiojn.

Solvojn ni akceptos ĝis la 15-a de Novembro.

Bonvolu atenti la ĝeneralajn regulojn!

42-a konkurso.

PRAKTIKA DEMANDO.


Kioma horo estas sur la norda poluso en tiu momento, kiam en Parizo la horloĝoj batas la tagmezon?

Tiujn personojn, kiuj donas al ni ĝustan respondon, ni ĝojigos per 10 premioj.

Templimo: la 20-a de Novembro. — Atentu la regulojn!

Kupono por la 40-a konkurso	Kupono por la 41-a konkurso	Kupono por la 42-a konkurso
--------------------------------------	--------------------------------------	--------------------------------------

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.





Grava informo!

Vi povas pagi
per poŝtmarkoj!

Sendi monon al eksterlando estas ĉiam pli malfacila. Kelkaj landoj tute malpermesis kaj malebligis sendi monon el la lando. Pro tio multaj Esperantistoj ne povas aĉeti librojn kaj aliajn Esperantaĵojn.

La eldonejo de LA PRAKTIKO volas fari servon al la samideanoj, akceptante kiel pagon ankaŭ poŝtmarkojn de la diversaj landoj.

De nun vi povas mendi de la eldonejo de LA PRAKTIKO ĉion, kion ĝi anoncas kaj vi plej komforte sendos la pagon kune kun la mendo en la letero, per la poŝtmarkoj de via lando. Vi ne havos la malfacilan klopodon aĉeti repordkuponojn kaj sendi poŝtmandaton, kaj vi ŝparas la superfluaĵajn elspezojn kaj perdojn de monŝanĝo.

Per ĉi tiu aranĝo ni venkas la barojn, per kiuj la gvidantoj de la landoj malfaciligas la internacian trafikon.

Niaj legantoj certe komprenas, ke la nova aranĝo kaŭzas al ni multan laboron, ĉar poste ni devos reŝanĝi la poŝtmarkojn en monon, sed ni volonte prenas sur nin tiun ŝarĝon, sciante, ke per ĝi ni servas nian legantaron kaj la tutan Esperanto-movadon.

En nia gazeto la prezoj estas indikataj ĉiam en nederlandaj guldenoj. Sendante pagon en poŝtmarkoj bonvolu kalkuli la valoron de la sendotaj markoj laŭ la suba kurz-tabelo:

LA VALORO DE 1.— NED. GULD. EN LA ALIAJ LANDOJ ESTAS:

en Aŭstrio 3.35 ŝil., en Belĝujo 14.— fr., en Britujo 2 ŝil. 4 pencoj, en Bulgarujo 56 levoj, en Ĉeĥoslov. 13.50 ĉ.kr., en Danujo 2.25 kr., en Estonio 1.55 est.kr., en Finnlando 27 f. markoj, en Francujo 10 frankoj, en Germanujo 1.70 markoj, en Hispanujo 5 pes., en Hungarujo 3.— peng., en Italujo 7.80 liroj, en Japanujo 1.35 jenoj, en Jugoslavio 26 dinaroj, en Latvujo 2.10 latoj, en Norvegujo 2.30 kr., en Polujo 3.60 zlotoj, en Portugalujo 12.50 esk., en Rumanujo 67 leoj, en Svedujo 2.25 kr., en Svislando 2.10 fr., en Usono —.40 dol.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registrigi la leteron.

La eldonejo de LA PRAKTIKO.



GRAVA PROPAGANDILO!

Bele ellaborita granda verda stelo el metalo, kun reliefaĵoj kaj literoj. La bildo montras la veran grandecon.

Ĝi devas esti videbla sur ĉiu loko (butikoj, oficejoj, loĝejoj), kie nia lingvo estas uzata, por ke la samideanoj trovu tiujn lokojn kaj por ke la publiko vidu, ke Esperanto vivas.

Fabrikita en tri formoj:

- a) Kun truoj, por fiksi al muro aŭ pordo,
- b) Kun ringeto, por pendigi en fenestro,
- c) Kun piedeto, por starigi en butika fenestro aŭ sur tablo.

Prezo kun sendkosto nur —.35 ned. guld.

La tri diversaj formoj kune nur... 1.— „ „

Ĉe mendo de 10 aŭ pli da ekzempleroj rabato de 30 %.

Afrankita sendo.

Mendu ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

La mono estas sendebla ankaŭ en letero per poŝtmarkoj de via lando.



MALKARA INSIGNO

el metalo, kun bela verda koloro.

Tre taŭga por amasa vendado en kursoj, festoj, ekskursoj. Speciale taŭga kiel festa insigno en kunmeto kun kokardo.

Havebla kun pinglo, broĉo aŭ butono.

Prezo nur 0.10 ned. guld.

Rabato de 30 %, se oni mendas 10 aŭ pli da ekzempleroj.

Afrankita sendo.

Mendebla ĉe LA PRAKTIKO.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

La fama supera lernolibro:

PAUL FRUICHTIER:

KOMPLETA GRAMATIKO

KAJ

VORTFARADO DE ESPERANTO

reviziita kaj kompletigita de

S. GRENKAMP-KORNFELD, L.K.

estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO.

Prezo: 2.50 ned. guld.

Al la abonantoj afrankita sendo.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
10-a numero



Oktobero
1932

INTERNACIA
SEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederland)
TELEFONO: 116720
POŝTEKKONTO
162626

Propagandu!

Revenis la aŭtuno, la sezono de la laboro. Ni pensu ankaŭ pri niaj Esperantistaj taskoj.

Ĉu estas sufiĉe, se ni lernas Esperanton kaj perfektigas nin en ĝi? Tute ne!

Ĉar fakte ekzistas tiaj Esperantistoj, kiuj studas Esperanton, ekzercas ĝin hejme inter la kvar muroj de sia ĉambro, sed ili ne faras eĉ unu paŝeton por ĝin disvastigi. Ili ŝatas kaj admiras nian facilan kaj logikan lingvon, ili ĝuas legante Esperantajn librojn, sed ili nenian intereson havas pri tio, ke ankaŭ la aliaj homoj konu kaj parolu ĝin.

Tiuj samideanoj prave ricevis la moknomon: „porsimemuloj”, ĉar ili volas havi Esperanton nur por si mem. Eble ili eĉ malĝojas, se ankaŭ aliaj homoj lernas ĝin; ili envias la aliajn, kiuj same havas plezuron okupante sin pri Esperanto. Estas speco de ĵaluzo. Feliĉe, la nombro de tiuj porsimemaj samideanoj ne estas granda.

Sed la granda plimulto de la Esperantistoj havas alian ideon. Ni bone scias tion, ke Esperanto povas doni al la mondo multegan utilon kaj ke ĝi kapablas kuraci vundojn, pro kiuj ĝis nun milionoj da homoj suferas. Sed tiu utilo kaj helpo dependas de la nombro de ĝiaj uzantoj.

En tio Esperanto similas al la telefono. La telefono estas sendube tre utila aparato. Sed nur tiam, kiam multaj homoj havas ĝin en siaj hejmoj. Kian valoron havas la

telefono, se nur unu homo havas ĝin? Absolute nenian! Ju pli multaj homoj havas ĝin, des pli utila ĝi estas.

Simile la valoro de Esperanto kreskas kun la nombro de ĝiaj uzantoj. Ju pli multaj homoj parolas Esperanton, des pli utila ĝi estas por la Esperantistoj kaj des pli potenca faktoro ĝi estos en la vivo kaj en la historio de la homaro.

Se ni jam lernis Esperanton, estas nia propra intereso, ke ĝi disvastiĝu. Se ni jam enkondukis en nian loĝejon tiun grandiozan universalan, internacian telefonon, ni rekomendu ĝin, ni disvastigu ĝin, ni enkondukigu ĝin ankaŭ ĉe la aliaj homoj, por ke ni povu per ĝi voki kaj paroli al ĉiun loĝanto de la Tero. Tio signifas: ni propagandu!

Per la propagando ni klopodas al tio, ke

- 1-e: la homoj konu Esperanton,
- 2-e: la homoj lernu Esperanton,
- 3-a: la homoj uzu Esperanton.

Pri ĉi tiuj tri celoj de nia propagando kaj pri la plej efikaj manieroj de la propagando ni parolos en la venontaj numeroj de La Praktiko.

Ni esperas, ke inter la legantoj de La Praktiko ne restos eĉ unu „porsimemulo”, sed ĉiu fervore disvastigos nian karan komunan lingvon. En la propra intereso kaj por la bono de la homaro.

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas jaro: 1 dolaro (250 ned. gul.). por duonjaro la duono. —
La abona jaro komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. —
Unu numero kostas .25 ned. guld. Specimeno sendebla. Reklam-tarifo: 1 paĝo
80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. —
Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

4-a konkurso.

Jam en la Junia numero de La Praktiko ni publikigis la nombrojn, kiujn ni ricevis por ĉi tiu konkurso. Post la kongreso ni ricevis el Parizo de la kongresa sekretario la oficialan informon, ke la 24-a Universala Kongreso de Esperanto havis precize 1619 kongresanojn.

La intenco de la juĝa komitato estis doni la promesitajn 20 premiojn al tiuj solvoj, kiuj ne faras pli grandan eraron ol 100. Sed kun bedaŭro ni konstatas, ke tia respondo venis nur unu sola, de s-ro Jac. Vonk en Zaandam (Nederlando), kiu profetis 1700 kongresanojn. Sekve la komitato decidis doni premion nur al tiu sola partoprenanto de la konkurso kaj la restantajn 19 premiojn ĝi retenas por la premiado de aliaj konkursoj. Ni esperas, ke niaj legantoj pli trafe profetos pri la venontjara kongreso, kiu okazos en Kolonjo (Germanujo).

26-a konkurso.

Ne estas tute facila tasko verki frazojn, kiuj konsistas nur el afiksoj. Niaj legantoj kuraĝe entreprenis la taskon kaj pluraj el ili atingis rimarkindan sukceson. Inter la ricevitaĵoj solvoj la juĝa komitato trovis ok tiajn, kiuj meritis ricevi premion. Ĉi tie ni publikigas la nomojn de la premiitaj partoprenintoj de ĉi tiu konkurso kaj post la nomoj ni citas kelkajn interesajn frazojn. La komitato antaŭ la juĝado forstrekis tiujn frazojn, kiuj ne estis konformaj al la kondiĉoj de la konkurso, plejparte, ĉar ili ne havis sencon. Jen la premiitaj:

1. S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Nederl. (La diseco de la anoj estas malebla. La estro disigis la fiularon. La aĉulo ekigis. Fiulo estas malinda estri. La etulo estas ema diserigi la aĵojn. La estro estas malema disigi la anaron. La ilaro estas en la ilejo. La estrino disigis la etulinaron. La fiularo malebligis al la estro la estradon. Estas ilo de la praulo. Aron disigeman igi ega estas maleblajo. La geidaro de la praulo igis ega. La eksestraro malebligas la reanigadon. La estraro estas ege inda al la anaro. La disigeblo de la eroj estas eta.). — 2. F-ino S. M. Wijers en Hago (La egulo estras la etulon. En la ejo estas uĵaro. La estro estas ano de la aro. La estraro ekigis malindan aninon. Etulo iĝos egulo. En la ujo estas eroj de etaj aĵoj. La indeco de la estro ebligis rearigi la disigintan anaron.). — 3. F-ino L. Vechtman en Hago (La eta iĝos ega. La idoj acigis la ingon de la ilo. La geuloj ebligis al la idoj igi egaj.). — 4. F-ino Chr. J. v. d. Hor en Amsterdam (La anoj malebligis la ekigson de la estraro. Fiuloj emas al estrado. En la ejo de la estraro estas ujo de la ingoj de la iloj de la etulo de la ano de la estraro.). — 5. S-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden, Nederl. (La disaj eksanoj are realigis. La malo de ega estas la eta. Estas maleblajo enigi egan aĵon en etan ujon.). — 6. S-ro Andreo Rubin en Satu-Mare, Rumanujo (La eksanaro estas reanigema. La estrino estras ine.). — 7. S-ro W. Rux en Bydgoszcz, Polujo (La aĵo estas aro de eroj.). — 8. S-ro A. de Visser en Dordrecht, Nederl. (La fiulo estis malema ekigsi).

27-a konkurso.

Inter la legantoj de La Praktiko estas tre multaj, kiuj ŝatas la florojn kaj konas iliajn nomojn, ĉar ni ricevis multegajn solvojn. Ni gratulas al ili, ĉar ilin koncernas la grava frazo, kiu estis kaŝita en la enigmo de ĉi tiu konkurso. La solvo estas: Bona homo amas florojn. La sorto tiel decidis, ke la 12 premiojn ricevas la jenaj personoj: S-ro J. Egger en Gossau (Svisl.). — S-ro A. J. J. Fiet en Blijham (Nederl.). — F-ino H. Förster en Königstein a/Elbe (Germ.). — F-ino A. Gobiet en Papendrecht (Nederl.). — F-ino S. M. Grönloh en Leiden (Nederl.). — F-ino E. Hoestra en Deventer (Nederl.). — S-ro O. Olsson en Höör (Svedujo). — F-ino M. Örn en Stockholm (Svedujo). — S-ino J. H. Poots-Kleyheeg en Dordrecht (Nederl.). — F-ino O. Schenker en Riedholz (Svislando). — S-ino J. Stefančić en Beograd (Jugosl.). — F-ino I. Traumówna en Tarnów (Polujo).

28-a konkurso.

La solvo de ĉi tiu konkurso estas: Majo, Stelo, Placo, Kano, Kafo, Kropo, Perko, Pigo, Kreto, Muso, Pramo, Pilko, Boto, Tiel, Lago, Trono, Rato, Ŝarko, Flava, Pino, Taso, Bojo, Kiam, Ĵoro, Cimo, Kriĝo, Kalo, Brosa, Fojno, Mono = Jean Forge, Saltego trans jarmilojn.

La 10 premiojn ricevis la jenaj solvintoj: F-ino L. Fruchtowna en Slawentyn, Polujo. — S-ro S. Karamančev en Nevrokop, Bulg. — S-ro L. Kerekes en Satu-Mare, Rum. — S-ro H. Mylén en Osby, Svedl. — S-ro M. F. Palma en Setubal, Portug. — S-ro J. Rambousek en České Budejovice, Ĉeĥosl. — S-ro A. v. d. Starre en IJmuiden, Nederl. — F-ino R. J. Touben en Amsterdam. — S-ro V. Veidemanis en Riga, Latvio. — S-ro L. A. Ware en East-Orange, Usono.

29-a konkurso.

La ensenditaj solvoj tion montras, ke la problemoj en ĉi tiu konkurso estas sufiĉe malfacila. En la granda amaso de la ricevitaĵoj respondoj ni trovis nur 34 respondojn kun la ĝusta solvo: la viro rigardas al nordo. La klarigo estas, ke starante precize sur la suda poluso oni povas rigardi nur al nordo, kiel anĝi oni turnas sin ĉirkaŭ sia akso. Ĉar sur la suda poluso ne ekzistas aliaj direktoj. Simile sur la norda poluso ekzistas nur suda direkto.

Inter la malĝustaj solvoj ni trovis diversajn interesajn respondojn. Ekzemple pluraj personoj respondis, ke la viro rigardas al oriento, aliaj opiniis, ke li rigardas al okcidento. Kelkaj personoj asertis, ke la viro ne povas vidi la sunon la 1-an de Aprilo, ĉar en tiu tago la suno tie estas jam subirinta kaj

estas do malluma nokto tie. Sed tio estas eraro. Tio estas vera, ke ĉe la suda poluso la suno subiras la 21-an de Marto. Tamen tio rilatas al la centra punkto de la sun-disko. La supra parto de la disko malaperas nur post kelkaj tagoj, supozante, ke ne estas montoj sur la horizonto.

Kelkaj personoj skribis al ni, ke la tuta demando estas aprila ŝerco. Ne, tute ne! Oni povas vidi, ke la demando estis tute serioza kaj ankaŭ la bildo estas bone desegnita. En la bildo estas nur unu eraro kaj ŝole s-ro T. Indra, ĉefdelegito de UEA en Riga (Latvuj) trovis ĝin kaj atentigis pri ĝi la redakcion. Tiu eraro estas, ke la viro havas tro mallongan ombron. Ĉe tiu pozicio de la suno la ombro devas esti senfine longa.

Ni citas ankoraŭ kelkajn interesajn, sed malbonajn respondojn: „La viro rigardas al la sudo, ĉar la ombro estas malantaŭ li.“ (El Polujo). — „La viro ne povas vidi la sunon, sed povas esti, ke li estas straba.“ (El Nederlando). — „Se li rigardas matene, tiam li rigardas al oriento. Se li rigardas vespere, li rigardas al okcidento.“ (El Svislando). — „Oni povas konstati la ĉieldirekton nur helpe de kompas, ĉar tie la suno ne subiras.“ (El Ĉeĥoslovakio).

Anstataŭ la promesitaj 5 premioj ni disdonas 10 premiojn. Per lotado ilin ricevis la jenaj personoj: F-ino C. J. Antonisse en Scheveningen, Nederl. — S-ro H. Håkansson en Wallåkra, Svedujo. — S-ro Ferd. M. Leis en Burg-hausen, Germ. — S-ro K. Lindqvist en Göteborg, Svedl. — S-ro J. Lux en Berlino. — S-ro H. H. Rippert en Friedberg, Germ. — S-ro K. Schlumpf en Oerlikon, Svisl. — S-ro P. Schwerin en Berlino. — S-ro P. Thorsen en Hillerød, Danujo. — S-ro S. Wabra en Gorkau, Ĉeĥoslov.

30-a konkurso.

La redakcio de La Praktiko estas tre feliĉa vidante, ke multaj abonantoj legas la numerojn kun granda atento de la unua vorto ĝis la laste. Tamen la rezulto de ĉi tiu konkurso tion montras, ke estas tre malfacila afero legi kun absolute plena atento.

Dum la korektado de la Junia numero de La Praktiko ni lasis en la tekstoj 5 preserarojn. Ne pli kaj ne malpli. Ili estas troveblaj:

1. Sur la dua paĝo, unua kolono, tria linio: respondoj = i.
2. „ „ tria „ en la lasta linio de la solvoj: agrablon = o.
3. „ „ kvina „ en la antaŭlasta spritaĵo: ĉipularo = p.
4. „ „ sepa „ sub la supra dekstra bildo: araranta = r.
5. „ „ lasta „ de malsupre en la 12-a linio: publika = p.

El tiuj kvin literoj oni povas fari la vorton „pipro“. Bedaŭrinde el la multaj partoprenantoj de ĉi tiu konkurso neniu trovis ĉiujn kvin preserarojn. Tial neniu meritis ricevi premion.

Tamen, konsiderante la malfacilecon de la tasko kaj la grandan laboron, kiun la konkurstantoj faris, la redakcio volas doni premiojn al tiuj, kiuj ensendis solvon proksiman al la ĝusta solvo.

Inter la respondoj ni trovis 7 tiajn, kiuj donas la vorton „pipo“. Do tiuj sep personoj trovis kvar erarojn. Ni decidis akcepti ĉi tiun solvon kaj sekve ĝiaj ensendintoj ricevas premiojn. Ili estas: S-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden (Nederl.). — F-ino A. M. Gobiet en Papendrecht (Nederl.). — F-ino Margot Rudloff en Berlino. — F-ino C. M. Scheffelaar en Hago. — S-ino H. Soeteman-Rübe en Hago. — F-ino L. Vechtman en Hago. — F-ino S. M. Wijers en Hago.

Inter la malĝustaj solvoj ni trovas la jenajn vortojn: „Paroli“, „Pri“, „Am“ (Kiamaniere? El tio, ke la vorto estas interesa kaj grava, ankoraŭ neniel sekvas, ke ĝi devas esti ĝuste la vorto „ami“!). „Pripenso“, „Proponi“, „Dia principo“, „La Praktiko“. Ni multe miras, ke oni povis trovi tiajn rezultojn. Verŝajne oni rigardis kelkajn ĝustajn vortojn kiel erarojn.

Ĉi tiu konkurso estis ĉiukaze tre interesa eksperimento pri la forteco de la homa atentkapablo. Ĉi tiu kapablo estas granda, sed ne tre...

31-a konkurso.

La solvo de ĉi tiu konkurso sonas jene: La utileco de la lingvo Esperanto estas tiel granda kaj la peno ĝin lerni estas tiel malgranda, ke ĉiu kulturhomo devas fari la provon ĝin ellerni. La ŝlosil-vortoj estis: Dimanĉo, Spegulo, Kravato, Girafo, Sceptro, Hejmo.

Laŭ la decido de la sorto la 10 premiojn ricevis la jenaj solvintoj: S-ro J. Berghs en Arcen, Nederl. — S-ro F. Bergquist en Lärje, Svedl. — F-ino D. Eriber en Londono. — S-ro C. Govers en Den Helder, Nederl. — S-ro A. Hilkersberger en Landeck, Aŭstrio. — S-ro J. B. v. Hoof en Valkenswaard, Nederl. — S-ro W. Kaaij en Utrecht, Nederl. — F-ino M. Lippert en Viena, Aŭstrio. — F-ino M. T. Roussel en Arras, Francujo. — S-ro H. Senn-Winter en St.-Gallen, Svisl.

Ĉiu Nederlandano devas esti ano de la
NEDERLANDA SOCIETO ESPERANTISTA
„La Estonto Estas Nia“

Sekretariejo: Adm. de Ruyterweg 201,
Amsterdam-West.

Faru la kontrolon!

La solvo de la 9-a tasko:

Pri kiu. Ĉi tiu. Inter ĉiuj. Tiu, kiu havas. — Tio tute. Tion, ke. Iu ajn. Kiu laŭ. De ĉiu. De tiu. El ĉiuj. Ĉiun okazon. Fari ion. Varbi iun. Ĉiun kaj neniu. — Tiu, kiu. Tiu persono. Neniu alia. Tiu sama. Kiun prezidas. Aŭskultas ĉiun. Al ĉiu. Ĉiujn siajn. Se iu. Li ion. Faras ĉion, kion. — Dum tiuj. Dum kiuj. El ĉiuj. En tiu. Festi tiun. Al tiu. Kiu promesis. Doni ĉion, kion. — Ĉion necesan. Kun ĉiuj. Tiun vagonaron, kiu. — Ĉiun vagonon. Sidis neniu. Ĉiun lokon, eĉ tiujn, sur kiuj. Sed tio. Al tio. — Pri tio. Ion hejme. Ĉiun pakajon. — Kio estas en tiu. — En ĉi tiu. Tiuj libroj. Kiujn la anoj. Ĉar kiujn. Tiujn ili. Rapide ĉiujn. — Kio estas en tiu. Tiu kofro. — En ĉi tiu. Tiuj leteroj. Kiujn alia. De tiuj. Kiuj ne. De tiuj anoj. Kiuj en ĉiu gazeto. Kun ĉiu. Pri ĉiu temo, sed kiuj. Al neniu. — Kaj kion. Kun tiuj. Je ĉiu. — Tiu skatolo. Al ĉiu. Tiuj kartoj. Al ĉiu, ke tiu. Al kiu. De kiu. Tiu tombo, kiu. Per tio. De ĉiu. — Ĉio, kion vi. Kio estas en tiu. Kiu kuŝas en tiu. — En ĉi tiu. Estas ĉiuj. — Sur ĉiun. Ĉar tiuj. Sur kiuj. Al neniu. Kaj tiu. Sub tiu. Kion ĝi. — En tiu. Tiu granda. Kiun mi. De tiuj, al kiuj. — Ankaŭ tiun. — Ĉi tiu mta. Pri tio. — Pri ĉio kaj nenio. Tiu stacio, ĉe kiu. De tiu. Tiu monto, sur kiu. — Ĉiujn siajn. Pri tio. Ion hejme. Tion, ke. Tion, kio por. Ĉiu loko. Ĉiu tempo. — Kion fari? Tion, ke. En tiu. Pri tio. Kun si ĉiujn. Inter kiuj. Tiun skatolon, elprenis ĉiun. Post tio. — Nenio mankis. Ĉiun minuton.

10-a tasko.

Hodiaŭ ni prezentas al vi rakonton, en kiu mankas la vorteto „la”. Via tasko nun estu: enskribi tiun vorton ĉie, kie ĝi estas necesa aŭ uzebla. Ĉar en la gramatikoj estas multaj reguloj pri la uzado de „la” kaj oni ĝenerale ne konscias pri tiuj reguloj, ni preferas, ke vi solvu la taskon laŭ via „sento”. — Detalaj klarigoj kun multaj ekzemploj estas troveblaj en la Kompleta Gramatiko de Fruictier-Grenkamp, acetebila ĉe la Eldonejo de La Praktiko.

La solvo aperos en la Novembra numero.

KREDO HELPAS.

(Vera historio)

Mikaelo Sortbat estis bona kaj honesta, sed tre malriĉa homo. Li laboris ĉiutage de mateno ĝis vespero, sed mono tre maldike fluis en lian poŝon. Njia Mikaelo estis modelo de bona civitano. Li obeis al leĝoj de lando, en festoj kaj li ornamis sian dometon per nacia flago, en publikaj kunvenoj li pie kantis nacion himnon kaj li preĝis ĉiutage por sano de reĝo. Lia speciala merito estis, ke li tre multe fumis kaj trinkis, por subteni kason de ŝtato. Tamen sorto ne estis favora al Mikaelo. Ofte malsanoj vizitis lian familion, ofte hajlo detruis lian grenkampon kaj foje eĉ lia dometo forbrulis, ĉar ĝi estis asekurita je pli alta sumo, ol kiom ĝi valoris.

Plej granda sortobato al Mikaelo Sortbat estis tio, ke li havis kvin infanojn kaj ĉiuj kvin estis knabinoj. Li ofte plendis pro tio. Ne pro tio, ke ili estis knabinoj, ĉar ili estis bonaj kaj belaj knabinoj. Sed pro tio, ke neniu junulo volis edzinigi ilin, ĉar Mikaelo estis tro malriĉa kaj ne povis doni doton.

Fine tamen aperis serioza junulo en persono de Aleksandro Liphar, kiu montris profundan intereson al Anjo, malplej juna filino de Sortbat.

Tuta familio Sortbat naĝis en feliĉo. Patro kun fiereco rakontis ĉie gravan novaĵon, kiu en

vilaĝa trinkejo vekis plej grandan sensacion.

Mikaelo Sortbat sidis en trinkejo kun brava Aleksandro Liphar kaj ili en granda harmonio trinkis kuraĝigan sukron de montoj. Maljuna Mikaelo post longa hezitado fine kuraĝis fari longe preparitan demandon:

— Kaj diru, kiam vi intencas fari edziĝon?

— Kian edziĝon? — demandis Liphar kun miro.

— Nu, vian! Kun mia filineto Anjo!

— Kion vi pensas? Si estas plej malriĉa knabino en tuta Eŭropo! Ŝi devas havi doton.

Minimume unu bovinon kaj 500 frankojn.

Bona Mikaelo kun peza koro iris el trinkejo sur straton. Unu malgrasan bovineton li havis, sed monon tute ne. Li ne kuraĝis iri hejmen. Li volis forkuri en senfinajn arbarojn de Himalajo aŭ salti en Amazonon. Li pensis iri al Ameriko aŭ al Ĉinujo por perlabori necesan monon. Sed fine li trovis solan bonan ideon: li iris al pastro por peti helpon.

Pia pastro pacience aŭskultis malfeliĉan homon kaj respondis:

— Bona homo, turnu vin kun fido al Dio, li zorgas pri ĉiu.

Mikaelo Sortbat iris hejmen kaj rakontis ĉion al sia edzino Katarino, kiu diris:

— Faru tion, kion pastro diris. Preĝu al Dio!

— Mi jam preĝis, sed ne venis helpo.

— Do tiam skribu!

Mikaelo prenis inkujon kaj paperon kaj skribis: „Ĉioscia kaj ĉiopova sinjoro Dio, vi scias, ke mi havas 5 filinojn kaj ke mi ne povas liberiĝi de ili, ĉar mi estas malriĉa. Aleksandro Liphar volas edzinigi Anjon, sed sentaŭgulo postulas unu bovinon kaj 1000 frankojn. Mi volonte donas grizan bovineton, sed monon mi ne havas. Mi petas, helpu min, por ke mi ne pereu. Via fidela servisto Mikaelo Sortbat. Postskribo: Monon mi bezonas urĝe kaj tuj.”

Post tio Mikaelo prenis koverton kaj surskribis adreson: „Al Dio”. Kaj plej juna knabino kuris kun letero al leterkesto.

En poŝtoŝeĵo poŝtistoj havis malfacilan taskon: Kiel transdoni leteron al adresito? Fine poŝtestro decidis kaj ordonis:

— En nia lando ĉiu letero adresita al Dio devas esti transdonata al lia moŝto reĝo, ĉar li estas anstataŭanto de Dio.

Reĝo ricevis leteron kaj kune kun reĝino longe ridis pri naiveco de vilaĝano. Reĝino diris:

— Mia majesta edzo, ni helpu al kompatindulo. Ankaŭ ni scias, kiel malfacila afero estas edzinigi filinojn.

Al reĝo plaĉis ideo. Li prenis el veŝtoŝo 500 frankojn, enmetis monon en koverton kaj forsendis ĝin al Sortbat.

Granda ĝojo estis en hejmo de Mikaelo Sortbat, kiam alvenis letero. Sur granda koverto brilis vortoj: „De Lia Majesto Reĝo”. Mikaelo kun tremantaj manoj malfermis koverton kaj el ĝi falis 500 frankoj.

Sortbat estis surprizita. Li prenis inkujon kaj skribis novan leteron:

„Ĉioscia kaj ĉiopova sinjoro Dio! Mi ricevis monon kaj mi dankas. Mi petis 1000 frankojn, sed en koverto mi trovis nur 500 frankojn. Se mi denove skribos al vi, bonvolu sendi monon ne per reĝo, ĉar ankaŭ li havas filinojn. Via dankema servisto Mikaelo Sortbat.”

Kaj plej juna knabino rapide kuris kun letero al poŝtestro.

ALA VENKO!

AL NIAJ LEGANTOJ!

Ni malfermas novan paĝon, sur kiu ni regule publikigos de nun la novaĵojn pri la pli gravaj sukcesoj de Esperanto. Tion ni faras kun du celoj:

Unue, por ke niaj legantoj estu precize informataj pri la konindaj progresoj de nia lingvo.

Due, por ke la propagandistoj de Esperanto havu sisteman registron pri tiuj faktoj, kiujn ili ofte bezonas mencii dum la propagando.

Por faciligi la serĉadon de la apartaj informoj, ni donas al ĉiu informo numeron kaj de tempo al tempo ni publikigos tabelon, en kiu la samspesaj informoj estos grupigitaj. Tiamaniere niaj legantoj ricevos kompletan kaj sisteme ordigitan liston de ĉiuj konindaj faktoj pri la progreso de nia movado.

Ni alvokas nun ĉiujn legantojn de LA PRAKTIKO, ke ili bonvolu sendi al ni sciigon (sur aparta paperfolio) ĉiam tuj, kiam io pli grava okazis. Ĉar ni publikigas ankaŭ la bildojn de la pli gravaj dokumentoj, oni bonvolu sendi al ni ankaŭ klišojn aŭ fotografiaĵojn, kiujn ni mem klišigos.

Ni rekomendas al niaj legantoj, ke ili traduku la informojn troveblajn sur ĉi tiu paĝo kaj klopodu aperigi ilin en siaj lokaj nacilingvaj ĵurnaloj. Per tia valora propaganda laboro Esperanto pli rapide proksimiĝos al la venkol

La redakcio.

Komitato fondiĝis, ĝia prezidanto estas urbestro *Bönnner*, vicprezidanto estas urba lerneja konsilisto *Theile*. La kunsidoj de la kongreso okazos en la Kongresa Palaco de la urbo Köln. Ĝis la 20-Sept. 1932 aliĝis 103 kongresanoj el 15 landoj.

5. Poŝtistoj uzas Esperanton. — En Amsterdamo, ĉefurbo de Nederlando, en la jaro 1932 sesdek poŝtistoj lernas Esperanton en kursoj. Ĉe la ĉefa poŝtoŭicejo de Amsterdamo 24 leterportistoj scias Esperanton kaj ili portas la verdan stelon sur la uniformo. (Bildon vidu en *La Praktiko*, numero 6.)

6. Komerca Ĉambro por Esperanto. — En la urbo Limoges (Francujo) okazas kurso gvidata de s-ro Gicquel sub la honora patronado de la tiea Komerca Ĉambro.

7. Ŝtatestro kiel protektanto de Esperanto-kongreso. — La protektanto de la 24-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo estis s-ro *Albert Lebrun*, prezidanto de la Franca Respubliko.

8. Registaroj reprezentas sin en Esperanto-kongreso. — En la 24-a Univ. Kongreso de Esperanto en Parizo reprezentis sin per delegito la jenaj 11 ŝtatoj: Belgujo, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Estonio, Germanujo, Hungarlando, Liechtenstein, Nederlando, Norvegujo, Polujo kaj Rumanujo.



Trafik-signaloj kun teksto en Esperanto en la urbo Cagnes-sur-Mer (Francujo).

9. Urbaj trafik-signaloj en Esperanto. — En la urbo Cagnes-sur-Mer (Francujo) oni starigis signal-fostojn kun dulingva teksto: franca kaj Esperanta, por komplezi kaj helpi al la eksterlanda vizitanto de la urbo. (Bildon de tia fosto vidu supre. La iniciatinto de ĉi tiu notinda sukceso de Esperanto estas s-ro *Jean Guerrini* en Cagnes-sur-Mer. Ni alvokas niajn legantojn klopodi, ke ankaŭ aliaj urboj sekvu ĉi tiun imitindan ekzemplon. Oni devas atenti pri tio, ke la tekstoj estu mallongaj, klaraj, gramatike korektaj kaj internacie kompreneblaj ankaŭ por personoj ne sciantaj Esperanton. La redakcio de *La Praktiko* volonte helpas en la redaktado de la tekstoj.)

1. La Ligo de Nacioj por Esperanto. — La Ligo de Nacioj en Ĝenevo komencis okupi sin pri Esperanto en la jaro 1920, je la propono de siaj delegitoj el 11 ŝtatoj. Por ricevi la necesan informan materialon ĝi komencis en la jaro 1921 internacian enketon pri la instruado kaj uzado de Esperanto kaj dum Pasko de la jaro 1922 ĝi aranĝis internacian konferencon en Ĝenevo pri la instruado de Esperanto. Laŭ la kolektita materialo la ĝenerala sekretario de la Ligo sub la gvidado de la japana d-ro *Inazo Nitobé*, tiama vic-ĉefsekretario de la Ligo, ellaboris ampleksan kaj tre favoran raporton, kiun la Tria Plenkunveno de la Ligo en Septembro de 1922 akceptis. En la jaro 1924 la Ligo de Nacioj faris favoran rezolucion, en kiu ĝi rekomendas deklari Esperanton kiel „klaran lingvon” en la internacia telegrafado. (La raporto de la sekretario de la Ligo de Nacioj, en la lingvoj angla kaj germana, estas havebla ĉe la eldonejo de *La Praktiko*.)

2. La Aŭstria Fervojo por Esperanto. — La Direkcio de la Aŭstria Federaciaj Fervojoj la 5-an de Septembro 1932 sub numero 13560 decidis organizi Esperanto-kursojn por la fervojistaro, sub la gvidado de reg. kons. H. Steiner kaj ĝi direktis al la tuta fervojistaro varman rekomendon lerni Esperanton. — Ĉe la elektado de konduktoroj por la internaciaj vagonaroj la Fervojdirekcio donas preferon al tiuj konduktoroj, kiuj scias ankaŭ Esperanton. — Fervojistoj sciantaj Esperanton portas la verdan stelon sur la uniformo, jam de la jaro 1924.

3. Grava maŝinfabrika uzas Esperanton. — La mondkonata firma *Fratoj Stork & Komp.*, maŝinfabrika en Hengelo (0), Nederlando, en Aŭgusto 1932 enkondukis en siaj oficejoj la uzadon de Esperanto kaj alvokis la Esperantistan komercistaron al kunlaborado per reprezentado en la produktaĵoj de la firma.

4. La 25-a Universala Kongreso de Esperanto en Köln. — La 25-a Univ. Kongreso de Esp. okazos en Köln (Germanujo), de la 29. Julio ĝis la 5. Aŭgusto 1933, laŭ oficiala invito de la ĉefurbestro de Köln, D-ro *Konrad Adenauer*, prezidanto de la Prusa Stata Konsilantaro. La Loka Kongresa

la mondo ridas

Gusta kalkulado.

- Mi povas elkalkuli, ke vi estas ĝuste 38-jara.
- Kiamaniere?
- Ĉar mi konis foje unu duonfrenezulon, li estis 19-jara.

★

En malliberejo.

Gardisto: Ĉu vi prenis banon hodiaŭ matene?

Malliberulo: Ne..... Ĉu mankas unu? (Haagsche Post)

★

En festeno.

- Ĉi tiuj grandaj versperfestoj estas vere strangaj. Ekzemple mi ne estas invitita, sed tamen neniu rimarkis tion.
- Ankaŭ mi ne estas invitita.
- Ĉu vere? Do kiel vi venis ĉi tien?
- Mi estas la mastro.

(Faun)

★

Komforte.

- Se la Nacia Bildgalerio ekbrulus, kiujn kvin pentraĵojn vi savus plej frue?
- Tiujn kvin, kiuj estas plej proksime al la pordo.

(London Opinion)


★

Eblecoj.

- Vi vojaĝas, sinjoro Brunet? Ĉu plezurvojaĝo?
- Tion mi ne scias ankoraŭ. Mi iras al la malfermo de la testamento de mia mortinta onklo.

(Moustique)

★



Tro frua kritiko.

- Kiam mi komencis senti mian malsanon, antaŭ ĉio mi petis konsilon de mia apotekisto.
- Nu, kaj kian stultajon li rekomendis?
- Ke mi turnu min al vi, sinjoro doktoro.

(Journal Amusant)

En vilaĝo.

- Nu, panjo Maria, ĉu vi aŭdis, ke mia filo gajnis premion en la lernejo?
- Bela, sinjorino, tre bela. Kaj mi povas kompreni vian ĝojon. En la pasinta jaro ankaŭ nia porko gajnis premion en la ekspozicio.

(Nagel's Lustige Welt)


★

Poste restante.

- Ĉu ne estas letero por mi sub devizo: „Dekmil kisoj“?
- Dekmil kisoj? Fraŭlino, tiam vi devas ĝin serĉi en la paketa sekcio.

(Herold)

★



La konscienco riproĉas.

La ŝtelisto de pluvombreloj hejme. (Sondagsnisse Strix).

★

La eta negocisto.

- Joĉjo:** Diru al mi, avo, kiam vi fariĝis avo?
- Avo:** Kiam vi naskiĝis, Joĉjo.
- Kaj se mi ne estus naskiĝinta, ĉu vi ne estus avo?
- Certe ne!
- Do nun kion vi donas al mi pro tio?

(Bunte Blatt)

★

Varma interesiĝo.

Flegistino: Tiu filmaktoro, kiun antaŭ unu horo oni portis en la malsanejon, estas vere bonaspekta viro.

Kuracisto: Jes, sed tamen ne mezuru lian temperaturon. Li jam plendis, ke unu post alia kvar flegistinoj mezuris lian febron.

(Hummel)

★

Rekomendinda rimedo.

- Ĉu efikas al vi la medikamento, kiun mi rekomendis al vi kontraŭ reŭmatismo?
- Ne, tute ne!
- Interese! Ankaŭ al mi ne!

(Passing Show)

★

La pantofla heroo.

- Se mi estus en via loko, mi montrus al la virino, kiu estas la estro en la domo.
- Superflue, ĉar ŝi jam scias.

(Judge)

Investado.

- Jen, sinjoro Holmes havas aŭtomobilon.
- Jes, lia riĉa onklo donacis ĝin al li.
- Sed li asertas, ke li metis sian tutan monon en ĉi tiun aŭton.
- Jes, li pravus. Li aĉetis por du dolaroj benzinon.

(Scarborough Post)

★

Bona koro.

- Paĉjo, donu 20 centimojn. Sur la strato staras unu malriĉulo kaj krias. Mi volas doni al li.
- Kaj kion krias tiu malriĉulo?
- Li krias, ke „Glaciaĵo, duobla porcio 20 centimoj!“

(Lustige Blätter)

★

La laboriloj.

Majstro: Ĉu mi ne diris al vi, ke vi devas alporti ĉion, kio estas necesa al la laboro?

Helpbubo: Sed sinjoro majstro, mi alportis ĉion, la segilon, la rabotilon, la raspilon, la martelon, la...

Majstro: Sed kie restis la biero?

(Vikingen)


★

En la infanĉambro.

- Patro, ĉu estas vere, ke la grandaj fiŝoj manĝas sardinojn?
- Jes, fileto.
- Sed kiel ili elprenas ilin el la skatoloj?

(Haagsche Post)


★



Malagrabla demando.

- Kiam mi estis tiel malgranda, kiel vi, mi neniam mensogis.
- Kaj kiam vi komencis, paĉjo?

(Pesti Hirlap)



Bildo pri la solena malferma kunsido de la 24-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo. La kunsido okazis en la granda amfiteatro de la universitato Sorbonne. Ĉe la longa tablo sidas la estraro de la kongreso. Malantaŭ la tablo sidas la reprezentantoj de la Esperantistaj organizaĵoj el 36 landoj kaj la oficialaj reprezentantoj de la registaroj de 11 ŝtatoj.



La plej maljuna Esperantistino de la mondo, la 91-jara s-ino Anna Tuschinski el Danzig, en la Pariza kongreso ricevis bukedon el rozoj „Esperanto“. Tiun novan specon de flava rozo kulturis la ĉeĥoslovaka ĝardenisto Jan Böhm en Blatná kaj li sendis la bukedon al Parizo per aeroplano, por honori la plej maljunan Esperantistinon. (Foto Buhr).



Ligu la aĝblan kun la utila! — Gesinjoroj Polak el Steenvijk (Nederlando), fervoraj legantoj de La Praktiko, dum sia libertempa vojaĝo tra la belgaj arbaroj fidele legis La Praktikon kaj diligente solvadis ĝiajn lingvajn taskojn kaj konkursojn. Kiel oni vidas, La Praktiko fariĝis ne forasebla kunulo de la Esperantistaj familioj.




La Esperanto-aŭtomobilo en la floropecio en Rotterdam. — En la naskiĝtago de la nederlanda reĝino oni aranĝas floropeciojn en la urboj de Nederlando. Ankaŭ la Esperantistoj kutimas partopreni por fari propagandon al nia lingvo. Dum la preterpaso de la veturilo tra deŭiloj tra busoj sonas la vorto „Esperanto“. La Esperanto-aŭtomobilo en Rotterdam ricevis la 5-an premion. Dekstre ĉe la aŭto staras s-ro J. D. Brakel, prezidanto de la Esperanto-societo „Merkurio“ en Rotterdam.



Esperanta kurso en la dana vilaĝo Vallekilde. — La grandsukcesan kurson gvidis s-ro instruisto Holger Hansen, delegito de UEA en Holbæk. Li sidas plej dekstre. Apud li sidas s-ro instruisto Harald Grønberg, kiu nun gvidas kurson en la popola aliternejo de Vallekilde. En Danujo en la lastaj tempoj Esperanto bone progresas.



Esperanto-kurso por infanoj en la urbo Nijmegen (Nederlando). La kurson organizis la urba komunumo, je iniciato de la Centra Esp. Propaganda Komisiono kaj gvidis ĝin s-ro J. R. Peters, instruisto de la Cseh-Instituto. Sur la bildo estas videblaj ankaŭ la estraranoj de la Prop. Kom. De maldekstre: s-ro A. van Weerhorst prez., s-ro H. de Lepper kassisto, s-ro A. van Straaten gvidanto de la fama korespondanta kurso, s-ro J. R. Peters, s-ro A. H. Jansen, sekretario. La geknaboj fervore lernas Esperanton.



La Esperanto-veturilo de la Esperantista Grupo en la floropecio de la nederlanda urbo Bergen. La bela simbola grupo prezentas „Paco per Esperanto“. La pacangelo alportas la pacon per Esperanto al la loĝantoj de la koina mondparto, prezentataj per simbolo vestitaj personoj. La veturilo ricevis la 4-an premion en la konkurso.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Morto. — La 11-an de Septembro subite mortis la patrino de s-ro O. Sklenka, ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥoslovakujo.

Ekspozicio en Zaandam. — La Esperantista Klubo de Zaandam (Nederl.) aranĝis ekspozicion de Esperantaj en la tagoj 24–25 Sept.

Jubileo. — La „Bruga Grupo Esperantista“ (Belgujo) la 16-an de Oktobro festos la tridekjaran datrevenon de sia fondiĝo. En la riĉa programo de la tago estas ankaŭ teatra prezentado kaj balo. Oni bonvenigas samideanojn el aliaj urboj.

Julio Baghy, nia konata verkisto kaj instruisto de la Cseh-Instituto, la 28-an de Sept. vojaĝis al Latvuj, kie li gvidos kursojn dum du monatoj.

Parizo. — En la Hungara Domo ĉiusabate okazas bone vizitata propagando kunveno. Oni preparas kursojn por la hungaraj loĝantoj en Parizo.

Argentino. — La Argentina Esp.-Asocio organizis korespondan kurson, en kiu partoprenas 700 personoj. Kiel ekzercilo estas uzata La Praktiko.

Norvegujo. — D-ro O. Fischer gvidas komencan kaj daŭrigan kursojn en Hamar. — S-ro H. Seppik faris en la urbo Lillström apud Oslo grand-sukcesan paroladon en Esperanto pri Estonio antaŭ mil ĝermantoj, en kinoteatro. Kiel rezulto komenciĝis kurso por infanoj, aranĝita de la lerneja estraro. En Oslo s-ro Seppik faris grandan provicionon kaj nun gvidas kursojn publikajn en Oslo kaj Lillström.

Anglujo. — S-ino Elizabeth Elliott gvidas sukcesplenan kurson en William Morris Hall, Londono.

Estonio. — S-ro H. Rikand gvidas kurson en Tallinn post proviciono aranĝita kun dankinda helpo de s-ro Th. Ussiso, direktoro de la ŝtata industria lernejo. — En Tartu komenciĝas novaj kursoj sub la gvidado de la sveda s-ro K. Tunön.

Polujo. — S-ro S. Szyk organizis kaj gvidis la unuan Cseh-metodan kurson en la urbo Vilno en la Esp. Grupo ĉe la Vilna Juda Landkonema Turista Societo. Nun jam la duan kurson gvidas s-ro Szyk, „forte, kuraĝe kaj inteligente“.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respondamanton.

Fino E. C. B. en A. kaj s-ro D-ro E. A. en L. — La deziro de vi esprimita estas prava. Tial ni de nun pli larĝe preparolas la solvojn de la konkursoj. Tion vi povas konstati jam en ĉi tiu numero. Ni ĝojas por via alta opinio pri la instrua valoro de niaj konkursoj.

S-ro R. J. en Polujo. — Pri la temoj, kiujn vi nomas en via letero, ni intencas aperigi artikolojn. Pri U. E. A. vi trovas detalajn klarigojn en la Konversacia Gazeto, aĉetebla ĉe nia eldonejo (kostas 55 groŝojn, kiujn vi povas sendi en letero en polaj poŝtmarkoj). Ni gratulas al vi, ĉar vi rimarkinde bone skribas en Esperanto, kvankam vi estas novulo. En via letero estas nur kelkaj malgravaj eraroj. Per diligenta praktikado de la lingvo vi baldaŭ estos perfekta.

S-ro K. K. en V.-L. (Rusujo). — 1) Laŭ la Fundamento „ŝati“ havas la signifon: havi altan opinion pri la valoro aŭ kapablo de io aŭ iu. Ĝi estas preskaŭ samsignifa kun la vorto „estimi“. La vortaro de Kabe kaj la Plena Vortaro de SAT pli-malpli transprenis tiun difinon, sed en la praktiko „ŝati“ ekhavis iom la saman signifon, kiel „ami“, sed aplikata al objektoj, dum la vorton „ami“ oni rezervas al personoj. La vorton „ŝati“ oni uzas ankaŭ pri personoj, kaj tiam ĝi esprimas pli malfortan formon de „ami“, do: „ameti“, „estimi“. Tiu uzado povas esti nomata ne laŭfundamenta, sed estas duba, ĉu oni povas forigi ĝin el la praktiko. — 2) *Bedaŭri* = senti ĝegrenon aŭ malkontentecon por iu faro aŭ nefaro. Ekz: *Mi bedaŭras, ke mi aĉetis tiun libron.* — 3) La vorto „domaĝo“ havas du signifojn: a) = bedaŭrindaĵo, ekz.: *Kia domaĝo, ke li mortis!* b) = difekto, perdo. Ekz.: *La tertremo kaŭzis grandajn domaĝojn.* La verbo „domaĝi“ signifas aŭ: timi bedaŭrindaĵon, pardon, ekz.: *Aĉetu la domon, ne domaĝu la monon!* aŭ: difekti, ekz.: *La haĵlo multe domaĝis la grenkampon.* La verba uzo de ĉi tiu vorto estas tre malofta. Supozeble pro tio, ke ĝi ne estas sufiĉe klara.

Fino A. J. de H. en H. — Efektive Zamenhof en tiuj lokoj, kiujn vi citas el la Fundamenta Krestomatio kaj el la Fundamento mem, sed ankaŭ en aliaj lokoj, ekzemple en siaj kongresaj paroladoj, ofte uzis la vorton „unu“, kiam ĝi certe ne estas numeralo. Ĝi tiam estas anstataŭebla per „iu“ aŭ eĉ tute forlasbla. Kiam oni povas anstataŭigi ĝin per „iu“, ĝi estas nedifinita pronomo. Se oni povas tute forlasi ĝin, ĝi estas nedifinita artikolo. Al ni ŝajnas, ke en la cititaj kazoj estas preferinde forlasi la vorton „unu“, kaj plej verŝajne ankaŭ Zamenhof mem tion respondus al vi, ĉar li neniam postulis, ke oni sklave imitu lin.

Al s-ro H. K. R. en U. (Ned.) kaj al ĉiu leganto. — Estas tre bedaŭrinda fakto, ke troviĝas personoj, kiuj anoncas sian adreson en la rubriko KORESPONDU! kaj ne respondas je la ricevita korespondadoj. Ni severe atentigas la anoncantojn pri ilia deĉo kaj ni publikigos la nomojn de tiuj anoncintoj, kiuj ne respondis. Kompreneble, la anoncintoj devas respondi ne nur je leteroj, sed ankaŭ je poŝtkartoj, sed nur tiam, se la ricevita korespondado estas konforma al lia anonco. Se ekzemple iu anoncis sian deziron korespondi kun Japanujo, li havas la rajton ne respondi je letero ricevita el Ameriko. Ni petas vin, bonvolu sendi al ni la nomojn de viaj silentantaj anoncintoj, por ke ni atentigu ilin en la gazeto. La saman peton ni direktas al ĉiuj niaj malkontentaj legantoj.

S-ro W. M. en Svislando. — 1) La ĉefa kaŭzo, ke la angla lingvo ne povas fariĝi internacia lingvo, estas tio, ke ĝi ne estas neŭtrala lingvo, sed nacia lingvo. Laŭ nia opinio la aliaj grandaj nacioj pro ĵaluzo neniam konsentos, ke la angla lingvo estu oficiala internacia lingvo en la tuta mondo. La internacia uzado de la angla lingvo dependas de la potenco kaj riĉeco de Britujo. Kun la malpliigo de ties potenco malpliigos ankaŭ la uzado de la angla lingvo. Sed nia principo estas, ke la internacia lingvo devas havi sian fundamenton sur la libera kaj justa interkonsento de ĉiuj nacioj kaj ne sur la potenco aŭ perforto de iu ŝtato. — 2) Por ke vi komprenu tiujn vortojn en la „Saltego trans Ĵamilojn“, vi devas koni la historion de la antikva Romo. En neniuj Esperanta vortaroj vi trovos tiujn vortojn, ĉar ili signifas specialajn aferojn de tiuj tempoj. Sed vi trovas ilin certe en ia granda leksikono franca. — 3) *Orkano* = uragano. *Salto mortale* = mortsalto. *Steinach-ulo* = homo reunigita laŭ la procedo de prof. Steinhach. *Faco* = ebena supraĵo de objekto, en geometria figuro. *Pekozo* = pekoplana. *Mandrello* = speco de simio. *Vekrii* = krii vel *Resedo* = nomo de bonodora floro, sed la ĝusta skribmaniero estas: *rezedo*. *Kolumno* = kolono. *Infulo* = episkopa ĉapelo en la preĝejo. *Flamingo* = nomo de birdo. *Rediviva* = reviviginta. *Botriparisto* = riparisto de botoj, ŝuoj. *Cabrako* = kovrilo de la ĉevalo sub la selo. *Marabuo* = nomo de birdo. *Mardioj* = dioj de la maro. *Peonio* = nomo de floro. *Fono* = malantaŭaĵo, fundo. — Ni re-

„LUDI KAJ LERNI“ ludilo por ĉiuj.

Ludante per ĉi tiu lernilo oni lernas la vortfaradon.

Prezo: -90 ned. guld.

Mendebla ĉe R. Wartena, Diepenveenscheweg 117, Deventer (Nederl.). Poŝtgirokonta 171697.

komandas al vi la Plenan Vortaron de SAT, kiu estas nun la plej kompleta vortaro. Ĝi donas la signifon de ĉiu vorto en Esperanto, sen nacia traduko, kun multaj ekzemploj. Ĝia prezo estas 6.— ned. guld., aĉetebla ĉe nia eldonejo.

S-ro J. H. en B. (Ned.) — (10) Pri la elparolo de „ĉj“ nia plej bona konsilo estas, ke vi foje vizitu internacian kurson en Arnhem, kie oni povas buŝe ilustri la klarigon kaj kie oni povas ankaŭ pridiskuti tiun kaj similajn problemojn kun diversnaciaj. — (12) La rezulton de la urua Esperantista popol-nombro ni publikigos en La Praktiko baldaŭ. — 1. *Pra* = latina *prae* (antaŭ). „Ig“, komparu kun la holanda kaj germana: *rein-reinigen*. „Em“, komparu kun la franca „*aimer*“ (ami). „Ju“ kaj „des“, komparu kun la germana je kaj desto. La devenon de la aliaj vortetoj oni ne konas. — „Mortis“ kaj „mortiĝis“. Sufiĉas diri: mortis. La vorto „mortiĝis“ ne estas malkorekta, ĉar oni povas kompreni ĝin: „iĝis morta“, sed ĝi ŝajnas esti superflua. — 3. En la libro „Lingvaj Respondoj de Zamenhof“ la dike presitaj ciferoj en la titoloj de la ĉapitroj estas la signifoj laŭ la „*decimala klasifiko*“, sistemo uzata por metoda ordigo en bibliografio. — 4. La lokojn kaj datojn de la universalaj kongresoj de Esperanto fiksis la Internacia Centra Komitato. La kongresoj mem ne povas decidi, sed nur esprimi dezirojn. Pri ĉi tiu temo detalajn klarigojn vi trovas en la libro de Isbrücker: *Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado*, mendebla ĉe La Praktiko, prezo -75 guld. Arangiĝi universalan kongreson ekster Eŭropo ne estas rekomendinda provizore, ĉar ĝin povus viziti nur tre malmultaj el la personoj, kiuj okupas gvidantajn rolojn en la movado. Cetere la iniciato, la invito devas veni de la koncernaj lokoj mem. — 5. La busto kaj busteto de Zamenhof estas faritaj el gipso kaj kovritaj per bronza koloro. — Dankon pro la artikolo, ni volonte ricevos ekzempleron.

ANONCETOJ

TARIFA: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

KORESPONDADO PER ILUSTRITAJ LETEROJ estas tre rekomendinda por komencantoj, ĉar ĝi estas interesa, facila, lerniga kaj malmultekosta, se tuta kurso aŭ klubo partoprenas ĝin kolektive. Sendu unu responduponon kaj vi ricevos specimenon kun detalaj klarigoj. Adreso: D-ro Ottmar Fischer en Hamar (Norvegujo).


DUONPREZAJ ABONOJ estas ankoraŭ haveblaj. Personoj, kiuj deziras ricevi la Praktikon por la jaro 1932 duonpreze, sendu al la eldonejo 10 tiajn poŝtmarkojn de sia propra lando, per kia oni afrankas leteron al eksterlando. Detalaj informoj en la Julia numero sur la dua paĝo.

ALVOKO AL KOMERCISTOJ. — La grava nederlanda maŝinfabrika *Fratoj Stork & Komp.* en Hengelo (O.), kiu donas laboron al 3000 laboristoj, enkondukis la uzadon de Esperanto kaj serĉas per Esperanto reprezentantojn en aliaj landoj. De la rezultoj de la unuaj provoj per Esperanto dependas pli vasta, grandskala uzado de Esperanto kaj grava subteno por la Esp.-movado pere de tia influa entrepreno. Seriozaj Esperantistaj komercistoj estas petataj klopodi, ke la firmo ricevu per Esperanto proponojn pri reprezentado. Kompreneble la firmo atendas proponojn nur de eksterlandaj, ne nederlandaj komercistoj.

PANORAMO




En la vilaĝo Höfel apud Löwenberg en Silezio (Germanujo) oni povas vidi tre elan abelejon. La abelujoj havas la ormon de sanktuloj. La posedanto, unu amparano, mem konstruis ilin.




Piramido el telefon-libroj. En Ameriko oni portis en amason ĉirkaŭe unu milionon da malnovaj telefon-libroj de Novjorko kaj oni bruligis ilin.



Vin-barelo kiel ĉerko. — Jakob Paul Gundling, kiu mortis la 1-an de Aprilo 1731, estis profesoro de historio kaj juro ĉe la nobela akademio en Berlino. La prusa reĝo Frederiko Vilhelmo la tre ŝatis lin precipe pro tio, ke li havis eksterordinaran kapablon en la trinkado. Kiam li mortis, laŭ la ordono de la reĝo oni enterigis lin en ĉerko simila al barelo.




La artefarita homo „Televox”. Ĝi aŭtomate telefonas, mendojn akceptas, telefone ricevitaĵojn ordonon plenumas. La konstruinto estas la amerika inĝeniero Wensley en Pittsburg.



En Nova-Gvineo la indiĝenoj ne kaptas la fiŝojn, sed pafas ilin per sago.



En Hindujo la bovino estas sankta besto kaj tial oni ne rajtas ĝin forpeli de tiu loko, kie ĝi ripozas. Ofte okazas, ke bovino ekkruŝas en la mezo de strato. Tiam la tuta trafiko de la strato devas halti ĝis tiam, kiam la bovino de si mem foriras.



Strangan akcidenton havis la rumana princo Bibescu, prezidanto de la Internacia Aerŝipada Asocio, dum sia vojaĝo tra Azio. En Persujo giganta vulturo atakis lian flugmaŝinon kaj rompita ĝian maldekstran flugilon. Sed la aerŝarbo de la flugmaŝino frakasis la furiozan birdon. La maŝino kun granda peno povis atingi la teron, kie ĝi renversiĝis kaj ekbrulis.

KONKURSOJ

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

GENERALAJ REGULOJ:

1. En la konkursoj rajtas partopreni ĉiu, ankaŭ ne-abonantoj.
2. Ĉiun solvon oni devas sendi sur aparta papero aŭ poŝtkarto.
3. Ĉe ĉiu solvo oni devas alĝui la koncernan konkurs-kuponon.
4. Al la solvo oni devas aldoni sur la sama papero la precizan nomon kaj adreson de la solvinto, per tre klara skribo.
5. Ni rekomendas, ke pluraj personoj sendu siajn solvojn kune en unu koverto, por ŝpari poŝtkostojn. Adreso: LA PRAKTIKO, Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando.
6. La nomoj de tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantaĵoj, sendotaj aŝrankite al la gajnintoj.

43-a konkurso.

ENIGMO

3,13 — 10,2,3,8,18,13,6 — 17,2,3,5 — 11,1 —
 9,6,9,1,3 — 12,7,1,19,5,18,2,3 — 14,5 — 11,1 —
 16,2,14,13,1,20,1 — 9,1,12,2 — 21,1,7 — 16,2,14,13,
 1,20 — 13,3,9,5,7 — 11,1 — 12,1,8,9,1,15,1,4 —
 15,6,7,2,4 — 14,5 — 17,6,11,2,3,4,2 — 8,6,7 —
 15,1,7,2, — 10,6,3,19,5,3,13,8 — 3,5 — 22,7,1,3,
 18,2,4 — 10,6,3 — 1,3,12,11,2,4 — 3,5 — 7,6,8,2,4
 — 10,6,3 — 24,2,11,2,4 — 8,5,14 — 16,2,15,2,4 —
 10,6,3 — 16,2,15,2,4 — 17,5,3,1,9,1 — 5,8,9,6 —
 11,1 — 9,1,12,2 — 10,1,4 — 12,7,1,3,14,1,4 —
 10,1,4 — 12,1,1,2,7,1,4 — 5,8,9,6 — 23,13,1,4 —

Anstataŭ la nombroj metu literojn. La sama nombro signifas ĉiam la saman literon. La rezulto estas grava frazo de D-ro Zamenhof el lia parolado en la 1-a Universala Kongreso de Esperanto.

Ŝlosil-vortoj:

- 10, 1, 15, 5, 11, 2, 2 = la ŝipo de la dezerto.
 18, 13, 12, 3, 2 = besto kun longa kolo.
 4, 6, 24, 2 = post malmulta tempo.
 23, 13, 7, 1 = virina vestaĵo.
 16, 1, 15, 8, 22 = besto kun longa kolo.
 21, 5, 19, 1, 9, 2 = besto kun longa kolo.
 Inter tiuj personoj, kiuj ricevis premiojn, aperos en LA PRAKTIKO. La premioj konsistas el libroj kaj aliaj Esperantaĵoj, sendotaj aŝrankite al la gajnintoj.

Kupono
por la
43-a
konkurso

44-a konkurso.

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 58 literoj.

- 34, 10, 44, 21, 30, 15, 56, 6 = senpieda besto.
 48, 14, 43, 27 = la kamelo havas.
 55, 41, 29, 3, 22, 16, 52, 58, 8 = norda lando.
 51, 39, 25, 36, 54, 7, 18 = nomo de monato.
 1, 52, 42, 43, 23, 49, 28, 45 = vermo en la tero.
 31, 19, 38, 57 = sur la ĉevalo estas.
 37, 12, 53, 27 = grava korpoparto.
 21, 47, 11, 26, 18 = vintra vestaĵo.
 32, 2, 13, 35, 50, 40, 6 = parto de la piedo.
 20, 33, 5, 24, 56, 41 = manĝaĵo.
 9, 4, 17, 49, 46, 18 = reĝo en la Biblio.
 1—58 = opinio pri la lingvo Esperanto.

Al la solvintoj ni donos 8 premiojn. Solvojn ni akceptas ĝis la 20-a de Decembro.

Bonvolu atenti la ĝeneralajn regulojn!

45-a konkurso.

TASKO POR ĜARDENISTOJ.

Plantu 10 arbojn sur kampo tiamaniere, ke ili estu en 5 vicoj kaj en ĉiu vico estu 4 arboj.

Bonvolu sendi al la redakcio la desegnitajn solvon ĝis la 20-a de Decembro.

En ĉi tiu konkurso rajtas partopreni ĉiu, ne nur ĝardenistoj. Se vi ne estas ĝardenisto, vi rajtas peti konsilon kaj helpon de ĝardenistoj, por bone solvi la taskon.

Inter la ensendantoj de la ĝusta solvo ni disdonos 6 premiojn.

Observu la ĝeneralajn regulojn!

46-a konkurso.

SAK-ENIGMO

En ĉi tiu enigmo estas kaŝita grava frazo el la Deklaracio pri Esperantismo. La frazo konsistas el 88 literoj. Oni devas solvi la enigmon laŭ la ĉevalmovo sur la ŝaktabulo. La komenco estas ĉe la litero „E”.

★	o	l	e	e	i	l	u	t	★
i	r	s	l	a	p	o	a	s	a
t	e	j	★	c	p	k	l	i	s
s	n	e	s	s	★	j	o	g	a
E	a	n	l	★	r	e	★	i	ĉ
g	o	p	a	★	i	o	e	z	t
s	s	i	o	u	★	★	u	a	t
n	v	z	e	ĝ	t	n	t	e	u
p	n	★	k	r	m	a	u	n	t
★	o	e	o	r	i	a	a	n	★

Al tiuj personoj, kiuj ensendas al la redakcio la ĝustan solvon, ni disdonos 7 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 20-a de Decembro. Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn!



KORRESPONDU

ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.
Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.
GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondajo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomoj de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto.
— La redakcio.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

ro = sinjoro	interŝ. = interŝanĝi	bfl. = la poŝtmarkon
ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
ez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
oresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ESTONIO

Tartu. — S-ro Viktor Krant, Uus savi 4-4. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t., ankaŭ germanlingve.

FRANCUJO

Cauchap. (S-&O). — S-ro Raoul Bourlier, oficisto, 26 Avenue Pasteur. — PI, bfl. Promesas respondi al ĉiu.
Oran. (Côte d'Or). — S-ro Marcel Mathieu, 30-jara oficisto, Esperanta kuracigvidanto, 27 Place de la République. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun fraŭlinoj. Respondo al ĉiu.
unketue. — S-ro Albert Bernaert, 13-jara lernanto, 10 rue des Soeurs Blanches. — L kun Anglujo kaj Italujo. Interŝ. PM.
moges (Haute-Vienne). — S-ro Roland Reboul, 27-jara desegnisto kaj dekoracisto, 1 rue du Rossignol. — K.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PM.
ris 18. — S-ro Ludovic Rodo, 14 rue Girardon. — Interŝ. PK, Esp. glumar-kojn. Ĉiam respondo.

GERMANUJO

lefelfeld-Vogtl. — S-ro Karl Meinel, 32-jara popollerneja instruisto, Falkenstein 203. — Dez. koresp. k.ĉ.l., p.ĉ.t. per L, PK kaj PI.
leinreichen (Lüben, Land, Silezio). — S-ro Paul König. — Pri katolika gazetservo kaj ĵurnalistaj aferoj.
öln-Bärenfeld. — S-ro Henrico Kaiser, Schadowstr. 8. — PI, bfl., kun ekster-eŭropanoj.
refeld. — Esperanto-Kurso, Kolpinghaus, Dionysiusstrasse 20. — La kursanoj dez. kor. k.ĉ.l.

HUNGARIJO

udapest. — S-ro D-ro Edmund Németh, bestkuracisto, Nagymező-u. 49. II. 14. — L, PI, PK, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

JUGOSLAVIO

eoograd X. — S-ro Miodrag Bogd. Erić, studento de inĝ. de arbarkulturo, Bosanska ul. 41. — L p.ĉ.t., interŝ. PM, muziknotojn, librojn k.t.p., k.ĉ.l.

LATVUJO

rigā. — S-ro Z. Lāncmanis, 48-jara instruisto, Vidzemes šos. 162. — PI k.ĉ.l., pri geografio, kolektas adresojn por siaj lernantoj.
Isma. — S-ro K. Meiers, instruisto. — PI, k.ĉ.l., escepte Germanujo. P.ĉ.t.

NEDERLANDO

Amsterdam (W.). — S-ro Herman J. Bosscheit, 25-jara maŝinkompostito, Chasséstraat 22. I. — L, PI, k.ĉ.l., pri kompostmaŝinoj k.t.p.
Arnhem. — S-ro E. Smits, 29-jara silkfabrika laboristo, Johannastraat 56. — K.ĉ.l., p.ĉ.t.
Hilversum. — F-ino A. J. de Haas, ekslegistino kaj instruistino, Borneolaan 13.a. — L kun Afriko kaj Aŭstralio, p.ĉ.t., kun mezaĝaj gesamideanoj.
Hippolytushoef (Wieringen). — S-ro H. Schouwplieger, 48-jara asekuristo, Beltstraat 48. — L, PI, bfl, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Hippolytushoef (Wieringen). — S-ro A. Hoekstra, 18-jara laboristo, Beltstraat 52. — L, PK, PI, bfl, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Rotterdam. — F-ino Toos Hoogstraaten, Oudeijk 3. — PI, PM, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

NEDERLANDA HINDUJO

Balikpapan (Borneo). — S-ro Jan Palit, Afd. Magazijn B.P.M. — L, PI, k.ĉ.l. Ĉerte respondo.

NORVEGUJO

Stavanger. — S-ro Andreas Baardsen, 24-jara bankoficisto, Oskarsgate 23. — L, PI, k.ĉ.l., pri religio, lando kaj popolo.

SVEDUJO

Göteborg. — S-ro John Rosell, Västergatan 9.A. — Dez. koresp.
Höör. — S-ro Hjalmar Leyden, 32-jara instruisto, Box 590, Hjularp. — L, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Höör. — S-ro Nils Olsson, 22-jara komizo, Kemikalieaffären. — L, PI bfl, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun skoltaj.
Lund. — S-ro Theo Jacobsson, Nils Bjelkegatan 6. — PI bfl. p.ĉ.t. kun ekster-eŭropaj landoj.
Sölvesborg. — S-ro Bertil Ohlsson, 19-jara poŝtisto, Tingshuset. — L, PI bfl, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun neeŭropanoj.
Trangstad. — S-ro Ivar Björkman, 43-jara popolinstruisto, Rud. — PK k.ĉ.l. pri la laboroj en la lernejo.
Trelleborg. — S-ro Otto Telin, Östra Förstadsgratan 77. — L, PK, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

LA PRAKTIKO

ABONPREZO: { por unu jaro 2.50 ned. guld.
 { por duonjaro 1.25 " "

La abonprezon oni povas sendi ankaŭ en poŝtmarkoj el la jenaj landoj (post la nomo de la lando estas la valoro de la sendotaj poŝtmarkoj por unujara abono. Por duonjara abono oni sendu la duonan valoron):

Aŭstrio (7 ŝil.), Belgujo (35 fr.), Britujo (5 ŝil.), Bulgarujo (140 levoj), Ĉeĥoslov. (33 ĉkr.), Danujo (5 kr.), Estonio (3.50 kr.), Francujo (25 fr.), Germanujo (4 markoj), Hispanujo (10 pes.), Hungarujo (5 pengoj), Italujo (20 lir.), Japanujo (3 jenoj), Jugoslavio (60 din.), Latvujo (4.50 latoj), Norvegujo (5 kr.), Polujo (8 zlotoj), Portugalujo (25 esk.), Rumanujo (150 leoj), Svedujo (5 kr.), Svisujo (5 fr.), Usono (1 dol.).

La INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO

kultura fondaĵo aprobita de la Nederlanda Registaro, disvastigas Esperanton per Cseh-metodaj kursoj. Ĝi edukas instruistojn, zorgas pri la necesaj instruiloj kaj peras la laboron inter la kursaranĝantoj kaj instruistoj.

En la jaro 1932 la Instituto havas pli ol 250 rajtigatajn instruistojn, kiuj laboras en 23 landoj.

Personoj dezirantaj instrui laŭ la Cseh-metodo ricevas por tio rajtigon kaj kunlaboras kun la Instituto laŭ fiksita regularo. La Instituto portas moralan garantion pri la laboro de tiuj instruistoj, kiujn ĝi rekomendis al la kursaranĝantoj.

Al la Instituto apartenas:

- Fondantaj Membroj**, kiuj subtenas la Instituton pagante unufoje por ĉiam minimume 500 ned. guldenojn (pageblaj ankaŭ en partoj dum du jaroj),
- Subtenantaj Membroj**, kiuj pagas unufoje por ĉiam minimume 100 guld. (pageblaj ankaŭ en partoj dum du jaroj) aŭ ĉiujare minimume 10 guld.,
- Aktivaj Membroj**, agantaj en la laborsfero de la Instituto (instruistoj, propagandistoj k.a.). La Aktivaj Membroj ne pagas kotizon, sed nur enskriban takson de 5 guld.

La membroj de la Instituto senpage ricevas la Bultenon de la Instituto.

La Bulteno aperas laŭbezono en nefiksataj datoj. Ĝia abonprezo estas por 10 numeroj 1.— guld.

LIBROJ

aĉeteblaj ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO,
Oostduinlaan 32, DEN HAAG (Nederlando).

La Kurso de Andreo Cseh. La stenografita kaj poste mimeo-grafita teksto de unu tuta kurso de Andreo Cseh, farita en Stokholmo en 1928. La kurso kaj enkonduko kun klarigoj pri la metodo kaj konsiloj al la instruantoj, krom tio aldonaj, entute 158 folioj, en eleganta kartona ujo, 7.75 G.	
Konversacia Literaturo, 8 numeroj. Unu numero	—10 "
Kartona ujo por la Konversacia Literaturo	—10 "
Konversacia Vortaro, ŝercaj difinoj de la vortoj uzataj en la kursoj	—15 "
Konversacia Gazeto. Unusola numero kun plena informaro pri Esperanto, por enkonduki la novajn Esperantistojn en la movadon	—15 "
La enigmoj. Libreto plena de enigmoj. La solvantoj partoprenas en konkurso kun 1000 premioj	—10 "



Fruictier-Grenkamp: Kompletata Gramatiko kaj Vortfarado ...	2.50 "
Thora Goldschmidt: Bildotabuloj	1.90 G., bind. 2.20 "
Plena Vortaro de Esperanto. Nur en Esperanto, kun la klarigo de la vortoj kaj multaj ekzemploj	6.— "
Isbrücker: Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado. Grava libro por preparo al ekzamenoj	—75 "
Privat: Historio de Esperanto 1-a parto	1.35 "
2-a	3.25 "
Privat: Vivo de "Zamenhof", 1.35 G., bindita	2.10 "
Privat: Esprimo de Sentoj en Esperanto	—75 "



Baghy: Hura! Originala romano, 3.60 G., bindita	4.— "
" Preter la Vivo. Poemoj, 1.— G., bindita	1.50 "
Madách: La Tragedio de la Homo. Ĉefverko de la hungara literaturo, en majstra traduko de K. Kalocsay	2.— "
Isac: Sonorilo kaj kanono. Trad. T. Morariu	—60 "
Sadoveanu: Nobela Peko. Trad. T. Morariu	—50 "
Rumana Bonhumoro. Trad. Firu kaj Pragano ... 1.— G., bind.	1.50 "
Akbar. Orienta romano, trad. el nederl.	1.80 "
Gysbrecht v. Aemstel. Trad. J. R. G. Isbrücker, 1.95 G., bind.	2.50 "
Puskin: Eugeno Onegin. Trad. el rusa, bind.	1.85 "
La Biblio (eld. de Brita Bibl. Soc.) en diversaj prezoj.	
La Nova Testamento (Br. Bibl. Soc.) en diversaj prezoj.	
Papini: Historio de Kristo	6.25 "
Wiseman: Fabeloj. Rakontoj el la katekismoj	3.50 "
Katolika preĝlibreto	—30 "



Dirksen: Methodisch Leerboek v. Esp.	—65 "
" Vertaalde Oefeningen	—35 "
Verzamelde Examenopgaven	—45 "
Vertaalde Examenopgaven	—50 "
Heilker: Esp. Leerboek (voor dipl. B.)	2.25 "
Schidlof: Vortaro Esp.-Ned. kaj Ned.-Esp.	1.50 "

Krom tio multaj aliaj libroj.

Afrankita sendo!

La monon oni povas sendi per poŝtĉekkonto (Den Haag 162626), per poŝtmandato, per bankĉeko aŭ per papermono en letero.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj de la diversaj landoj, kalkulante la valoron laŭ la suba tabelo:

1.— ned. guldeno valoras:

en Aŭstrio 3.35 ŝil., en Belĝio 14.— fr., en Britujo 2 ŝil. 4 p., en Bulgarijo 56 levoj, en Ĉeĥoslov. 13.50 ĉkr., en Danujo 2.25 kr., en Estonio 1.55 est.kr., en Finnlando 27 f.m., en Francujo 10 fr., en Germanujo 1.70 markoj, en Hispanujo 5 pes., en Hungarijo 3.— peng., en Italujo 7.80 liroj, en Japanujo 1.35 jenoj, en Jugoslavio 26 din., en Latvujo 2.10 latoj, en Norvegiujo 2.30 kr., en Polujo 3.60 zlotoj, en Portugalujo 12.50 esk., en Rumanujo 67 leoj, en Svedujo 2.25 kr., en Svislando 2.10 fr., en Usono —.40 dol.

La sendo de poŝtmarkoj en letero okazas je la risko de la sendanto. Tial estas konsilinde uzi netravideblan koverton kaj ĉe pli granda sumo registri la leteron.

DUM IOM PLI OL UNU JARO

infano eĉ marŝi ne ellernis, sed

LITERATURA MONDO

dum tiu mallonga tempo

PLENKRESKIS.

Ĝi fariĝis la plej ampleksa, plej bela, plej altnivela el la Esperantistaj gazetoj. sub la vartado de la ĉefredaktoroj

Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay.

Dum tiu tempo la eldonejo aperigis

dekdu volumojn

kun entute

2 2 6 2 paĝoj

kaj luksan, ilustritan revuon kun 280 grandformatataj paĝoj.

Kaj tiun kreskon eĉ la krizo ne povas haltigi.

DUM LA KRIZA JARO 1932

Literatura Mondo eldonas

la saman kvanton

da libroj kaj gazetopaĝoj.


Se vin interese la juna giganto de la Esperanto-Literaturo, petu senpagan prospekton aŭ specimenon kontraŭ unu respondkuponon de la

ADMINISTRACIO DE LITERATURA MONDO

Budapest, IX. Mester-u. 53. V. 7. Hungarijo.

LOTERIO
de la ESPERANTO-DOMO

1 gld. =



Ĉar restis ankoraŭ kvanto de nevenditaj lotoj kaj la Loteria Komitato intencas disliti nepre ĉiujn 1000 promesitajn premiojn, La Nederlanda Ministro por Justeco per decido de la 22. Jul. 1932 konsentis prokrasti la tiradon.

La tirado okazos tuj, kiam la lastaj lotoj estos venditaj. Por ke la tirado povu baldaŭ okazi, ni alvokas la Esperantistaron, ke ĉiu aĉetu almenaŭ unu loton por si mem kaj klopodu vendi kelkajn al siaj konatoj.

Prezo de unu loto: 1.— guld.

" " dek lotoj: 9.— "

La lotoj estas mendeblaj ankaŭ ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Ni dissendas la lotojn afrankite kaj en netravidebla, ferma koverto, sed tamen je la risko de la mendanto. Se oni deziras registritan sendon, oni aldonu —.15 guld.

Grava informo: Por eviti perdiĝon de la loto, ni estas pretaj teni la aĉetitajn lotojn ĉe ni kaj sciigi la numerojn al la aĉetintoj.

Oni povas pagi la lotojn ankaŭ per poŝtmarkoj sendataj en letero.

La dato de la tirado kaj la rezulto de la tirado kun la listo de la gajnintaj numeroj kaj gajnintaj premioj aperos en La Praktiko.

La Loteria Komitato.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
11-a numero



Novembro
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederlando)
TELEFONO: 116720
POŬTĈEKKONTO
162626

Konu Esperanton

ĉiu homo en la mondo! Tio estas la devizo de la vera Esperantisto. Esperanto volas esti lingvo universala, lingvo por ĉiu homo. Por ke ĝi povu esti tia, antaŭ ĉio estas necese, ke la homoj sciu, ke ĝi ekzistas.

Bedaŭrinde eĉ en la nuna tempo, kiam Esperanto estas jam 45-jara, eĉ en la plej kulturitaj landoj de Eŭropo ni renkontas ĉiutage personojn, kiuj ankoraŭ neniam aŭdis la nomon de nia lingvo. Tio estas ne ilia kulpo, sed la kulpo de ni, Esperantistoj. Jes, nia kulpo, ĉar ni ne sufiĉe konigas Esperanton al la publiko.

Ni devas informadi la homojn pri Esperanto, sed tion ni devas fari prudente. Ni konas Esperantistojn, kiuj pro propagandista fervoro konstante bombardadas ĉiun homon per paroloj pri Esperanto. Plej ofte ili vekas nur malŝaton al sia persono kaj al Esperanto. Ni lernu el tio. Propagandante ni ne estu trudaj al la homoj, sed agrablaj. Ni elektu la taŭgajn lokon, tempon kaj manieron.

Plej bone estas, se ne ni mem komencas paroli pri Esperanto, sed la aliaj homoj, farante al ni demandojn pri Esperanto. Ni nur donu la okazon al tio.

Ĉi tie ni montras kelkajn bonajn manierojn de la konigado de nia lingvo. Ĉiu el niaj legantoj elektu el ili la plej konvenajn al sia persono kaj cirkonstancoj.

1. Vi sendube estas membro de diversaj

societoj kulturaj, sportaj k.t.p. Faru en tiuj societoj paroladon pri Esperanto.

2. Vi certe abonas nacilingvan ĵurnalon. Sendu al ĝia redakcio regule mallongajn informojn pri la gravaj novaĵoj rilate al Esperanto. En tiuj informoj vi ne laŭdadu kaj ne rekomendadu Esperanton, sed simple nur registru faktojn pri la progreso kaj uzado de nia lingvo. Tiam la redakcio certe publikigas ilin. Materialon por tiaj informoj vi trovas sur la paĝo „Al la venkol” de La Praktiko.

3. Uzu leterpaperon kaj koverton ornamitajn per la verda stelo kaj la vorto „Esperanto”, korespondante kun ne-esperantistoj.

4. Portu ĉiam la verdan stelon. Ofte vi ricevos demandojn pri ĝia signifo kaj vi havos okazon paroli pri Esperanto.

5. Ornamu vian loĝejon per la verda stelo.

6. En fervojo, tramo kaj aŭtobuso legu ĉiam Esperantan gazeton.

7. Se vi estas komercisto, en la fenestro de via vendejo nepre staru la vortoj: „Esperanto parolata” kaj sur via leterpapero: „Korespondo en Esperanto”.

Nun ni ne donas pluajn konsilojn, ĉar mankas loko kaj ĉar ankaŭ vi mem eltrovas pluajn punktojn, se vi tenas antaŭ viaj okuloj la regulon: Ĉiu homo devas koni Esperanton!

La Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Unu numero kosta 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. —
La abona jaro komencigas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. —
Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.), por duonjaro la duono. —
Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo —
Kopirajto de la enhavo rezervita.

LA REZULTO DE NIAJ KONKURSOJ

33-a konkurso. La tasko de ĉi tiu konkurso estis: formi vortoĵon el la naŭ literoj de la vorto „Esperanto”. En la konkurso partoprenis 95 personoj el la plej diversaj landoj, eĉ el Islando kaj Kalifornio.

Kiel ĉiam, ankaŭ nun pluraj personoj ne atentis bone la regulojn. Ekzemple oni faris plurajn vortoĵojn kun la sama radikoj, malgraŭ nia aparta atentigo en la 1-a regulo. Aliaj personoj ripetite uzis la literojn en unu vorto, ekzemple ili enskribis la vorton „estas”, kiu enhavas dufoje la literon „s”, kvankam en la vorto „Esperanto” tiu litero troviĝas nur unufoje. Tiuj personoj evidente ne atentis nian rekomendon: eltranci 9 kartonpecojn kun la literoj kaj miksi ilin. Tiamaniere la literoj ne povas ripetigi. Sed plej interese estis trovi en la listoj vortoĵojn kun tiaj literoj, kiuj tute ne estas troveblaj en la vorto „Esperanto”, ekzemple: *pelto, pola, pasko*. La juĝa komitato antaŭ la juĝo devis forstrekii la metaŭgajn vortoĵojn. Tri personoj ne aldonis sian nomon.

La nombro de la formitaj vortoĵoj variis inter 196 kaj 58. Entute 67 personoj faris pli ol 100 vortoĵojn. La 12 premiojn ricevis la jenaj personoj, laŭ la nombro de la formitaj vortoĵoj: 1. S-ro T. Indra en Riga (192 vortoĵoj). — 2. S-ro M. J. Wessel en Soestdijk, Nederl. (190 v.). — 3. F-ino S. M. Wijers en Hagoo (179 v.). — 4. S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard, Nederl. (168 v.). — 5. S-ro A. J. J. Fiet en Blijham, Nederl. (163 v.). — 6. S-ro A. Toldsepp en Tartu, Estonio (161 v.). — 7. S-ro K. Meinel en Ellefeld, Germ. (160 v.). — 8. S-ro S. Karamančev en Nevrokop, Bulgario (159 v.). — 9. F-ino L. Vechtmann en Hagoo (157 v.). — 10. S-ro H. Kaiser en Köln-Ehrenfeld, Germ. (155 v.). — 11. S-ro F. Bergquist en Lärje, Svedujo (154 v.). — 12. S-ro L. Martensen en Hamburgo (152 vortoĵoj).

34-a konkurso. La redakcio transdonis la envenintajn solvojn al s-ro Paulo Mallert, por ke li faru la juĝon. S-ro Mallert sendis al nia redakcio la jenan leteron, kiu enhavas lian juĝon kun la nomoj de la gajnintoj kaj kun la konigo de la plej interesaj solvoj. Jen la letero:

„Estimata Redakcio! Mi estas tute ravita kaj kortuŝita, vidante, ke preskaŭ cent ĝesamideanoj el dek-tri landoj rapidis al mia helpo. Tio montras la solidarecon kaj la bonkorecon de la Esperantistoj. Mi petas la Redakcion esprimi mian koran dankon al ĉiu partopreninto en la konkurso. — Mi devas konfesi, ke la juĝado estis tre malfacila, ĉar ĉiu solvo enhavis belan, bonan kaj saĝan konsilon, venantan el kunsentema Esperantista koro. Sed ĉar tamen en la mondo la aferoj ne estas egalaj, sed ili estas malfacilaj, kaj sekve ankaŭ inter la solvoj estas diferencoj, mi sukcesis juĝi. Ĉiuj solvoj meritas ricevi premion. Sed ĉar vi disponigis nur 10 premiojn, mi mem donos premiojn al tiuj, kiuj ne ricevas ĝin de la Redakcio. Sed pri tio poste. Unue mi raportas pri la aljuĝo de la 10 premioj de la Redakcio. — 1. La unuan premion ricevu *Gefratoy Fichtner* en Radebeul (Germ.), ĉar ili sendis al mi la jenan belan konsilon: „Kara sinjoro Mallert, la afero estas tre simpla. La sorto donis al vi afablan atentigon. La de vi dezirata Else ne estas la konvena edzino por vi, sed Ester. Ke vi mallongigis ŝian nomon per la komenclitero „E” kaj ke ŝia patrino ŝanĝis la nomojn, tio ne estas hazardo, sed saĝa destino de la sorto. Ridetu pri la komika turno kaj rapide edzinigu la bonan Ester.” En ĉi tiu solvo mi trovas la belan penson, ke ni devas en la aferoj de la vivo kun fido vidi la volon kaj arangon de la Providenco (Sed ĉu estas deĉe, se al niaj mallertajoj ni donas la belan nomon „Providenco”? La redakcio.). — 2. La duan premion ricevu s-ro J. C. B. v. d. Kamp en Amsterdamo. Li skribis: „Estimata sinjoro Mallert, vi devas konfesi, ke sole vi estas kulpas pro via malfacila situacio, ĉar vi ne skribis la tutan nomon de f-ino Else. Tial vi devas porti la sekvojn, la punon. La puno povas konsisti nur en tio, ke vi edzinigas fraŭlinon Ester. Mi tamen deziras al vi, ke la puno estu dolĉa.” En ĉi tiu solvo mi trovas la respekton al la grava principo de la justeco. Krom tio flatas min, ke mia estimata konsilanto en tiu kontraŭvola edziĝo vidas punon nur por mi, sed ne por la fraŭlino. Koran dankon! — En la sekvantaj ok solvoj mi trovas tre saĝajn, ofte diplomate ruzajn praktikajn ideojn, kiuj sendube meritas esti premiataj kaj rekomendataj al aliaj fraŭloj, kiuj falas en malfacilan situacion similan al la mia. Do tiuj solvoj ricevu la premiojn 3—10. Jen ili: 3. S-ino E. Tilstra-Rohdens en Leeuwarden (Nederl.) konsilas: „Sinjoro Mallert, ne estu malfeliĉa! Vi vidas, ke f-ino Ester volas edzinigi. Diru do al ŝi la puran veron kaj promesu, ke vi serĉos por ŝi fraŭlon kun pli da mono, ol kiom vi havas. Kaj vi vidos: la mono faras miraklojn en la nuna tempo.” — 4. S-ro A. de Visser en Dordrecht (Nederl.) donas spritan konsilon: „S-ro Mallert diru al f-ino Ester: Kara f-ino Ester, miaj seriozaj sentoj al vi kaj al via tuta kara familio, kaj mia zorgo pri via bonstato instigas min proponi al vi, ke vi faru kontrakton pri vivasekuro ĉe la plej bona asekura instituto de nia lando, kies agento mi estas. Monata engago estas nur 2 guldenoj. Ni asekuras ankaŭ kontraŭ akcidento, ŝtelo, brulo kaj hajlo. Plej favoraj kondiĉoj.” — 5. S-ro A. P. G. Droste en Hillegersberg (Nederl.) montras sin vera Esperantisto. Li skribas: „S-ro Mallert devas tuj rezigni je sia amo al f-ino Else kaj lerni Esperanton. En la Esperantolando li retrovos sian Else. (ESperanto Lando).” — 6. S-ino Julia Goldzier en Bayonne (Usono) rekomendas ruzan taktikon: „S-ro Mallert diru la veron rekte, kuraĝe kaj ne flankigante. Li parolu en ekstazo: „Mi venis por viziti f-inon Else! Kie ŝi estas? La litero „E” estas por mi la simbolo nur de ŝi! Else, la bela! Else, la ĉarma! Else, la gracia! Else, la aminda! Else, la unika! Else, la sola! Ŝi devas tuj veni! Se ŝi ne venas, mi hejmeniros kaj tuj mortos!” Kiu volas havi tian frenezan amanton? Versajne nur Else. Do Ester ĝoje forkuros kaj sendos sian fratinojn.

Sed mi ne garantias, ke s-ro Mallert post kelkaj jaroj ne diros: „Ho, mi malfeliĉulo, kial mi ne edzinigis f-inon Ester!” — 7. S-ro A. Klein en Vieno (Aŭstrio) rekomendas: „S-ro Mallert rakontu longan historion. Li konfesu, ke li volas edziĝi, sed ne povas facile eklekti, sed li fidas, ke f-ino Ester, kiel bona kamaradino, helpos trovi la ĝustan edzinon. Por tio li proponu kunvenojn kun fraŭlinoj. Kaj ĉe bona okazo li diru, ke la ĝusta fraŭlino estas jam trovita en la persono de f-ino Else.” — 8. S-ro F. M. Leis en Burghausen (Germ.) konsilas: „S-ro Mallert pretekstu la viziton por inviti la tutan familion al hejmeca kunveno. Tiam li okaze povos diri sian deziron.” — 9. S-ro S. Karamančev en Nevrokop (Bulgario) proponas grandan strategian planon: „S-ro Mallert fianĉigu kun Ester kondiĉe, ke la patrino antaŭe donos al li sian tutan havaĵon. Dum la fianĉa tempo li malkaŝu sian tragedion al Else, deklaru sian amon al ŝi kaj preparu la planon de ilia ludo. Kiam en la preĝejo la pastro demandas lin, ĉu li amas sian fianĉinon kaj ĉu ne estas sur li premo de aliaj personoj, li konfesu, ke li ne amas f-inon Ester, sed ŝian fratinojn Else. Sub la premo de la cirkonstanco, ke s-ro Mallert jam estas posedanto de la tuta havaĵo kaj pro honto antaŭ la invititaj gastoj, la patrino konsentos al la ŝanĝo.” — 10. S-ro L. Müller en Berlino proponas tre ruzan kaj certe efikan taktikon: „S-ro Mallert diru al f-ino Ester, ke li havas en la poŝto muson. Tiam f-ino Ester kun granda krio elkurs el la ĉambro eventuale el la domo, eventuale kune kun sia patrino. Else aŭdos la skandalon, venos por vidi la kaŭzon kaj tiam s-ro Mallert diros al ŝi la veron. Ili povos paroli tiam konfide tute trankvile, ĝenataj de neniu.” — El la ceteraj solvoj la plej multaj konsilas, ke ni rekte alparolu f-inon Ester: „Mi salutas vin, mia kara kaj ĉarma estonta bofratino!” Aliaj rekomendis diversajn ruzojn, similajn al la supre cititaj. El la multaj konsiloj mi povis sekvi — memkompreneble — nur unu konsilon. Kaj nun mi konfesas, ke mi sekvis la unuan konsilon, mi jam edziĝis kun f-ino Ester kaj ĝis hodiaŭ, kvankam jam du monatoj pasis, mi ankoraŭ ne bedaŭras. Ankaŭ tion mi povas malkaŝi, ke mia edzinego fervore lernas Esperanton kaj mi esperas, ke en la proksimaj kongresoj mi povos ŝin prezenti al la ĝesamideanoj. Fine mi deklaras, ke mi decidis doni el mia propra kaso premion al ĉiu solvinto: mi pagos al ili porcion de glaciĝo aŭ alia bongustaĵo en la Esperanto-Domo en Arnhem, kie mi pasigos kune kun mia edzinego la proksiman kristnaskan libertempon kaj tre versajne ankaŭ la someran libertempon. Kun estimo kaj samideana saluto: Paulo Mallert.”

La redakcio esperas, ke ĉiu solvinto de la konkurso kaj ankaŭ ĉiu leganto de La Praktiko vizitos la Esperanto-Domon en Arnhem por interkonatiĝi kun niaj ŝatataj ĝesamideanoj Mallert.



La tirado de la LOTERIO

por la Esperanto-Domo en Arnhem
okazos publike

la 30-an de Decembro 1932, posttagme, je la 2-a h.
en la Esperanto-Domo en Arnhem,
sub la gvidado de notario Ch. J. Engelberts.
Ĉiu Esperantisto estas kore invitata!

Rapidu aĉeti lotojn! Helpu disvendi la ankoraŭ restintajn lotojn, mendante malgrandan kvanton (ekzemple 5 aŭ 10 lotojn) kaj vendante ilin al viaj konatoj.

1000 VALORAJ PREMIOJ!

Vi povas gajni aŭtomobilon, meblaron, skribmaŝinojn, radio-aparatojn, foto-aparatojn, biciklojn, elektraĵojn, mas-trumajn aparatojn, horloĝojn k.t.p., k.t.p.

Prezo de 1 loto: 1.— guld.

” ” 5 lotoj: 4.50 ”

” ” 10 ” 9.— ”

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj sendataj en letero.
APARTAĴAJ PREMIOJ:

La vendinto de tiu loto, kiu gajnis la unuan ĉefpremion (la aŭtomobilon), ricevas monpremion de 100 guldenoj. La vendinto de tiuj 9 lotoj, kiuj gajnis la ceterajn 9 ĉefpremiojn, ricevas po 25 guldenojn en mono.

La lotoj estas mendeblaj ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Ni dissendas la lotojn aŭfrankite kaj en netravidebla, fermita koverto, sed tamen je la risko de la mendanto. Se oni deziras registritan sendon, oni aldonu — 15 guld.

Grava informo: Por eviti perdiĝon de la loto, ni estas pretaj teni la aĉetintajn lotojn ĉe ni kaj sciigi la numerojn al la aĉetintoj.

La Loteria Komitato.

ALA VENKO!

AL NIAJ LEGANTOJ!

Sur ĉi tiu pago ni regule publikigas informojn pri la gravaj progresoj de Esperanto kaj de tempo al tempo ni faros alfabetan registron pri ili, por helpi al niaj propagandistoj.

Ni petas niajn legantojn, ke ili traduku la informojn kaj klopodu publikigi ilin en siaj lokaj nacilingvaj ĵurnaloj. Per tio ili faras tre valoran propagandon. Ni gratulas al tiuj abonantoj de *La Praktiko*, kiuj jam publikigis la informojn el la antaŭa numero kaj ni dankas pro la senditaj gazetekzempleroj entenantaj la represitajn informojn. Al la venko!

La redakcio.

10. Eminentaj scienculoj protektas Esperantan kurson. — En Lund, sveda universitata urbo, la rektoro de la universitato, s-ro Axel Moberg, profesoro de orientaj lingvoj, kaj episkopo Edu. Rodhe, universitata prokanceliero, akceptis la patronadon de la Ĉe-metoda Esperanto-kurso, kiun la rumana redaktoro T. Morariu komencos gvidi la 3-an de Novembro.

11. Grandskalaj paroladoj en Esperanto por la norvegaj lernejoj. — La estraro de la norvega „Lerneja Filmo“ (*Skolefilm*) en Oslo aranĝis en la tagoj 11-14. Oktobro prelegojn de la estona Esperanto-instruisto Henriko Seppik pri Estonio, kun lumbildoj kaj filmo. La prelegoj okazis en kinoteatroj, el kiuj unu, la *Colosseum*, kun 2000 sidlokoj, estas la plej granda kinoteatro de Skandinavio. Pro la granda interesiĝo oni okazigis la prelegojn kvarfoje. Partoprenis entute 7000 infanoj kaj 400 ĝeinstruistoj. Ĉeestis ankaŭ la ĝenerala konsulo de Estonio. La Lerneja Filmo honorigis s-ron Seppik per argenta pokalo. — Similaj prelegoj okazis ankaŭ en la norvegaj urboj Lilleström, Stabekk kaj Strømmen.


12. La Argentina Aero-Klubo propagandas Esperanton. — La grava argentina institucio por civila aviado „Aero Club Argentino“ la 8-an de Septembro aranĝis rondflugon de unu el siaj aeroplanoj super la ĉefurbo Buenos Aires kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj disĵetis 50.000 propagandajn flugfoliojn kun teksto invitanta al la lernado kaj uzado de Esperanto. Sekve de la efika reklamo 800 personoj aliĝis al la koresponda kurso de la Argentina Esperanto-Asocio. (*Bildon vidu sur la 6-a pago.*)

13. Esperanta Lingva Olimpiado. — Dum la kristnaska libertempo (27-29. Dec.) okazos en la Esperanto-Domo en Arnhem konkursoj por la nederlanda Esperantistaro pri la scio kaj lerteco en la lingvo Esperanto. En 12 diversaj konkursoj (kono de la gramatiko, vortaro, sintakso, tradukado, parolado, deklamado k.t.p.) oni komparas siajn kapablojn. La konkursoj okazos en tri grupoj, laŭ la lingva matureco de la partoprenantoj. Por ĉiu grupo estas difinitaj pluraj premioj. La ĉefpremiojn ricevos tiuj, kiuj akiris la plej multajn punktojn en ĉiuj konkursoj kune. — La olimpiadon organizas la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto (Hago).

14. Profesoroj parolas Esperante per radio. — Je la iniciato de la estona Akademia Esperanto-Klubo la estonaj radiostacioj en Tallinn kaj Tartu decidis disaŭdigi en Esperanto paroladojn de la jenaj eminentaj estonaj scienculoj: D-ro August Tammekann prof. de geografio en la universitato de Tartu (pri „*La Lando Estonio*“, la 30-Okt.-1932 je la 18.00 - 18.30 h. laŭ MET.); — D-ro Peeter Köpp, prof. de agronomio en la univ. de Tartu, membro de la Internacia Agrikultura Instituto en Romo (pri la estona agrikulturo, la 20-Nov.-1932 je la 18.00 - 18.30 h. laŭ MET.); — S-ro Anton Kasemets, direktoro de la teatro „Estonia“ en Tallinn, komponisto kaj verkisto (pri la estona muziko, la 18-Dec.-1932 je la 18.00 - 18.30 h. laŭ MET.); — D-ro Albert Saareste, prof. de la estona lingvo en la

univ. de Tartu (pri la estona lingvo, la 22-Jan.-1933 je la 18.00 - 18.30 h. laŭ MET.); — Prof. H. Richter intervjuos pri la *Esperantlingva Estona Antologio* kaj pri la estona literaturo magistron Gustav Suits, prof. de estona kaj ĝenerala literaturo en la univ. de Tartu, poeto, honora doktoro de la universitato de Uppsala (la 19 - Febr. - 1933 je la 18.00 - 18.30 h. laŭ MET.); — D-ro Hans Kruus, prof. de estona kaj nordlandaj historioj en la univ. de Tartu (pri la estona historio, la 19-Marto-1933 je la 18.00 - 18.30 h. laŭ MET.). — Ni varme rekomendas al la legantoj de *La Praktiko*, ke ili aŭskultu la supre menciitajn radio-paroladojn, por ricevi informojn pri la malmulte konata Estonio kaj por aŭdi la mondlingvon el la buŝo de eminentaj scienculoj kaj artistoj. Oni instigu ankaŭ neesperantistojn aŭskulti tiujn paroladojn, por ke ili konvinkigu pri la taŭgeco kaj progreso de nia lingvo. Post la aŭdo oni sendu leteron aŭ poŝtkarton al la radiostacio de Tallinn aŭ Tartu (adreso: Radiostacio) kun danko pro la parolado kaj kun instigo al pluaj similaj paroladoj.

15. Esperanto en lernejo. — En la *Boldingh-lernejo* por knabinoj en Hago (Nederlando) oni instruas Esperanton en la 7-a klaso. La instruistino de Esperanto estas f-ino Chr. Keiser, instruistino ĉe tiu lernejo. La instruado de Esperanto okazis ankaŭ en la pasinta lernoĵaro 1931—32.



La marmortabulo de la „Strato de D-ro Zamenhof“ en Barcelona (Hispanujo).

16. „Strato de D-ro Zamenhof“. — En Barcelona, ĉefurbo de Katalunio en Hispanujo, la 14-an de Aprilo 1932 oni inaŭguris la „Straton de D-ro Zamenhof“. (*La bildon de la marmortabulo kun la stratnomo kaj reliefa portreto de Zamenhof vidu supre. Bildo pri la inaŭgura solenaĵo aperis jam en la 8-a numero de La Praktiko.*)

17. La radio-stacio en Zagreb (Jugoslavio) disaŭdigas de la 22-a de Okt. 1932 en ĉiu dua sabato propagandajn prelegojn pri Esperanto, aranĝatajn de la Studenta Esperantista Klubo en Zagreb.

18. La radio-stacio en Helsingborg (Svedujo) dissendas en ĉiu dua dimanĉo Esperanto-kurson kaj paroladon. La 6-an de Novembro 1932 parolas la rumana redaktoro Tiberio Morariu kaj lia sveda edzino Lizzi Andersson pri la temo: „Per Esperanto tra Mezeŭropo“.

19. La radio-stacio de Varŝavo (ĉefurbo de Polujo) decidis okazigi regule radio-paroladojn en Esperanto en ĉiu dua merkredo je la 22.40 - 22.55 h. La unuan paroladon faros s-ro T. Hodakowski pri la „festo de sendependeco en Polujo“, la 9-an de Novembro.

la mondo ridas



Moderna astronomio.

Instruisto: Ĉu vi scias la nomojn de kelkaj steloj, Marinjo?

Marinjo: Ho jes! Greta Garbo, Pola Negri, Dolores del Rio!

★

La gajninto.

— Mi vetas je dek guldenoj, ke vi ne scias, kial mi vizitas vin.

— Facila veto. Vi kompreneble volas prunti monon de mi!

— Tute ne! Mi volis nur informiĝi pri via sano. Do rapide tian la dek guldenojn, ĉar mi gajnis!

★

Naturscienco.

Instruisto: Joĉjo, diru la nomojn de la elementoj!


Joĉjo: Fajro, akvo, tero, aero kaj brando.

— Sed la brando ne estas elemento!

— Sed jes! Kiam mia patro stas ebria, la patrino ĉiam diras al li: „Vi estas denove en via elemento.”

(Lustige Blätter)

★



En ebrio.

— Sinjoro, vi ŝajnas esti konata al mi. Ĉu vi ne scias, kie ni vidis nin?

— Al mi ŝajnas, ke en la lasta antialkoholista kongreso.

(Travaso)

El kio oni vivas.

— Mia kuzo perlaboras 8000 guldenojn jare kiel flugmaŝina direktisto.

— Kaj jen, oni diras, ke oni ne povas vivi el aero.

(Haagsche Post)

★

La amatora rajdisto.

— Jen, mia rajd-foto-grafo.

— Sendube momenta bildo.

— Kial vi pensas tion?

— Ĉar vi estas sur la ĉevalo.



Alloga ekzemplo.

— Paĉjo, kiam mi estos granda, ĉu ankaŭ mi povos esti tiel malĝentila, kiel vi?

— Jes, fileto, se vi bone kondutas.

(Le Rire)

★

Antaŭ la juĝisto.

— Do vi konfesas, ke vi ŝtelis la revolveron?

— Jes, sed nur por ke mi mortpafu min per ĝi.

— Sed tiam kial vi vendis ĝin?

— Por ke mi povu aĉeti kuglojn per ĝia prezo.

(Life)

★

Malfacila kazo.

Kuracisto: Vi devas mal multe manĝi, alkoholon tute ne trinki, ne fumi; matene frue leviĝi, vespere frue enlitiĝi kaj multe promeni.

Malsanulo: Sed sinjoro doktoro, se mi plenumas ĉion, kion vi diris, kian bezonon mi havas je kuracisto?

(Judge)

La eterna regulo.

Edzo: Die kie vi havas novan ĉapelon?

Edzino: Aĉetita.

— De kie vi havis la monon?

— Trovita!

— Kie?

— En via poŝto!

(De Lach)

Bona advokato.

— La hundo de via najbaro mordis vin, disŝiris vian pantalonon kaj vi malgraŭ tio ne akuzas lin ĉe la juĝejo. Kio estas la kaŭzo?

— Rigardu, la homaĉo havas tian advokaton, ke li kapablas kredi al la juĝisto, ke mi mordis la hundon kaj mi disŝiris ĝian pantalonon.

(Wróble na dachu)

★

Grava malsano.

— Jam pluraj kuracistoj rezignis pri mi.

— Kiel? Ĉu ili trovas vian malsanon nekuracebla?

— Nu, ĝuste tion ne. Sed ĉar mi ne pagis al ili.

(Hummel)

★

La nova advokato.

— Akceptu mian gratulon! Mi aŭdis, ke vi jam havas unu proceson.

— Jes, mia tajloro faris proceson pro mia ŝuldo.

(Herold)

★

Praktike.

— Mi apenaŭ povis rekonii vian patron, amiketo. Li detondigis sian barbon.

— Ne li, sed la patrino, por ŝtopi per ĝi la kanapon.

(Tatler)

★

Eŭropano kaj ĉino.

— Mia flava frato, diru al mi, ĉu vi scias, kia estas la aŭtobuso?

— Ne, mia blanka frato, mi ne scias tion.

— Ĝi estas ronda, ĝi estas flava, kiel citrono, sed tamen ĝi ne estas citrono.

(Jaunakas Zinas)

★

En malliberejo.

Vizitantino: Kaj pro kio vi venis en la malliberejon?

Malliberulo: Pro miopeco.

— Kiel?

— Ĉar kiam mi malplenigis la fenestron de la magazeno, mi ne ekvidis la policiston.




Sub perforto.

— Kaj nun, sinjoro, ĉu vi estas preta malaltigi la luprezon?

(Dimanche Illustré)



La propagando de Esperanto en Argentino. — La Argentina Aero-Klubo faris al nia movado per nobla gesto gravan helpon. Ĝi disponigis al la Argentina Esperanto-Asocio aeroplanon, kiu jetis sur la urbon Buenos Aires 50.000 propagandajn flugfoliojn kun invito al koresponda kurso. Al la kurso aliĝis 800 personoj. Ĉi tiun bildon oni faris kelkajn momentojn antaŭ la propaganda flugo, la 8-an de Septembro. La personoj estas (de maldekstre): s-roj A. Corral kaj C. Otheguy, redaktantoj de Argentina Esperantisto, s-ro Jozefo N. Santoianni piloto, D-ro Toscano kuracisto de la argentina armeo, kapitano Petro Castex Lainfor direktoro de la milita aviado, s-ro Rodolfo G. Bosch esperantista flugisto kaj s-ro A. Villafranca, reprezentanto de la Esperanta koresponda kurso. — Oni imitu ĉi tiun belegan ekzemplon!



La Esperanto-klaso de la katolika lernejo en la S. Eusebius-domo en Arnhem. La gvidanto de la klaso, frato Henriko, fervora propagandisto kaj instruanto de nia lingvo, staras maldekstre. La bravaj nederlandaj knaboj entuziasme lernas nian lingvon kaj rapide progresas en ĝia uzado.

LA MALDEKSTRA BILDO:


La Centra Oficejo de UEA en Genevo. — UEA (= Universala Esperanto-Asocio) estas la granda internacia organizaĵo de tiuj Esperantistoj, kiuj volas ne nur lerni Esperanton, sed ankaŭ uzi ĝin en la praktiko. UEA havas reprezentantojn („delegitojn“) en pli ol 2000 urboj de la mondo. La delegitoj estas je la helpo de la membroj, kiam ili petas informojn aŭ vojaĝas. La Centra Oficejo de UEA estas en tre interesa punkto de la urbo Genevo (Svislando), en la „turo de la insulo“, domo konstruita sur insuleto de la rivero Rono, en la mezo de la urbo. La turo estas historia vidindaĵo.



Kurso en Bezenec. — Nia senlaca ĉeĥoslovaka propagandisto s-ro Dolfa Bartošik, instruisto en Uti, Ostroh, guidas sukcesan kurson en la ĉeĥoslovaka urbo Bezenec. Post efika propaganda parolado kaj proleciono aliĝis al la kurso 50 personoj. En la sama urbo okazis samtempe ankaŭ angla kurso, sed ĝi devis ĉesi, ĉar la kursanoj transiris al la Esperanta kurso. S-ro Bartošik staras tute dekstre.



Kurso en Nowa-Wies (Polujo). — S-ino Klara Borzykowska, la agema instruistino de nia lingvo, guidas plurajn kursojn en Polujo. Ĉi tiu bildo montras la vendejan lecionon de la kurso en la pola urbo Nowa-Wies. La ŝafata instruistino staras ĉe la nigra tabulo kaj klarigas la gravan vorton „komercisto“.



La indigenoj de Nederlanda Hindujo lernas Esperanton. — S-ro Dick M. Pot, oficiisto de la Batava Petrola Societo, kunlaboranto de la Ĉeĥ-Instituto, komencis en Nederlanda Hindujo viglan propagandon por nia lingvo. En liaj kursoj multaj indigenoj lernas Esperanton. Ĉi tiu bildo montras la partoprenantojn de la unua kurso por indigenoj en la urbo Sambodja sur la insulo Borneo. S-ro Pot staras supre, malantaŭ f-ino Tamon. Tute dekstre staras D-ro Zakir, kuracisto. Ĉiuj kursanoj legas La Praktikon.



Jurnalistoj interesigas pri Esperanto. — En la nederlanda urbo Dordrecht s-ro W. Kunnen, prezidanto de la tuta Esperantista societo „Tra la Mondo“, okazis vizito de nia rumana kunlaboranto s-ro Pragano, kunvokis la anojn de la Jurnalista Rondo de Dordrecht al interparolo pri Esperanto. En la mezo sidas s-ro Huisman urba konsilanto kaj prezidanto de la Rondo, ornamita per granda stelo pro lia simpatio al Esperanto. S-roj Pragano kaj Kunnen staras en la mezo.



Strangaj luprezoj.

En Britujo multaj aristokratoj laŭ malnova privilegio pagas la luprezon per rozo, akvo aŭ neĝo. La skota princo Atholl ekzemple loĝas en belega kastelo kaj kiel luprezon li sendas al la brita reĝo ĉiujare unu blankan rozon. Ĉi tiu kutimo ekzistas jam de du jarcentoj. En tiu tempo la estro de la familio apartenis al la partio de la domo Stuart. Sed kiam la angla armeo iris kontraŭ la Stuartoj, li aliĝis al la angla reĝo. Kiel signon de sia submetiĝo li prezentis al la reĝo blankan rozon. La reĝo akceptis ĝin kun la kondiĉo, ke li devas ĉiujare ripeti la transdonon de la rozo por esprimi per tio la rajton de la reĝo al la kastelo. — Estas alia skota nobelo, kiu devas servi lav-akvon, se la reĝo tion deziras. — Lordo Poulis ĉiujare devas porti en la fortikajon de Edinburgo unu sitelon da neĝo. Se iu vintro estas tro milda kaj ne falas neĝo, li devas en la sekvanta vintro porti du sitelojn da neĝo. La princo Marlborough anstataŭ loĝmono devas transdoni al la reĝo ĉiujare unu malgrandan silkan flagon.

Harditaj testudoj.

En iu tago la farmisto Blignaut en Sudafriko vojaĝis kun sia veturilo de Kapurbo al Wellington. Survoje li faris ripozon ĉe la urbeto Kraaifontein. Li maljungis la ĉevalojn kaj dormetis sur la kampo. Post la ripozo li ekvidis grandan testudon. Por ke la testudo ne povu forkuri, dum li rejungas la ĉevalojn, li

turnis la testudon, kuŝigis ĝin sur la dorson, kaj metis sur ĝin grandan ŝtonon. Sed post la rejungo de la ĉevaloj li ne povis retrovi la testudon. Post unu jaro li denove faris la saman vojon kaj faris ripozon sur la sama loko. Hazarde li retrovis la testudon. Ĝi kuŝis ankoraŭ en la sama maniero, sur la dorso, sub la granda ŝtono. La farmisto deprenis la ŝtonon kaj tiam je lia granda miro la testudo turnis sin kaj malrapide forrampis. La testudo pasigis unu tujan jaron sen ia ajn manĝaĵo, sed ĝi elportis tion, same kiel la malfavoraĵojn de la vetero.

Pro la kuloj.

En la franca urbo Lyon antaŭ nelonge en la frumateno oni vekis iun drogiston kun la novaĵo, ke dum la nokto oni pirabis lian butikon. La vendeĝo montris efektive la bildon de elrabita loko. Ĉiuj tirkestoj estis malfermitaj kaj ilia enhavo disjetita sur la planko. Sed kiam la drogisto komencis kalkuli la mankon, kun surprizo li rimarkis, ke nenio mankas. Eĉ, sur la vendotablo li trovis paperon, kiu solvis la tutan enigmon. La skribinto de la letero komunikis, ke dum la nokto li ne povis dormi pro la kuloj. Pro iliaj pikoj lia tuta vizaĝo ŝveliĝis kaj unu el liaj oreloj multe pligrandiĝis. En tiu situacio li nepre bezonis ian rimedon kaj tial li enrompis en la drogejon. Li feliĉe trovis la taŭgan rimedon, prenis kun si la skatolon kaj la prezon, 10 frankojn, lasis sur la vendotablo.

La lando de la gigantaj krateroj.

Inter la lago Viktoria kaj monto Kili-maŝaro en Afriko estas la lando de la plej grandaj krateroj. Inter la multaj aliaj oni trovas tie ok jam estingiĝintajn vulkanojn, kies alteco superas trimil metrojn. La kratero de la plej granda vulkano havas diametron de 20 kilometroj, do unu Eŭropa ĉefurbo tute komforte povas havi lokon en ĝi. Antaŭ la mondmilito estis en ĝi la farmo de iu koloniisto.

Duobla bonŝanco.

Antaŭ nelonge iu malriĉa laboristo en Berlino aĉetis tombolan bileton. Ĉe la tiro li gajnis grasan anason. Kun ĝojo li portis la anason hejmen, transdonis ĝin al sia edzino, kiu komencis fari el ĝi bonan vespermanĝon. Ĉe la malfermo de la anaso nova ĝojo atendis ilin: ili trovis en la anaso oran brakringon.

2000 citronoj dum kvar monatoj.

En vilaĝo apud Belgrado en Jugoslavio vivas iu oficisto, kiu jam de longa tempo suferis en stomakmalsano. La kuracistoj asertis, ke lia malsano ne estas kuracebla. Fine la malsanulo decidis fari radikalan kuracon: li faris trifojne malsat-dieton, ĉiam dum 40 tagoj. Dum tiu tempo li manĝis nur citronojn, entute 2000 pecojn. La rezulto pravigis la strangan kuracmetodon, ĉar poste la kuracistoj devis konstati, ke la oficisto fariĝis tute sana. Sed la kuraco kostis 22 kilogramojn, ĉar tiom li perdis el la pezo de sia korpo.

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Morto. — La 3-an de Oktobro en Budapeŝto mortis en 64-jara aĝo s-ro *Paŭlo Lengyel*, membro de la Lingva Komitato. Li estis unu el la plej fruaj kaj plej meritplenaj pioniroj de Esperanto. Li estis dum kelka tempo redaktoro de la fama Esp-gazeto „Lingvo Internacia“. El sia hejmlando Hungarujo li transloĝiĝis al Parizo, kie li fondis la Presan Esperantistan Societon kaj direktis la Centran Presejon Esperantistan.

Nova organizo de la Esperantistaro. — En la lasta universala kongreso de Esperanto en Parizo la gvidantaro de la Esperanto-movado decidis ŝanĝi la ĝisnunan sistemon en la internacia organizo de la Esperantistaro. Tiu decido estis sekvo de la ĝenerala deziro havi unuecan organizaĵon, en kiu per unu kotizo oni povas esti membro de la landa kaj de la internacia organizaĵoj samtempe. — Oni elektis en Parizo komitaton el sep personoj, por ellabori la statuton de la nova organizo. La tuta Esperantistaro kun granda intereso atendas, ke oni solvos la malfacilan, sed tre gravan problemon en la plej taŭga maniero.

Fino Margarete Saxl, instruistino de modernaj lingvoj en Berlino kaj instruistino de la Cseh-Instituto, sukcesplene gvidas siajn unuajn eksterlandajn kursojn en Danujo. La gazetaro tre favore raportis pri ŝiaj paroladoj kaj lecionoj kaj la nombro de ŝiaj kursanoj daŭre kreskadis, ĵus finiĝis ŝia unua kurso en Silkeborg kaj post la kursfino oni fondis Esperanto-klubon. El la 40 kursanoj aliĝis al la klubo 38 personoj. F-ino Saxl gvidos pluajn kursojn en Danujo dum ĉi tiu vintro.

Kursoj en Nederlando. — En DORDRECHT la publikan lecionon de S. Pragano ĉeestis pli ol 300 personoj, el kiuj al la kurso aliĝis 80 personoj. La nombro poste kreskis al pli ol 90. — En GORINCHEM kaj ROTTERDAM kursojn gvidas s-ro S. Pragano. — En AMSTERDAM kursojn gvidas A. Cseh por 60 personoj. — En LEIDEN la lokaj Esp-grupoj neŭtrala, katolika kaj laborista kune organizis kursojn gvidatan de Andreo Cseh. La frukto de la modela organizo estis tre sukcesa publika leciono kaj 125 kursanoj. — En ZEIST kursojn gvidas f-ino H. Plemper van Balen.

Anglujo. — S-ro S. H. Fomison gvidas kursojn en Newcastle kaj South Shields. — En Cheltenham la tiea Esp-societo aranĝas kursojn, kiujn gvidas s-ro W. M. Appleby. — En Bishop Auckland f-ino A. B. Edwards gvidas vesperan kursojn.

Cehoslovakujo. — Nia propagandisto s-ro Dolfi Bartošik faris propagandan paroladon en Bzenec en la artileria kazerno, al 300 militistoj. La paro-

ladon oni tradukis en germanan kaj hungaran lingvojn. Li organizas nun kursojn en Uh. Hradište la 5-an de Oktobro. La kursojn aranĝis la „Komenský“ kaj la Regiona Porkultura Societo.

Germanujo. — En Leipzig s-ino Ch. Stegenwaller gvidas kursojn aranĝatan de la Esp.-Societo en Leipzig.

Norvegujo. — D-ro O. Fischer finis siajn kursojn en Hamar kaj komencis novajn kursojn en Trondheim. — En Hammerfest kursojn gvidas s-ro Nicolaisen. — S-ro Henriko Seppik finis siajn kursojn en Oslo kaj Lilleström kaj komencis novajn kursojn en Stavanger.

Svedujo. — En MALMÖ post provleciono, kiun partoprenis 200 personoj, s-ro T. Morariu komencis kursojn la 5-an de Oktobro. La kursojn aranĝis la Laborista Kleriga Asocio (A.B.F.) kaj la Laborista Esperanto-Grupo. — En LUND, universitata urbo en Suda Svedujo, s-ro T. Morariu la 3-an de Novembro komencas kursojn, sub la patronado de la univers. rektoro s-ro Axel Moberg kaj episkopo Edv. Rodhe.

Kolonio de senlaboruloj. — En Anglujo 18 junaj senlaboruloj ne volis akcepti la ŝtatan senlaborulan subtenon, sed preferis per laboro akiri la vivtenon. Tial ili fondis meze en arbaro ĝardenan kolonion kaj propramane produktas ĉiajn bezonaĵojn. La gvidanto de la kolonio estas nia samideano s-ro W. K. Robinson. Nun la tuta kolonio komencas lerni Esperanton. La nomo de la kolonio estas: „Grith Fyrd Camp“, sude de Salisbury.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandon bonvolu aldoni respond-markon.

S-ro H. R. en W. (Germ.). — 1. Kompreneble, ne la aglo, sed la struto estas la plej „alta” birdo. La aglo povas esti la plej alta fluganta aŭ la plej alttestimata birdo. — 2. „Kvieta” signifas fizikan taton kaj „trankvila” rilatas al la morala stato. „Amen” en la praktiko oni kelkfoje interŝanĝas la vorton pro metafora uzo kaj ĉi ili havas tre proksimajn signifojn. — 3. La vorto „ĉe” signifas: en la proksimo. Ĝi havas tute ĝeneralan, eprecizan signifon de proksimeco, kunesto, samlokeco. La samlokecon precize difinas la aliaj prepozicioj: *sur, sub, en, apud, inter, antaŭ, malantaŭ* t.p. *Apud* = ĉe la flanko. — 4. Vi estas prava, ĉi devas diri en Esperanto: *Bulonjo ĉe la maro* aŭ *Bulonjo apud la maro*. La formo: *Bulonjo sur la maro* estas sklava traduko de la franca formo. — 5. Anstataŭ la vorto ombroli vi tre bone povas diri la vorton „ŝirmilo”, do: *pluvŝirmilo kaj sunŝirmilo*. Sed ankaŭ la vorto „ombrello” estas tute bona. Uzante ĝin oni ne bezonas pensi pri la ombro. — 6. Oni kutimas diri „malfermi la kongreson” kvante la esprimmanieron de la naciaj lingvoj, tamen oni prave dubas pri ĝia logikeco. Sed la praktika uzo de la lingvo ankaŭ la kutimo das gravan rolon, ne nur la logiko. Kompreneble ni rajtas diri: „komenci la kongreson”. Sed estas demando, ĉu ĉi tiu pli logika esprimo elpuŝis iam alian, jam enradikiĝintan? — 7. Ankaŭ ni edaŭras, ke per la eltranĉado de la konkursoj aponejoj oni difektas la gazeton. Tamen tio ne estas tre grava, ĉar la tekstoj mem ne difektigis. is nun ni ne sukcesis eltrovi pli bonan sistemon.

S-ro K. K. en Rusujo. — 1. Vere la esprimo *Vagadi sur la norda parto de Parizo* sonas iom range. Preferinda estas la prepozicio „en”. — „La pilgrimanto malrapide iris sur la vojo”. In ĉi tiu frazo la prepozicio „sur” estas tute korekta. Anstataŭ ĝi uzi la vorton „tra” aŭ „laŭ” stus malbone. — 3. „Sur la kontraŭa flanko de la strato”. La vorto „sur” ĉi tie ne estas malekta, sed oni povas diri ankaŭ: en kaj ĉe. — „Li jetis sin sur la ŝtuparon”. La frazo estas bona. Oni povas diri ankaŭ: „al la ŝtuparo”, sed iam ni ne scias, ĉu li atingis la ŝtuparon kaj ĉi li falis sur la ŝtuparon, aŭ apud la ŝtuparon aŭ ub la ŝtuparon. — 5. „Trapasi la straton” estas tre bona esprimo. Ankaŭ „trairi”. — 6. „Oni lin rairigis la straton”. Malbela frazo. Prefere diru: *Oni devigis lin trairi la straton*.

S-ro W. G. en L. (Ned.). — Ni dankas pro ĉi tiu interesa kaj preciza scienca ellaboro. Niaj konkursoj estas popularaj kaj tial ĉe la 29-a konkurso ni ne postulis tiel profundan astronomian konon.

S-ro F. M. L. en B. (Germ.). — 1. Jes, oni povas Esperantigi la nomojn de urboj. La naturo je ĉiu lingvo postulas, ke la vortoj en ĝi uzataj estu konformaj al la gramatikaj reguloj de la lingvo. En Esperanto tio signifas, ke la nomoj devas ricevi la finaĵojn „o”, havi la akcenton sur la antaŭlasta silabo kaj esti skribataj laŭ la Esperanta skribmaniero. Tial ni kutimas Esp-igi la nomojn, sed nur de la plej konataj urboj, pri kiuj oni ofte parolas. Ekzemple: *Londono, Krakovo, Parizo, Varŝavo, Liverpulo, Novjorko, Romo, Vaŝingtono, Vieno*. Ĉe la Esp-igo de la nomoj ni devas atenti, ke la Esp-a nomo restu simila al la originala, por ke oni facile komprenu ĝin. Se tio estas malfacila, ni preferu konservi la originalan skribmanieron kaj aldonu la elparolon inter parentezoj. Ni tre bedaŭras, ke vi trovis en Esp-a teksto

la vorton „Cologne”. Aŭ oni Esp-igu la nomon kaj diru „Kolonjo”, aŭ oni lasu ĝin en la originala formo „Köln”. Simile granda eraro estas uzi en Esp-a teksto: *Mailand, Boedapest, Krakau, Rom*. — 2. Por ricevi prunte Esp-ajn librojn bonvolu turni vin al la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, gvidanto: Dr. phil. Max Friedrich Schreiber, Pegauer Str. 8, Leipzig S. 3. — 3. Ne malĝoju kaj ne malkuraĝiĝu pro tio, ke viaj kolegoj mokus vin kaj nomas vin idioton, pro via Esperantisteco. Vi ja bone scias, ke ili estas la idiotoj. Sed tion ne diru al ili. Estas sufiĉe, se vi pensas tion. Venos la tempo, kiam ili ĉiuj imitos vin, kiel simioj.

S-ro J. B. en P. (Ĉeĥosl.). — Ne estas eraro, se en leteroj vi skribas la vorton „vi” kun granda litero, do: „Vi”. Ne ekzistas regulo pri tio. Ĉar ni opinias, ke tia ĝentilajo estas superflua, ni konsilas al vi skribi la vorton kun malgranda litero.

S-ro K. A. en M. — Nia gazeto ne polemikas, sed ĝi instruas kaj amuzas. La plezuron de la disputado ni lasas al tiuj samideanoj, kiuj la venkon de Esperanto atendas de la batalado inter la Esperantistoj mem.

F-ino M. de K. en G. — 1) „us” esprimas supozon, okazon, kiu ne realiĝos, ne efektiviĝos. „os” esprimas simplan futuron, okazontajn certan, ne supozatan aŭ kondiĉan. Ekz.: *Se mi havus monon, mi vojaĝus*. Oni povas daŭrigi: *Sed mi ne havas monon*. En viaj du frazoj: „Se mi ne plu vivus” kaj „Li sentis, ke lia edzino ne estus forlasita, se la kuracistoj estus erarintaj”, ambaŭ formoj estas uzebaj. La elekto dependas de la penso de la parolanto. — 2) „Fikse rigardi antaŭ si (sin).” La korekta formo estas: *antaŭ sin*. Vi klare vidis tion, se ni pligrandigas la frazon: „Sur la scenejo li fikse rigardis antaŭ sin.” Ni demandu: Kie? Sur la scenejo. Kien? Antaŭ sin. La verbo „rigardi” esprimas ne staton, sed agon. Tion tre klare montras ĝia difino: direkti la vidon al io.

Al kelkaj plendintoj. — Kelkaj abonantoj plendas, ke ili ne ricevis certajn numerojn de La Praktiko. Tio neniel povas esti nia kulpo, ĉar ni ekspedas la gazeton al ĉiu abonanto en la sama tago kaj la adresadon faras perfekta maŝino, kiu ne povas fari erarojn. Do tiuj numeroj perdiĝis ĉe la poŝto. Tamen ni ĉiam plej volonte sendas denove tiujn numerojn, kondiĉe, ke oni petas nin por tio kun ĝentileco kaj ne kun malĝentilaj riproĉoj. Je malĝentilaj leteroj ni ne kutimas respondi.

S-ro B. v. d. W. en R. (Ned.). — La poŝtoferoj, reŝanĝante la respondukuponon, ne donas kontantan monon, sed nur poŝtmarkojn aŭ aliajn poŝtajn valor-objektojn.

S-ro F. F. en Vieno. — La vorto „punigi” estas tute bona. Ĝi signifas: *iĝi punata, punatigi*. La klarigo estas: kiam ni uzas la sufikson „ig” kun transitiva verbradiko, ni devas ĉiam alpreni la pasivan partecipan sufikson „at”.

F-ino M. C. J. v. d. G. en D. — 1. Post „anstataŭ” estas ĉiam nominativo, ĉar ĝi estas prepozicio kaj en Esp-o la prepozicioj neniam postulas akuzativon. Se vi tamen renkontas frazon, kiel ekz-e: *Mi trinkis limonadon anstataŭ bieron*, la klarigo estas tio, ke la akuzativo de la vorto „bieron” postulas ne la vorto „anstataŭ”, sed la forlasita vorto „trinki”, kiun ni tamen alprenas. La kompleta frazo estas tiam: *Mi trinkis limonadon, anstataŭ trinki bieron*. Kiel vi vidas, la akuzativo ĉi tie estas pro la verbo kaj ne pro la prepozicio. Do ĉio estas en ordo, ĉu ne? Samtempe vi vidas ankaŭ tion, ke post la vorto „anstataŭ” povas servi aŭ substantivo en nominativo, aŭ infinitivo. — 2. Post la prepozicio „krom” neniam oni uzas akuzativon. — 3. La vorto „escepte” (same kiel ankaŭ „rilate”, „koncerne”) ne estas prepozicio, sed adverbo derivita de transitiva verbo kaj uzata kiel prepozicio. Estas bone, se vi uzas post ili akuzativon. Sed plej bone vi solvas la problemon, se vi kombinas tiujn vortojn kun veraj prepozicioj kaj diras: *escepte de, rilate al, koncerne al*. — 4. „La stacidomo estas proksima.” La frazo estas tute bona, ĉar vi demandas: Kie? kaj respondas:

Proksime. Oni povas diri ankaŭ: *La stacidomo estas proksima*. Sed tiam ni parolas ne pri la loko de la stacidomo, sed pri ĝia eco, kaj ni devas demandi: *Kia estas la stacidomo?* — Ni rekomendas al vi la librojn: *Kompleta Gramatiko kaj Plena Vortaro*.

S-ro L. A. W. en E. O. (Usono). — „Ĉu estas vera, ke via filo edziĝis?” En ĉi tiu frazo la vorto „vera” ne estas malbona. La klarigo estas, ke oni forlasis, sed tamen alprenas la vorton „tio” kaj sekve la kompleta frazo estas: *Ĉu estas vera tio, ke...* Tiam forlasadon de vortoj oni multe praktikas en la uzo de la lingvo. Ekzemple ni diras: *Bonan tagon!*, anstataŭ: *Mi deziras al vi bonan tagon*. Kompreneble vi povas diri ankaŭ: *Ĉu estas vere, ke...*

S-ro L. C. en M. (Ital.). — „Ili sidis al la tablo.” En ĉi tiu frazo la vorto „sidi” signifas: „eksid”, „alsidiĝi”. Ĝuste tion montras la esprimo „al la tablo”. Kaj ĉar la eksido estas ankaŭ proksimiĝo al la tablo, la frazo ne estas malkorekta.

Al kelkaj, kiuj plendas pri „silentantaj” korespondantoj. — Se vi volas eviti la riskon, ke vi vane skribas al anonciitoj en la rubriko „Korespondul”, ni rekomendas, ke vi mem publikigu vian adreson kaj viajn dezirojn. Cetere inter la adresoj vi trovas ankaŭ tiajn, ĉe kiuj estas aldonite: „certe respondos”. Al tiuj vi povas skribi kun plena espero.

S-ro A. P. en V. (Hisp.). — Dankon pro la gratulo. Via abono finiĝos kun la decembra numero.

ANONCETOJ

TARIFO: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

KLUBOJ! — Ni sendas por unu respondukuponon facilan teatarjeton: „Terano kaj Marsano”. Tre taŭga por klubvesperoj. „La Norda Stelo”, Hamar, Norvegujo.

KORESPONDADO. — Knabo 17-jara deziras korespondi, prefere kun eksterlandaj abstinenculoj. Adreso: *Gerardus Kuperus, 6-e Vegelindw. str. 1, Leeuwarden (Nederlando)*.

GRAVA ALVOKO al ĉiulandaj Esperantistoj kaj institucioj. — La grava argentina institucio por civila aviado „Aero Club Argentino” metis siajn flugaparatojn je la dispono de Argentina Esperanto-Asocio por la propagando de Esperanto. En ĉi tiu numero de La Praktiko vi vidas bildon pri la unua flugo tiucela. Ni petas vin plej insiste, bonvolu sendi leteron aŭ poŝtkarton al la suba adreso, kun danko al la estraro de tiu institucio pro la senkondiĉa kaj valora helpo al nia laboro. Argentina Esperanto-Asocio antaŭdankas vin plej sincere pro la bona plenumo de ĉi tiu peto. — La korespondantoj bonvolu adresi al: „AERO CLUB ARGENTINO”, str. Esmeralda 238, Buenos Aires (Argentino).

DUONPREZAJ ABONOJ estas ankoraŭ haveblaj. Personoj, kiuj deziras ricevi La Praktikon por la jaro 1932 duonpreze, sendu al la eldonejo 10 tiajn poŝtmarkojn de sia lando, per kia oni afrankas leteron al eksterlando. Detalaj informoj en la Julia numero sur la dua paĝo.

KIU HELPOS? — Kelkaj senlaboruloj deziras, sed ne povas aboni La Praktikon. Kiu bonvolas pagi por ili la duonon de la abonprezo? La alian duonon pagos la eldonejo mem. Koran antaŭdankon en ilia nomo.

DANKO. — La estraro de la Esperanto-Domo en Arnhem diras koran dankon al la Esperantista Societo „Norda Stelo” en Hamar (Norvegujo), kiu donacis al la domo belegan grandan bildon pri la historiaj ruinoj ĉe Hamar. La bildon, kiu nun ornamas la konversacian salondon de la Esperanto-Domo, alportis dum la somero persone la prezidanto de la societo, s-ro ing. Kleven.

KONKURSOJ

Legu la ĝeneralajn regulojn en la Oktobra numero!

32-a konkurso.

(Represita el la Junia numero)

Kiu estis la plej diligenta?

(La konkurso de la konkursoj)

Ni deziras per apartaj donacoj premii tiujn fidelajn legantojn de la Praktiko, kiuj plej diligente partoprenadas en niaj konkursoj. 15 premiojn ni disdonos al tiuj personoj, kiuj dum la jaro 1932 plej ofte partoprenis kun bona solvo.

Speciala celo de ĉi tiu konkurso estas, ke ankaŭ tiuj personoj ricevu premiojn, kiujn ne favoris la sorto ĉe la dislotado de la premioj, kvankam ili ensendadis ĝustajn solvojn.

Reguloj de partopreno: 1. Ĝis la 15-a de Januaro 1933 bonvolu sendi al ni la liston de tiuj konkursoj aperintaj en la Praktiko dum la jaro 1932, en kiuj vi partoprenis kun ĝusta solvo. Vi ne bezonas ripeti la solvojn mem, sufiĉas skribi nur la numerojn de la konkursoj.

2. Post ĉiu konkurso-numero aldonu, ĉu vi ricevis premion en tiu konkurso, aŭ ne.

3. Algluu la kuponon de ĉi tiu konkurso kaj plenumu la ĝeneralajn konkurso-regulojn. La kupono estas en la Junia numero.

47-a konkurso.

5	2	6	18				14	9	1	5
1	14	1	3	13	2	7	1	10	4	5
7	8	5	15	6	1	4	5	7	2	10
2	6	11	1	14	7	2	1	13	8	9
13	12	1	12				8	2	6	1
	10	12	2	16			7	3	3	3
	6	10	5	10			2	4	6	8
9	2	12	11				3	15	3	7
2	3	17	8	5	9	1	11	6	3	6
20	4	3	4	1	8	3	4	2	21	3
1	2	4	13	2	16	9	7	2	4	19
5	9	1	11				14	1	15	11

En ĉiun kvadraton enmetu unu literon. La rezulto estos preĝetaj vortoj de Zamenhof el lia parolado farita en la jaro 1907 en la Guildhall en Londono.

Ŝlosil-vortoj:

11, 8, 1, 5, 10, 12, 2 = lando en Eŭropo,
13, 2, 16, 3, 6, 20, 1, 18, 2 = ĉefurbo en Eŭropo
4, 3, 7, 19, 3, 6, 8, 2 = suboficira titolo,
17, 11, 7, 13, 1, 14 = prepozicio,
21, 3, 7, 9, 2 = besteto en la fromaĝo.

Al la ensendintoj de la ĝusta solvo ni donos 8 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Februaro.

Ne forgesu plenumi la ĝeneralajn regulojn!

La celo de niaj konkursoj estas: doni al la Esperantistaro agrablan kaj interesan okazon por ekzerci la lingvon. Ni varme rekomendas al ĉiu samideano diligente uzi ĉi tiun tre efikan manieron de la praktiko.

48-a konkurso.

ENIGMO

Ĉiu kvadrato signifas unu literon. En vertikala direkto estas ĉiam la sama litero. La solvo donas gravan nomon.

La bovino donas ĝin

Plezurigas la homojn

Kuireja ilo

Parto de dramo

Aŭdebla en opero

Kolorilo

Malpura mambesto

Nedifinita vorto

Manko de sentoj

Demanda vorto

Kaŭzo de doloro

La lignajisto uzas ĝin


Sovaĝa besto

Montra vorto

La poŝto transportas ĝin

Parto de la cirklo

Arbo konifera



La solvo:

□□□□□□□□□□

Al la ensendintoj de la ĝusta solvo ni donos 8 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Februaro. Bonvolu observi la ĝeneralajn regulojn.

49-a konkurso.

SILAB-ENIGMO.

ag, ak, ak, ar, ĉo, da, do, do, do, do, dor, er, es, est, fla, fo, fo, ĝo, ko, lo, lo, lun, mar, na, ne, nig, no, nok, nor, nuk, on, onk, or, pas, ra, re, ro, ro, ro, so, so, so, ŝa, ti, to, to, ur, va, ver, vint, vo, zeb, zin, zo.

El ĉi tiuj 54 silaboj faru 27 dusilabajn vortojn kun signifo:

1. Parto de la tago.
2. La terkulturisto faras.
3. Kvarpieda besto.
4. Parenco.
5. Koloro.
6. Granda besto.
7. Nomo de tago.
8. Granda birdo.
9. Koloro.
10. La veturilo havas.
11. Afrika besto.
12. La maro havas.
13. Direkto.
14. La plej ofta verbo.
15. Parto de la korpo.
16. Koloro.
17. Fiskaptilo.
18. Grava persono.
19. Nomo de tago.
20. La rozo havas.
21. Trinkajo.
22. Frukto.
23. Jarparto.
24. Apartenas al la violono.
25. Metal.
26. Ne havas gepatrojn.
27. Blanka akvo.

La unuaj literoj de la 27 vortoj donas interesan proverbon kun sekvinda enhavo.

Al tiuj personoj, kiuj bone solvis ĉi tiun enigmon, ni disdonos per loto 8 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la 1-a de Februaro. Bonvolu plenumi la ĝeneralajn regulojn!

Kupono
por la
47-a
konkurso

Kupono
por la
48-a
konkurso

Kupono
por la
49-a
konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.



ADRESOJ.

Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas —45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.
Favoro al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresigi sian adreson senpage unufoje en la jaro.
GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondajo, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto.
 — La redakcio.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro interŝ. = interŝanĝi bfl. = la poŝtmarkon
 s-ino = sinjorino L = letero gluu sur la bildan
 f-ino = fraŭlino PK = poŝtkarto flankon
 dez. = deziras PI = poŝtkarto ilustrita k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
 koresp. = korespondi PM = poŝtmarko p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

MEMORIGO. — La redakcio memorigas la jenajn anoncintojn, ke oni atendas de ili respondojn: S-ro G. Andreev en Ĉuĉuligovo (Bulg.). — S-ro D. G. Batoev en Batak (Bulg.). — F-ino M. Gudjonsdottir en Reykjavik. — S-ro A. Ilves en Tartu. — S-ro S. Jönsson en Reykjavik. — S-ro I. Krestanov en Sofia. — F-ino E. Medeck en Los Angeles. — S-ro G. H. Pjeturson en Reykjavik.

ANGLUJO

Leigh-on-Sea. — S-ro Frederick Kennedy, 34-jara ŝtatoficisto, 62 Walker Drive. — L kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, p.ĉ.t.
Leigh-on-Sea. (Essex). — Tri studentinoj, aĝoj 21, 24 kaj 29 jaroj, dez. kor. per PI kun gesamideanoj en ĉiuj landoj, p.ĉ.t. Skribu al s-ro F. Kennedy, 62 Walker Drive. Ni certe respondos.
London, E. 17. — Gekursanoj de s-ino Elizabeth Elliott, William Morris Hall, Walthamstow. — Dez. koresp. k.ĉ.l.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Aussig. — F-ino Antonia Mras, tajlorino, Grosse Wallstrasse 40. — L, PK.
Aussig. — F-ino Elisabeth Matzke, oficistino, Herrengasse 13. — L, PK.
Aussig. — S-ro Jos. Trnoblansky, oficisto, Montangesellschaft. — L, PK.
Aussig. — S-ro Alfred Eckelt, profesoro, Handelsakademie. — Por siaj 21 studentoj-kursanoj 16-20-jaraj. Skribu grandare!

FRANCUJO

Dunkerque. — S-ro G. Vanhove, 39-jara kasisto, 6 Place du palais de justice. — L, PI bfl. k.ĉ.l. Certe respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.
Limoges (Haute-Vienne). — S-ro Marcel Alquier, 4 Route de Lyon. — (22-jara). L, PI p.ĉ.t.
Limoges (Haute-Vienne). — S-ro M. Leboucher, desegnisto, 7 rue d'Agnes-seau. — PI bfl. PM, Esp-materialon. Ne pre respondos.

GERMANUJO

Wolfenbüttel (Braunschweig). — S-ro Walter Schattenberg, 26-jara fraŭlo, Krummestrasse 8. — PI bfl., L k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

NEDERLANDO

Enkhuizen. — F-ino A. Slot, 23-jara mastrumistino kaj instruistino de Esp., Kuipersdijk 34. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.
Nijmegen. — S-ro P. Verhoog, 42-jara tramkondukisto, Koolemans Beynenstraat 75. — K.ĉ.l.
Rijswijk (Zuid-Holland). — S-ro D. J. van Gaalen, 20-jara librotenisto, Rembrandtkade 133. — Dez. koresp. kun hispanaj aŭ francaj fraŭlinoj.
Rijswijk (Zuid-Holland). — S-ro W. K. L. Hess, 19-jara studento, Stadhoudersstraat. — Dez. koresp. kun fraŭlino el sudaj aŭ orientaj landoj.
Rotterdam. — S-ro Ernst Cohen, Mathenesserweg 20. — Precipe per PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t.

Florbulboj. Plantoj. Rozoj.

Prezaron je peto senpage sendas:

C. A. Juffermans en Hillegom (Nederl.)

kulturejo de florbulboj kaj plantoj.

Korespondo en la lingvoj: ned., esp., germ., angla.

Sassenheim. — S-ro Adr. Verdegaa, Rijkstraatsweg 54. — (23-jara). PK, PI bfl. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Dez. interŝ. PM.

NORVEGUJO

Grettebygd. — S-ro Bjarne Dalland, 29-jara instruisto. — PI kun landoj en Afriko.

PALESTINO

Jerusalem. — S-ro A. J. Benyaminy, teknika desegnisto, Beth-Yisrael Qtr. — (33-jara, edzo). Dez. koresp. per L pri la temo: Kiel ni povas alproksimigi la idealan homsocion? — Certe respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.

POLUJO

Brody. — S-ro Oskar Spielmann, poŝta kontrolisto, delegito de UEA. — Dez. koresp. kun britoj por ekzeraci Esp-on kaj la anglan lingvon.
Halemba (pow. Katowice). — S-ro Franz Besler, ul. 3go Maja 77. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t., kun fraŭlinoj.
Nowa-Wies (pow. Katowice). — S-ro Alojzo Mušalik, ul. Cmentarna 15. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t., kun fraŭlinoj.
Nowy-Bytom (G. Sl.) — S-ro Józef Szyma, 38-jara tornisto, ul. Niedurnego 8. — K.ĉ.l., interŝ. PM. Respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.

SOVET-UNIO

Kiev. — S-ro A. Kovalenko, studento en instituto de inĝenieroj-mekanikistoj, ul. Borohova 20/17. — Dez. koresp. k.ĉ.l., p.ĉ.t., interŝ. PI, ilustritaj gazetoj, diversajn objektojn.
Moskva 6. — S-ro Nikolao Gluškov, str. Sadovaja-Triumfalnaja d. 4, kv. 3. — Dez. viglan kores. pri div. temoj.

USONO

La Grande (Oregon). — S-ro Franklin Edwards, 23-jara librotenisto, P. O. Box 139. — L kun Rumanujo, Italujo, Norvegujo, p.ĉ.t.

GIS

LA FINO DE ĈI TIU JARO

ni liveras niajn famajn eldonaĵojn AFRANKITE; ni rekomendas speciale:

	fr. sv.
Bastien, Naŭlingva Etimologia Leksikono	5.—
Cart, Vortoj de Profesoro Cart, luksa eldono kun 2 portretoj (140 paĝoj)	3.—
eldono sur madagaskara papero, kun aŭtografo	20.—
— Pri landnomoj	0.40
Fruictier & Grenkamp, Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto { broŝ.	5.—
bind.	6.50
Balzac, La Firmo de la Kato, kiu pilkludas	1.—
Balucki, Kuzeto (tr. Grenkamp)	0.25
Bossuet, Funebra parolado (tr. Bastien)	1.—
En Svislando, kvin rakontoj kun ilustraĵoj	2.—
Frenkel, Verdaj Fajrejoj	1.—
Gogol, Portreto (tr. Fiŝer)	1.50
Gordon, Kara Panjo (tr. Gego)	0.75
Grenkamp, Krijo de l' Koro	0.25
— Penseroj (II-a kajero)	0.40
— 5.000.000, novelaro	2.—
Lermontov, Novaj Versaĵoj (tr. Bela Manto)	1.50
Mickiewicz, Improvizacio de Konrad	0.25
— Sinjoro Tadeo (tr. Grabowski)	6.50
Robinson, Vol. II, novelaro, angle kaj esperante	2.50
Smogorzewski, Pol-Pomeranio (tr. S. Grenkamp) kun 22 kartoj entekste kaj 4 plurkoloraj eksteretekste, la plej interesa studo pri la pola-germanaj rilatoj. 136-paĝa	2.50
Unterman, En danĝero	2.50
Wagner, Estu Homo! (tr. Meyer) (Premiita de l' Esperantista Akademio)	1.25
Wyslouch, El la lando de ruinoj (tr. Grenkamp)	0.25

Fr. sv. 1.— = fr. fr. 5.—

KROME ĉe ĉiu mendo de MINIMUME fr. sv. 6.—, ni aldonos surprizan DONACON en pkartoj, fotoj aŭ maloftaj revuoj.

Ĉiu kvindeka mendonto ricevos SENPAGE librojn en la valoro de fr. sv. 5.— laŭ sia elekto: ĉiu centa mendonto ricevos SENPAGE ekzempleron de VORTOJ DE CART kun aŭtografo de nia amata kaj bedaŭre formortinta prof. Cart.

Ni liveras ĉiujn librojn de aliaj eldonejoj afrankite.

Eldonejo S. Grenkamp, 117, Bd Jourdan, Paris 14.

KION MI AĈETAS JE LA LIBROTAGO?



PRIVAT, Edmond: Historio de la lingvo Esperanto. Vol. I.: *Deveno kaj Komenco 1887-1909*. Dua eldono. Kartonita: RM 1.60; luksa tolbindaĵo: RM 2.25.

Vol. II.: *La Movado: 1900-1927*. Luksa tolbindaĵo: RM 5.40.

PRIVAT, Edmond: *Vivo de Zamenhof*. Kun portreto de L. L. Zamenhof. Kartonita RM 2.25; bindita RM 3.15.

ZAMENHOF, L. L.: *Originala Verkaro: Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de Prof. D-ro Joh. Dietterle, L.K.* Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. Luksa tolbindaĵo RM 10.—.

ESPERANTO-ROMANOJ:

JEAN FORGE: *Abismoj*. Orig. romano. Broŝurita RM 1.75; bindita RM 2.75.

JEAN FORGE: *Saltego trans jarmiloj*. Romano orig. verkita. Bindita RM 2.75.

H. A. LUYKEN: *Pro Iŝtar*. Romano el la antikva Babela historio. Bind. RM 4.—.

H. A. LUYKEN: *Stranga Heredaĵo*. Romano originale verkita. Bindita RM 4.—.

MABEL WAGNALLS: *Palaco de danĝero*. Rakonto pri Madame la Pompadour. Luksa tolbindaĵo RM 4.—.

DELSUDO-LAIHO: *Aŭstralio, lando kaj popolo*. Plej interesa priskribo de la kvina kontinento. 31 tutpaĝaj ilustraĵoj kaj 1 landkarto. Bindita RM 4.20.

INTERNACIA MONDLITERATURO. Kolekto de plej famaj verkoj el ĉiuj naciaj literaturoj. Ĉiu volumo kartonita en arta kovrilo ampeksas 64—80 paĝojn. Prezo po volumo RM .80. *Speciala kaj detala prospekto senpage.*

POSTULU SENPAGAN TRANSENDON DE NIAJ KATALOGOJ: Esperanto-lernolibroj laŭ rekta metodo. Esperanto-vortaroj. Esperanta literaturo. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe via libristo aŭ de ni senpere.

FERDINAND HIRT & SOHN, Esperanto-Fako, LEIPZIG C. 1. (Germanujo), Salomonstrasse 15.
Bankkonto: Deutsche Bank u. Disconto Gesellschaft, Leipzig. Poŝtekkonto: Leipzig N-ro 52372.



ESPERANTISTA KRISTNASKA LIBERTEMPO

en la Esperanto-Domo en Arn-
hem, 24. Dec. 1932 — 1. Jan. 1933

Ĉiu Esperantisto estas tutkore
invitata.

PROGRAMO:

24. Dec. Vespere: *Kunveno ĉirkaŭ la Esperantista Kristnaskarbo*. Kan-
toj. Alparoloj. Malfermo de la Esperantista Krist-
naska Libertempo.
25. Dec. Matene: *Diservoj katolika kaj protestanta kun Esperanto-
lingvaj predikoj.*
Posttagmeze: Komuna promeno.
Vespere je la 8.00 h.: *Parolado de Andreo Cseh pri sia
hejmlando: Transilvanio, la orienta Svislando, ĝia
kultura kaj socia vivo.* — Post la parolado intima
kunesto.
26. Dec. Libertempo kun promenoj. Vespere parolado.
- 27—29. Dec. **TUTLANDAN KONKURSO DE LA NEDERLANDA
ESPERANTISTARO**, laŭ aparta programo.
29. Dec. Vespere je la 8.00 h.: *Esperantista Festo kun la publiki-
go de la rezultoj de la Konkurso kaj solena disdono
de la premioj.*
30. Dec. Posttagmeze je la 2.00 h.: *Publika TIRADO DE LA LOTE-
RIO* de la Esperanto-Domo, sub la gvidado de
notario Ch. J. Engelberts.
31. Dec.—1. Jan. Libertempo kun promenoj kaj ev. kunvenoj kaj paro-
ladoj (poste anoncotaj).

La partoprenantoj povos loĝi en la Esperanto-Domo, kiu kalkulos
la rabatitan pensionan prezon. Aliĝojn oni sendu al la Int. Cseh-
Instituto en Hago, Oostduinlaan 32. — Kotizo ne estas. — Ankaŭ
eksterlandaj gastoj estas kore invitataj.

Por plivigli la Esperantistan vivon kaj instigi la Esperantistojn
al la perfektigado en la lingvo, la *Internacia Cseh-Instituto de Espe-
ranto* en interkonsento kun la Ned. Esp. Soc. „LEEN“, Ned. Katolika
Ligo Esp., Ned. Kristana Unuiĝo Esp., Centra Esp. Peop. Komisiono
en Nijmegen, Ned. Soc. de Blindaj Esp-istoj, Ned. Ekzamena Komitato
kaj Nederl. Teritorio de UEA, aranĝas

en la Esperanto-Domo en Arnhem dum la 27—29. Dec. 1932

TUTLANDAN KONKURSON

DE LA NEDERLANDA ESPERANTISTARO,

en kiu kvazaŭ en **LINGVA OLIMPIADO** la partoprenantoj komparos
sian scion kaj lertecon en Esperanto.

La konkurso enhavos la jenajn partojn: Konkurso en 1) Korekta
skribado laŭ diktado. 2) Traduko el Esperanto en la holandan ling-
von. 3) Traduko de holanda teksto en Esp-on. 4) Skriba reproduktado
de aŭdita rakonto. 5) Skriba rakontado de historio prezentata en
bildo. 6) Kono de la Esp-a vortaro. 7) Kono de la Esp-a gramatiko
(per kompletigo de tekstoj kun mankantaj partoj). 8) Lerteco en la
vortfarado (formado de novaj vortoj per la afiksigo dum limigita tempo).
9) Solvado de enigmoj. 10) Improviza verkado de poemeto. 11) Pu-
blika paroladeto kvin- minuta. 12) Deklamado de poeziaĵo.

En ĉiu aparta konkurso estos kelkaj premioj (libroj, objektoj, diplo-
moj), kiujn ricevos tiuj konkursantoj, kiuj akiris la plej multajn punktojn
en la konkerna aparta konkurso. La ĉefpremiojn ricevos tiuj parto-
prenantoj, kiuj gajnis la plej multajn punktojn en ĉiuj konkursoj kune.

Esperantistoj kaj societoj estas petataj disponigi premiojn, kiuj portos
la nomon de la donacinto. Dankon pro la jam senditaj premioj!

Por certigi al ĉiu partoprenanto, eĉ al la novaj Esperantistoj, la
ŝancon de sukceso, la konkurso okazos en tri grupoj laŭ la matureco
en la lingvo, do ĉiu konkurso okazos aparte por B-diplomuloj, por
A-diplomuloj kaj por sendiplomuloj. Ĉiu grupo havos apartajn premiojn.
Speciala sinpreparo ne estas necesa.

La juĝadon faros speciala Juĝa Komitato de kompetentaj Esperant-
istoj, delegitaj de la supre nomitaj Esp. organizaĵoj.

La publikigo de la rezultoj de la konkursoj kaj la solena disdono
de la premioj okazos la 29. Dec. vesp. dum la Esperantista Festo.
Por la disdono de la premioj estos petata la urbestro de Arnhem.

En la konkursoj partopreni rajtas ĉiu Esperantisto, kiu estas ano de
iu nederlanda Esp-ista organizaĵo. Konkursa kotizo: 2 guld. Oni ne
estas devigata partopreni en ĉiuj 12 partoj de konkursaro, sed oni
povas laŭvole elekti.

Aliĝojn oni sendu al la Int. Cseh-Inst. de Esp., Oostduinlaan 32,
Hago. — Detala programo havebla kontraŭ respond-marko.

REDAKTAS KAJ ELDONAS:

1-a jaro
12-a numero



Decembro
1932

INTERNACIA
CSEH-INSTITUTO
DE ESPERANTO
OOSTDUINLAAN 32
DEN HAAG
(Nederland)
TELEFONO: 116720
POŬTĈEKKONTO
162626

La 15-a de Decembro

estas festa tago en la Esperantista kalendaro. Kial? Ĉar en tiu tago de la jaro 1859 naskiĝis la aŭtoro de la lingvo Esperanto, doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Modesta viro aperis en la mondo sub tiu nomo, sed li enskribis sian nomon en la historion de la homaro.

Granda estas la verko de Zamenhof kaj ĝi meritas ĉiun respekton kaj admiron. Sed pli granda kaj pli estiminda estas la ideo, kiu lin inspiris kaj movis al la ellaboro de la nova lingvo. Ĝi estas la ideo de internacia kompreno, respekto kaj harmonio, la ideo de universala frateco sur la bazo de internacia egaleco kaj justeco. Venos iam la tempo, en kiu la tuta mondo vidos en Zamenhof grandan spiritan gvidanton. Tiam, kiam la nebulo, kiu nun ankoraŭ mallumigas la mensojn de la popoloj, estos for ...

La Esperantistaro kun pia fideleco konservas la memoron de la Majstro kaj jam nun pluraj monumentoj anoncas lian nomon kaj lian meriton. Monumentoj el ŝtono kaj el kupro. Sed la plej grandioza monumento de Zamenhof estas konstruita ne el ŝtono kaj metalo, sed el papero. El Esperantaj libroj. El la dokumentoj kaj fruktoj de lia genia verko, kiuj estas pli fortaj kaj daŭraj, ol marmoro kaj kupro.

Je la propono de nia konata poeto Julio

Baghy, la Esperantistaro decidis dediĉi la naskiĝtagon de Zamenhof al la Esperanta libro. Tio signifas, ke en tiu tago ĉiu Esperantista societo kunvenas por memori pri Zamenhof kaj por pligrandigi lian plej veran monumenton. Oni konigas la Esperantajn librojn kaj ĉiu Esperantisto aĉetas el ili laŭ sia povo. Tiamaniere oni disvastigas la verkon kaj spiriton de Zamenhof kaj oni starigas por li la plej konvenan monumenton, ne sur unu placo de unu urbo, sed sur nekalkuleble multaj lokoj, en miloj kaj miloj da hejmoj samideanaj.



D-ro L. L. Zamenhof
(desegnita H. Piegns)

Tiuj monumentoj, la libroj, ne nur memorigas pri Zamenhof, sed ili ankaŭ instruas, inspiras, disvastigas la Zamenhofan idealon kaj kondukas al la venko de la mondlingvo.

Pro tio la ideo, proklami la 15-an de Decembro kiel „Tago de la Libro“, estis tre bona kaj ni varme rekomendas al ĉiu leganto

de nia gazeto, aĉeti en tiu tago kelkajn librojn aŭ almenaŭ unu solan kaj tiamaniere kontribui al la honoro de Zamenhof kaj al la plifortigo de nia movado.

Aĉetante la libron oni pensu ankaŭ pri niaj talentaj verkistoj kaj kuraĝaj eldonistoj, kiuj multe laboras kaj ofte faras riskon kaj oferon por nia movado. Ili faras gravan propagandan servon, ĉar la belaj kaj bonaj libroj vekas ĉe la publiko respekton al nia movado.

Praktiko

LA GAZETO, KIU INSTRUAS KAJ AMUZAS

Aperas monate. Abonprezo por unu jaro: 1 dolaro (2.50 ned. guld.), por duonjaro la duono. — La abona jaro komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. — Unu numero kostas .25 ned. guld. Specimeno senpage. Reklam-tarifo: 1 paĝo 80.- guld., 1/2 p. 45.-, 1/4 p. 25.-, 1/8 p. 14.-, 1/16 p. 8.-, 1/32 p. 4.50 gld. — Kopirajto de la enhavo rezervita.

LECIONO PRI LA KUIREJO.

1. fajrujo
2. rostejo
3. hakilo
4. (fajro-) prenilo
5. kaserolo
6. tebolilo
7. gladilo
8. bolpoto
9. kovrilo
10. kuiristino
11. kribrilo
12. rostpato, rostkaserolo, fritilo
13. telertuko
14. kuireja tranĉilo
15. balaaĵsovil
16. balailo
17. gaslampo
18. akvotruilo, ĉerpilo
19. viŝtuko
20. akvotubo
21. akvokrano
22. kuireja lavotablo
23. cindrositelo



24. akvotinet
25. ovingo, ovotet
26. ovo
27. ŝaŭmkulero
28. funelo
29. haktranĉilo
30. pastrulilo
31. hakbreto
32. pistujo
33. pistilo
34. plado
35. telerstablo
36. malprofunda (plata) teler
37. profunda teler, sup-teler
38. kruĉo
39. korbo
40. tenilo
41. raspilo
42. pudingformilo
43. kuirejŝranko
44. hakbloko
45. korbo por tolaĵoj
46. gladbreto

Kiu estas en la kuirejo? — La ¹⁰ staras antaŭ la ¹ kaj preparas la supon en la ⁸.

De kie la kuiristino prenas la akvon? — Super la ²² vi vidas la ²⁰. La kuiristino tie malfermas la ²¹ kaj fluigas la akvon en la ⁶, kiu staras sur la ¹.

Kion la kuiristino pretigis por la matenmanĝo? — Ŝi boligis ²⁶, kiun ŝi en la ²⁵ metis sur la ⁴³. Ŝi alportos ĝin en la ĉambron.

Kion ŝi kuiras por la tagmanĝo? — Ŝi enŝovos la rostpaton en la ² kaj rostos leporon. Dum ŝi preparas la manĝaĵon, ŝi uzas la okazon de forta fajro, por varmigi la ⁷.

Al kio servas la gladilo? — Ĝi servas por gladi la tolaĵojn, kiu estas en la ⁴⁵ apud la ⁴⁶.

Kion la kuiristino faras post la tagmanĝo? — Ŝi lavas la vazaron kaj sekigas ĝin per la ¹³. Ĝi pendas super la ¹. Poste ŝi revenas en la kuirejon kun la ¹⁶, metas sur la ¹⁵ la balaaĵojn kaj formetas ĝin en la ²³.

Kiuj kuirejaĵoj iloj pendas sur la muro super la kuirejtablo? — Proksime de la fenestro ²⁷ estas pendigita; oni uzas ĝin, por preni la ŝaŭmon de la supo. Apud ĝi estas ²⁸, super tiu la ²⁹. Oni bezonas la ³⁰ por prepari la paston, el kiu oni faras vermicelojn. La ³² kun la ³³ servas al la pistado de spicaĵoj.

Kiam la kuiristino bezonas korbon? — Ŝi prenas la ³⁹, irante en la urbon, por aĉeti legomojn ktp.

El kia materio la pudingformilo estas farita? — La ⁴² estas farita el lado. La angloj tre ŝatas pudingojn.

INTERPAROLO

Mastrino: La fajro ne brulas bone. Anna, enmetu pluajn karbonojn kaj iru en la kelon por preni ankoraŭ karbon!

Servistino: Tuj, sinjorino! — Ĉu vi ordonas aĉeti farunon? Ni havas ankoraŭ nur kelkajn gramojn.

Servistino: Tuj, sinjorino! — Ĉu vi ordonas aĉeti farunon? Ni havas ankoraŭ legomojn!

Servistino: Nun mi devas prepari la rostaĵojn.

Mastrino: Mi sentas malagrablan odoron. Forprenu rapide la lakton de sur la fajrujo! Ĝi superbolas.

Ĉi tiu leciono estas prenita el la bonega praktika lernolibro: THORA GOLDSCHMIDT: BILDOTABULOJ, eldonita de la firma Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. La libro sur 104 paĝoj pritraktas ĉiujn temojn de la praktika vivo en similaj bildoj.

La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo de LA PRAKTIKO kaj ĝia prezo estas:

kartonita nur 1.90 ned. guld.

bindita „ 2.20 „ „

Al niaj abonantoj afrankita sendol

Faru la kontrolon!

La solvo de la 11-a tasko:

Per forta. Kun malgaja. Per malsekaj. Kun sia. Kun serena. — Tiris per siaj. Kun timo. Kun nebuloj. — Kun kiu. Kun sia familio. Per sia patrino. Kun bonaj. Per drinkado. Kun siaj amikoj. Per almozpetado. Kun samsortaj. — Per sia lasta. Kun du novaj. — Per profunda. Kun ĉiu komforto. Per mono. Per malbonfaroj. Per ĉiuj fortoj. — Per la manoj. Kun elegantaj. Kun firmaj paŝoj. Per duonlaŭta. Kun si mem. Kun plena. Kun kolbaso. Kun ruĝa. Kun kremo. Kun minerala. Kun la kalkulo. Per mallaŭta. Per telefono. Kun li per aŭtomobilo. — Per sia. Kun kiu. Per siaj harditaj. Per forta. Kun sia frako kaj kun sia. — Kun maldolĉaj. Per la mono. Per kiom. Kun gumbastono. — Per siaj tremantaj. Kun horloĝoj. Kun la ekvido. Kun iom da. Per ambaŭ. Kun furioza. Kun forta krako. Per aŭtomobilo. Kun hundoj. Kun pumpiloj. Kun trankvila. Kun esperplena. Per krajono. — Per la ŝtono. — Per nematura. Kun severa. — Per forta voĉo. — Kun du horloĝoj. — Kun la policistoj. Kun siaj. Per kio. Per siaj malfortaj. Per la plej. — Kun aktoroj. Kun granda trankvileco. Per tiu. Kun mia edzino. Kun ĉi tiu. — Kun granda bruoj. Kun malespero. Kun kortuŝigo. Per honesta laboro. Kun larmantaj. Per honesta. Kun firma volo. Per fera. Per tondra. — Kun mi. Per malliberejo.

12-a tasko.

Malnova proverbo diras, ke „la ripetado estas la patrino de la sciado”. Tial ni prezentas al vi ĉi tie novan taskon, kiu entenas la materialon de ĉiuj 11 taskoj, kiuj dum ĉi tiu jaro aperis sur ĉi tiu paĝo. Bonvolu dum la jarfina libertempo kompletigi la tekston kaj kontroli vian solvon per nia solvo, kiu aperos en la Januara numero. Agrablan laboron!

BELA NOKTO

(Vera historio)

Petro kaj Paŭlo estis oficistoj en la regna imposta oficejo. Ili estis ted...taj d... la malbela metio kaj p... ti... ili decidis fari pli longan ekskurson p... refreŝigi...in kaj... forgesi la korsiĝan ĝemadon,.... ki... la kompatindaj malsat...ntaj civitanigo pagadas...iajn impostojn. Kiel celon d...ia ekskurso ili elektis la belan montaran regionon en la orienta parto d... la lando.

..... ĝojo adiaŭ...nte al...iaj familianoj, ki...j ŝarĝis...in..... amaso d... bongustaj kukoj,.... dorsosakoj plenig...taj..... bongustaj iloj gaje iris al la stacidomo.

La vetero estis belega. La radi...nta suno kovris la preterflug...ntan pejzaĝon.... ora koloro. La maturig...nta greno, mov...ta..... dolĉa venteto, similis al ond...nta maro. La beleco d... la panoramo kompletigis..... flug...ntaj birdoj, graciaj cikonioj ĉas...ntaj ranojn, kaj leporoj rapide kur...ntaj al...iaj kaŝejoj. Tr... la kamparo leviĝis la altmontaro..... nubkovr...taj pintoj.

La vojaĝo tr... la vasta ebenaĵo daŭris longe. Vespere Petro

kaj Paŭlo alvenis al malgranda stacio, ĉe ki... komenciĝas la fervojlinio konduk...nta tr... la plej belaj valoj tr... la montaron. Tie ili eksciis ti...n, ke la vagonaro forveturos nur matene. Do ili devas pasiĝi la nokton en ti... stacio.

Petro kaj Paŭlo enkasigadis en...ia malben...ta oficejo multe d... mono, sed ne por...i mem. Ili mem estis malriĉaj kaj p... ti... kaŭzo ili preferis ŝpari la hotelmonon, pens...nte ankaŭ p... ti... ke ili bezonas la monon p... estingi...ian soifon sur la montoj..... iom d... vino. La nokto estis belega, varma. La ĉielo estis plena..... bril...ntaj steloj kaj d... tempo al tempo meteoroj tr...kuris la firmamenton. La du amikoj decidis dormi sub la glora libera ĉielo, tiel ofte prikant...ta..... sentoriĉaj malsat...ntaj poetoj.

Post kelka serĉado ili trovis unu benkon antaŭ la stacidomo, sed ĝi ne estis sufiĉe longa, p... ke ili ambaŭ povu kuŝi sur ĝi. Sed la sagaca Petro faris al...ia amiko praktikan proponon:

— Estim...ta kaj ŝat...ta kolego, ni ambaŭ sidu sur la benko kaj apogu...iajn dorsojn unu al la alia. Tiamaniere ni povos komforte etendi almenaŭ...iajn kruojn.

Paŭlo..... forta manpremo esprimis...ian gratulon p... la bonega ideo. Post iom d... klopodo la du amikoj trovis la plej oportunan pozicion kaj dolĉe endormiĝis.

Sed Petro post kelka tempo vekigis. La dormo estis bona, sed p... la nekutima sid-kuŝado komencis dolori...ia talio. Li volis promeni. Sed kiel? Li ne povas foriri, ĉar tiam Paŭlo perdas...ian apogon, falas kaj vekigis. Do li atendadis kaj pripensadis. Fine li ekvidis tr... la mallumo pakportiston, ki... en la proksimeco sidis kaj ekbruligis...ian pipon. Bonan ideon ekhavis Petro. Li venigis al...i mallaŭte la portiston kaj diris:

— Amiko, vi ricevos bonan trinkmonon, se vi anstataŭos min sid...nte sur ĉi ti... benko, p... ke ĉi ti... dorm...nta viro ne falu. Atentu, silente kaj lerte tr...prenu mian lokon, p... ke li ne vekigu.

La pakportisto lerte enŝovis...in en la lokon d... Petro, ki... felica sento etendis...iajn membrojn kaj komencis promeni en la bela nokto sur la rosa kampo apud la stacidomo.

Li volis ekfumi, sed li ne trovis...iajn alumetojn. La elpren...tan cigaredon..... malĝojo li remetis en...ian poŝon, kiam li rimarkis en la proksimeco brilet...ntan lumon d... brul...nta cigaredo. Petro ekĝojis. Jen, homo! Alia nokta promenanto! Li rapide aproksimiĝis kaj petis fajron.

La alparol...ta viro ekbruligis alumeton kaj ĉe ties vibr...nta lumo Petro ekvidis..... granda miro, ke la alia viro estas neni... alia, ol — Paŭlo.

— Sed amiko, ĉu vi ne dormas? Mi ja lasis vin sur la benko kaj anstataŭigis min..... la pakportisto.

— Jes, sed ankaŭ mi anstataŭigis min..... portisto jam antaŭ unu tuta horo, ĉar mi tute ne povis dormi en ti... malsprita pozicio.

Post kvin minutoj d... komuna ridado ili decidis promeni kaj interparoli ĝis la mateno. Tiam ili reiris al la stacidomo, antaŭ ki... sur la benko dolĉe dormis kaj potence ronkis la du dung...taj pakportistoj, apog...ntaj unu la alian.

La du portistoj vekigis nur... la ridego d... la frumatene alven...nta staciestro. Post kiam ili ricevis la postul...tan trinkmonon, kies sumo superis la prezon d... du hotelĉambroj, la ŝparemaj herooj d... nia vera historio konsciigis p... la valoro d... la ŝparado.

Someraj kursoj de Andreo Cseh en la Esperanto-Domo en Arnhem dum 1933:

29. Majo—10. Junio: Internacia kurso por poŝtistoj.
21—28. Julio: Internacia perfektiga kurso.
7—20. Aŭgusto: Internacia Pedagogia kurso kaj Seminario por Cseh-metodaj instruistoj.

Ĝojplenajn festojn kaj feliĉan novan jaron

deziras al la ŝatata legantaro:

LA PRAKTIKO.

AL LA VENKO!

AL NIAJ LEGANTOJ!

Sur ĉi tiu paĝo ni regule publikigas informojn pri la gravaj progresoj de Esperanto kaj de tempo al tempo ni faros alfabetan registron pri ili, por helpi al niaj propagandistoj.

Ni petas niajn legantojn, ke ili traduku la informojn kaj klopodu publikigi ilin en siaj lokaj nacilingvaj ĵurnaloj. Per tio ili faras tre valoran propagandon. Ni gratulas al tiuj abonantoj de La Praktiko, kiuj jam publikigis la informojn el la antaŭaj numeroj kaj ni dankas pro la senditaj gazetekzempleroj entenantaj la represitajn informojn. Al la venko!

La redakcio.

20. Ŝtata subvencio al la Brazilo Ligo Esperantista. — D-ro Getulio Vargas, prezidanto de la brazila registaro, per dekreto N-ro 21, 639 de la 18-a de Julio donis al la Brazilo Ligo Esperantista subvencio de 1000 milrejoj por la jaro 1932.

21. Grava scienca verko por Esperanto. — Dum ĉi tiu jaro aperis en Germanujo grava scienca verko de D-ro inĝ. Eugen Wüster, sub titolo „Internationale Sprachnormung in der Technik“. La libro, kies konkludo rekomendas Esperanton kiel plej taŭgan internacian teknikan lingvon, aperis kun la subteno de la Prusa Akademio de l' Teknikaj Artoj kaj Sciencoj. La materialo por la verko estis kolektata en 18 lingvaj teritorioj kaj grandparte disponigita de la Germana Normiga Komitato (Deutscher Normenausschuss).

22. Tutmonda statistiko Esperantista. — En la jaro 1927 prof. J. Dietterle en Leipzig, komisiita de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, efektivigis tutmondan nombradon de la Esperantistaro. La resumo de la rezultato estas la jena: En la jaro 1927 en 119 landoj, en 7209 lokoj de la mondo ekzistis entute 126.508 Esperantistoj, pri kiuj la statistiko donis fidindan scion. El ili 41.751 estis organizitaj en 1776 grupoj (inter ili 632 fakaj grupoj), el kiuj 693 posedis Esperanto-bibliotekon. En la grupoj dum la jaro 1926 oni okazigis 2531 kursojn kaj laŭ la raportoj entute oni okazigis 12.014 kursojn. Krom tio ekzistis 16.987 izole vivantaj Esperantistoj en lokoj, kie ne ekzistis grupo, kaj estis 67.837 ekstergrupaj Esperantistoj en lokoj, kie ekzistis grupoj.

La fakta situacio estis multe pli granda, ĉar pro la manko de la necesaj rimedoj oni ne povis atingi la tutan Esperantistaron. Oni taksas tiel, ke la nombro de ĉiuj vivantaj Esperantistoj sur la terĝlobo nun, en la jaro 1932, estas ĉirkaŭ unu miliono. Tio estas facile kredebla, se ni konsideras, ke laŭ la raportoj de la

Ligo de Nacioj, ĝis la jaro 1922 oni disvendis ĉirkaŭ 4 milionojn da Esperanto-lernolibroj. (La detala rezultato aperis en la gazeto „Esperanto“, numero de Julio 1928, paĝoj 2-24.)

23. Ŝtata subvencio al la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. — La ministerio de komerco kaj industrio de la ĉeĥoslovaka respubliko decidis doni al la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista por la jaro 1932 subvencio de 5000 ĉeĥaj kronoj por la celo de turisma propagando per Esperanto en fremdaj landoj.

24. Esperantistaj instruistoj. — Laŭ la statistika materialo kolektita de la Esperanto-Instituto por la Germana Regno, en la mondo estas 7021 Esperanto-sciantaj ĝeinstruistoj en 62 landoj. La Esperantistaj ĝeinstruistoj posedas internacian gazeton sub titolo „Internacia Pedagogia Revuo“, eldonata de la Tutmonda Asocio de Ĝeinstruistoj Esperantistaj (TAGE).

25. Estona Kantista Ligo uzas Esperanton. — La granda kantfestojn, en somero de 1933 havos sian 10-an jubilean kantfeston en Tallinn, ĉefurbo de Estonio. La estraro de la Ligo ĵus decidis vaste uzi Esperanton en la internacia propagando por siaj grandskalaj jubileaj festoj. La Ligo faris interkonsenton pri kunlaboro kun la Esperantistaj organizaĵoj kaj decidis eldoni ĉiujn siajn presaĵojn ankaŭ en Esperanto.

Gebruiksaanwijzing voor dubbelbelles automaat 1. Een onbekende nummer te de goud geven. 2. De telefoon van de hand nemen en wachten tot de beltoon. 3. Het gewenste nummer geven. 4. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde. 5. Het gewenste nummer geven. 6. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde. 7. Het gewenste nummer geven. 8. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde. 9. Het gewenste nummer geven. 10. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde.	Mode d'emploi de l'appareil téléphonique à double sonnerie 1. Donner un numéro inconnu (1 à 9) dans la sonnerie. 2. Prendre le téléphone de la main et attendre la sonnerie. 3. Donner le numéro désiré. 4. Attendre le numéro désiré. 5. Donner le numéro désiré. 6. Attendre le numéro désiré. 7. Donner le numéro désiré. 8. Attendre le numéro désiré. 9. Donner le numéro désiré. 10. Attendre le numéro désiré.	Gebruiksaanwijzing voor dubbelbelles automaat 1. Een onbekende nummer te de goud geven. 2. De telefoon van de hand nemen en wachten tot de beltoon. 3. Het gewenste nummer geven. 4. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde. 5. Het gewenste nummer geven. 6. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde. 7. Het gewenste nummer geven. 8. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde. 9. Het gewenste nummer geven. 10. Wachten tot de gewenste nummer antwoorde.
Directions for use of automatic telephone with coin box 1. Put a coin (about 10 cents) into the slot. 2. Take the receiver from the hook, and for a moment bear the sound. 3. Dial the figure of the number desired. 4. When the desired number answers the call, pass the receiver, release it and start the conversation. 5. When the desired number is engaged or does not answer, put the receiver back on the hook without touching the button and pass the coin back into the slot. 6. When the coin has been returned, pass the receiver back to the hook.	Instrucciones para la manijación de automata telefonos con monedas 1. Meter una moneda (de 10 centavos) en la ranura. 2. Quitar el auricular del gancho y esperar un momento la señal. 3. Marcar la cifra del número deseado. 4. Cuando el número deseado contesta, pasar el auricular, soltarlo y comenzar la conversación. 5. Cuando el número deseado no contesta o está ocupado, poner el auricular de nuevo en el gancho sin tocar el botón y devolver la moneda a la ranura. 6. Cuando la moneda ha sido devuelta, pasar el auricular de nuevo al gancho.	

Emajla tabulo kun Esperanto-lingvaj instrukcioj ĉe la publikaj telefon-stacioj en Hago.

26. La telefono en Hago aplikas Esperanton. — La urba telefon-direkcio en Hago (Nederlando) en la jaro 1931 fiksas grandajn emajlajn tabulojn ĉe la publikaj aŭtomataj telefon-stacioj. Sur la tabuloj estas legeblaj la instrukcioj pri la manipulado de la aŭtomataj telefon-aparatoj, en la jenaj kvin lingvoj: nederlanda, franca, germana, angla kaj esperanta. (Bildon de tia tabulo ni publikigas ĉi tie.)

27. La radio-stacio en Karlskrona (Svedujo) dissendas en ĉiu dimanĉo Esperanto-programon. Okazas Esperanto-lingvaj paroladoj kun sveda traduko kaj svedlingvaj paroladoj pri Esperanto. La unuan paroladon faris S. Fritiof Ahnfeldt pri la internacia helplingvo.

28. Infanoj lernas Esperanton. — En Dordrecht (Nederlando) la Esperantista Societo „Tra la mondo“ organizas specialajn kursojn de Esperanto por la lerneja ĝeunularo, kun la subteno de la urbestro. Al la kursoj, kiuj okazas en lernejoj disponigitaj de la urbo, aliĝis 318 ĝelernantoj.



Ciuj Esperantistoj devas posedi kaj legi la gravan libron:

Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado

verkita de J. R. G. Isbrücker, membro de la Esperantista Akademio.

Necesa por preparo al ekzamenoj!

Nova eldono, kompletigita per la faktoj ĝis post la Pariza kongreso.
Prezo: 0.75 ned. guld.

Aĉetebla ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

KRISTNASKO.

Teksto de Cath. Roskes-Dirksen.
Hago, Nederlando.

Muziko de Dina Appeldoorn.
Hago, Nederlando.

Moderate

KANTO *p*

Nok-te la paŝ-tis-toj Es-tis en kam-par;
Go-jon mi al-por-tas, Car en fru-a hor',
Laŭ-dis la an-ge-loj Pro la Di-fa-vor'

FORTE *mf*

PIANO *p*

mf *p*

Lu-dis sur la flu-to, la flu-to, Gar-dis ĉe ŝa-far' Jen ti-mi-ga lu-mo
Ve-nis sur la te-ron, la te-ron Kris-to, la Sin-jor' In-fa-ne-ton dol-ĉan
An-kaŭ la paŝ-tis-toj, paŝ-tis-toj Kan-tis en la hor': Pa-co sur la te-ro,

f *p* 1-a kaj 2-a strofoj

Ve-nis el ĉi-el' I-lin kvi-e-ti-gis Vo-ĉo de an-ĝel':
Kun la Di-pa-trin' Tro-vos vi en sta-lo, Gas-ti-gan-ta Lin.
Pa-co, har-mo-ni'. En su-pe-ra' al-to

1-a kaj 2-a strofoj *p*

3-a strofo

Glo-ro, glor' al Di'.

POSTLUDO

3-a strofo *f* *mf* *mf*

MOMENTON!

malgrandaj bildoj pri grandaj homoj

ALPHONSE KARR (1808—1890)

franca verkisto, kiu profunde konis la virinan animon, diris foje:

— Mi decidis, ke mi ĉiam tuj cedos al la virinoj; ĉar ĉiam tiel devas finiĝi la afero. Tiamaniere mi ŝparas la militkostojn.

★

ANTONO GALGOTZY (1837—1929)

estis aŭstria generalo, eminenta militisto, sed tre kruda viro. Oni tute ne povis lin uzi al plenumado de delikataj taskoj. Unu el liaj kolegoj jam maturiĝis por iri en pension kaj tiam oni donis al Galgotzy la komision, ke li komuniku tion al la pensiota generalo kun delikata takto.

Galgotzy plenumis la komision en la jena maniero:

— Unu el ni iras en pension. Ne mi estas tiu. Adiaŭ!

★

GIUSEPPE SARTO (1835—1914)

episkopo de Mantovo, kiu poste estis papo sub la nomo Pio X-a, iris foje al Romo, por fari raporton antaŭ la papo Leono XIII-a. Dum la interparolo la papo faris al la episkopo la demandon, ĉu la mantovanoj estas bonaj kristanoj?

Episkopo Sarto, aludante pri la kompatemaj kaj malavaraj bonfarantoj, ridetante diris:

— Sankta Patro, en Mantovo la plej bonaj kristanoj estas la — judoj.

★

KARLO V-a (1500—1558),



germana-roma imperiestro, en iu tago demandis al Michelangelo, kiel li opinias pri la germana pentristo Albert Dürer.

— Se mi ne estus Michelangelo, mi preferus esti Dürer, ol imperiestro Karlo, — estis la respondo.

MARIANO ALVAREZ DE CASTRO (1770—1809)

estis hispana generalo. En la jaro 1809 dum la hispana sendependeca milito, ĉe la sieĝo de Gerona li donis al unu kapitano la ordonon, ke li nepre tenu kun siaj soldatoj la pozicion.

— Kaj se la francoj elpelas nin el ĉi tiu pozicio, kien ni devos retiri nin? — demandis la kapitano.

— En la tombejon, — respondis la generalo.

★

IMMANUEL KANT (1724—1804)



estis unu el la plej grandaj filozofoj de la mondo. Li vivis en la germana urbo Königsberg. Oni ĝenerale opinias pri li, ke li estis seka scienculo, kiu ne zorgis pri sia eksteraĵo kaj ne havis senton pri beleco. Nu, tio estas granda eraro, ĉar Kant vestis sin ĉiam elegante

kaj tre bonguste, eĉ fidele sekvante la modon.

— Oni estu freneza prefere en la modo, ol ekster la modo, — estis la diro de Kant. Sendube stranga frazo el la buŝo de filozofo.

En lia hejmurbo tiel konata estis lia ĉiama eleganteco, ke la publiko nomis lin ĉiam nur „la bela magistro“.

★

SOLON (640—558 a. Kr.),

la greka saĝulo, estas mondfama pro tio, ke li ellaboris la leĝojn por Ateno. Foje iu demandis al li: kiel oni povas atingi tion, ke la amikeco estu eterna?

Solon respondis:

— Al viaj konatoj sekrete diru iliajn mankojn, sed publike laŭdu ilin.

LORDO P. SANFORD METHUEN,

angla generalo, partoprenis en la angla-bura milito. Lia plej arda deziro estis kapti la buran generalon Dewet. Sed la milito finiĝis sen la plenumiĝo de lia deziro. La brava bura militestro ne falis en kaptitecon.

Kelkajn jarojn poste lordo Methuen ricevis de la brita registaro la taskon, fari interkonsenton inter la venkintoj kaj venkitoj. La angla generalo, kiel plenrajta ministro, inter solenaj ceremonioj renkontiĝis kun sia antaŭa malamiko.

La aranĝantoj de la renkonto havis grandan maltrankvilecon pri la kunveno de la du grandaj malamikoj, sed ili baldaŭ trankviliĝis. Dewet ridetante proksimiĝis kaj plej afable etendis sian manon al lordo Methuen. Ĉi tiu kun varma amikeco premis lian manon, dum kelka tempo tenis ĝin en siaj manoj kaj diris:

— Fine vi estas en miaj manoj, kara generalo.

★

JOSEPH LA FAYETTE (1757—1834)

estis franca generalo kaj politikisto. En iu tago aperis antaŭ li unu petanto, transdonis petskribon kaj por ke la peto havu pli certan sukceson, li aldonis, ke li estas nobelo.

— Sinjoro, tio ne estas malhelpo, — respondis La Fayette.

★

GEORGES CLEMENCEAU

(1841—1929),



la fama franca politikisto, estis jam 83-jara, kiam en iu tago vizitis lin d-ro Voronoff, la eltrovinto de la reuniga procedo kaj proponis al li siajn servojn.

— Ni atendu, ĝis kiam mi estos maljuna, — respondis la franca ĉefministro.

NOVAJ LIBROJ

A. Dumas: Tri rakontoj. Trad. E. Deligny, Saint-Omer. 40 paĝoj. — Tri interesaj rakontoj el la „Impresoj de vojaĝoj“, lerte tradukitaj el la franca lingvo kaj prezentantaj agrablajn legajon por liberaĵ horoj.

Isbrücker: Historio kaj organizo de la Esperantomovado. Dua eldono. 52 paĝoj. Eld. Int. Cseh-Inst. de Esp., Hago. Prezo — 75 guld. — Ĉi tiu libro de Akademiano Isbrücker estas necesa lernolibro por ĉiuj, kiuj preparas sin al ekzameno. En apartaj ĉapitroj ĝi donas ĉiun necesan informon pri nia

movado, ĝis la lastaj okazintaĵoj (post la pariza kongreso). Ke la libro estas ŝatata, montras la fakto, ke en ĉi tiu jaro aperis jam la dua eldono.

Gvidlibro de Tartu. Eld. Akademia Koop. en Tartu, Estonio. 28 paĝoj. Kun pluraj bildoj kaj kun kolora plano de la urbo. — Ĉi tiu lerte aranĝita gvidlibro aperis okaze de la 300-jara jubileo de la universitato en Tartu.

K. Smogorzewski: Pol-Pomeranio. El franca lingvo trad. S. Grenkamp. Eld. „Esp. Voĉo“, Jaslo. 125 p., 22 kartoj entekste, 4 plurlukolaj kartoj ekstertekste. Prezo 1.25 ned. guld. — Ĉi tiu libro defendas la polan vidpunkton pri la „pola koridoro“ tra Germanujo. Ne okupante nin pri politikaj demandoj ni konstatas nur, ke la libro rekomendas sin per bonega lingvo kaj eleganta

eksteraĵo kaj ke ĝi estas valora kaj interesa dokumento pri la uzado de nia lingvo en la politika propagando.

P. Firu kaj M. Beraru: Vortaro Esp-Rumana kaj Rum.-Esp. Dep. Esp.-Institutu-Rumana en Cluj. 160 p. Prezo 2.— sv. fr. — Fine aperis la multe atendita vortaro por rumanoj. Kun gramatika enkonduko kaj plaĉa aranĝo ĝi promesas esti utila kaj ŝatata helpilo.

P. Heilker: Oefeningenboek. Eld. N.V. Joh. Ykema, Hago. Prezo 1.25 guld. — Ĉi tiu libro estas kompletigo al la bonega lernolibro de Heilker por progresantoj kaj por B-diplomo. Sur 126 paĝoj ĝi donas la tradukojn de la taskoj de la lernolibro mem kaj multajn aliajn traduk-taskojn kun la solvoj, por nederlandaj lernantoj de Esp.

la mondo ridas



En religia leciono.

Pastro: Helenjo, diru al mi, kiuj estis la tri saĝuloj orientaj.

Helenjo: Gasparo, Melhoro kaj Baltazaro.

Pastro: Tre bone... Kaj el ili kiu estis la negro?

Helenjo: La nigra.

(Képes Krónika)

★

Amikina lango.

Si: Multaj viroj malĝojos post mia edziniĝo.

Amikino: Kiel? Vi ja povos esti edzino nur de unu!

(Haagsche Post)

★

En la parko.

Sur benko sidas sinjoro kaj knabineto.

— Kial vi ploras, etulino?


— Mi volas ricevi miajn buterpanojn!

— Sed kie estas viaj buterpanoj?

— Vi sidas sur ilil

(Jaunakas Zinas)

★



La servemulo.

— Ĉu mi povas helpi surmeti la surtuton, sinjoro?

— Tre afable... Sed mi ja ĝuste volis demeti la surtuton.

(Passing Show)

Stulta hundo.

Kuracisto: Ĉu vi ne scias, ke mia konsult-horo daŭras nur ĝis la kvara?


Paciento: Jes, sinjoro doktoro, sed la hundo, kiu min mordis, ne sciis tion; ĝi mordis min je la kvara kaj duono.

★

Plenumis la juron.

Si: Kiam vi antaŭ kvar jaroj petis mian manon, vi juris, ke vi eterne amos min.

Li: Nu, kion vi volas plu? Tiuj kvar jaroj estis al mi vere eterneco.



Antaŭstudoj.

— Kial vi instruas al la papago tiom da malĝentilaj esprimoj?

— Morgaŭ alvenos mia bopatrino...

(Pesti Hirlep)

★

Teruraj leterportistoj.

— Infanoj, kion vi faras tie?

— Ni ludas leterportistojn.

Ni portas al ĉiu domo unu leteron. En ĉi tiu strato ni jam jetis en ĉiun keston unu leteron.

— Sed de kie vi havas tiom multe da leteroj?

— Ni trovis ilin en la ŝranko de la patrino, ili estis ligitaj per rozkolora rubando.

Sen pripenso.

Patrino: Mi ne permesas, ke vi dancu hodiaŭ vespere pli longe, ol ĝis la deka. Kiam mi estis en via aĝo, mi devis enlitiĝi ĉiuvespere je la oka horo.

Filino: Ho, patrino, se tio estas vera, vi havis terure komikan patrinon!

Patrino (kolerete): Nu, estu certa, ke mi ĉiukaze havis pli bonan patrinon, ol vi.

En la balo.

— Sinjorino, ĉu vi ŝatas la tangon?

— Jes.

— Kaj la fokstroton?

— Same.

— Tiam ni iru en la bufedon.

(Wróble na dachu)

★

Trafa respondo.

Novriĉulo iam diris en ĉeesto de pastro: „Se mi havus stultan filon, mi edukus lin por pastro.”

La pastro respondis: „Via patro evidente ne pensis same.”

(De Lach)

★

Malbona rimedo.

— Aŭdu nur! Mia najbaro per ŝtono rompis mian fenestron, kiam mi pianludis.

— Kia stultulo! Nun li pli bone aŭdas.

(Herold)

★



Praktiko.

— Estimata artistino, vi havas admirandan lertecon ludi en komedioj.

— Kial ne, kara majstro. Mi ja estis jam trifoje edzino.

(Journal Amusant)

Ĉiu Nederlandano devas esti ano de la
NEDERLANDA SOCIETO ESPERANTISTA

„La Estonto Estas Nia”

Sekretariejo: Adm. de Ruyterweg 201,
Amsterdam-West.

ATENTU!!

Kun ĉi tiu numero finigas la abono por multaj abonantoj de La Praktiko. Pri tio ni atentigas ilin per ruĝa stampo sur la banderolo.

La Januaron numeron ni sendos nur al tiuj, kiuj renovigis la abonon por la venonta jaro. Tial oni bonvolu kiel eble plej baldaŭ ensendi la abonmonon.

Informoj pri la malsendo estas troveblaj sur la 14-a paĝo.

LA ELDONEJO.



Ni publikigas ĉi tiun bildon, faritan dum la Pariza kongreso, ĉar ĝi prezentas kelkajn konatajn Esperantistojn, antaŭ la kongresejo. La starantaj (de maldekstre): s-ro G. Širkis, helpanto de la kongresa komitato kaj s-ro Jean Forge, aŭtoro de originalaj romanoj. La sidantaj (de maldekstre) s-ro N. H. Slinger, nederlanda ĵurnalisto, kiu akompanis s-ron Scherer en la mondvojaĝo, s-ro S. Grenkamp, verkisto kaj eldonisto, s-ro Raymond Schwartz, la fondinto de la Esperanta kabaredo „La Verda Kato” kaj aŭtoro de famaj humoraj verkoj, s-ro inĝeniero R. Orengo el Italujo, s-ino Helmi Dresen, ĉefdeleg. de UEA el Estonio kaj f-ino H. Bertig el Krakovo, anino de la Krakova kongresa komitato. Jen, anoj de sep nacioj per Esperanto estas en amikeco kaj kunlaboro.



S-ino Cath. Roskes-Dirksen, malnova nederlanda pioniro de Esperanto, aŭtoro de multaj poemoj kaj kento-tekstoj, verkintino de la Kristnaska Kanĉo en ĉi tiu numero de La Praktiko. Ŝi estis plurfoje premiata en la Katalunaj Floraj Ludoj.







Angulo de la Esperanto-stando en la tutlanda latva ekspozicio en Riga, dum la aŭtuno de 1932. La lerte aranĝita stando ricevis rekonan ateston. Sur la bildo estas videblaj: s-ro T. Indra ĉefdeleg. de UEA por Latvio kaj f-ino L. Jevsejeva studentino, deĵorantino ĉe la stando dum la ekspozicio.

Dekstra bildo: S-ino Marcelle Tiard en Parizo, fervora propagandistino de Esperanto en Francujo, mortis dum la somero de 1932.



Malsupra bildo: La partoprenintoj de la dua Esperanto-kurso de la „Kisiwada Esperanto-Societo” en Tokio, Japanujo. Inter la personoj: D-ro T. Jonedo prezidanto de la societo (signita per kruco), s-ro S. Minami kursgvidanto (signita per rondeto) kaj s-ro Nisida Ryōya, abonanto de La Praktiko kaj sendinto de la bildo (staranta en la mezo, en nigra uniformo). En Japanujo Esperanto floras.





LA MONDO ESTAS INTERESA



Dolĉa mortero.

Oni pensas senvole al la fabela domo kun ĉokoladaj muroj, kiam oni aŭdas la novaĵon el Ameriko, ke dolĉa mortero estas eltrovita. En la eksperimenta laborejo de la amerika Mellon-Instituto oni faris la interesan konstataĵon, ke la solideco de la ordinara kalka mortero pligrandiĝas per 60 %, se oni almiksas kanan sukron. La hazardo kondukis al ĉi tiu eltrovo, kiam oni faris diversajn kemiajn eksperimentojn por trovi ian novan eblecon al la utiligo de la sukero, ĉar en Ameriko estas nuntempe grandegaj kvantoj superflujaj. Laŭ la faritaj spertoj la plej favora proporcio de la miksaĵo estas: al 50 kilogramoj da kalko aldoni 3 kilogramojn da sukero.

La radiumo — kaŭzo de vulkanaj erupcioj.

Profesoro Benjamin Holzmann, geologo de la scienca instituto en Pasadena (Kalifornio), venis al la konkludo, ke la kaŭzo de la vulkanaj erupcioj oni devas serĉi en la radiumo. En sia laboratorio li sukcesis produkti el granito radium-gason, kiu estas pli peza, ol la hidrargo. La opinio de la scienculoj ĝis nun estis, ke radioaktivaj elementoj troviĝas nur en la supra tavolo de la tero. Sed la granito kuŝas ordinaro en la pli profunda interno de la tero. Laŭ la kalkuloj de prof. Holzmann unu milionono de unu gramo da radiumo dum centmil jaroj elradias tiom da varmo, ke la granito fluidiĝas kaj varmigas ĝis mil gradoj.

Ni vivas sub bombardado.

Ni ne ofte vidas meteorojn, kvankam ilia falado estas tre ordinara fenomeno. Oni eĉ povas diri, ke la Tero faras sian vojaĝon en konstanta pluvego de meteoroj. Laŭ la taksado de la scienculoj ĉiutage ĉirkaŭe 10-20 milionoj da meteoroj falas sur nian Teron. Sed laŭ la opinio de la

amerika astronomo d-ro Harlow Shapley tiu nombro atingas en unu tago eĉ ĝis unu miliardo. Tamen la plej granda parto de la meteoroj — je nia teliĉo — estas tre malgranda, havanta la mezurojn de polvo ĝis pizo. Tiuj korpecoj ne atingas la surtacon de la terglobo, ĉar ili disbrulas jam en la aero, pro la frotiĝo, donante al ni la belan vidaron de falanta stelo. Sufiĉe maloftaj estas tiuj pli grandaj flugantaj ŝtonoj, kiuj trafenbras la tutan aerkovrilon de la Tero kaj atingas ĝian surtacon. Sed se ne ekzistus la aero, ni vivus sub tambur-pafado, niaj domoj devus havi ŝtalan tegmenton kaj ni povus eliri nur sub la ŝirmo de dika metala ombrello. — Ĉirkaŭ la Suno cirkulas potenca meteor-svarmo kaj nia Tero en ĉiu aŭtuno trapasas ĝian orbiton. Pro tio dum la aŭtuno ni povas vidi pli multajn meteorojn. Kaj en ĉiu 33-a aŭ 34-a jaro ni trapasas la plej densan parton de la meteor-amaso. En tiaj jaroj la falado estas pli granda. Tia jaro estas ankaŭ 1932.

Verdaj musoj.

La angla Societo de Mus-Bredantoj ĵus anoncis konkurson pri bredado de verdaj musoj. Kiel oni scias, ekzistas musoj en diversaj koloroj, sed ne en verda. La societo promesas grandan premion kaj honoran pokalon al la unua persono, kiu prezentas verdan muson. Inter la kondiĉoj de la konkurso estas trovebla ankaŭ la grava punkto, ke la muso devas havi naŭran verdan koloron, ne sutiĉas verdigi iun blankan muson per verda inko.

Aera biciklo.

La greka inĝeniero Aristotelo Hatzoglou, kiu dum la mondmilito servis ĉe la brita maristaro, konstruis novan flugmaŝinon, kiu estas movata per homa torto. La nova flugaparato, nomata „anemopteron“, pezas kune kun la piloto nur 220 kilogramojn, la mekanismo produktas 8

ĉevalfortojn, la maŝino povas altiĝi ĝis 4000 metroj kaj povas dum tri horoj ŝvebi en la aero sen movado de la pedaloj. Per ĉi tiu eltrovaĵo realiĝas la sonĝo de la mitologia Ikaro, kiu flugis per algluitaj birdaj plumoj.

Nur starloko!

La angla sociologo d-ro Christopher Rolleston faris kalkulojn kun terura rezulto. Li elkalkulis, ke post 500 jaroj, se la homaro en la sama proporcio plimultiĝas, kiel nuntempe, sur la terglobo vivos 250,000 milionoj da homoj. Kaj post pluaj 500 jaroj estos tiom da homoj, ke ili trovos lokon sur la tero nur starante. Do terura sorto atendas la homaron post 1000 jaroj, sed ni esperas, ke niaj nepoj trovos la solvon kaj savon. Evidente tion celas la nuntempaj „gvidantoj“ de la homaro, fabrikante la savrimedojn en la formo de venenaj gasoj kaj aliaj geniaj buĉiloj.

4200 fotoj — dum unu sekundo.

La teknologia instituto de la usona ŝtato Massachusetts konstruis fotografan aparaton, per kiu oni povas fari dum unu sekundo 4200 fotografaĵojn. Kun la aparato oni uzas kurantan filmon kaj inter la unuopaj bildoj oni ne fermas la lenton. La bildoj estas klaraj kaj akraj.

La aĝo de la homaro.

Profesoro Elliott Smith, estro de la anatomia instituto ĉe la universitato de Londono, deklaris, ke la homaro havas la aĝon de minimume 20 milionoj da jaroj. Laŭ lia opinio nur antaŭ tiu tempo evoluiĝis la homo el iu speco de gorilo. Kontraŭ tiu longega tempo la homa civilizacio povas rerigardi al historio de nur 5000 jaroj. Proksimume 3000 jarojn antaŭ Kristo komencis la homo la unuan civilizitan profesion, la terkulturadon.

INVITO.

La publika tirado de la ESPERANTO-LOTTERIO

okazos la 30-an de Decembro p.m. je la 2-a horo en la Esperanto-Domo en Arnheim.

Ĉiu Esperantisto estas invitata ĉeesti!

La premioj estos ekspoziciitaj en la Esperanto-Domo. La gajnintoj povos tuj transpreni la premiojn, kontraŭ la redono de la loto. Tial oni portu kun si la aĉetitajn lotojn.

La listo de la gajnintaj numeroj aperos en la Januara numero de La Praktiko.


Rapidu aĉeti la lastajn lotojn!

Detaloj en la Nov. n-ro de La Praktiko, sur la 2-a paĝo.

La Loteria Komitato.



ĈIUJN MOTOROJN



liveras
plej rapide
— kaj —
plej bone
en la tuta
mondo

VAN ROSSUM'S MOTOREN

PAPENDRECHT - Nederlando

Esperanto uzata!

INFORMOJ

Tekstojn por ĉi tiu rubriko oni sendu ĉiam sur aparta papero. Oni redaktu la tekstojn kiel eble plej mallonge.

Morto. — S-ro Kazimiera Bujwid, edzino kaj kunlaborantino de profesoro D-ro O. Bujwid, prezidanto de la kongreso en Krakovo, mortis la 8-an de Oktobro. Ŝi estis fervora laborantino por la virinaj rajtoj kaj dank' al ŝi oni fondis en Polujo la unuan virinan gimnazion.

Anglujo. — En Letchworth kursojn gvidas s-ro Johano Bruckenberg el Aŭstrio.

Belgujo. — La 4-a Flandra Esperanto-Kongreso okazos dum Pentekosto de 1933 en la urbo Mechelen.

Ĉeĥoslovakio. — En Uh. Hradište kursojn gvidas s-ro Dolfa Bartošik post grand sukcesa publika prelego de s-ro A. Neuzil el Olomouc, kiun kun siaj gelemantoj prezentis lernejan instruadon de Esperanto. Ĉeestis ankaŭ la distrikta lernejo-inspektoro, kiu varme rekomendis Esperanton, kvankam antaŭe li estis kontraŭulo de nia lingvo.

Cinujo. — En Kantono la tiea Esperanto-Instituto aranĝas kursojn, kiujn gvidas s-ro Lilok.

Danujo. — En Vallekilde s-ro N. H. Aldrich gvidas kursojn. En Aarhus plurajn kursojn gvidas f-ino M. Saxl el Berlino, ankaŭ apartajn kursojn por senlaboruloj.

Estonio. — En Rakvere kursojn gvidas s-ro H. Rikand. — En Tartu plurajn kursojn gvidas la sveda s-ro K. Tunón. — En Vaimastvere komencan kaj daŭrigan kursojn gvidas f-ino H. Ilves el Tartu.

Francujo. — En Dijon kursojn gvidas s-ro M. Mathieu. — S-ro kapitano R. Léger gvidas kursojn de la militista lernejo en Les Andelys. — En Mulhouse komenciĝis tri novaj kursoj kun 71 gelemantoj. La Esp. Societo Mulhouse (38 rue des Abeilles) jam nun kolektas adresojn de personoj, kiuj volas korespondi kun tiuj novaj Esperantoj.

Germanujo. — En Berlino kursojn gvidas s-ro W. Pawelski, prez. de la Esp. Grupo de Tegel. — En Köln kursojn gvidas s-ro A. Fehr.

Latvuj. — S-ro Julio Baghy gvidas grandajn kursojn en la urboj Riga kaj Jelgava. Enlanda ekspozicio okazinta en Riga estis etika Esperanto-stando financita de s-ro J. Kalniņš.

Nederlando. — En Amsterdam s-ro L. Schoutens gvidas kursojn aranĝitan de la loka Katolika Esp. Societo. — En Heerlen s-ro A. P. A. Pennartz gvidas kursojn aranĝitan de la Laborista Esp. Societo „Ni Venkos!“. — En Roosendaal s-ro L. Kerremans gvidas kursojn, organizitan de la tiea societo „La Matenstelo“. — En Brielle s-ro M. Goossens gvidas kursojn por 20 personoj. — En Rotterdam s-ro M. de Waard gvidas du kursojn specialajn por senlaboruloj. La kursojn aranĝis la senlaborula organizacio. — S-ro S. Stuit gvidas kursojn en Wirdum (Frislando).

Norvegujo. — En la urbo Hamar, plej Esperanta urbo de Norvegujo, s-ro Gustav Johannessen aranĝis ekspozicion de Esperantaj libroj en granda fenestro de la ĉefstrato. — F-ino Maghild Norheim gvidas kursojn por 34 infanoj en Hamar. — S-ro Jens Schjerve gvidas du kursojn en Eidsvoll.

Polujo. — En Rozdzien-Szopienice (Supra Silezio) kursojn gvidas s-ro F. Mikunda. — En Borszczów la Esperantista Societo „Verda Fonto“ la 19-an de Novembro aranĝis grandan dancvesperon. Ĝi estis la unua dancvespero en Borszczów, en kiu partoprenis tri nacioj: poloj, rusoj kaj judoj. Dank' al kapitano D-ro E. Pajak, altŝatata favoranto de Esperanto, partoprenis ankaŭ multaj oficiroj. Kiel reĝinon de la Esperanto-balo oni elektis f-inon Gunjo Finkl, kiu elektis al si kiel reĝon D-on Pajak.

Rumanujo. — En Timișoara (Temesvár) la klubo de USE (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo) organizas kursojn, kiujn gvidas s-ro Julio Csapó, vicdelegito de UEA.

Svedujo. — En Karlskrona okaze de kursomenco oni aranĝis en vendeja fenestro specialan ekspozicion de Esperanta literaturo. La multaj libroj kaj imponaj afiŝoj aliris multan atenton kaj intereson. — F-ino Lidja Zamenhof finis siajn kursojn en Gävle, Skutskär kaj Strömsbro. — Post la unua kurserio, vizitita de 200 personoj, ges-roj Morariu komencis duan kurserion en Skanio kun 400 partoprenantoj. S-ro Morariu gvidas nuntempe kursojn en Lund, Trelleborg kaj Malmö. S-ino Morariu havas kursojn en Lund, Limhamn, Vellinge, Klagshamn kaj Kävlinge. En Lund okazis solena kurs-inaŭguro en la Akademia salono. Partoprenis 500 personoj, inter kiuj la rumana konsulo de Malmö kaj pluraj pedagogoj. — En Hålsjöholm s-ro T. Morariu faris prelegserion en la Teknika Lernejo pri Saksujo, Aŭstrio, Svislando kaj Rumanujo. La publikan ekzamenon ĉeestis s-ro Waldemarck rektoro de la Teknika Lernejo, inspektoro Erhard kaj adjunkto Nordlund. La kursanoj prezentis en Esperanto teatraĵeton „La hispana etiketo“. — En Höör estis solena finfesto de la kurso de s-ro Morariu, kun ĉeesto de parlamentano O. Andersson kaj la loka lerneja inspektoro.

Svislando. — En Genevo la Esp. societo „Stelo“ aranĝis kursojn kaj ĝin gvidas f-ino A. Nercessian.

Usono. — En Milwaukee post sukcesa ekspozicio la „International House“ decidis organizi Ĉemotodan kursojn, kiujn gvidas s-ro A. F. Doneis, kasisto de la Esp-Asocio de Nord-Ameriko.

LA REDAKCIO RESPONDAS

La redakcio volonte respondas je ĉiu demando. Pri aferoj, kiuj interesas la tutan publikon, ni respondas en ĉi tiu rubriko. Pri aliaj aferoj letere. Farante demandojn bonvolu aldoni respondmarkon.

S-ro B. J. P. en S. (Ned.). — 1. *Loĝi en la kampo aŭ sur la kampo*, ambaŭ formoj estas bonaj. — 2. *Diru: danĝero de infekto.* — 3. *Se aŭ kiam iu estas vundita.* Ambaŭ formoj estas bonaj, sed inter ili estas diferenco. Se esprimas kondiĉon, *kiam* esprimas tempon. — 4. *Li renkontas ĉiajn pacientojn: invalidojn, kriplulojn k.t.p.* Jes, en ĉi tiu frazo „invalidojn“ kaj „kriplulojn“ estas bonaj. Oni devas aldoni la signon de akuzativo, ĉar tiuj vortoj dependas de la verbo „renkontas“. — 5. *Murdi signifas: intence krime mortigi.* Do la vorto *murdisto* estas bona. — Ni konsilas al vi uzi la Plenan Vortaron.

S-ro L. B. en N. (Belgujo). — Ekzistas la vortaroj: *Merkurio: Nederl.-Esp. vortaro* (2.90 guld.), *Uitendijk: Esp.-Nederl. vortaro* (2.— guld.) kaj *Poŝvortaro Esp.-Ned. kaj Ned.-Esp. de Schidlof* (1.50 guld.). Mendeblaĵ per nia eldonejo.

S-ro J. D. en R. (Polujo). — Se vi ne volas riski, ke la anoncintoj ne respondu je viaj leteroj, ni rekomendas, ke vi skribu nur al tiuj, kiuj aldonas la esprimon: „certe respondos“. Krom tio estas konsilinde, ke vi publikigu vian propran anonceton.

F-ino A. J. de H. en H. (Ned.). — 1) Jes, vi estas prava. D-ro Zamenhof mem diris en la antaŭparolo al la Fundamenta Krestomatio, ke ne estas oportune ŝanĝi la esprimojn en la diversaj eldonoj, ĉar la utilo de la ŝanĝoj estas multe pli malgranda, ol la malutilo kaŭzata per la ŝanĝado. Al tiuj ŝanĝindaj, sed ne ŝanĝitaj aferoj apartenas ankaŭ la uzado de la vorto „unu“. — 2) En la libro „La faraono“ la vorto „uteno“ estas nomo de monero. La klarigo de la vorto „epatre“ troviĝas sur la 9-a paĝo. Ĝi signifas kronprincon.

S-ro M. C. en T. (Ned.). — En la vorto „fremlanda“ pro preseraro mankis la litero „d“, ĉar tia vorto en Esperanto ne ekzistas. Devas esti: *fremdlanda*.

F-ino R. J. T. en A. (Ned.). — La vorto „unueveninto“ estas ĝusta, same kiel la vorto *supreniranto*. Sed por eviti longajn kaj pezajn vortformojn, estas bona via prefero diri: la unue veninta.

S-ino A. M. G. B.-B. en R. (Ned.). — La sufikso „an“ signifas: „homo apartenanta al“. Ekz-e: *Amerikano, klubano, kristano*. La sufikso „ist“ signifas: „homo okupanta sin pri“. Ekz-e: *ŝuisto, historiisto, sportisto, spiritisto, idealisto*. Ĉar ni apartenas al Esperanto kaj ni ankaŭ okupas nin pri Esperanto, ni povas nin nomi per ambaŭ vortoj: *Esperantano kaj Esperantisto*. Estas eraro opinii, ke per „ist“ oni povas formi nur tiajn vortojn, kiuj signifas profesion, mongaĵnan okupon.

S-ro A. M. en D. (Ned.). — Adresojn de korespondemaj rusaj samideanoj vi trovas en La Praktiko. Se vi deziras havi pliajn korespondantojn, publikigu vian deziron en la rubriko „Korespondul“.

Al kelkaj. — Se vi deziras ke ni sendu la numerojn de La Praktiko rekomendite, bonvolu alpagi al la abonprezo por ĉiu numero ankoraŭ — 15 ned. guld.

S-ro F. A. en T. (Svedujo). — Via propono, ke ni represu la bildojn aperintajn en La Praktiko, sur apartaj kartoj kaj disponigu ilin al la Esperantistaj grupoj por montri ilin kiel projekciatajn lum-bildojn, estas tre bona. Ni faros tion volonte, se ni ricevos kelkajn similajn petojn.

S-ro H. J. H. en A. (Ned.). — 1) La vorto „la“ estas uzebla ne nur kun senco difinanta unu konatan objekton, sed ankaŭ en senco ĝenerala, ekz-e: *La hundo estas besto* (= ĉiu hundo estas besto). Tial ni korekte diras: *en la festotagoj kaj en la publikaj kunvenoj (en ĉiuj festotagoj kaj en ĉiuj kunvenoj)*. 2) El la letero falis 500 frankoj kaj ne „la 500 frankoj“, ĉar Mikaelo ne konis la historion de tiu mono kaj li atendis 1000 frankojn. 3) La vortoj „ĉioscia“ kaj „ĉiopova“ estas bonaj, ĉar kunmetante vortojn sufiĉas uzi la radikojn de la unua vorto, ekzemple *domposedanto, fruktmangisto* (kaj ne *domonposedanto, fruktonmanganto*). Tial estas superflue diri *ĉionscia kaj ĉionpova*.

ANONCETOJ

TARIFA: 1 vorto aŭ mallongigo 0.03 guld.

„LUDI KAJ LERNI“. Skatolo kun pluraj centoj da kartonpecoj kun la literoj de Esperanto por formi vortojn. La plej amuza kaj instrua ludilo por grupkunvenoj. Por ĝi oni benege lernas la vortofradon. Ĉiu Esp-ista societo devas ĝin posedi. Lud-regulato estas aldonita. *Prezo: — 90 ned. guld.* Mendebla ĉe R. Wartena, Diepenveensche weg 117, Deventer, Nederl. (pagebla per poŝtmandato aŭ poŝtgiro n-ro 171697), kaj ĉe La Praktiko.

Gajan Kristnaskon kaj feliĉan Novjaron deziras al la legantoj de La Praktiko: Tib. & Liz. Morariu. **LIBROJ PRI BULGARUJO.** — La *Bulgara Lando* kaj *Popolo*, kun trikolora etnografia karto, 150 paĝoj, prezo 5.— sv. fr. — *Bulgara Antologio*, elektitaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj el 40 bulgaraj verkistoj, kun portretoj, 250 paĝoj, prezo 5.— sv. fr. — Ambaŭ libroj kune menditaj nur 5.— sv. fr. antaŭpagite per bankbileto (rekom. letero) aŭ per poŝtmandato, inkl. sendkostoj kaj rekomendo. Adreso: Krestanov, str. 6. Septemvri n-ro 2, Sofia, Bulgario.

PETO. — La gesamideanoj, kiuj naskiĝis la 5-an de Aŭgusto 1905 (la unua tago de la unua kongreso), bonvolu sendi sian adreson, prefere kun fotografajo, al s-ro G. J. Boom en Nieuw-Lekkerland, Nederlando. Ni fondus „Rondon de la Unua“ (sen kotizolo).

KOLEKTANTOJ DE POSTMARKOJ! Skribu al mi kaj mi respondos. Adreso: s-ro Rich. Petersen, Sanatoriet Faksinge, Danlando.

KONKURSOJ


Legu la ĝeneralajn regulojn en la Oktobra numero!

50-a konkurso.

La festoj estas gravaj en la homa vivo, ĉar en la festaj tagoj oni multe manĝas kaj post ĉiu festo pli prosperas la kuracista metio. Laŭ la ĝenerala kutimo de la gazetoj ankaŭ La Praktiko rekomendas menuon por la kristnaska tagmanĝo, sed en formo de enigmo, por ke la peza laboro de la solvado pligrandigu la apetiton.

Nia menuo konsistas el 13 manĝaĵoj, kies nomojn vi trovas, se la malsuprajn 83 literojn vi enmetas en la kvadratojn de la figuro.

a a a a a a b b b d e e e e
e f g g g g i i i j k k k l l l
l l l m m m m n n n n n o o o
o o o o o o o o o o o o o o o
o o p p r r r r r r s s s s t t
t t t t u u



nomo de supro
manĝaĵo el ovo
parto de la porko
kreskaĵo
legomo
longa viandaĵo
amerika kreskaĵo
granda birdo
spicitaĵoj
angla kukaĵo
ronda kukaĵo
laktaĵo
suda frukto

La literoj en la dikaj kvadratoj donas gravan deziron, kiun la redakcio de La Praktiko tutkore direktas al ĉiu solvinto de la enigmo.

10 premiojn ni dislotos inter la solvintoj. Oni devas ensendi ne nur la frazon el la dikaj kvadratoj, sed ankaŭ la nomojn de la unuopaj manĝaĵoj. — Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Februaro.

Observu la ĝeneralajn konkurso-regulojn!

51-a konkurso.

El la regnestroj de Eŭropo kiu portas la plej grandan ĉapelon?

Per ĉi tiu demando ni deziras ekzameni, ĉu la legantoj de La Praktiko havas sufiĉajn konojn pri la aferoj de la mondo.

Kio koncernas la filmstelojn, la publiko tre bone konas ilin, eĉ ilian privatan vivon kaj iliajn intimajn aferojn. Sed nun ni volas vidi, ĉu nia legantaro konas ankaŭ la plej gravajn personojn, de kiuj ofte dependas la sorto de tutaj popoloj kaj regnoj.

Per la vorto „regnestro” ni komprenas: imperiestro, reĝo, reganta princo, duko, gubernatoro, respublika prezidanto, diktatoro.

Inter tiuj personoj, kiuj donas al ni la ĝustan respondon, ni dislotos 6 premiojn. Ni akceptas solvojn ĝis la fino de Februaro.

Observu la ĝeneralajn regulojn!

ATENTU! Ni rimarkas, ke multaj partoprenantoj de niaj konkursoj ne atentigas la regulojn. Ni ofte ricevas plurajn solvojn sur unu paperfolio, aŭ solvojn sen nomo kaj adreso de la solvinto. Ĉe ĉiu konkurso ni atentigas ĉiam pri la ĝeneralaj reguloj kaj ni insiste rekomendas plenumi la regulojn, ĉar la juĝanta komitato ne konsideras la nekonformajn solvojn. — La redakcio.

REZULTOJ DE MALNOVAJ KONKURSOJ

35-a konkurso. Je nia enigma demando ni ricevis la plej diversajn respondojn kaj ĉi tie ni publikigas ilin: *Mono. La enspirata aero. Pluvo. Suno. La morto. Forno. Aŭtomobilo. Apetito. Bona manĝaĵo. Edzino. Bopatrino. Barbo. Malfuneco. Biero. Prunto. Ebrieco. Vagonaro. Kuracisto. Tramo. Laboro. Bona trinkaĵo. Malsato. La paco. La pasio. La vero. La sulkoj sur la vizaĝo. Piedpilko. La morgaŭa tago. Tempo. Gasto. La solvoj de la konkurso en La Praktiko.*

Nun ni povas malkaŝi, ke antaŭ la publikigo de la konkurso ni fiksas kiel ĝustan solvon la respondo: *La apetito*. Ĉi tiun respondon donis nur 4 personoj kiuj sekve ricevas premiojn. Tiamaniere restas 3 liberaj premioj, kiujn la juĝa komitato decidis doni al pluaj tri personoj, kiuj sendis akcepteblajn respondojn. Jen la sep gajnintoj: 1. F-ino E. Stray en Oslo. — 2. S-ro L. Martensen en Hamburgo. — 3. S-ro A. Sommer en Hagen (Germ.). — 4. S-ro F. Bergquist en Lärje (Svedujo). — 5. Gefratoj Fichtner en Radebeul (Germ.). — 6. S-ro P. Creemers en Obbicht (Nederl.). — 7. F-ino C. M. Scheffelaar en Hago.

36-a konkurso. La granda nombro de la alvenintaj solvoj montras, ke estis agrabla tasko okupi sin pri la solvado de ĉi tiu „bonĝusta” enigmo. Kaj efektive kelkaj solvintoj skribis al ni, ke la konkurso kaŭzis al ili grandan apetiton. Ni tute ne miras pri tio, ĉar ili trovis la jenajn belajn vortojn: *Migdalo, Dekilo, Orango, Rubuso, Kukumo, Melono, Tomato, Abrikoto, Ananaso, Frago, Kukurbo, Persiko, Granato, Figo, Pruno, Pomo, Kokoso, Ribo, Avelo, Greso, Citrono, Piro, Cerizo, Vinbero, Frambo, Moruso, Banano*. Sekve la grava kaj tuta admono, kaŝita en la dikajn kvadratojn, sonas jene: Manĝu multan frukton por esti ĉiam sana.

Inter la solvoj ni trovis kelkajn, kiuj enhavas erarojn, ekzemple: „manĝi”, „multaj fruktoj”, „kaj estu sana”. Tiuj solvoj, kompreneble, ne povis partopreni en la konkurso. La eraro pruvas al ni, ke la enigmo estis iom malfacila. La 12 premiojn ni dislotis kaj la jenaj personoj ricevis ilin: S-ro K. Adamek en Zablato (Ĉeĥoslov.). — S-ro A. Blid en Nynäshamn (Svedujo). — F-ino R. L. Bouman en Lunteren (Nederl.). — F-ino E. Carsten en Stokholmo. — F-ino H. Ezopówna en Bydgoszcz (Polujo). — F-ino M. Faulhaber en Potsdam (Germ.). — S-ino M. S. Hoestra en Hago. — S-ro A. Kala en Rakvere (Estonio). — F-ino E. Lörtscher en Herisau (Svisl.). — S-ro H. Mähren en Berlin-Tegel. — F-ino H. Rietmann en Herisau (Svisl.). — S-ro M. K. Schreyer en Chelmo (Polujo).

37-a konkurso. La Komerca Societo „DELICAAT” en Bergen-op-Zoom informis nian redakcion, ke ĝi ricevis entute 35 solvojn de la enigmo en ĉi tiu konkurso, sed el ili 3 solvoj estis eraraj. La surprize malgranda nombro de la solvoj kaj ankaŭ kelkaj ricevitaj plendoj komprenigas al ni, ke la enigmo estis tro malfacila. Efektive, en la enigmo estis vortoj, kiujn oni nur malfacile povas trovi. Des pli granda estas do la merito de tiuj, kiuj bone solvis ĝin. La kaŝitaj vortoj estis la jenaj: *Elefanto, Ameriko, Maco, Pantalono, Urano, Gorgo, Januaro, Kameleono, Bukureŝto, Abelo, Nomado, Trapezo, Pesto, Sabato, Nesto, Koncerto, Violono, Girafo, Turkiso, Erinaco, Silenti, Brasiko*. — La grava frazo estas: La manĝanto de Sanovite estas forta, sana kaj gracia.

La Komerca Societo „DELICAAT” decidis sendi al ĉiu ensendinto de bona solvo unu paketon da biskvito Sanovite. Ni esperas, ke ĉi tiu gajninto manĝos la bongustajn biskvitojn kun bona apetito kaj kun multa utilo al la sano. Jen la nomoj de la gajnintoj: S-ro K. Adamek en Zablato (Ĉeĥoslov.). — S-ro F. Bergquist en Lärje (Svedujo). — F-ino G. Binder en Parsch ap. Salzburg (Aŭstrio). — S-ro Boucon en Anney (Franc.). — F-ino R. L. Bouman en Lunteren (Ned.). — S-ro E. W. v. d. Burgh en Leiden (Ned.). — S-ro A. J. J. Fiet en Blijham (Ned.). — F-ino A. M. Gobiet en Papendrecht (Ned.). — S-ro W. Gombault en Leeuwarden (Ned.). — F-ino M. C. J. v. d. Graaf en Dordrecht (Ned.). — S-ro E. Gubler en Zürich (Svisl.). — S-ino M. S. Hoestra-Nieuwenhuys en Hago. — S-ro J. B. v. Hoof en Valkenswaard (Ned.). — S-ro F. Hoppenbrouwers en Valkenswaard (Ned.). — F-ino M. K. E. Jayet en Morges (Svisl.). — S-ro W. Kaaijk en Utrecht (Ned.). — S-ro H. Kaiser en Köln-Ehrenfeld (Germ.). — S-ro S. Karamančev en Nevrokop (Bulgarujo). — S-ro C. G. Kat en Amsterdamo. — F-ino F. Lörtscher en Herisau (Svisl.). — S-ro O. Mennicke en Wolfen ap. Bitterfeld (Germ.). — S-ro O. Olsson en Lund (Svedujo). — F-ino M. Rettke en Potsdam (Germ.). — F-ino H. Rietmann en Herisau (Svisl.). — F-ino M. Scheffelaar en Hago. — S-ro K. Schlumpf en Oerlikon (Svisl.). — S-ro B. B. Skaffell en Reykjavik (Islando). — S-ino H. Soeteman-Rübe en Hago. — F-ino H. Tachauer en Würzburg (Germ.). — F-ino L. Vechtmann en Hago. — S-ro J. C. v. d. Vlerk en Voorburg (Ned.). — F-ino S. M. Wijers en Hago.

Kupono
la
50-a
konkurso

Kupono
por la
51-a
konkurso

Ĉi tiujn kuponojn detranĉu kaj sendu ilin kun viaj solvoj al la redakcio.

PREMIOJ AL LA KOLEKTANTOJ DE ABONOJ

- I.
a) Tiu, kiu kolektas 7 tutjarajn abonojn, ricevas LA PRAKTIKON senpage dum unu jaro.
b) Tiu, kiu kolektas 7 duonjarajn abonojn, ricevas LA PRAKTIKON senpage dum duonjaro.

II.
Tiu persono, kiu varbas kaj sendas al ni unu tutjaran abonon (aŭ du duonjarajn abonojn), rajtas elekti unu premion el la sekvanta listo.

Tiu, kiu kolektas du tutjarajn (aŭ 4 duonjarajn) abonojn, rajtas elekti du premiojn. Kaj tiel plu.

Tiu, kiu kolektas 7 tutjarajn (aŭ 14 duonjarajn) abonojn, rajtas elekti 7 premiojn, aŭ ricevi LA PRAKTIKON.

La kolektanto devas sendi la mendon kun la mono rekte al la eldonejo de LA PRAKTIKO kaj aldoni: „Mi elektas la premio(j)n N-ro(j):”

La listo de la premioj:

- N-ro 1. La libro „KARLO” de D-ro E. Privat.
2. La libro „GAJAJ HOROJ” (spritajoj, anekdotoj, vortludoj).
3. La libro „DIBUK” (fama hebrea teatraĵo).
4. La libro „ANEKDOTARO” de D-ro L. Dreher.
5. KONVERSACIA LITERATURO, N-oj 1-4.
6. KONV. LITERATURO, N-oj 5-8 kaj kartona ujo.
7. KONVERSACIA VORTARO, KONVERSACIA GAZE-TO, LA ENIGMOJ kaj GVIDLIBRO DE ARNHEM.
8. Kvin Esperanto-ŝlosiloj (libretoj) en diversaj lingvoj.
9. La NOVA TESTAMENTO (eld. de Brita Biblia Soc.).
10. La PSALMARO (trad. de Zamenhof).
11. La libro: „Teksto el la Biblio en 630 diversaj lingvoj”.
12. Carolfi: Katolika preĝlibreto.
13. Esperanta Kantokolekto (kun muziknotoj).
14. Esperanto-Kantareto por katolikoj (de frato W. van Zon).
15. 25 poŝtkartoj kun la bildo de la Esperanto-Domo.
16. 10 foto-poŝtkartoj pri la Esperanto-Domo kaj Arnhem.
17. 5 portretoj de D-ro Zamenhof.
18. „Esperantuja Kanto” kaj „Al la Esperanto-Domo” (du kan-
toj kun muziknotoj).
19. Granda verda stelo kun la vortoj „ESPERANTO PARO-
LATA” (kun truoj, ringo aŭ piedo, laŭ elekto).
20. Kvin simplaj Esperantistaj insignoj (verda stelo kun pinglo,
broĉo aŭ butono, laŭ elekto).

Ĉi tie detranĉu!

Mendilo de koresponda anonceto

Unufoja enskribo kostas -45 ned. guld. (= 3 poŝtajn respond-
kuponojn). La abonantoj de LA PRAKTIKO povas unufoje en la jaro
senpage anonci.

Bonvolu skribi tre klare, se eble, per skribmaŝino. Se vi skribas per
mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Nomo:

Profesio:

Aĝo (laŭvole, sed konsilinde):

Adreso:

leteroj

Deziras korespondi per poŝtkartoj kun la landoj:
il. p-kartoj

pri la temoj:

Specialaj deziroj:

Mi promesas respondi almenaŭ unufoje al ĉiu, kiu al
mi skribas.

La monon mi sendas samtempe per

Dato:

(subskribo)

ABONILO

Bonvolu sendi la kolektitajn abonojn sur ĉi tiu papero. Skribu tre klare, se
eble, per skribmaŝino. Se vi skribas per mano, bonvolu imiti presitajn literojn.

Abonprezo: }

Maniero de } turnu kaj legu: 
pago: }

FAVORO POR NOVAJ ABONANTOJ: Tiu, kiu
abonas La Praktikon por la jaro 1933, pagante la plenan
abonprezon, povas ricevi la jarkolekton de 1932 por
la duono de la ordinara prezo!

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	1	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	2	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	3	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	4	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	5	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	6	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	7	Abonkomenco:
S-ro: S-ino: F-ino: Adreso:	SENPAĜA	Abonkomenco:

La sumon de mi sendas samtempe
per

Mi elektas la premio(j)n:

Dato:

(subskribo)

Ĉi tie detranĉu!

Ĉi tie bonvolu detranĉi!

Vigla, kuraĝa, interesa por katolikoj kaj nekatolikoj

LA JUNA BATALANTO

ORGANO DE LA INTERNACIA KATOLIKA JUNULARA KAJ
PACA MOVADO.

Eldonata de MONDJUNULARO KATOLIKA (MOKA) nur en
Esperanto.

Protektanto: Mro D-ro G. K. Grafo MAJLATH,
Episkopo de Transilvanio, Alba Julia, Rumanujo.

Redaktoro: D-ro WILHELM SOLZBACHER, Köln, Germanujo.

APERAS DUMONATE.

Jen, kion oni diras pri La Juna Batalanto:

7-a jaro.

Episkopo:

Mi esperas, ke ankaŭ la nova serio de La Juna Batalanto efikos
tiom da bono kiel la antaŭaj jarkolektoj.

Mons. D-ro G. K. Grafo Majlath, episkopo de Transilvanio,
Rumanujo.

Katolika ĉiutaga ĵurnalo en Ameriko:

La Juna Batalanto devus esti interesa por ĉiu katoliko interesita
pri la internacivivo.

The Daily American Tribune, Dubuque, Iowa, Usono.

Nekatolika pacifista gvidanto en Svedujo:

Mi ne estas katoliko, sed mi volas vin danki el tuta koro pro la
ĉefartikolo en La Juna Batalanto. Vortojn de tia valoro mi neniam
aŭdis en mia lando al ĵurnaloj en la protestantaj eklezioj.

Cefredaktoro Werner Oedegard, Hudiksvall, Svedujo.

La plej konata Esperanto-propagandisto kaj instruisto:

Kun plezuro mi ĉie rekomendas La Junan Batalanton.

Pastro Andreo Cseh en Hago, Nederlando.

Neŭtrala Esperanto-gazeto:

En ĝi blovas la vigla spirito de nuntempaj junulmovadoj.

„Heroldo de Esperanto“, Köln.

Jara abonprezo: 2.— RM (2.50 sv. fr.). Oni pagas al:

Eldonejo LA JUNA BATALANTO,

Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germanujo.

Postĉekaj kontoj: Bruxelles 3313.51 (Jean Winandy, Dison), Köln
480.37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück), Luzern VII. 2030
(Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug), Strasbourg 8180
(P. J. A. Muffang, Bourg-la-Reine), Wien D 12.017 (Kath. Kreuz-
bündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer, Wien).

Ni estas ankaŭ la ĉefa vendejo de katolika Esperanto-literaturo!
Postulu prezaron!

Inter la 40 volumoj eldonitaj de S.A.T.

(Sennacieca Asocio Tutmonda)
(Sidejo: 23, rue Boyer, Paris 20)

troviĝas jenaj interesaj kaj de ĉiu esperantisto
legindaj verkoj:

Jack London: La Fera Kalkanumo
(368 pĝ.) Prezo broŝ. 2.50, bind. 3.50 mk.g.

Volter (Voltaire): Kandid (Can-
dide), 162 pĝ. 1.50, bind. 3.— „

Bogdanov, Ruĝa Stelo, 168 pĝ. 1.50, „

Vortoj de K-do Lanti, 192 pĝ. 1.80, „

Petro (lernolibro laŭ rekta metodo
ilustrita), 116 pĝ. 1.—, „

Unua Legolibro, ilustrita, 104 pĝ. 1.—, „

Malgranda Terbiblio (Szereni),
31 kartoj k skemoj 1.20, „

Kropotkin, Etiko, 240 pĝ. 1.20, „

Lenin, Stato k Revolucio, 160 pĝ. 0.80, „

E. Lanti, Naciismo, 124 pĝ. 1.20, „

E. Lanti, La Laborista Esperant-
ismo, 40 pĝ. 0.40, „

Proletaria Kantaro (74 kantoj el
22 lingvoj kun muziknotoj)

180 pĝ. 2.—, „

kaj multaj aliaj eldonaĵoj, pri kiuj vi petu kompletan
katalogon! Oni atentu la malaltajn prezojn de niaj libroj!

Mendu ĉu Administracio de SAT, Kolmstr. 1,
Leipzig O. 27. (Germ.).

Abonprezo de LA PRAKTIKO:

por unu jaro: 2.50 ned. guld.

„ duona „ 1.25 „ „

(La abona jaro komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro.)

La abonon kaj monon sendu al:

Internacia Cseh-Instituto de Esperanto,
Oostduinlaan 32, DEN HAAG, Nederlando.

Vi povas sendi la monon en diversaj manieroj:

- 1) Enpagu la monon al la postĉekkontoj de la Internacia Cseh-
Instituto de Esperanto, en la jenaj landoj (post la n-roj de la
postĉekkontoj estas la sumo sendota por unujara abono):

Aŭstrio: Wien A-156.933 (7.— sil.)

Ĉeĥoslovakio: Praha 500.362 (33 ĉ. kr.)

Danujo: Kopenhago 34941 (5.— kronoj)

Germanujo: Berlin 129527 (4.— g. mk.)

Hungarujo: Budapeŝto 13201 (5.— pengoj)

Jugoslavio: Zagreb 41345 (60.— dinaroj)

Latvuj: Riga 4870 (4.50 latoj)

Nederlando: Den Haag 162626 (2.50 guld.)

Polujo: Warszawa 190.203 (8.— zlotoj)

Svedujo: Stockholm 74.126 (5.— kronoj)

Svislando: Bern III. 6761 (5.— frankoj)

- 2) Sendu papermonon en registrita letero.
- 3) Per postmandato. Ne forgesu aldoni la celon de la pago, sur la
kupono de la mandato.
- 4) Per UEA-kuponoj, kies valoron ni kalkulas: 1.— svisa franko =
0.50 ned. guld.
- 5) Per poŝtaj respondkuponoj. Unu kuponon ni akceptas en valoro de
0.15 ned. guld.
- 6) Per poŝtmarkoj de la jenaj landoj (post la nomo de la lando
estas la valoro de la sendotaj poŝtmarkoj por unujara abono).

Aŭstrio (7 sil.), Belujo (35 fr.), Britujo (5 sil.), Belgio (140
levoj), Ĉeĥoslov. (33 ĉ.kr.), Danujo (5 kr.), Estonio (3.50 kr.),
Francujo (25 fr.), Germanujo (4 markoj), Hispanujo (10 pes.), Hun-
garujo (5 pengoj), Italujo (20 lir.), Japanujo (3 jenoj), Jugoslavio
(60 din.), Latvujo (4.50 latoj), Norvegiujo (5 kr.), Polujo (8 zlotoj),
Portugalujo (25 esk.), Rumanujo (150 leoj), Svedujo (5 kr.), Svisujo
(5 fr.), Usono (1 dol.).

La poŝtmarkojn oni povas sendi en simpla letero kun nefravidebla
koverto.

Ĉiuj Esperantaj libroj

estas aĉeteblaj ĉe la eldon-
ejo de LA PRAKTIKO.

Oni povas pagi per niaj postĉekkontoj
(la numerojn vidu supre!)
kaj per poŝtmarkoj. La pagotan valoron oni
kalkulu laŭ la taga monkurzo ĉe la bankoj.

ELDONAĴOJ DE SOCIETO SANKTA MIĤAELO (S. S. M.)

La Universala Reĝeco de Kristo, enciklikla letero, trad.	afrankite
el latina J. Schmidt	fr. fr. 1.50
Parvuli, de Bessières, trad. el franca Ramo	1.50
Kiel mortis la unuaj Kristanoj, de Kraszewski, trad. Em. Robert	1.50
Nova Afriko, de Ch. Monens, trad. de Floriano	1.50
La Origino de la Religio, ilustrita, originala verko de Jos. Schmidt	3.—
Klari, de Myriam Catalany, trad. Em. Robert	8.—
Fabiola, de Kardinalo Wiseman, trad. Ramo	35.—
Gvidfolio pri Lourdes	1.—

Mendu pagante al F-ino M. Larroche, 55, rue de
Vaugirard, Paris-6. — Poŝta ĉekkonto: Paris 738-67.



Prezo de enskribo. — Unufoja enskribo kostas — 45 ned. guld. (= 3 respondkuponojn). Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj diverslandaj.
Favore al niaj abonantoj. — Ĉiu abonanto de LA PRAKTIKO havas la rajton enpresi sian adreson senpage unufoje en la jaro.

GRAVA ADMONO! — Ĉiu anoncinto havas la devon respondi almenaŭ unufoje je ĉiu ricevita korespondado, kiu estas konforma al la deziro esprimita en la anonceto. La nomojn de la nerespondantoj ni publikigos en la gazeto. — La redakcio.

SLOSILO DE LA MALLONGIGOJ:

s-ro = sinjoro	interŝ. = interŝangi	bfl. = la poŝtmarkon
s-ino = sinjorino	L = letero	gluu sur la bildan
f-ino = fraŭlino	PK = poŝtkarto	flankon
dez. = deziras	PI = poŝtkarto ilustrita	k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj
koresp. = korespondi	PM = poŝtmarko	p.ĉ.t. = pri ĉiu temo

ADRESOJ.

BULGARUJO

Sviŝtov. — S-ro Nikolaj Petrov, gimnazia lernanto, Aksakovska 39. — PI, PM k.ĉ.l., p.ĉ.t.
 Gara-Nova-Zagora. — S-ro Aleksander Gerasimov, 25-jara fervojoficisto, fraŭlo. — Dez. kor. kun samprofesiaj el la tuta mondo.

DANUJO

Silkeborg. — Multaj partoprenintoj de la Ĉe-metoda kurso de f-ino M. Saxl dez. kor. k.ĉ.l. Adreso: Esperanto-Klubo, „Kornmod“, Fredensgade 9.

ESTONIO

Tartu. — F-ino Helene Gern, instruistino, Tööstuse 9-9. — L, PK, PI k.ĉ.l., p.ĉ.t.
 Tartu. — Esperantistaj gimnazianoj dez. kor. per L kaj PK p.ĉ.t., precipe kun fraŭlinoj eksterlandaj. Adreso: Esperantistaj gimnazianoj, Riia t. 121.
 Viljandi. — S-ro Siegfried Torokoff, 28-jara komizo, Tallinna 17-1. — L, PI k.ĉ.l.
 Viljandi. — S-ro Johannes Viira, 25-jara komizo, Pärna 4. — PI bfl.

FRANCUJO

Dijon (Côte d'Or). — F-ino Yvonne Girard, 30-jara oficistino, 50 rue Berblsey. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t., precipe kun fraŭloj. Respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.
 Dijon (Côte d'Or). — S-ro René Godchoŭt, komercisto, 3 Boulevard de Broesses. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Respondos almenaŭ unufoje al ĉiu.
 Dunkerque. — S-ro Michel Merck, 31-jara tabakvendisto, 6 Place du Palais de Justice. — L, PI bfl. k.ĉ.l. pri kutimoj. Ankaŭ pri legoscienco kun notario- aŭ leĝostudentoj.
 Limoges (H.V.). — S-ro Roger Blanchard, presisto, 14 rue Anatole France. — L, PI bfl., PM, k.ĉ.l., nepre respondos.
 Mulhouse-Dornach (Haut-Rhin). — S-ro Roberto Strasser, 4 rue du Tunnel. — Volonte ricevas kaj interŝanĝus praktikajn konsilojn pri propagando por Esp. k.ĉ.l. Dez. koresp. kun komencantoj loĝantaj en Francujo, por helpi al ilia progresado en Esp.
 Paris 7. — S-ro Marcel Chaleix, 56 rue de Babylone. — Interŝ. kun fotoamatoroj, k.ĉ.l.

GERMANUJO

Berlin, S. 14. — S-ro Max Mähler, 29-jara oficisto, Dresdener Strasse 71. — L kun Italujo kaj Japanujo, p.ĉ.t., precipe kun sinjorinoj.

HUNGARIJO

Budapest, I. — S-ro D-ro Gustav Dolozselek, 27-jara juristo, Attila-ucca 95. — L, PI p.ĉ.t., kun Japanujo, Hindujo, Ĉinujo.
 Budapest, X. — F-ino Anna Kubinyi, 20-jara instruistino, Beleznay-utca 28. — L kun ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos!
 Káloz (dep. Fejér). — S-ro Jozefo Jofeiu, 48-jara agronomo. — Dez. kor. kun la anoj de la III. ordeno de Sankta Francisko kaj kun aliaj pri religio, k.ĉ.l. Interŝ. PM (laŭ Michel). Certe respondos.
 Rákosszentmihály. — S-ro Teodoro Kovács, fervojoficisto, redaktoro de etnografia revuo. — Dez. kor. kun ural-altajaj popoloj pri la parenceco. Kun aliaj pri turismo, stenografio, lingvoj, fremdultrafiko.

JAPANUJO

Hiroŝima. — S-ro Nobuo Oda, Jokogaŭa-matĉi 3. — 20-jara; dez. kor. precipe pri kinematografio. Serĉas junajn geamikojn en Nederlando.

LATVUJO

Riga. — F-ino Adele Foerst, 27-jara instruistino, Grobinas i. 2-9. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t.
 Riga. — S-ro Julij Krumins, bibliotekisto, Vidzemes ŝoseja 5. — L k.ĉ.l. pri organizo de la biblioteka muzeo kaj pri ĉio, kio rilatas al biblioteko, literaturo, arto.
 Riga. — S-ro J. Peterpauls, 25-jara ĝardenisto, Anninmulzas iela 121.a. — Dez. kor. per belaj PI (fot. bild.), precipe kun sudlandaj kamaradoj.

NEDERLANDO

Arcen. — S-ro Jan Gooren, 20-jara pentristo, Rijksweg. — PK, PI, k.ĉ.l.
 Arcen. — S-ro Albert Peters, 19-jara poŝtovicisto, Maasstraat 200. — L, PI kun fraŭlinoj el ĉ.l.
 Arcen. — S-ro G. H. van Soest, instruisto, Lingsforterweg 125. — Dez. kor. k.ĉ.l., precipe pri instruado kaj vetero.
 Deventer. — S-ro Allard Möller, 18-jara lernanto, Groote Pot 17. — L, PI, PM, k.ĉ.l. precipe kun Hungarujo, Polujo, Jugoslavio, Hispanujo kaj Japanujo. Respondos ĉiam kaj tuj.
 Dordrecht. — S-ro C. Bax, 34-jara policisto, Weeskinderendijk 51. F. — PI k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.
 Gemert (Noord-Brabant). — S-ro Frans P. Bouw, Handel D 56.
 Gemert (Noord-Brabant). — S-ro A. J. S. Derks, instruisto, Mortel.
 Gemert (Noord-Brabant). — S-ro Frans v. d. Wiel, Oude straat.
 Nieuw-Lekkerland. — Por kelkaj 12-15-jaraj geknaboj mi serĉas samaĝajn gekorespondantojn. Kor. prefere per PI. Adreso: s-ro G. J. Boom, Nieuw-Lekkerland.
 Texel. — F-ino G. Rab, pli maljuna Esperantistino, dez. kor. kun gesamideanoj en ĉ.l., p.ĉ.t.
 Voorburg. — F-ino D. van Deyl, Prins Albertlaan 10. — 27-jara; dez. kor. kun angloj kaj germanoj.

NORVEGUJO

Hamar. — S-ro Per Hagen, 28-jara kontoristo. — Dez. kor. k.ĉ.l., p.ĉ.t. Ne kun skandinavo.
 Trondheim. — S-ino Marit Georgsen, instruistino, Innherredsvei 10. — L, PI, k.ĉ.l.
 Trondheim. — F-ino Andrea Klinge, sekretario de la Esperantista Grupo, serĉas korespondantojn por la membroj de la Grupo.
 Trondheim. — S-ro Eilif Hellen Schei, 24-jara kontoristo, Elgeseter gate 37. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Kolektas ankaŭ PM.

POLUJO

Zarki-st. Myszków (Pow. Zawierciański). — S-ro Salo Mrówka. — Dez. kor. k.ĉ.l.

PORTUGALUJO

Setubal. — S-ro Lino de Andrade, Avenida Todí 464. — Dez. kor. Respondos al ĉiu.

SOVET-UNIO

Saratov. — S-ro N. A. Insarskij, Poŝtamt, Poŝtkesto 53. — L, PI, PK, rekompenas per glumarkoj, rusaj maloftaj poŝtmarkoj, papermonoj.
 Tambov. — S-ro Nik. M. Medousov, 30-jara oficisto, fraŭlo, Kronstadtskaja 35. — L, interŝ. Esp-ajojn. Kolektas insignojn, katalogojn, librojn, poŝtkartojn. Rekompenas per Esp-aj libroj, ilustr. gazetoj en rusa, germ. kaj angla lingvoj eldonataj en Sovet-Unio, il. pkartoj kaj pmarkoj.

SVEDUJO

Biursås. — Esperanta studrondo, dez. kor. per L kaj PI k.ĉ.l.
 Hällevik. — S-ro Henry Ysner, instruisto. — L, PI, k.ĉ.l., p.ĉ.t. Ankaŭ 26 ĝelernantoj en popola lernejo, 13-14-jaraj, k.ĉ.l., L, PI.
 Torskörs. — S-ro Fritiof Ahnfeldt, 44-jara popollerneja instruisto, dez. kor. k.ĉ.l. pri paca kaj abstinencia movadoj, religio kaj instruado.
 Värnamo. — S-ro Heimer Schill, 27-jara aŭtomobil-mekanikisto, Mosslegatan 20. — L, PI bfl., k.ĉ.l., p.ĉ.t. Certe respondos.

Unu el la plej interesaj kaj plej valoraj
 libroj de la mondliteraturo:

Emeriko Madách:

LA TRAGEDIO DE LA HOMO

ĉefverko de la hungara literaturo, en majstra
 traduko de D-ro Kolomano Kalocsay.

Ĉi tiu admirata verko en majstraj scenoj kondukas la leganton tra la historio de la homaro, de la mondkreo tra la diversaj kulturŝtupoj ĝis la mondpereo. La libron ornamas 20 beleĝaj tutpaĝaj desegnaĵoj de la mondfama pentristo M. Zichy.

Prezo: 2.— ned. guld.

Mendebila ĉe la eldonejo de La Praktiko.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.



ESPERANTISTA KRISTNASKA LIBERTEMPO

en la Esperanto-Domo en Arn-
hem, 24. Dec. 1932 — 1. Jan. 1933

Ĉiu Esperantisto estas tutkore
invitata.

PROGRAMO :

24. Dec. Vespere: Kunveno ĉirkaŭ la Esperantista Kristnaskarbo, Kan-
toj, Alparoloj, Malfermo de la Esperantista Krist-
naska Libertempo.
25. Dec. Matene: Diservoj katolika kaj protestanta kun Esperanto-
lingvaj predikoj.
Posttagmeze: Komuna promeno.
Vespere je la 8.00 h.: Parolado de Andreo Cseh pri sia
hejmlando: *Transilvanio, la orienta Svislando, ĝia
kultura kaj socia vivo.* — Post la parolado intima
kunesto.
26. Dec. Libertempo kun promenoj. Vespere je la 8-a h. parolado de
f-ino M. Saxl el Berlino, kursgvidantino en Danujo.
- 27—29. Dec. **TUTLANDA KONKURSO DE LA NEDERLANDA
ESPERANTISTARO**, laŭ aparta programo.
29. Dec. Vespere je la 8.00 h.: **ESPERANTISTA FESTO** (*Festparo-
lado de s-ro P. Heilker; publikigo de la rezulto
de la konkursoj; solena disdono de la premioj; sol-
dancoj de f-ino Th. Simonis: La Espero, La sonĝo
de l'infano, Florvalso. Komunaj kantoj. Muziko.*)
30. Dec. Posttagmeze je la 2.00 h.: **PUBLIKA TIRADO DE LA LOTE-
RIO** de la Esperanto-Domo. Vespere je la 8-a h.:
Dancvespero.
31. Dec. Libertempo kun promenoj. Vespere je la 8-a h.: **Parolado
de frato Vigberto van Zon** el Reusel pri: „*Kiu
estas Esperantisto?*“
1. Jan. Diservo. Libertempo kun promenoj.

Kotizo ne estas. — La partoprenantoj povos loĝi en la
Esperanto-Domo. Prezo de plena pensio por unu tago
(ĉambro kaj la tri manĝoj): 4.25 guld. (aparta ĉambro),
3.75 guld. (du ĝis kvar pers. en unu ĉambro) kaj 3.25 guld.
(kvin aŭ pli da pers. en unu ĉambro). Servmono: 10 %. —
Aliĝojn oni sendu al la Int. Cseh-Instituto de Esp., Hago.
— Aliĝante oni mendu por si la ĉambbron.

LA KONKURSOJ

DE LA NEDERLANDA ESPERANTISTARO
(*Lingva Olimpiado*)

okazos en la Esperanto-Domo en Arnhem dum la 27-29 Dec.
laŭ la informoj publikigitaj en la Novembra numero
de La Praktiko (lasta paĝo).

Detalan programon je peto volonte sendas la Int.
Cseh-Instituto de Esp. en Hago.

Membroj de la Juĝa Komitato: s-ro H. J. Bulthuis, Andreo Cseh, s-ro
J. B. B. Dufrenne, s-ro P. Heilker (del. de la Ekz. Komitato), s-ro
J. R. G. Isbrücker, s-ino Julia Isbrücker, f-ino Chr. Keiser, f-ino H.
de Lange (del. de LEEN), s-ro H. C. van Leeuwen (del. de NKEU),
s-ro A. L. Moreau, s-ro J. R. Peters (del. de la Centra Esp. Prop.
Kom.), s-ro S. Pragano, f-ino M. Saxl kaj Frato Vigberto van Zon
(del. de NK).

Premioj donacis ĝis la 1-a de Dec.: LEEN, Centra Esp. Prop.
Komit., Int. Cseh-Inst., Nederl. Teritorio de UEA, „Merkurio“ en
Rotterdam, U.A.S.E. en Amsterdam, Frisa Esp. Rondo, s-ro J. Telling,
Utrecht Esp. Rondo, „Stelo de l'Maro“ en Nijmegen, „Fine Ĝi Venkos“
en Hago, P.E.N.I. en Bergen-op-Zoom, Sekcio de LEEN en Zeist,
s-ro A. L. Moreau, U.P.E. en Arnhem kaj s-ro I. Gabriëls.

En la konkursoj partopreni rajtas ĉiu Esp-isto. Kotizo por ĉiuj
konkursoj: 2.— guld. Oni ne estas devigata partopreni en ĉiuj 12
partoj de la konkursaro, sed oni povas libere elekti. Speciala sinpreparo
ne estas necesa.

Aliĝojn oni sendu al la Int. Cseh-Instituto de Esp. en Hago.

Sole la granda

ENCIKLOPEDI DE ESPERANTO

kostos al vi

23.— sv. fr.

Tamen, tiun libron kun

5

aliaj libroj, entute kun paĝonombro

2000

kaj en la valoro de

55.— fr. sv.

donas al vi por la jara kotizo en 1933,

13.50

svisaj frankoj la

Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj (AL)

se vi aliĝas al ĝi antaŭ 1 februaro 1933

Tial

rapide mendu detalan senpagan prospekton de ĝia administr

Literatura Mondo

Budapest, IX, Mester ucca 53, V. 7, Hungarujo

La gajaj verkoj
de

**RAYMOND
SCHWARTZ:**



Verdkata Testamento,
amuza verslibro 1.— ned.

Prozo Ridetanta,
noveloj kaj rakontoj 1.40 „

Anni kaj Montmartre,
romano 1.20 „

La Stranga Butiko
humorprovizo dum la krizo 1.20 „

Mendeblaj ĉe ĉiuj Esp-aj librejoj
kaj ĉe

**LA PRAKTIKO, Oostduinlaan
DEN HAAG**

Aldono 10 % por sendkostoj.

Oni povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

